

# El verkoj de E. Lanti

**Eŭgeno Lanti**



**1922-1947**

**Exported from Wikisource on 08/03/20**

***EL  
VERKOJ  
DE  
E. LANTI***

**EL VERKOJ DE E. LANTI**  
(Unua volumo)

* <u><b>FOR LA NEŬTRALISMON!</b></u> (1922) .....	1
* <u><b>LA LABORISTA ESPERANTISMO</b></u> (1928) .....	27
* <u><b>ABSOLUTISMO</b></u> (parolado, 1934) .	55
* <u><b>HEREZULO – HEREZAĴO</b></u> .....	
– <u><b>Gvidpunktoj de "Herezulo"</b></u> (1935/36) .....	71
– <u><b>Herezaĵo</b></u> (1934) .....	79

– <a href="#">Polemiko pri Sennaciismo</a> (1937) ..	97
* <a href="#">ADAMAĴOJ</a> .....	
– <a href="#">Nobla sennaciulo</a> (1921) .....	111
– <a href="#">Teoremoj</a> (1934) .....	113
– <a href="#">Meti Esperanton serve al la Proletaro</a> (1935) .....	115
– <a href="#">La signifo de la esperantista laborista movado kaj la rolo de S.A.T.</a> (parolado, 1933) .....	119
– <a href="#">K-do Lanti ĉe la Neŭtraluloj</a> (1939) .....	129
– <a href="#">Raciigado</a> (1937) .....	138
– <a href="#">Sennaciismo</a> (1948/49) .....	145
– <a href="#">El la "Notlibreto de Alfesto"</a> (1939) .....	152
– <a href="#">Ni preparu nin al neeviteblo</a> (1938) .....	155
– <a href="#">Kaprompe</a> (1949) .....	157
– <a href="#">Memore al pioniro</a> (1955) .....	159
– <a href="#">Ĉiu plenumu sian devon</a> (1937) ....	161
– <a href="#">Mi ĝojas esti esperantisto</a> (1935) ...	164

(Dua volumo)

* <a href="#"><u>Tri semajnojn en Rusio</u></a> (1922) .....	1
* <a href="#"><u>Ĉu la Unua de Majo havas ankoraŭ sian dekomencajn signifon?</u></a> (1933) .	67
* <a href="#"><u>Epiloge</u></a> (1933) .....	75
* <a href="#"><u>Principoj de unueco</u></a> (1935) .....	91
* <a href="#"><u>Diskutejo. Ni bezonas marksistan papon</u></a> (1939) .....	101
* <a href="#"><u>Pri la morto de Bubu</u></a> (1939) .....	107
* <a href="#"><u>Tro Plena Gramatiko kaj ne sufiĉe Plena Vortaro</u></a> (1939) .....	109
* <a href="#"><u>Letero al K-do Lanti</u></a> (Waringhien) (1939) .....	124
* <a href="#"><u>Responde al K-do G. Varingjen</u></a> (1939) .....	129

(Tria volumo)

<a href="#"><u>For la idismon!</u></a> (25. Okt. 1937) .....	9
<a href="#"><u>Ĉu idismo?</u></a> (respondo de Karlo Minor, 25 Nov. 1937) .....	10
<a href="#"><u>Quandoque bonus dormitat Homerus</u></a> (25. Jan. 1938) .....	12
<a href="#"><u>Ne ankoraŭ ekzistas mondlingvo</u></a> (25. Dec. 1937) .....	13

<a href="#"><u>Vi do eksci...</u></a> (25. Nov. 1938) .....	15
<a href="#"><u>Vivu la neŭtralismo!</u></a> (verŝajne 1936) .	16
<a href="#"><u>El la notlibreto de Alfesto</u></a> (25. Apr. 1939) .....	19
<a href="#"><u>Ĉu prave?... </u></a> (25. Maj. 1939) .....	24
<a href="#"><u>El la notlibreto de Alfesto</u></a> (25. Aŭg. 1939) .....	27
<a href="#"><u>Aforismoj</u></a> (Jun. 1946) .....	29
<a href="#"><u>Amare</u></a> (Aŭg. 1946) .....	31
<a href="#"><u>For la dogmoj!... el SAT</u></a> (Aŭg. 1946) .....	31
<a href="#"><u>Oni povas bedaŭri esti esperantisto</u></a> (Sept. 1939) .....	33
<a href="#"><u>Trompo, nebulo, ekbrileto</u></a> (Apr. 1940) .....	37
<a href="#"><u>Viva lingvo artefarita: Esperanto</u></a> (29. Apr. 1940) .....	40
<a href="#"><u>El letero al kdo L.</u></a> (26. Apr. 1939) ....	51
<a href="#"><u>El letero al parizaj SAT-anoj</u></a> (5. Feb. 1940) .....	52
<a href="#"><u>El letero al kdo D.</u></a> (15. Sep. 1940) ...	53
<a href="#"><u>El la notlibro de Li-Ŝi</u></a> (29. Maj. 1941) .....	55
<a href="#"><u>Parolado ĉe radiostacio X.E.W.I.</u></a> (31. Maj. 1941) .....	56
<a href="#"><u>Tria parolado ĉe radiostacio X.E.M.I.</u></a> (9. Aŭg. 1941) .....	59

<a href="#"><u>El la notlibro de Alfesto</u></a> (13. Sep. 1941) .....	62
<a href="#"><u>Monologe</u></a> (12. Nov. 1941) .....	64
<a href="#"><u>Mielpipre</u></a> (Nov. 1941) .....	65
<a href="#"><u>Metafizike</u></a> (Nov. 1941) .....	66
<a href="#"><u>Pri Japanio</u></a> (15. Dec. 1941) .....	67
<a href="#"><u>Parolas fama virino ĉina</u></a> (14. Maj. 1942) .....	71
<a href="#"><u>Letero de F. Azorin</u></a> (1. Nov. 1942) ..	73
<a href="#"><u>Respondo de E. Lanti</u></a> (5. Nov. 1942) .....	74
<a href="#"><u>Ĉu lingyumi?... </u></a> (24. Feb. 1944) .....	81
<a href="#"><u>La sinsugesto faras "miraklojn"</u></a> (komp. de Lanti) .....	83
<a href="#"><u>Letero al E., Sydney</u></a> (11. Maj. 1944)	88
<a href="#"><u>El letero al kdo D.</u></a> (23. Jul. 1944) .....	92
<a href="#"><u>Letero al J. A., Buenos-Aires</u></a> (25. Dec. 1944) .....	93
<a href="#"><u>Nacia honoro</u></a> (Maj. 1945) .....	95
<a href="#"><u>Pravis Hitler...!?</u></a> (Jul. 1945) .....	97
<a href="#"><u>K-do Lanti rakontas pri Meksikio</u></a> (Sep. 1946) .....	99
<a href="#"><u>Kiel naskiĝis kaj disvolviĝis la faŝismo?</u></a> (Sep. 1946) .....	103
<a href="#"><u>Letero de k-do Lanti</u></a> (13. Okt. 1945) .....	104
<a href="#"><u>Letero de Herezulo</u></a> (5. Maj. 1946) ...	108

<a href="#"><u>Letero al k-do G. Waringhien</u></a> (14. Maj. 1946) .....	110
<a href="#"><u>Budaismo (Nuraj_ideoj)</u></a> , (komp. de Lanti) .....	114
<a href="#"><u>Mi fariĝas imperialismema...</u></a> (26. Sep. 1946) .....	117
<a href="#"><u>Komento de k-do Valo</u></a> (Sep. 1946) ..	119
<a href="#"><u>Nia kamarado E. Lanti</u></a> .....	120


 La teksto estas [publika havaĵo](#) (*public domain*). Detaloj pri la licenco troviĝas ĉe la paĝo de la aŭtoro: [Eŭgeno Lanti](#).

# For la Neŭtralismon!

[Atentigo pri la unua eldono](#)

[Atentigo pri la dua eldono](#)

[Antaŭparolo al la tria eldono](#)

[I. For la Neŭtralismon!](#)

[II. Por-esperanta organizo](#)

[III. Per-esperanta organizo](#)

[Difinoj](#)

 La teksto estas [publika havaĵo](#) (*public domain*). Detaloj pri la licenco troviĝas  
ĉe la paĝo de la aŭtoro: [Eŭgeno Lanti](#).



## ATENTIGO PRI LA UNUA ELDONO

Ĉi tiu studeto pri la organizado de nia esperanta movado estas verkita jam de unu jaro. Ĝi aperis en la n-roj 3, 4-5 kaj 6 de "Esperantista Laboristo".

De post tiu tempo **Sennacieca Asocio Tutmonda** stariĝis definitive, kaj la solvo de la organiza problemo kuŝas nun en la disvolviĝo de nia Asocio. Sed tiu disvolviĝo devas okazi laŭ ĝusta direkto, ne hazarde kaj ĥaose. Ni jam spertis, ke multaj Kamaradoj ne havas ankoraŭ tre klaran ideon pri nia celo. La kvazaŭ religia atmosfero en kiu kreskis la esperantista movado, nebuligas ofte la klaskonscion de fervoraj prolet-esperantistoj. Aliaj, impresite de la ĝisnuna organizmaniero laŭ naciaj sekcioj, emas refali en ian Internacion, similan al la politikaj, nesamlingvanaj organizoj.

Ĉar la studo de **Sennaciulo**<sup>[1]</sup> interdividiĝas en tri sinsekvaj n-roj de la gazeto, ni opiniis utila kunigi la tuton en broŝureto, por ke ĉiuj interesiĝantoj povu pli bone prezenti al si la aferon, agi laŭ direkto montrata aŭ rebati la tezon, se ili juĝas ĝin malprava.

Post apenaŭ unujara ekzistado, SAT jam enkalkulas pli ol 900 membrojn. Estas nepre necese, ke ĉiu el ili konu la vojon sekvidan; estas plie necese, ke ni konigu ĝin al la varbotoj.

Tial la Centra Komitato de SAT decidis la eldonon de la jena broŝuro.

**Februaro 1922**

## **Piednotoj**

1. [↑](#) La unua eldono aperis sub tiu pseŭdonimo.

## ATENTIGO PRI LA DUA ELDONO

Kiam, komence de l' jaro 1921, mi publikigis ĉi tiun studaĵeton per la gazeto "Esperantista Laboristo", mi ja ne dubis pri la praveco de la principoj tien metitaj. Sed, verdire, mi ne antaŭvidis tiel rapidan kreskadon de nia movado laŭ la direkto montrita.

SAT enkalkulas nun pli ol 3500 membrojn. Ĝi posedas ampleksan revuon, kiun legas almenaŭ 7 aŭ 8000 personoj. Artikoloj el tiu revuo estas represitaj en kelkcentoj da plej diverslingvaj gazetoj. Eldonkooperativo eldonis jam kelke da indaj kaj gravaj verkoj. SAT okazigis tri kongresojn, pri kiuj trumpetis plej diversaj gazetoj el ĉiuj landoj. Nia movado eĉ altiris la atenton de registaroj, tiagrade, ke ĉe la Pola Sejmo (parlamento) okazis interpelacio de deputito (s-ro Pankratz) pri la persekutoj, kiuj trafis polajn SAT-anojn.

[[tab]]Multe da aliaj faktoj mi povus citi, por pruvi, ke ni ekiris ĝustan vojon, ke ni entreprenis fruktodonan laboron, kaj ke la esperantistoj, kiuj jam aliĝis al nia organizo, povas ne domaĝi siajn monon kaj penadon.

\*

\*

\*

Tamen hodiaŭ mi preskaŭ bedaŭras pri tiu rapida kreskado. Mi supozas, ke ne ĉiuj aliĝintoj plene konscias pri la celo kaj taskoj de nia entrepreno.

Antaŭ du jaroj mi kriis al la prolet-esperantistoj: **For la neŭtralismon!** Tiu krio estas ankoraŭ nuntempe oportuna. Ne ĉiuj aŭdis ĝin kaj komprenis ties signifon. En niaj rondoj troviĝas Kamaradoj, kiuj iom honte, duonkaŝe daŭrigas mone kaj age subteni la t.n. neŭtralan esperantan movadon.

Tial la reeldono de ĉi tiu broŝuro respondas al certa bezono. Necesas insiste montri, ke la neŭtralismo de la burĝaj esperantistoj estas nur ŝajna; nur masko, per kiu ili kaŝas hipokrite sian klasan profiton. La sperto montras ĉiutage la pravecon de tiu aserto. Sufiĉas altiri pri tio la atenton de la prolet-esperantistoj, por ke ili mem proprokule vidu la faktojn. Mi tamen citu la sintenadon de la esperanta gazetaro, kiu per silento bojkotas nianmovadon.

Tiaj neŭtraluloj estas ja simple hipokrituloj. Ili ĉiam celis kapti kaj direkti la movadon profite al siaj klaso, negoco aŭ eklezio. Ili okulumis al la Laboristaro nur kun la espero moligi, nebuligi ĝian klaskonscion. Kaj iagrade ili sukcesis.

Sed nun, vidante, ke esperanto disvastiĝas en revoluciaj rondoj; ke la laborist-esperantistoj memstare organiziĝas, la "neŭtraluloj" ĉagrenas kaj silentas pri tiu por ili bedaŭrinda fakto. Ekzistas eĉ malnovaj esperantistoj, kiuj fariĝis malamikoj de la lingvo internacia, konstatinte, ke la "kara lingvo" estas uzata por kontraŭbatali la "karan patrimon", la "sanktajn kredojn", per kiuj oni sukcesis tiom longe teni la proletaron en servuteco.

Kaj tio estas logika – antaŭvidita...

\*

\*       \*

En ĉi tiu broŝureto estas ankaŭ pritraktita la demando pri organizado de la revolucia esperanta movado. La ĝisnuna organizsistemo **inter-nacia** estas malaprobata kaj montrata kiel necelkonforma por mondlingvanoj.

Estas vere, ke la **sennacieca** organizbazo estas akceptata de granda nombro da Kamaradoj. Sed oni eraros, opiniante, ke ĉiu emo reveni al la **inter-nacia** organizprincipo estas sufokita; oni trompus sin volante kredi, ke ĉiuj SAT-anoj estas pretaj plenkonsente kaj plenkonscie laboradi laŭ tiu direktivo. Estas ankoraŭ necese kontraŭbatali ĉian provon reiri al la forlasita vojo, ĉian danĝeron refali en la rutinon.

Senindulge ni kontraŭbatalu la imitaĉan spiriton. Ni lernu tiri ĉiajn konsekvencojn el la mondlingveco. Ni ne imitaĉu la aliajn "Internaciojn" el malsamlingvanoj. Ni kreu novon, penante ĉiuokaze, ĉiurimede fordetrui la malnovon!...

Por tia tasko ĉi tiu modesta broŝuro povas ankoraŭ utili.

\*

\*       \*

Hodiaŭ, se mi farus ĉi tiun studeton, ĉu mi verkus ĝin samforme, samamplekse? Kompreneble, ne. Mi farus certe kelkajn ŝanĝetojn kaj aldonojn. Punktoj nur ektuŝitaj indas

esti pli detale pritraktataj. Ekzemple mi pli vaste priparolus la punkton, kie estas nur aludite pri la edukrolo de esperanta organizo tutmonda.

Ĉi tiu studeto devas do esti konsiderata kiel skizo utila por gvidi kaj subteni pli densan kaj ampleksan pritrakton. La legantoj mem tiru ĉiujn konsekvencojn de la ideoj ĉi tie skizitaj. Mi ne dubas, ke ili alvenos al tiu mia konkludo:

For la verdaĉan neŭtralismon esperantan!...

For la patriotismon kaj naciecon!...

Homeciĝu la homo sur la sennaciigita Tero!...

E. LANTI.

**Aŭguste 1925.**

## ANTAŬPAROLO AL LA TRIA ELDONO

Mi certe ne supozis, ke ĉi tiu serio da artikoloj, aperintaj en "Esperantista Laboristo" antaŭ ses jaroj, estos havintaj tri eldonojn en broŝura formo. Ĉi fakto montras, ke la agitvorto: **For la neŭtralismon!** restas ankoraŭ aktuala, ke ĉi tiu modesta verketo respondas al la bezono ekzistanta en la esperantistaj laboristaj rondoj.

Tri punktoj karakterizas la enhavon de ĉi tiu broŝuro:

1-e Neceso por la laborista esperantistaro apartigi sian movadon de la t.n. neŭtrala;

2-e Neceso tuj uzadi praktike la lingvon;

3-e Neceso en nia organizsistemo tiri ĉiujn logikajn konsekvencojn el nia mondlingveco.

Pri la unua kaj dua punktoj preskaŭ ĉiuj klaskonsciaj esperantistoj konscias.

Rilate la trian punkton, restas ankoraŭ kelkaj necedemaj kontraŭuloj. Kvankam ili neniam povis pravigi la efektive nepravigeblan tezon, ke samlingvanoj devas imiti la ne samlingvanojn en ilia organizformo, tamen niaj "internacianoj" daŭrigas revii pri starigo de ruĝ-verda internacio.

Tio ne estas miriga. Tiuj Kamaradoj estas ĉefe okupataj per la propagando de esperanto; ili sekve kutimas agadi preskaŭ nur laŭ la nacia skalo kaj sekve tute nature emas

opinii, ke la kunigo de naciaj asocioj en iun internacion, plej bone solvus la problemon pri la organizado de l' tutmonda esperantista movado.

Sed la Kamaradoj, kiuj precipe okupiĝas pri la praktika aplikado de esperanto, aŭ kiuj bone komprenas la gravecon de tia aplikado, pli klare vidas, ke la ĝusta solvo ne kuŝas en la simpla, rutina imitado de la ne-samlingvanoj.

Necesas tamen diri, ke neniam mi opiniis, ke **nuntempe** la naciaj esperantaj asocioj estas nenecesaj. Sed oni ankaŭ povas jam antaŭvidi la tempon, kiam nia lingvo estos tiom larĝe kaj ĉiufake **aplikata**, ke ne plu necesos speciala aparato, t.e. nacilingvaj asocioj, por ĝin propagandi. La pli kaj pli ampleksa aplikado de esperanto sufiĉos por ke ĝi mem disvastiĝu en la amasoj.

Tial venos la tempo, kiam la plej obstinaj rutinemuloj devos ankaŭ konsenti pri la tria punkto el la enhavo de ĉi tiu broŝuro.

E. LANTI.

**Aprile 1928.**



# I

## FOR LA NEŬTRALISMON!

**Direktivo.** – Kiu havas esploreman, sendogmegan spiriton, tiu senĉese konsideras la faktojn en ilia rilato kun la medio, la epoko, la cirkonstancoj kaj la senĉesa evoluado, – mi preskaŭ dirus kun ilia estontpoveco. Plie, la esploranto devas observi kvazaŭ li estus ekstere de ĉio kaj samtempe ne forgesi, ke li ankau iel estas aganto en la naskigado de la fenomenoj.

Laŭ tiu spirito mi intencas trastudi la demandon pri organizado de la esperanta movado en revoluciemaj medioj, en la postmilita, kriza, klasbatala periodo nuna. Mi ne pretendas alporti tute pretigitajn verojn. Se nur mi sukcesos vekti la atenton kaj intereson de la Kamaradoj ĉiulandaj pri tiu problemo, mi konsideros, ke mia peno ne estis sen rezulto.

**Nur rimedo.** – La vivo estas batalado. Tiuj venkas kiuj konkorde, discipline, entuziasme militas laŭ plano funde studata kaj kiel eble plej simpla.

Ni estas sennacianoj, almenaŭ interaciistoj, nepre kontraŭkapitalistoj, mondlingvanoj, esperantistoj.

Tial ke ni estas sennacianoj, ni propagandas mondlingvon. Ĉar ni opinias, ke la esperanta movado estas nun la plej taŭga forto por rapide triumfigi la ideon pri **Universala Lingvo**, ni propagandas esperanton. Ĝi estas por ni bezona ilo por trafi

nian idealon. Esperanto ne estas la celo de nia agado, sed **nur rimedo** por atingi nian celon.

Se fi-komercistoj, militistoj, ĝendarmoj, juĝistoj, ekzekutistoj lernas kaj uzas esperanton, tio ne signifas, ke nia idealo baldaŭ realiĝos.

Por konvinkiĝi pri la praveco de tiu aserto, oni legu jenon, ĉerpitan el "Espero Katolika" (Januara n-ro, 1921). Temas pri la 7-a kongreso de la katolika esperantistaro:

"Dum tiu kongreso en Graz, oni devos fondi fortegan internacian armeon kontraŭ la potencoj de blinda renverso, kontraŭ la materialisma bolŝevismo, la danĝera anarkismo, la kontraŭ-eklezia agado de la framasonaro, ktp..."

Tiel la katolikaro jam uzas esperanton por kontraŭstari nian agadon, por malhelpi nian liberiĝon.

Kiel alian pruvon, ke esperanto estas nur ilo, ne povas esti alio ol rimedo por bonaj aŭ malbonaj celoj mi aldiru:

Dum la milito, la germana registaro uzis esperanton por sia eksterlanda propagando. En Paris, la komitato "Por Francio per Esperanto" ricevis monon de la franca registaro por kontraŭagadi la germanan propagandon. Sekve esperanto estis uzata de registaroj por iliaj krimaj, hontindaj celoj.

Jen pruvite, ke internacia lingvo **ne povas esti per si mem** liberigilo; ĝi estas **tia nur en la manoj de liberigantoj**.

**Burĝeca atmosfero.** – Aliflanke, oni povas rimarki, ke la esperanta neŭtralismo nebuligas la vidon al klaskonscio. Kontakte kun la burĝoj la esperantistaj revolucianoj tendencas al dandismo, al emo pri nomkonigado kaj aliaj burĝecoj. Estas vere amuze – aŭ plorinde – konstati, ke la t.n.

laboristaj<sup>[1]</sup> grupoj neniam forgesas, en raportoj senditaj al la redakcioj de esperantaj ĵurnaloj, meti la nomojn de la prezidanto, subprezidanto, kasisto, subkasisto, ktp., ktp.

Kredeble en la koro de ĉiu "laboristo" dorme kuŝas burĝa spirito.

Pro ĉiuj tiuj ĉi supre parolitaj motivoj estas nepre necese enŝovi en nia esperanta propagando sanan spiriton. Ni zorgu, ke la movado por universala lingvo ne estu putrigota de la burĝecaj miasmoj en kiuj nun ĝi kreskas.

La sperto jam montris, ke la plej belaj inventaĵoj, kiam ili estas en la manoj de la kapitalanoj, anstataŭ helpi alla liberigo de l' Homaro utilas al ĝia malfeliĉo. Sufiĉas nur citi unu ekzemplon: kiam la aviadiloj konkeris la ĉielon, multaj naivuloj diris, ke tiu grava progreso forstrekos la landlimojn. Nu, kion ni vidis dum la mondmilito? Tiujn mirindajn flugmaŝinojn la militistoj uzis por dissemi mortigilojn super prosperaj urboj. Infanoj, maljunuloj, malsanuloj estis mortigataj per la bomboj faligataj de la belaj aparatoj, inventitaj por malaperigi la landlimojn!

Ni do ĉesu esti naivuloj. Esperanto malhelpos la militon! Ne, tute ne, se ĝi estas uzata de la militokazigantoj. Por ke esperanto estu bonfara ni ĝin metu en la manojn de la bonfarantoj.

Neniam ni malatentu pri la malbonfareco de la fiburĝaro kapitalana. Senĉese ni orientadu nian agadon cele al la renversiĝo de tiu potenco. Ni organiziĝu konforme al tiu neforgesinda direktivo.

**Homaranismo.** – Zamenhof mem komprenis, ke lingvo

helpa ne sufiĉas por konduki la mondon al Paco. Tial li parolis pri "interna ideo" de esperanto, pri "homaranismo".

Kio estas tiu doktrino? Nur elpenŝaĵo de bonkora viro, de religia idealisto liberkreda:

"La homaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religiaro, donas al li la eblon eviti ĝian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia-religiaj principoj kaj komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco".

Mankis al la aŭtoro de esperanto klara koncepto pri senĉesa interbatalado ekzistanta, pli-malpli akre, inter la socialaj klasoj. Li ne vidis, ke la militkaŭzoj kuŝas en la principoj mem, sur kiuj estas bazitaj la interhomaj rilatoj.

Tamen lia celo esence similis la nian. Li deziris unuigi la homojn en "grandan rondon familian". Sed toleremo pri religio, raso aŭ nacio, kaj ebleco interkompreniĝi ne sufiĉas por forigi malfratecon kaj estigi justecon. Kaj kie ne estas **Justeco**, tie latente kuŝas milito.

La homaranismo Zamenhofa povos kreski nur en socialisma mastrumado.

Por liberiĝi kaj paciĝi la homaro bezonas renversi ĉiujn barojn inter la homoj.

Neebleco interkompreniĝi estas unu el la baroj. Esperanto estas **bezona** sed ne **sufiĉa** rimedo por liberigi la homojn. Ni jam vidis, ke ĝi eĉ povas malutili al ni en la servo de sklavigantoj. Konsekvence ni helpu meti la ilon nur en la manojn de niaj amikoj. – Deduktiĝas el tio, ke kontraŭkapitalistoj logike ne povas kunlaboradi kun iuj ajn

esperantistoj.

Komence tiu kunlaborado povis esti utila. Tiam, temis ja pruvi, ke artefarita lingvo povas interkomrenigi la homojn; temis triumfi la **ideon mem** pri lingvo helpa.

Sed jam farita estas la pruvo; ŝanĝiĝis la situacio; sekve nia agadmaniero ankaŭ devas ŝanĝiĝi.

Nune, kunagado estas logike akceptinda nur inter samcelanoj. Socialistoj, sindikatistoj, komunistoj, anarkistoj, unuvorte ĉiuj revolucianoj<sup>[2]</sup> povas, devas kuniĝi por pli efike trudi la alprenon de esperanto al la revoluciano.

**Akceptebla kunlaborado.** – Ĉu tamen niaj kontraŭuloj ne povas utili al ni, je la lingva vidpunkto? Ĉu ne estus danĝere rifuzi ĉiun interrilaton kun ili? Ĉu ni, ekzemple, devas havi apartan Esperantan Akademion!?!...

Eĉ kiam samlingve oni parolas, por sin interkompreni estas necese ne kunmiksi ĉiujn demandojn.

Kiam revolucianoj laboras, gvidate de iu ajn teknikisto, ĉu ili kunlaboras laŭ la senco, kiun pli supre mi donis al la nedezirinda kunlaborado? Kiam niaj rusaj Kamaradoj utiligas la teknikkapablecon de iuj caraj generaloj, ĉu ili kunlaboras kun la carismo? Ĉiutaĝe ni uzas monon. Ĉu ankaŭ pro tio ni kunlaboras kun la financistoj?

Nia interkomprenigilo devas esti kiel eble plej perfekta. Ĉu ne estus stulte malatenti la konsilojn de la perfektigantoj? La lingvistoj estas niaj teknikistoj. Ni ne kunlaboras kun ili, kiam ni obeas iliajn konsilojn.

Sur tiu kampo plena neŭtralismo estas ebla, pli ĝuste, nepre necesa. Ne ekzistas scienco katolika aŭ komunista;

ekzistas **Scienco**. Kiel klaso, la burĝaro posedas sciencan, klercon. Kiam proleto sukcesas kleriĝi, li kvazaŭ ŝtelas la scion de la burĝa klaso. Ĉiuj, kiel eble plej ni ŝtelu ja burĝaron!... Estas tute saĝe, ke neklera laboristo lernu esperanton ĉe kurso de klera kontraŭulo; estus sendanĝere, ke revoluciulo ĉeestu esperantan kurson, faratan de policano. La scio akirita ĉe policano povos utili por kontraŭagadi la malbonfaron de la polico. Sed estus vere tro stulte helpi la propagandon de esperanto ĉe policanoj, ĉe iuj ajn el niaj kontraŭuloj.

Tamen jen kio okazas, kiam naive kaj senpripense oni propagandas laŭ neŭtralisma metodo.

For la neŭtralismon!

## Piednotoj

1. ↑ La strikrompantoj ankaŭ estas laboristoj. Tia titolo signifas nenion krom konfuzon.
2. ↑ Vidu la difinon de la vorto **revolucio** sur paĝo 21.

## II POR-ESPERANTA ORGANIZADO

**Varbado.** – En la antaŭa ĉapitro mi pruvis, ke konsekvencaj revolucianoj ne povas konsideri la poresperantan propagandon kiel celon; ke logike nur **samcelanoj** povas kunlaboradi kune. Restas nun esplorende, kia estas la plej trafa maniero por nin organizi.

Firme konvinkite, ke lingvo universala estas nepre necesa por atingi nian celon, ni devas varbi al esperanto niajn samcelanojn. Por tiu varbado, ni bezonas nacilingve presitajn propagandilojn kaj lernilojn. Estas do necese grupiĝi loka por organizi kursojn, regione eĉ nacie<sup>[1]</sup>, por havigi al ni bonkondiĉe la varban materialon necesan.

Gazeto en nacia lingvo povas ankaŭ esti konsiderata kiel necesa varbilo tie, kie ne estas eble aperigi notojn aŭ artikolojn en neesperantaj ĵurnaloj. Ĉiel oni devas tamen klopodadi, por ke ĉiuj laboristaj gazetoj pritraktu la temon pri lingvo internacia, samkiel tio jam okazas pri kooperativismo, feminismo aŭ sporto.

Sed por sukcese klopodadi estas ankaŭ necese, ke ni havu sintenadon konsekvencajn rilate al la interklasa batalado. Ĉe redakcia komitato de revolucia gazeto, ĉu dece ni povas glori pri sukcesa kongreso de esperanto, honore prezidita de reĝo, aŭ de alia moŝtaĉo, kaj benita de la papo?! Ne, ĝi restus

ridinda. Pro tio, ke la ĝisnuna esperanta movado estis prilaborata en burĝaj medioj estas tiom pli necese nin montri tre nekompromisemaj. Ni devas nin organizi tiel, ke iel ajn oni ne povos riproĉi al ni pri eksterklasa, kvazaŭ perfida agado.

**La sinceruloj helpos nin.** – Meze de la t.n. burĝaj esperantistoj, se troviĝos personoj sufiĉe sinceraj por ne atenti pri la profito de sia klaso, ili komprenos tion kaj helpos nin por plirapidigi la triumfon de esperanto. Estas ja de multaj konsentite, ke la Internaciistaro estas la plej bona grundo por semi la ideon pri lingvo internacia. Se sinceraj neŭtraluloj ne helpos, ni rajtos demandi ilin: "Kion vi opinias pri terkulturisto havanta du kampojn, unu ne- kaj la alia tre fruktodona, kaj kiu tamen prisemas prefere la unuan?" Ili devos konsenti, ke tiu terkulturisto estas ĉu stultulo, ĉu havas nekonesindajn motivojn por tiel agi.

La situacio de la neŭtralaj esperantistoj rilate la propagandon tute similas tiun de la supre parolita terkulturisto. Se ili ne helpos, ni rajtos diri: "Vi estas stultuloj aŭ hipokrituloj, sed tre certe ne sinceraj esperantistoj".

Grupiĝinte loke, nacie aŭ samlingve kaj sin arminte per bonaj, trafaj<sup>[2]</sup> propagandiloj, la varbistoj povos sukcese almiliti la indiferentecon de la revolucionaro pri esperanto. Klopodante ĉe la gvidantoj, ili estos aŭskultataj, ĉar ili parolos je la nomo de organizo.

**Rilate al la oficialaj rondoj.** – Mi liveris jam sufiĉe da motivoj por montri la netrafecon de la neŭtrala propagandmaniero kaj la nepran necesecon de laŭpartia



organizado. Sed estas ankaŭ aliaj pli konvinkaj.

Jam en multaj urboj la estraro estas ĉu socialista, ĉu komunista. Povos okazi – jam okazis – ke subvencioj estus voĉdonataj por la esperanta propagando. Se ne ekzistas laborista organizo, la mono estos donacata al burĝa societo, kiu ĝin fuŝuzos por propagandi ĉe policistoj, komercistoj aŭ aliaj subtenantoj de l' kapitalismo. Estas do nia devo zorge klopodadi por ke ĉiu monhelpo estu enkasigota de niaj organizoj<sup>[3]</sup>.

Se tion ni ne faros, ni montros bedaŭrindan nekapablecon por labori al nia liberiĝo.

Kiam esperanto sukcesas en burĝaj rondoj, mi kompreneble ĝojas. Konvinkita mi estas, ke universala lingvo entenas econ revoluciigan. Samkiel cetere ĉio scienca: Internaciismo estus ja nur revo se ne ekzistus fervojoj, telegrafo, aviadiloj ktp. Vole nevole, la scienculoj laboras por tutmonda revolucio. Sed ĉu necesas longe pripensadi por konkludi el tio, ke sciencaj rimedoj estas ju pli revoluciigaj, des pli ili estas en la manoj de konsciaj revoluciuloj. Nia poresperanta agado estu do inspirita de tiu evidenta vero. Ni dediĉu nian tutan energion al propagando ĉe niaj klasaj organizoj.

La komercistoj propagandu en komercistaj rondoj, la katolikoj en katolikaj medioj, ktp. – kaj la revoluciuloj en revoluciemaj rondoj! Tiel nia varba agado plej rapide sukcesigos esperanton.

Sed se ni estas laŭklase organizitaj, la monsumoj voĉdonataj de komunumoj aŭ de parlamentoj devas esti

disdonataj inter ĉiuj esperantaj organizoj proporcie je la nombro de la membroj. Tiel la neŭtraluloj ne povos misuzi la monon laŭ sia bontrovo, kiel jam ofte okazis.

## Piednotoj

1. ↑ Estus pli ĝuste diri: laŭ la komuna nacia lingvo parolata. Ekzemple, Belgoj, Francoj kaj Svisoj havos profiton grupiĝi kune por eldoni grandkvante franclingvajn propagandilojn.
2. ↑ Eĉ la lernolibroj devas esti redaktataj laŭ revoluciema spirito. La ekzemploj de la ekzercaro devas montri nian celon.
3. ↑ La fakto, ke la urbestroj de Lyon kaj Göteborg subvenciis SAT-kongresojn, montras la pravecon de tiu vidpunkto. (Rimarko al la 3-a eldono.)

### III

## PER-ESPERANTA ORGANIZADO

**Esperanto tuj utilu.** – Mondlingva movado bazita nur sur naciaj organizoj estas kvazaŭ unukrura, ne ekvilibreca kaj kondamnita je pereco.

La sperto montras, ke estas pli facile varbi iun al esperanto, ol fari, ke la varbita iĝu vera praktikanto de la lingvo. Kaj kiam oni ne praktikas, la intereso pri la afero baldaŭ forperdiĝas. Milionoj da lernolibroj estas disvenditaj; milionoj da personoj eklernis la lingvon. Tamen, malgraŭ tio, oni povas diri, ke la rezulto akirita dum multjara propagando ne respondas al la foruzitaj penoj de la propagandistoj. Malgranda estas la nombro de ellernintoj kaj praktikantoj.

Tiu nekontentiga konstato devenas el tio, ke oni ne sufiĉe prizorgis la praktikan flankon de la afero. Mi tute ne pretendas, ke nenio estis farita tiudirekte, sed nur insiste diras, ke oni devas kiel eble plej klopodadi por igi la lingvon tuj utila. En nia organizota movado ni do estu senĉese inspirataj de tia zorgo.

**Kial utiligi la lingvon?** – Ni ne bezonas helpan interkomprenigilon por interparoli kun niaj samlandanoj. Por utile praktiki esperanton estas do necese transiri la landlimojn.

Ĉar ni estas idealistoj, celantaj al tutmonda paco, al regno

de l' justeco sur la tero, ni devas kiel eble plej ofte interriliti kun niaj ĉiulandaj samidealanoj. Pere de nia komuna lingvo devas estiĝi spirita trafluado super ĉiuj ŝtatlimoj. Konstanta interrilitado kreskigos en nia koro supernacian senton. Ĝi estos kvazaŭ kontraŭveneno por la finacieca edukado, kiun la ŝtato trudas al ni. Ĝi estos ia spirita higieno kontraŭ la naciecaj miasmoj, kiujn ni senĉese enspiras meze de la ŝovinisma atmosfero, kreita de la registaroj. Uzante kiel eble plej ofte artefaritan lingvon, ni enkarnigos en ni ecojn taŭgajn por igi nin veraj mondĉivitanoj. Ni ne povas tro taksi la gravecon de tiu fakto. Tie kuŝas la esenca revoluciigeo de esperanto. Senĉese interrilitante kun niaj ĉiulandaj Kamaradoj ni povos pro tio prave fieri, ke ni estas la plej konsekvencaj el la t.n. internaciistoj.

**Kiel utiligi la lingvon?** – Por ke la Kamaradoj povu profite interrilitiĝi estas necese, ke ili estu grupiĝintaj en iu asocio, kies centra organo kolektos kaj eldonos la adresojn kaj ebligos ĉiuspecajn servojn: korespondado, dokumentado, kongresoj, vojaĝoj, eldono de gazeto, de trafe bona literaturo ktp.

Se ni supozas, ke la esperantistoj estas jam grupiĝintaj en nacilingvajn por-esperantajn asociojn, tuj estiĝas ĉe la spirito la penso pri kunligo de tiuj grupiĝoj en iun "Internacion". La rutino estas granda potenco, kiun oni ĉiam devas kontraŭbatali, eĉ ĉe si mem.

Estas vere, ke ĝis nun ĉiuj "internacioj" stariĝis sur naciaj asocioj. Unue tion trudis al ili la nesamlingveco de la membroj; due tiuj naciaj asocioj havas saman taskon: batali kontraŭ la politika kaj ekonomia fortoj de siaj respektivaj

registaroj; dum la por-esperantaj asocioj ne havas la saman taskon, kiel la per-esperanta. La unuaj celas per nacia lingvo varbi por esperanto; la dua celas ebligi la uzadon de nia lingvo laŭ tutmonda skalo.

Estus tute netrafe kompari la politikajn organizojn kun la esperantaj.

Ni ne estas malhelpataj de la lingvaj baroj; ni ne havas similan taskon, kiel tiujn de la "Internacioj". Se do ni imitus la ĝisnunan organizmanieron, ni kvazaŭ similus al homo, havanta aŭtomobilon, kiun li trenigas per ĉevalo.

Nia per-esperanta organizo povas logike kaj celkonforme esti nur supernacia, **sennacieca**.



Niaj legantoj bonvolu atente pririgardi la skemon, metitan sur la sekvanta paĝo. Ili tuj ekvidos la diferencon, ekzistantan inter internacia kaj supernacia organizoj.

**Lingvaj institucioj.** – Per-esperanta organizo ne povas seninteresiĝi pri la ilo, kiun ĝi uzas.

Ekpaŝante sur ĉi tiun kampon, objektiva esplorado konstatas, ke tie kuŝas plena neorganiziteco kaj eĉ senrajteco.

En la oficiala jarlibro (1920) de UEA oni povas legi: "esperanto kaj la kontrolado de ĝia evoluo estas komisiitaj al **Lingva Komitato** (L.K.), kies anoj estas elektitaj de la L.K. por 9 jaroj inter kandidatoj proponitaj de la Akademio. La **Esperanta Akademio** estas supera laborkomisiono, elektita de la L.K. por 9 jaroj kaj potrone rebalotata ĉiun trian jaron. Dum la milito tiuj institucioj ne funkciis kaj estas reorganizotaj".

La samon diris S-ro Warden ĉe la XII-a Kongreso. Kaj se oni volus funde esplori ĉi tiun punkton, oni verŝajne alvenus al konkludo, ke niaj lingvaj institucioj kuŝas sur nenia jurbazzo<sup>[1]</sup>.



F = fako; g = grupo; I = Internacio; i = individuo;  
 N = nacio; R = regiono.

La fig. 1 montras la laŭnecian organizmanieron; la fig. 2 tiun de **Sennacieca Asocio Tutmonda**. Al ĉi tiu lasta, individuo povas senpere aniĝi, kvankam ne estante membro de iu ajn grupo; dekmembra grupo povas anigi nur 8 el siaj membroj, se la 2 aliaj ne konsentas. Ĉar estas kotizo por la grupo kaj kotizo por SAT, la afero estas do tute facile aranĝebla. F montras fakan organizon, povantan aniĝi laŭ

aparta maniero, tial ke oni supozas, ke ĝi jam estas internacie organizita.

Ne estas nia intenco malice ĉikaneti niajn teknikistojn. Ili daŭrigu dormeme deĵori kiel gardistoj de la netuŝebleco de l' **Fundamento!**...

Sed eble venos tago, kiam la esperantistaro volos serioze organizi siajn lingvajn instituciojn. Tiam, sed nur tiam, ni povos konsideri kian kunhelpon povos alporti nia Asocio, kaj kian sintenadon ĝi devos havi tiurilate.

Ĝis tiu tempo, ni do ne atentu pri senrajtaj organoj kaj konsideru laŭsence, ne laŭvorte, la **Fundamenton**, kiel nian solan lingvan inspiranton kaj unuecgarantianton.

**Kritikoj estas petataj.** – Trastudante diversajn punktojn pri nia organizota movado, ni vidis, ke esperanto ne povas esti konsiderata kiel la celo de nia agado, sed nur kiel ilo por atingi nian celon: la forrenversiĝon de l' kapitalisma sistemo, kies unu el ĝiaj plej fortaj kolonoj estas la intergenta malamo – rezulto de nebla interkompreniĝo inter la ĉiulandaj proletoj – kaj starigon de socio bazita sur justeco, ekvivalenteco kaj firmigata de frateca, **sennacieca** sento.

Mi montris, ke la varbado por esperanto ĉe niaj samidealanoj bezonigas naciajn, aŭ pli ĝuste samnacilingvajn asociojn; kaj ke, por profite uzi la lingvon, estas necese transpaŝi la eksterlandan kampon. Tial ni, mondlingvanoj, devas krei novajn formojn de agado; ni devas adapti nian akiritan ilon al ĝia funkcio, kaj tiucele formalatenti la ĝisnunan asocisistemon de la pli-malpli fiaskaj "internacioj".

Preterpasante mi ekvidigis, ke la esperantaj oficialaj institucioj estas en plena neorganiziteco kaj eĉ sen jura bazo.

Mia sola deziro estas servi la Veron. Mi kutimas submetiĝi antaŭ la faktoj. Se mi eraris, oni bonvolu montri la erarojn. Mi petas nur, ke oni konsideru objektivaj kaj ne sentimente la pridiskutaĵon.

Oni ne forgesu, ke ni estas nun en 1921, ne en la naskiĝa jaro de la Zamenhofa lingvo. La ilo estas nun forĝita kaj elprovita. La demando estas jena: Ĉu ne pli utilas por nia celo enkonduki esperanton en la tendaro de niaj samcelanoj, ol en tiu de niaj hodiaŭaj kontraŭuloj kaj morgaŭaj malamikoj? Se oni respondas jese al tiu demando, kiaj estas la plej trafaj propagandrimedoj?

Se oni pruvas al mi, ke esperanto estas per si mem sufiĉa liberigilo, ke laŭklasa organizado estas malutila al nia propagando; ke ni, mondlingvanoj, devas tamen grupiĝi laŭ internacia maniero, unuvorte, ke ni devas daŭre sekvi la ĝisnun tratabitan vojon, mi estas preta kunlabori kun ĉiuj reĝoj, episkopoj, generaloj, ekzekutistoj kaj aliaj eminentuloj kaj ankaŭ aliĝi al la IV-a Internacio – esperantista!

Ĝis oni estos liverinta al mi konvinkigajn pruvojn, mi ne laciĝos diri al la samklasanoj:

Ni fosu nian propran sulkon.

## Piednotoj

1. ↑ En 1909, ĉe la Barcelona Kongreso, S-ro Boirac, prezidanto de la **Lingva Komitato**, deklaris: "Ĝis nun ĝi (la L.K.) havis nur fidan, moralan bazon, kaj tion oni jam riproĉis al mi" (**Of. Gazeto**, n°15, p.129). Kaj D-



ro Zamenhof, en 1911, diris: "Bedaŭrinde ĝis nun niaj kongresoj ne povis plenumi sian agadan rolon, ĉar ili ne estas organizitaj kaj ne havis la eblon aranĝi aŭtoritatan voĉdonadon".

## DIFINOJ

**Burĝo.** – 1. Mezklasulo, ne nobelo, ne proleto. – 2. Homo, havanta kapitalon kaj ekspluatanta laboristojn. – 3. Homo, ne progresema, ne deziranta ŝanĝi la ekzistantan sociordon. Proleto povas esti burĝmensa; homo havanta burĝan pozicion povas tamen ne havi burĝan menson.

**Internaciismo.** – Politika sistemo, kiu celas trovi kompromison inter la naciismo kaj la postuloj de la pli kaj pli malvolviĝantaj produktofortoj, kiuj tendencas nepre ignori la landlimojn. La internaciismo volas gardi la sendependecon de ĉiuj nacioj, konservi la naciajn kutimojn kaj lingvojn, unuvorte ebligi la malvolviĝon de la diversaj "naciaj gentoj".

Sur la ekonomia kampo, la paco estus certigata (?) per starigo de supernacia institucio, kiu zorgus por interkonsentigi la ofte kontraŭajn interesojn de la diversaj sendependaj nacioj.

Kelkaj internaciistoj konsentas pri starigo de internacia helpa lingvo.

**Patriotismo.** – Religio, kies origina bazo estis la tero, kie vivis, mortis kaj diiĝis la prapatroj. Laŭ la daŭro de l' jarcentoj, la ideo aliĝis kaj samiĝis kun la amo, fideleco kaj memoferemo al iu nacio (patrio). La patriota religio, perdinte

sian dekomenca bazon, daŭras ekzisti dank'al artifikaj rimedoj: instruado en la lernejoj, propagando per gazetoj kaj libroj, per paroladoj, manifestacioj, ktp.

La armeo kun siaj standardoj estas la simbolo de la patrio kaj la soldato ĝia pastro. La patriotismo estas forta ideologia subtenilo de la reganta klaso.

**Proleto.** – Homo, kies vivrimedoj estas la nura vendo de sia laborforto. – **Proletaro.** Klaso de la proletoj.

**Revolucio** (socia). – Kompleta aliiĝo en la spiritoj, en la moroj kaj en la juraj rilatoj inter la homoj. La forigo de la sklaveco, de la servuteco, estis revolucioj. La forigo de la salajreco estos ankaŭ revolucio.

Rimarko. – Se ĉie la supre parolita aliiĝo okazus **samtempe** ĉe la grandega plimulto da homoj, revolucio povus okazi pace. Sangaj politikaj bataloj kaj forrenverso de registaroj ne ĉiam signifas efektivigon de revolucio. Oni ne devas samigi la vortojn revolucio kaj ribelo.

La ŝanĝoj en la produktomanieroj okazigas aliiĝojn en la spiritoj. Tial ke ne ĉie kaj samtempe okazas tiuj aliiĝoj, oni bedaŭrinde ne povas esperi la efektiviĝon de senperforta revolucio.

Por efektivigi revolucion, necesas ribeli; sed ne ĉiu ribelo estas revolucio.

**Sennaciano.** – Homo, kiu aprobas principe la sennaciiismon.

**Sennaciismo.** – Kultura doktrino kies ĉefaj celoj estas: 1. Malaperigo de ĉiuj nacioj kaj ŝtatoj konsiderataj kiel sendependaj unuoj; 2. Mondmastrumado kaj raciigo de la produktado laŭ sciencaj metodoj; 3. Unuecigo de ĉiuj mezuriloj kaj kalkuliloj; 4. Starigo de racie artefarita lingvo universala, uzota kiel la sola kulturlingvo.

Pravigo – La sennaciismo sin apogas sur la historia materialismo, kiu instruas, ke la produktofortoj tendencas al senĉesa malvolviĝo kaj interplektiĝo, kio neeviteble estigos mondekonomion. Tial ke la ideologia superstrukturo, rezultanta grandparte el la produkt- kaj vivkondiĉoj de la homoj, ĉiam malfruas rilate al la ŝanĝoj okazintaj en la produktorimedoj, la sennaciismo celas instrui la homojn racie – ne naciece aŭ religiece, kio finnalize estas la samo – por tiel glatigi la vojon al la historia procezo.

Rimarko. – Principe, la historia procezo povus alkonduki la homan socion al ĝia lasta stadio de malvolviĝo, t.e. al sennacieca stato, per la rimedoj de l' kapitalisma imperialismo. Fakte, ekzistas en ĉi tiu lasta sistemo internaj kontraŭecoj, kiuj kreas grandan riskon je pereigo de la civilizacio per science organizitaj militoj. Tial la sennaciismo sin apogas sur la proletara klaso, kies interesoj estas tutmonde la samaj. La klasbatalo ja instigas kaj devigas la ekspluatatan klason al pli kaj pli larĝa unuiĝo, kaj tio okazigos la forrenverson de l' ĥaosa kaj krimoplena reĝimo kapitalista.

Konsekvence la proletara sennaciismo havas nenion komunan kun la kapitalista imperialismo aŭ kun la burĝa kosmopolitismo.

**Sciigo.** – La sennaciisma doktrino estas jam nun embrie aplikata de **Sennacieca Asocio Tutmonda** en ĝia organizformo. Multaj (ne ĉiuj) membroj de tiu organizo celas fariĝi konsciaj sennaciuloj. Ili tamen opinias, ke necesas unue esti lerninta kaj praktike aplikinta esperanton, t.e. sennaciecan lingvon, dum kelka tempo, por povi kompreni la priparolitan doktrinon. Tial ili ne propagandas ĝin ekster esperantistaj rondoj.

**Sennaciulo.** – Homo, kiu konscie celas kaj ĉiel eble provas jam nun konformigi siajn pensojn, sentojn kaj agojn al sennaciismo.

# La Laborista Esperantismo

## Antaŭparolo

### I. Civilizeco kaj artefariteco

### II. Viva artefarita lingvo


### III. Esperanto je la servo de l' Proletaro

### IV. Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)

### V. Apero de nova tendenco: Sennaciismo

### VI. SAT kaj la nacilingvaj Asocioj Esperantistaj

### VII. SAT kaj la oficialaj Institucioj de la Esperantistaro

 La teksto estas **publika havaĵo** (*public domain*). Detaloj pri la licenco troviĝas ĉe la paĝo de la aŭtoro: [Eŭgeno Lanti](#).

## ANTAŬPAROLO

Laŭ plej freŝdata statistiko, ekzistas nuntempe en la mondo 126.000 esperantistoj. El tiu nombro pli ol la duono certe estas ĉu simplaj laboristoj, ĉu batalantoj por la emancipo de la laborista klaso. Ekzistas do jam sufiĉe larĝa kampo por diskonigi la celon kaj taskojn de **Sennacieca Asocio Tutmonda**.

Temas konvinki la neorganizitajn esperantistojn laboristajn pri la neceso aliĝi al nia movado; temas ankaŭ liveri al la nunaj anoj direktojn por ilia agado. Estas ja konstatebla fakto, ke multaj SAT-anoj ne komprenas ĝuste la signifon kaj karakteron de nia organizo. Kvazaŭa programo estas do necesa por helpi al ili en ilia orientiĝo por propagandi kaj apliki esperanton.

\*

\*       \*

Ni titolis ĉi tiun verketon: **La Laborista Esperantismo**, por diferencigi nian movadon de la t.n. neŭtrala, kiu sin bazas sur la simpla esperantismo, difinita jene ĉe la I-a Universala Kongreso de Esperanto:

"La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo

la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu "ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj nenion celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn", donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure **privata**, por kiu la Esperantismo ne respondas".

Leginte la ĉi-supran citon, ĉiu klaskonscia laboristo bone komprenos, ke li ne povas konsenti kun tia mallarĝa difino pri esperantismo. Ni ne havas la naivecon kredi, ke esperanto povos resti eterne nur helpa interkomprenilo kaj ne elpuŝos la naciajn lingvojn. Nia esperantismo jam nun tiras ĉiujn konsekvencojn el la estonta fakto de komuna lingvo tutmonde uzata. Aliparte esperanto ne estas por ni "neŭtrale homa", sed ilo por faciligi nian batalon kontraŭ la kapitalisma ekspluatado.

\*

\*            \*

La verketo: **For la Neŭtralismon!** faris negativan laboron, en tiu senco, ke ĝi celis nur montri la neceson por la esperantistaj laboristoj aparte organiziĝi. Tiu broŝuro jam havis tri eldonojn, kio montras, ke ĝi trovis bonan akcepton ĉe nia popolo.



Ĉi tiu dua verketo celas fari pozitivan, konstruan laboron.  
Ni esperas, ke ĝi ne havos malpli da sukceso ol la unua.

E.L.

**18. Julio 1928.**

# LA LABORISTA ESPERANTISMO

## I

### CIVILIZECO KAJ ARTEFARITECO

Kio karakterizas plej bone la evoluadon de la Homaro, tio estas ĝia tendenco eliri el mistika stato kaj celadi al racieco. En la plej primitivaj epokoj, la elpensemo de l' homo igis lin artefari ilojn por ĉasi kaj sin defendi. La fabrikado de plej simpla objekto postulas la obeon al fizikaj leĝoj. Tial racieco povis iom post iom enpenetri la homan cerbon. La konstruado de domoj, de ŝipoj, la fabrikado de iloj kaj finfine de treege perfektaj kaj delikataj aŭ potencaj maŝinoj okazis samtempe kaj paralele kun la kreskado de la racio en la homa menso.

En la bonstato de l' homo, ĉiu progreso estas ligita intime kun artefariteco. Artefaritaj estas niaj manĝaĵoj kaj vestaĵoj. Plej bonaj fruktoj kreskas ĉe kulturitaj arboj, kaj oni povas eĉ diri, ke ili ankaŭ estas iel artefaritaj; ili almenaŭ estas arte kreskigitaj. La homo fariĝis la "reĝo de l' naturo" dank'al sia kapablo arte aliigi la medion, en kiu li vivas. La besto sin adaptas al la medio; la homo adaptas la medion al si.

La civilizo estas rezulto de raciigado. Sed tio okazis ĝis nun preskaŭ senkonscie, plej ofte senmetode kaj nur laŭ

limigita skalo. Ni eniras periodon<sup>[1]</sup>, en kiu ekzistas tendenco, konscie, metode kaj grandskale<sup>[2]</sup> ĉion raciigi. La ennaskita elpensemo de l' homo estas sendube ia **vivilo**. Hodiaŭ la scienco, la tekniko – rezulto de la malvolviĝanta racio en la homa cerbo – fariĝas kvazaŭ socia, kolektiva vivilo.

La fervojoj kaj vaporŝipoj, la aviado kaj senfadena telegraf- kaj telefonio malgrandigas la distancojn tigrade, ke homoj el diversaj kontinentoj baldaŭ sentos sin kvazaŭ ili estus najbaroj. Ekzistas nehaltigebla tendenco al normigo, tipigo en la produktado. La mondo unueciĝas, dank'al senĉese malvolviĝanta tekniko. La Racio, la Artefariteco triumfas.

\*

\*       \*

Estas tamen kampo, sur kiu ĝis nun la racio malmulte enplantiĝis. Ni aludas pri la multlingveco, ekzistanta en la mondo, kiu metas barojn inter la homoj el diversaj mondpartoj. Lokomotivoj kurantaj sur reloj en Eŭropo, en Ameriko, en Azio, en Afriko estas proksimume la samaj kaj povas esti kondukataj de ĉiu ajn maŝinisto. Aŭtomobilo aŭ aeroplano fabrikita ĉu en Parizo, ĉu en Tokio, ĉu en Novjorko, ĉu en Moskvo aŭ en alia urbo povas tuj esti kondukata de fakulo. La samon oni povas diri pri ĉio, kion produktas grandskale la moderna tekniko.

Sed en kelkaj partoj de l' mondo, homoj vojaĝantaj per

rapidaj veturiloj baldaŭ renkontas aliajn homojn, kun kiuj ili ne povas interkompreniĝi, tial ke ili parolas malsaman lingvon. Ili uzas samajn ilojn, sed tiujn ilojn ili nomas per malsamaj vortoj. Sur la lingva kampo regas ankoraŭ la mistika primitiva stato. Ĉi tie ankaŭ necesas raciigadi.

Antaŭ kelkdekoj da jaroj, eĉ lingvistoj opiniis, ke lingvo estas kvazaŭ viva organismo; ke sekve estas tute ĥimera la provo starigi racie artefaritan lingvon. Same plej famaj kaj kleraj homoj neis siatempe la eblecon veturi per vapormaŝinoj. Aliaj mokis la "fantaziulojn", kiuj provis imiti la birdojn kaj flugi per artefaritaj aparatoj...

Hodiaŭ la lingvo-scienca instruas, ke **lingvo estas socia institucio tradicia; ke la homa volo senĉese influas en lingvaj aferoj**. Plej aŭtoritata lingvisto skribis antaŭ nelonge: "La ebleco starigi artefaritan lingvon, facile lerneblan kaj la fakto, ke tiu lingvo estas utiligebla, estas pruvitaj per la praktiko. Vana estas ĉia teoria diskutado: esperanto funkciis<sup>[3]</sup>". Kaj en la sama libro la aŭtoro konkludis: "Nur artefarita lingvo povas doni al la internaciaj rilatoj la praktikan kaj simplan ilon, kiu mankas por ili."

Racieco komencas penetri ankaŭ sur la lingvan kampon...

## Piednotoj

1. ↑ Ĉiu historia periodo havas siajn proprajn leĝojn... sed tuj kiam la vivo transpasis la periodon de donita evoluo, kiam ĝi eliris el donita stadio kaj transiris en alian, tiam ĝi estas regata de aliaj leĝoj. **K. Marks.**

(Laŭ cito de N. Buĥarin en "La teorio de l' historia materialismo", pĝ.68 de la franclingva eldono).

2. ↑ Raciigado en kapitalisma soci-ordo tendencas nature okazi ĉefe por la profito de la ekspluatanta klaso. La ekspluatitaro devas batali ne kontraŭ la raciigado mem, sed kontraŭ la maniero laŭ kiu la burĝaro tendencas raciigi. Vera raciigado cetere devas celi la bonstaton de la tuta homa speco.
3. ↑ "Les Langues dans l'Europe Nouvelle" (1918) (La Lingvoj en la Nova Eŭropo), de **A. Meillet**, profesoro ĉe la Pariza Universitato, direktoro de studoj ĉe la lernejo de **Altaj Studoj**.

## II VIVA ARTEFARITA LINGVO

La bezono de tutmonda interkomprenilo jam delonge ekzistas. Pro tio troviĝis homoj, kiuj provis arte kontentigi tiun bezonon. Estis faritaj multaj provoj por starigo de artefarita lingvo. Pensemaj homoj jam delonge rimarkis, ke la t.n. naturaj lingvoj entenas multe da komuna, precipe radika materialo; ili konstatis, ke en tiuj lingvoj svarmas la esceptoj, la kontraŭdiroj kaj diversaj absurdaĵoj. Ili penadis por krei racian lingvon, en kiu regus ordo, simpleco, reguleco.

Sed racieco kaj artefariteco devas ĉiam sin apogi sur konkretoj; aliel la elpensemo similas nur fantazion. Multaj projektoj de artefaritaj lingvoj tute fiaskis, tial ke ilia bazo ne radikis en la vivo. La tuta konstruo ŝvebis en aero, konsistis en abstraktoj kaj ne trovis apogilon en la instinkto, en la sento de l' homo.

Antaŭ kvardek jaroj troviĝis genia homo, kiu bone ekkonis la leĝojn pri la vivo de la lingvoj kaj submetis sian elpensemon al tiuj leĝoj. Lia racio ne perfortis la instinkton, sed nur ĝin gvidis. Lia natura lingvo-sento kondukis lin al ĝusta solvo de l' problemo. D-ro L.L. Zamenhof iniciatis lingvon, kies elementoj jam troviĝas en la vivantaj lingvoj. Per multjara praktikado de sia lingvo, li sukcesis doni al ĝi vivon kaj animon. Tial **esperanto** – tiel estas nomata la

lingvo – trovis ĉe interesiĝantoj bonan akcepton kaj venkis ĉiujn konkurencajn projektojn, antaŭ kaj post ĝi aperintajn. La aŭtoro de esperanto sukcese alkondukis raciecon sur la lingvan kampon. Artefariteco tie ĉi ankaŭ plene venkis.

\*

\*       \*

Sed la lingva problemo evoluas en tute specialaj kondiĉoj, laŭ tute apartaj cirkonstancoj. Plej bona elpenŝaĵo devas eliri el la eksperimentejo kaj eniri la praktikan aplikadon por esti utila. Kaj la aplikado de lingvo postulas ĝeneralan akcepton flanke de la publiko. Por tion atingi stariĝis propagandaj asocioj. Da ili jam nun ekzistas en ĉiuj partoj de l' mondo. Kaj sen ia troigo oni povas diri, ke la de Zamenhof artefarita lingvo eniris ĉiujn fakojn de la socia vivo: komercistoj utiligas esperanton por siaj negocoj; scienculoj por siaj traktatoj; policistoj por siaj serĉadoj; pastroj por disvastigi siajn absurdaĵojn; literaturistoj eldiras en esperanto siajn pensojn, kaj poetoj elkantas sian animstaton per versoj; oratoroj vekas aplaŭdadon kaj geamantoj trovas en la lingvo plej mildajn esprimojn. Esperanto estas jam ĉiurilate elprovita kaj preta por ĝenerala enkonduko. La artefarita lingvo fariĝis viva lingvo.

### III

## ESPERANTO JE LA SERVO DE L' PROLETARO

Estas bone spertita fakto, ke la Laboristaro povas atingi plibonigon de siaj labor- kaj vivkondiĉoj nur per konstanta batalado kontraŭ la ekspluatanta klaso – la burĝaro. Tia batalo por sukcesi bezonas unuiĝon. Komence la ekspluatitoj sindikate grupiĝis en la urbo, kie ili laboris; poste la grupiĝo plilarĝiĝis, fariĝis regiona, nacia, internacia.

La kapitalismo, enirinta la stadion de imperialismo, disvolvas la produktofortojn tiagrade, ke la ekonomio pli kaj pli interplektiĝas laŭ tutmonda skalo. Grandaj trustoj jam nun posedas fabrikojn en plej diversaj partoj de l' mondo. Se la laborforto estas malpli kara en iu loko, t.e. se la tieaj laboristoj estas malpli postulemaj kaj ne bone organizitaj, la industriĉefoj tendencas pligrandigi la produktadon en tiu loko, kaj tiel senlaboriĝas la alilokaj laboristoj.

En tre proksima tempo la strikoj en kelkaj industrioj povos esti sukcesaj, nur se ili okazos samtempe kaj tutmonde. La granda plimulto da laboristoj ne ankoraŭ komprenas tion. Sed la faktoj pli kaj pli devigos ilin kompreni. Jam gvidantoj devis konfesi, ke la lasta karbminista striko en Britio malsukcesis ĉefe pro tio, ke en Germanio, en Francio kaj en aliaj landoj ministoj elfosis la bezonatan karbon, kiun aĉetis Britiaj industriĉefoj. Rezultas el tia stato, ke la laboristoj nepre bezonas ne nur internacian, sed eĉ tutmondan unuiĝon.



Por unuiĝi necesas interkompreniĝi. Kaj jen aperas la bezono de komuna lingvo.

\*

\*

\*

La reganta klaso ĝis nun solvis la problemon relative facile. La idoj de la burĝaro ja vizitas la lernejojn ĝis sia 20-25-30-a jaraĝo. Tie ili lernas kelkajn lingvojn, kaj tiel diversnaciaj burĝoj povas pli-malpli bone interkompreniĝi. Aliparte la grandaj firmoj kaj entreprenoj povas salajradi tradukistojn kaj interpretistojn. Tia solvo de la interkompreniĝo ne estas racia, sed ĝi almenaŭ ebligas la komercajn rilatojn.

Tute alia estas la situacio ĉe la laborista klaso. La proletaj gefiloj forlasas frue la lernejon kaj apenaŭ povas korekte uzi sian gepatran lingvon. En tiaj kondiĉoj la tutmonda nepre necesa unuiĝo de la laboristoj estas malfacila. En la ĝisnunaj provoj de unuiĝo inter la naciaj organizoj laboristaj oni devis imiti la burĝojn kaj uzi la helpon de tradukistoj kaj interpretistoj. Intima kunlaborado, intima konatiĝo inter la diverslingvaj ekspluatatoj estas tute neebla. La gvidantoj de laboristaj organizoj traktas pri la interesoj de siaj delegintoj kvazaŭ negocistoj rilate varojn. Milionoj da laboristoj, kies klasaj interesoj estas la samaj, restas ja apartigitaj, enkadrigitaj per la lingvaj baroj kaj staras mute unuj apud aliaj kvazaŭ objektoj, varoj.

Kvankam la rilatoj inter la diverslandaj organizoj estas

ankoraŭ neoftaj, preskaŭ okazaj, ili tamen jam postulas la elspezon de grandaj sumoj por la tradukado de dokumentoj, de raportoj, de tezoj en multajn lingvojn, por la eldonado de samenhavaj revuoj en kelkaj lingvoj. La intereso de la laborista klaso urĝe postulas la forigon de la lingvaj baroj. La gvidantoj de la laborista movado, kiuj malatentas tiun problemon, iel perfidas la laboristojn. Ne sufiĉas prediki elokvente la neceson de tutmonda unuiĝo, se oni malzorgas la rimedojn, kiuj ebligas tiun unuiĝon. La mondlingva problemo estas jam teorie solvita. Laŭ malgranda skalo, esperanto eĉ eniris la praktikon, la socian vivon. Tamen la granda plimulto da laboristaj gvidantoj faras nenion por apliki la solvon.

Tia stato postulis la starigon de organizo, kies ĉefa celo estas la praktika aplikado de esperanto por la interesoj de l' Proletaro.

## IV SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT)

### a) Ĝia celo

Kiam temis pruvi per faktoj, ke artefarita lingvo povas bone funkcii; kiam ekzistis en la mondo tre malmulte da esperantistoj, tiam estis necesa ilia kuniĝo en sama asocio. Burĝoj kaj proletoj, katolikoj kaj framasonoj, anarkistoj kaj policistoj, unuvorte, ĉiuj esperantistoj el plej diversaj medioj kaj devenoj havis intereson kunlabori por montri al la publiko, ke la lingvo iniciatita de Zamenhof kontentige solvas la problemon pri tutmonda interkompreniĝo. Politika neŭtraleco tiutempe estis necesa.

Sed pasis dekoj da jaroj. Esperanto disvastiĝis en ĉiuj medioj de la socia vivo. Tiam alvenis la tempo, kiam necesis fakigi la propagandon kaj aplikadon de la lingvo. Kiam la ilo estis ĉiufake elprovita, evidentiĝis, ke ĝi povas utili por plej diversaj celoj. La laboristoj sekve per- fidus la interesojn de sia klaso, se ili daŭrigus elspezi sian monon, sian energion, por enkonduki esperanton en la tendaro de siaj klaskontraŭuloj. Troviĝis homoj por krei: "For la neŭtralismon!... Ni metu esperanton je la servo de niaj klasaj interesoj!"

En 1921, okaze de la XIII-a Universala Esperanto-Kongreso, laboristoj kunvenis aparte kaj fondis la organizon

nomitan **Sennacieca Asocio Tutmonda**. Ĝi do jam ekzistas de post ok jaroj, kaj ĝia celo estas jene klarigita en la Statuto:

1. Sub la nomo **Sennacieca Asocio Tutmonda** (SAT) estas fondita Asocio, kiu celas: **a)** utiligi praktike la internacian lingvon esperanto por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda; **b)** kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de homeca soiidareco; **c)** lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj; **ĉ)** servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj kies celo estas analoga al tiude SAT; **d)** peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio.

\*

\*       \*

SAT, ne estante politika sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la **dogmiĝon** de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas, per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la

kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn, kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

## b) Ĝia strukturo kaj organizeco

Kiel jam dirite, SAT ne havas politikajn taskojn. Ĝi celas precipe ebligi al siaj membroj la praktikadon de esperanto laŭ tutmonda skalo. Homoj, kiuj forrenversis inter si la lingvajn barojn, povas tute bone jam nun ignori la naciojn en sia organiziĝo. Je eduka vidpunkto estas en tio certa utilo: la anoj de la organizo kutimiĝas spirite sin konsideri kiel apartenantaj al iu **unu**, ampleksanta la tutan mondon. Tia kondiĉo estas necesa, por ke ili akiru pli kaj pli la emon uzadi inter si la lingvon, pli kaj pli ofte interrilatiĝi kaj intime kunlabaori.

Eĉ asocio, kiu ignoras la naciajn limojn, bezonas tamen gvidantaron. Por ke la gvidantoj ne povu **nacie** influi la gvidadon, necesas, ke ili neniel reprezentu la interesojn de iu aparta lando aŭ ŝtato. Tial la iniciatintoj de SAT decidis arbitre disdividi la mondon laŭ sektoroj. La strukturo de SAT bazas sur konsilantaro el 24 anoj, po unu por ĉiu sektoro limigita per du meridianoj. La konsilantoj estas elektataj de la asocioj per ĝenerala voĉdonado. Ĉiuj ŝanĝoj en la Statuto povas okazi ankaŭ nur per tia ĝenerala balotado.

Ĉiujare la SAT-anoj ricevas kun sia Jarlibro voĉdonilon, per kiu ili havas eblecon influi la funkciadon de la tuta

Asocio. Tiu sistemo estas plej demokrata kaj montriĝas tute taŭga en la praktiko.

\*

\*

\*

**Sekcioj.** – SAT estus peza, burokrata organismo, se ĝia Centro devus plenumi ĉiujn taskojn. La "kapo" devas havi kiel taskon nur interrilatigi, interligi la diversajn organojn. Tiel cetere okazas en viva estulo: la koro, la pulmoj, la renoj, la okuloj k.a. organoj havas ĉiu sian apartan funkcion. Kaj la cerbo estas la regulilo inter la diversaj organoj.

Simile estas en SAT: jam ekzistas **Pedagogia, Kooperativa, Junulara, Studenta, Sporta, Vegetara Sekcioj.** Aliaj certe stariĝos kun la malvolviĝo de la Asocio. Liberpensuloj, literaturistoj, sportistoj, radiuloj, blinduloj kaj ceteruloj ankaŭ iun tagon sentos la bezonon starigi kaj funkciigi sekcion en la kadro de SAT.

La Estraro estas ĉiam preta doni moralan apogon kaj kuraĝigon al Kamaradoj, kiuj volas fake labori en iu speciala medio. Necesas tamen, ke la iniciatantoj taksu ĝuste siajn fortojn kaj ne starigu entreprenon nevivkapablan. SAT estu granda, libera laborejo, kie ĉiu penadas en sia fako por la komuna intereso de l' tutmonda Proletaro.

c) **Ĝia superpartieco**

La laborista movado estas neunuece organizita. Ekzistas diversaj partioj, sindikatoj, kooperativoj, sportasocioj aŭ aliaj similaj organizoj. Ĉiu el ili celas altiri al si la tutan laboristaron. Tiucele okazas polemikoj, disputoj, eĉ kelkfoje bataloj inter tiuj konkurencaj tendencoj. SAT ne enmiksiĝas en tiuj disputoj. Ĉiuj disputantoj same bezonas esperanton. Cetere okazas ne malofte, ke iuj transiras de unu tendo en alian, de iu partio en alian.

Nur la sperto povas pravigi aŭ ne teorion, taktikon. Estas nur eble ekscii, firme konvinkiĝi pri la celo, al kiu sin direktas la tuta organizita Laboristaro. Tiu direkto estas sufiĉe larĝvoja, kaj inter la limoj de tiu vojo SAT lasas al siaj anoj plenan liberecon. Neniu ano estas devigata malkonfesi la principojn, kiuj konsistigas la programon de lia partio. Nenio en SAT kontraŭstaras al iu ajn laborista organizo. En la presorganoj de SAT ĉiuj tendencoj havas la rajton defendi, klarigi sian propran teorion vidpunkton sub deca formo. Ĉiu rajtas diskuti; nur disputado estas malpermesata.

La ĉefa tasko, kiun difinis al si la organizita Laboristaro, estas la forrenverso de l' nuna kapitalisma soci-ordo, – kiu okazigas militojn, senlaborecon, mizeron kaj eĉ minacas pereigi la tutan civilizon per venontaj kruelaj kaj absurdaj militoj. La limoj de la vojo surpaŝata estas la konfeso pri ekzisto de klasoj kaj neceso por la Laboristaro batali kontraŭ la ekspluatanta klaso. La laboristoj, kiuj ne konsentas pri tiu neceso, perfidas sian klason, kaj sekve ne povas trovi lokon en nia Asocio.

SAT estas superpartia. Ĝia aparato ebligas al anarkistoj, al komunistoj, al socialistoj interrilatiĝi, interkonatiĝi

mondskale kaj ricevi informojn, kiujn ili povas utiligi polemike **ekster** SAT kontraŭ malsampartianoj, malsamtendencanoj.

Se Kamarado akiras per konstanta uzado de esperanto pli da klereco; se per la SAT-aparato li povas bone informiĝi pri ĉio, kio interesas la tutmondan laboristan movadon, ne povas esti dubo, ke li fariĝos pro tio plej taŭga partiano, plej bona sindikatano kaj plej valora batalanto por la interesoj de sia klaso. Tial, kvankam estante superpartia organizo, SAT tamen tre povas utili al ĉiu partio, al ĉiu tendenco. Superpartieco ja ne signifas kontraŭpartiecon.

\*

\*       \*

**Frakcioj.** – Kio estas frakcio? Se oni malfermas vortaron, oni legas: **Frakcio estas parto de unuo.** Se oni konsentas pri tiu difino, evidentiĝas, ke SAT konsistas el frakcio da anarkistoj, frakcio da komunistoj, frakcio da socialistoj, frakcio da sindikatistoj ktp. Kaj tiuj frakcioj konsistigas la unuon SAT.

Dezirinde aŭ ne, aktive aŭ latente, frakcioj ekzistas en nia Asocio, ĉar ĝi konsistas el diverspartiaj elementoj. Ĉu estas dezirinde, ke tiuj frakcioj havu aktivan vivon? Jes, certe.

Ĉiuj laboristaj eperantistoj havas intereson kuniĝi en sama organizo; la apartiĝo devas esti nur laŭklasa, ne laŭtendeca. La tendencoj ja ne konsistigas ion firman, daŭran, kiel estas klaso. Oni povus citi multe da ekzemploj pri Kamaradoj, kiuj



aliĝis sinsekve al diversaj partioj kaj tendencoj. Aliparte, oni povis nemalofte konstati en la historio de l' laborista movado la stariĝon de novaj partioj kaj forlason de aliaj; okazis ankaŭ kunfandiĝoj. Senĉese kreiĝas novaj tendencoj, novaj fluoj, novaj organizoj politikaj. Kaj ni havas kiel celon trudi al ili **ĉiuj** senescepte la uzadon de esperanto. Tion ni neniam forgesu. Sed estas evidente, ke la Kamaradoj, kiuj apartenas al tiuj diversaj tendencoj, devas havi la eblecon uzi la SAT-aparaton por la intereso de sia propra tendenco. Por tio necesas, ke ili konu unu la alian, ke ili interrilatu por plenumi difinitan taskon.

Ekzemple, ĉiu konsentas, ke klopodoj ĉe partiaj instancoj havas pli da ŝanco esti bonvenataj, se ilin faras partianoj. Tial por prepari tiujn klopodojn, SAT per siaj gazetoj aŭ aliaj organoj ebligas al sampartianoj la funkciadon de frakcioj.

Oni tamen devas bone diferencigi inter sekcio kaj frakcio. La unua funkcias en la kadro de SAT kaj sub ĝia kontrolo, dum la dua funkcias ekster la Asocio, kiu havas nenian respondecon pri ĝia laboro.

Sekcioj povas eldoni gazetojn, aŭ havi specialajn paĝojn en la presorganoj de SAT, sed ne frakcioj. La frakcianoj apartenantaj al la Amsterdama, Berlina aŭ Moskva Intenacioj devas klopodi por atingi, ke tiuj organizoj eldonu mem revuojn aŭ dokumentojn en esperanto. Sed estus granda maltrafo, se iu frakcio el SAT-anoj volus mem eldoni gazeton. Partia gazeto devas ja aperi sub la kontrolo de la koncerna partio. Kaj sekve ĝi devas preni sur sin ties eldonon.

Frakcio ne devas havi kiel taskon "anarkistigi",

"komunistigi", aŭ "socialistigi" nian Asocion. Tio estus granda sensencaĵo. Ili nur celu "esperantigi" sian propran partion, kaj por tio uzu la SAT-aparaton, kies celo estas meti esperanton je la servo de l' tutmonda Proletaro kaj ne al la servo de nur iu sola partio.

#### d) Ĝiaj taskoj

**Interhelpo.** – Okazas nemalofte, ke laboristoj devas forlasi la hejmlandon, ĉu por serĉi laboron, ĉu por eviti persekutojn flanke de reakciaj aŭ faŝistaj registaroj. SAT difinis al si kiel taskon helpi al tiuj laborserĉantoj aŭ persekutatoj. Per eldono de Jarlibro, enhavanta la adreson de ĉiuj membroj, SAT metas en la manon de forkuranto, de vojaĝanto, ilon per kiu li ne sentas sin izolite en iu ajn lando. En ĉiu urbo li trovas adresojn de Kamaradoj, kiuj pretas helpi al li por trovi okupon aŭ eviti malbonan okazeblaĵon. Kaj en ĉiu kunveno de la esperanta grupo, li havas la senton kvazaŭ li troviĝus meze de siaj gepatraj samlingvanoj. La interhela laboro de SAT estas jam nun tre atentinda kaj multsignifa.

Aliflanke, la posedo de Adresaro per kiu estas eble trovi ĉie helpemajn Kamaradojn instigas multajn junulojn travojaĝi la mondon. Tio akcelas la alproksimiĝon de la laboristoj kaj kreas fortajn solidarecajn ligilojn super la landlimoj.

**Informado.** – SAT funkciigas Informservon, kiu liveras interesajn sciigojn pri la laborista vivo kaj konigas diversajn faktojn, kiujn kutime ne atentis la agentejoj kapitalistaj. Tiel multaj neriĉaj gazetoj povas ricevi senpage originalajn informojn.

En sia Jarlibro SAT publikigas la adresojn de la laboristaj organizoj, kiuj uzas esperanton en sia korespondado, kaj tiel ĝi plifaciligas kaj simpligas la rilatojn inter tiuj organizoj. SAT-anoj estas ĉiam pretaj servi kiel tradukantoj kaj interpretantoj per esperanto. Ili ankaŭ aranĝas korespondadon de fabriko al fabriko, de metiejo al metiejo, kaj tiel ebligas la komparon de laborkondiĉoj en diversaj landoj. Unuvorte ili uzas ĉiujn okazojn por pruvi per faktoj, kiom povas utili komuna lingvo uzata mondscale.

\*

\*            \*

**Klerigo.** – Estas bone konate, ke geknaboj, eĉ plenaĝuloj, perdas emon al la lernado, tial ke, tuj ĉe ta komenco de lernobjektoj ili renkontas malfacilojn. Bona metodo de instruado procedas de facilo al malfacilo. Esperanto estante facillernebla lingvo, ĉefe ĉe la komenco, donas emon por lernado. La esperanta lernanto akiras konfidon al si mem, konstatante, ke li povis relative facile akiri sufiĉan scion de lingvo, kiu ebligas al li interriliatiĝi kun la tuta mondo. Tiel la lernemo enplantiĝas ĉe la esperantisto. Tia emo al lernado devas trovi kontentigon. Tial SAT prenis sur sin la taskon liveri lernilojn, instruilojn, librojn, ktp. en esperanto.

Por perfektigi en la elparolado, la SAT-rondoj organizas lekciojn, debatojn kaj diversajn diskutojn, kiujn partoprenas la anoj. Per tio ilia kleriĝemo pligrandiĝas kaj ili fariĝas pli kaj pli taŭgaj elementoj por defendi la interesojn de sia klaso

kaj labori al la konstruado de nova soci-ordo.

Plej eminentaj scienculoj kiel H. Puenkare (france: Poincaré; oni ne samigu lin kun la ŝtatiso R. Poincaré) kaj A. Ejnŝtejn (germane: Einstein) pruvis la relativecon en scienco. Eĉ geometriaj aksiomoj devas esti konsiderataj nur kiel oportunoj.

Oni ja daŭrigas instrui en ĉiuj lernejoj la tridimensian, "Eŭklidan" geometrion, kvankam estas pruvite, ke ĝi eĉ ne plu estas oportuna, kiam temas pri grandegaj distancoj. Tial, ekzemple, Ejnŝtejn uzas por siaj kalkuloj la kvardimensian geometrion de Rimano (germane: Riemann).

Ĉio en la mondo estas relativa. Ne ekzistas absoluta vero. Kaj tio ĝustas, "oportunas" precipe en sociologio. Tial tasko de SAT devas esti klerigi siajn membrojn en kontraŭdogma, kontraŭabsolutisma spirito. Per tia klerigado oni evitas, ke sin nomantaj liberpensantaj homoj konduku kiel dogmanoj, kiel maltoleremaj sektanoj.

\*

\*        \*

**Eduko.** – Homo povas esti tre klera, sed malgraŭ tio seneduka. La klerigado rilatas nur al la cerbo; la edukado rilatas ankaŭ al la cerbo, sed plie al la koro kaj al la volo. Socio el tre kleraj kaj sciencoriĉaj homoj povas tamen esti barbara. Belan ekzemplon pri tio liveras al ni la kapitalista soci-ordo, kie homoj malsatas, dum aliaj malsaniĝas pro troa abundeco da ĝuaĵoj. Tamen la kapitalismo malvolvis la

sciencon kaj teknikon jam nun ĝis tre alta ŝtupo.

Eduko ne estas samsignifa kiel agitado. Politikaj partioj plej ofte nur agitadas, kiam ili parolas pri edukado. Trafa edukado celas kreskigi ĉe la homo ne nur ĝentilecon kaj afablecon, sed precipe lojalecon, sincerecon kaj sindonemon por la komuna afero. Neniu movado povas prosperi, neniu klaso povas venki, se ĝi ne entenas anojn, kiuj ĉiam estas pretaj oferi sian bonstaton, sian personan profiton – sian vivon por la ĝenerala intereso.

Sendube la ekonomiaj kondiĉoj ludas la plej grandan rolon en la rilatoj inter la homoj. Eduk-sistemo, kiu malatentus tiun fakton, estus nur simpla senvalora metafiziko. Sed estas bone spertita fakto, facile pruvebla vero, ke neniu homa grupiĝo povas bone prosperi sen obeo al moralaj principoj. Plej perfekta maŝino bezonas oleumadon por funkcii. Homo malsaniĝas, se li ignoras higienajn leĝojn. Simile ia ajn socio ne povas ĝui pacon kaj bonstaton, se ĝiaj membroj ne estas morale edukataj.

SAT edukas siajn anojn en tiu senco, ke ili fariĝu sociemaj, helpemaj, toleremaj inter si, lojalaj kaj sindonemaj al sia klaso. Ni volas, ke la SAT-anoj estu fortvolaj, firmkarakteraj kaj persistaj homoj.

\*

\*       \*

**Kulturo.** – Oni povas esti klera, boneduka kaj tamen ne kultura. Ne ĉiu erudiciulo estas scienculo. Scii entenas la

idedon antaŭvidi. Amasego da konoj povas esti tute senutilaj, se ili ne ebligas antaŭdiri ion praktikan por la Homaro. Necesas kompreni diferencon inter klerigo, edukado kaj kulturo. Bonedukado povas ne esti klera. Ĉiu kultura homo estas klera, sed ne ĉiu klerulo havas kulturon.

Kulturo postulas komprenon kaj senton pri plastikaj artoj, pri beletristiko, pri filozofio, pri estetiko kaj etiko. Klerulo kaj bonedukado povas rilati al belo kaj bono kiel blindulo al koloroj. Sed kultura homo kapablas ĝue ŝati ĉiujn elmontrojn de celado al perfekteco, ĉiujn sopirojn al idealo. Nura klereco iel pensigas pri perfekta, delikata maŝino, sed kulturo donas la ideon pri krea laboro.

SAT ne povas malatenti tiun flankon de la prihoma problemo kaj devas celadi, ke ĝiaj membroj akiru elementojn de vera kulturo.

\*

\*        \*

**Literaturo.** – Por informi, klerigi, eduki, kulturi, SAT eldonas gazetojn, librojn kaj artaĵojn. La elekton de literaturo devas gvidi relativeca principo. Estas ja neeble ekscii tute certe, kiu el la diversaj sociologiaj kaj politikaj skoloj eldiras la veron. Eble neniu la tutan. Sociologio estas ankoraŭ tre juna scienco. SAT-anoj devas serĉi kaj elekti sian propran vojon, t.e. mem decidi, al kiu partio aŭ tendenco ili aliĝos por batali kontraŭ la kapitalisma ekspluatado. Pri la ekzisto de tiu ekspluatado, laboristoj tute nature ne povas dubi, ĉar ĉiutage

ili spertas ĝin. Dubo povas okazi nur pri la rimedoj, pri la maniero per kiuj ni povos pli facile kaj rapide emancipiĝi.

Sed kompreneble SAT-ano devas scii, ke manko de absoluta certeco ne estas sufiĉa motivo por ne agi. Por konstrui pontojn kaj maŝinojn, inĝenieroj utiligas kutime la Eŭklidan geometrion, kvankam ili bone scias pri la ekzisto de aliaj geometrioj, kies aksiomoj liverus al ili same ĝustan bazon por starigi iliajn planojn kaj fari kalkulojn. En la manoj de inĝenieroj geometrio estas ilo por konstrui; simile, partia programo estas ilo en la manoj de proletoj por sin liberigi.

SAT devas eldoni verkojn de ĉiuj aŭtoritataj teoriistoj. Anarkisto ne povas ignori la verkojn de Marks, de Kaŭcki, de Lenin; komunisto aŭ socialisto tiujn de Prudon, de Kropotkin, de Reklü. Nian Bibliotekon devas konsistigi indaj, pensigaj verkoj de ĉiuj homoj, kiuj sindone kaj sincere deziris la bonstaton de l' tuta Homaro.

Per tia eklektika procedo en la elekto de traduka literaturo, SAT treege helpas al la unuecigo de l' laborista movado. Sed multe pli grava ŝajnas al ni la eldono de verkoj originale verkitaj en la artefarita lingvo. Por ni ne ekzistas dubo, ke la uzado de racia lingvo utilas al la spirita raciigo de ties uzantoj.

Aliparte estas de ĉiuj lingvoscienculoj bone konstatita fakto, ke lingvo ludas en kia ajn socio rolon de plej ega graveco, ke la komuneco de lingvo sufiĉas por krei komunecon de kulturo kaj de sentoj. Per ĝia celado por starigi riĉan, originalan literaturon tutmondan, SAT fariĝos pli kaj pli potenca aganta forto en la historia procezo, kiu tendencas al neevitebla unuecigo de l' mondo. La tekniko

alproksimigas la korpojn; la lingvo, la literaturo intimigas la korojn kaj animojn. La literatura tasko de SAT estas unu el la plej gravaj kaj meritas ĉies atenton kaj subtenon.

Antaŭ ol kreiĝos valora originala mondliteraturo, SAT havu ankaŭ kiel taskon helpi al la laboristaj organizoj, kiuj decidis eldoni per siaj propraj elspezoj literaturon en esperanto. Ĉiu sperta esperantisto bone scias, ke por verki aŭ traduki tute korekte kaj klare en nia lingvo, longa praktikado estas necesa. Estus ega danĝero por la tuta mondlingva movado se organizoj uzus nian lingvon laŭ fuŝa maniero. Kiam tiuj organizoj decidis eldoni verkojn aŭ dokumentojn en esperanto, ili devos sin turni al SAT, kies tasko estas eduki aron da lertaj kaj kompetentaj esperantistoj.



## V

### **APERO DE NOVA TENDENCO: SENNACIISMO**

La Zamenhofa lingvo jam ekzistas de 40 jaroj; okazis 20 universalaj esperanto-kongresoj neŭtralaj kaj 8 universalaj kongresoj de SAT. Rilatoj inter esperantistoj el ĉiuj landoj fariĝis relative oftaj. Esperantio fariĝis kvazaŭa regno super la aliaj. Proletaj esperantistoj pro senlaboreco aŭ persekutoj de reakciaj registaroj estis dispelataj tra la mondo. Kaj ĉie ili povis konstati la ekziston de klasoj, de riĉuloj unuflanke kaj mizeruloj aliflanke; ili spertis, ke ĉie la ekspluatemo de la mastroj estas limigata nur per la klasbatalemo kaj organizkapablo de la ekspluatatoj. Fabrikestroj atentis nur pri la lerto kaj produkto-kapablo de la laboristoj, ne pri ilia nacieco. Okazas nemalofte, ke laboristaj regnanoj en iu lando plendas pro tio, ke ili senlaboras, dum "fremduloj" havas okupon. Tiel kreiĝas laborista naciismo. Tiuj proletoj ĝis nun ne komprenis, ke, ĉu rilate la aĉeton de laborforto aŭ krudaĵoj, ĉu rilate la vendon de fabrikaĵoj sur la merkato, la konkurenco jam delonge ne limiĝas je landlimoj, sed etendiĝas al la tuta mondo. Ekzemple, la stariĝo de teksindustrio en Hindio okazigis krizon en Britio kaj senlaborigis tie multajn laboristojn.

Aliflanke, post la patriota mondbuĉado, multaj nacioj "liberiĝis"; ŝtatoj "sendependiĝis". Kaj la proletoj el tiuj regnoj hodiaŭ konstatas, ke ilia situacio ne pliboniĝis. Ili

sekve konkludis, ke nacia liberiĝo estas por laboristoj simpla iluzio. Ĝi profitdonas nur al burĝoj, aŭ al tiuj kiuj okupas bone pagatajn ŝtatpostenojn. Nacie nur la komuneco de lingvo ligas la ekspluataton al la ekspluatanto. Sed proletaj esperantistoj rompis tiun ligilon; ili almenaŭ forte konvinkiĝis, ke la lingvaj baroj estas facile renverseblaj, ĉar ili povis mem interrilati tiom facile kaj amike kun alilandanoj en la tuta mondo. Tiel kreiĝis ia konkreta stato, ia **mikrokosmo** (malgranda mondo), sur kiu povis naskiĝi la ideo pri **sennaciismo**. Troviĝis anticipemaj spiritoj por prezenti al si bildon de tutmonda socio mastrumata laŭ raciaj principoj, socio en kiu ne ekzistus landlimoj kaj estus uzata kiel kulturlingvo nur esperanto.

Sendube estis multfoje parolite en la pasinta tempo pri mondcivitaneco, pri kosmopolitismo, pri tutmonda unuiĝo de la laboristoj. Sed tio estis plej ofte nur temo por parolado kaj literaturo. Konkrete, praktike nenio estis entreprenata por efektiviĝi tiujn pli-malpli nebulajn pensojn. Fakto estas, ke ĉiuj internaciaj kongresoj de la plej maldekstraj laboristaj organizoj, ĉu politikaj, ĉu sindikataj, ĉiam sin deklaris por la "liberiĝo de subpremataj popoloj", por ia sendependeco de l' nacioj ktp. Neniam la problemo pri liberiĝo de l' Proletaro estis starigata je sennacieca vidpunkto.

Kaj tio ne povis okazi, tial ke neniam la gvidantoj de la laboristaj organizoj okupiĝis pri la lingva demando. Nur la praktikado de esperanto en la kadro de **Sennacieca Asocio Tutmonda** povis ebligi tielan stariĝon de la problemo. Estiĝis sennacianoj, sennaciuloj, kiuj, prave, malprave – ne estas ĉi tie la loko por decidi pri tio – celadas orienti la laboristan

movadon laŭ sennacieca direkto. Ili argumentas, ke la laboristoj el Irlando, el Bretonio, el Nikaragvo, el Koreo, el Georgio, el Ĉinio, el Hindio aŭ el aliaj "subpremataj landoj" ne havas intereson oferi sian vivon por akiri nacian sendependecon; ili asertas, ke la sola inda kaj profitdona batalo estas la batalo kontraŭ la mastroj en la fabriko mem, en la minejo mem, en ĉiuj laborejoj mem. Ili rekomendas laŭindustrian, ne inter-nacian, sed tutmondan organiziĝon.

La sennaciuloj ne kontraŭstaras al la stariĝo de "internaciaj trustoj", sed nur rekomendas al la laboristoj okupataj de tiuj trustoj, ke ili grupiĝu super la landlimoj en sama organizo por pli efike batali kontraŭ la trusto-mastroj. Ili opinias, ke estas vana – eĉ reakcia – penado kontraŭstari al pli supera formo de organizado de l' produktado. En la pasinta tempo, kiam ribelantaj laboristoj detruis maŝinojn, ili agis reakcie kaj ne povis malebligi la senĉesan malvolviĝon de l' maŝinismo. La trusta organizado de l' produktado preparas la grundon por socialisma mastrumado. La sennaciuloj ankaŭ ne kontraŭbatalas la kapitalistan imperialismon pro jenaj du motivoj:

1) Laŭ Lenin, "la imperialismo estas la lasta stadio de l' kapitalismo"; 2) laŭ Marks, "la Socialismo povas naskiĝi nur el la kapitalisma sistemo elkreskinta ĝis plena matureco".

Se ĝustas tiuj asertoj de tiom eminentaj gvidantoj de l' laborista movado, estas memevidente, ke barante al la malvolviĝo de la "lasta stadio de l' kapitalismo", oni samtempe malhelpas al la stariĝo de l' Socialismo. Cetere, la popoloj, kiuj ne kapablas tiri profiton el la naturaj riĉaĵoj, troviĝantaj en "siaj" landoj, ne rajtas laŭ natura leĝo malhelpi

aliajn utiligi tiujn riĉaĵojn.

Aliparte, estas facile konstatebla fakto, ke la disvolviĝo de la esperanta movado en ĉiuj mondpartoj nur postsekvas la enpenetron de l' kapitalismo ĉe la malfruiĝantaj popoloj. Kontraŭbatali la imperialismon signifas bari al la historia procezo, kiu tendencas nepre al starigo de mondmastrumado kaj mondlingvo. La sennaciuloj argumentas, ke ili kontraŭbatalas la kapitalismon ne pro tio, ke ĝi estas imperialisma, sed simple tial ke ĝi estas sistemo, kiu tendencas ekspluatadi la mondon por la sola profito de nur unu klaso da homoj. Per la fakto, ke homoj malkonfesas ĉian naciecon, estas memkompreneble, ke ili ne povas defendi la apartajn interesojn de iu ajn imperialisma nacio. Sed ili klare konscias, ke estas vana elspezo de energio provi haltigi la historian evoluadon. Oni ne devas celi haltigi nehaltigeblan fluon, sed nur zorgi, ke ĝia antaŭenirado faru kiel eble malplej da viktimoj<sup>[1]</sup>. La sennaciuloj asertas, ke la sola inda kaj trafa batalo estas nur tiu por atingi, ke ĉiu homo, – ĉu virino, ĉu "fremdulo" – havu la samajn rajtojn kiel la viraj kaj enlandaj laboristoj.

\*

\*

\*

Kompreneble, la sennaciula tendenco ne havas en SAT pli da rajtoj nek malpli ol la aliaj tendencoj. Ni jam diris, ke nia Asocio estas superpartia; necesas insiste aldoni, ke ĝi estas plie supertendeca. Sed estus ankaŭ nelojale en ĉi tiu verketo,

kies celo estas konigi la laboristan esperantan movadon, prisilenti la ekziston de tendenco, kiu kelkrilate ne akordiĝas kun la nuntempa programo de la laboristaj partioj.

Oficiaie, statute SAT konfesas sennaciecon en sia organizformo, sed ne sennaciismon kiel socipolitikan teorion. Ĉiu devas bone noti tion en la memoron. Se la estonto montros, ke la sennaciismo malvolviĝas paralele al la malvolviĝo de l' imperialismo kaj de l' mondlingvo, oni devos konkludi el tio, ke la sennaciuloj estis pli kapablaj ol aliaj antaŭvidi la malproksiman celon, al kiu, ofte senkonscie, sin direktas la Homaro. Se tiel ne okazos, nu, la estontaj historiistoj simple parolos pri la sennaciistoj, kiel pri revuloj, utopiistoj. Dume ilia agado neniel povas ĝeni en la laborista movado, ĉar ili propagandas nur inter la esperantistoj. Ili ja opinias, ke propagandi sennaciismon al malsamlingvanoj estus same malsaĝe kiel instrui beletristikon al analfabetoj.

Nur la sperto, la eksperimento povas montri la pravecon aŭ malpravecon de teorio. SAT nur ebligas starigi kaj diskonigi la pravigendan sennaciismon.

## Piednotoj

1. ↑ "La imperialismo estas nedisigeble ligita al la kapitalismo en ĝia nuntempa formo kaj sekve la **rekta batalo kontraŭ la imperialismo estas absolute vana...**" (Lenin, "La Imperiismo lasta stadio de l' kapitalismo, pĝ. 119-120 de la franca eldono). En la sama verko Lenin riproĉas al Kaŭcki, ke lia opozicio al

la imperialismo estas "etburĝa, reformista, reakcia en siaj ekonomiaj bazoj..."

## VI

# SAT KAJ LA NACILINGVAJ ASOCIOJ ESPERANTISTAJ

Kvankam esperanto jam akiris tre atentindan disvastiĝon, estus tamen eraro opinii, ke la granda publiko estas bone kaj ĝuste informita pri la mondlingva demando. Tian informadon povas fari nur nacilingvaj aparatoj.

En la nacilingva propagando montriĝis ankaŭ necesa la laŭklasa apartiĝo de la esperantaj organizoj. Tial en kelkaj landoj stariĝis L.E.A. (Laboristaj Esperantistaj Asocioj). Ili havas kiel taskon ne nur propagandi por esperanto, sed ankaŭ organizi kursojn por lernigi la lingvon kaj eldoni lernolibrojn por ĝin instrui.

Utilas ankaŭ, ke tiuj nacilingvaj por-esperantaj aparatoj interŝanĝu spertojn pri la propagand- kaj instrumetodoj. Kaj por tion atingi internacia ligilo estas necesa. Pro tio kelkaj Kamaradoj klopodis por starigi esperantan Internacion. Ili estis influataj de la fakto, ke la laborista movado estas organizita internacie. Imitemo forgesigis ilin, ke la esperantistoj forrenversis inter si la lingvajn barojn kaj sekve neniel bezonas imiti la organizmanieron de nesamlingvanoj. La vidpunkto de tiuj internacianoj estis des pli erara; ke ili ne sufiĉe atentis pri la neceso uzadi praktike la lingvon. La ekzisto de SAT, peresperanta aparato, kies celo ĝuste estas ebligi la praktikan utiligadon de esperanto, povis tre facile

solvi la demandon pri internacia ligilo inter la L.E.A. Homo kapabla levi 100-kilograman ŝarĝon, povas same bone levi 10 kilogramojn. SAT estante konstruita por interrilatigi la laboristajn esperantistojn el ĉiuj mondpartoj, povas ankaŭ tre facile ŝervi al la L.E.A. por interŝanĝi siajn spertojn aŭ ĉe aliaj okazoj. Tiucele la per-esperanta aparato disponas spacon en sia semajna gazeto por ĉiuj gravaj novaĵoj kaj demandoj, havantaj intereson por la tuta laborista esperantistaro.

Kiu bone komprenis, ke la plej grava afero en la mondlingva movado estas la tuja aplikado de la lingvo; ke sekve ĉiuj laboristaj esperantistoj havas la devon aliĝi al SAT, tiu facile konsentos, ke la ekzisto de ĉi tiu lasta malnecesigas la starigon de esperanta internacio. La sperto cetere montris, ke ĉiu provo tiucela fiaskis. En ĉiuj – neoftaj – okazoj, kiam klopodoj ĉe internaciaj instancoj estas utilaj por la propagando de esperanto, tiam SAT povas bone plenumi la taskon kaj paroli je la nomo de ĉiuj laboristaj esperantistoj. Vere konsciaj mondlingvanoj ja estas nur tiuj kiuj aliĝas al SAT kaj klopodas por pli kaj pli penetrigi la uzadon de la lingvo en la socian vivon. Kaj nur tiuj praktikuloj povas havi aŭtoritaton por paroli je la nomo de la esperantista movado.

Aliparte, oni jam povas antaŭvidi la tempon, kiam la L.E.A. – almenaŭ en sia nuna formo – ne plu estos necesaj. Kiam esperanto estos vere grandskale uzata, ĝi sin propagandos mem per la aplikado. Tiam en ĉiu lingvoregiono oni bezonos nur eldonkooperativon por liveri nacilingvajn lernilojn.

Cetere, kelkaj instruistoj opinias, ke oni povas tute bone lernigi la lingvon sen ia ajn nacilingva materialo. Pri tiu



punkto mi ne havas firman opinion, ĉar tro malofte mi instruis la lingvon. Almenaŭ ne povas esti dubo, ke en la intereso de la lingvo-unuco estas dezirinde, ke oni utiligu kiom eble malplej da nacilingva instruilaro. Tion farante oni sin direktas al la fincelo laŭ la plej rekta vojo. Estas evidente, ke kiam esperanto estos fariĝinta la sola kulturlingvo en la mondo, tiam oni instruos ĝin en la lernejoj laŭ la sama maniero kiel oni faras nuntempe pri la nacilingvoj t.e. peresperanta instruado de esperanto. Tiam estos tute sensece paroli pri neceso de nacilingvaj lernolibroj.

El tiuj konsideroj oni estas nepre alkondukata konkludi, ke la rolo de la L.E.A. pli kaj pli tendencos malgraviĝi, ĝis ili fariĝos tute superflujaj.

Dume SAT restos ankoraŭ necesa por plenumi la taskojn, kiujn ni difinis al ĝi en la IV-a ĉapitro. Estonte kiel nuntempe la rolo de nia per-esperanta aparato restos la plej grava kaj zorginda.

## VII

# SAT KAJ LA OFICIALAJ INSTITUCIOJ DE LA ESPERANTISTARO

Okaze de la Unua Universala Kongreso de Esperanto (Bulonjo-*ête*-Maro, France: Boulogne-sur-Mer, 1905) estis fondata **Lingva Komitato** (L.K.) kun la celo prikonsiliĝi kun D-ro Zamenhof kaj **zorgi pri la konservado de la principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evoluadon**. La nombro de L.K.-anoj ne estas limigita. Nuntempe ili estas 110 el 24 diversaj landoj. La L.K. elektas mem siajn anojn. Rajtas prezenti kandidatojn la landaj asocioj esperantistaj kaj la fakaj societoj. La L.K. elektas inter si superan komisionon el 17 membroj, kiuj konsistigas la Akademion.

"La **Lingva Komitato** kaj ĝia **Akademio** ne havas la rajton iniciati iun ŝanĝon, korekton aŭ aldonon, nek krei novajn vortojn; ili devas nur konstati, kontroli, elekti, konsili, rekomendi aŭ malrekomendi; ili estas nur ordigiloj, moderigiloj kaj reguliloj, kiuj celas konservi la necesan unuecon kaj harmonion.

"La rolo de la Lingva Komitato kaj de la Akademio ne dependas de la plaĉo de iliaj anoj, nek de la okaza ŝanĝebla opinio de iuj esperantistaj grupoj au kongresoj. Tiun rolon, tre klare kaj precize difinitan per la Fundamento, – kiu estas konstitucia leĝo por ĉiu esperantisto, – per la Fonda Regularo kaj per la Zamenhofaj komentoj kaj konsiloj, devas akcepti

ĉiu Komitatano kaj Akademiano." (El **Deklaracio de la Akademio**, decembro 1920).

Ni ne intencas esplori ĉi tie ĉu tiuj institucioj funkcias normale kaj kontentige; sufiĉas nun deklari, ke la principoj laŭ kiuj ili estis fondataj ŝajnas al ni ĝustaj kaj saĝaj.

Sed ekzistas aliaj t.n. oficialaj institucioj, pri kiuj estas necese diri kelkajn vortojn.

En la jaro 1922, ĉe Helsinki, okaze de la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto, estis farata kontrakto inter **Universala Esperanto-Asocio** (U.E.A.) kaj la landaj asocioj. El tio rezultis organizo, kies strukturo estas jena: ĉe la bazo sidas la naciaj societoj unuflanke kaj UEA aliflanke. La naciaj societoj delegas po unu reprezentanto kaj tiel stariĝas **Plena Estraro de la Esperanto-Movado** (P.E.). Paralele al tiu P.E. staras la **Komitato de U.E.A.** Ambaŭ instancoj siavice elektas po tri membroj, kiuj konsistigas la sesmembran Internacian **Centran Komitaton** de la Esperanta Movado (I.C.K.)

Tiu I.C.K. pretendas reprezenti la tutan esperantistaron kaj paroli je ĝia nomo. Oni ne bezonas longe esplori la aferon por baldaŭ konvinkiĝi, ke la sinjoroj, kiuj starigis tiun aparaton, simple uzurpas rolon kaj trompas la neinformitan kaj kredeman publikon. Parolante je la nomo de la esperantistaro, la uzurpuloj ja sukcesas kelkfoje atingi, ke malavaremaj personoj donacas monon al ilia "oficiala institucio", kun la kredo, ke ĝi fakte reprezentas la tutan esperantan movadon.

Ni diris, ke tiu I.C.K. uzurpas rolon kaj jen pravigado de nia diro: Jam en kelkaj landoj la laboristaj esperantaj asocioj

havas pli da membroj ol la "naciaj oficialaj societoj". En Sovetio cetere **Sovetrespublikara Unio Esperantista** tute ne havas reprezentanton en P.E. Aliparte ne ĉiu esperantisto aliĝas al U.E.A. kaj se la progreso de SAT daŭras lau la ĝisnuna proporcio, nia organizo havos post du-tri jaroj pli da membroj ol la "oficiala" U.E.A.

Estas do tute klare, ke I.C.K. ne reprezentas la tutan esperantistaron, ĉar la laboristaj asocioj ne havas en ĝi reprezentantojn. Utilas ankaŭ mencii, ke ne regas en tiu organizo konkordo kaj harmonio. En la okuloj de personoj bone informitaj, I.C.K. ne havas aŭtoritaton.

La laboristaj esperantistoj sekve agnoskas kiel **oficialajn instituciojn** nur la Lingvan Komitaton kaj ĝian Akademion. Estas unu el la taskoj de la organizita laborista esperantistaro klopodi, por ke, estonte, tiuj institucioj funkcii normale. Nuntempe tro da LK-anoj estas tiaj nur titolo, tro da ili estis elektataj pro konsideroj tute fremdaj al ilia lingva kompetenteco. Ĝis nun sole la t.n. neŭtraluloj okupiĝis pri la lingvaj institucioj de la esperanta movado. Necesas, ke la laboristaj esperantistoj – ne ĉiuj estas malkleraj kaj malsaĝaj – enblovu freŝan aeron en la ŝima atmosfero de la Lingva Komitato kaj Akademio; necesas, ke ili enfluigu novan sangon en tiuj malviglaj organismoj.

\*

\*       \*

La laborista esperantismo sin bazas sur la principo, ke la artefariteco kondiĉas la homan progreson; ĝi sin apogas sur la konvinko, ke la Laboristaro povos sin tute liberiĝi kaj starigi pacon en la mondo nur se ĝi firme organiziĝas laŭ tutmonda skalo kaj celas formi nedisigeblan unuon. Tia unuiĝo estas ebla nur per la helpo de komuna lingvo. Nia movado pravigas sian ekziston per la konstato, ke la laboristaj gvidantoj malatentas la tre gravan lingvan demandon kaj tiel senkonscie perfidas tiurilate la interesojn de l' Proletaro.

La laborista esperantismo ne ludos en la estonto malpli gravan rolon ol la kooperativismo kaj sportismo. La kooperativisto lernas la mastrumadon por povi anstataŭi la ĥaosan kapitalistan produktaĵ-distribuadon; la sportisto lernas akiri korpan fortikecon kaj sanon; la esperantisto lernas plie akiri la intelektajn kaj moralajn ecojn necesajn por esti vera kaj inda mondĉivitano.

La Leganto bonvolu noti en la memoron tiujn niajn nerefuteblajn konkludojn. Per tio li certe konvinkiĝos pri la neceso pli kaj pli forte antaŭenpuŝi, plifirmigi kaj kapabligi la SAT-movadon.

---

# Absolutismo

## ENKONDUKO.

Necesas enkonduki ĉi tiun broŝuron per kelkaj klarigaj vortoj. La nederlandlingva LEA (FLE) invitis al sia kongreso kdon Lanti, ĝis antaŭ ne longe gvidanto de SAT, por fari paroladon. Ĝi lasis al li elekti la temon, kies enhavon la legantoj nun povas ĝui en ĉi tiu broŝuro. Laŭ deziro de la kongreso nia LEA faris la necesajn paŝojn por eldoni la paroladon en la nuna formo, kion SAT aprobis fari en kunlaboro kun ni, ĉar ni same kiel la kongreso opinias la paroladon vere inda por esti pli vaste konata. Estas vere, ke ni ne postulis de kdo Lanti oficialan paroladon kaj li pravas, ke ni fidis en lia prudento.

Kaj eble tial, ke kdo Lanti ne estis ligita, li povis sin esprimi libere, por doni al ni klaran bildon pri la danĝeroj de la absolutismo. Kompreneble ni ne atendas, ke ĉiuj samopinias pri la enhavo. Se ĉi tiu broŝuro nur efikas pripensigon de la problemoj, kiujn la parolinto tuŝis, tiam ni jam estas kontentaj.

LA ESTRARO DE FLE.

## KARAJ GEKAMARADOJ!

Akceptinte paroladi hodiaŭ ĉi tie, mi supozas, ke vi ne atendas de ni parolaĵon kun karaktero pli malpli oficiala, pli malpli programeca. Cetere la estraro de via Federacio difinis al mi neniun temon. Ĝi verŝajne fidis — ĉu prave?! — al mia prudento por ne pritrakti demandojn, kiuj povus malagrable tikli viajn sentojn; sendube ĝi opiniis, ke ne ĝermos en mia kapo la intenco elekti dornoplenan temon, per kiu mi tro akre pikus okulojn k ŝirus orelojn.

Tamen, ĉu konvenus, ke mi parolu al vi pri malaktualaj demandoj, por kiuj vi eble havus nenian intereson? Ĉu fari apologion por nia lingvo? Ĉu priskribi k laŭdi nian movadon? Tio ŝajnas al mi ne trafa k tute superflua.

Eble vi almenaŭ atendas de mi kuraĝigajn, esperigajn, se ne entuziasmigajn vortojn. Tiaokaze vi permesu al mi tuj konigi pri tio mian starpunkton, per cito de frazo, kiun mi ĉiam donis al mi kiel regulon: „*Ne necesas esperi por entrepreni, nek sukcesi por persisti.*”

Oni ja devas difini al si celon en la vivo. Ĉiu normala k sana homo sentas en si bolantan energion, kiu nepre devas elŝpruci. La esenca demando sekve estas: kiel plej bone utiligi tiun energion? Mi ĉiam opiniis, ke ne ekzistas pli trafa maniero ol dediĉi sin al alta, nobla celo, — k tia certe estas la agado por ekipi nian klason per tutmonda interkomprenilo k tiel helpi al ĝia venko super ekspluatado k maljusto.

Entuziasmigan paroladon mi ne kapablas, nek deziras fari,

tial ke *vole* mi kutimiĝis min turni al la racio de l' homoj k ne al iliaj sentoj. Ne pro malŝato al la entuziasmo tamen, sed simple pro la konvinko, ke la plej arda fervoro devas ĉiam resti sub la dependo de l' malvarma racio. Blinda entuziasmo povas iafoje esti malutila k eĉ danĝera.

Ĉar miaj diroj ne havos oficialan karakteron; ĉar mi nenial celas akiri vian senrezervan aprobon, eble vi konsentos al mi la rajton tute libere, verŝajne hereze, konigi mian vidpunkton pri la nuna stato de la aferoj en la mondo. Mi ne havas alian celon, nek pretendon ol instigi vin al memstara pensado. Tiu sinteno forte kontrastas, ĉu ne? kun tiu de politikaj agitistoj, kies paroloj kutime devas esti aprobataj per fina rezolucio. Tion mi ne diras riproĉe al ili, sed nur por substreki, ke ne ĉiu povas havi la saman taskon en la vivo...

Vi ĉiuj certe konsentos, se mi diros ke la epoko, kiun ni travivas, ne estas tre ĝojiga por ni, laboristoj. Ni ja konstatas, ke nia klaso multloke spertas malvenkojn. Kaj ĉie, ĉie senescepte, ĝia vivnivelo malaltiĝis dum la lastaj jaroj. En landoj kiel Germanio k Aŭstrio, kie la laboristaro estis tre bone organizita, tie tamen venkis la faŝismo k la tieaj organizoj estas detruitaj. Ĉie demokratiaj reĝimoj estas minacataj de diversspecaj diktaturoj. Ĉie la individua libero estas sufokata de la Ŝtato. Ne kredu tamen, ke mi havas admiron por la burĝa demokratio. Sed neniam mi prezentis al mi la ekonomian emancipiĝon de nia klaso, per la perdo de ĉia politika libero, per submetiĝo al la arbitro de monstra burokrata aparato, kiu malebligas ĉian iniciativon k eĉ



postulas pasporton por ŝanĝi laborlokon.

Kaj kia kruela ironio! En epoko dum kiu distancoj pli k pli malgrandiĝas, sekve de teknikaj progresoj; kiam per radioaparato oni povas tuj kontaktiĝi kun homoj for de ni je miloj k miloj da kilometroj, ni tamen konstatas, ke nacioj k ŝtatoj starigas barojn pli k pli dikajn, murojn pli k pli altajn kontraŭ la interkomunikiĝoj. Neniam estis tiom forta kiel nun la tendenco de l' popoloj sin apartigi, sin fermi en landlimoj; neniam la nacieca ideologio estis tiom forta, tiom instige minaca.

Sendube antaŭ unu jarcento la granda plimulto de l' homoj restis kvazaŭ ŝlositaj en siaj apartaj provincoj aŭ regionoj; sed almenaŭ la tiamaj regantoj ne havis kiel la hodiaŭaj la eblon ordoni, komandi al ĉiuj regatoj. Metiistoj k kampanoj ne spertis kiel nuntempe en diktatorecaj landoj la senĉesan premon de l' Ŝtato. Hodiaŭ Stalin, Musolini, Hitler povas fakte kontaktiĝi kun sia tuta regataro pere de radio-aparato k laŭtparoliloj, instalitaj en konvenaj lokoj. Kaj helpe de partia organizo ili povas komandi al ĉiu ajn laboristo aŭ kampano el la plej malproksimaj partoj de la lando.

Kio rezultas de tio? La rezulto estas, ke homoj, havantaj tian grandegan, ĝis nun neniam ankoraŭ ekzistintan potencon, emas tute nature konsideri sin duon-dioj, kiuj ne povas erari k kies ordonoj sekve devas sendiskute esti obeataj.

Ĉiu el tiuj diktatoroj starigis sian apartan dogmon k neniu regato povas esprimi herezan opinion, sen risko esti

konsiderata kiel ŝtatperfidulo, meritanta ekstermon. Ne plu estas loko por dubemuloj. Estas ja tro granda aroganto, tro incita impertinento dubi pri la genio de gvidanto, kies paroloj k faroj estas centpocente aprobataj k akklamataj en kunvenoj k kongresoj..... Kiel tio povas okazi? eble vi pensas. Ne estas nun mia intenco esplori tiun aferon. Sed ĉu ne ŝajnas al vi tre signifa la fakto, ke ĉe la lasta XVII-a Kongreso de l' bolŝevika partio en Moskvo, raporto de Stalin estis unuvoĉe aprobatata, kio neniam antaŭe okazis, eĉ dum la gvidado de Lenin? Sama konstato estas farebla pri Hitler. Kaj la ĵus okazinta balotado, kiu donis dek milionojn da jesaj voĉoj al Musolini kontraŭ nur dekkvin miloj da neaj, ŝajnas al mi ne malpli signifoplena fakto.

Ĉe tiaj konstatoj estas por mi evidente, ke la homaro tendencas refali en ian mezepokon, similan al tiu, dum kiu regis la absolutismo de la religiaj ideoj. Malgraŭ grandaj progresoj sur la kampo de l' scienco k tekniko, la plimulto da homoj tamen konservis kredeman menson. Kiam iu ideo enplantiĝis en ilia cerbo, tiam ĝi baldaŭ fariĝas *absoluta „vero”*, nediskutenda dogmo. Tial nuntempe, same kiel dum la Mezepoko, homoj estas maltoleremaj k emas per ĉiuj rimedoj trudi sian propran vidpunkton.

Tiun maltoleremon ni cetere povis sperti mem en nia movado. Fanatikuloj ne kapablas kompreni, ke ekzistas homoj, kiuj volonte toleras ideojn, kiujn ili mem ne aprobas. Kiu ĝisoste *kredas* — estas ja nur kredo — posedi la „veron”, tiu tute nature ne povas toleri alian koncepton ol

sian propran. Toleri „eraron”, tio estus peko, krimo; necesas malebligi, ke erarantoj infektu la intelekton de aliaj homoj; estas devo fari ĉion eblan, apliki la plej drastajn rimedojn por senpovigi la herezulojn. Dum la Mezepoko, la Inkvizicio ilin turmentadis, torturadis, brulmortigadis. Sed estus eraro konkludi el tio, ke la inkviziciuloj estis pli kruelaj ol aliaj tiamaj homoj. Kelkaj el la turmentistoj eĉ sincere kompatis siajn viktimojn; sed ili opiniis, ke la turmentoj estas necesaj k eĉ havos bonan rezulton, ĉar per ili eble saviĝos la animo de l' turmentatoj.

Cetere la menso de multaj viktimoj de l' katolika Inkvizicio ne multe diferencis tiun de la torturistoj. En lokoj kie la protestantoj estis la plej fortaj, ili kondukis same kruele kontraŭ katolikojn k liberpensulojn. Tiam en preskaŭ ĉiuj cerboj regis la *absolutismo* k la logika konsekvenco de tio povis nur esti la persekutado k ekstermado al alikreduloj.

Kiam oni ĵetas ekrigardon sur la laboristan movadon el la postmilita periodo, tiam oni bedaŭrinde konstatas, ke la absolutismo superregas ankoraŭ multajn kapojn. Pli da energio k tempo estis elspezataj en fratluktado ol en bataloj kontraŭ la ekspluatistojn. En la okuloj de dogmanoj, alipensantoj povas esti nur „perfiduloj”, „social-faŝistoj”, „renegatoj” ktp. En nia propra esperanta movado blovis vento de absolutismo, kiu baldaŭ detruis ties unuecon. La fundamentaj ideoj, klare esprimitaj en la Statuto k antaŭ kelkaj jaroj preskaŭ unuanime aprobitaj per tute libere funkciinta ĝenerala voĉdonado, fariĝis senenhavaj vortoj por homoj, regataj de pasia maltoleremo.

Alian pli malnovan ekzemplon pri bedaŭrinda konsekvenco de absolutismo oni povas trovi en la mondlingva movado. Ĝis la jaro 1907-a la mondlingvanoj unuece batalis por esperanto. Sed jen aperis homoj kun projekto de lingvo „science” prilaborita. Ili asertis k sendube sincere kredis, ke ido estas la sole taŭga, la definitiva k sekve la nepre venkanta mondlingvo. Tial la idistoj ne timis fari skismon en la esperanta movado, k la rezulto estis, ke dum pluraj jaroj multe da tempo, energio k mono estis elspezataj en bataloj inter samcelanoj.

Mi ne pensas, ke ĉiuj esperantistoj tiam estis senigitaj je absolutismo. Tre certe multaj ankaŭ opiniis, ke nia lingvo estas la plej taŭga k perfekta. Eble ili eĉ bezonas tion kredi por ĝin propagandi. Oni ja devas havi konvinkon, ke io estas bona k taŭga por dediĉi sin al ĝia sukcesigo. Ni ĉiuj scias laŭsperte, ke esperanto estas taŭga lingvo. Ido, esperantido, novial, okcidental k sendube aliaj projektoj estas same taŭgaj. Sed absolutistoj kredas, ke ilia preferata sistemo estas la *sole* taŭga. Estas en tio granda diferenco. Tamen ĉiu homo devus scii, ke ni vivas en tempo, kiam eĉ fizikistoj konfesas la relativon de siaj scioj, rezultantaj de eksperimentado.

Ĉe serioza k profunda meditado pri la demando, oni nepre alvenas al la konkludo, ke sur neniuj kampo la absolutismo estas pravigebla k ke ĝi estas danĝera, koncerne la homajn interrilatojn. La dubemo estas nepre antaŭkondiĉo por la progreso en sciencoj k ĝi ankaŭ kondiĉas socian harmonion.

„Necesas kredi por agi”, oni ofte aŭdas. Tio dependas....

Unue ni interkonsentu pri la signifo de vortoj. Kiam mi envagoniĝis por veturi al via urbo, mi ja *kredis*, ke mi atingos ĝin. Tamen estas klare, ke mi ne havis pruvojn, certon pri tio. Akcidento povus okazi; nemalofte tiaj okazas; nemalofte personoj entreprenas vojaĝon k neniam trafas la celon. En mia kredo estis nenia absoluto. Estus pli ĝuste diri, ke mi fidis al la sorto. La penso, ke personoj deziras mian ĉeeston ĉi tie, ke mi povos eble utili iomete al la prosperigo de bona afero, tio estis sufiĉaj motivoj por ke mi konfidu miajn ostojn al la prizorgado de lokomotivisto. Neniam io estus entreprenata, se oni volus ĉiam havi la *certon* pri sukceso. Necesas do ne samigi la signifon de la vortoj kredo k certo. La kreduloj ĉe kiuj forestas ĉia dubo apartenas al la kategorio de absolutistoj; tiuj, miaopinie, estas malsaĝaj k eĉ iafoje danĝeraj homoj.

Aliparte, ni ne devas malatenti la fakton, ke ĉe iaj homoj la *riskemo* ludas grandan rolon en iliaj decidoj. Fidi al la sorto k havi la konvinkon, ke la entrepreno estas bona k nobla la celo tio plene sufiĉas por instigi homojn agadi. Dubemo ne povas do rezultigi nepre neagemon.

Kompreneble estus malsaĝe dubi pri ĉio. Malkonfesi absolutismon, tio ne signifas, ke oni ankaŭ ne agnoskas la ekziston de *objektivaj* veraĵoj. Mi ne povas dubi, ke mi staras nun antaŭ vi, paroladas k eble tedas vin. Neniu laboristo povas dubi, ke li estas ekspluatata ĉe la konstato, ke aliaj homoj, nenion utilan farantaj, tamen vivas en komforto k eĉ lukse; ĉiu facile konsentas, ke la socio estas malbone organizita, ĉar homoj mizeras k eĉ malsatas malgraŭ tio, ke

produktaĵoj abundas k eĉ estas detruataj pro manko de aĉetantoj. Ekzistas multaj tiaj demandoj pri kiuj preskaŭ ĉiuj homoj povas universale interkonsenti. Ankaŭ neniu dubas, ke ĉiuj punktoj de cirkonferenco estas en egala distanco de ĝia centro; ke tuto estas pli granda ol iu el siaj partoj; ke du rektoj paralelaj kun iu tria rekto, estas ankaŭ paralelaj inter si. Neniu dubas pri neceso ekveturigi trajnojn je difinita tempo; ĉiu konsentas, ke estas mallaŭdinde, ne plenumi promeson, libere faritan; heroeco vekas admiron ĉe ĉiu normala homo; k neniu atendas gratulon pro sia malkuraĝo; neniu dubas pri la ekzisto de Tokio, kvankam ne ĉiu veturis tien por vidi la urbon proprokule; ktp. ktp.

Sed ĉu Marks eraris aŭ ne? Ĉu Stalin pravas kontraŭ Trocki, aŭ inverse? Ĉu la malvenko de l' proletaro en Germanio k alie rezultas de tio, ke la politiko k taktiko de l' socialistoj estis eraraj? Ĉu tiuj de l' komunistoj estis la sole ĝustaj? Ĉu la regado de Hitler estos longdaŭra aŭ ne? Al tiaj demandoj necesas rilati kun dubemo....

Tamen, kion ni vidas? Ni vidas, ke la diversaj tendencoj de l' laborista movado kulpigas unuj la aliajn; insultas sin reciproke k ĉiuj agas laŭ maniero, malebliganta komunan agadon, kuniĝon de l' fortoj. Ĉiuj estas konvinkitaj, ke nur ili pravas; ke se okazis malvenko, kulpas en tio ne ili sed la aliaj, kiuj opinias havi nenion por riproĉi al si. Ĉiuj pli malpli estas regataj de absolutismo.

La plej karakteriza ekzemplo pri absolutismo estas la sinteno de l' patriotoj, Ĉiuj senescepte preferus morti ol perdi sian

naciecon. Kiom da francoj estas pretaj rezigni sian francecon? Kiom da angloj konsentus akcepti alian regadon ol la britan? Kiom da germanoj povus toleri eĉ la penson, ke ilia lando fariĝu nur geografia esprimo? Estas tute neeble respondi precize al tiaj demandoj, sed mi havas la konvinkon, ke eĉ en revoluciulaj rondoj troviĝas tre malmulte da homoj por sincere deklari: *ne gravas por mi perdi mian naciecon; male, mi sopiras al tia perdo k konscie penas akiri menson de mondcivitano.*

Ĉiu patrioto estas sub la regado de absolutisma ideologio, kiu igas lin, se necese, oferi sian vivon antaŭ la sanga altaro de l' patrio.

\* \* \*

Ĉe tiaj konstatoj ŝajnas al mi evidente, ke ideoj estas potencaj fortoj. Iafoje ili eĉ ludas pli gravan rolon ol ekonomiaj faktoroj mem. Pri tio mi mencias al vi tre karakterizan ekzemplon, kiun mi trovis lastatempe en geografia verko.

La aŭtoro unue rimarkigas, ke la vito-kulturon evidente kondiĉas grundo k klimato. En Laponio vito ne povus kreski. Sed la vito malaperis el landoj, kie ĝi kreskis antaŭ jarcentoj, malgraŭ tio, ke la grundo k klimato restas tute favoraj al ĝia kulturado. La vera origina patrio de l'vito estis Egiptio, Arabio, k Nord-Afriko. En la antikva tempo la vinoj el Egiptio k Kartago estis famaj. Nu, la disvastiĝo de la islamo — do idearo — en tiuj regionoj havis kiel rezulton, ke tie la vito-kulturo malaperis. Vi ja sendube scias, ke iu regulo el la Korano malpermesas trinki vinon. Sufiĉis do la ŝanĝo de

religio por ke sur la materia, ekonomia kampo okazu tre grava aliîgo.

Kompense, la vito enplantiĝis en mezvarmaj regionoj, tre malproksimaj de siaj originaj lokoj de kulturo. Estas ankaŭ interese noti, ke en Flandrio k eĉ en Skandinavio vito iam estis kulturata. En la kristana religio vino estas uzata por la meso k tiam estis malfacile venigi ĝin el malproksime; pro tio vito estis do kulturata eĉ en malfavoraj lokoj.

La sama aŭtoro (Petro Defonten — Deffontaines), kiu tute ne celas refuti la materialisman koncepton pri la Historio, mencias aliajn faktojn ekonomiajn, kies kaŭzoj estas pure religiecaj. Ekzemple, multaj vojaĝoj, la plimulto en landoj kiel Tibeto k la islama Afriko, havas religian kialon k ne ekonomian. Urboj kiel Jeruzalemo, Romo, Santiago de Kompostel, en Hispanio, Lurd, en Francio, La Meko, Lasa, en Tibeto, Benareso, en Hindio, venigas al si ĉiujare milojn k dek milojn da homoj nur pro religiecaj motivoj.

Antaŭ 87 jaroj, Karlo Marks diris, en *La Komunista Manifesto*: "La naciecaj diferencoj k antagonismoj inter la popoloj pli k pli malaperas, paralele kun la evoluado de l'burĝaro, kun la komerclibero, la mondmerkato, la samiĝo de la industria produktado k de al ĝi respondaj vivkondiĉoj."

Bedaŭrinde ni devas hodiaŭ konstati, ke la aserto de l'fama aŭtoro estas absolute erara: Oni vane serĉas signojn pri malapero de antagonismoj inter la popoloj k de naciecaj diferencoj. Male, ni vidas, ke ĉie la naciismo estas la plej potenca, la plej instige minaca ideo-forto, movanta la amasojn. Vidiĝas nenia signo pri kunfandiĝo de



*malsamlingvaj* nacioj en pli grandan unuon, sed male ĉie oni rimarkas tendencojn k agitadon por nacia apartiĝo k sendependiĝo. La patriotismo estas pli profunde enradikiĝinta ol antaŭ 87 jaroj, kiam Marks k Engels verkis la faman *Manifeston*. Ili tro alte taksis la rolon k efikon de la ekonomiaj faktoroj. Mondmerkato k industria egalformeco estas nur antaŭaj *kondiĉoj* por la kunfandiĝo de l'popoloj. Necesas plie, ke la spirito de l'homoj ankaŭ estu preparata al tiu kunfandiĝo.

Kaj nun mi demandas: ĉu io vere pozitiva, reale efika estis tiurilate entreprenata de la ĝisnunaj revoluciaj movadoj k laboristaj organizoj? Sen ia ŝanceliĝo mi respondas: ne! Sendube okazis internaciaj kongresoj k manifestacioj dum kiuj bombaste estis parolate pri tutmonda interfratiĝo, pri pacaj rilatoj inter la nacioj ktp. Sed malgraŭ tio la partoprenantoj, zorge flegantaj sian nacian lingvon, restis spirite k anime angloj, germanoj, italoj, rusoj ktp. Nenio konkreta estis entreprenata por forigi tian staton. Nenio, — ĝis la starigo de *Sennacieca Asocio Tutmonda*....

Kaj dum okazis tiuj internaciaj — ne sennaciecaj — manifestacioj, la diversaj ŝtatoj per la lernejo, per la preĝejo, per ĉiuj celkonformaj rimedoj klopodis tre sukcese encerbigi al siaj regatoj naciecan ideologion. Tial hodiaŭ la naciismo malebligas unuiĝon de l' popoloj, kvankam ekzistas objektivaj kondiĉoj por ke povu okazi tiu kunfandiĝo.

Pro teknikaj progresoj nia planedo ja pli k pli malvastiĝas, sed ŝajnas, ke la spirita horizonto de l' homoj ankaŭ malvastiĝis dum la lastaj jaroj....

Kaj tamen la senĉese malvolviĝantaj produktofortoj pli k pli postulas mondekonomion k liberan mondmerkaton. Kio rezultos de tio? Nu, karaj Gekamaradoj, pardonu min, sed ne promesinte prezenti al vi idilian bildon pri la nuna stato de l' mondo, mi povas nur antaŭdiri katastrofon. Ĉar la proletaro ne kapablis forte unuiĝi super la landlimoj k akiri la necesan konscion pri la historia misio, kiun bonkrede Marks atribuis al ĝi, verŝajne internacia milito kun ĉiuj siaj abomenindaĵoj kreos novan, provizoran ekvilibron en la mondo. Eble tiu milito detruos kelkajn limojn k konsistigos pli grandan unuon ĉirkaŭ la venkinta popolo.

La historia procezo ne povas longe esti haltigata, k ni scias, ke ĝis nun ĝi ĉiam trabatis al si la vojon per armiloj. Rimarku, ke en la nuna stadio ne eĉ ĉiuj popoloj samlingvaj estas unuigitaj. Kaj necesis la veno de Musolini k de Hitler sur la historian scenejon, por ke Italio k Germanio akiru sian definitivan nacian unuiĝon. Vi ja scias, ke en Germanio antaŭ ne longe ekzistis ankoraŭ duonsendependaj landoj. Nun tia sendependeco malaperis; sed ĉu ne estas plorinde, ke tian pli intiman kunfandiĝon de l' germana popolo ne faris la dum pluraj jaroj regintaj internaciistoj, sed fanatika naciisto?

\* \* \*

Karaj Gekamaradoj! mi avertis vin, ke mia parolado ne estos entuziasmiga. Vi certe nun konstatas, ke mi ne trompis vin tiurilate. Ne kredu tamen, ke nenio laŭ mia opinio estas farebla; ke ni devas tute rezigni antaŭ la sorto k atendi senage

la venon de pli favoraj tempoj por propagandi nian lingvon, k rekomendi al la laboristaro novajn vojojn, laŭ kiuj ĝi povos pli sukcese ol ĝis nun atingi sian emancipiĝon.

Antaŭ momento mi citis el *La Komunista Manifesto* frazon k montris ĝian erarecon. Sed en la sama verketo, sur la sama paĝo, Marks ankaŭ diras: „Unuigita agado (de l' proletaro), almenaŭ de l' civilizitaj landoj, estas unu el la unuaj kondiĉoj de ĝia emancipiĝo.” Kun tiu diro mi plene konsentas. Kaj en ĉies oreloj sonas la bona rekomendo: „*Proletoj el ĉiuj landoj unuiĝu!*”

Sed kial do ne okazis tiu bezonata k rekomendita unuiĝo? Miaopinie, ĝi ne okazis, tial ke la spiritojn regis absolutismo k tial ke mankis komuna lingvo. En tiaj kondiĉoj estis neeble atingi unuecon de agado. Estas absurde rekomendi unuiĝon al homoj, se ili ne povas interkompreniĝi, se ili ne povas legadi la samajn gazetojn, studi la samajn librojn k interdiskuti sen la helpo de tradukistoj k interpretistoj.

Se oni konsentas pri tio, sekvas, ke nia mondlingva movado ne devas esti konsiderata kiel io akcesora, malgrava, diletanta. Male, ĝi devas esti ĉe la bazo mem de ĉiu agado por unuigi mondscale la proletaron. Kaj mi ne timas aserti, ke la malatento al la lingva demando flanke de la plimulto da gvidantoj de la laboristaj organizoj estas unu el la kaŭzoj, pro kiuj la laboristoj ne akiris la taŭgan, celkonforman spiritostaton, kiu ebligus realan, ne fiktivan unuiĝon super la landlimoj.

For de mi tamen la opinio, ke esperanto estas universala

kuracilo; ke sufiĉus ĝin alpreni, por ke paco k bonstato regu en la mondo. Sed almenaŭ ĉiuj malnovaj SAT-anoj, kiuj daŭre k intense praktikadis nian lingvon, scias tre bone k laŭsperte, ke ne ekzistas pli taŭga rimedo por senigi sin je naciemo. Estas danĝere ne konscii pri siaj intimaj sentoj. Tion oni povis sperti en la jaro 1914. Antaŭ la eksplodo de l' milito multaj laboristoj manifestaciis je la sonoj de la *Internacio*; sed tuj ĉe la unuaj tamburfrapoj la nacia himno refariĝis por ili la plej kara. Kaj mi forte kredas, ke ĉe la venonta milito okazos tute same. Mi eĉ ne estos mirigata, se proletoj el Sovetio, je la sonoj de la Internacio, kiu estas la tiea... nacia himno!, k la francaj proletoj, je la nomo de la *Marsejezo*, kiu iam ankaŭ estis revolucia himno, aliance konsentos partopreni la militon kontraŭ Germanion. La regantoj k laboristaj gvidantoj facile trovos, kiel en 1914, pravigilojn por tia partopreno....

Sur la unuaj propagandiloj, eldonitaj de SAT antaŭ dektri jaroj, troviĝas jenaj frazoj, kiuj ŝajnas al mi ĉiam veraj k aktualaj:

„La ideala socio ne devenos tute preta el revolucio, kiun iuj prezentas al si kiel panaceon”.

„Estas do necese sin prepari, sin ekzercadi al la tasko de mondĉivitanoj, forigante el si mem la nenaturajn naciecojn, kiujn la ŝtata, enlanda edukado metis en niajn kapojn k korojn.”

Estas ja vere, ke nenia universala kuracilo ekzistas. Sed estas

same vere, ke nenia vera progreso povas okazi ekster la kapo k koro de l' homoj. Plej alte evoluinta tekniko povas paralele ekzisti kun moroj barbaraj. Ne estas vere, ke niaj ideoj estas nur la „reflekto” de la ekstera medio k ke sufiĉas aliigi tiun medion por ke ankaŭ aliĝu nia menso. Tio estas tro simplisma teorio. Cetere ĝiaj adeptoj mem kontraŭdiras ĝin per sia tuta agado: ili ja multe propagandas k agitadas por ŝanĝi la ideojn de tiuj, kiujn ili volas varbi al siaj propraj.

Ideoj ja ne ekzistas en si mem ekster la cerbo de homoj, sed ili tamen estas grandaj fortoj k kiam ili estas eraraj, tiam ekzistas grandaj danĝeroj. La rasismo, la naci-socialismo (konstruado de socialismo en unu sola lando) estas danĝeraj ideoj; ili preparas la menson de homoj al konsento partopreni naciecajn militojn.

Sed bonfaraj estas ideoj, kiuj celas al universalismo, al interfratiĝo k kunfandiĝo de l' popoloj. Ĉiu vera, reala progreso iras laŭ tiu direkto k ĉio, kio kontraŭas k baras estas esence reakcia, eĉ se la kontraŭantoj k barantoj patose eldiras revoluciajn parolojn....

Ĉe la komenco de mia parolado mi diris, ke por ĉiu normala homo iam stariĝas la demando: „kiel utiligi mian energion, mian liberan tempon?” Estas ja tre grava demando. Se sincera homo elektas eraran vojon, verŝajne iun tragediecan tagon okazos, ke ĝi ekvidos sian eraron k ĉagrene ekkonscios, ke ĝiaj fortoj estis misuzataj, estas senprofite perditaj.

Ĉu ni, esperantistoj, povas timi tian kruelan disreviĝon? Mi havas la firman konvinkon, ke ni povas esti tute trankvilaj

tiurilate. Se ni ne povas havi la certon, ke „ni atingos la celon en gloro”, kiel kantis Zamenhof en sia bela poemo „La Vojo”, almenaŭ ne ekzistas ĉe mi dubo, ke ni vojas al la ĝusta direkto. Mi diris pesimisme, ke ŝajne la homaro tendencas refali en ian mezepokon, sekve de la absolutismo, kiu pli malpli infektas preskaŭ ĉiujn intelektojn el la mondo; sed post tiu malbeninda tempo okazos renesanco. Post nigra nokto, ĉiam sekvas hela tago. Kaj eĉ en la plej profunda nokto ekbriletas iafaje steletoj en la ĉielo. Ni estu tiuj steletoj, kiuj modeste brilas k malebligas, ke vojirantoj tute malesperu. En la landoj, kie ni ĝuas ankoraŭ iom da libero, ni duobligu niajn penojn por enradikigi esperanton; kun niaj amikoj el la diktatorecaj landoj ni profitu ĉiujn okazojn, ni uzu ĉiujn rimedojn por ne tute perdi kontakton kun ili; ni kuraĝigu ilin k ne riproĉu, se ili aliĝas al la esperanto-organizoj tolerataj de diktatoroj.

Mi eksciis lastatempe, ke eĉ fanatikuloj, kiuj insultis min ĉe la Amsterdama k Stutgarta SAT-kongresoj, jam aliĝis al la Germana Esperanto-Asocio, kiu estas, kiel ĉiuj aliaj organizoj, sub la gvidado k kontrolo de naci-socialistoj. Mi ne riproĉas pro tio al tiuj kompatinduloj k ne kritikas ilian nunan konduton; ni ĉiuj faru nian eblon por sciigi al ili niajn fratecajn sentojn. Ni neniam forgesu, ke por niaj amikoj en diktatorecaj landoj estas danĝere utiligi esperanton por konigi alion ol la oficialan „veron”. En niaj korespondaĵoj kun ili ni estu prudentaj, ni ne agu senpripense, kio povus havi kiel rezulton sendigi ilin en ekzilon aŭ en internigejon.

Ŝajnas al mi neeble, ke la homaj socioj evoluu daŭre en

direkton, kiu kondukas al simila vivo kiel tiu de l' termitoj k.a. similaj insektoj. Mi gardas la esperon, ke pli malpli frue la homoj ĉie sur la tero retrovos emon por individua libero k ne plu rezignos ĉian dignon antaŭ despotoj diversspecaj.

Ni do esperu, ĉar ni estas esperantistoj k precipe ni gardu nin kontraŭ la kredo, ke nenio estas farebla, ke la historia fatalo estas neevitebla, ke la homoj estas nur instrumentoj en la manoj de diigitaj produktofortoj. Tio ne estas vera k ili grave eraris k trompis nin tiuj pseŭdo-sciencistoj, kiuj pretendas klarigi k antaŭdiri la sorton de l' homaro, adiciante la tunojn da fermaĵo, la kvantojn da karbo, la produktokvanton da ŝtalo en la mondo....

Tiuj homoj estas ĝenerale la samaj, kiuj atendas la kunfandiĝon de l' nacioj k lingvoj per, mi ne scias kia, miraklo. Esperanton kreis homa cerbo, instigite de la deziro pri fratiĝo inter la homoj. Tiun idealon ni tenu viva en niaj koroj k ni disvastigu ĝin kun la sama fervoro kiel iuj danĝeraj absolutuloj disvastigas siajn malhumanajn ideojn.

Al la naciismo, kiu frenezigas la homojn k faras el ili kruelajn bestojn, ni kontraŭstarigu la sennaciismon, kiu povos savi la homaron.

\*

\*        \*

Post la parolado, la prezidanto, kdo Faulhaber, demandas la ĉeestantaron, ĉu iuj deziras fari demandojn al kdo Lanti, kiu certe bonvole respondos.

Kdo Eerdmans el Rotterdam ekstaras k diras, ke en ĉi tiu granda ĉambro estas personoj el la lastaj vicoj, kiuj verŝajne ne bone aŭdis la interesan paroladon, tial ke kdo Lanti ne havas fortan voĉon; sekve estas dezirinde, ke ĝi aperu presita.

La prezidanto respondas, ke la estraro ekzamenos la proponon k decidos verŝajne favore; li aldiras, ke tio povus eble okazi en kunlaboro kun SAT.

Kdo Lempert el Gent demandas la prezidanton, ĉu ankaŭ gasto rajtas paroli pri la temo, kiun pritraktis Lanti. Ricevinte jesan respondon, li diras proksimume jenon:

Mi ne ĉeestis la komencon de la parolado de Lanti, sed aŭdis tamen sufiĉe por havi la konvinkon, ke necesas protesti kontraŭ lian pesimismen, kiu povas havi kiel rezulton malkuraĝigi laboristojn k sekve malutili al ilia batalo kontraŭ la burĝaron. Lanti ne rajtas semi dubon en niajn vicojn. Kaj precipe min indignas tio, ke li metas Stalin, Musolini k Hitler en la saman kategorion. Tio ankaŭ estas absolutismo. En Sovetio regas la Proletaro k la tiea reĝimo nenial estas komparebla kun la diktatorejoj el Italio k Germanio. Estas malbona faro de Lanti ataki Sovetion k tiel helpi al la burĝaro tutmonda, kiu deziras ĝian pereon. Mi protestas kontraŭ la dirojn de Lanti, kvankam mi ne estas komunisto; sed mi konsideras kiel devon defendi la sovetian popolon, la landon, kie oni konstruas socialismon....

Kdo *Lanti*. — Estas iel bedaŭrinde, ke la ĵus parolinta kdo devigas min ripeti, kion averte mi tuj diris ĉe komenco: Miaj



herezaj paroloj havas nenian programecan karakteron k ili nur celas instigi la aŭskultantojn al pripensado k al memstara prijuĝo. La kdo emfazis, ke li ne estas komunisto; tio liaflanke estas nekonsekvenca sinteno, ĉar li subtenas la vidpunkton de komunistoj. Sed ja ekzistas diversspecaj komunistoj k ne ĉiuj aprobas la politikon de Stalin. Mi mem apartenas al tiu kategorio. Cetere, ekde la stariĝo de la III-a Internacio ĝis 1928, mi estis kompartiano, kvankam jam ne tute „ortodoksa”. Ĝis tiam ekzistis en Komintern libera pensesprimo; tiam ne ankoraŭ estis naskiĝinta la esence reakcia teorio de Stalin pri eblo konstrui socialismon en unu sola lando k pri neceso de pensa „monoliteco” en la Partio. En Sovetio ne konstruiĝas socialismo, sed *ŝtatkapitalismo* el la plej malbona speco. Nenie en la mondo estas tiom granda diferenco inter la salajroj. La vivkondiĉoj de la simplaj laboristoj k kamparanoj estas tie mizeraj; mankas al ili la plej necesaj vivnecesaĵoj; mankas ĉia libero; regas ne la Proletario, sed la.... Sekretario.... Fulmotondro! tian „socialismon” ni ne volas....

Oni bonvolu kredi, ke se finfine mi akiris firman opinion pri la Stalina registemo, tio ne okazis sen longe antaŭa ŝanceliĝo k sen serioze objektiva esplorado estinte mem dum ok jaroj ano de Komintern, mi emis kroĉiĝi al miaj esperoj, al mia deziro kredi, ke tiu organizo estas la gvidanto de l' mondproletato. Sed fine mi tute disreviĝis k hodiaŭ konsideras kiel devon, averti la laboristojn, ke ili ne submetiĝu al iu ajn partia diktaturo, kiu neeviteble tendencas fariĝi diktatoreco de nur unu persono.

En la jaro 1922 mi jam vizitis Sovetion k restis tie dum tri

semajnoj. Reveninte kun malbonaj impresoj, mi publikigis ilin en la tiam *Sennacieca Revuo* (Sekve mi estas malnova herezulo), avertinte la legantojn, ke „impresoj” ne estas juĝo. Tiu simpla fakto klare montras ke tiam regis en Komintern libera pensesperimo. Eĉ anarkistoj en Sovetio povis ankoraŭ kunveni k publike paroladi. Sed hodiaŭ ?!....

De tiu tempo mi multe korespondadis kun kdoj el Sovetio; tie mi havas multajn amikojn, kiuj devas nun tute silenti k ne povas skribi al mi senpere. Mi observis k notis. Plie mi konas sufiĉe intime kelkajn personojn, kiuj iris tien kun entuziasmo por helpi k servadi. Ili ne restis tie dum kelkaj semajnoj, sed dum pluraj jaroj; tie ili laboris en diversaj fakoj k travojaĝis la landon laŭ ĉiuj direktoj. Tiuj homoj konas tre bone la situacion de la tiea laboristaro; elreviĝinte ili revenis k mi povis proprele aŭdi ilian detalan raportadon. Tiaj atestoj ŝajnas al mi multe pli valoraj ol tiuj de blufe k artifice aranĝitaj delegitaroj.....

Sed, Gekamaradoj, vi estas esperantistoj k do havas iun eblon esplori mem per korespondado. Kompreneble vi devas scii, ke ankaŭ la esperanta korespondado estas ŝtate organizita k kontrolata. Unu el la kaŭzoj de la skismo en nia movado estas ĝuste tio, ke SAT ebligis per sia Jarlibro senperajn interrilatojn kun Sovetiaj kdoj. La starigo de *Proleta Esperanta Korespondanto* (PEK) havis en la okuloj de la gvidantoj de SEU ĉefe kiel celon faciligi la kontroladon de la korespondado. Se vi volas ekscii ion alian ol la oficialan „Veron” pri Sovetio, vi devas serĉi korespondantojn ekster tiu aparato; necesas plie, ke vi akiru ilian fidon; ili devas esti

certaj, ke iliaj leteroj ne estos transsendataj al CK de SEU, kiel jam okazis fare de kdoj, kiuj sendube opiniis, ke tiujn leterojn skribis danĝeraj kontraŭrevoluciuloj. Vi devas kun ili elpensi ŝlosilon por interkompreniĝi kun viaj korespondantoj, tiele evitante, ke la cenzuristoj ankaŭ komprenu. Starigu tuj ĉe la komenco tute precizajn demandojn k avertu, ke la samajn vi jam faris al aliaj korespondantoj por povi kompari. Se vi estas sufiĉe paciencaj k persistemaj, mi certigas vin, ke post unu aŭ du jaroj vi estos kolektintaj materialon per kiu vi havos tute alian bildon pri la vivo de la laboristoj en Sovetio ol tiun, kiun disvastigas grandskale k multkoste la Stalina propagandaparato tra la tuta mondo. Tiel vi praktike utiligos la lingvon.

Konigi tiun mian sperton, fari tiujn rekomendojn, tio neniel signifas „ataki Sovetion”; tute male! tio povas nur helpi al la Sovetia laboristaro liberiĝi el parazita, mizeriga, sklaviga burokrataro.

Se mi parolis pesimisme pri la nuna tempo, instigis min al tio nur la faktoj. Nenio estas pli danĝera ol blinda optimismo. Mia pesimismemo neniam malhelpis min agadi k mi ne rekomendas senagadon. Tial mi kredas havi la rajton diri libere mian opinion pri ĉio, same kiel vi havas la rajton akcepti aŭ rifuzi miajn dirojn.

 La teksto estas [publika havaĵo](#) (*public domain*). Detaloj pri la licenco troviĝas ĉe la paĝo de la aŭtoro: [Eŭgeno Lanti](#).

# Herezulo

## GVIDPUNKTOJ DE "HEREZULO"<sup>[1]</sup>

### HEREZULO

libere, severe, sed objektive kaj sincere **kritikas** ĉion kaj ĉiujn. Ĝi **kondamnas** nenium sincerulon.

### HEREZULO

senkompate vipas ĉiajn absolutulojn kaj celas direkti la homojn al relativisma kompreno prl la vivo, kio estas nepra kondiĉo por ke ekzistu inter ili toleremo kaj paco.

### HEREZULO

celas la malaperigon de ĉiu nekunnaskita, neesenca diferenco inter la homoj el la tuta mondo kaj ilian sennaciecan unuiĝon.

### HEREZULO

subtenas ĉion, kio miksas kaj lutas inter si la popolojn kaj levas la homojn al pli deca, pli digna kaj pli larĝhorizonta vivo.

### HEREZULO

rekomendas al la proletoj, al la ekspluatatoj, ke ili batalu

nur por akiri ĉiam pli bonajn vivkondiĉojn, pli da libepro, pli da ŝatateco, kaj neniam pro teorioj, doktrinoj aŭ sistemoj, kiujn ili ne tute komprenas kaj pri kiuj fakuloj interdisputas.

HEREZULO

luktas kontraŭ ĉian gvidistecon – kio ne signifas malakcepton al ĉia gvidado.

HEREZULO

kontraŭbatalas ĉian emon al apartigo de l' homoj laŭ du kategorioj: intelektuloj kaj manlaboristoj. Ĉiu homo devas celi al mana kaj intelekta lerto.

HEREZULO

resumas sian tutan programon per du krioj:

**For ĉiajn dogmojn kaj diktatorojn! Vivu justo kaj libero!**

\*           \*

\*

## KLARIGOJ PRI LA GVIDPUNKTOJ

Leginte en la unua kajero de HEREZULO la ok gvidpunktojn, laŭ kiuj ni intencas redakti la revueton, kelkaj K-doj skribis, petante klarigojn. Tiujn ni volonte donas.

Unu leganto diras: "Vi volas kritiki ĉion kaj ĉiujn, tio ŝajnas al mi ne aprobinda; tiel vi agos nur negative, detruie, dum estus pli saĝe fari pozitivan, konstruan laboron..."

Ni facile komprenas la preskaŭan indignon de nia korespondanto. Li tamen bonvolu tute kvietiĝi kaj bone

pripensi la sencon de l' vorto **kritiki**. Ĝi ne havas nepre la signifon mallaŭdi, malaprobi. Oni eĉ povas **laŭde** kritiki verkon. Sekve neniun vidu en tiu nia unua gvidpunkto ian malbonan intencon, ian ajn malican mallaŭdemon. Cetere, al ni mem devas ankaŭ esti aplikata tia kritikemo. Kaj se nia K-do aplikus ĝin al si mem, li eble pli ĝuste komprenus la signifon de la gvidpunkto, kiun li malaprobas. Tie estas ja dirite, ke ni "**kondamnas** neniun sincerulon". Tiuj lastaj vortoj montras do, ke nia unua gvidpunkto estas nenial malbonintenca.

Kritiko estas necesa kaj ĝia manko en homaj socioj, en organizoj, signas tendencon al kreiĝo de dogmoj, al stariĝo de diktatoroj, al malaltiĝo de l' homa digno kaj finfine al enplantiĝo de sklavecaj socisistemoj.

Estas ja vere, ke nura kritiko ne alportas ion pozitivan. Ĝi eĉ povas esti efektive detrua. Sed plej ofte detruado estas unue necesa antaŭ ol komenci konstruadon. Aliparte, konstrui, ekzemple, kazernojn, tio estas pozitiva laboro sed neniel utila por la homaro. Ĉia ajn "pozitiva" laboro sekve ne estas laŭdinda, dum negativa, detrua agado povas kelkokaze esti utila.

Ni firme opinias, ke la laborista movado estas orientita laŭ malĝusta direkto. La sinsekvaj fiaskoj en plej diversaj landoj montras tion al ĉiu, kiu ne estas dogme blindigita. La malatento de l' gvidistoj al la esperanta afero, al la neceso faligi la lingvajn barojn inter la homoj, antaŭ ol rekomendi al ili unuiĝon, ĉiam ŝajnis al ni konscia aŭ senkonscia perfido al la laborista klaso. Bedaŭrinde eĉ ne ĉiuj laboristaj esperantistoj konscias pri tio; multaj emas ankaŭ konsideri

nian aferon kiel akcesoran.

Tamen estas sufiĉe atentinda fakto, ke centjara internaciisma propagando kaj agitado rezultigis nur la venkon de l' naciismo en la tuta mondo. "Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!" alvokis Marks kaj Engels (...) Sed tiu unuiĝo neniam havis realan fundamenton. La diversaj Internacioj fiaskis en sia agado, tial ke ilia tuta ŝajnvivo rezultis nur el la interrilatoj de kelkcentoj da gvidistoj. En krizaj momentoj homoj perdis ĉian influon sur la amason kaj plej ofte havis personan intereson renegatiĝi. Kaj tiel estos, tiom longe, kiom la homoj el la tuta tero ne havas la eblon intime, senpere konatiĝi kaj organiziĝi. La ĝisnuna internaciisma organizsistemo estas la plej granda iluzidona afero, kiun oni povas imagi.

Ĉion tion nia kritiko celas malkaŝe kaj sentime diri al niaj samsortanoj. Se tiu nia agado estas negativa kaj detrua, nu, tio ne ĝenas nin: necesas ja detruoi danĝerajn iluziojn. Ni konsideras kiel devon rekomendi al niaj Gek-doj, ke ili vane kaj senrezulte ne batalu; ke ili ne eluzu sian energion, irante laŭ malĝusta direkto.

Ĉu do ni trompu nin mem kaj trompu aliajn? Ĉu indas, ke liberpensantaj homoj sin lulu per iluzioj? Ĉu saĝa homo devas ankaŭ kondukti freneze, se li troviĝas inter frenezuloj? Ni gardu nin kontraŭ ĉiaj vanaj esperoj; ni lernu scii ĝuste taksi kaj ĝui la staton de homo, kiun gvidas racio kaj ne blinda entuziasmo. Ĉu ne estas ĝuinda sento la konscio esti saĝa inter malsaĝaj? Se ni ne povas ĉiam teni nian korpon libera, almenaŭ neniue registaro, neniue diktatoro, neniue gvidisto posedu nian spiriton, nian animon. **Eppur si muove**

(kaj tamen ĝi moviĝas), diris la granda herezulo Galileo, kiam la inkvizicio devigis lin publike malkonfesi sian opinion, ke nia planedo turniĝas.

Jes, ja ni kritiku ĉion kaj ĉiujn, tiel ke nur per tia sinteno ni restos liberaj homoj inter sklavoj.

Longe ni povus skribi, donante konkretajn ekzemplojn por pravigi nian unuan gvidpunkton. Sed ni sufiĉe alte taksas la intelektan nivelon de niaj legantoj, por ne dubi ke ili mem kapablas per propraj observoj kaj konstatoj ĝustan komprenon pri nia penso, pri nia celo.

\*

La **dua gvidpunkto** rekomendas relativismon pri vivkompreno.

"Ĉu do vi neas la ekziston de absolutaj veroj?" demandas iu; "ĉu, ekzemple, vi ne agnoskas la absoluton de la matematikaj principoj?"

Kiam temas pri abstraktaĵoj, oni ja povas apliki absolutajn principojn: du plus du estas kvar ĉie kaj ĉiam; sed du homoj plus du homoj neniam estas kvar tute samvaloraj estaĵoj. La samon oni povas eĉ diri pri objektoj. Sekve, la disciplino aplikebla en matematiko neniel taŭgas en sociologio. Mi tre timas la absolutulojn, kiuj ne komprenas tion kaj havas la pretendon esti kapablaj eldiri la veron pri soci-politikaj demandoj per rezonmaniero, taŭga nur en alia fako.

"Nenion pli belan mi konas ol apliki perforton por venkigi veron kaj juston." Jakobo Frederiko Fries.

Tion antaŭ nelonge mi legis hazarde sur la kovrilo de



revuo, kies ekzempleroj estis elmetitaj vendcele en esp-a kunvenejo. Tia eldiro preskaŭ timtremigas min. Kiu granda saĝulo difinos tute precize kaj senerare tion, kio estas la vero kaj justo? Kredeble la redaktoro de l' koncerna revuo opinias esti tia saĝulo kaj sendube pretas apliki aŭ aplikigi de policanoj perforton por venkigi **sian** veron, **sian** komprenon pri la justo. Stalin, Musolini, Hitler ankaŭ aplikas tiun belan maksimumon de l' germana filozofo. Kaj milionoj da entuziasmoj helpas en tio. Tiuj diktatoroj estas certe tute konvinkitaj, ke ili agas laŭvere kaj laŭjuste. Tamen la "vero" kaj la "justo" de Stalin ne tute samas kun tiuj de Hitler.

Jes, ja! "H-ulo" vipos ĉiajn absolutulojn, kiuj, konscie aŭ nekonscie, preparas la sklavecon de l' homaro, aŭ helpas pluigi ĝin tie, kie ĝi ekzistas. Sed rilate kelkajn absolutulojn, vipilo ne necesas; sufiĉas ridi al ili en la vizaĝon, aŭ simple leveti la ŝultrojn ĉe la aŭdo de iliaj pretendemaj filozofiaĵoj.

Dume ni rediru, ke rilatoj ne povas esti pacaj kaj glataj inter la homoj, se ili ne havas relativisman komprenon pri la vivo, kiel estas dirite en la dua gvidpunkto.

\*

Kiu legis supraĵe la **trian gvidpunkton**, tiu eble povas pensi, ke ni celas sammodeliĝon, unutipiĝon de l' tuta homaro. Tiel tamen ne estas. Tute male eĉ. Serioza kaj profunda pripensado komprenigas, ke la kunnaskitaj diferencoj, ekzistantaj pli malpli inter **ĉiuj senescepte** homoj, povus pli facile malvolviĝi kaj sin montri, se forestus ĉia diktatoremo, ĉia absolutemo en la pensoj kaj moroj.

Estas evidente, ke nacia lingvo, nacia edukado ne estas io kunnaskita, sed rezultas de situacioj kaj cirkonstancoj, kiuj ne estas ĉiamaj, kiuj eĉ ofte ne plu ekzistas konkrete. Ju pli la homoj estas memstare pensantaj, ju pli ĉiu el ili deziros esti unika specimeno de l' homa genro kaj ne iu naciانو, des pli ekzistos da ŝancoj, ke la kunnaskitaj diferencoj elkreskos.

Post ĉi tiu klarigo neniu sincera homo povos do aserti, ke nia deziro al sennacieca unuiĝo de l' tutmondo celas uniformecon. La sennaciismo tute ne signifas unutipecon de l' homoj; ĝi ne celas al griza, unutona, banala homaro, sed male al originaleco ĉe ĉiu individuo, al varieco inter ĉiuj teranoj.

\*

Supraĵa lego super la **kvara gvidpunkto** povus ankaŭ pensigi pri ia unutipaj kunfandiĝo de ĉiuj rasoj. Tia ne estas nia penso kaj cetere ni scias, ke fiziologie tio ne eblas. Tamen la rasismo estas nenatura, monstra teorio. Malpermesi aŭ eĉ malrekomendi la geiĝon inter malsamrasaj individuoj, tio estas tute arbitra. Laŭ la rezonmaniero de rasistoj oni povus same sofisme "pruvi", ke nur geiĝo inter homoj, havantaj la saĝan koloron de okuloj, aŭ de haroj, devas esti permesata.

Ne malpli arbitraj estus reguloj, bazitaj laŭ la formo de l' nazo, la grandeco de l' buŝo aŭ la longo de l' kapo. Eble iam troviĝos iu "scienculo", kiu argumentos, ke la tuta malbono en la mondo venas de tio, ke oni ne malpermesis geiĝon inter brakicefaloj kaj dolikocefaloj...

Kiam ni parolas pri mikso kaj luto inter la popoloj, ni

pensas, ke la homoj devas unue kaj ĉefe konscii pri sia homeco kaj ne pri sia nacieco aŭ raso, kio neniel signifas, ke ĉiuj devas fariĝi samtipaj. Ĉiuj homoj estas teranoj, ricevas lumon kaj varmon de l' sama suno; la saĝo ordonas, ke ili do forte konsciu pri tio kaj organizu la socion laŭ maniero, kiu ebligas ĝuadon el ĉiuj riĉaĵoj de nia komuna planedo.

\*

Jam aperis klarigoj pri kvar el la punktoj, kiuj signas al ni la vojon kaj montras nian apartan komprenon pri kelkaj soci-politikaj demandoj. Daŭrigante tiun klarigadon, ni tuj rimarkigas, ke la **kvina punkto** fakte estas sufiĉe klara per si mem. Ŝajnas al ni ja tute evidente, ke simplaj laboristoj ne povas legadi, kompari kaj primediti la tezojn de l' diversaj soci-politikaj skoloj, por eltrovi, kiu el ili estas la plej ĝusta. Marks, Prudon, Bakunin interdisputis dum jaroj kaj ĉiu el tiuj teoriuloj havis siajn respektivajn aprobantojn. Poste Pleĥanof, Lenin, Rosa Luksemburg same interbatalis per tezoj. Nuntempe Kaŭcki, Stalin, Trocki k.a. pli malpli famaj marksistoj interdisputis pri la plej ĝusta interpretado al la verkoj de sia majstro. Tia interdisputado estas interesa nur en tiu senco, ke ĝi montras la argumentkapablon de homoj. Sed fakte ĝi pruvas nenion.

Ĉiu el ni ja scias, ke tre lerta advokato iafoje sukcesas montri plej fian krimulon kiel simpatian homon; dum mallerta pledisto lasas kondamni senkulpulon. La lerto de dialektikulo estas tamen admirinda pro simila motivo laŭ kiu oni admiras la forton de atleto. Sed ĝi pruvas nur, ke ni devas

dialektikumi, por teni vigla nian intelekton, same kiel oni gimnastikas por ke nia korpo estu sana kaj fortika.

Atleto kutime marŝas kiel ordinara homo kaj ne ĉiam kuras kaj saltas rekordcele; simile al tio ni lasu nin gvidi per la simpla saĝo, kiam temas decidi pri ordinaraj aferoj en nia vivo. Kio koncernas nin mem, kio tuŝas nin en nia karno, en nia intima vivo, pri tio neniu pli bone ol ni povas prijuĝi.

En la XVI-a jarcento homoj interbatalis kaj mortigis unuj la aliajn, tial ke teologoj havis malsaman komprenon pri kelkaj partoj el la Biblio. Ĉu ne estas same bedaŭrinde kaj ridinde, kiam en nia epoko ni vidas proletojn, kiuj pugne interbatalas, tial ke doktoroj je marksismo ne interpretas tute same "**La Kapitalo**"n?

En Sovetio la laboristoj lasis sin sklavigi en la fabrikoj, tial ke gvidistoj konvinkis ilin per marksaj eldiroj, ke necesas, por "konstrui socialismon", labori pli streĉe, pli rapide kaj pli senpostule. La kruda rezulto de tio estas, ke la marksismo-klarigantoj konsistigas nun novan klason kun privilegioj diversspecaj.

Tiel en ĉiuj tempoj pastroj el ĉiuj religioj bone sukcesis havi komfortan vivon inter mizeraj piuloj...

\*

La **sesa punkto** estas la logika konsekvenco de la kvina. Tial ke ni ne volas toleri ian ajn pastrecon, la gvidado de organizo, ĉu sindikata aŭ partia, ne devas fariĝi profesio. Ni akceptas gvidantojn, ne gvidistojn. Kiu havis gvidan postenon dum kelkaj jaroj, tiu devas reiri al la fabriko kaj sperti denove

la tieajn laborkondiĉojn. Nur tiel oni povas eviti la fariĝon de novaj privilegiuloj.

Kelkfoje mi jam havis la okazon konstati la mensan aliĝon de proleto, fariĝinta gvidisto. Tiaj homoj pli malpli senkonscie akiris la spirito-staton de mastroj, de komandantoj kaj rilatas al siaj subuloj kiel al ia homa materialo. Ili plie sentas malŝatemon al siaj gvidatoj. Kaj tial ke ili akiris sian gvidistecon proprarimede kaj ne kiel sekvo de longjara studado en altgrada lernejo, tiuj homoj tute nature emas pensi, ke ili estas kvazaŭ de dio elektitaj por komandi kaj obeigi. Komprenible ekzistas esceptoj; sed inter la milionoj da pastroj sendube troviĝas ankaŭ kelkaj sanktuloj. Tiurilate la escepto konfirmas la ĝeneralan regulon. Tia spiritostato ĝerme entenas la elementojn por la stariĝo de novaj privilegioj, de nova ekspluatema klaso. Tio estas nun konstatebla en Sovetio, kie la novaj estroj ĝenerale kondutas pli krude kaj senkompate ol la malnovaj.

Tiaj gvidistoj famiĝis; iliaj manoj seniĝis je kaloj kaj jen okazas, ke ili ne plu sentas sin hejme, kiam la hazardo igas ilin interrilati kun malnovtempaj laborkunuloj. Ili nun preferas rilati kun t.n. intelektuloj, kiuj ĝenerale bonakceptas ilin kaj iel rigardas kiel kuriozaĵon. Iom post iom la proleteca sento de gvidistoj foriĝas kaj tiel kreiĝas la tipoj de nova reganta klaso...

Neniam ni forgesu, ke la socialismo ĉiam havis kiel celon forigi la klasojn. Sed tio ne okazos mirakle, per mi ne scias kia mistera procedo de l' "produkto-fortoj". La klasoj malaperos nur kiam la homoj ne plu toleros la ekziston de gvidistoj, kiam ĉiu laborulo konscios pri sia valoro en la

produktado kaj estos akirinta senton pri digno; kiam la manlaboro ne plu estos konsiderata kiel io malsupera kaj evitinda; kiam oni ne plu parolos pri "manlaboristoj" kaj "intelektuloj"; kiam ĉiu homo havos la eblon lertiĝi mane kaj intelekte...

Ĉi tiu lasta demando rilatas al la sepa punkto de niaj gvidideoj. Sed spaco mankas por pritrakti ĝin. Mi do simple memorigos al legantoj, ke ĝi jam estas pritraktita sur la paĝoj 100-1-2-3 de "**Vortoj**". Interesiĝantoj bonvolu do legi aŭ relegi tiun artikolon kies titolo estas: **Intelektulo? Manlaborulo?**

E.L.

Tiuj "Klarigoj pri la gvidpunktoj" aperis en 1935 kaj 1936 en la revuo "**Herezulo**".

## Piednotoj

1. ↑ "**Herezulo**", revuo de la "Sennaciista Frakcio" de SAT, aperis de januaro 1935 ĝis decembro 1936. (Kompilnoto)

 La teksto estas [publika havaĵo](#) (*public domain*). Detaloj pri la licenco troviĝas ĉe la paĝo de la aŭtoro: [Eŭgeno Lanti](#).

# Herezaĵo

Letero de E. Lanti

al la malkontentaj legintoj de "[Absolutismo](#)"

(ankaŭ la kontentaj legintoj havas intereson legi ĉi tiun leteron)

*"Nia fincelo estas la neniigo al la ŝtato, t.e. al ĉia organizita kaj sistema perfortado, al ĉia perfortado kontraŭ homoj ĝenerale."*

*LENIN*

*en "Ŝtato kaj revolucio", 1917.*

Parizo, oktobro 1934.

Al Gekamaradoj M.A., B.V., K.S., k.a....

Estimataj,

Kuŝas antaŭ mi viaj leteroj per kiuj vi bonvolis diri vian malaprobantan opinion pri la enhavo de **ABSOLUTISMO**. Kelkajn aliajn mi ankaŭ ricevis, sed mi metis ilin flanken: iuj laŭdas senrezerve la verketon, la aliaj diras nur insultojn. Evidente, al tiaj skribaĵoj estas tute senutile respondi. Ĉar vi

ne laŭdas nek insultas, sed emas bonkamaradece diskuti, mi deziras danki al vi pro via honesta malaprobo kaj samtempe mi volas pravigi mian vidpunkton antaŭ vi.

Unue mi notis kontente, ke al la ĝenerala tezo pri absolutismo vi konsentas. Kio malagrabla tiklas vin kaj eĉ dolore pikas, tio estas, ke mi metas en la saman kategorion la diktatorecojn de Stalin, Musolini kaj Hitler. KREDU, estimataj Gek-doj, ke mi tre bone komprenas vian malemon akcepti tiun mian opinion. Dum longa tempo mi devis kvazaŭ batali kontraŭ min mem por forskui miajn iluziojn karajn pri Sovetio. Mia sento forte kontraŭstaris al mia racio. Tio estas tute natura. Dum almenaŭ dek jaroj mi konsideris la landon de la Oktobra Revolucio kiel la unuan bastionon, kiun konkeris la Proletaro en la kapitalisma fortikaĵo. Al Moskvo iris miaj esperoj kaj mi fidis al la Komunista Internacio por gvidi la batalojn de la ekspluatatoj en la tuta mondo. Sendube mi vidis mankojn kaj bedaŭris erarojn faritajn. Sed ili ne estis esence gravaj kaj neniu organizo povas havi la pretendon esti neerarkapabla. Nur katolikoj havas tian kredon rilate al la papo. Sed, en 1928, sub la influo de Stalin k.a., estis proklamata la tezo pri eblo starigi socialismon en unu sola lando. De tiam, ĉiu atenta observanto povis rimarki ke sub la masko de revolucieca frazaro, Komintern pli kaj pli fariĝas instrumento en la servo de l' Sovetia Diplomatio. Ŝajnas al mi absolute neeble klarigi al si la stultan, kriman politikon de Komintern dum la lastaj ses jaroj, se oni ne komprenas, ke la ĉefa zorgo de Moskvo ne plu estis prepari la mond-revolucion, sed atenti precipe pri la naciecaj, ŝtataj interesoj de la Stalina diktatoreco. Estas fakto, ke la laboristaj,



revoluciaj movadoj el ĉiuj landoj estis malfortigataj pro la skismaj instrukcioj, venintaj el Moskvo. Tie oni havis kiel ĉefan celon fari el la kompartie gvidataj organizoj aparatojn blinde, serveme obeantaj al la ordonoj de Stalin kaj de G.P.U. – Kaj tiu abomeninda, monstra plano tre bone sukcesis. Nuntempe oni povas tre facile vidi ĝian aplikon en Francio.

Vi sendube jam scias, ke ĉi tie komunistoj kaj socialistoj faris lastatempe interkonsenton kaj nun kunlaboras amike. Tamen antaŭ nur kelkaj monatoj, oni povis legi ĉiutage en "**La Homaro**" (L'Humanité), la organo de l' Kompartio, ke la socialistoj estas la plej danĝeraj malamikoj de la laborista klaso, la plej fiaj perfiduloj kaj ke ili evidente preparas la venkon de l' faŝismo. Pro tio ili estis dum jaroj nomataj "social-faŝistoj". Kaj jen subite, tute neatendite, la Kompartio ĉi-tiea proponas al tiuj "perfiduloj" komunan agadon. En la kompartiaj presaĵoj ĉesis aperi atakoj kaj insultoj kontraŭ la Socialista Partio. Kiel do tio povis okazi? Al tiu demando oni povas fari nur jenan respondon: kial Stalin tiel ordonis? Nu, por kompreni ĝuste tian returniĝon, sufiĉas rigardi al Genève, kie "K-do" Litvinov interkonsente kaj amike kunlaboras kun S-ro Bartu (Barthou), la franca ministro por eksterlandaj aferoj.

Ne kredu, ke mi fantazias aŭ kalumnias, kiam mi parolas pri amikeco inter Litvinov kaj Bartu. Antaŭnelonge la internacia Asocio de la ĵurnalistoj rajtigataj ĉe la Ligo de Nacioj aranĝis bankedon al kiu partoprenis la konsilantoj de ĉi tiu lasta Institucio. Tiuokaze la reprezentanto de la imperiisma Francio gratulis sian Sovetian kolegon, pro lia

nova sinteno antaŭ la Ligo de Nacioj, kaj Litvinov respondis: (laŭvorte)

"Koncerne min, mi simple konstatas, ke hodiaŭ ni estas sinceraj kaj lojalaj amikoj".

Vi ja certe scias, ke la Ligo de Nacioj estis ĉiam antaŭe konsiderata, en Moskvo, kiel Asocio de imperiistaj rabistoj. Kaj la tuta agitado de l' franca kompartio celis montri, ke Francio estas la ĉefa rabisto, ke ĝi staras unuavice de tiuj, kiuj preparas militon kontraŭ Sovetion, ktp, ks. – Kiu esplorus la kolekton de LA HOMARO el la lastaj jaroj, tiu povus mire konstati, ke preskaŭ ĉiutage la redaktoroj alarmis pri la danĝero de TUJA MILITO ("guerre imminente") kontraŭ Sovetion. Kaj se iu diris sian dubon pri tio, tiu estis tuj insultata kiel "kontraŭrevoluciulo", "social-faŝisto", kaj similaj predikatoj, kutime uzataj malavare de bolŝevikoj...

Cetere, la 6a kondiĉo el la 21, kiuj reguligas la akcepton de partio en Komintern, tekstas jene:

"6) Ĉiu partio deziranta aliĝi al la III-a Internacio havas kiel devon deklari, ke ĝi malaprobas tiel same la konfesitan social-patriotismon, kiel la hipokritan kaj falsan social-pacismon, sisteme demonstri al la laboristoj, ke sen la revolucia renverso al la kapitalismo, neniu arbitracia internacia tribunalo, neniu "demokrata" reorganizo de la Ligo de Nacioj povas savi la homaron de la imperiistaj militoj".

Kaj nun? – Nun, la komunistaj, pli ĝuste la Stalinaj, gazetoj prezentas la aliĝon de Sovetio al la Ligo de Nacioj kiel "grandan venkon de l' proleta registaro"!! Ĉe tia cinike hipokrita aserto mi emus pensi, ke temas pri sonĝo... Tamen estas realaĵo. Legante la pledon de Bartu pot akceptigi

Sovetion en la Ĝenevan aeropagon, oni povas facile mezuri la grandan distancon, kiu disigas la Leninan politikon de la Stalina. Bartu interalie diris:

"Kun la kontrakto en la manoj, mi supreniras ĉi tiun tribunon, kun la kontrakto, kiu metis la unuajn fundamentojn de la Ligo de Nacioj. Ĝi estas mia gvidilo, mia atestanto, mia garantio."

Tio signifas, ke la Sovetia registaro akceptas tiun imperiisman, banditan, rabistan kontrakton. Kaj por tute konvinki siajn kolegojn, kiuj time ankoraŭ kredas, ke Moskvo ĉiam estas la ĉefa bastiono de l' mondrevolucio, li aldone citis frazon de Mirabo, tiu fama oratoro el la tempo de la franca Revolucio. Mirabo celis fariĝi ministro kaj tiucele iun tagon konfesis al sia amiko la grafo Lamark, kiu estis lia peranto ĉe la reĝa kortego:

"Jakobenoj fariĝintaj ministroj ne ĉiam estas jakobenaj ministroj."

Kia vangofrapo al Stalin! Kia honto, ke Litvinov eĉ ne provis forviŝi tian klaran aludon pri perfido al la revoluciaj principoj!! Kia plej aŭtoritata atesto, ke Komintern ne plu timigas burĝajn registarojn!!! Klarige Bartu insistis:

"Mi pensas, ke ne necesus citi multajn faktojn, por demonstri, ke okazis evoluo en la sovetia Rusio kaj, ĉiaokaze, pri tiu evoluo mi havas pruvon kaj ateston hodiaŭ mem. Ĉu Rusio respondis al ni per malprecizaj paroloj kaj per nedifinitaj promesoj? Se tiel estus, mi ne starus ĉe ĉi tiu tribuno por defendi la tezon pri akcepto. Sed mi vokas al viaj memoraĵoj, al via konscienco. Kvankam mi pensis, ke Rusio faros deklaron, kiu ebligos, ke oni akceptu ĝin, ĉu vi pensis,

ke la deklaro estus tiom senkondiĉa, kiom ni ĝin ricevis? Ĝi ja estas kategoria, absoluta, tiagrade, ke mi renkontas neniun el la oratoroj, kiujn ni ĵus aŭdis, por dubi pri la sincero de la deklaro de Rusio".

Tiajn parolojn de la franca ministro la komunistaj kaj socialistaj gazetoj ne raportis al siaj legantoj. Kaj per tia silento oni povas konstati, ke la partiaj gvidistoj tre bone komprenas la signifon de tiu granda aliigo en la politiko de Sovetio. Tia opinio-ŝanĝadon ili provas dronigi en la entuziasmo, kaŭzita de la ekamikiĝo inter komunistoj kaj socialistoj. Sed kiu observas kaj pripensas, tiu ĉagrene ekvidas ke tiuj gvidistoj (mi substrekas tiun vorteron, por akcenti ke temas pri homoj, kiuj ĝenerale havas ĉefe kiel celon okupi postenojn, stari ĉe la rando de la politika scenejo) pretiĝas oferi la vivon de milionoj da laboristoj sur la altaro de siaj respektivaj patrioj.

"Li estas tro pesimista, li troigas, lia fantazio vere hiperbolas...", vi sendube pensos. Mi tre deziras, ke vi estu pravaj; se mi eraras, neniu pli ol mi ĝojos pri tio. Sed bonvolu atenti kaj pripensi jenajn faktojn. Jam de kelka tempo en Sovetio mem estas entreprenita vasta agitado por encerbigi al la tiea popolo la patriotismon. Por pruvi mian aserton, mi citos al vi kelkajn specimenajn pecojn de tiu propagando kaj la tutan tekston de dekreto alprenita la 8an de junio 1934. Legu atente kaj meditu: poste vi decidu ĉu mia pesimismo havas aŭ ne fundamenton:

*"POR LA PATRIO*

*"Por la Patrio! Ĉi tiu vorto ekbruligas la flamon de la heroeco, la flamon de l' krea iniciativo sur ĉiuj kampoj de nia vivo tiom riĉa kaj dieca. Por la patrio! Tiu vorto entuziasmigas dekojn da milionoj da laboristoj por la defendo de ilia nobla patrio kaj igas ilin pretaj por ĉia ofero. La defendo de l' patrio! ĝi estas la superega leĝo de l' vivo. Kaj kiuj levas la manon kontraŭ la patrion, kiuj perfidas ĝin, tiuj devas esti ekstermataj..... La popolo el 170 milionoj da laboristoj, por kiuj la naskiĝa grundo estas la patrino-patrio, kiu nutras per sia sango la glorajn ĝermojn de nova kaj feliĉa vivo, senmanke kaj severege punos ta patri-perfidulojn, POR LA PATRIO, POR ĜIA HONORO KAJ ĜIA GLORO, POR ĜIA FORTO KAJ PROGRESO!"*

Tiu cito estas prenita el la **Pravda**, n-ro de la 9a de junio 1934. Kaj ne nur la Pravda sed ĉiuj aliaj gazetoj el Sovetio entreprenis tiun porpatrian predikadon. Sed prefere mi tuj konigu la tutan tekston de dekreto, kies supre cititaj frazoj konsistigas nur ties komenton:

*"DEKRETO DE L' CENTRA PLENUM-KOMITATO DE L' SOVETOJ*

*Kompletigi la leĝon rilatan al la krimoj kontraŭ la ŝtato per kvar paragrafoj, koncernantaj la perfidon al la patrio.*

1) Ĉiu agado farita de Sovetiaj civitanoj kontraŭ la militistan potencon de USSR, ĝian sendependecon aŭ la tuton de ĝia teritorio, kiel, ekzemple, la spionado, la diskonigo de ŝtataj aŭ militistaj sekretoj, la dizerto, la transiro de la limo aŭ aeroplana forkuro eksterlanden, estas punata per morto kun konfisko de ĉiuj havaĵoj. En okazo de malpligravigaj cirkonstancoj la mortpuno estas aliigata je 10 jaroj da

*malliberiĝo kun konfisko de ĉiuj havaĵoj.*

2) *Koncerne la militistojn, nenia malgraviga cirkonstanco estas akceptebla kaj la samaj punindaj faroj sekvigas mortpunon kun havaĵ-konfisko.*

3) *En la okazo de limtransiro aŭ de forkuro eksterlanden per aeroplano, la plenrajtaĝaj (dekokjaruloj – E.L.) familianoj de l' militisto, se iel ajn ili helpis tiun perfidon, aŭ se ili sciis pri ĝi kaj ne denunciis ĝin al la estraro, estas punataj per 5 ĝis 10 jaroj da malliberiĝo kun havaĵ-konfisko.*

*La plenrajtaĝaj familianoj de l' perfidulo, ĉu vivantaj kun li, ĉu estantaj sub lia prizorgado ĉe la momento de l' perfido, estas senigitaj je voĉdonrajtoj kaj ekzile sendotaj por 5 jaroj en malproksimajn regionojn de Siberio.*

4) *La nedenuco kontraŭ militisto koncerne perfidon, ĉu en preparo, ĉu jam farita, sekvigas punon je 10 jaroj da malliberiĝo.*

*Por la civiluloj La sama delikto estas punata laŭ la paragrafo 12a de la leĝo pri la krimoj kontraŭ la ŝtato.*

*(La 8an de junio 1934. La Prezidanto de l' Centra Plenum-Komitato: **Kalinin**. Por la Sekretario de l' Centra Plenum-Komitato: **Medviejev**.)"*

Tiu dokumento ne bezonas komentojn por ke ĉiu memstare pensanta homo komprenu ties gravon kaj ĝustan signifon. Mi tamen volas almenaŭ substreki, ke en la lando, kie laŭdire oni konstruas socialismon, eĉ civiluloj estas **mortpunataj** simple pro forkuro eksterlanden! Hitler kaj Musolini ne ankoraŭ atingis tian gradon de barbareco. Kaj ĉu do ne estas monstraĵo, ke familianoj de forkurinto povas esti punataj pro "krimo", kiun ili mem ne faris?

Paralele al tiu porpatria prizorgado sovetia, en la francaj komunistaj gazetoj estis rimarkebla lastatempe nova sinteno rilate al la nacio. Sendube la lakeaj redaktoroj ricevis ordonon ne tro rapidi en tiun novan direkton, por ke la kontrasto ne estu tro facile rimarkebla de la legantoj. Tamen atentema persono povis vidi la ŝanĝon. En "**La Homaro**" ekzemple, mi legis jenon:

**"Ni amas kaj defendas Francion kaj ĝuste pro tio ni kontraŭbatalas la kapitalismon"**. Ĉu ne estas videbla la intenco krei konfuzon en la cerbo de la legantoj kaj iom post iom kutimigi ilin al la ideo akcepti militon, kiun partoprenos mem Sovetio aliance kun Francio? Tiam la "komunistoj" emfazos, ke temas defendi la civilizon kontraŭ la Hitlera barbareco ktp... Tute same kiel en 1914! Tiam la t.n. revoluciaj gvidistoj rekomendis partopreni la militon por defendi la demokration kontraŭ la germana imperiismo. Pro tia sinteno Lenin kaj la tiamaj bolŝevikoj tute prave nomis la gvidistojn de la II-a Internacio perfiduloj. Sed nun la gvidistoj de la II-a kaj III-a Internacioj pretiĝas same perfidi la verajn interesojn de l' Proletaro. Por mi, tio estas tute klara, kaj granda estas mia ĉagreno ĉe la konstato, ke la simplaj laboristoj ne ekvidas tian prepariĝantan perfidon.

Sed malgraŭ ĉio vi tamen eble pensos, ke mi ne estas prava samigante la diktatorecon de Stalin kun tiu de Musolini kaj de Hitler. Vi opinias ankoraŭ, ke en Sovetio regas la laboristoj kaj la kamparanoj. Tiu regado cetere estas simboligata per la ĉie videblaj martelo kaj falĉileto. Por kredemuloj tiu simbolo estas sendube pruvo pri ekzisto de laborist-kamparana regado...

En Francio la devizo "Libero – Egalo – Frateco" kuŝas sur la fronto de ĉiuj oficialaj konstruoj kiel atesto pri la principoj, kiuj gvidas la respublikan regadon. Kaj certe la francaj revoluciuloj el la jaroj 1789-93 batalis por ke efektiviĝu tiu ilia idealo. Ne necesas insisti pri tio, ĉu ne? Vi certe jam delonge scias, ke en Francio la bela devizo de la unuaj respublikanoj estas nur trompaj, senenhavaj vortoj.

Estas vere miriga kaj ploriga la konstato, ke ĝenerale la homoj facile estas blufe mistifikataj per vortoj, simboloj kaj devizoj. Ekzemple, milionoj kaj milionoj da katolikoj kredas, ke la papo reprezentas Jesuon sur la tero; tamen ĉiuj bone scias, ke la "filo de Dio" vivis simple, modeste kaj kondamnis la riĉulojn. Malgraŭ tio la kreduloj volonte konsentas, ke la ekleziestro, kardinaloj kaj aliaj "princoj" de la eklezio vivu lukse kaj tute malmodeste.

Certe la rusa Revolucio el la unuaj jaroj metis la regadon en la manojn de la laboristoj kaj kamparanoj; ĝi sendube celis la forigon de la klasoj kaj lastarigon de l' socialismo. Sed necesas esti blinda aŭ fermi la okulojn por ne vidi, ke jam de kelkaj jaroj pli kaj pli kreiĝas ia nova aristokrataro, ke regas ia nova pastraro, kiu faris el la marks-leninismo dogmon, novan religion. Ĉu do, ekzemple, ne estas tre karakteriza la fakto, ke tiu nova formiĝanta klaso havas en sia ekskluziva dispono specialajn magazenojn, kiuj estas relative bone provizumataj, dum mankas preskau ĉio en la aliaj? Kaj ĉu do la ekzisto de grandega diferenco inter la salajroj (de 60-70 ĝis 1500-2000 rubloj monate<sup>[1]</sup>) ne estas okulfrapa pruvo, ke la tiea reĝimo havas nenion komunan kun vera socialismo?



Necesas posedi grandan dozon da naivo por samigi industriigon<sup>[2]</sup> kun socialismo. Estas ja vere ke en Sovetio la fabrikoj kaj ĉio apartenas al la Ŝtato, sed tio neniel signifas, ke reale, fakte la laboristoj povas disponi je la produkto de sia laboro. La plusvaloro anstataŭ iri en la poŝojn de kapitalistoj, servas por vivteni grandnombran ŭrokrataron kaj pagi altajn salajrojn al iu kategorio de homoj. Kaj la "komunistaj" moŝtoj, kiuj havas en sia dispono luksan aŭtomobilon, ĝuas ties komforton kaj oportunon tute same kiel se ĝi apartenus al ili. Diru al mi, kiel, ekzemple, Lunaĉarski povis dum longa tempo ripozi en aristokrata banurbo el suda Francio? Kaj kiam li tie mortis, kial lia kadavro povis esti transportata al Moskvo? Saman demandon ni faras pri la ambasadoro Dovgalevski, kiu antaŭ ne tre longe mortis en Parizo kaj kies kadavro ankaŭ estis en granda pompo ekspedata al Moskvo. Ĉu tiuj faktoj ne klare montras, ke la sovetiaj moŝtoj apartenas al iu speciala klaso de homoj? Kaj mi ĉiam pensis ke la socialismo celis malaperigi la klasojn!... Sed eble la laboristoj, kiuj duonmalsatas en Sovetio, devas esti kontentaj kaj eĉ fieraj pro tio, ke siajn ekspluatantojn ili nomas "Kamarado"! Kompreneble, povas okazi, ke ial kamarada moŝto perdas la bonan postenon kaj refalas en preskaŭ proletan situacion. Sed ankaŭ en kapitalisma registemo okazas nemalofte, ke ekspluatanto bankrotas, ke milionulo malriĉiĝas. Neniu reĝimo donas absolutan sekuron al privilegiitoj.

Laŭ mia ĉiama kompreno, la socialismo estas reĝimo en kiu fakte regus libero, egalo (aŭ ekvivalento) kaj frateco. Ĉu

tiel estas en Sovetio? Ne! tiel ne estas kaj la tuta propagando de la Stalina burokrataro estas nur giganta blufi, grandega trompo. Mi asertas, ke ne ekzistas **esenca** diferenco inter la diktatorecoj nun regantaj en Sovetio, Italio, Germanio kaj alie. Oni tamen ne povas tute samigi ilin. Ankaŭ ekzistas diferenco inter la diktatoreco de Musolini kaj tiu de Hitler. Pro tio mi substrekis la vorton "esenca". Kio rajtigas min diri ke la reĝimoj nun regantaj en diktatorecaj landoj estas **esence** la samaj, tio estas jenaj konsideroj:

- 1) Nur unu sola partio tie povas ekzisti kaj ĝi regas laŭ absolutisma maniero.
- 2) Unu sola homo regas absolute super tiu partio,
- 3) Forestas ĉia libero pri pensesprimoj kaj kunvenrajtoj,
- 4) Ĉiuj kontraŭuloj de la diktatoro estas malliberigitaj, ekzilitaj aŭ mortigitaj,
- 5) La sindikatoj kaj kooperativoj perdis sian sendependecon kaj fariĝis kvazaŭ ŝtataparatoj,
- 6) La infanoj estas devige edukataj laŭ la ŝtata dogmo,
- 7) La militismo estas freneze disvolvata, kvankam la diktatoroj ne malofte deklaras, ke ili deziras pacon.

Mi povus verki dikan libron per la amaso da materialo, pruvanta ke la Stalina diktatoreco estas unu el la plej abomenindaj kaj danĝeraj. Ĝi ja estas aparte danĝera, tial ke ĝi hipokrite prezentiĝas kun ruĝa masko. Nur kelkaj faktoj estu ĉi tie menciataj. Laŭ plej fidindaj raportoj de socialistoj, de neortodoksaj bolŝevikoj kaj de anarkistoj, estas en Sovetio almenaŭ 5 milionoj da malliberigitaj aŭ punekzilitoj. El inter la herezaj komunistoj malliberigitaj mi citas nur la nomon de Razianov, la fondinto de la komunista Akademio kaj de la

Instituto Marks-Engels en Moskvo, kaj tiun de Viktoro Serge, verkisto kun kiu mi povis persone konatiĝi en Vieno dum la jaro 1925. Tiam li estis la direktoro de la franclingva eldono de **Internacia Korespondado**, semajna organo de Komintern. Kaj vi certe memoras, ke Trocki havis la bonŝancon esti forpelata eksterlanden; sed bonvolu ne forgesi, ke proksimume 5000 Trockianoj sidas en la Stalinaj malliberejoj.

Por resti en nia esperantista afero, mi estus al vi tre danka, se vi povus akiri sciigon pri Kdo Futerfas, kies portreton vi povas trovi en la decembra numero (1922) de **Sennacieca Revuo**. Li estis – verŝajne ankoraŭ estas, se li vivas – anarkisto. Jam de la jaro 1924, mi vane provis ekscii ion pri li. Sed eble vi opinios, ke anarkisto estas homo pri kies sorto vi ne volas elspezi poŝtmarkojn en korespondado kun Sovetianoj!! Se vi volas interesiĝi nur pri sampartianoj, tiam demandu pri la sorto de M. Krjukov, la malnova bolŝeviko, kiu kuraĝis en 1930 malkaŝe diri sian opinion pri la fripona agado de S.E.U. kontraŭ S.A.T. Jam de pli ol tri jaroj, mi sensukcese provis ricevi vorton de li aŭ informon pri li. Demandu pri Kdoj Beŝkarev, Djatlov, k.a. kiuj pli malpli kaŝe kuraĝis kontraŭstari al S-ro Drezen, la lakea respondeculo antaŭ Stalin pri la esperanto-movado en Sovetio...

Responde al Kdo Lempert, mi diris, en **Absolutismo**, ke mi konas intime personojn, kiuj longe restadis en Sovetio kaj tute seniluziigis pri la tiea reĝimo. Unu el ili restis tie dum 10 jaroj, okupis diversajn respondecajn postenojn en la industrio kaj pro tio iel apartenis al la kategorio de privilegiitaj

personoj. Malgraŭ tio li tamen ne povis elteni pli longe, perdinte la esperon, ke pliboniĝos la situacio. Cetere li paciencis tiom longe, tial ke li ne volis forlasi sian edzinon, al kiu la Ŝtato ne permesis eksterlandiĝi, ĉar ŝi estis rusino. Nur kiam la diplomataj rilatoj inter Francio kaj Sovetio fariĝis amikecaj, li tiam sukcesis atingi, ke lia edzino akompanu lin. Jam de 10 monatoj li do estas denove en Francio. El la detala raporto, kiun mi aŭdis el lia buŝo, mi citos al vi nur malmulton. Mia opinio tio sufiĉas, por ke vi povu akiri iom da kompreno pri la ĝusta situacio en "la lando regata de laboristoj". Vi eble memoras, ke antaŭ 2 jaroj sin mortigis la edzino de Stalin. Kiel kompartiano mia amiko devis deĵori ĉe la enterigo kaj iel ludi policistan rolon. Mi lasu al li la parolon:

"G.P.U. (Politika Ŝtata Direkcio) atingis sub la Stalina reĝimo nekredeblan malvolviĝon. Ĝi fariĝis grandega administracio, disponante, krom siaj propraj anoj, la tutan milicon de la lando, centon da malliberejoj aŭ ekzilejoj kaj organizanta la vivon kaj laboron de cent miloj da punitoj, kiujn, plejparte, ĝi ekspluatas mem en fabrikoj kaj grandaj laborejoj. Koncerne la nombron da ĝiaj propraj soldatoj, oni juĝu pri ilia gravo: la speciala armeo de G.P.U. konsistas el 100 mil militistoj, zorge elektitaj, bone nutrataj, severe kaj laŭcele edukataj. Tiu armeo esta modelo el sia speco, kiel rilate al disciplino kaj servemo, tiel rilate al la ekstera aspekto. Okaze de la enterigo de la edzino de Stalin, mi memoras pri la impona spektaklo, kiun prezentis la gvardio de l' diktatoro laŭ la vojo al la tombejo. Du vicoj da oficiroj el G.P.U. rajdantaj sur la plej belaj ĉevaloj, poste vico da

lernantoj de la speciala lernejo por oficiroj de G.P.U. kaj fine la milico, kiu fortendis la popolamason. Bonvolu noti ke Stalin tre zorge evitas kontakti kun la publiko kaj, timante atencon, oni estis forpelinta la homojn de sur la trotuaro laŭ la tuta irdistanco, eĉ en la mallarĝa strato Volondka. Interne de la domoj, G.P.U.anoj prizorgis, ke ĉiuj alstrataj fenestroj restu nepre fermaj; la procesio konsistis ekskluzive, krom el la oficialuloj, el la plej fidelaj kaj servemaj kompartianoj el Moskvo. Por ke vi havu klaran bildon pri la antaŭzorgoj, mi aldonu, ke en ĉiu okopa vico de la irantaro, la unua kaj la oka vicano estis antaŭe elektitaj kaj havis kiel taskon malebligi la enpenetron de personoj fremdaj al la procesio."

Mi rimarkigis al mia amiko, ke laŭ francaj gazetoj ŝajnas, ke antaŭ kelkaj monatoj G.P.U. estis reorganizata. Tiam kun melankolia rideto li respondis:

"Kiel vi, mi legis pri la afero kaj eĉ tre detale en rusaj gazetoj, kiujn mi ricevas. Fakte nur la nomo estas ŝanĝita. La nova **Komisario por internaj aferoj**, kies ĉefkomisaro estas Jakoda, la eksestro de G.P.U., konservas ĉiujn funkciojn kaj taskojn de ĉi tiu lasta. Ne gravas la titolo: estonte kiel estinte tiu polica aparato rajtos malliberigi kaj ekzili sen antaŭa publika juĝo, plenumi politikan spionadon, cenzuri poŝtaĵojn ktp. Kelkrilate la nova organizo eĉ estos pli timinda ol la antaŭa, sed ĝi almenaŭ havas la avantaĝon ĵeti polvon en la okulojn de la eksterlanda publiko, kiu kredos ke Sovetio iom demokratiĝis, ĉar G.P.U. malaperis. Estos tiel pli facile al Litvinov pledi por la akcepto de U.S.S.R. en la Ligon de Nacioj..."

El tiu atesto de kompetenta persono min ĉefe impresas la

fakto, ke Stalin havas tute la saman potencon, kiel antaŭe havis la caroj, ĉar por la enterigo de sia edzino li povas okazigi tian grandegan, pompan manifestacion funebran. Same ankaŭ kiel caro li timas atencojn kaj ŝirmas sin per polica aparato. La cara ŝtato estas tute simila. Mi ne diras "sama"; ekzistas ja diferencoj; la klasiĝa procezo, t.e. la formiĝo de klasoj<sup>[3]</sup> ne ankoraŭ atingis sian definitivajn formon kaj la nuna regotaro ne povas esti komparata kun la cara aristokrataro. Cetere en niaj demokrataj landoj ankaŭ la burĝaro ne estas komparebla kun la malnova aristokrataro. Kia estis la ĉefa karakterizo de la cara socia sistemo? Ĝi estis la **servuto**. La Stalina tute similas al servuto: kamparanoj devas servi en kolĥozoj kaj laboristoj en fabrikoj. Ili ne rajtas foriri sen permeso kaj **devas havi pasporton por ŝanĝi laborlokon**. Jes!!.. La enlanda pasporto, kiel ĝi ekzistis dum la cara tempo, estas restarigita antaŭ proksimume du jaroj... Sed ĉio tio okazas sub la signo de martelo kaj falĉileto kaj por naivaj homoj tio sendube estas sufiĉa pruvo, ke en Sovetio stariĝas socialismo. Plorinde!... La Stalina "socialismo" fakte estas novspeca sklaveco kaj tian mi ne volas. Liberon kaj homan dignon mi alsopiras kaj tio en Sovetio absolute mankas...

Ĉi tiu letero jam fariĝis longa, kvankam mi ne diris ĉion dirindan, ĉion, kio povus tute malfermi viajn okulojn kaj forviŝi la densan, grandegan blufon tre lerte aranĝitan de la Stalina burokrataro, de la nun formiĝanta nova privilegiita klaso. Sed mi devas rezigne limigi min. Ĉar vi sendube estas ankoraŭ sub la influo de la lerte organizita blufado de la Stalina

propagand-aparato, vi verŝajne emos kredi, ke miaj klarigoj pri klasoj estas subjektivaj. Mi petas ke vi bonvolu esplori, kontroli kaj poste mediti nur pri jena fakto, kiu miaopinie estas tre signifoplena: post 35-40 jaroj da laborado en fabrikoj, se laboristo fariĝas invalido, li ricevas pensie po 30-35 rubloj monate, sed vidvinoj aŭ parencoj de altranguloj ricevas po 350-750 rubloj monate, plus diversajn aliajn privilegiojn...

Tamen mi ne volas fini, ne respondante al K-ino M.A., kiu demandas, ĉu fakte ne ekzistas signoj pri malapero de naciecaj diferencoj. Se oni staras ĉe scienca kaj teknika vidpunkto, estas evidente, ke naciecaj problemoj pli kaj pli tendencas malaperi. Ŝipoj, aŭtomobiloj, kanotoj ktp..., laŭforme pli kaj pli samiĝas en la tuta mondo. La disvastiĝo de la verkoj de Marks, Engels k.a. en ĉiuj landoj ankaŭ povas esti konsiderata kiel ia signo pri unueciĝo de l' penso. Sed tiel ne prezentiĝas konkrete la problemo. Mi skribis:

"...ĉie la naciismo estas la plej potenca, la plej instige minaca ideo-forto, movanta la amasojn. Vidiĝas nenia signo pri kunfandiĝo de **malsamlingvaj nacioj** en pli grandan unuon, sed male ĉie oni rimarkas tendencojn kaj agitadon por nacia apartiĝo kaj sendependiĝo..."

Ĉu tio, kion mi asertis, estas fakto aŭ iluzio? Por respondi, laŭ mi, sufiĉas memori pri la sangaj bataloj, okazintaj en Irlando; pri la Gandhia movado en Hindio; pri la tuta agitado en Ĉinio; pri la nuna baraktado en Katalunio kaj Vaskio. Kaj eĉ en Francio, kiu estas unu el la landoj, kie la provincoj plej funde kunfandiĝis, oni povas vidi ekde kelkaj jaroj movadon por la sendependigo de Bretonio!... Kaj ĉu do ne estas la

naciismo, kiu konsistigas la ideologian bazon sur kiu konstruis Masarik, Pilsulski, Mustafa-Kemal, Musolini, Hitler k.a. "herooj"? Kaj ĉu do la dokumento, kiun mi konigas al vi pli supre, ne montras klare, ke eĉ Stalin nun utiligas la naciismon por firmigi sian ruĝan tronon? Necesas fermi la okulojn, por ne vidi la naciismajn ondojn, kiuj minacas ĉiuflanke la homaron. Jes ja, la patriotismo estas la plej forta religio, movanta en nia epoko la amasojn. Ŝajnas al mi, ke Marks ne antaŭvidis tion. Li subtaksis la forton de ideoj, la mistikemon, kiu ĝenerale superregas la racion en la cerbo de homoj, eĉ de tiuj, kiuj tamen kredas esti senigitaj je antaŭjuĝoj. La maŭzoleo por la kadavro de Lenin en Moskvo pruvas tion tre bone.

Ne kredu tamen, ke mi havas la opinion, ke Marks ne estis grandcerba homo. La aŭtoro de l' "**Kapitalo**" certe meritas ĉies admiron. Sed mi emas pensi, ke Marks mem hontus pri siaj nuntempnj disĉiploj, kiuj tro laŭlitere komprenas kaj instruas lian doktrinon. Li certe tre ĉagreniĝus ĉe la konstato, ke la marksismo fariĝis nediskutebla dogmo, devigo instruata al 160 milionoj da homoj sur unu sesono de l' mondo.

Ho! mi bone komprenas, ke miaj pesimismaj diroj en **Absolutismo** povas fari malbonan impreson ĉe multaj legantoj. Se mi celus akiri popularon, aliel mi certe parolus. Por veki aplaŭdojn ĉe la amaso, necesas doni al ĝi esperojn, baldaŭ efektivigontajn, flati ĝin kaj fari mirindajn promesojn. La pastroj promesas eternan feliĉon al la piuloj; la politikaj agitistoj promesas paradizon sur la tero, se oni donas al ili la regadon. Mi volas esti nek pastro, nek agitisto. Mi bone konscias, ke la sennaciismo estas utopio en la nuna tempo,



sed mi havas la firman konvinkon, ke civilizo pereos, se la popoloj el la tuta tero ne unuiĝos kaj kunfandiĝos. **La ĝenerala aplikado de esperanto povus tre efike helpi al tiu kunfandiĝo**; pro tio mi estas SAT-ano kaj tre ĉagreniĝas ĉe konstato, ke ĝenerale la t.n. revoluciuloj restas ligitaj al tradicioj kaj rutinaj kutimoj kaj malatentas nian movadon...

La nuna mondo prezentiĝas al mi kiel amaso da homoj, naĝantaj kontraŭflue en riverego. Nur malmultaj lasas sin porti de la fluo, sed estas malhelpataj de la baraktado de la plimultaj. Tamen la fluo nevenkeble portas ĉiujn al la oceano, kie ĉiuj akvoj miksiĝas. Ĉu estas saĝe naĝi kontraŭdirekte al la fluo, kiel ĉiaspecaj naciistoj?...

Eble mi nur sukcesis tedi vin per mia longa babilado. Tiaokaze bonvolu pardoni min kaj akcepti mian fratecan kaj sennaciecan saluton.

P.S. Mi volas kompletigi tiun ĉi leteron per mencio de kelkaj faktoj, kiuj estas ankaŭ tre signifaj:

1) Komence de aŭgusto 1934 alvenis en Romon aernavigada misio sovetia por redoni la viziton, kiun faris al Moskvo la faŝista marŝalo Balbo. La sovetiaj aviadistoj estis akceptataj je la sonoj de la **Internacio** (!!!), de **Giovinezza**, la faŝista kanto, kaj de la reĝa himno...

2) Antaŭnelonge la faŝista generalo Graziolo k.a. italaj militistoj estis akceptataj en Moskvo kaj Minsko je la sonoj de la itala himno kaj de la **Internacio**. La stacidomoj estis abunde ornamitaj de italaj flagoj kaj de sovetiaj, kompreneble kun la martelo kaj la falĉileto (!!!). Graziolo povis ĉeesti la grandajn manovrojn de la t.n. ruĝa armeo kaj laŭ lia raporto en la "Giornale d' Italia", la itala misio estis tute speciale

bonvenigata.

3) Por ke la legantoj povu prijuĝi la leĝon, kies teksto troviĝas pĝ. 84, laŭ ĝia apliko, ni menciuj jenan konkretan ekzemplon:

Okaze de antaŭnelonga vizito de sovetia ŝiparo en la pola haveno Gdĵnia, la maristo VORONKOV el la kirasŝipo "Marat" dizertis. Sekve de tio la militista juĝistaro mortkondamnis lin kaj ordonis la tujan areston de liaj parencoj; kiuj estas malliberigataj dum 10 jaroj kiel garantiuloj. La motivo de tiu ordono estas laŭvorte jena: "pro ebla kunkulpeco eĉ pasiva aŭ senkonscia".

La ŝipano VORONKOV ne povis esti mortpafata, ĉar li forkuris; dume liaj parencoj sidas en malliberejo kaj sendube meditas pri la plej bona maniero konstrui socialismon en unu sola lando.

4) Moskvo, la 5an de novembro 1934. – La supera tribunalo verdiktis en la proceso rilata al la fervojakcidento, okazinta ĉe la stacio Osnava. La tri akuzitoj estas konsiderataj kiel kulpaj pro (laŭvorte) "**krima maldiligento en la deĵoro**". La ĉefoficisto Linnik estas punata per mortpafado kaj la du aliaj akuzitoj: la signalisto Junnoĉef je kvin jaroj da malliberiĝo kaj la relŝanĝisto Pavlenko je tri jaroj.

Tiu fakto ne estas unika; mi povus mencii aliajn, similajn. Kaj nun mi demandas al la blindaj kreduloj, kiuj atendas la lumon el Moskvo, en kiu alia lando, el inter la plej reakciaj, laboristoj estas mortpafataj pro "maldiligento en la deĵoro"?

\*

\*

\*

Bonvolu tamen, mi petas, ne konkludi el ĉio dirita, ke mi kontraŭas al ĉia diktaturo. Dum furiozas la batalo inter ekspluatistoj kaj ekspluatatoj, estus ja stulte paroli pri libero kaj demokratio. Sed diktaturo devas daŭri mallonge kaj ne aliĝi en diktatorecon de persono. Mi faras diferencon inter proleta diktaturo mallongdaŭra kaj la pli kaj pli rigora kaj subprema diktatoreco Stalina, kiu kondukas al restariĝo de kastoj.

E.L.

## Piednotoj

1. ↑ Kelkfoje oni legas en kom. gazeto ke la salajroj estas plialtigataj, sed la trompisto ne diras, ke dume la aĉetpovo de l' rublo paralele plimalaltiĝas!
2. ↑ La elsekigo de la Pontinaj marĉoj fare de la itala faŝismo ankaŭ estas tre grandioza laboro; la samon oni povas diri pri la elsekigo de la Zuiderzee fare de la Nederlanda registaro. Kaj oni nur pensu pri la cent-etaĝaj domoj en Usono!!!!
3. ↑ Nuntempe oni povas larĝtrajte diri, ke ekzistas kvin klasoj:
  - 1) La ĉefaj gvidantoj de l' Partio; la altrangaj funkciuloj; la superaj estroj de la armeo kaj de G.P.U.;

kelkaj famaj verkistoj.

2) La inĝenieroj, teknikistoj k.a. diversspecaj intelektuloj,

3) La laborinstigistoj (udarnikoj); la subrangaj anoj de l' Partio kaj de G.P.U.

4) La granda amaso de laboristoj kaj kamparanoj, kies vivkondiĉoj estas pli malbonaj ol tiuj de senlaboruloj en kelkaj kapitalistaj landoj.

5) La parioj t.e. la ekzilitoj, eksigitoj, suspektitoj kaj ĉiaspecaj herezuloj.

© La teksto estas publika havaĵo (*public domain*). Detaloj pri la licenco troviĝas ĉe la paĝo de la aŭtoro: [Eŭgeno Lanti](#).

## POLEMIKO PRI SENNACIISMO

Noto de la kompilinto: Jena teksto estis grandskale disvastigita per la esperantlingva gazeto "**Popola Fronto**" (15an de julio 1937), kiu aperis dum la hispana milito:

---

Vortoj al kamarado LANTI:

### PUBLIKA LETERO PRI SENNACIISMO

(verkita de kdo Vilh. BOSK, SAT-ano 19317)

Antaŭ kelkaj monatoj vizitis Valencion kdo Lanti, ekmigranta tra la mondo. Kun lia afabla permeso, eĉ kun lia instigo, mi promesis skribi artikolon en "**HEREZULO**" por esprimi mian malkonsenton al liaj laboro kaj sinteno, rilate al la rolo de la sennaciistoj kaj de ties presorgano. Intertempe militistar-klerikala ribelaĉo eksplodis en Hispanio kaj mi devis zorgi pri alia pli urĝa tasko. Ankaŭ "**HEREZULO**" malaperis. Prokrastinte la verkadon de tiu ĉi letero, mi fine

sendas ĝin al SAT kun peto bonvole enpresigi ĝin en "SENNACIULO". V.B.

Jam de longe, post mia aliĝo al la Sennaciista Frakcio, al kio pelis min la legado de la MANIFESTO en la jaro 1934, mi sentis la bezonon eksterigi mian malaprobos, ne al la doktrino, kiun principe mi senhezite apogas, sed al la metodoj de ĝia ĉefa pioniro, kamarado Lanti.

Per tiu ĉi letero mi intencas pruvi, ke la teorio pravos sed la procedoj uzataj de tiu kamarado estas kontraŭefikaj kaj sekve damaĝaj por la afero.

Laŭ la koncernaĵ fundamentaj tekstoj, la sennaciisma vidpunkto "estas nuntempe utopia" dum la internaciisma vidpunkto (tiu pri la rajto al plena memdispono de ĉiu nacio) estas la sole aplikebla en la nuntempaj kondiĉoj.

En tiuj deklaroj estas agnoskite, ke la mondo nepre devas travivi "internaciecan" stadion. Tio signifas do, ke internaciismo tute ne estas baro sed ŝtupo al la sennaciisma estonta socio, nuntempe neefektivigebla. Kial do ni aprobu la konstantajn atakojn de k-do Lanti al la internaciistoj? Miaopinie, internaciismo estas la grundo, kie ni devas semi senlace sed ne sarkasme, ne per primokoj kaj per dubasencaj ironioj. Estas ĉe la internaciistoj, kie troviĝas la plej antaŭenemaj personoj, varbeblaj por nia celo. Satiroj tiuokaze ne taŭgas por logi ilin al nia tendaro.

**HEREZULO** deklaris, ke ĝi kondamnas nenian sincerulon. Sed la faktoj ja pruvas, ke en ĝia kolekto amasiĝas atakoj dekstren kaj maldekstren, kontraŭ

komunistoj, kontraŭ socialistoj, kontraŭ internaciistoj, kontraŭ vivantoj kaj kontraŭ mortintoj. Evidente, la redaktoro trovis ĝis nun nenian sincerulon. Ĉu tio ĉi ne ŝajnas sektemo?

Malakceptinte ĉiujn dogmojn, k-do Lanti mem kreis novan dogmon el sia maltolerema "ismo". Kun ĉagreno mi skribas tion ĉi, ĉar mi timas esti ekskomunikata, kiel "hereza" sennaciisto. Sed mi ne estas ortodoksa ĝis tia grado, ke mi silentu, kiam mi konsideras, ke la taktiko de k-do Lanti (kiun cetere, mi persone tre sincere estimas) estas malĝusta. Efektive, oni povas konstati, ke liaj malutilaj procedoj okazigas, rilate al Sennaciismo, miskomprenon kaj eĉ malŝaton flanke de kamaradoj, simpatiantaj ideale al la afero sed ne kapablaj juĝi aparte "sennaciismon" sendepende de la agado de iu ajn sennaciisto. Multaj ne bone vidas, ke sennaciismo, samkiel Esperanto, estas nenies propraĵo, sed konscie aŭ ne, ĉies celo ĉe la progresemluloj. Tial oni povas tro facilanime, identigi la doktrinon kun unu persono.

K-do Lanti, kiu tiel ofte alvokas la racion, sin montras tiurilate tro pasia kaj bedaŭrinde, laŭ mia penso, faras tute negativan laboron por la sukceso de Sennaciismo. Racia, normala homo, konsideras Internaciismon, kiel paŝon al iama Sennaciismo, sed kamarado Lanti traktas la internaciistojn kiel malamikojn de la homaro. Se oni kredas je la leĝoj de la evoluo, oni konfesos, ke Sennaciismo en la praktiko nur povas esti natura logika sekvo de maturiĝinta Internaciismo.

Imagu ekzemple, ke por propagandi Esperanton, ni dediĉus niajn fortojn insulti la eventualajn lernontojn, dirante al ili, ke ilia patrolanda lingvo estas ĵargono, dum Esperanto estas la sola lingvo belsona kaj taŭga, kiu nepre devos forigi

ĉiujn "naciajn lingvaĉojn". Kioman elcenton ni sukcesus varbi inter la alparolatoj? Ni, sennaciistoj, celas la starigon de unu sola lingvo tutmonda, sed tian propagandon ni povas fari nur inter tiuj, kiuj jam estas konsciaj Esp-istoj kaj al tiuj internaciistoj kun supernacieca spirito. Al la laikoj ni simple diras, ke Esperanto estas helpa lingvo. Tion postulas la bona taktiko, mi pensas.

"Ili – la sennaciistoj – (asertas la **Manifesto**) tamen ne kredas, ke ĉiuj homoj povos baldaŭ akiri menson, en kiu superregus la racio. Ili scias, ke la sento estas granda forto, tre forta instigilo; ke la mitoj ludas gravan rolon en la Historio". Jen frazoj, kiuj pravigas mian tezon pri la taktiko ĝusta, konsistanta en tio, atenti zorge la menson de la homoj, por ne fuŝi la aferon mem, kiun ni volas defendi. Se anstataŭ prezenti Sennaciismon kiel aspiron, kiun la homaro post la necesaj etapoj realigos, ni prezentas ĝin kiel "absolutisman" idealon, tuj aplikebla por solvi ĉion malgraŭ la "nuntempaj kondiĉoj" kaj en opozicio al la, hodiaŭ ebla, Internaciismo, kiu estas pli facile komprenebla de la malkleraj amasoj, ni neniel sukcesos akceptigi ĝin grandskale kaj ĝi fariĝas stranga teorio.

Ne estas necesa troa cerbumado por kompreni, ke Sennaciisma socio nur povos eliĝi siatempe el longedaŭra kunvivado paca de memstaraj nacioj, internaciece regataj. Alimaniere, ĝi ne estus naskita de normala akuŝo, sed nevivpova monstro eligata per aborto. Praktika laboro estas do, helpi al la disvolviĝo de forta sento de internaciisma solidaro kaj kunlaboro inter la ŝtatoj kaj inter la popoloj, kiuj dume konservu daŭre siajn ecojn kaj apartajn karakterojn, ĝis



kiam pli favoraj kondiĉoj ebligas, ke nia semado fruktiĝu.

Se internaciismo estas rimedo kaj Sennaciismo estas celo – tiel mi vidas la aferon – nia devizo estu: "Al Sennaciismo PER (ne kontraŭ) Internaciismo".

Ĉio alia, mi kredas, estas "diletantismo" kaj vana pretendo konstrui kastelon sur la sablo.

\*        \*  
\*  
\*  
\*

Ni ne povas ne aludi aspekton de la agado de kamarado Lanti per siaj eldonajoj. Tiun, kiu koncernas lian sintenon antaŭ la Soveta Registaro.

Post rekono de mankoj en tiu reĝimo – kvankam mi persone ne konsentas al ĉiuj kritikoj de kamarado Lanti – mi ne povas aprobi, ke la organo de la Frakcio havu preskaŭ ekskluzivan taskon, sisteme ataki la sovetan povon. Por tio ĉi mankis inter la gvidpunktoj de **HEREZULO**, unu tekstanta jene: "La precipa rolo de "H" estas ataki senĉese la agadon de la Sovetaj instancoj kaj persiste ignori la ekziston de la aŭtokratioj alilandaj". Ne gravas, ke **HEREZULO** ne plu estas eldonata. Mi deziras konstati, ke la revueto senlace agis tiel, malgraŭ ke simila gvidpunkto ne estis publikigita en ĝi. Pri la pretekstoj, per kiuj oni celis pravigi la "ne-sinokupadon" pri la faŝistaj ŝtatoj en la Sennaciista bulteno, mi preferas silenti.

Konstateble kaj konstatinde estas, ke k-do Lanti difinis al sia vivo tiun ununuran celon: batali kontraŭ la "ruĝa faŝismo"

(esprimo fervore elpensita de li) kaj forlasi ĉion, kio rilatas al la faŝismoj bruna, nigra kaj alikoloraj, kun kiuj li ne trovas esencan diferencon ĉe Sovetlando, eĉ se li iam diris, ke ne ĉiuj reĝimoj estas samaj. Ke li agu tiel per siaj paroladoj kaj verkoj, estas tute privata afero lia; sed ke la politiko de la frakcio estu persiste tia, tion mi, kiel sennaciisto, ne ŝatas. Laŭ mia opinio, la gazeto de Sennaciismo estu disvastigilo de nia doktrinoj, kleriga informilo objektiva kaj supertendenca, eksponilo de nia altcela teorio, propagandilo de nia idealo, neniam pamfleto.

De sennaciista vidpunkto, jen unu el la gravaj pekoj, kiun k-do Lanti riproĉas al la Soveta Registaro. Ĝi kreis potencon armeon! Kiu ajn sagaca homo agnoskus sincere, ke se Sovetio ne volis liveri sin sendefende al la avideco de la kapitalismaj ŝtatoj (jam intervenintaj malsukcese dum la civilmilito en Rusio) ĝi estis devigata organizi fortan militaparaton. Nuntempe la minacoj kreskis, pro la najbaraj impetegaj faŝismoj "ne ruĝaj". K-do Lanti, pli obstina ol sagaca observanto, ignoras, ke la faŝistaj potencoj armadas sin por satigi imperiismajn apetitojn dum la Ruĝa Armeo havas nur elementan defendan rolon.

Ĉio ĉi estas evidenta. Kaj se la sovetaj aŭtoritatoj ŝajne ekspluatis la denaskan emon de la homoj al sia naskiĝloko, tiel profitante la forton de la sentoj por igi pli fortika la militpovon de la lando, tio pruvas simple, ke la sovetaj instancoj aplikis al sia logika celo tiun memstaran miton, "ludanta gravan rolon en la Historio", kaj kiu estas nepre atentinda fakto por kiu ajn entrepreno homa "en la nuntempaj kondiĉoj". Ili do agis saĝe kaj prudente.

Verŝajne k-do Lanti preferus ke Sovetio "sennaciigu", sin liverante senarme al Hitler kaj al Japanio. Sed tiun sennaciismon (mondunuigo sub tutmonda kapitalisma regno) mi ne ŝatas, kaj kredeble ankaŭ ne la plejmulto el la frakcianoj.

Kiam oni proklamas – kiel faris k-do Lanti – ke konstrui Socialismon en unu sola lando estas neeble, ankaŭ oni devas akcepti, ke enradiki Sennaciismon en Sovet-Unio, profite al la ŝovinista naciisma faŝismo eksterlanda, estus malspritaĵo. Natura amo al la patrolando, kia estas en Sovetio, ne signifas atakemon al alilandanoj kaj ne povas esti komparata kun la naciisma eduko en la faŝistaj nacioj, kie internaciismo (ĉiuj movadoj kaj organizoj tiucelaj aŭ kun tiu kvalito) estas persekutata kaj malpermesata. Patriotismo en Sovetio ne estas danĝera al alia popolo; ĝi estas memkompreneblaĵo en la nuna stato de la homaro kaj esence diferenca de la naciismo ŝovinista de la kapitalismaj faŝistaj ŝtatoj.

Malfortigi la nacian senton de la popolo, en la nomo de la bono de Socialismo (neante ties eblecon en nur unu sola lando, kiu cetere estas ĉirkaŭata de la malamikoj) estus neniel utila al la intereso de la laborista klaso tutmonda, eĉ se oni rifuzas la valoron de la soveta eksperimento, kies gvidantoj profitis je la natura amsento al la patrolando, por starigi fortan defendocelan armeon.

Alia peko de la Soveta reĝimo, laŭ k-do Lanti, estas, ke Sovetio subskribis kontraktojn kun aliaj ŝtatoj, alianciĝis kun Francio kaj aliĝis al la Ligo de la Nacioj. Tiu klara konsekvenco de la situacio ĝenerala, montras "perfidon al certaj marksismaj principoj, forlason de la intereso de la

proletaro" ktp. Sed agi male, t.e. praktiki sinmortigan politikon de izoliĝo, ĉu ne estus stulte?

**Sennaciismo** diferencas de iu snoba "kosmopolitismo" en tio, ke ĝi unue postulas la ekziston de laboristara klasregado tutmonda. Sen tiu premiso, akcepti monduuiĝon kiel rezulton el perfortaj konkeroj de avida sukcesanta naciismo, same ol kiel sekvon de libervola decido de sendependaj popoloj, tion ni serioze ne povas nomi "sennaciismo" sed absurda **samnaciismo**.

Mi supozas ne senbaze, ke abundas la sennaciistoj, kiuj ne povas esti partianoj de tiu identigo de nia doktrino kun imperialismo.

"Vera revoluciulo" – mi legis en la Manifesto – "devas esti kapabla IDEE anticipi". Mi konsentas. Sed ne estas "vera revoluciulo", laŭ mia honesta vidmaniero, tiu, kiu nur ŝvebas en filozofiaj nebulaĵoj kaj ne praktike laboradas en akordiĝo kun la cirkonstancoj.

Disvastigi plej bonan, neaplikeblan teorion, en kontraŭstaro al alia pli modesta, eĉ malperfekta sed farebla, estas malhelpi la progreson, almenaŭ tion mi pensas. Tiu starpunkto estas fakte reakcia!

Vilh. BOSK (19317)

P.S. – Skribinte la supran artikolon mi, kiel sennaciisto, statas en enbaraso pri tio, kia estu mia sinteno antaŭ la atako de la Mondfaŝismo al Hispanio. Ĉu mi helpu, aŭ ne kontraŭstaru al "sennaciigo" aŭ "samnaciigo", de mia

naskiĝlando? Ĉu mi konsideru la invadon de la intervenistoj kiel krimon aŭ kiel benon? (Ĉar okaze de la aneksado de Abisenio fare de Italio, la plej elstara sennaciisto opiniis, ke tio favoras la planojn por Socialismo en Tutmondo). Mi hazarde estas hispano, tial mi timas ne objekte alrigardi la aferon. Ja estas terure... Se mi povus provizore loĝi en glacia zono... Sed ĉi tie estas treege varme.

V.B.

---

### Noto de la kompilinto:

Pro la "personeca karaktero de tiu polemiko kaj pro la specialeco de la temo" la tiama Plenum-Komitato de SAT juĝis "ne oportuna ĝian publikigon en S-ulo" kaj transsendis ĝin al la Sennaciista Frakcio. E. Lanti respondis jene en la Sennaciista bulteno n<sup>o</sup>2 de novembro 1937:

**ĈIA DILETANTISMO ESTU FOR!**  
Publika respondo al Kdo Vilh. BOSK.

Jamaŝiro-maĉi, aŭgusto 1937.

Estimata Kamarado,

Kun miksa intereso mi legis vian "publika letero pri sennaciismo". Iarilate ĝi tamen estas tre instrua, kvankam ne laŭ la senco, kiun eble vi opinias. Unue mi rimarku, ke viadire la **Manifeston** vi legis en 1934. Tri jaroj do forpasis. Nu, mi forte emas pensi, ke via memorkapablo ne estas tute senmanka. Aliel mi absolute ne povas kompreni kial la leginto el 1934 kaj la **aprobanto** el 1937 estas la sama persono, kiu verkis la leteron al kiu mi nun respondas. Por konvinkiĝi pri tio, sufiĉas legi aŭ relegi la tekston de nia tezo pri sennaciismo por trovi plenan refuton al viaj asertoj. Ĝus farinte tiun eksperimenton mi povas nur rekomendi la saman al la legantoj. Ili ja povos konvinkiĝi, ke mia aserto ĝustas. En la **Manifesto** oni povas konstati, ke la gvidistoj de la labor-organizoj, kiuj ignoras esperanton, estis en 1931 (dato de la eldono) same vipataj kiel pli poste en **HEREZULO**; ke la internaciistoj estis montrataj kiel senkonsciaj reakciuiroj (pĝ.26, ekz-e); ke pri Sovetio jam montriĝis forta dubo, rilate al ĝia socialismeco. Unuvorte, Kdo, vi povus trovi en la **Manifesto** la samajn motivojn por kritiki kaj riproĉi, kiel tiujn, kiujn vi trovis pli poste en **HEREZULO**. Kaj tio ne estas miriga, ĉar la tuto fontas el la sama inko, fluis el la sama plumo. Sufiĉe!... La legantoj mem faru la eksperimenton.

El la ĉi-supre dirita mi konkludos jene: Tial ke ni "kondamnas neniun sincerulon"<sup>[1]</sup>, ni povus konsenti nur al jena via deklaro: "Depost mia aliĝo al la S.F. okazis grandaj

ŝanĝoj en la internacia politiko; mia lando estis invadita de araboj, italoj kaj germanoj kaj tial mi ekkonsciis pri mia hispaneco kaj ne povas toleri tian invadon nek la perfidon de generalo Franko k.a. malbonaj hispanoj. Pro tio mi nun komprenas, ke la sennaciismo estas nur revo de utopiuloj, kiuj ne vidas la mondon tia, kia ĝi estas. Necesas ja batali por defendi la sendependecon de sia lando kaj sekve mi malkonfesas sennaciismon kaj refariĝas internaciisto".

Se tiele vi parolus, Kdo BOSK, via sinteno estus konsekvenca kaj neniel "kondamninda". Sed aprobi la enhavon de la **Manifesto** kaj skribi vian publikan leteron, tio estas rilati al la sennaciismo vere tro diletante. Ĉu prave aŭ malprave – pri tio nun ne eblas diskuti – la sennaciisma tezo celas montri, ke la internaciismo estas esence konservativa, eĉ **reakcia** (oni pensu pri la movadoj por la sendependeco de provincoj, kiuj jam delonge enkadriĝis en nacio); ke la homoj, kiuj volas pacigi la mondon, konservante la naciojn, iel similas al tiuj, kiuj volus elsekigi lagon per kribriloj. Kaj la samon oni povas diri pri la naivuloj, kiuj provas konstrui socialismon en iu anguleto de l' mondo kaj eĉ sur ĝia sesono.

En via letero troviĝas parto, kiu ne rilatas rekte al la sennaciismo kaj ĝi sekve ne trovas anticipan respondon en la **Manifesto**. Temas pri mia sinteno al Sovetio. Dankon pro tio, ke vi donas al mi la okazon por eldiri denove mian opinion pri tiu demando. Mi jam publikigis broŝuron, kies konkludo estas, ke en Sovetio ne konstruiĝas socialismo, sed ke tie regas **ruĝa faŝismo**. Forpasis de tiam du jaroj kaj neniu refuto al mia tezo venis. Male, gravaj okazintaĵoj ĝin confirmis. Lastatempe en laboristaj ĵurnaloj kaj revuoj ankaŭ

aperis la kvalifiko: **ruĝa faŝismo**. Kaj mi eĉ havis la amaran plezuron ricevi leterojn de ge-kdoj, kiuj konfesis: "rilate Sovetion, vi ja estis tute prava; nun ni pensas kiel vi post la lastaj okazintaĵoj, sed antaŭe ni opiniis, ke vi pasie troigis...". Bedaŭrinde tiel ne estis; eĉ ne sufiĉe mi akcentis pri la terura danĝero, kiun konsistigas por la homaro la jezuiteca bolŝevismo, la senetikeca **perĉiarimedeco** Lenina, tiom draste aplikata de Stalin. Mi jam diris kaj ripetas, ke en neniua alia lando la laboristoj kaj kamparanoj estas tiom servutigitaj kiom estas tiuj el Sovetio, fare de la kreiganta nova klaso, fare de la oligarkoj el la Kremlo, fare de la sangosoifanta diktatoro Stalin. En neniua lando krom en Sovetio ekzistas la **interna pasporto**. Japana laboristo ne bezonas tian legitimilon por iri el Tokio al Osaka, sed Sovetiano sen ĝi ne povas iri el Moskvo al Leningrado!... Kaj nur en Sovetio la familio estas respondeca pro la "krimoj" de unu el siaj anoj kontraŭ la Ŝtato.

Okaze de la procesoj, kiuj sendis al morto malnovajn bolŝevistojn, la tuta mondo estis tre mirigita pro tio, ke la akuzitoj konfesis mem siajn "krimojn". Por kompreni tion, necesas scii, ke per tiu konfeso la akuzitoj celis eviti al siaj parencoj, al siaj gefiloj persekutojn kaj turmentojn ĉiaspecajn... – Turmentojn? Jes! Kaj laŭ aserto de Eŭgeno Lyons en "The American Mercury", **eĉ infanoj estis torturataj antaŭ la okuloj de akuzitoj**, por devigi ilin konfesi siajn "krimojn" kontraŭ la Ŝtato. Musolini kaj Hitler ne ankoraŭ atingis tian gradon de kruelo en sia diktatoreco... La krimoj de l' ruĝa faŝismo estas nenombreblaj kaj apenaŭ priskribeblaj. Se vi fermas la okulojn por ne vidi la realon kaj



ŝtopas al vi la orelojn, por ne aŭdi la kriojn de l' viktimoj de Stalin, tio estas afero de via konscienco; sed tiom facilan mi ne havas kaj sekve konsideras kiel devon konigi la rezultojn de mia longa observado kaj diversmaniera enketado super Sovetiaj aferoj.

Sed mi ne forsilentu ion ajn el mia penso kaj mi demandas: "Ĉu hazarde vi mem estas ankaŭ ia ruĝa faŝisto? Ĉu vi aprobas la farojn de tiuj, kiuj buĉis 12 anojn de la **Liberecana Junularo** el Barcelono? kiuj murdis la K-dojn Berneri, Barbieri, Nin kaj multajn aliajn?" Jam longa estas la listo de l' viktimoj de la ruĝa faŝismo hispana, kiu estas importita el Moskvo.

Oni raportis al mi, ke dum la lasta SAT-Kongreso, Kdo HERNANDEZ via kunulo kaj eble amiko, eldiris, ke "ne necesas esti prava, sed forta", kio vekis indignon ĉe multaj kongresantoj<sup>[2]</sup>. En tiu cinika eldiro ni trovas la ĝermojn de l' faŝismo. Tia senetikeco karakterizas la "moralon" de l' ĝangalo, la "moralon" de l' bolŝevistoj kaj de l' jezuitoj. Kiam via samlandano Ignaco de Lojola eldiris, ke "la celo pravigas la rimedojn", li ja estis la instruonto de Lenin, kiu rekomendis uzadon de **ĉiaj rimedoj** kontraŭ la "malamikon". Kiam Lenin faris sian jezuitecan rekomendon, tiam la "malamiko" konsistis el burĝoj, socialdemokratoj kaj anarkistoj; poste el la maristoj el Kronŝtad, kiujn mortpafigis Trocki; poste ĝi estis Trocki mem, kiun Zinovjev kaj Kamenev volis ke oni kondamnu je morto; poste, estis Zinovjev kaj Kamenev, kiujn Stalin mortpafigis; poste... La Tarpeusa Roko estas proksima de l' Kapitolo...

Estimata Kdo BOSK! Mi ne forgesis kiom afable kaj helpeme vi rilatis al mi, okaze de mia restado unusemajna en Valencio. Malfacile mi povas kredi, ke vi aprobas la krimojn de l' ruĝaj faŝistoj en Katalunio kaj alie. Via jesa aŭ nea respondo estos al mi tre valora. Tamen mi demandas: Ĉu vi aprobas aŭ ne? Mi havis la okazon observi kaj noti, kiom malbonfara estas la bolŝevisma senetikeco sur honestajn kaj bonfaremajn personojn iom simplanimajn. Al bona manĝaĵo ili aldonus venenon, se iu aŭtoritata persono klarigus, ke tio estas necesa por la sano de gasto. La **perĉiarimedeco** Lenina laŭ kiu bolŝevistoj devas mensogi, kalumnii, ruzaĉi, murdi ktp... por venki la kontraŭulojn, sukcesis atingi similan rezulton ĉe kredemaj admirantoj. Mi ne pensas, ke vi apartenas al tia kategorio de homoj. Necesas do serĉi alian klarigon pri via sinteno. Ĉu do vi opinius, ke por praktikemulo, kiu volas ludi en la socio elstarantan rolon, necesas ke li apartenu ĉu al la ruĝa aŭ alikolora faŝismo, ĉar ŝajne la homaro devas trapasi tian regsistemon? Kvankam mi ne konas vin intime, tamen mi malemas pensi ke tia hipotezo estas ĝusta koncerne vin. Sed se mi estus konvinkita ke tia estas via kazo, tuj mi formetus la skribilon, dirante: "je tia vidpunkto vi pravas kaj la elmonro de simpatio por la sennaciismo povas nur malutili al via kariero."

La sennaciismo ne bezonas diletantojn, sed pionirojn, kiuj klare konscias, ke ilia agado kaj laboro ne donos al ili gloron, famon iaspecajn. Se en 1934 vi estus tre atente kaj kompreneme leginta la **Manifeston**, vi certe substrekus kaj ne forgesus jenan alineon: "La plej esence grava laboro estas tiu de l' pioniroj, kiuj inventas, anticipas, dishakas en la

arbaro el antaŭjuĝoj kaj tradicioj, kiu forsekiĝas la marĉon el rutino kaj tiel preparas la vojon, kiun pli poste sekvos la amaso..."

Sed vi ne sufiĉe atente legis aŭ verŝajne vi forgesis; aliel ne estas klarigeble, ke en via letero vi diras aprobi la enhavon de l' **Manifesto** kaj samtempe vokas al sennaciismo PER internaciismo. Estas kontraŭdiro en la esprimo mem. La celo de l' verketo ĝuste estas montri la **esencan, fundamentan diferencon** inter la du ismoj. En via letero vi parolas pri diletantismo, sed, estimata Kdo, per tio vi nur povas pensigi seriozan homon pri la biblia rakonto pri pajlo kaj trabo.

Mi emus diri ankoraŭ multon pri la temo, sed necesas, ke mi bridu mian rezonemon. Cetere la legantoj de ĉi tiu letero povas trovi kvazaŭ aldonon en artikolo kun la titolo "**Ĉiu plenumu sian devon**", kiu verŝajne aperos en **S-ULO**<sup>[3]</sup>. Tamen mi ne volas fini, ne parolante pri via aludo al mia "morto". Estas tute vere, ke mi volis mortigi Lanti-n, kaj refariĝi simple Adam, la nekonatulo. Mi deziris laŭpove helpi al la neŭtrala movado en Japanio, opiniante, ke "universala lingvo entenas econ revoluciigan" (pĝ.15 en "**For la Neŭtralismon!**"). La japana Polico tion ne permesis. Tial ke mi malsukcesis en mia provo pri sinmortigo, tute nature mi do emas denove labori por la sennaciismo. Certe mi ne lasos sen respondo atakojn de internaciistoj; mi ne toleros konfuzon, misklarigojn kaj diletantismon en mia pionira laboro. Mi ne laciĝos ripeti, ke estas danĝera iluzio kredi, ke oni povas atingi daŭran pacon, konservante la naciojn; mi eventuale montros ke la sovetia patriotismo estas same

danĝera kiel la japana, la germana, la itala kaj ĉiu cetera; ke plie la sovetiaj servutuloj havas absolute nenian intereson defendi sian servuton. Ĝuste pro tio ke ili ne havas intereson, Stalin decidis fari grandskalan agitadon porpatrian. Se la kompatindaj servutuloj fakte havus intereson, tia agitado ne estus necesa. Kaj la plej lerta sofisto ne kapablu liveri ŝajnkontentigan klarigon pri tiu ĉi historia fakto: kiam Sovetio estis reale minacata de kapitalistaj ŝtatoj; kiam ĝi ne aliĝis al la Ligo de nacioj kaj ne alianciĝis kun la kapitalistaj Francio kaj Ĉekoslovakio, tiam la patriotismo ne estis agitobjekto de Komintern. Se plaĉas al vi fermi la okulojn, nu faru, sed ne postulu, ke ĉiu ankaŭ blindiĝu...

Mi plie aldiru, ke ankaŭ la ĉinaj kulioj kaj kamparanoj neniel plibonigos sian sorton, defendante la regadon de Ĉang-kaj-Ŝek kontraŭ la japana invado. Unuvorte kaj konklude: saĝa homo ne elektas inter pesto kaj ĥolero, sed provas ŝirmi sin kontraŭ ĉia malsano. Kaj se sennaciisto falas viktime dum milito, li almenaŭ povas ĝui la internan kontenton, ke la militistoj sklavigis nur lian korpon, ne lian spiriton, lian animon. Nenio ŝajnas al mi pli malsaĝa ol homoj, kiuj akceptas enkateniĝon, kredante, ke ili per tio liberiĝos. Se la milionoj da francoj, britoj kc., kiuj entuziasme batalis kaj mortis dum la milito por venki la "germanan imperialismon", por ke estu "la lasta milito", povus ekvidi la nunan staton de l' mondo, ili certe komprenus, kigrade ili estis trompataj, kigrade ili estis naivaj...

Nuntempe sennaciisto povas havi nur la senton, ke li troviĝas kaj devas vivi en granda frenezulejo. Ĉu pro tio li agu kiel la frenezuloj, kiuj ĉirkaŭas lin? Se mi juĝas laŭ la

sencenhavo de via letero, Kdo BOSK, la nura logika respondo al tia demando devas esti jesa; permesu, ke la mia estu nea...

Kun estimo kaj bonmemoro: E. LANTI

## Piednotoj

1. ↑ kio tute ne signifas, ke ni ne kontraŭbatalas sincerajn opiniojn, se ni opinias ilin eraraj kaj danĝeraj; ŝajne Kdo BOSK ne tute komprenas la sencon de l' vorto "kondamni".
2. ↑ Vidu pĝ.75 de la "protokolaro" (N°457 de S-ULO)
3. ↑ Vd. pĝ.161 de tiu ĉi broŝuro. (Kompil. noto)

# Adamaĵoj

[Nobla sennaciulo](#) (1921)

[Teoremoj](#) (1934)

[Meti Esperanton serve al la Proletaro](#) (1935)

[La signifo de la esperantista laborista movado kaj la rolo de S.A.T.](#) (parolado, 1933)

[K-do Lanti ĉe la Neŭtraluloj](#) (1939)

[Raciigado](#) (1937)

[Sennaciismo](#) (1948/49)

[El la "Notlibreto de Alfesto"](#) (1939)

[Ni preparu nin al neeviteblo](#) (1938)

[Kaprompe](#) (1943; publikigita en 1949)

[Memore al pioniro](#) (1955)

[Ĉiu plenumu sian devon](#) (1937)

[Mi ĝojas esti esperantisto](#) (1935)

## NOBLA SENNACIULO

(15 Decembro 1855 – 14 Aprilo 1917)

Ĉiu esperantisto pli malpli scias pri la admirinda vivo de la aŭtoro de esperanto. Liaj sindonemo, modesteco, altanimeco fariĝis kvazaŭ proverbaj ĉe esp. rondoj.

Sed oni ne metis sufiĉe en plenan lumon la ĉefaĵon el la spirito de Zamenhof: lian sennaciemon. Tiu karakterizaĵo lia estis preskaŭ ĉiam vualita de ti-kiuj sin kredas la disĉiploj de la genia hebreo.

Hebreoj estas ja fakte sennaciuloj. Sed multaj ne estas tiaj spiritaj. Pliparto el ili revas pri restarigo de hebrea nacio en iu Palestino. Aliaj fariĝis ŝovinistoj en la nacio en kiu la hazardo naskigis ilin.

Zamenhof ĉiam superstaris tiujn aĉe etajn ideojn. Li volis esti nur homo, ne nacio. En sia ruslingva libro, kies titolo estas **Hilelismo**, laŭ la nomo de la profeto Hillel, li klarigis sian penson pri tio. Subsignante tiun verkon per la du latinaj vortoj **Homo sum** (mi estas homo) li sufiĉe precize montris la esencon de sia penso.

Mi estas homo, nur homo, ne iu ajn naciulo. Jen la bazo mem sur kiu ripozas la Zamenhofa etiko; jen la deira punkto de lia agado kaj vivcelo.

En 1914, petite partopreni kunvenon por fondo de Hebrea

Ligo, li skribis al la organizantoj:

*"Mi mem bedaŭrinde devas stari flanke de la afero ĉar laŭ miaj konvinkoj, mi estas "homarano", kaj mi ne povas ligi min kun celado kaj idealoj de speciala gento aŭ religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devas esti: krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj – kiel natura sindefenda reago – estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, ol kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala.*

*Tio estas la kaŭzo, pro kiu mi, malgraŭ la korŝirantaj suferoj de mia gento, ne volas ligi min kun hebrea nacionalismo, sed volas labori nur por interhoma justeco absoluta. Mi estas profunde konvinkita, ke per tio mi alportos al mia malfeliĉa gento multe pli da bono, ol per celado nacionalisma."*

Tiuj noblaj vortoj lasas nenian dubon en nia spirito pri la sennaciemo de "D-ro Esperanto". Cetere en 1905, ĉe la Kongreso de Boulogne-sur-Mer, li jam samsence parolis:

*..."Ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio... Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Mar, kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj*



*kun Poloj, sed homoj kun homoj... "*

Mi estas homarano. Ni estu ĉiuj nur homoj jen kvazaŭ la **leitmotiv** de la penso Zamenhofa.

Iu "eminentulo", blufamanto kaj sciigisto de falsaj novaĵoj, povas malŝate paroli pri nove bakitaj esperantistoj. Lia elokventeco povas tondri. Li ne timigos nin kaj daŭre ne sukcesos monopoligi Zamenhof. La sennaciuloj tre konscias, ke ili sekvas la vojon montritan. Ili estas konvinkitaj, ke la "interna ideo" estas io plena, se ĝi entenas nian sennaciismon, kaj certe malplena se ĝi estas nur temo por paroladi antaŭ ministroj kaj reprezentantoj de kapitalistaj ŝtatoj, sed sufiĉe!...

La "nove bakitaj" honoros la "Majstron" ne per solenaĵoj, nek per preĝoj, nek per festoj, sed relegante kelkajn pecojn el lia verkaro. Ili penas pli funde scipovi la sennaciecan lingvon; ili provos varbi al ĝi novajn anojn.

Zamenhof estis religiulo liberkreda. Konsekvence, ne per ritoj, nek per ceremonioj ĉiuspecaj oni pli bone povas honorii lian memoron. Nek per ŝtonaj aŭ bronzaĵaj monumentoj, sed per senlaca laborado por trudi al la homaro la de li kreitan universalan interkomprenigilon.

La litero mortigas, la spirito vivigas. En niaj koroj, en nia hardita volo ni starigu idealan monumenton, la sole indan de la genia sennaciulo el Bjalistok.

**E.L.**

(El "**Sennacieca Revuo**", dec. 1921)



## TEOREMOJ

1) La senĉesa kaj nehaltigebla malvolviĝo de l' maŝinismo (permaŝina produktado kaj transportado) pli kaj pli alproksimigas la popolojn kaj interdependigas iliajn interesojn.

Konsekvenco. Tiu ekonomia interdependiĝo devigos la popolojn unuiĝi kaj kunfandiĝi.

2) Unu grava malhelpo en la unuiĝo de l' popoloj estas la subjektivaj fortoj, kiujn konsistigas malsamaj tradicioj kaj kulturoj, esprimataj per malsamaj lingvoj.

Konsekvenco. Kvankam estante nesufiĉa rimedo por estigi unuiĝon inter la homoj, tamen komuna lingvo estas nepre necesa, por ke ili povu interkonatiĝi kaj poste unuiĝi.

3) Ĉiuj naciaj idiomoj estas tre komplikaj, nelogikaj kaj sekve tre malfacile lerneblaj.

Konsekvenco. Estus malsaĝe esperi, ke iu el tiuj idiomoj povus fariĝi la komuna lingvo de ĉiuj homoj sur la tero.

4) Ekzistas jam de kelkaj jardekoj artefarita lingvo, kiu estas kvazaŭ la kvintesenco de la grandaj kulturlingvoj; ĝi nomiĝas **esperanto**, estas simpla, logika, facile lernebla, tre esprimoriĉa kaj jam disvastiĝis en ĉiuj mondpartoj.

Esperanto fariĝis viva lingvo de vivanta popolo kaj solvis la problemon pri tutmonda inter-kompreniĝo.

Konsekvenco. Kiu deziras efike kaj celkonforme batali por la unuiĝo de ĉiuj popoloj, tiuj havas la devon ellerni kaj praktikadi esperanton.

5) Per la praktikado de artefarita lingvo inter homoj el ĉiuj landoj disfalas la tradiciaj muroj, interpenetriĝas la diversaj kulturoj; plie, per la senĉesa pliriĉiĝo de origi- nala literaturo en esperanto kreiĝas nova, **sennacieca** kulturo ampleksanta la tutan mondon.

Konsekvenco. Sama kiel ĉe 4.

6) La klaso, kiu plej bezonas esperanton, estas la proletaro, tial ke ĝenerale la laboristoj estas nekleraj kaj ne havas kiel burĝoj la eblon lerni kelkajn fremdajn lingvojn.

Konsekvenco. Kiu volas efike kaj celkonforme labori por la emancipo de l' proletoj, tiuj nepre devas propagandi, lerni kaj praktikadi esperanton.

7) Jam de 13 jaroj ekzistas prolettendenca asocio, kies anoj estas unuigitaj per esperanto kaj ignoras inter si la landlimojn. Ĝi nomiĝas: **Sennacieca Asocio Tutmonda**.

Konsekvenco. Kiu deziras la starigon de senklasa, senlandlima socio, unuvorte la regadon de l' socialismo sur la tuta tero, tiu havas la devon aliĝi al tiu organizo, tial ke ĝi konsistigas la embrion de la estonta socio.

Kara leganto, kiel vi sendube scias, teoremo estas aserto,

kiu bezonas demonstracion, por ke ties vero vidiĝu klare. Al vi mi lasas tiun taskon. Pripensu mem, rezonadu logike, konsekvence kaj mi estas certa, ke tiuj teoremoj fariĝos por vi, kiel ili estas jam delonge por mi, disvastigindaj veraĵoj, nepre obeendaj principoj.

E. Lanti.

(El "**Sennaciulo**", 25. Aprilo 1934)

## METI ESPERANTON SERVE AL LA PROLETARO

En la gvidrezolucio, unuanime akceptita ĉe la fondkongreso de SAT, troviĝas interalie jeno: "... *nur per faktoj ni sukcesos vekti veran intereson pri esperanto ĉe niaj klasbatalaj organizoj... (La Kongreso) sendas al ĉiuj esperantistaj proletoj sian elkoran saluton kaj petas, ke ili aniĝu la Asocion, por ke, per komuna, frateca kaj sindonema kunlaborado, ni metu kiel eble plej rapide en la manojn de ĉiuj proletoj la ilon, kiu permesos al ili la forrenversiĝon de la lingvaj baroj...*"

Tiu kompreno pri la rolo kaj signifo de nia movado ĉiam gvidis la konsciajn SAT-anojn en ilia agado. Renversinte inter si la lingvajn barojn, spertinte mem kiom faciligas komuna lingvo la homajn interrilatojn, ili ĉiam klopodis, kiel eble plej laŭcele, por ke esperanto estu akceptata kaj uzata de kiom eble plej multaj proletoj. Meti la mirinde riĉan kaj facilan lingvon en la servon de ĉiuj laboristoj, tio klare signifas, ke nia tasko estas konvinki ilin pri la neceso lerni esperanton, ke la devo de ĉiu sincera homo, deziranta la tutmondan unuiĝon de l' proletaro, estas, imite al la SAT-anoj, unue detrui inter si la lingvajn barojn.

Estas ja aferoj, kiuj dependas de ni mem kaj aliaj kontraŭ kiuj ni ofte estas senpovaj. Lerni esperanton povas ĉiu homo. Tion ni scias laŭsperte. Oni ne povas riproĉi al laboristaj

organizoj, ke ili ankoraŭ ne sukcesis forrenversi la kapitalismon kaj starigi socialismon. Malebligis tion diversaj kaŭzoj, kiuj ne dependas de gvidantoj aŭ de simplaj anoj. Sed ni plene rajtas diri, ke la internaciistoj povas, se ili volus, fariĝi ĉiuj samlingvanoj per la lernado de esperanto. Se tiel ne okazis, estas eble pro tio, ke ni, esperantistoj, ne sukcesis sufiĉe lerte kaj trafe propagandi nian aferon. Tro da diletantismo ĉiam regis en la esperantistaj rondoj ĝenerale. Kaj lastatempe eĉ disvastiĝis iu stranga, sofisma, vere ridinda koncepto, laŭ kiu "meti esperanton serve al la proletaro", tio ne plu signifas klopodi por ke la laboristaj organizoj alprenu tiun lingvon kaj maldungu tradukistojn kaj interpretistojn, sed simple utiligi la esperantajn organizojn por ricevi informojn el eksterlando en la celo meti ilin al la dispono de iuj, ne de ĉiuj, partiaj tendencoj. Laŭ tia kompreno pri la rolo kaj signifo de nia movado, evidentiĝas, ke la propagando kaj instruado de nia lingvo estas tute akcesora, duagrada afero kaj sekve ne tre konsiderinda.

Sufiĉas tamen rapida ekzameno super tia elpensajo por tuj ekvidi, ke ĝi estas tute fantazia, tute malracia kaj povis ĝermi nur en la kapo de demagogoj aŭ de malsaĝuloj. Per la angla, franca, germana aŭ aliaj multe disvastigitaj lingvoj estas nuntempe multe pli facile akiri el la tuta mondo informojn, kiuj estas ofte pli interesaj kaj seriozaj ol tiuj akireblaj per esperanto. Anglalingvano povas trovi korespondantojn en la tuta mondo kaj aboni interesajn gazetojn el Usono, Hindio, Japanio k.a. landoj, kie la angla lingvo estas larĝe disvastigita. Mi persone plurfoje spertis en Germanio, Aŭstrio, Hungario, Italio, Rumanio, Turkio, Sovetio, Svedio, Norvegio, eĉ en

Japonio, ankaŭ en aliaj landoj, ke la franca lingvo estas multe pli disvastigita ol esperanto. Esperantisto, ano de iu ajn el la grandaj kulturlingvoj, trompas sin mem aŭ celas trompi aliajn, kiam li rekomendas kiel ĉefan taskon utiligi esperanton por kolekti informojn por gazetoj. Tiam kolektadon li ja povus fari pli bonrezulte per la utiligo de sia gepatra lingvo.

Agadi por "meti esperanton serve al la proletaro", tio tute ne povas signifi tiun peresperantan kolektadon de informoj, ofte tre banalaj kaj nepresindaj. Nur malsaĝulo povas aserti tion; nur demagogo povis elpensi tian sofismon por logi naivulojn.

Kompreneble esperantisto devas praktikadi sian lingvon; li agus malsaĝe, se li preterlasus iun ajn okazon tiucele. Kaj kiam grupo aŭ individuo ricevis el eksterlando presindan materialon, li ja devas meti ĝin al la dispono de gazetoj. Sed tion li faru kun la celo montri la ekziston, la vivantecon de nia lingvo, unuvorte **kun la celo propagandi nian aferon.**

SAT estis fondita ĝuste por ebligi, faciligi tian praktikadon de esperanto. Estis tempo, kiam la Jarlibro de nia Asocio, ĝia 12-paĝa semajna ĵurnalo, ĝiaj aliaj gazetoj (**La Nova Epoko kaj Sennacieca Pedagogia Revuo**) liveris relative multan represindan materialon. Informservo eĉ funkciis per la zorgoj de la Lajpzigaj K-doj. La landaj asocioj aŭ grupoj tiel havis en sia dispono materialon uzindan por tradukite utiligi en sia **poresperanta** propagando. La ĉefa tasko ĉiam celis instigi per nia ekzemplo la laboristajn organizojn, ke ili rekomendu al siaj membroj la lernadon kaj aplikadon de esperanto. Neniam envenis la kapon de la respondecaj gvidantoj de nia



movado, ke la ĉefa celo estas eldoni nacilingvajn gazetojn per materialo tradukita el esperanto!... Tio estus absoluta manko de kompreno pri la rolo kaj signifo de mondlingvo.

Meti esperanton serve al la proletaro, tio povas nur signifi, ke ni celas atingi, ke la gravaj internaciistaj organizoj laboristaj alprenu, apliku, uzadu nian lingvon kaj ne plu funkciu kiel ĝis nun nur per la helpo de tradukistoj kaj interpretistoj. Meti esperanton al la servo de l' proletaro, tio signifas, ke la plej simplaj laboristoj povos interrilati senpere kun siaj samklasanoj aŭ sammetianoj el la tuta mondo...

Iam ni havis la esperon, ke Sovetio donos grandan antaŭenpuŝon al la movado, celanta la forrenversiĝon de la lingvaj limoj. En 1920 aperis en gazetoj la informo, ke esperanto estos devige instruata en ĉiuj lernejoj tieaj. Ĉe la ekscio de tiu novaĵo Romen Rolan (Romain Rolland) skribis al ni jenon:

"Brave pri la novaĵo! La decido ĵus alprenita de la Sovet-registaro pri la deviga instruado de esperanto en ĉiuj lernejoj de Rusio estas evento de historia gravo, kies sekvoj estos grandegaj; ĝi estos farinta por la homara internacio pli ol ĉiuj teoriaj diskutoj, aŭ disputoj de partioj, en kiuj absorbiĝas la agado de la okcidenta socialistaro... Tutkore."

Sed poste evidentiĝis, ke la "decido" – se fakte decido okazis – restis nur surpaperaĵo; neniam ĝi efektiviĝis.

Malgraŭ ĉio, rilate la gravon kaj utilon de la esperanta movado laborista, ni restas ĉe la sama opinio kiel tiu de l' fama verkisto. Nia celo daŭre estas klopodi, batali, ĉiel instigi la internaciistojn, ke ili agu konsekvence, rilate la lingvan problemon. Per 15-jara praktikado, per siaj 15 kongresoj, per

sia eldonagado, SAT pruvis nekontesteble, ke esperanto taŭgas por laboristoj kaj sekve devas esti utiligata de ĉiuj. Nur tiele ili ĉesos esti fremdaj unuaj al la aliaj; nur tiam ilia samlingveco ebligos realan interfratiĝon. Nun la laborfratoj diverslandaj estas inter si kvazaŭ mutuloj. Meti esperanton al la servo de l' proletaro, tio signifas ĉesigi tiun malnormalan staton.

Sed eble poliglotaj gvidistoj kaj taĉmentoj da tradukistoj kaj interpretistoj preferas, ke daŭru la nuna stato. Tio estas alia temo de artikolo...

E. Lanti

(El "**Sennaciulo**", 25 dec. 1935)

---

## LA SIGNIFO DE LA ESPERANTISTA LABORISTA MOVADO KAJ LA ROLO DE S.A.T.

(parolado de E. Lanti en Svedio; 1933)

Estimataj Sinjorinoj kaj Sinjoroj,  
karaj Gekamaradoj!

La organiza Komitato de la XIII-a Kongreso de **Sennacieca Asocio Tutmonda** komisiis al mi la taskon klarigi antaŭ sveda publiko la signifon kaj la rolon de nia movado. Mi volonte akceptis fari tian servon, sed kun la supozo, ke vi ne atendas fari sciencoplenan, metafizike nebulan traktadon pri artefarita lingvo. Cetere, ne estante lingvisto, mankas al mi la necesa aŭtoritato por tion fari. Plie, mi tuj diros al vi tute malkaŝe kaj senĝene, ke teoriaĵoj pri eblo aŭ neblo krei kaj vivantigi lingvon, ŝajnas al mi absolute senvaloraj.

Pri tiu temo estis skribitaj multe da verkoj. Aŭtoritataj profesoroj neis; aliaj, ne malpli eminentaj, jesis kaj de tio rezultis nenio certa kaj pozitiva. Pli konvinka ol ĉio ŝajnas al mi la simpla, tuj **konstatebla fakto**, ke mi nun staras antaŭ vi, estimataj ĉeestantoj, kaj paroladas en **artefarita** lingvo. Kaj estas ankaŭ kontrolebla, se ne tuj konstatebla **fakto**, ke relative multaj el la aŭskultantoj ĉi tie sidantaj min bone komprenas. Ankaŭ same bone komprenus la malproksimaj esperantistoj, kiuj nun aŭdus per sia radio-aparato, se la

sveda radiostacio ne estus malpermesinta la dissendon de nia hodiaŭa programo. Vi certe konsentos, ke tiuj faktoj havas multe pli grandan valoron ol ĉiaj teoriaĵoj.

Cetere nur eksperimento, sperto povas meti finon al pure teoriaj diskutoj. Sekve, eksciis do, ke jam de 46 jaroj pli kaj pli ofte la eksperimento sukcese ripetiĝas ĉiutage, tra la tuta mondo.

Ni vivas en epoko, dum kiu la homo flugas per maŝinoj, aŭdas el malproksime per aparatoj; en nemalproksima tempo oni ne nur povos aŭdi, sed vidi la foran kunparolanton. Tamen pri la ekzisteblo de tiuj teknikaj mirindaĵoj multaj homoj ne volis kredi antaŭ kelkaj dekoj da jaroj. Hodiaŭ la maljunuloj el inter la plej obstinaj nekredantoj devas konfesi al si, ke ili eraris.

Same okazos, rilate la problemon pri mondlingvo. Pli kaj pli cetere la nombro de skeptikuloj malgrandiĝas. Iel estus ofendi la svedan publikon, kies progresema spirito estas bone konata, se mi insistus pri tiu punkto per akumulado de pruvoj, ĉu teoriaj aŭ faktaj. Mi do limigos min per la facile pruvebla aserto, ke esperanto vivas, funkcias, senĉese pliriĉiĝas kaj elastiĝas per la uzado, ke ĝiaj progresoj en la vastiĝado, kvankam malrapidaj, estas tamen konstantaj kaj ke ĉiuj surogatoj naskiĝintaj poste fiaskas unu post la aliaj, tial ke ili venas tro malfrue por solvi problemon jam kontentige solvitan.

Tial mi do simple transiros al la du ĉefaj punktoj de mia parolado, nome:

- 1) Kial laboristoj kaj avangardaj esperantistoj aparte kongresas?

2) Kiajn avantaĝojn la proletaro povas trovi en la ĝenerala tutmonda aplikado de esperanto?

Necesas ja diri, ke ĵus finiĝis en Kolonjo la XXV-a tiel nomita neŭtrala Universala Kongreso de esperanto, dum ni kolektiĝis ĉi tien.

En la fruaj tempoj de la esperanta movado, kiam temis ĉefe montri al la skeptika publiko, ke lingvo artefarita povas funkcii; kiam la nombro da esperantistoj estis tre malgranda, tiam estis memkompreneble, ke la intereso de tiuj unuaj pioniroj postulis malatenton inter klasoj kaj inter opinioj. Burĝoj kaj proletoj, katolikoj kaj framasonoj, reakciuloj kaj revoluciuloj estis ligitaj per unu sama komuna ideo kaj deziro, nome konigi al la mondo la mirindan kreaĵon de d-ro Ludoviko Zamenhof. Cetere la aŭtoro de esperanto estis tiom altspirita homo; el lia modesta persono elradiis tia unuiga forto, ke harmonio povis regi dum la universalaj kongresoj inter homoj plej diversaj laŭ deveno, kulturo kaj opinioj. Sed laŭgrade kiel vastiĝis la movado, kiam ĝi penetris pli kaj pli en laboristajn rondojn, tiam neeviteble devis elmontriĝi la klasaj antagonismoj.

Dum la lasta mondmilito esperanto estis metata en la servon de nacieca propagando. Esperantaj organizoj en Germanio kaj Francio uzis nian lingvon por diskonigi dokumentojn kaj propagandilojn, favorajn al sia respektiva nacio. Tio kompreneble devis havi kiel sekvon, ke internaciistoj ne plu emis renkontiĝi en sama kongreso kun ŝovinistoj; same la laboristoj, kiuj estas nemalofte persekutataj de sia propra registaro, ankaŭ ne plu povis silente aŭskulti la flatajn kaj malsincerajn vortojn, kiujn

kutime eldiras la gvidantoj de la neŭtrala movado al la registaroj, kies gastoj ili estas. Ĉu, ekzemple, niaj komunistaj kaj socialistaj K-doĵ povus nunjare kongresi en Kolonĵo kaj neŭtrale rilati kun reprezentantoj aŭ laŭdantoj de la Hitlera barbareco? Tio estas neebla. Tia neŭtralo estus tute kontraŭnatura kaj mi sekve deklaras, ke la XXV-a k.a. tiaj kongresoj havas nenian rajton, nenian pravon en sia pretendo reprezenti la tutan esperantistaron...

Antaŭ dek tri jaroj aŭdiĝis la krio: "For la neŭtralismon!" kaj ĝi trovis larĝan resonon en la laboristaj esperantaj rondoj. De tiam nia movado iras laŭ sia propra vojo, kvankam ĉiuj esperantistoj uzas la saman esperanton. Jen do kial nunjare ni estas la gastoj de la demokratie regata ĉefurbo de Svedio, dum la neŭtraluloj honoris Hitleron per sia ĉeesto en Kolonĵo...

La laborista esperantismo pruvis eksperimente, ke ĝi estas natura kaj vivkapabla entrepreno; sed oni komprenu min bone: tia apartiĝo neniel signifas niaflanke deziron, ke esperanto ne prosperu en burĝaj kaj eĉ faŝistaj rondoj. Male, kun maliceta kontento ni ĝojas, kiam ni tion konstatas. Ni havas la firman konvinkon, ke la artefarita lingvo portas ion en si revoluciecan. Tiun "ion" Zamenhof malprecize nomis "interna ideo de esperanto", kaj estas fakto, ke tiu pli malpli nebula koncepto pri la signifo de tutmonda lingvo forte ligis kaj subtenis la unuajn pionirojn de la esperanta movado; tiu ideo ligilo estas eĉ unu el la kaŭzoj de la sukceso de esperanto super konkurencaj projektoj.

Ĉio kio helpas faligi la murojn inter la popoloj, estas ja en si mem revolucieca. Estus tute utopie prezenti al si mondon,

sur kiu regus socialismo, t.e. paco, libero, foresto de ĉia ekspluatado kaj en kiu mankus la modernaj komunikiloj kaj produktiloj. Sekve sur la teknika kampo eĉ faŝistoj povas senkonscie labori al la detruo super tio, kion ili glorigas kaj deziras pluigi. Al tiaj homoj bone aplikiĝas la penso de la aktikva greka poeto:

**"Kiujn volas Jupitero pereigi, tiujn li malsaĝigas."**

La apartiĝo inter la laborista kaj burĝa movadoj okazis en Prago dum la jaro 1921. De tiu tempo ĉiujare kaj sen interrompo Sennacieca Asocio Tutmonda flirtigis sian standardon en iu grandurbo el Eŭropo: kvarfoje en Germanio, po unu fojo en Belgio, Aŭstrio, Sovetio, Francio, Britio, Nederlando kaj estas jam la dua fojo, ke Svedio gastigas nin: en 1928 ni ja kongresis en Gotenburgo kun la partopreno de K-doj el Sovetio kaj eĉ unu el Afriko.

Kaj tio estas ebla? vi certe demandos, kiam vi ekscios, ke nia organizo en la plej prospera tempo havis nur 7000 membrojn. Tio estas tiom pli miriga, ke la SAT-anoj estas ĉiuj neriĉaj homoj, eĉ multaj estas malriĉaj, senlaboraj, tiom pli ke en Italio jam delonge nia Asocio estas malpermesita, ke en Sovetio antaŭ tri jaroj trafis ĝin la sama sorto, kaj ke en aliaj diktatorecaj landoj ĝi renkontas multajn barojn kaj malhelpojn. Tamen malgraŭ ĉio ni sukcesis venigi en ĉi tiun belan urbon el la Nordo 599 K-dojn el 15 landoj. Trude ja staras la demando: kiel tio estas ebla?

Pli faciligos la respondon, se mi tuj konigas al vi la fakton, ke, ekzemple, 5 K-doj venis el Parizo bicikle kaj unu el Hispanio samrime. Dum la tuta jaro ili ŝparegis kun la celo akiri la necesan monon por libertempe vojaĝi al la SAT-

kongreso. Ĉiun jaron okazas tiaj faktoj, kaj ili klarigas la miraklon, ke Asocio havanta nur kelkajn milojn da anoj povas tamen okazigi ĉiujare kongreson same imponan, kiel tiuj de organizoj kun milionoj da membroj. La forto de nia movado kuŝas en tio, ke la SATanoj forte konscias, ke ili estas pioniroj de nova, granda ideo, kiu pli malpli frue konkeros la mondon.

La nombro da anoj cetere ne ĉiam estas por organizo sufiĉa pruvo pri ĝia efektiva forto. La lastatempaj okazintaĵoj en Germanio bedaŭrinde montras tion tre klare...

Nia movado estas forta kaj nedetruibla, tial ke naskis ĝin entuziasmo, idealismo kaj forta konscio pri tio, ke la proletaro povos definitive emancipiĝi nur, se ĝi estas mondscale unuigita. Ĉiuj facile konsentos, ke tia unuiĝo por esti reala, natura kaj efika, postulas komunan lingvon kaj **senperajn** rilatojn inter la membroj.

La nuna furoro de la faŝismo, de la naciismo en pluraj landoj ne devas trompi nin. Tiu movado povas dume triumfi kaj eble alkonduki la homaron al nova milita katastrofo la mondon ampleksanta, sed ili neniel kapablas solvi la problemojn, kiujn la senĉesa kaj nehaltigebla vastiĝo de la permaŝina produktado metas antaŭ nin. Malgraŭ ĉiaj naciismaj penoj la landaj kadroj krakas, fendiĝas; pli kaj pli evidentiĝas, ke la industria kaj financaj problemoj ne povas trovi solvon naciskale. Tion montras la senrezulta sinsekvo de mondkonferencoj. Eble kelkaj ties partoprenantoj komprenas la problemon kaj ekvidas solvon; sed evidente neniu kuraĝus ĝin proponi pro timo esti konsiderata kiel malbona patrioto, kiel naciperfidulo. La ĝusta solvo ja postulas forlason de la



naciaj suverenecoj kaj forfalon de la landlimoj.

La problemo, estimataj aŭskultantoj, estas ja tutmonda. La fakto, ke Japanio forlasis la Ligon de Nacioj, pruvas tion tre bone. Oriento ne plu toleras la hegemonion de Okcidento, tial ke pli kaj pli enplantiĝas tie la okcidentaj produktometodoj. Kaj tio havos kiel rezulton, ke venos nepre la tago, kiam la eŭropaj merkatoj estos surŝutataj de malkaraj varoj. La salajroj de la aziaj laboristoj estas ja tre malaltaj; iliaj vivkondiĉoj estas mizeraj kaj tio okazigos en tempo pli malpli proksima, ke salajroj tendencos egaliĝi tra la tuta mondo. Sed, se la okcidentaj laboristoj ne konatiĝos kaj unuiĝos kun tiuj el la Oriento, la egaligo okazos al la malsupro, dum ĉiuj havas intereson, ke ĝi okazu al la supro. En kia ajn direkto okazu la egaligo, ĝi estas neevitebla.

Estas utopie kredi, ke oni povas haltigi la teknikan progreson. En pasinta tempo laboristoj disrompis maŝinojn; hodiaŭ ekzistas burĝaj ekonomiistoj, kiuj rekomendas limigi, reguligi la instalon de maŝinoj. Sed tio estas neebla: neniam la kapitalistoj el la tuta mondo interkonsentos pri tio.

La invento de artilerio havis dum la mezepoko kiel sekvon, ke baronoj, grafoj kaj dukoj perdis sian suverenecon super la malgrandaj teritorioj de ili regataj, tial ke la dikaj muroj de iliaj kasteloj ne plu ŝirmis ilin kontraŭ la kanonoj. La hodiaŭa tekniko havos nepre similan rezulton rilate al la **nacia** suvereneco. La limoj devas malaperi; kaj ne nur Eŭropo, sed la tuta mondo estos vole nevole devigata unuiĝi – se ĝi ne volas refali en primitivan barbarecon.

Kiel okazos tiu unuiĝo? Ĉu milite, aŭ pace? La nunaj nacioj rezultas de la kunfandiĝo de provincoj kaj tio okazis

ĝenerale per milito. Ĉu same okazos rilate al la monduiĝo? Estus tro riske respondi tian demandon. Antaŭ kelkaj jaroj oni povis esperi, ke la II-a aŭ III-a Internacio sukcesos unuigi la tutan laboristaron tiom forte ke ĝi kapablus starigi novan ordon en la mondo. Bedaŭrinde montriĝis, ke la nacikonscio estas nun ankoraŭ multe pli forta ol la klaskonscio. Necesas esti blinda por tion ne vidi. Kaj la konsekvenco de tio estas, ke oni ne povas esperi fare de la proletaro baldaŭan plenumon de la historia misio, kiun Karlo Marks atribuis al ĝi...

Kiuj kulpas en tio? Ne estas mia tasko pritrakti tiun demandon. Sed mi opinias, ke ne necesas klarigoj por kompreni, kian grandan rolon povas ludi esperanto en la necesa, urĝa tasko ĝisradike detruiri la naciismon, kiu infektas diversgrade la tutan mondon kaj malhelpas ĝian unuigiĝon...

Se la laboristoj volas eviti kompletan sklaviĝon, kiel nun okazas en kelkaj landoj, ili estos devigataj serĉi novajn vojojn por atingi sian celon, nome la starigon de l' socialismo. Kaj, parolante pri socialismo, mi pensas pri sociordo, el kiu ne nur la klasoj malaperis, kie ne plu estas burĝoj nek proletoj, nek privilegiita burokrataro, sed ankaŭ kie regas libero, kie la homo konservas, aŭ pli bone, akiris sian tutan dignon. Tia vera socialismo, miaopinie, ne povas ekzisti nur en unu sola lando, sed devas havi kiel kampon la tutan mondon.

Mi jam diris, ke la tekniko pli kaj pli penetras en Azion. En tiu procezo unuavice marŝas Japanio kaj estas tre karakteriza fakto, ke tie ankaŭ la esperanta movado larĝe vastiĝas. Antaŭ nelonge eĉ la eksurbestro de Tokio, S-ro Hidejĉiro Nagata, faris perradian paroladon, en kiu li forte

akcentis la neceson de esperanto. Ĉi-okaze mi altiras la atenton de la svedaj laboristoj al tio, ke ili havas tute apartan intereson konatiĝi, intertrakti kaj unuiĝi kun japanaj K-doj.

Ne kredu, ke mi fantazias aŭ ŝercas. Per raporto publikigita en **Sennaciulo**, la oficiala organo de nia asocio, mi eksciis kun intereso pri la laŭdinda entrepreno de via kooperativa movado fabriki kaj disvendi elektraĵojn. Nu, malmultan tempon poste mi legis en iu revuo represon de informo, aperinta en la bulteno de la franca Komerca Ĉambro de Tokio, laŭ kiu elektraĵoj, fabrikitaj en Japanio, komencas invadi la mondmerkaton; ili jam konkurence venkis en Usono, en Sud-Ameriko kaj en Afriko; ili penetris en Brition, Holandon kaj Germanion. Per tiu simpla fakto vi nun certe pli facile komprenas pri la intereso de svedaj laboristoj interrilati kun japanaj fratoj.

Por tion fari, ĉu vi lernos la japanan lingvon, ĉu vi atendos, ke la japanoj lernu la svedan, aŭ ĉu ne estas preferinde sekvi la konsilon de S-ro Nagata, nome lerni esperanton? La respondo al tia demando ne povas esti duba.

Aliflanke la sperto instruas, ke por esti efika, la interligiĝo ne devas okazi nur de supre, burokrate. Sekve necesas de malsupre plekti retaron el multaj fadenoj, kaj tiele krei fortan, nedisŝireblan klasan unuiĝon.

Tian plektadon jam povas komenci esperantistoj. Estas ĝuste la celo kaj la tasko de SAT liveri la fadenojn. Per eldono de Jarlibro, en kiu aperas adresoj de membroj kaj grupoj el la tuta mondo, ni ebligas kaj faciligas al ili la interrilatojn; same per la publikigo de korespondpetoj en niaj gazetoj. La SAT-anoj interŝanĝas leterojn, fotojn, informojn

kaj per tia daŭra interrilatado kreiĝas fortaj amikecaj ligiloj. Tio bedaŭrinde okazas ankoraŭ tre timigite; sed kiu neos, ke tia demalsupra, grandskala kreiĝo de ligiloj povus tre helpi al la malfortigo de la naciismo kaj al la estigo sur la tuta tero de spiritostato, ebliganta la aplikon de la sennaciecaj solvoj, kiujn diktas pli kaj pli trude la senĉese vastiĝanta tekniko?

La nuna malharmonio kaj ĥaoso en la mondo rezultas grandparte de tio, ke la ideoj kaj sentoj ĉe la plimulto da homoj ne evoluis paralele al la sciencaj progresoj. La tradicioj pezas tiom forte sur la mensojn, ke tio malebligas ekvilibriĝon, harmoniĝon inter la materio kaj la spirito. Modeste, sur limigita kampo nia Asocio laboras efike al la efektivigo de tiu necesa harmoniigo.

Morgaŭ kelkaj centoj da kongresanoj el 15 landoj komencos pritrakti siajn komuninteresajn aferojn kaj la tuta kongreso aspektos, kvazaŭ sidus kune nur homoj de sama nacio. Forestos tradukistoj kaj sekve neniu parolonto povas timi, ke liaj diroj ne estos ĝuste interpretataj. La protokolaro de la kongreso estos publikigita nur en unu sola lingvo. Per tio tempo kaj mono estos ŝparataj, kaj multaj eraroj kaj malagrablajoj evitataj. Se troviĝas skeptikuloj inter vi, mi kore invitas ilin ĉeesti unu aŭ du kunsidojn de nia kongreso kaj iliaj duboj baldaŭ elbloviĝos. Ĉiu sincera homo, kiu konsentas esplori la aferon, devas konsenti, ke nia Asocio konsistigas por la laboristaro modelon de organizado, kiu prezentas grandajn avantaĝojn.

Pli malpli precize vi jam povas prezenti al vi nian movadon kaj restas al mi nur aldoni unu trajton, por ke la bildo estu finskizita antaŭ viaj spiritaĵoj. SAT ne havas

partie politikan karakteron kaj laŭstatute ne povas trudi al siaj membroj ion ajn kontraŭan al ilia politika konvinko. Ne difinante al si politikajn taskojn, kiujn cetere ĝi tute ne povus plenumi, sed nur edukajn kaj kulturajn, nia Asocio ebligas al anarkistoj, komunistoj, socialistoj, sindikatistoj kaj senpartiuoj, ke ili kunlaboru kun reciproka kompreno kaj toleremo. En kelkaj landoj tia kunlaboro estas malfacila pro la tie reganta partia fanatiko, sed ni ne timis entrepreni malfacilan taskon. Cetere mi ne bezonas insisti pri tiu punkto, ĉar ni troviĝas en landoj kie funkcias la al SAT similcela **Laborista Kleriga Asocio**, kiun vi nomas A.B.F. Kiam en la jaro 1928 mi por la unua fojo aŭdis pri tiu laŭdinda entrepreno de la sveda laboristaro, mi sentis fortan deziron fari el SAT per esperanto iun mondiskalan A.B.F. Vi eble pensas, ke tio estas troa ambicio, kvankam tre nobla. Povas esti!... Sed estas vero, ke por homo la vivo estas vivinda, nur se li havas altan idealon, al kiu li senĉese penas alproksimiĝi...

Estimataj Sinjorinoj kaj Sinjoroj, karaj Gekamaradoj!

Eble mi parolis tro longe kaj tedis vin; permesu tamen, ke mi konigu al vi ankoraŭ kelkajn pensojn, kiujn vi konsideru fantaziaj aŭ ne.

Antaŭ du monatoj oni celebris en Kutans (Coutances) urbo el la departemento Manŝ (Manche), la miljaran datrevenon de la alveno de normandoj en Fraricio. Tiuj homoj venis el Skandinavio. Tial ke mi mem naskiĝis en Normandio, tio sendube instigis min fari belan revon, kiu tamen povas fariĝi realaĵo. Unue mi vidis per la imago la antikvajn vikingojn, kiuj rabe kaj venke trakuras la mondon kaj starigas en la

mezo de l' XI-a jarcento la t.n. Skandinavian Imperion, kies limoj etendiĝis de Konstantinoplo al Nov-Jorko, pasante tra Kievo, Novgorodo, Stokholmo, Kopenhago, Oslo, Jorko, Dublino, Rejkjaviko kaj kiu posedis Groenlandon, Novan Teron, la duklandon de Normandio kaj la reĝlandon de la Du-Sicilioj. Poste okazas reciproka asimiliĝo inter la konkerintoj kaj konkeritoj. Maristoj fariĝas terkulturistoj kaj ĉe ili la aventuremo malfortiĝas aŭ almenaŭ ekdormas por longa tempo. Kaj, Skandinavio mem, de kie foriris la batalemaj vikingoj, fariĝis en nia epoko unu el la plej pacemaj mondpartoj. Sed la konkeremo tamen ne tute elsekiĝis; ĝi nur aliĝis en metodan organizemon kun larĝa horizonto. La skandinavaj idiomoj ne estante multe disvastigataj tra la mondo, modernaj vikingoj alprenas esperanton kaj konkereme vastigas ĝin sur la tutan teron...

Ĉu tio estos nur revo? Vi, estimataj skandinavo, respondu mem al tiu demando. Ni konas kaj alte taksas vian organizkapablon, vian seriozon kaj obstinon; tial ni havas la konvinkon, ke nenie troviĝas pli taŭga grundo ol en ĉi tiu norda duoninsulo por dissemi nian esperantismen. Pli kaj pli nia SAT-movado renkontas barojn kaj malhelpojn en la diktatorecaj landoj. Estas eĉ timinde, ke la diktatorema frenezo infektu ĉiam pli kaj pli larĝan kampon. Eble Skandinavio estos la lasta rifuĝejo por nia movado. Se tiel devus okazi, mi estas certa, ke vi ne lasos fali la standardon, sed gardos ĝin fidele, ĝis forpasos la febro, kiu nun skuas grandajn potencojn. Frenezo kaj pasio ne pevas daŭre regi la mondon; venos certe tempo, kiam la racio kaj prudento eniros la kapon de la homoj.

En tiu espero, kun la neŝancebla konvinko, ke pli malpli frue nia SAT-movado konkeros la tutan mondon, mi finos per ĉi tiuj esperigaj vortoj de la aŭtoro de esperanto:

*"Tra densa mallumo briletas la celo,  
Al kiu kuraĝe ni iras.  
Simile al stelo en nokta ĉielo,  
Al ni la direkton ĝi diras.  
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,  
Nek batoj de l' sorto nek mokoj de l' homoj,  
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita  
Ĝi estas, la voj' elektita."*

E. Lanti.

(El "**Sennaciulo**", aŭg.1933, sept.1933, oktobro 1933)

## K-do LANTI ĈE LA NEŬTRALULOJ!...

El la enkonduko far la Plenum-Komitato de SAT  
("Sennaciulo", 25. marto 1939):

*"Okazis antaŭnelonge en Uelingtono la Naŭa Kongreso de Nov-Zelanda Esperanta Asocio. K-do Lanti estis invitita ĝin partopreni kaj tie eĉ paroladi. Kredeble niaj legantoj legos kun granda intereso la tekston de lia parolado el la antipodo. Kaj ili certe rimarkos, ke nia K-do ne ŝanĝis sian vidpunkton rilate al la neŭtralismo. Ni substreku la fakton, ke Lanti facile povis pravigi sian ĉeeston inter neŭtraluloj, **kiuj permesis al li tute libere paroladi**, kaj ĉiokaze montri, ke neniam li celis malutili al la neŭtrala movado..."*

Estimindaj Gesamideanoj!

Se ni ne estus la samtempuloj de Ajnŝtajn (Einstein); se ni ne vivus en la epoko de l' relativismo, mi estus iom embarasata por pravigi mian ĉeeston inter vi. Sed se fakte ĉio estas relativa, estas facile klarigi, ke antaŭ 18 jaroj mi kriis en Parizo: "For la Neŭtralismon!" kaj nun en Uelingtono, por la unua fojo en mia vivo, mi partoprenas neŭtralan kongreson. Situacio kaj cirkonstancoj ja ne tute similas ĉe ambaŭ lokoj, kiuj situas antipode unu de la alia.



En Nov-Zelando – ial mi ne volas diri: "via lando"! – la klasdiferenco estas apenaŭ perceptebla kaj sekve esperanto povas esti pli malpli sukcese propagandata laŭ neŭtralisma maniero. Sed en Eŭropo ĝenerale tia propagando estas tute senefika en laboristaj rondoj. Tial mi iniciatis la neneŭtralan propagandmanieron kaj poste la starigon de Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.). Kaj la sperto montris, ke tiu organizo estas utila kaj vivkapabla, ĉar en aŭgusto de l' lasta jaro ĝi havis sian dek-okan kongreson kun partopreno de pli ol 600 personoj...

Por la bono de l' tuta esperanta movado necesas, ke nia lingvo disvastiĝu kaj enplantiĝu en ĉiuj medioj. Kaj la sperto montris al mi, ke ne eblas efike varbi al esperanto klaskonsciajn laboristojn per propagandiloj, uzindaj, ekzemple, ĉe la Sav-Armeo...

Pri tio mi ne volas insisti. Sed por ke vi povu okaze tute konvinkiĝi, ke neniam mi deziris la malprosperon de l' neŭtrala movado, mi mencias kontroleblan fakton: En la broŝuro "[\*\*For la Neŭtralismon!\*\*](#)", kiun mi verkis en 1921, vi povos legi sur la 16-a paĝo de la 3-a eldono jenan frazon: "**Kiam esperanto sukcesas en burĝaj rondoj, tiam mi kompreneble ĝojas...**" Kaj sur la 17-a paĝo: "La komercistoj propagandu en komercistaj rondoj, la katolikoj en katolikaj rondoj, ktp – kaj la revoluciuloj en revoluciemaj rondoj! Tiel nia varba agado plej rapide sukcesigos esperanton..."

Ĉar la sorto faris, ke hodiaŭ mi troviĝas en Nov-Zelando, kie la objektivaj kondiĉoj, rilate al la propagando por nia afero, ne tute similas al tiuj ekzistantaj en Eŭropo, ne estas

do vera kontraŭdiro en mia antaŭa sinteno kaj la nuna. Kaj se iu el vi dubas pri la sincero de miaj diroj, rilate al tio, ke mi deziras la prosperon de l' neŭtrala movado, sufiĉu al mi menci, ke S.A.T. eldonis **neŭtralan** vortaron, verkon, kiu povas esti uzata de esperantistoj el la plej diversaj medioj kaj kiun fakte uzas homoj, apartenantaj al tute malsamaj partioj.

Ĉar vi ne timis inviti al via kongreso iun diablan SAT-anon, supozeble vi ankaŭ ne timos aŭdi pri la kialo de lia esperantisteco. Mi rakontos al vi pri tio, ne kun la intenco pravigi mian vidpunkton, sed faros kvazaŭ konfeson. Kaj se mi sukcesos sufiĉe klare eldiri mian penson, tiam vi certe ne dubos pri mia sincera deziro, ke nia lingvo disvastiĝu senescepte en ĉiuj medioj.

Homoj varbiĝas al esperanto pro diversaj motivoj. Iujn ĉefe interesas la lingva flanko de la afero. Tiuj estas relative multaj en nia movado kaj sendube pro tio senĉese okazas viglaj diskutoj, eĉ disputoj pri lingvaj demandoj. Komercistoj povas varbiĝi, se ili kredas, ke nia lingvo helpas ilian negocon. Poŝtmarko-kolektantoj ankaŭ facile konvinkiĝos, ke nia lingvo utilos en ilia distra okupo.

Pro aliaj motivoj, same bagatelaj, homoj fariĝis esperantistoj kaj partoprenis nian movadon dum pli malpli longa tempo. Sed ĝenerale tiaj varbitoj ne restas ligitaj al nia afero dum tre longa periodo. Rilate al mi, la varbmotivo estis la logika konsekvenco de mia tiama konvinko politika. Antaŭ la milito mi estis internaciisto kaj eksciinte pri la ekzisto de internacia lingvo, tiam mi decidis, ke mi ĝin ellernos, tuj kiam mi havos tempon. Sed, verdire, mi konsideris la aferon akcesora kaj ne tre urĝa. Nur pli poste, kiam mi estis

praktikinta esperanton dum kelka tempo, mi konvinkiĝis, ke fakte la lernado de internacia lingvo devus esti la unua faro de ĉiu konsekvenca internaciisto. Tiam konvinkon mi sukcesis komuniki al Henriko Barbus, sufiĉe fama aŭtoro franca, kiu eldiris en artikolo, publikigita en kelkaj multe legataj ĵurnaloj, ke **"esperanto estas la Aboco de la internaciismo"**.

Bedaŭrinde la plej elokventaj diroj ne estas konvinkaj, se ties eldirinto mem ne **agas** konsekvence. Vortoj nur emocias, necesas agoj por efektive altiri, varbi. Se Barbus mem ellernus esperanton kaj poste parolus kaj verkus en nia lingvo, la varba efiko estus miloble pli granda. Tion saman oni povas diri pri aliaj famuloj, kiuj laŭde parolis pri esperanto kaj tamen neniam lernis ĝin.

Se fakte la scio de esperanto estas la Aboco de la internaciismo, tio signifas, ke la plej aŭtoritataj kaj famaj internaciistoj estas analfabetaj, ĉar ili ne lernis nian lingvon kaj ĝenerale ignoras nian movadon. Aliparte, ĉiu scias, ke unu sekcio de la Tria Internacio regas jam de 20 jaroj super 170 milionoj da homoj. Nu, se ties regantoj ne estus internaciiste analfabetaj, ili jam delonge enkondukus la devigan instruadon de esperanto en ĉiuj lernejoj de Sovetio.

Tiaj konstatoj igis min forte dubi pri la valoro de la internaciismo, kiel doktrino por starigi pacon kaj juston en la mondo, aŭ se vi preferas, por "konstrui socialismon".

Atakite de duboj, tiam mi estis instigata cerbumi pri la "interna ideo de esperanto". En la unuaj jaroj de mia esperantisteco mi emis moki kaj fakte kelkfoje mokis tiun nebulan ideologion de Zamenhof. Tamen unu frazo en lia

parolado ĉe la Unua Universala Kongreso ĉiam forte impresis min. La aŭtoro de nia lingvo diris:

*"Ni konsciu bone la tutan gravon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maró kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed Homoj kun Homoj."*

Karaj Gesamideanoj! Tiu frazo estas pensoriĉa; eble pli riĉa ol opiniis Zamenhof mem. Ĝi ja entenas la esencon de l' **sennaciismo**; ĝi signifas, ke la homeco devas venki la naciecon en la koro kaj cerbo de ĉiu homo. Kaj tiucele ili devas lerni ĉefe **praktikadi** esperanton, lingvon sennaciecan.

Ĉu eblas, ke la homeco venku kaj detruu la naciecon? Mi estas konvinkita, ke jes. Plurfoje mi havis la okazon konstati dum la kongresoj de S.A.T., ke ĝenerale la malnovaj, spertaj esperantistoj kondukas kvazaŭ ili apartenus al unu sama popolo. Ne eblis diveni ilian civitanecon. Kaj tiam mi pensis: "Se homoj povas dum kelkaj tagoj kondukti kiel anoj de unu sola popolo; se ili povas forgesi sian naciecon, ekzistas do la eblo atingi per laŭcela edukado, ke post kelkaj generacioj la homeco tute venku la naciecon..."

Aliflanke, mi rimarkis nemalofte, ke la internaciismo estas nur la bremse haltigita naciismo, kiu tuj refunkcias, kiam diplomatoj ne sukcesas akordigi la interesojn de siaj respektivaj landoj. Tial mi forlasis la internaciismon kaj fariĝis sennaciisto; tial esperanto akiris grandan signifon antaŭ miaj okuloj, kaj tial mi provis sistemigi la penson, kiun eldiris Zamenhof en Bulonjo-ĉe-Maró. La "interna ideo de esperanto" ja entenis ĝerme la sennaciismon, kiun mi provis pli malpli sukcese formuli en miaj verkaĵoj.

Mi diris sufiĉe por ke vi komprenu, ke por mi la sennacieca lingvo Zamenhofa ne estas io akcesora. Male, ĝi estas io tre grava, kvazaŭ la unua ŝtupo, kiun devas suriri ĉiuj sinceraj homoj, kiuj **celkonforme** volas labori al la konstruado de mondo, kie regus justo, paco kaj frateco.

\*

\*

\*

Mi faris al vi konfeson, sed tuj aldonas, ke mi ne emus fari ĝin nacilingve antaŭ neesperantistoj. Estas ĝuste kaj trafe diri al la ĝenerala publiko, ke esperanto estas nur interkomprenilo kiel ĉiu ajn alia lingvo. Ilo ne povas havi celon. La unua lokomotivo, la unua aŭtomobilo ne "celis" anstataŭi la ĉevalojn por la transportado. Kaj certe tio neniam okazus, se tiuj iloj ne taŭgus. Esperanto ne "celas" anstataŭi la naciajn lingvojn. Sed ne necesas longe cerbumadi por kompreni, ke se iam nia revo efektiviĝus, t.e. se nia lingvo estus devige instruata en ĉiuj lernejoj, tiam la naciaj lingvoj havus certe similan sorton al tiu de la ĉevaloj, rilate al la transportado.

Por ke vi pli facile komprenu mian penson, mi mencias konkretan ekzemplon. Vi sendube scias, ke la irlandaj naciistoj **konsekvence** penadas por revivigi la gaelikon kaj tiel havi **nacian lingvon**. Ili verŝajne sukcesos. Sed ni supozu, ke jam ili sukcesis, ĉu vi kredas, ke la irlanda verkisto Bernar Ŝo (Shaw) forlasus la anglan lingvon por gaelike verki? Al tia demando oni povas senhezite fari nean respondon. Verkisto ĉiam sin turnos al kiel eble plej granda

publiko – kaj sekve, se nia lingvo fariĝus la plej multe sciata, estas evidente, ke aŭtoroj preferus verki en esperanto ol nacilingve. Tiel la naciaj idiomoj iom post iom perdus sian kulturalan rolon, falus al la rango de nuraj dialektoj kaj eĉ finfine mortus.

Tio estas la logika konsekvenco de la esperanta movado, kiam ĝi estos atinginta sian celon. Kaj en tio kuŝas la profunda signifo de la "interna ideo de esperanto". Almenaŭ, se mi mem farigis ne nur ĝisosta, sed **ĝismedola** esperantisto, estas pro tio ke, prave aŭ malprave, mi opinias, ke esperanto devas fariĝi la kultura lingvo de sennacieca mondo. Se mi sentas min tiel forte ligita al la esperanto-movado estas ĉefe pro tio, ke mi pensas sekvi la direkton de la historia procezo, kiu el klanoj faris tribojn; el triboj, civitojn; el civitoj, provincojn; el provincoj, naciojn. Mi ne kredas, ke la nacioj konsistigas la lastan stadion de la evoluo. Ni ja vivas en la epoko de l' radio kaj aviado. Por la tekniko landlimoj jam ne ekzistas. Sed la menso de l' homoj tre malfruas, rilate al la scienca progreso. En tio kuŝas la ĉefa kaŭzo de l' krizoj, kiuj minacas la tutan mondon, sed precipe Eŭropon. La nura solvo al tiu problemo estas atingi, ke sur la tuta tero ne plu estu angloj, ĉinoj, francoj, germanoj, japanoj, rusoj ktp., sed nur **Homoj**. Kaj tio estos la konkreta realiĝo de la "interna ideo de esperanto"; tio estos la efektiviĝo de l'sennaciismo.

\*

\*       \*

Kompreneble tia idealismo vekas ĉe krudaj realistoj nur mokan rideton. Sed nun ni ne intencas argumenti pri tiu temo. Mi celas nur altiri vian atenton al tiu konstatebla fakto, nome, ke ĝenerale restas fidelaj al nia movado nur homoj, kiujn instigas idealismo, kiujn entuziasmigas la pli malpli nebula "interna ideo de esperanto". Kaj oni povas pruveble aserti, ke la idista movado fiaskis, precipe pro tio, ke ĝiaj anoj estis interesataj nur pri la lingva flanko de la afero kaj mokis la Zamenhofan idealismon. Sed mi ne bezonas insisti pri tio, ĉar evidente vi ĉiuj estas **intern-ideanoj**; tion almenaŭ sugestas la titolo de via gazeto.

Kiel mi jam diris, esperanto per si mem ne havas celon; sed tio ne signifas, ke la esperantistoj povas agi sencele. Kaj ju pli alta kaj malproksima estos tiu celo, des pli ili streĉos la fortojn por antaŭeniri al ties direkto. Kaj tio neeviteble okazigos miskomprenojn kaj eĉ persekutojn. Esperanto havas signifon, nur se ĝi estas utiligata por interrilati kun homoj el trans la naciaj limoj. Tiu simpla fakto sufiĉas por klarigi, kial nia afero aspektas suspektinda en la okuloj de ĉiuj diktatoroj.

Feliĉe la historio instruas, ke neniam la persekutoj sukcesis malebligi la finan venkon de bona, racia, utila entrepreno. Malgraŭ la teruraj persekutoj de l' katolika inkvizicio dum la mezepoko, tamen la movado por religia libero venkis. Hodiaŭ tra la tuta mondo preĝejoj el diversaj konfesioj staras en la samaj urboj; plie, libirpensuloj kaj ateistoj povas libere eldiri siajn pensojn. Kaj se ni tempe reiras plimalproksimen, ĝis la frua epoko de l' kristanismo, ni vidas, ke dum tri jarcentoj la kristanoj estis persekutataj kaj povis kulti al sia dio nur kaŝe en la katakomboj...

Nun en Eŭropo kaj Japanio milionoj da internaciistoj devas silenti aŭ sidi en malliberejo. Nu, ni supozu, ke la menso de tiuj homoj estas saturita per la "interna ideo de esperanto"; ni supozu, ke ili konscie celas al sennacieca mondo. Se tiel estus, neniu forto povus malebligi ke ili ellernu nian lingvon kaj per tio kaŝe, senbrue subfosu la bazon de l' naciismo, sur kiu sin apogas la diktatoraj reĝimoj. Se la diktatoroj malpermesus la eldonon de esperantaj libroj, tiam la subfosantoj povus ilin mane kopiadi; la unuaj kristanoj tion faris rilate al la "sanktaj skriboj".

Sed tiuj internaciistoj ne imitas la kristanojn, tial ke neniam ili fakte celis al sennacieca mondo; tial ke ĉiam ili ignoris nian movadon. Kaj ne peninte elradikigi la naciismon, ili finfine per ĝi estis venkitaj. Nur esperantistoj, mondlingvanoj, povas ignori la limojn kaj prezenti al si mondon, kie vivus nur homoj, ne diversaj nacioj. Necesas ja ne samigi internaciismon kun sennaciismo!...

Estimindaj Gesamideanoj! ĉar vi havas la bonŝancon vivi en lando, kiu situas ekster la detruaj uraganoj de l' naciismo; ĉar vi povas libere propagandi kaj agi, necesas, ke vi ekkonsciu pri la respondeco, kiun trudas al vi tia stato antaŭ la tuta homaro. Eble la civilizo milite disrompiĝos en Eŭropo, kaŭze de l' freneza naciismo; tial vi devas iel prepariĝi por kolekti okaze ties fragmentojn. Vi devas almenaŭ profunde konvinkiĝi, ke esperanto ne estas bagatela afero, ke nia movado estas unu el la plej gravaj faktoroj en la evoluado de l' homa socio.

Kompreneble estus malsaĝe pretendi, ke vi devas fariĝi ĝismedolaj esperantistoj, kiel mi, kiu sentis sin fremda en sia



naskiĝlando kaj pro tio fariĝis sencela vagulo tra la mondo. Almenaŭ vi povas mediti pri tiu fakto, ke antaŭ vi ĉeestas homo, ĉe kiu la ĉiutaga praktikado de esperanto kaŭzis ke li sentas sin kore kaj spirite ligita al **Esperantio**. Kaj ne kredu, ke tiu regno estas tute fikcia, kiel oni povas unuapense opinii. Jam de tri jaroj mi spertis multfoje tra la mondo, ke ĉie, kie mi troviĝas inter esperantistoj, tie mi sentas min hejme. Ĉie en Esperantio mi trovis helpon kaj fratecon.

Esperanto fariĝis al mi tiel kara, ke se hazarde esperantisto parolas al mi franclingve, tiam mi sentas min preskaŭ ofendita. Kaj eble tio klarigas, kial mi ne kapablas ellerni la anglan lingvon. Tiu lernado ĉiam donis al mi la senton, ke mi pekas, ke mian tempon mi fuŝuzas. Tiun konfeson mi faras, ne kun la intenco konsili, ke vi penadu por akiri mian sentmanieron kaj iel imiti min, sed nur por ke vi komprenu kiel forte la esperanta afero povas influi la menson de homo, kiun tamen ĝis nun oni ne bezonis loki en frenezulejon.

Esperanto ja ne estas por mi bagatela afero. La fakto, ke ĝi estis artefarita lingvo, kaj sekve sennacieca, kaŭzas, ke mi ŝatas ĝin treege; mi eĉ povus diri, ke mi kvazaŭ amas ĝin. Kaj mia granda ĉagreno estas, ke mi ne povas gravedigi tian lingvon per ĉefverko. Mi malŝatas ĉian naciaĵon kaj ĵaluzas al la naciaj lingvoj, kiuj trovas pii talentajn amantojn ol nia juna, kara lingvo sennacieca. Sed mi forte esperas, ke iam en Esperantio troviĝos geniulo, kiu donacos al la tuta homaro ĉefverkon.

Hieraŭ vespere ni aplaŭdis al teatraĵoj, al spritaj komikaĵoj, al lertaj magiaĵoj ktp. Mi tamen devas diri, ke plej forte impresis min la fakto, ke sep-jara knabo bele deklamis kaj

kantis en nia lingvo. Mi fidas al la generacio de homoj, kies lulila lingvo estos esperanto. Inter ili devas logike troviĝi la dezirata kaj bezonata geniulo. Dume ni ĉiuj plenumu modeste, sincere kaj sisteme nian esperantan taskon. Ni lertiĝu en la praktikado de nia lingvo kaj tiucele ni forte konvinkiĝu, ke por funde scipovi esperanton, por esti kapabla elfosi ĝiajn kaŝitajn trezorojn, necesas unue atingi staton en kiu ni estus tute liberigitaj el ĉia influo de naciaj lingvoj...

Se malfacile estas konvinki homojn pri la pravo de l' sennaciismo rilate al la soci-politiko, mi kredas, ke esperantistoj povas almenaŭ konsenti, ke sur la lingva kampo tiu ismo estas tute prava.

Estimindaj Gesamideanoj! mi dankas al vi pro via pacienca toleremo. Mi konscias, ke plurrilate mi herezas incite. Miaj diroj povis iafaje sulkigi la brovojn, eĉ hirtigi la harojn de kelkaj aŭskultantoj. Sed vi ĉiuj estas sufiĉe larĝmensaj, por ne deziri persekuton al herezuloj, kiel tio okazas ankoraŭ nun en kelkaj partoj de l' mondo.

Pro tia toleremo vi estu kore gratulataj – kaj samtempe mi gratulas al mi mem pro tio, ke mi troviĝas en la suda hemisfero de nia terglobo kaj ne en la norda... Tia memgratulo estas la plej bona komplimento, kiun mi povas direkti al vi... Dankon!

E. Lanti.

## RACIIGADO

(Tiu ĉi lekcio farita ĉe laborista e-grupo, aperis en "Sennacieca Revuo", 10.Januario 1937)

Vi certe konsentos kun mi pri la neceso unue difini la vorton **raciigado**. Ĝi estas ofte komprenata malsame de diversaj personoj. Multaj ja uzas ĝin kun la senco de **normigado**. Estas vere, ke por normigi la fabrikadon de objektoj, oni devas apliki raciecajn principojn, sed tio tamen povas havi nenion komunan kun la raciigado, kiel mi ĝin komprenas.

Klarigcele mi donu konkretan ekzemplon. En Usono, sekve de instigoj de la prezidanto Huver (Hoover), stariĝis antaŭ kelkaj jaroj komitato el teknikistoj, kiuj konsilis redukti la nombron da tipoj de diversaj objektoj. Ekzemple, konstatinte la ekziston de 210 tipoj de boteloj, ili konsilis redukti ilin ĝis 20; konstatinte la ekziston de 175 specoj de aŭtomobilradoj, ili konsilis redukti ilin ĝis 4; same pri la 66 dimensioj de brikoj, kiujn ili konsilis redukti ĝis 7. Praktike, la usona ministro por komerco konstatis, ke de la jaro 1921 ĝis 1928 okazis meza reduktado de 73%, koncerne 50 diversajn objektojn.

Evidente tia normigado estas racieca en si mem, ĉar ĝi ebligas grandan ŝparon de homa energio kaj eĉ de materialo. Produktado de malsamaj objektoj ja necesigas la ekziston de

malsamaj iloj kaj instaloj, kio postulas apartan laboron kaj sekve nenecesan elspezon de energio. Laŭ iu statistiko la normigado pligrandigis en Germanio la produktokapablon je 30, 45% en pluraj industrioj.

Sed ĉu tio signifas, ke ĉiu ajn normigita produktado estas racia? Certe ne. Oni ankaŭ povas normigi la produktadon de kanonoj, militŝipoj aŭ maŭzoleoj, kaj tio havas nenion komunan kun la racio.

Studante la historion pri la homaj socioj, oni povas konstati, ke la homoj plibonigis sian sorton, proporcie kiel kreskis la racio en ilia cerbo. Kiam regis male la mistiko, ili suferis mizeron kaj turmentojn. Kiam homoj adoras diojn, konstruas por ili templojn, buĉas por ili bestojn kaj eĉ homojn, unuvorte faras plej egajn sensencaĵojn, tiam ne regas la racio, sed absurda mistiko. Kaj tamen, por konstrui plej senutilan kaj sensencan objekton, oni devas, konscie aŭ ne, apliki, obei raciecajn leĝojn. En la homa cerbo sekve ĉiam estis pli malpli granda kvanto da racieco; sed la proporcio da mistiko estis, kaj ĉe multaj homoj ankoraŭ estas, pli granda ol la proporcio da racieco. La mistiko eĉ plej ofte tute servutigis al si la racion.

Sed mi rimarkas, ke mi ne ankoraŭ difinis la vorton **raciigado**, kiu estas la temo de mia traktaĵo. Laŭ mia kompreno la raciigado estas la ago fari, ke io estu racia; ĝi estas apliki la principojn, kiujn eltrovas la racio. Nu, bone, sed necesas ankaŭ difini ĉi tiun lastan terminon. La racio estas la kapablo koncepti, abstrakti, starigi aksiomojn, regulojn, leĝojn, metodojn kaj ankaŭ hipotezi, anticipi. La racio estas la plej alta funkcio de la intelekto.

Ekzistas alia vorto iel parenca kun la racio, ĝi estas la saĝo. La **Plena Vortaro** difinas tiun terminon jene: "kapablo ĝuste juĝi pri ĉiaj aferoj". Por ke vi pli bone komprenu la parencecon kaj la diferencon inter ambaŭ vortoj, jen estas konkreta uzo de ili: La saĝo instigis Zamenhof elpensi esperanton. Li konstatis, ke la neeblo ĉe homoj interkompreniĝi pro manko de komuna lingvo estas malbona afero kaj nepre forigenda stato. Lia racio helpis lin eltrovi ĝeneralajn prilingvajn principojn, kiuj kondukis lin al normigo de la lingvoj ĝis unu sola tipo: esperanto. Zamenhof, instigite de sia saĝo, celis do raciigi la rilatojn inter la homoj sur la tuta tero per lingva normigo. Iarilate Zamenhof estis do raciulo; sed kiam en sia "**Preĝo sub la verda standardo**" li deklamas:

*"Al, Vi, ho potenca senkorpa mistero,  
Fortego la mondon reganta,"*

estas tute evidente, ke tiam en la menso de la aŭtoro de esperanto superregas la mistiko. Tian dualismon ni povas konstati ĉe preskaŭ ĉiuj homoj. Ili estas treege majmultaj tiuj, kiuj tute liberiĝis je la mistiko.

Se oni normigus la fabrikadon de la krucoj, kiuj estas ordinare metataj sur tombojn ĝis unu sola tipo; aŭ se oni decidus, ke estonte ĉiu mortinto estas konservata en maŭzoleo kiel estas la kadavro de Lenin, mi ne opinius, ke tia normigado estas racia.

Kiam mi do parolas pri raciigado, temas pri dezirindo, ke la homoj agadu, kondutu racie kaj ne mistike; oni pensas pri la neceso starigi socisistemon, laŭ kiu homoj ne malsatus pro normigado de la produktado.

Vi ja scias, ke la terura senlaboreco nuna estas grandparte kaŭzata de la normigado. Kaj tamen, se oni ĉesus konstrui militŝipojn, kanonojn k.a. malutilajn objektojn kaj ankaŭ la neutilajn, kiel estas funebraj monumentoj en tombejoj, la nombro da senlaboruloj povus eĉ pligrandiĝi, se nenio alia estua ŝanĝita en la socio.

Kio instigas la kapitalistojn normigadi la produktadon, tio ne estas la racia deziro plibonigi la vivkondiĉojn de la produktistoj, sed nur la freneza avido al ĉiam pli granda monprofito.

Okazas tamen, malgraŭ la indiferento de la kapitalistoj pri tio, ke normigado en la produktado profitdonas ankaŭ al la laborista klaso. Per la aplikado de raciecaj principoj en la konstruado de maŝinoj kaj en organizado de la laboro, oni ja povas atingi grandkvantan kaj sekve malmultekostan produktadon, kio ebligas al pli granda nombro da personoj aĉeti la tiele produktitajn objektojn. Nuntempe ĉiu daŭrigita laboristo povas, ekzemple, posedi poŝhorloĝon, bicikleton, pli malpli komfortajn vestojn kaj meblojn; li povas legi ĉiutage gazetojn kaj eĉ aĉeti librojn. Antaŭ 100 jaroj nur malmultaj burĝoj povis havi similan bonstaton.

Sed tia stato ne estas atingita per la nura normigo en la produktado. Necesis por tio, ke la laboristoj klasbatalu por povi iom profiti de la industriaj perfektigoj. Kie la laboristoj ne estis postulemaj, tie ta burĝa klaso simple plibonigis siajn proprajn vivkondiĉojn, lasante la laboristojn vivadi en mizero kaj laŭ la plej primitiva maniero. Bonan ekzemplon liveras al ni la stato de la kulioj en ĉinio. Prezentu al vi, ke en Ŝanhajo ne ekzistas sur la kajoj de tiu granda haveno arganoj por ŝarĝi

kaj malŝarĝi la ŝipojn. Tiun tre penigan laboron faras 20–30.000 kulioj, kiuj laboras tage 12, 13 horojn por ridinde malalta salajro. Ili nutras sin nur per rizo kaj loĝas en kabanoj sen ia ajn komforto. La tieaj kapitalistoj – la ĉinaj kiel la aliaj – diras, ke la "rizmotoro" kostas malpli kare ol la petrolmotoro. Tial ili ne instalas arganojn en la haveno.

En tiu granda moderna urbo, ja pro la sama motivo, oni ankaŭ vidas homojn, kiuj faras ĉevallaboron; ili kure trenadas veturilojn, en kiuj sidas sinjoroj aŭ sinjorinoj. Kiu ŝoforo en Eŭropo konsentus fari tian humiligan, sklavecian laboron?

Kredeble vi jam pli malpli klare komprenas, kia estas mia vidpunkto, koncerne tiun tiom ofte debatitan demandon pri **raciigado**. Ĝenerale en tiuj debatoj oni ne interkonsentas, tial ke la debatantoj uzas vortojn, pri kiuj ili ne havas saman komprenon. Mi do aprobas la normigadon en la produktado, kiam ĝi estas racia t.e. kiam ĝi malpligrandigas la penon de la laboristoj kaj plibonigas iliajn vivkondiĉojn. En mala okazo, ne povas temi pri raciigado, sed nur pri sklavigado.

En kapitalisma mastrumado vera raciigado estas tute neebla, ĉar ĉe kapitalistoj la instigo al la produktado ne estas krei bonstaton por ĉiuj homoj, sed nur la deziro akiri personajn profitojn.

Malgraŭ tio la laboristoj ĝenerale ne agas saĝe, kiam ili kontraŭstaras al la instalado de maŝinoj. Ili prefere batalu organizite, por ke la maŝinoj okazigu plimallongigon de ilia labortempo. Cetere en la pasinta tempo neniam la maŝindetruantoj povis atingi sian celon. Kontraŭstari al la maŝinismo estas kvazaŭ naĝi kontraŭflue. Kiam la pratempa homo utiligis ŝtonon aŭ bastonon, tio jam estis la unua paŝo

sur la vojo, kiu kondukis la homaron al la nuntempa maŝinisma epoko. Ne estas eble iri malantaŭen, nek halti.

Kaj jen ni trafas nun la kernon, la esencon de l' problemo. Kial la homo scipovis unue fabriki tre simplajn ilojn kaj poste plej komplikajn kaj delikatajn maŝinojn? Ekzistas bestoj, precipe insektoj, kiuj posedas naturajn ilojn tre perfektajn kaj delikatajn. Ekzemple, termitoj posedas borilojn, segilojn kaj tondilojn. Sed tiuj iloj ne troviĝas ekster la korpo de la termito. Tute aliel statas la afero ĉe la homo. Li inventas kaj fabrikas mem siajn ilojn kaj maŝinojn, kiuj staras ekster lia korpo. La homo scipovis fabriki ilojn, ne nur pro tio, ke lia dikfingro kontraŭas al la aliaj fingroj, kio sendube estas grandega avantaĝo, sed ĉefe pro tio, ke en lia cerbo naŝkiĝis la kapablo abstrakti, koncepti kaj poste rezoni, alivorte kiam naskiĝis la **racio**.

Kiel kaj kial naskiĝis tiu kapablo en la homa cerbo? Neniu povas doni tute kontentigan respondon al tiuj demandoj. Sed la fakto, ke mi parolis pri **naskiĝo** de la racio, tio montras, ke mia opinie la homoj ne ĉiam posedis tiun kapablon. Kaj nuntempe ne ĉiuj samgrade posedas ĝin. En la antaŭparolo al **Naciismo** mi parolis pri du tendencoj, kiuj kunekzistas en la menso de l' homoj: la mistikeca kaj la teknikeca. La teknikeca tendenco havas kiel bazon la racion. Kaj mia espero estas, ke la racio okupos pli kaj pli grandan lokon en la homa cerbo, ĝis finfine la tuta mistikeco estos elpelata, sufokata. Sendube pasos kelkaj jarcentoj, ĝis tiu rezulto estos atingita. Sed oni povas tamen racie havi tiun esperon. Levi-Brül (profesoro ĉe la Pariza Universitato) en siaj verkoj pri la menso de la primitivuloj tre klare montris, ke ĉe ili mankas la



kapablo abstrakti; racio sekve tute ne ekzistas en ilia cerbo; ili estas sub kompleta influo de la mistiko. Ili eĉ ne konscias pri sia individueco. La totema klano konsistigas por ili unu tuton, kiun nur la anoj de alia totemo povas diferencigi. Primitivuloj scipovas kalkuli ĝis dek aŭ dudek laŭ tio, ĉu ili konas siajn man- aŭ piedfingrojn. Sed la abstrakto **unu** aŭ **dek** restas por ili nepensebla. Nu, se oni komparas la menson de tia primitivulo kun tiu de iu Ajnŝtajn, kiu konceptas kvaran dimension, en kiu enestas la ideo pri tempo, oni tuj vidas, kiom granda estas la aliĝo, kiu okazis en homaj cerboj.

Pro tio, ke mi konsentas prj la ekzisto de tiu dualismo – mistiko-racio – en la homa menso, okazis, kiel eble vi scias, ke ortodoksaj marksistoj riproĉe emfazis ke mi estas idealisto aŭ pli ĝuste **ideisto**, kaj tio por la anoj de la nova materialisma religio estas plej abomena kaj kondamninda. Tiuj ortodoksuloj estas ĉu tre nesciaj aŭ pli verŝajne tre malsinceraj. Konstati la ekziston de ideoj ĉe la homo kaj la grandan rolon, kiun ludas tiuj ideoj, tio neniel signifas, ke mi kredas je ilia memstara ekzisto. Kaj jen vidu, kiom stranga ŝajnas ĉi tio: mi faris la apologion de la racio kaj tamen mi ne estas raciisto en la senco, kiun havas tiu termino ĉe filozofoj. En filozofio oni ja komprenas sub la nomo **raciismo** la sistemon, kontraŭdiran al la empiriismo, laŭ kiu la racio estus originala kapablo, kiu donas al ni unuajn ideojn, unuajn principojn, malsamajn je tiuj akiritaj per la sperto. Se tiel estus, ĉiuj homoj havus tiun originaian kapablon, kaj ĵus mi diris, ke la primitivuloj estas senigitaj je racio, ke ilia menso estas tute sub la regado de la mistiko. Ĉe la origino ne

ekzistas do ia ajn dualismo. Sed kiam la racio, sekve de la sperto, naskiĝis kaj kreskis en la homa cerbo, tio estis nova kaj grandega faktoro en la evoluado de la homaro. Mia vidpunkto estas do pure monisma – ne dualisma, kiel ortodoksuloj volas kredigi tion al simplanimaj K-doj.

Sed kiam oni scias, ke la homo aliĝis kaj daŭre aliigas la mondon ĝuste pro tio, ke la racio naskiĝis kaj kreskis en lia cerbo, estus malsaĝe forgesi tion, kiam oni volas akiri mondpercepton. Kiel diris la filozofo **Alen** (Alain): "... Kiam vi priskribos la homan animalon, ne forgesu la Ideon. Ĝi estas la unego de l' homo kaj lia bleko."

Eble vi atendis tute alian pritraktadon super la temo; eble vi deziris ekscii, ĉu mi aprobas aŭ ne la labororganizon kun ruliĝantaj stabloj. Mi devas konfesi, ke mi ne havas personan opinion pri tio. En sia verko "**Mia vivo kaj mia Laboro**" Ford asertas, ke la granda plimulto de la laboristoj ŝatas fari laboron, kiu postulas de ili nenian iniciativon. Ĉu tio estas vera aŭ ne, mi ne scias. Kiam mi laboris en la industrio, mi ĉiam preferis la malfacilajn taskojn, kaj fariĝinte sperta en iu fako, mi baldaŭ forlasis ĝin por iri en alian, kie mi devis denove lerni. Mi kredas sekve, ke mi povus malfacile adaptiĝi en monotona, teda labormaniero. Tamen se tia laboro ebligus, ke mi laboru 5 horojn anstataŭ 8, kredeble oni penus adaptiĝi. Sed tio estas nur spekulativa rezonado, ĉar mi ne spertis la aferon.

Konklude mi diru, ke se la laboro ĉe ruliĝanta stablo estas tiom teda, ke ĝi riskas stultigi la laboristojn, tia labormaniero ne estas racia; la instalon de ruliĝantaj stabloj mi do ne nomus raciigado. La racio ne povas disiĝi de la saĝo. Se oni

malsaĝe aplikas raciecajn principojn kaj metodojn, tio havas nenion komunan kun mia kompreno pri **raciigado**. La racio naskiĝis en la homa cerbo kaj ĝi devas utili al la tuta homaro kaj ne nur al unu klaso da ekspluatistoj. Mia raciismo estas ilo, kiun mi deziras meti en la manojn de ĉiuj laboristoj, por ke ili uzu ĝin en sia batalo kontraŭ la burĝa klaso; mia raciismo kondukas al la socialismo, t.e. al la starigo de socio sen ekspluatado de homoj al homoj. La ĝenerala alpreno de esperanto estus plej efika kaj laŭcela raciigado kaj la laboristaj gvidantoj, kiuj ignoras ĝin, kondutas tute malracie, kio pruvas, ke en ilia cerbo, la proporcio da mistiko superas la proporcion da racio.

E. Lanti.

## SENNACIISMO

(Tiun ĉi artikolon verkis k-do Lanti en 1941 por la E-gazeto "**Renovigo**", Meksikio. Represis ĝin "**Sennaciulo**", dec. 1948 kaj jan. 1949)

La termino per si mem estas tute klara: ismo laŭ kiu ne ekzistus nacioj kaj sekve ĉiuj homoj sur la tero estus samregnanoj, mondcivitanoj.

Sed tia ismo estas sensencaĵo, kredeble pensos legantoj, ĉar nacioj ekzistas kaj ilin ignori ne eblas. La nacioj estas ja realaĵo. Bedaŭrinde! Malsanoj ankaŭ ekzistas kaj tamen neniu – krom eble kuracistoj – deziras, ke oni ĝoju pro tio kaj penadu por ilin eternigi.

Nacioj ekzistas kaj ĝuste pro tio la homaro malsanas, elspezante nekalkuleblan kvanton da energio kaj materialo por detruaj, mortigaj celoj. Sed regnestroj, ambasadoroj, generaloj kaj similaj parazitoj profitas ilian ekziston – simile al la kuracistoj, kiuj havas komfortan vivon dank' al la ekzisto de malsanuloj.

Kompreneble neniu kuracisto volus eldiri publike sian deziron, ke estu sufiĉe da monhavaj malsanuloj, por ke ili povu enspezi grandan honorarion. Ĉiuj ja volonte asertus, ke ili deziras la kiel eble plej rapidan resaniĝon de siaj pacientoj.

Same ĉiaj registoj kaj regaspirantoj asertas, ke ili klopodas

por starigo de surtera paco kaj tiucele penadas por ekvilibrigi la fortojn de la nacioj per armado kaj aliancoj. Diplomatoj trovas en tio agrablan okupon kaj ĝuas plezuron, sciante, ke en la ĵurnaloj el la tuta mondo oni raportos pri la intertraktadoj, kiujn ili faras kun siaj kolegoj alinaciaj.

Kaj tial ke tiaj intertraktoj neniam sukcesis eviti militojn, ĉiam troviĝas ruzaj registoj, kiuj, de tempo al tempo, faras proponojn por aliigi la ludon, kun la celo malebligi, ke la popoloj ekkomprenu, ke ili mem estas nur la peonoj de tiu fia ŝakludilo internacia. La lasta tia trompo estis la starigo de **Ligo de Nacioj**, kio havis nur kiel rezulton doni oficojn al miloj da parazitoj kaj kaŭzis la elspezon de miliardoj da ormoneroj.

La Ligo de Nacioj estis subtenata de ĉiaj internaciistoj. Ili kritike rekomendis nur kelkajn modifojn en la strukturo de tiu institucio. Etimologie kaj historie la internaciismo ja estas nur iu politika sistemo, celanta trovi juran kompromison inter la naciismo kaj la postuloj de la ekonomio, kiun senhalte evoluigas la progresoj de l' tekniko (rezulto de la homa elpenskapablo kiu mem devenas de l' homa volo). La sennaciistoj sekve opinias, ke la internaciismo estas nur paliativo, kiu tute ne garantias daŭran pacon.

Sed kio povas esperigi, ke la sennaciismo iam efektiviĝos?, sendube pensos legantoj. Esperigaj konsideroj estas jenaj: la nacioj signas nur stadion en la historia procezo; ili eĉ jam nun konsistigas ian anakronismon, rilate al la malvolviĝo de l' tekniko, kiu tendencas pli kaj pli tempe malgrandigi la distancojn. Kaj tiu procezo ne haltas. Fakulo eldiris antaŭnelonge, ke post 20–30 jaroj la aeroplanoj rakete

funkcios, flugos tra la stratosfero kaj rapidos po 1.500 km. hore kaj eĉ pli. La aŭtoj veturos sur apartaj vojoj kaj ilia rapido hora estos almenaŭ 150-kma. Fervojoj estos utiligataj nur por transporti materialojn kaj la pasaĝertrafiko longdistanca okazos aviadile. La tutmonda trafiko pli kaj pli intensiĝos kaj tia stato grade sentigos la bezonon de komuna lingvo. Tiam esperanto havos pli kaj pli favoran grundon por sia enplantiĝo. Laŭgrade kiel la artefarita lingvo disvastiĝos, samgrade la propagando por sennaciismo fariĝos facila kaj efika...

Nuntempe la sennaciismo, kiel historia faktoro, ekzistas nur embrie. Ĝi trovis antaŭmilita, favoran grundon en la esperanta organizo Sennacieca Asocio Tutmonda. Tiu asocio, same kiel Universala Esperanto-Asocio, estas sennacieca laŭ sia strukturo, tamen ne sennaciista. Ambaŭ organizoj ignoras la naciojn, sed ne havas kiel taskon propagandi sennaciismon.

Tial ke la sennaciisma movado nunepoke neniel povas praktike influi sur la eventojn, ties anoj devas havi nur unu celon: ĉiel provi ne viktimiĝi per naciecaj frenezaĵoj. La sennaciistoj opinias, ke estas tute normale, ke patriotoj diverslandaj buĉu unu la aliajn, kaj ili sekve neniel celas malebligi tion. La nacioj ekzistas **por** la registoj kaj regaspirantoj kaj **per** la amaso da naivaj patriotoj. Se la sennaciistoj atentus nur sian racion, ili dirus: ju pli da naciistoj buĉas sin reciproke, des pli bone. Sed ilia koro kompatas al la trompitoj, kiuj mortas por la gloro de malmultaj nacioprofitantoj.

La ekzisto de nacioj estas la plej terura plago de la homaro. La tekniko tendencas unuigi la mondon, sed la homa

menso ĝenerale ne evoluas laŭ sama rapido. La sennaciisma propagando celas restarigi la ekvilibron en la historia procezo.

Ĉe prezento de tezo pri sennaciismo oni ĝenerale renkontas nur indiferenton, miron aŭ pasian nekomprenon. Kaj se iu naciisto tamen kapablas bridigi sian indignon kaj konsentas diskuti, li proteste emfazos, ke la amo al la patrio estas tiel natura sento, ke tute ne eblas ĝin ignori kaj sekve, ke la sennaciismo estas kontraŭnatura, estas monstraĵo neniel konsiderinda...

En la okazo, ke nia patrioto estas klera homo, li tiam citos la aŭtoritatan opinion de multaj famuloj, kiuj donis belformajn difinojn pri patriotismo. Da tiaj mi kolektis almenaŭ kvindek el diversaj lingvoj.

Se temas pri internaciisto, tiu certe ne preterlasos la okazon citi almenaŭ la opinion de la fama oratoro franca Ĵores (Jaurès) kaj tiun de Lenin. En sia verko **La Nova Armeo**, parafrazante diron de la angla filozofo Bekn (Bacon): "iom da scienco malfortigas la kredon je Dio; multe da scienco ĝin fortigas", Ĵores diris: "iom da internaciismo malfortigas la patriotismon, multe da internaciismo fortigas ĝin".

Kaj en la **Kompleta Verkaro de Lenin**, volumo 13-a, paĝo 342 de la franclingva eldono, oni povas legi jenon: "En milito reale nacia la vortoj 'defendo al la Patrio' ne estas trompo kaj ni tute ne kontraŭas ilin".

Ĉe la konstato, ke naciistoj kaj internaciistoj interkonsentas pri la esenco de la demando kaj nur disputas pri nuancoj kaj aplikado, oni tuj emas pensi, ke la naciismo

estas fantazia teorio, kiu malatentas objektivaĵojn. Kaj tamen mi ne timas aserti, ke fakte nur ni, sennaciistoj, prikonsideras la problemon pri mondpaco laŭ ĝia reala aspekto. Ni krome asertas kaj povas pruvi, ke la nacieca sento estas **artefarita, rezultas de edukado**: el ĉiu ajn infano oni povas fari ĉu meksikan patrioton aŭ usonan, nikaragvan, ĉilan, anglan, japanan ktp; same kiel el la sama infano oni povas fari ĉu kristanon aŭ islamanon, budaanon ktp.

La "natura" amo al la loko, kie oni naskiĝis, kie estas entombigitaj la prauloj estas limigita al tre malvasta regiono el tuta lando...

Ĉar mi estas ankoraŭ en Meksikio, apoge al mia aserto, mi mencias faktojn, kiuj rilatas al tiu lando. Antaŭ kelkaj monatoj aperis en la grava ĵurnalo "El Universal" serio da artikoloj de profesoro Angel M. Korzo kun jena titolo: "**La Problemo Indiĝena kaj la Nacieco**". En tiu longa studo mencie svarmas faktoj, kiuj senintence apogas mian tezon. Mi limigos min substreki du tre signifajn asertojn de la menciita profesoro: 1) **La meksika nacieco ne ankoraŭ ekzistas en la menso de milionoj da indiĝenoj analfabetaj**; 2) **en Meksikio oni povas kalkuli 80 naciecojn**.

Solve al tiu problemo la internaciistoj de la Moskva konfeso proponas la starigon de **Unuiĝo de Respublikoj Indiĝenaj de Meksikio** kun konsekvenco, ke la dialektoj (60) estu konservataj, ke la moroj estu respektataj; unuvorte, ke la 80 naciecoj estu eternigotaj...

Profesoro A.M.K. prave ridindigas tiun Lenin-Stalinan vidpunkton. Li argumentas, ke ne eblas klerigi la indiĝenojn



per ilia respektiva dialekto, ke, ekz-e, estas tute neeble traduki klasikajn verkojn en "otomi".

Estas interese rimarki, ke tiurilate la sennaciistoj konsentas kun la meksike naciista profesoro. Lia vidpunkto fakte estas imperialista, sed ĝi pli kongruas kun la historia evoluo ol tiu de l' bolŝevista internaciismo, kiu fakte estas konservativa, por ne diri reakcia.

Same la sennaciistoj opinias, ke mondregno ne povus ekzisti, glate funkcii, sen mondlingvo. Antaŭ 13 jaroj, en la [kvina ĉapitro de "La Laborista Esperantismo"](#), mi ja skribis jenon: "... propagandi sennacismon al malsamlingvanoj estus same malsaĝe, kiel instrui beletristikon al analfabetoj".

Tamen, estas fakto, ke kelkajn jarojn poste, nia propaganda broŝuro "**Manifesto de la Sennaciistoj**", estis tradukita kaj eldonita en franca lingvo, poste en angla, kaj nunjare argentinaj samideanoj aperigis ĝin hispanlingve. Tion mi mem ne konsilis, sed la tradukintoj sinpravige klarigis, ke per tiuj nacilingvaj eldonoj ili celas varbi al esperanto personojn, kiuj revas pri mondpaco kaj tamen ignoras la lingvan demandon.

Esperanto ja ekzistas, vivas. Per tiu artefarita, do sennacieca lingvo mi mem povis interrilatiĝi kuri homoj el ĉiuj mondpartoj; kaj jam de preskaŭ ses jaroj migras mi ĉirkaŭ nia relative malgranda planedo, rilatante nur kun esperantistoj. Laŭsperte mi do scias, ke oni povas interfratiĝi kun homoj el ĉiuj raso. Eĉ en Ĉinio kaj Japanio mi sentis min hejme, kiam mi estis inter samideanoj. El tio mi rajtas konkludi, ke la sennaciismo ne estas tiel fantazia teorio, kiel

asertas filistroj aŭ individuoj, kiuj havas personan intereson en la eterniĝo de nacioj. Mi aludas al regnestroj, ambasadoroj, konsuloj, generaloj, regaspirantoj kaj similuloj. Tiuj parazitoj ordinare ne viktimiĝas dum milito kaj ĉiam sekurigas al si agrablan, komfortan vivon per la mizero kaj morto de malaltranguoj.

Kiuj celas starigi pacon surtere kaj tamen volas konservi la nacian suverenecon, tiuj similas al kuracisto, kiu provus resanigi pacienton kaj ne atentus pri la kaŭzo de lia malsano. Militoj certe okazos, tiom longe, kiom ekzistos suverenaj nacioj; tiom longe, kiom la riĉaĵoj de nia planedo ne estos dispone "al ĉiuj popoloj".

Kiam oni konsideras la nunan malvolviĝon de la tekniko, tiam ne necesas esti fakulo, por tuj kompreni, ke ĉiuj homoj povus ĝui bonstaton, komforton, se la produktofortoj ne estus utiligataj por detruaj celoj.

Lastatempe ĵurnaloj raportis, ke Britio elspezas ĉiutage 11 milionojn da sterlingoj por militaj celoj. Kiom da markoj elspezas Germanio? Kiom da dolaroj Usono? Kiom da jenoj, Japanio?... Kiom da energio kaj materialoj estas tiel misuzataj sur la tuta tero? Mi ne povas respondi tiujn demandojn. Sed ĉiu penskapabla homo tamen tuj klare ekvidas, ke se la homaro ne estus naciece malsana, ĝi povus vivi bonstate kaj pace.

La naciismo aŭ patriotismo (mi ĉiam uzas tiujn du terminojn kun la sama senco) estas la plej potenca kaj efika "ideoforto" de nia epoko. Ĝi ne ekzistis en tia grado antaŭ unu jarcento kaj rezultas de edukado – la vorto "dresado" estus eĉ pli ĝusta. La patriotoj estas iaj fanatikuloj, kiuj

similas al la mezepokaj religiuloj el Eŭropo. Same kiel religia kredulo ĉiam estis preta mortigi anojn de alia religio, tiel same la patriotoj volonte mortigas patriotojn de aliaj patrioj, kvankam tiuj povas esti iliaj samreligianoj.

La naciismo estas tiom efika ideologio, ke per ĝi la malmultaj naciprofituloj en ĉiu nacio facile atingas, ke la popoloj faru la plej grandajn oferojn, kiam la nacia suvereneco estas minacata. En tempo kiam regas senlaboreco kaj mizero en iu lando, tiam la koncerna registaro kutime diras, ke la nacia buĝeto absolute ne povas solvi tiun problemon, ke la nacioj bankrotus ktp. Sed se la interesoj de la reganta klaso estas minacataj, tiam la buĝeto ŝveliĝas ĝis atingo de astronomiaj nombroj. La prezidanto de la plej sensignifa respubliko volas ja daŭre prezidi; la suvereno de la plej eta reĝlando volas ja daŭre reĝi; kaj la ambasadoroj de la plej mizera lando volas reprezenti ĝin en aliaj landoj kaj tie vivi kiel princoj...

Feliĉe la naciismo portas en si mem sindetruan ĝermon, nome la imperialismon. Kiam nacio akiras la senton, ke ĝi superas la najbarajn naciojn, tiam ĝi emas aneksi parton de ili aŭ eĉ entute. Tial, ĉiam estis "subpremataj" nacioj. Kaj la malgrandaj povas ekzisti, nur tial, ke ili kvazaŭ ludas la rolon de bufro inter la grandaj. Tia estis, ekzemple, la kazo de Belgio, Luksemburgo kaj Holando rilate al Britio, Francio kaj Germanio.

Ĉiu regnestro estas potencavida kaj sekve ĉiam deziras pligrandigi sian regnon. Ĉia prezidanto avidas prezidi super kiel eble plej granda nombro da regatoj aŭ da partianoj. Inter patrio kaj partio ekzistas multaj similaĵoj; esence ili estas

samaj aparatoj, tial ne malofte okazas, ke en la sama lando malsampartianoj buĉas sin reciproke, kiel faras malsamnaciaj patriotoj.

Ni tre klare konscias pri tio. Tial en nia organo "Herezulo", inter ĝiaj gvidpunktoj la sesa diras, ke la sennaciistoj "luktas kontraŭ ĉian gvidistecon – kio ne signifas malakcepton al ĉia gvidado".

La homaro ne ĝuos pacon, tiom longe, kiom la regavido ne estos bridata ĉe la homoj. En sennacieca mondregno la organizproblemo ne plu estus politika sed "teknika". La teknikuloj estus elektataj per konkuro, kontrolataj de samfakuloj. Kaj la problemoj tiam solvenda estus kiel eble racie utiligi la riĉaĵojn de nia planedo, profite al ĉiuj homoj senescepte...

Se mi emus sofiste argumenti, kiel ordinare faras politikuloj, kies ĉefa celo estas akiri la regadon en sia propra nacio, mi dirus, ke la sennaciismo estas la plej bona speco de patriotismo, tial ke la bonstato de l' grandega plimulto da patriotoj el la tuta mondo povas ekzisti nur se malaperis la nacia suvereneco.

Dume la sennaciistoj havas la senton vivi en granda frenezulejo; sed de tio ne sekvas, ke ili ankaŭ devas bleki patriote kiel la naciecaj frenezuloj...

Meksiko, 5-10-41.

E. Lanti.

El la "NOTLIBRETO DE ALFESTO"  
("Sennaciulo", 25.junio 1939 – 25.aŭgusto 1939)

Mi ne scias, ĉu estas pli konvene rideti aŭ ploremi, kiam mi aŭdas aŭ legas jenan frazon aŭ similan:

"Esperanto havas kiel celon okazigi amikecon inter la nacioj..."

La modernaj nacioj estas sangavidaj diaĵoj. Ĉiu nacio devas riverenci antaŭ sia aparta idolo, kaj plie, ĉiam esti preta oferi sian vivon por pluigi sian ekziston. Ĉu tiaj blindaj, surdaj kaj senkoraj kreaĵoj de l' homa superstiĉo kapablas interamikiĝi? Mi asertas, ke ne. Ni do simple laboru por amikiĝo inter la homoj de l' tuta tero. Tiucele necesas detrui la naciojn kaj starigi mondregon kun esperanto kiel oficiala lingvo.

\*

Antaŭ multaj jaroj Karlo Marks elkriis: "La proletoj ne havas patrion." Kia sensencaĵo! Ili ja havas patrion kaj por ĝi eĉ konsentas morti kaj mortigi. La ĝusta devizo estas:

**Proletoj el ĉiuj mondpartoj ne havu plu patrion kaj sennaciece unuiĝu.**

\*

Kiu ne pensas esperantigi sian propran nomon aŭ ne kuraĝas tion fari, tiu ne estas vera esperantisto.

\*

Sed kiam esperantano naciece elparolas la nomon de esperantisto, tiam ĉi tiu lasta sentas sin preskaŭ ofendita. Mi parolas laŭsperte...

\*

La respekto al la nacia ortografio de nomo fontas el la prapatra epoko, kiam en kelkaj triboj la nomo de estro estis tabuo.

\*

Ĝismedola sennaciulo vivas en la lando, kies civitano li estas, kvazaŭ enmigrinto.

\*

Kiam mi aŭdas el la buŝo de esp-istoj: "Vi estu bonvena en **nia** lando", tiam mi emas proteste eldiri: "Mi ne konsentas, ke ĉi tiu bela terparto estu via; ĝi devas esti nur ia provinco de Esperantio, kies samrajtaj civitanoj ni ĉiuj estu..."

\*

Faŭsto ne pravis, hezitante por decidi, ĉu la Parolo aŭ la Ago estis ĉe la komenco de ĉio. Tiam la voĉo kaj la nanoj konsistigis iun tutajon. Almenaŭ tion mi kredas, kiam mi observas "hispanojn", kiuj interparolas. Kaj ne nur per la manoj kaj la buŝo ili sin esprimas, sed ankaŭ per la okuloj, per la brovoj, per la ŝultroj – per la tuta korpo, mi kredas.

Mi ne diris: la "hispanoj", tial ke ne ĉiuj estas tiel... elokventaj. Havante la okazon observi iun esp-iston kaj rimarkinte, ke li estas flegma, kiel "anglo", foje mi demandis lin:

– Vi ne estas "hispano", ĉu?

– Jes, mi estas kaj eĉ tute "purrasa", li aldonis ridetante. Sed vi ne estas la unua, kiu faris pri mi tian rimarkon. Kiam mi estis en Hispanio, tie oni eĉ nomis min la "marmora homo".

La leganto bv. rimarki, ke mi signis la vortojn **hispano** kaj **anglo** per krampetoj: ne ĉiuj "angloj" ja estas tute flegmaj kaj ne nur "hispanoj" bezonas la manojn por esprimi sin, sed ankaŭ "italoj" kaj "francoj", ĉefe tiuj el la suda parto de tiu landeto.

Oni devas nepre prijuĝi homojn kiel individuojn kaj ne laŭ ilia naskiĝloko.

Estas eraro prijuĝi homojn laŭ ilia religio: ne ĉiu katoliko estas jezuito; ne ĉiu protestanto estas bigoto, ne ĉiu bigoto estas hipokritulo – kaj ne ĉiu ateisto estas tolerema kaj memstare pensanta homo.

– Mi estis ateisto dum longaj jaroj, sed nun ne plu...

– Do vi lasis vin forlogi de teologoj...

– Ne!...

– Nu?

– Vane mi ja serĉis en la deismaj tezoj argumentojn, kiuj povus konvinki min pri la ekzisto de ĉiopova Estulo, de pura Spirito, senlima bona kaj perfekta, kiu estus kreinta nian fuŝan mondon. Sed mi scias, ke deistoj ankaŭ ne trovas akceptinda la ateisman tezon. Kaj inter ili troviĝas homoj pli kleraj, kredeble eĉ pli inteligentaj ol mi. Sekve...

Mi ne kredas je la ekzisto de Dio, sed mi ne volas aserti, ke, fakte Ĝi ne ekzistas. Mi ne scias... Tial mi ne estas ateisto.

Ne okazu miskompreno: se mi ne plu emas perdi tempon, por argumente pravigi mian nekredon je la ekzisto de Dio, tio neniel signifas, ke mi ne plu emas kontraŭbatali la dogmojn, kiuj fundamentas la religian kredon. Dogmaj religioj, eklezioj, sektoj estas **faktoj**. Kaj la Historio instruas, ke tiaj institucioj fariĝas maltoleremaj kaj persekutemaj tuj, kiam ili sentas sin sufiĉe fortaj, por tion fari senriske.

Sed soci-politikaj doktrinoj, elpensitaj de ateistoj, povas ankaŭ fariĝi dogmoj en la manoj de kredemuloj aŭ profitemuloj, kiuj siavice persekutas, malliberigas, ekzekutas laŭ maniero, kiu memorigas pri la mezepokaj inkvizitoroj.

Sufiĉas observi faktojn el nia epoko por konvinkiĝi pri tio. Ho ve!...

\*        \*  
\*  
\*  
\*

Sennaciisto ne lasas sin trompi per vortoj; li atentigas nur faktojn. Kaj la historiaj faktoj instruas, ke la homaj socioj



evoluis el klanoj al tribo, el triboj al civito, el civitoj al provinco, el provincoj al nacio. Sekve, oni povas racie antaŭvidi, ke la nacioj ankaŭ malaperos por konsistigi pli grandan unuon.

Ĉio, kio kontraŭas al tiu historia procezo, tio estas esence reakcia. Kaj reakciuloj estas ĉiaj ajn patriotoj. Sed mi volonte konsentas, ke ili havas la rajton oferi sian propran vivon antaŭ la altaro de sia idolo...

\*

– Vi fariĝas ŝovinista ano de Esperantio, ŝerce diris al mi iu samideano.

– Nu, eble, sed tia ŝovinismo povus esti danĝera nur por la loĝantoj de Marso...

\* \* \*

*Humuro estas speco de ŝerco, precipe ĉe  
anglaj aŭtoroj, laŭ kiu verkisto elmetas kun  
seriozo kaj scienca ŝajno satirajn  
burleskaĵojn. P.V.*

## NI PREPARU NIN AL NEEVITEBLO

Ĉiuj klarvidaj homoj jam delonge konvinkiĝis, ke milito estas neevitebla. Ĝi ja povas nur prokrastiĝi. Ĉiuj nacioj diligente preparas sin por tiu okazontaĵo. Se prokrastiĝo okazas, estas ĉefe pro tio, ke neniu aro da interligitaj potencoj kredas havi nuntempe grandan ŝancon venki. Nur kelkaj revuloj, utopiuloj, ĝeme kaj bombaste parolas pri eterna paco.

Kiam oni konvinkiĝis pri la neeviteblo de milito, ĉu konvenus kontraŭstari al la homoj, kiuj preparas ĝin, al la generaloj, kiuj gvidos ties partoprenontojn? Ĉu ne estas iel kruele diri al ĉi tiuj lastaj, ke la milito estas barbaraĵo, krimo ks? Ŝajnas al mi preferinde kaj pli humane konvinki la estontajn viktimojn, ke ilia morto estos utila, glora, heroeca ktp. Tio efikos sur ilin kvazaŭ dormigilo sur operacioton. Tiam mi plene aprobas la **novan** sintenon de l' bolŝevistaj gvidistoj kaj la kuraĝon de l' junkomunistoj, kiuj laŭte kaj

entuziasme deklaras, ke ili fieras esti soldatoj. Estas tute laŭdinde, ke ili ne plu kantas la strofon de la **Internacio**, kie estas rekomendita pafi al siaj propraj generaloj.

Kiuj argumentas, ke la milito estas stultaĵo, tial ke ĝi pereigas ĉefe la junajn kaj fortikajn virojn kaj tiel kontraŭas al la Darŭina leĝo pri natura selektado inter la individuoj, al tiuj oni rebatu, ke ili estas papagoj, kiuj ne kapablas memstare pensi. Iam tiu riproĉo al la milito estis ĝusta, sed en la nuna stato de la primilita tekniko ĝi estas maltrafa. En la nun prepariĝanta milito ĉefe pereos la maljunuloj, la virinoj kaj infanoj. La viglaj kaj sanaj mobilizotoj apartenas al kategorio de homoj, kiuj estos la plej bone ŝirmataj. Tial la Darŭina leĝo plene efikos, kaj sekve ne plu ekzistas motivo por kontraŭi la militon.

Kaj rilate al la gvidistoj, al la generaloj k.s. eminentuloj, ni ne bezonas timi. Nedubeble ili estos bone tute speciale ŝirmataj. Cetere, dum la lastdata Granda Milito estis bone spertita fakto, ke aviadistoj ne faligis bombojn al la lokoj, kie troviĝis la reciprokaj staboj de ambaŭ malamikaj armeoj. Kaj nuntempe, nek Franko, en Hispanio, nek Ĉang-kaj-Ŝek, en Ĉinio, ricevis ĝis nun la plej etan vundon. Ni estu do tute trankvilaj pri la sorto de l' registoj dum la venonta milito.

Rilate al la demagogaj diroj, ke oni devus pafi al Musolini, al Stalin, al Hitler k.a. regnestroj, ili ne estas pli atentindaj ol la paroloj de Loid Ĝorĝ kaj Klemenso, kiuj dum la lastdata Granda Milito deklaris, ke post la venko de la demokrataj landoj la germana imperiestro estos juĝata kaj mortkondamnata. Ĉiu ja bone scias, ke li nun tre komforte vivas en Holando kaj kredeble fariĝos centjarulo.

Tial ke ekzistas nacioj, kies sendependeco devas nepre esti defendata, milito estas neevitebla. Sekve estas la devo de ĉiuj bonkoraj kaj grandanimaj homoj fari ĉion eblan, por ke ties estontaj viktimoj havu la firman kredon, ke ilia morto estos utila, ke ilia heroeco estas sankta kaj ke ili estos honorataj per belaj monumentoj sur publikaj placoj.

Kiuj kontraŭas al tiu saĝa kaj tute ortodoksa vidpunkto, ekzemple, la sennaciistoj, tiuj meritas esti mortigitaj per malhonoriga kuglo, pafota en malhela kelo.

Almenaŭ tia estas la ŝtate firma kaj tre sincera opinio de

A. Tirlarigo.

Ie, la 15.7.1938.

(El "**Sennaciulo**", 25.oktobro 1938)

## KAPROMPE...

Mi neniel dubas, ke hardisfendema metafizikisto povas multvorte – ne dokumente – klarigi, kial la posteularo de Adam konsistas el diversaj rasoj. Alivorte, ni supozu, ke la homo kreita de Dio estis negro, kial do poste en lia idaro troviĝas blank-, brun- kaj flavhaŭtuloj? – kaj ĝibuloj, blinduloj, surdmutuloj ktp, ks.

Sed mi mem honteme konfesas, ke dum jarcento mi vane cerbumus por trovi kontentigan pravigon pri akordo de la Biblia rakonto kun la konstateblaj faktoj.

Nu, mi emas kredi, ke fiziologoj ankaŭ ne povas facile klarigi la tialon de la bone konstatita fakto pri ekzisto de kvar specoj de homa sango. Kaj tiuj specoj diversas ne laŭ rasoj, sed laŭ individuoj. T.e., ke la sango de negro povas esti samspeca, kiel tiu de purrasa blankhaŭtulo, dum la sango de du blankhaŭtaj kuzoj, ekz-e, povas esti malsamspeca. Tiel ke, se okazis, ke unu el la kuzoj suferus, pro akcidento, gravan hemoragion, kio necesigus transfluigon de sango, povus esti, ke la sango de negro taŭgus kaj ne tiu de la kuzo.

La samon oni povas diri pri du negroj.

Sed malgraŭ tiu science pruvita fakto, ke raso kaj sango havas nenion komunan, tamen en Usono oni tenas en apartaj ujoj la plasmon de negroj kaj tiun de blankhaŭtuloj. Kredeble tial ke la menso de l' popolo estas saturita per bibliaj diroj, el

kiuj mi citu jenan: "La sangon de ia korpo ne manĝu, ĉar la animo de ĉiu korpo estas ĝia sango." (Biblio, pĝ.105 de la esp-a eldono).

Tial ke, laŭ la dia aserto, raportita de Moseo, sango estas animo, evidente neniu blankhaŭta usonano povas konsenti, ke en lia korpo vivu duonarja, duonnegra animo...

\*

Ne malpli kaprompan problemon konsistigas la demando, kiu estis pridiskutata en la Lorda Ĉambro el Londono, antaŭ kelkaj monatoj. Temas pri arta gravedigo. Se tia procedo aplikiĝus nur ĉe bestoj, tiam, laŭ la opinio de la anglaj lordoj, ĝi estus akceptebla kaj eĉ tre rekomendinda. En Britio oni ja konsumas abunde bovan karnon kaj tie la bredistoj devas bone nutradi taŭrojn, por ke ili kapablu gravedigi kiom eble plej da bovinoj.

Nu, la rusa profesoro Ivanov eksperimente pruvis, ke oni povas gravedigi bovinojn eĉ per spermo de taŭro mortinta antaŭ du semajnoj. Sekve, la aplikado de tiu procedo estus konsiderinde ŝpara por la bredistoj.

Sed la afero komplikiĝas, tial ke dum la diskutado lordo Brabanzon menciis, ke en Usono 10.000 virinoj igis sin gravedaj per arta injekto. Tiuj virinoj ne povis gravediĝi, ĉu pro manko de generpovo ĉe ilia edzo, al kiu ili volis resti fidelaj, ĉu pro sia propra manko de gravediĝpovo. En la unua kazo oni injektis al ili spermon de alia viro, kaj en la dua kazo ovulon de alia virino.

La episkopo de "Chichester" intervenis per jenaj

embarasaj diroj: "Se patrino ne havis edzon kaj arte gravediĝis, tiam la rilatoj kun ŝia ido povas havi eksterordinaran karakteron kaj abundon, ne nur da danĝeroj, sed eĉ da malfeliĉegaĵoj en la daŭro de longa tempo; kaj la rilatoj inter sterila edzo kaj edzino arte gravedigita povas esti tre maltrankvilaj kaj malfeliĉaj."

Tio pensigas min pri alia tipo de virinoj, nome tiuj, kiuj ne volas gravediĝi kaj celas nur en la seksinterrilatoj spertadi voluptajn spasmojn. Vane mi rompas al mi la kapon, por decidi, ĉu la pli saĝaj estas la arte gravediĝintaj virinoj aŭ la artifice sterilaj?

– Se la gravedevitulinaj estus ĝenerale kaj tutmonde imitataj, tio kaŭzus la ekstermiĝon de la homa gento...

– Nu, ĉu tio estus vere bedaŭrinda? Legante ĵurnalojn, kiuj raportas pri la interbuĉado de diversnaciaj patriotoj, mi konfesas, ke ĉiufoje mi spertas senton de honto, de hontego, pro aparteno al la homa gento, kaj neniel mi bedaŭrus ĝian malaperon. La artifika kaj artisma gravedevitigo voluptodona iel signifas atingi ian nirvanon tre agrablan...

Almenaŭ mia kaprompa cerbumado igis min finfine kompreni la rakonton el la Sanktaj Skriboj pri la sengeiĝa ĝravediĝo de l' patrino de Jezuo Kristo: ne temas pri miraklo, ĉar estas pruvite, ke, per gravediĝo arta, virino povas naski kaj tamen resti virga.

Kompatinda!...

E. Lanti (2.12.1943)

(El "**Sennaciulo**", nov.1949)



*K-do 25.623:*

## **MEMORE AL PIONIRO**

*(aŭ Adamaĵo)*

*Jena okazaĵo havas lokon en 1946. Tiam mi estis juna esperantisto, ankoraŭ ano de la neŭtrala movado. Sed laŭ anonco de hazarde ricevita ekzemplero de "SAT-Amikaro" mi aĉetis la libron "Leteroj de E. Lanti". Ĝian enhavon mi multe ĝuis, kaj mi povas aserti, ke ĝi grave kontribuis al mia pli posta SAT-aniĝo. Mi ankaŭ rimarkis la du portretojn de la aŭtoro, kun kaj sen barbo. Tia sensignifa afero tamen kaŭzis, ke mi skribe konatiĝis kun la fondinto de SAT.*

*Petinte meksikan korespondanton, mi ricevis kelkajn specimenojn de la nun malaperinta gazeto "Renovigo". Lanti, tiam loĝanta en Meksikurbo, riĉigis ĝin per siaj kontribuoj. Sur la naŭa paĝo de la julia n-ro troviĝis tia barbata portreto kun surskribo:*

*"Sinjoro Adam, la mortinto kiu tamen vivas; al ĉiu kiu solvos tiun ĉi enigmon kaj skribos nin, dirante la kompletan nomon de la stranga barbulo, ni sendos senkoste ekzempleron de la libro "Meksiko kaj Kardenas" de Jesuo Amaja."*

*Ĉar mi bone konis la nomon de la barbulo, dank' al la "Leteroj", mi do sendis al Jesuo la ĝustan respondon. Kaj mi*

*atendis. – Tri monatojn poste alvenis la letero, kies tekston mi konigas ĉi-sube:*

23.12.46

"Estimata Sinjoro!

"La eldonanto de Reno nun libertempas kaj li komisiis al mi la taskon prizorgi lian korespondadon esp-an. Vi do eksciis, ke alvenis la du libroj, kiujn vi sendis, kaj sekve vi de nun ricevos la revuon. Post kelkaj tagoj mi ankaŭ sendos al vi ekzempleron de "Meksiko kaj Kardenas", tial ke vi ĝuste divenis la identon de s-ro Lanti.

Ĉi-okaze mi ne povas deteni min diri, ke mi tute malsamideas kun tiu sennaciulo kaj mi vere ne komprenas kial s-ano Amaja konsentas publikigi liajn artikolaĉojn.

Klarigcele mi diru, ke mi estas vasko kaj jam delonge agitas, por ke mia patrio, kiu estas subprema de Francio kaj Hispanio, akiru sian sendependecon, sian suverenecon. Vi certe komprenos facile, ke se tiel okazus, mi eble povus akiri la postenon de ambasadoro vaska en Meksikio, kaj tiam pliboniĝus mia situacio. Mi eĉ kontentiĝus per ofico de ataŝeo aŭ de konsulo.

En ĉi-tieaj ĵurnaloj mi legis, ke ne ĉio estas bonstata en Francio, sed vi povas esti almenaŭ kontenta je la ekscio, ke ĉi tie la franca ambasadoro vivas lukse kaj de tempo al tempo regas siajn kolegojn alinaciajn per bankedoj...

Sufiĉe mi diris, por ke vi povu kompreni, ke mi abomenas la sennaciismon kaj deziras, ke estu en la mondo kiom eble plej da nacioj...

"Naciece salutas vin

**E.A. Lanieps."**

*Ĉar la ideoj eldiritaj en tiu tetero ŝajnis fonti el la cerbo de fantaziulo, mi ne respondis. Ĉio aspektis stranga, eĉ la nevaskeco de la nomo, kaj tiu naciisto vere scipovis majstre la sennaciecan lingvon.*

*Pasis kelkaj semajnoj, kaj jen la februara "**Renovigo**" (1947) informas pri la memmortigo de k-do Lanti. Interesajn artikolojn ĝi enhavis pri lia personeco. Ĝi aludis interalie tian ŝercemon. Lia lasta ŝerco konsistis el sendado de leteroj plendantaj pro la subpremo al la malgrandaj patrioj. Jen li nomis sin normando kun subskribo E.A. Laniepe (nomo de lia patrino), jen li fariĝis vasko. Kaj li certe multe ĝuadis la respondojn, kiel tiujn de juna franca pastro, kun kiu li korespondadis sub la nomo de fraŭlino Laniepe. Laŭdire la juna pastro tre ŝatis la leterojn de tiu "aminda fraŭlino Laniepe"!*

*Interese estus ekscii pri la rezultatoj de tiuj "testoj". Bedaŭrinde Lanti ne vivis sufiĉe longe, por informi nin pri tio. Li certe estus eltirinta instruon. Ĝi estus potenca satiro kontraŭ la hodiaŭ furiozanta nacisistemo.*

25.623.

(El "**Sennaciulo**", marto 1955).

## ĈIU PLENUMU SIAN DEVON...

(Tiu ĉi artikolo, kiun Lanti subskribis per "E.L. ITANŜA" aperis en "**Sennaciulo**" de 25. Nov. 1937)

Nenio ŝajnas al mi pli ridinda ol pacistoj, kiuj sin ĝeme turnas al la tuta mondo, dirante: "Ne batalu!... Ne mortigu!... Vivu pace!... Estu fratoj!..." Tiuj pacistoj unue ne havas sufiĉe fortan voĉon por aŭdigi ĝin trans la landlimojn; sed eĉ se ili havus, tio neniel signifus, ke la mondo aŭskultas, atentas, **komprenas...**

La bombastaj porpacaj alvokoj ja estas ne nur ridindaj kaj senefikaj, sed eĉ maltrafaj. Kial paroli pri frateco al homoj, kiuj fakte ne estas, nek povas esti fratoj? "Esti fratoj", tio signifas aparteni al la sama familio, havi saman patron – almenaŭ spiritan – saman moron, **saman lingvon.**

Ĉu tiel estas inter la homoj de malsamaj nacioj? Certe ne! Ne nur la nacioj diversspecaj havas malsamajn morojn kaj kutimojn, sed ankaŭ malsamajn lingvojn; ili do tute ne povas interkompreniĝi kaj sekve estas tre ridinde konsideri tiajn homojn kiel fratojn el sama familio.

Tian bedaŭrindan staton ni nun ne povas aliigi. Malgraŭ tio, ke esperanto ekzistas jam de 50 jaroj, tamen estas plorinda fakto, ke la esperantistoj – mi ne diras la esperantanoj – estas ankoraŭ tre malmultenombraj. Kaj kiom

da ili komprenas la profundan signifon de l' samlingveco, de tiu fakto, ke per uzado, aplikado de esperanto kun homoj el ĉiuj mondpartoj estas eble akiri menson de mondcivitano? Kiom da ili penadis senigi sin je ĉia naciemo kaj tiel fariĝi taŭgaj por interfratiĝo malgraŭ ĉiuj landlimoj? Jes ja, nur samlingvanoj povas eksenti kaj fine kompreni, **konscii**, ke ili konsistigas la embrion de la "granda rondo familia", pri kiu parolis Zamenhof.

Inter esperantistoj estas logike paroli pri tutmonda interfratiĝo, pri paco kaj amo. Sed maltrafe, ridindege estas prediki fratecon al homoj, kiuj efektive ne povas esti fratoj, ĉar ili devas stari mutaj unuj apud la aliaj, pro neeblo interkompreniĝi.

Konsekvence, al la nacioj, kiuj povas esti fratoj nur inter difinitaj limoj, pli malpli longaj; al la homoj, kiuj volas konservi, defendi la naciecojn, ni ne rekomendu interfratiĝon, sed simple diru: "**Vi plenumu vian devon.** La sendependeco de via lando estas minacata kaj vi deziras, ke ĝi restu plene suverena; nu, bone, vi devas ja esti preta por oferi vian vivon tiucele. Vi devas akcepti loĝi en kazerno, vivaĉi en tranĉeoj, obeadi blinde al iaj ajn ordonoj diktatorecaj de l' milita stabo; vi devas unuvorte rezigni vian homecon por teni kaj konservi vian naciecon."

Verdire, kiam naciistoj diversspecaj, diversnuancaj kaj diverslandaj buĉas unuj la aliajn por la gloro de sia respektiva patrio, tiam nia koro bedaŭras kaj kompatas, sed nia cerbo ne povas ne kompreni, ke tia buĉado estas tute normala... Mi eĉ konfesas, ke iafoje venis al mi la amara penso ke ju pli multe da patriotoj estas elmondigitaj per sia reciproka malsaĝo, des

pli bone! Ili plenumis sian devon. Kaj estas konstatebla fakto, ke naciistojn oni ne povas konvinki per raciaj argumentoj. Sekve...

Kio estas vere terura kaj priplorinda, tio estas, ke homoj, kiuj ellernis kaj praktikadis esperanton, kiuj penadis senigi sin je ĉia naciemo, t.e. la **sennaciistoj**, tiuj riskas esti perforte eldevigataj partopreni patriotan buĉadon. Racipensante, oni nepre alvenas al la konkludo, ke nur tiuj homoj estas kompatindaj, tial ke dum milito ili ne plenumas sian devon, sed male agas kontraŭvole, kaj eĉ riproĉate de sia konscienco. La devo de sennaciisto estas tute mala je tiu de patrioto, de internaciisto, de ĉiu ajn, kiu predikas, ke la nacioj gardu sian sendependecon. Internaciisto **devas** buĉi aŭ esti buĉata; sed sennaciisto **devas** nepre per ĉiuj fortoj penadi por eviti partoprenon en bataloj, kiuj por li estas tute sensencaj.

Kiam la Lenina kaj Uilsona (Wilson, prezidinto de Usono) principo pri sendependeco de l' nacioj estas ie ajn minacata, tiam ĉiu internaciisto devas volontuliĝi por defendi kaj savi la sanktan principon. Kaj male estas la devo de ĉiu homo, kiu akiris la firman konvinkon, ke tia principo estas esence reakcia, resti nepre ekster la internaciaj bataloj. Nur la klasbatalon partoprenu sennaciisto; nur por defendi sian homecon li konsentu morti aŭ mortigi... Kaj tiurilate tre menciinda estas la fakto, ke homoj devis dum jarcentoj elbataladi la rajton ne aparteni al iu ajn eklezio. Similan batalon devos fari la sennaciistoj por akiri la rajton ne esti naciano. Ili devas organiziĝi tiucele kaj nenial imiti la internaciistojn, kies bonintenca agado estas tamen niaopinie

**esence** reakcia...

Ĉiu ja plenumu sian devon kaj tion farante neniu rajtos riproĉi al la alia. Kiu kuraĝe agas laŭ sia konvinko kaj konscienco, tiu indas estimon.

Kaj aliparte SAT havas ankaŭ sian specialan devon: esti same akceptema al la tezo de l' sennaciistoj, kiel al tiu de la internaciistoj. Nia organizo estas laŭstatute ekstertendeca kaj sekve ne havas, nek povas racie havi partiecan programon. Ni ĉiuj plenumu nian devon...

E.L. ITANŜA

## MI ĜOJAS ESTI ESPERANTISTO

Dek-sep jaroj forpasis, de kiam finiĝis la granda hombuĉado. Post tiu krima katastrofo, rezultanta de homa volo, de malvarma decido de tre malmultaj regnestroj kaj diplomatoj – kaj eĉ de krudaj, eksplodemaj fortoj nebrideblaj – oni povis esperi, ke la homaro lernus el tiu terura, sangoplena leciono, profitus la sperton kaj akirus la necesan saĝon por finfine organizi pacan mondon.

Vana la espero!...

Malgraŭ la ekzisto de la Ligo de Nacioj; malgraŭ la okazigo de senarmigaj konferencoj; malgraŭ bombastaj deklaroj porpacaj de ĉiuj diktatoroj kaj ĉefministroj; malgraŭ tio, ke abundas la vivnecesaĵoj kaj la maŝinoj por ilin plimultiigi; malgraŭ tio, estas pli kaj pli evidente, ke nova katastrofego milita prepariĝas tute malkaŝe antaŭ niaj okuloj. La tiacelaj signoj, kiujn oni povis rimarki ĝis la monato Julio 1914, estas denove videblaj por ĉiu atenta kaj observokapabla homo. Ĉiuj grandaj regnoj el la mondo, ĉiuj senescepte, pligrandigas siajn armeojn, pliperfektigas armilojn kaj akumulas montojn da municio.

Tre signife: militfakuloj diskutas senĝene kaj cinike en revuoj kaj eĉ en ĉiutagaj, milionekezemplere eldonataj ĵurnaloj, pri tio, ke verŝajne grandaj urboj kiel Berlino, Londono, Parizo estos detruataj la tagon de la militdeklaro,



aŭ eĉ eble la antaŭtagon.

En laboratorioj cerbumas scienculoj kaj diligente eksperimentas por trovi la plej mortigajn, detruajn, neniigajn gasojn, venenojn, bacilojn, eksplodilojn. Tio ne estas inkubsonĝo, sed realo perceptebla de niaj sentorganoj. Kaj tion faras homoj, kiujn vi povas renkonti sur la strato, en kafejo, en teatro aŭ alie. Ili ne aspektas monstre, sed ĝentilhome kaj honestule. Helpemaj al vi ili estos okaze kaj en la hejmo ili kondutas bonkore kun la edzino kaj infanoj. Tamen tiuj homoj dediĉas sian tutan energion, sian tutan eltrovkapablon por inventi la plej aĉajn kaj terurajn mortigilojn. Plie, ili estas pretaj uzi mem siajn inventaĵojn, mortigi aŭ morti, kiam ordonos la Patrio...

– "Nur kapitalistoj kaj burĝoj respondecas pri militoj, kiujn ili mem ne partoprenas", frustras en mian orelon iu kredema K-do.

Nemalofte mi aŭdis tion el la buŝo de flamaj oratoroj en agitaj kunvenegoj; nemafofte mi legis pri tio en laboristaj gazetoj. Tamen la vero estas iom alia. En ĉiuj landoj oni ja povas trovi ekzemplojn pri burĝoj kaj aristokratoj, kiuj volontuliĝis en armeon kaj "glore mortis sur batalkampo". Ankaŭ ne estas vere, ke ĉiuj burĝoj kaj altranguloj artifice fortenis siajn filojn aŭ parencojn de la fronto. Tre tipa ekzemplo pri tio estas, ke la kvar filoj de Dumer, unu el la prezidintoj de l' franca respubliko "falas heroe por la Patrio" dum la lastdata milito.

Eĉ patrinaj konsentis kun fiero pri la morto de siaj idoj. Al unu el ili oni sciigis, ke ŝia kvara kaj lasta filo estis mortigata ĉe Verdun. Kun sekaj okuloj ŝi akceptis la informon kaj diris:

"Mia plej granda bedaŭro estas, ke kvinan mi ne havas por oferi al la Patrio". Kaj oni ne kredu, ke tiu patrino estis senkora monstro. Male, ŝi bone prizorgis kaj dorlotis siajn filojn, kiam ili estis hejme. Ŝi dolore funebris pro ilia morto dum longa tempo kaj ankoraŭ nun vizitas kaj florornamas iliajn tombojn. Sed la Patrio postulis...

– Kiu patrio?

– Ha! estas ja multaj, sed ĉiuj estas same sangavidaj kaj ĵaluzas unuj la aliajn. Tiuj idoloj estas satigeblaj nur per homa karno kaj ties adorantoj ne povas rifuzi tian nutraĵon...

Estas tro supraĵa pensmaniero aserti, ke nur la kapitalismo kaŭzas militojn. Homoj buĉis sin reciproke antaŭ ol ekzistis kapitalisma sociordo. Kaj sekve, oni povas sen troa nigrevidemo pensi, ke militoj ankoraŭ povos okazi, post kiam regos alia socisistemo, se malgraŭ tio nacieca ideologio daŭre infektas la menson de l' homoj. Sendube en la okazigo de militoj ludas grandan rolon la ekonomia faktoro. Tamen, miaopinie, ĝi tute ne sufiĉas por klarigi, kial homoj konsentas kadavriĝi aŭ murdadi en la nomo de nacio. Tiurilate ideologiaj, psikologiaj faktoroj povas en iaj cirkonstancoj ludi tre gravan rolon kaj esti decidigaj. La amo por eterna gloro, la konscio pri socia devo, la timo antaŭ fremda regado kaj altrudo de fremdaj moro kaj lingvo, ia sange mistika sento el pratempa deveno inklinigas la homojn partopreni tiujn sangoplenajn epopeojn, kiujn prikantis ĉiuj popoloj.

La homoj ĝenerale ne estas unue kaj ĉefe homoj, sed anoj de klanoj, de tribo, de nacio. Tion ili pli malpli forte kaj akute sentas. Kaj en tia stato kuŝas la granda, latentia, eksplodema forto, kiun grandkapitalistoj, registoj kaj

demagogoj scipovas utiligi por peli la popolojn sur batalekampojn kaj en amasbuĉadojn.

Necesas esti blinda aŭ fermi vole la okulojn, por ne vidi, ke la naciismo estas la plej potenca ideo-forto el nia epoko. Per ĝi povis akiri la regadon Musolini, Mustafa-Kemal, Pilsudski, Hitler kaj aliaj naciaj herooj. En la nomo de l' rajto por la popoloj disponi pri si mem, mortis kaj mortigis milionoj da soldatoj dum la lastdata mondmilito. Tiu principo estas ja unu el la 14 punktoj de la usona prezidinto Uilson; per ĝi li sukcesis entiri sian popolon en la milito. Laŭ ĝi li revis ordigi kaj pacigi la mondon.

Sed la sperto montras ĉiutage, ke tiu bela principo ne estas praktike aplikebla. Cetere estas granda trompo samigi la interesojn de burĝoj kaj proletoj en iu ajn nacio aŭ ŝtato. Estas plie danĝera iluzio kredi, ke solvoj al la mondkrizo povas esti aplikeblaj en naciaj kadroj, konservante la sendependecon kaj suverenecon de l' nacioj.

– Sed kion vi do proponas?...

Mi ne havas en la poŝo mirindan recepton, kiu povus tuj kuraci la mondon. Nenian panaceon mi reklamas. Fakulo en ekonomio mi ankaŭ ne estas. Cetere tiu scienco estas ankoraŭ tre nova kaj mankohava, por ke ĝiaj principoj povu esti agnoskataj kiel nepre obeendaj leĝoj. La fincelon de l' homaro neniu konas; tutsimple mi vidas obstaklojn, kiuj malhelpas ĝian antaŭeniradon. Unu el tiuj malhelpoj, kaj mia opinie ne la malplej grava, kuŝas en la kapo mem de l' homoj. Ĝi estas la nacieca ideologio, kiu baras al ĉiu racia solvo de sociaj problemoj, konsidere la nunan staton de l' tekniko en la mondo. La naciismoj estas inter si

neakordigeblaj. Tio estas nepre kontraŭ ilia naturo mem. Sekve, kia estas la plej urĝa tasko, se ne penadi por detrui tiun danĝeran ideologion?

Por detrui, ekstermi la naciismon, ne ekzistas pli bona, pli efika rimedo ol faligi unue la lingvajn barojn, kiuj apartigas la popolojn. Ni posedas la necesan ilon por tio. Ĝin donacis al ni Zamenhof. Laŭsperte ni scias, ke Esperanto perfekte taŭgas por nia celo. Ĝia diskonigado, vastigado kaj lernigado estas do nia ĉiutaga tasko. Sed antaŭe, plej necese estas lertiĝi en ĝia uzado. Esperanto ne estu por ni nur helpa lingvo, per kiu oni balbutas ĉe hotelo aŭ en restoracio. Ĝi pli kaj pli fariĝu viva lingvo, per kiu ni pensas, rezonas kaj argumentas. La artefarita, racia, sennacieca lingvo eniĝu nian konscion tiel profunde, ke ĝi fariĝu nia preferata esprimilo, per kiu ni tute faligu la fremdon inter ni kaj niaj samlingvanoj el aliaj mondpartoj.

Unuvorte, ni estu veraj ĝisostaj Esperantistoj. Kiuj traktas la Zamenhofan kreaĵon, kiel nure helpan lingvon, tiuj estas filistraj Esperantanoj, ne Esperantistoj. Ili tute ne komprenis la profundan signifon de tio, kion la elpensinto de nia lingvo nomis la "interna ideo de Esperanto".

Estas ja vere, ke per Esperanto povas esti mensogoj dissemataj kaj malamo kreskigata. Diversspecaj faŝistoj uzas nian lingvon por sia eksterlanda propagando. Sed ili faras tion, tial ke Esperanto ekzistas, estas realaĵo. Kiu kredas, ke faŝisto povus elpensi mondlingvon? Ĉu ĝi estas necesa, por pluigi, eternigi la naciismon? Certe ne! Sed ĉu oni povas prezenti al si mondon pacan, sen landlimoj kaj sen Esperanto? Oni ne povas... Konkludu mem, kara Leganto.

La pesto, la plago de nia epoko estas la naciismo. Por trafe kontraŭbatali ĝin, Esperanto estas nepre necesa, tial mi ĝojas esti Esperantisto. Laborante por nia lingvo, praktikante ĝin kaj penante per ĝi akiri menson de mondcivitano, mi havas la certon, ke miaj tempo kaj energio ne estas maltrafe elspezataj. Mi ĝojas pro mia Eaperantisteco, tial ke ĝi donas al mi la eblon forigi la malagrablan senton, kiun kaŭzas fremdo inter malsamlingvaj homoj. Per Esperanto mi akiris konatojn kaj amikojn en ĉiuj mondpartoj. Estas ja vere, ke per Esperanto mi ankaŭ havigis al mi kontraŭulojn en plej diversaj landoj. Sed prefere senti, sperti kontraŭecon ol fremdon!... Esti insultata en Esperanto, tio estas al mi preskaŭ pli agrabla ol esti laŭdata en franca lingvo...

Eble la nuna civilizo pereos, kiel pereis la egipta, la greka, la roma kaj aliaj; eble neniam stariĝos mondpaco en la mondo; almenaŭ per la imago mi povis, dank' al nia lingvo, vivi tiun idealan vivon; per mia aliĝo al S.A.T. mi havas la agrablan senton esti konscia ero de tiu embrio de sennacieca socio, kiun konsistigas nia mondorganizo.

Jes, mi ĝojas esti Esperantisto kaj SAT-ano. Se mi ne havas, kiel Zamenhof, la iluzion, ke Esperanto povas pacigi la mondon, almenaŭ forta estas mia konvinko, ke sen ĝi ankaŭ ne povus la homoj interfratiĝi tra la tuta tero. Sekve nia lingvo estas necesa pacigilo, se ne tute sufiĉa. Mi ĝojas esti Esperantisto, tial ke la praktikado de nia lingvo donis al mi la senton, ke nenian respondecon mi havos en la abomenindaj frenezaĵoj, kiujn nun preparas ĉiaspecaj naciistoj.

E. Lanti

La ĉi-supra artikolo aperis en "**Sennaciulo**" de la 25a de aprilo 1935.

# TRI SEMAJNOJN EN RUSIO (1922)

"Tri Semajnoj en Rusio" aperis felietone en "Sennacieca Revuo" de nov., dec. 1922 kaj jan., febr., mart. kaj april-maj. 1923.

"...Jam en 1922, sekve de mia trisemajna restado en Sovetio, mi havis la konvinkon, ke la rusa revolucio alportos al la Laboristaro nur iluziojn kaj poste amarajn elreviĝojn. Sed tiam mi ne kapablus argumenti mian konvinkon. Estis nur forta impreso, ne rezulto de rezonado. Sed la malbona impreso, kiun mi kunportis el Moskvo, igis min esti tre atenta pri faktoj. Mi observis, demandis kaj notis. Kaj jam en 1927-28 mi havis konvinkon, rezultantan de racia argumentaro..."

Lanti, 14.IV.37, en letero al kamaradino el Valence d'Agen (Francio)

## Enkondukaj vortoj

Rusio!... La lando kie, la unuan fojon en la historio, la proletaria klaso konkeris kaj konservis la politikan regadon. Nediskuteble tiu evento (okazego) estas la plej grava el la nuna epoko. La falo de l' putriĝinta cara reĝimo havos certe grandajn sekvojn en estonteco. Tial ĉiuj interesiĝas pri la iome mistera lando, kiun iuj alrigardas kun malamo kaj pereigdezirego; aliaj kun espero kaj amo...

Jam multe da raportoj, eĉ da dikaj libroj estas verkitaj pri la Soveta Respubliko. Kaj mi supozas tamen, ke neniu el la verkintoj estas tiel pretendema, ke li opinias esti pentrinta la vere veran bildon de la postrevolucia Rusio. Restas do multo direnda kaj pentrinda. Cetere la bildo ŝanĝiĝas, – kaj ĉiu vidas per siaj propraj okuloj.

Tial mi konjektas, ke nia legantaro akceptos kun intereso skizitan rakonton pri mia vojaĝo.

Ĉu mi estas tiel akrevida, tiel observpova, ke mi sukcesis vidi la ĝustan fizionomion de vastega mondparto, kie ĉio ankoraŭ bolas, kie ĉio estas kvazaŭ en eksperimenta retorto? For de mi tia penso!... Kaj mi estas certa, ke neniu leganto esperas trovi tion en ĉi tiu skizo. Mi promesas nur eldiri sincere miajn impresojn, – kaj impresoj ne estas juĝoj.

Nenia politika motivo povas trudi al mi la devon silenti pri la malbonaj impresoj, kiujn mi kunportis el Rusio. Amicus Plato, sed magis amica veritas. Mi amas kaj estas preta defendi la Rusan Revolucion. Nu, ĉefe pro tio mi volas paroli pri ĝi malkaŝe, ne fipolitikiste. Cetere la Soveta Respubliko estas jam sufiĉe potenca por ke, sen ia skrupulo, oni diru pri ĝi la veron. Oni ankaŭ ne forgesu, ke la Bolŝevikoj mem ofte riproĉas akre al



si mem.

Fine de tiu raporto oni legos pri la nuna situacio rusa klarigojn de iu, kiu deziras konservi anonimecon. Tiu kamarado, komunisto, estas tre klera kaj studema homo. Al li oni komisiis tre gravajn diplomatajn misiojn. Li partoprenis kun Lenin kaj Trocki en gravaj decidoj kaj portas sur siaj ŝultroj parton el respondeco en la okazintaĵoj. La hazardo igis nin interkonatiĝi. Mi povis sperti pri lia spiritobjektiveco kaj plena informiteco pri Rusio (lia lando). Antaŭ ol foriri mi do iris al li prefere ol al iu el la ĉefoj, kies nomoj estas ĉiutage presataj en la gazetoj. Ofte tiuj k-doĵ estas simple la trumpetistoj, kiuj bruade konigas la decidojn cerbumitajn en kabinetoj. Al tiu eminenta k-do mi diris miajn impresojn, miajn dubojn, mian senreviĝon. Liajn respondojn mi resume kaj kiel eble plej fidele raportos. – Kaj tiel trankvila estos mia konscienco, se ankoraŭ doloras mia koro.

### Antaŭ la foriro

– Vi intencas forveturi Rusion!!?... Tion ne faru. Milfoje vi riskas esti mortigata...

– Kial?...

– Nu, regas tie grandega teruro. La komunistoj konstante perfortas. Vi vidos tiom da kruelaĵoj, ke vi ne povos deteni vin protesti, kaj jen, la ruĝarmeanoj pafos al via kapo...

– De kiu vi estas sciigata pri tio?

– Antaŭ du tagoj R. mem diris tion al mi. Konatoj liaj rakontis...

– De kiu, tiuj konatoj eksciis pri teruraĵoj?

– De aliuĵ, kiuj...

– ...verŝajne legis tion en la burĝaj gazetoj... Nu, bone, mi

forveturos. Proprokule mi volas vidi Rusion. De tiel longe mi sopiras al la Meko de l' tutmonda Revolucio. Neniĉe la danĝero povus min haltigi. Male ĝi havas ian strangan allogon. Mi forveturos...

Tian resumitan interparoladon mi efektive havis kun kelkaj el miaj konatoj. Tipe ĝi montras la ĝeneralan opinion, kiun la plimulto el la Francoj havas pri Rusio. Kaj pro tio mi volis ĝin konigi antaŭ ol komenci mian privojaĝan rakonton.

### Survoje al Moskvo

La 1an de aŭgusto mi envagoniĝis; alvenis Berlinon la morgaŭon; restis tie du tagojn por prizorgi la pasportan aferon; poste forveturis al Stettin kaj la 5an enŝipiĝis en Oberbürgermeister Hacken, germana ŝipo veturonta Petrogradon. Tiu ŝipo kunportis agrikulturajn maŝinojn, diversajn aliajn objektojn kaj ankaŭ pasaĝerojn.

Je la 22a horo la ŝipo ekveturis. Mi tre bedaŭris forlasi la Stettinan havenon nokte. Je la luna lumo mi nur povis videti ebenan pejzaĝon kaj ŝipkonstruejojn. Sub tiu pala lumo ĉio vestiĝis per melankolia poezio. Glate iris la ŝipo en la enfluejo de Oder. Pli skua estis la irado en la Baltika maro.

Dimanĉe 6an de aŭgusto. – Ellitiĝinte mi sentas min iom malbonfarta. Kelkaj personoj jam malsanas. Mi penas por kontraŭi la vomemon, kaj sukcesas forigi stomakturniĝon. La maro estas malglata; ondetoj kun blankaj makuloj. Nuboj. La ŝipo antaŭeniras, sed ŝajnas, ke ĝi estas ĉiam centro de granda rondo. La maŝinaro ritme funkcias; surda bruoj. Mevoj ĉirkaŭflugas la ŝipon. Tiele estos la vojaĝo ĝis Petrograd.

Inter la pasaĝeroj estas 5 Italoj, junuloj kiuj devis forkuri el

Italio post interbatiĝo kun la faŝistoj; 2 Alĝerianoj kiuj veturas por studi marksismon ĉe la Orienta Lernejo en Moskvo – cele al posta propagando de l'komunismo inter la Araboj; Germanoj, Amerikanoj, Rusoj k.a. Mi estas la sola Francdeveninto. Krom kun la Rusoj, kiuj preskaŭ ĉiuj konas tri, kvar aŭ kvin lingvojn, la interkompreniĝo estas malfacila. Plurfoje mi havis okazon paroli pri esperanto. Kaj mi konstatis, ke multuij ankoraŭ ne scias pri nia afero. Post klarigoj ĉiuj konsentis al nia entrepreno.

Merkrede 9an de aŭgusto. – Jam ni estas en Rusio. Je la 7½ ni enveturas la rodon de Kronŝtad. Aeroplano surflugas. Rusa Komisiono enŝipiĝas por kontroli la pasportojn. Kronŝtad aspektas kvazaŭ mortejo. Oni vidas postsignojn de la marista ribelo. Dekstre fortikajo estas detruita.

Je la 11a ni alvenas en la Petrograda haveno. Pluvegas. Oni disdonas paperfoliojn sur kiuj ni devas skribi la nomon, profesion, deiran lokon, naciecon, celon de la vojaĝo, kiom da tempo ni intencas resti en Rusio. Viro kun pafilo staras ĉe la elŝipejo. Li estas vestita kiel laboristo ne kiel soldato. De sur la ferdeko elmontriĝas du fiakroj, tramveturilo; virinoj marŝas nudpiede; junulo mizeraspekta trairas kun pafilo vojon. Preĝejoj kun kupoloj turbformaj staras tie ĉi kaj tie. La domoj estas ŝmiritaj ĉiu per malsama koloro. Kaj tio aspektas plaĉe. Estas jam la 13a, kaj ankoraŭ ni ne elŝipiĝis. Senĉesa pluvado. Rusa junulo alvokas por ke ni venu sur la ferdekon kaj kantu la "Internacio"n. Germanoj, Rusoj, Italoj, Alĝerianoj k.a. ekkantas, ĉiu en sia nacia lingvo. Kia malharmonio! Ĉiu ĉesas kanti ĉar li konscias pri ridindeco.

La pakaĵoj estas zorge traserĉataj. Kiam venas mia vico, du el la oficantoj demandas min france kaj, post vido de mia pasporto, lasas min eliri sen traserĉo en miaj pakaĵoj. Fine aŭtomobila

ŝarĝveturilo alkondukas nin ĉe la "Internacia Hotelo". Tie ni atendas almenaŭ du horojn por ricevi ĉambron. Virino proksimume 30jaraĝa ŝajnas ordoni tie. Ŝi parolas iomete france kaj aspektas kiel prostituciulino; alia samaspekta junulino kun cigareto ĉe la lipoj kondukas la voĵagantojn al iliaj ĉambroj.

La "Internacia Hotelo" staras sur granda placo kun arbustoj, verdaĵoj kaj benkoj. Dekstre estas kvadratbaza, kolonhava preĝejo kun ampleksa orumita kupolo. Antaŭ la preĝejo kuŝas amasego da brulŝtupoj, kiujn deĵore gardas soldato. Ricevinte ĉambron mi vidavide iras promeni tra la urbo. Mi iras sencele. Sur la trotuaroj, sur la stratoj troviĝas kotaj kavaĵoj. Plejparto el la butikoj estas fermitaj. Preskaŭ ĉiupaŝe virinoj, geknaboj eĉ viroj, vende proponas plej diversajn aĵojn: pomojn, paprikojn, cigaredojn, kukojn ktp. Estas ankaŭ veturilvendejoj ĉe kruciĝo de stratoj. Ĉie oni renkontas soldatojn. En iu strato mi rimarkas, ke virinoj ire kaj reire paŝas sur la trotuaro. Mi haltas kaj observas: nenia dubo, ili estas prostituciulinoj. Korpemite mi revenas al la hotelo. Temas vespermanĝi. Mi ŝanĝas 3000 mg. kaj ricevas 21 milionojn da rŭbloj! Nu, mi fariĝis milionulo! En la restoracio mi manĝis supon en kiu estis viando, diversaj legomoj kaj mi ne scias kio. Ĉion mi ne povis manĝi. Mi trinkis akvon. Kosto: 2 milionoj da rubloj.

Ĵaŭde la 10an de aŭgusto. – La komunista karavano estas sub la zorgado de "Kuriero", kiu kunvojaĝis ĝis Petrograd kaj akompanos nin ĝis Moskvo. Kiam ni forveturos de ĉi tie? Neniu scias. Nia karavano konsistas el du kategorioj de individuoj: iuj apartenas al la fako "Komintern"<sup>[1]</sup>, la aliaj al la Komisarejo por Eksteraj Aferoj. Iafoje certa rivaleco okazas inter la du fakoj. Kvankam estante samcelaj ili tamen ne havas saman taskon: la unua laboras por forrenversi la kapitalistajn registarojn, dum la

dua kontraktas kun ili. La "Eksteraferuloj" plendas pri la maldiligenteco de la kuriero, kiu tute malaperis de kiam ni estas ĉi tie. Ni do decidas iom viziti la urbon atendante ekscii kiam ni forvoĵagos...

Jen la "Vintra Palaco" sur kiu estas videblaj postsignoj de la Revolucio: kuglotruojn kaj diversajn difektaĵojn. Sur la Palaco flirtas la ruĝa standardo. Oni klarigas, ke ĉirkaŭ tiu ĉi cara restadejo estis orumita krado, kiun vendis la Soveta Registaro. Sur la "Kampo de Marso" tute proksime de la Palaco kreskas legomoj. Tie, inter dikŝtona, kvadratangula fermitaĵo kun aperturo ĉe ĉiu flanko, estas tomboj de revoluciuloj mortigitaj dum la ribelo. Sur la stratego "Perspektiv Nevskij" multaj magazenoj kaj butikoj estas malfermitaj. En la montrejoj vidiĝas luksaĵoj: piedvestoj, kukaĵoj ktp. Sur tiu ĉefa strato ĉie estas gevendistoj de plej diversaj objektoj. Mi aĉetas paron da laĉoj por miaj ŝuoj kaj pagas por ĝi 400 000 rublojn. Oni renkontas virinojn elegante vestitajn; kelkajn eĉ lukse. Policanoj ne estas videblaj. Tie ĉi kaj tie soldato aŭ civilvestita viro kun pafilo ĉe la ŝultro ŝajnas deĵori kiel ordigisto. Mi rimarkas, ke la ordonoj ne devas esti tre severaj: la deĵorantoj fumas, senzorgeme babilas kun la civiluloj kaj aspektas tre ne timindaj.

Vendrede la 11an de aŭgusto. – Hodiaŭ mi tagmanĝis en restoracio mastrumata de komunistoj. Mi ricevis nigran panon, kiun mi ne povis manĝi, porcion da viando kun terpomoj, kompoton kaj teon kun sukero, kosto: 1 100 000 rubloj.

Pluvas. Ĉu ni forveturos hodiaŭ? Neniu scias. Mi koleras pro tiu necerteco, kiu malhelpas profitan uzon de la tempo. Ne estas prudente foriri malproksimen de la hotelo ĉar verŝajne venos la kuriero por sciigi nin pri la forveturo. Kion fari? Mi decidas eniri la preĝejon S-ta Isaako. Okazas diservo. La ĉeestantoj (30

personoj proksimume) preĝas fervore, kruccsignas, genufleksas kaj fronte tuŝas la plankon. Diservanto kantas per forta voĉo tre impresiga: ŝajnas, ke ĝi eliras el tombo. Sammomente preteriras la preĝejon kantante aro da soldatoj. Ili marŝas ritme, ordeme, ne portas armilojn. La kanto estas melankolia, unutona, iom mistika. Mi sentas en ĝi kaŝitan forton, grandegan, vastan kiel la stepo kiu verŝajne inspiris tiun kanton...

...Fine ni ekscias, ke ni forveturos hodiaŭ vespere. Je la 21a horo ni envagoniĝas en la diplomata vagono. Ampleksa, komforta ĝi estas. En ĉiu kupeo estas nur kvar personoj. La apogdorsa parto de la benkoj estas movebla. Tiamaniere, ke oni povas ĝin levi horizontpozicie kaj utiligi kiel liton.

Sabate 12an de aŭgusto. – Frumatene mi vekiĝas. Briletas jam la suno. Forkuras sufiĉe rapide la vagonaro, kvankam la lokomotivo estas hejtita per ligno. La pejzaĝo estas ĉie samaspekta: senfina ebenaĵo kovrita ĉi tie kaj tie de arbaroj el abioj kaj betuloj.

Ni alvenas Moskvon je la 13a horo. Longa atendado ĉe la stacio. Fine venas omnibuso kiu kondukas nin al la hotelo "Lux" (Lumo) kie estas kutime gastigitaj la eksterlandaj delegitoj. Kino Leiciague, la reprezentanto de l'Franca Komunista Partio, forestas; ankaŭ Rappoport por kiu mi havas leteron kaj monon. Neniu povas do prizorgi min kaj la du Alĝerianojn, kiuj ankaŭ apartenas al la Franca Partio. Ne estas eble interkompreniĝi kun la hotelmastrumanto, kiu verŝajne parolas nur ruse. Je la 19a ni ankoraŭ atendas; ĉiuj aliaj alvenintoj jam estas instalitaj. Mi tre malpacienas. Fine, france parolanta reprezentanto de l'Itala Partio kompatas kaj bonvolas klopodi por ni. Post sephora atendado mi povis okupi ĉambron kaj manĝeti.

Mi bezonis 12 tagojn por atingi la Mekon de la Revolucio...

En mia ĉambro estas kvar litoj; du estas okupataj de Amerikanoj kaj la tria de Germano. Tia komuneo tre malplaĉas al mi, soleĉatanto...

## Moskvo

La surstrata movado estas tre vigla en kelkaj lokoj. La tramveturiloj funkcias normale. Ili plenigite trakuras la urbon; knare ili balanciĝas sur eluzitaj, moviĝemaj reloj. Estas mirakle: malgraŭ tia stato mi eĉ ne vidis dum mia ĉi-tiea restado unu solan haltigan akcidenton!... La trotuaroj estas malglate kaviĝintaj. Oni devas tre atenti por ne fali marŝante. Kelkaj aŭtomobiloj rapide forkuras kaj kvazaŭ salte transpasas la kavaĵojn. La fiakretoj – isvolŝiki — iras malrapide. La kondukistoj – nomiĝas ankaŭ isvolŝiki – aspektas al mi tre originale, kun siaj longaj malpuraj surtutoj, ĉe la talio alĝustigitaj kaj siaj legendaj ĉapoj. La maniero laŭ kiu la ĉevalo estas jungita aspektas ankaŭ originale: la flankaj timonoj estas kunligitaj per ligna arkaĵo superstaranta la kolon de la ĉevalo.

Ĉar de unu jaro okazis la "Nep" (Nova Politiko) jam multaj butikoj estas malfermitaj. Ŝajnas ke ili estas bone provizumataj. En aliaj oni prepariĝas por malfermo. Tial mi havas impreson, ke la urbo estis sieĝita dum longa tempo. La malamiko foriris; kaj nune normala vivo rekomenciĝas. Metiistoj laboras dimanĉe, eĉ nokte por instali butikojn kaj magazenojn.

Kio vere karakterizas la fizionomion de la urbo estas la gevendistoj, kiujn oni renkontas ĉe la sojlo de ĉiu domo, ĉe ĉiu stratangulo, preskaŭ ĉiupaŝe. De matene ĝis noktomeze ili stare aŭ kaŭre prezentas al la preterpasantoj plej diversajn objektojn: bulkojn, ovojn, pomojn, haringojn, cigaredojn, kukaĵojn ktp. ktp.

Iuj havaa apud si korbon; aliaj portas montran pladon, sin apogantan sur la brusto kaj retenitan per ŝnuro duonĉirkaŭanta la kolon. En certaj lokoj oni povas kalkuli 20, 25 da tiaj vendistoj, – kiuj iafoje interdisputas por okupi la plej bonan lokon.

Apud mia hotelo, dum tuta aemajno, mi vidis viron sanan, laborkapablan, kiu kun brako horizontale aletendita vende proponas... unu razilon!

Se ĉiu strato estas kvazaŭ bazaro, ekzistas tamen lokoj, placoj destinitaj por vendejoj. Oni povus nomi ilin interpuŝejoj. Tie svarmas densa popolamaso.

Ekzistas famo, ke en tiuj vendejoj cirkulas plej lertaj poŝoŝtelistoj. Fremdulo, kiu sin riskas tien, devas tre atenti pri sia monujo.

Ĉiupaŝe ankaŭ oni trafas almozulojn: invalidojn, militkripligitajn, infanojn, virinojn kaj eĉ maturulojn laborkapablajn. Ili estas nudpiedaj, malpuraj, la korpo apenaŭ kovrita per nepriskribeblaj ĉifonoj. Ĉe la pordo de pan- kaj kukvendejoj ili du, tri au kvarope staras kaj humile almozpetegas. Ili havas mienon de batitaĵ hundoj; kaj certa movo de la ŝultroj indikas, ke ili estas mordataj de pedikoj.

Meze de tia korprema mizero cirkulas personoj sufiĉe komferte vestitaj. La modo tamen ŝajnas esti ĉi tie nekonata. Oni vidas plej diversajn vestaranĝojn. Sed tio neniel malhelpas la virinojn koketi. Multaj viroj portas la nacian kostumon: bluzon, ĉirkaŭatan ĉe la talio per ŝnuro, kaj botojn kun altaj tibiingoj. – Virinoj ankaŭ portas tiajn botojn.

En multaj lokoj vidiĝas postsignoj de la prorevoluciaj bataloj: detruitaj, forbrulintaj konstruaĵoj; sed oni ankaŭ renkontas domojn, kiuj simple ruiniĝis pro malzorgo. Estas okulfrapanta fakto: dum pluraj jaroj oni apenaŭ laboris ĉi tie. Ĉio aspektas



mizere, malpure, eluzite. Moskvo havas sufiĉe belajn, rondirektajn promenejojn. Sed la gazonoj ne estis zorgataj; la kradetoj, kiuj ĉirkaŭis ilin, estas rompitaĵoj kaj nun ĉie oni paŝadas.

Tamen kelkloke oni riparas, repavumas per ligno la stratojn. Verŝajne post kelkaj jaroj Moskvo fariĝos pli belaspekta, pli pura kaj ankaŭ espereble malpli malbonodora.

### Bildoj

Sur promenejo, superŝutita per varmaj sunradioj, personoj kuŝas sur la gazono; aliaj sidas sur benkoj; aliaj preterpasas. Mizera blindulo kaŭras borde de la promenejo. Seninterrompe li balbutas la saman petegan frazon per voĉtono kortuŝiga. Li levas la vizaĝon al la ĉielo, tiel montrante sian nudan kolon sur kiu promenas pedikoj. Ifoje iuj mordetas. Tiam la blindulo rapidmove pinĉas per la fingroj la besteton kaj ĝin ĵetas antaŭen sur la polvon. Li ne mortigas la pedikon. Li bezonus la du manojn, dum unu almenaŭ devas senĉese almozgesti.

\*

Oni diras, ke Moskvo enkalkulas kvardekoble kvardek preĝeojn (1600). Mi ne scias, ĉu estas la ĝusta nombro. Sed kiam ĉiuj sonoriloj komencas bruadi, oni kvazaŭ kredas, ke ĉiu domo fariĝis preĝejo. La sonoj, alvenantaj el ĉiuj flankoj, eniras ĉiun lokon, sin trudas, inside penetras vian senton, batas vian animon, konfuzigas vian cerbon, tiele, ke oni povas nur fali sur la genuojn por preĝi aŭ kolerigite ŝtopi siajn orelojn por ne plu aŭdi tiun premkoran bruon. En la aero traflugas io nedifinebla,

mistera, ploriga, mistika – stultiga. Tiam oni komprenas la potencon de la religio, kiu sorĉas la animon de l'popolo kaj igas ĝin forgesi penojn kaj mizeron.

Kelkloke malgranda preĝejo staras borde de la trotuaro, kun pordo malfermita. La preterpasantoj vole nevole devas vidi la diservan spektaklon. Kreduloj ĉeestas ekstere. Vidiĝas plej akra kontrasto. La pastroj estas luksege vestitaj, brilas orumitaĵoj, dum plejparto de la ĉeestantoj aspektas tre mizere.

De antaŭ duonhoro mi rigardas tiun spektaklon: kreduloj kruccsignas plurfoje, balancas la kapon, genufleksas, kisas la teron. Se estus en alia loko mi preskaŭ kredus, ke ili gimnastikas. Preterpasantoj ankaŭ rapide kruccsignas. Rimarkinde estas, ke preskaŭ nur virinoj, maljunuloj kaj kripligitoj vidigas tiujn eksterajn signojn de religia kulto. Mi atente observis, kaj ne vidis eĉ unu junulon kruccsigni preterpasante. La plejmultnombraj preterpasantoj ŝajnas esti tute indiferentaj pri la ĉi tie ludata religia komedio. Kaj tio nedubeble estas konsekvenco de la Revolucio.

\*

La urbon transpasas la rivero Moskova. Ĝia, ne tre hela, iom malbonodora akvo fluas malrapide. Apude, la granda, luksega preĝejo "Jesuo Savanto", kiu estis konstruata por danki al Dio pro la malvenko de Napoleono, prezentas sian altan, orumitan kupolon al la kisoj de la sunradioj. Estas la 16a horo. Tute proksime sin banas viroj. Ili estas absolute nudaj. Post la banado kelkaj lude kuras aŭ luktas; aliaj, surdorse kuŝiĝintaj, liveras al la karesoj de varmeta bloveto la proprajojn de l'vira sekso. Iom pli malproksime sur la alia bordo, estas virinoj, kiuj ankaŭ tute nude

sin banas. Neniu – krom mi – atentas tiun spektaklon.

Ĉu mi ne songas? Ne. Nu, mi prezentas al mi tian bildon en Paris apud la katedralo "Notre Dame". Kia skandalo!...

Ĉu tio ankaŭ estas konsekvenco de la Revolucio?<sup>[2]</sup>

\*

Laŭlonge de la multe trapasata strato Tverskaja, kondukarita al la hotelo "Lux", estas placeto sur kiu kuŝas amase ruboj de ruiniĝintaj domoj. Nu, jen tie sin paŝtas tute kviete du porkoj!...

\*

Viro kun pafilo ĉe la ŝultro marŝas meze de la strato; sekvas lin du senarmitaj viroj. Post ĉi-lastaj marŝas du soldatoj. Ĉemane ili tenas revolveron kies tubo alcelas la teron... Kio okazis?...

La kvino iras, kaj neniu atentis pri tiu bildo, kiu verŝajne estas kutima...

\*

Surstrata bazaro. Plej diversaj objektoj estas tie aĉeteblaj. Sur placeto 17 ŝuriparistoj en ronda enviciĝo staras. Malnovaj pecoj de ledo kaj plej elementaj iloj kuŝas tere. Nudpiedaj, nudkapaj, ĉifonvestitaj buboj stare aŭ sterne rigardas la ŝuriparantojn. La riparata piedvesto sidas ĉe la supro de stango, kiun la staranta ŝuisto preme tenas per la genuoj... Kaj la suno vertikale ĵetas siajn radiojn, kolorigante per kvazaŭa oro la tutan scenon...

\*

Moskvo estas plena je tiaj pentrindaj bildoj. La amatoroj de pitoreskaĵoj venu ĉi tien; ili akiros grandan provizon da neforgeseblaj impresoj. En tiu intermiksiĝa punkto de Okcidento kun Oriento oni ege ĝuas kontrastojn ne tiome troveblaj alie. Mizerego okultranĉe najbaras kun luksego. La cara regado kaj la religio amasigis en palacojn kaj preĝejojn nekalkuleblajn riĉaĵojn, dum la popolo restis en stato plej mizera. – Kaj ĝis nun la Revolucio ŝangis nenion tiurilate...

Iafoje miaj impresoj estis tiom fortaj, mi havis tiel egan spiritstreĉitecon, penante, sed vane, kompreni la min ĉirkaŭantan mondon, ke vespere mi sentis kompletan elĉerpitecon kaj fine indiferecon pri ĉio. Nitĉevo...

### Ĉe la sidejo de "Komintern"

– Kiom da tempo vi intencas resti ĉi tie? demandis min k-do Doriot, la sekretario de Internacia Junularo Komunista, Franco, kiun mi havis okazon renkonti, ĉe la hotelo "Lux".

– Proksimume tri semajnojn.

– Nu, vi prudente agos ne prokrastante pri viaj klopodoj. Oni ne kutimas rapidi ĉi tie. Plie, neniam oni scias, kiam oni povos forveturi...

Mi do decidis tuj iri al la sidejo de Komintern. Doriot indikis al mi la vojon, faris desegnon sur paperpeco, kaj provizumite de tiu plano, mi iris.

Sen tro granda peno mi trafis la lokon. Sur placo, ne malproksime de l'Kremlo, staras granda konstruaĵo sur kies fasado oni povas legi kvarlingve la faman frazon: "Ĉiulandaj proletarioj unuiĝu".

Mi aliris ĉe la enirejo. Tie du deĵorantaj soldatoj malpermesis, ke mi eniru. Unu diris kelke da vortoj de mi nekomprenataj kaj gestis al apuda pordo. Mi iris tien, eniris kaj ekvidis sinjorinojn sidantajn antaŭ ĝiĉetoj. Mute mi montris mian legitimaĵon, skribis la nomon de la k-do, kiun mi deziris viziti kaj ricevis paperaĵon kun kiu mi reiris al la soldatoj. Tiam ili permesis, ke mi eniru. En tiu okazo nur gestoj utilis kial interkomprenigilo.

La de mi vizitoto forestis. Dum unu horo mi sidis en antaŭĉambro, kaj fine fraŭlino germanlingve komprenigis min, ke mi revenu je la dua posttagmeze. Mi do foriris. Survoje al la hotelo mi havis ŝancon renkonti Doriot, kiu venis ankaŭ viziti la sidejon. Klariginte pri mia maltrafo li konsentis akompani min kaj prezenti al k-do Rakoŝi, la Sekretario de Ekzekutiva Komitato de Komintern.

Ne tre akceptema estis Rakoŝi. Li alparolis min jene:

– Ha, vi estas k-do Lanty! Vian mandaton mi vidis; ĝi ne valoras por ni. Vian organizaĵon ni ne konas. Ĉu ĝi estas komunista? Ĉu vi konas ĉi tie esp. komunistojn? Cetere ni ne povas okupiĝi pri esp-o. Ni havas tro da aliaj prizorgendaj taskoj, multe pli gravaj kaj urĝaj. Mi ne komprenas, ke vi venis ĉi tien el Paris pro tia motivo. Vi elturniĝu kiel vi povos. Komintern ne povas pagi por turistoj...

Iom bolis mia sango. Kaj sektone mi respondis al Rakoŝi:

– Nu, ĉu do vi supozas, ke mi intencis gastigi min de Komintern? Neniel. Mi kutimas kontraŭe elspezi por la komunismo kaj tute ne vivas per la komunismo. Vi malpravas fari tian supozon koncerne min. Mi pagos el mia propra poŝo por mia ĉi-tiea restado. Sed regulan mandaton mi havas kaj nepre devas plenumi la al mi konfiditan mision.

Se la mondlingva afero estas por vi bagatelaĵo, nu, mi prave

malprave, kiel internaciisto, konsideras ĝin gravega. Homo kiel Romain Rolland ankaŭ asertas, ke la internaciistoj estas tute malpravaj malatentante tiun aferon...

– Ho, R.R...., literaturisto, ne komunisto, intermetis Rakoŝi kun malŝatema rideto.

– Se pri tiu temo ankaŭ valoras nur opinio de komunistoj mi do citu al vi la nomon de Henri Barbusse, kiu, kvankam literaturisto, estas komunisto Li ankaŭ opinias, ke internacia lingvo estas nepre necesa por ke vivu vera Internaciano, ne Internaciano de poliglotaĵoj.

– Ĉu vere H.B. interesiĝas pri tiu demando? iom mirigite demandis Rakoŝi.

Tiam mi prezentis al li ekzempleron de la lernolibro eldonita de Federacio de revoluciaj esperantistoj franclingvaj por kiu verkis H.B. antaŭparolon. Rakoŝi trarigardis la libron kaj diris:

– Bonvolu sidiĝi.

De tiu momento la tono de nia interparolado iom dolĉiĝis. Mi klarigis pri nia movado, montris la cirkuleron de l' Franca Ministro ktp. Post dudekminuta interparolado, Rakoŝi konfesis, ke eble nia agado povas utili la komunismon, sed konkludis, ke nun Komintern ne povas okupiĝi pri la demando.

Tiam mi respondis, ke tute ne estas mia intenco tedi la kom. gvidantojn per antaŭtempaj postuloj. Tia ne estas mia misio. Mi nur venis por esplori la laborojn de la Studkomisiono por alpreno de helpa lingvo en la IIIa Internaciano, kiu estis starigata dum la IIa Kongreso. Mi devas ekscii ĉu la komunistoj povas prave konsideri tiun entreprenon kiel seriozan kaj indan je atento de ĉiuj komunistaj mondlingvanoj. Kaj mi aldonis, ke kvankam mi estas esp-isto mi estas preta propagandi kaj instrui iun ajn lingvon oficiale alprenitan de Komintern.

Aŭdante la vortojn: "laboroj de la studkomisiono" Rakoŝi ridetis kaj tiam diris kion mi jam resume raportis en la oktobra n-ro de S.R. Li aldonis, ke neniuj rajtas sin apogi sur la Komintern por propagandi iun ajn internacian lingvon.

Restis al mi nur peti oficialan ateston de tiu deklaro por esti plenuminta mian mision. Senhezite Rakoŝi liveris al mi la dokumenton, kies originalan franclingvan tekston niaj legantoj jam konas.

Mi plue devas noti, ke, pro neekzisto de esp. komunista organizaĵo en Rusio, mia pozicio antaŭ Rakoŝi ne estis favora. Li eĉ min avertis, ke mi ne devas fidi al iu ajn esp-isto. "Multaj estas kontraŭrevoluciuloj", li aldonis, "Estu singardema, prudenta en viaj rilatoj kun esp-istoj..."

### En Esperantio

Dank' al Sankta Cirilo kaj lia frato Metodo, la slavoj havas specialan alfabeton. – Kaj tio ankoraŭ iom pli apartigas ilin de la aliaj popoloj. Okcidentano, kiu ne lernis la rusan alfabeton, ne kapablas eĉ legi iun vorton. Sur la ŝipo, rusa K-do iomete instruis al mi la rusajn literojn. Mi do sukcesis legi la nomon de la strato, kie staras la hotelo "Lux". Tverskaja. Ĝuste sur tiu strato ankaŭ troviĝas la redaktejo de "La Nova Epoko", kiun mi intencis viziti. Mi do povis sen plano trovi la lokon. Tie mi trafis plej afablan kaj bonkamaradecan akcepton. Sonis esp-o bele kaj flue en la buŝoj de la rusaj samideanoj. Mi ne plu sentis min en fremda lando.

Ĉeestis K-do Nekrasov, redakcia sekretario de la revuo, K-do Polakov, prezidanto de, l'rusa sekcio de E.L.A., K-do Demidjuk, kiu okupas altan postenon en la ruĝarmeo, kaj K-do Futerfas,

kiu kritikeme kaj bildriĉe parolas en vera oratoro, kia li estas.

Neniu el ili apartenas al la Komunista Partio. Ili nur simpatias la komunismon kaj lojale kunlaboras kun la Soveta Reĝimo. K-do Futerfas estas anarkisto. Iam li estis arestita pro falsa denunco. Amuza fakto: Ĉar oni trovis ĉe li multajn dokumentojn esperantlingvajn, estis la idisto Milter ("Ĉekisto") kiu esploris la esp-ajn tekstojn. Tial ke oni trovis nenion suspektindan, Futerfas estis liberigata.

Dirinte mian deziron ekinterrilatiĝi kun esp. komunistoj, tuj estis proponate al mi viziti K-don E. Drezen, kiu oficas en la Kremlo.

La morgaŭan tagon antaŭtagmeze, akompanate de Nekrasov, mi iris al Drezen.

Apud unu el la enirejoj de, l' Kremlo, humile sin apogas al la fortika muro ligna budo, kie oni devas peti enirpermeson. Enviciĝe ni staris proksimume duonhoron kaj fine ricevis la bezonatan enirpermesilon. Provizumite de tiu paperaĵo ni aliris grandan portalon, kie vico da deĵorantaj soldatoj stare gardis la enirejon. Montrinte la enirpermesilon ni trapasis sub alta arkaĵo kaj trafis duan vicon da soldatoj, al kiuj denove ni devis prezenti nian rajtigilon. Poste ni transpasis grandan korton kaj alvenis ĉe impona konstruaĵo, kie deĵoranta soldato ankoraŭ unu fojon esploris nian paperaĵon. Trapaŝinte longajn, duonhelajn koridorojn ni fine venis al la ĉambro, kie oficas nia samideano.

Kvankam juna, Drezen okupas tamen tre altan postenon en la administra fako de l' Soveta Respubliko. Li estas vic-direktoro de Tutrusia Centra Ekzekutiva Komitato de Sovetoj. Tiun fakon oni kutimas nomi mallongige V.C.I.K. Kalinin estas la Prezidanto de tiu Centra Komitato, kiu estas (principe) la plej alta Instanco de l' Rusa Respubliko.



Tre afable kaj helpeme akceptis min Drezen. Li sin metis je mia dispono por faciligi kaj agrablighi mian restadon en Moskvo. Mi klarigis al li en kia situacio iom duba mi troviĝas en la hotelo "Lux", pro foresto de la reprezentanto de l' Franca Kom.Partio. Mi diris, ke mi trafas malfacilaĵojn por esti konsiderata kiel rajtigita delegito ktp.

Drezen telefonis ien, skribis letereton, kiun li donis al mi por ke denove mi vizitu la sidejon de l' Komintern; unuvorte klopodis tiele, ke de tiu momento ĉio glatiĝis antaŭ mi.

Ĉar en tiu momento nia samideano ne disponis sufiĉan tempon por longe priparoli diversajn aferojn, li petis, ke mi revenu posttagmeze je la 5a. Tiel estis interkonsentite.

Je la difinita horo mi revenis sola al la Kremlo. Post la kutimaj formalaĵoj prieniraj mi denove troviĝis en la sekretario de l' Vic-direktoro de V.C.I.K.

Ĉar nia Samideano plenumas oficon en la administracia fako mi ne povis trafi pli bonan okazon por ekscii pri la strukturo kaj funkciado de l' Soveta Reĝimo. Mi do petis al Drezen, ke li bonvolu sin lasi intervjui. Tre afable li konsentis, kaj liveris al mi klarigojn, kiujn resume mi konigos en alia parto de mia raporto.

Allo!... – Drezen telefonas, kaj, post minuto: – Hodiaŭ vi estas mia gasto. Tuj venos aŭtomobilo, kiu kunportos nin hejmen. Vi vespermanĝos kaj konatiĝos kun mia edzino.

Ĉu oni povas rifuzi tian afablan proponon? Kvankam iom ĝenate, mi povis nur danke akcepti...

Post kelkaj minutoj ni veturas tra la kortego de l' Kremlo, kaj rapide alvenas al la Spasskije voròta (Sav-pordego). Drezen klarigas pri la sankteco de l' loko. Eĉ la caro demetis la ĉapon, kiam li trapasis ĉi-tien. – Dum ni malpiege malatentas tiun antaŭrevolucionan kutimon kaj trapasas kiel en tute ordinara loko.

Sur la turo de tiu pordego estas granda horloĝo, kiu, je la 9a matene kaj je la 9a vespere, ludas per sonoriloj ĉu Internacion, ĉu Funebran Marŝon. Antaŭ la Revolucio ĝi ludis la caran himnon: "Dio la caron gardu" kaj iun preĝon. Apenaŭ emociata mi estas. Strange. Kial entuziasmo ne flamigas mian koron? Jes, kial? Mi ne povus nun respondi.

Post kvaronhora veturado ni alvenis ĉe mia gastiganto. Lia ĉarma edzino ne parolas esperante, sed malgraŭ tio ne estas malpli afabla. Cetere ĉu estas necese paroli kiam oni sidas antaŭ tablo abunde provizumita per bongustaj manĝaĵoj? Simpla rideto sufiĉas por montri kontentecon. Certe mi ne bedaŭras mian neĉeeston ĉe la vespermanĝo en la hotelo "Lux"!...

Drezen prave fieras pro sia esp. biblioteko. Kun granda intereso mi povis foliumi kolekton da libroj raraj, kies ekzisto rakontas la historion de la mondlingva movado. Nia samideano nedubable havas fortan ŝaton al esp-o. Mi konstatis kiom ame li parolas pri nia afero. Sed la vivo estas trudema. Lia ofico forprenas lian tempon kaj li malmulte povas okupiĝi pri nia afero.<sup>[3]</sup>

Kompreneble ni interparolis pri nia S.A.T.-movado. Ŝajnas, ke ni ne interkonsentis. Drezen riproĉas, ke SAT ne estas pure komunista. Li ne volas kunlabori kun anarkistoj kaj socialdemokratoj. Sed, strange, li estas prezidanto de Sovetlanda Esperanta Unuiĝo, en kiu estas ne nur anarkistoj sed burĝoj el plej certa speco. Tiun kontraŭdiron ĝis nun mi ne sukcesis klarigi.

\* \* \*

\*

Mi revidis Drezen kelkfoje ĉe la Moskva Klubo Esp-ista, kiu estas malfermita ĉiutage de la 7a vespere ĝis la 9a. La kunvenejo de niaj Moskvaj samideanoj troviĝas en la strato Bolŝaja-Dmitrova, 12. Preterpasantoj povas vidi surgluitan ĉe la vitraĵo de butiko, ne revolucian esp. gazeton, sed Esperanto-n Triumfonta-n!... Se oni alproksimiĝas kaj premas sian nazon kontraŭ la malpuran vitraĵon, oni ekvidas ĉe muro grandan portreton de Zamenhof kaj malgrandajn portretojn de Karl Marx kaj de H. Barbusse. La Klubo enkalkulas 80 membrojn proksimume, estas al mi dirite. Sed ŝajnas, ke la propagando ne estas vigla kaj trafe farata. Mia impresio estas, ke ne tie estas la kerno, al kiu povos alcentriĝi la fortoj kapablaj antaŭenpuŝi nian aferon en la revolucia Rusio. Eble ĝi estas ĉe "La Nova Epoko".

\* \*  
\*

Riĉa je poetoj estas la nuna esp. movado. Nekrasov kaj Polakov kutimas rajdi Pegason.

Iun tagon ruĝarmeano, akompanate de Polakov, venis al mi. Ili alportis kolekton de poeziaĵoj por ke mi elektu la presindajn en S.R.

La morgaŭon, Nekrasov ridetis aŭdante min rakonti pri la vizito de "soldato", K-do Rozenblat. Demandite de mi pri la kaŭzo de lia mokemo, Nekrasov respondis, ke tiu "soldato" estas simple... generalo! Rozenblat estas juna, eble 26-jara. Nu, ĉiam mi prezentis al mi generalon grizhara. Mi tute forgesis, ke ankaŭ Napoleono estis generalo je sia 25-jaraĝo. Verdire grado de generalo, laŭ la kutima senco, ne ekzistas en la ruĝarmeo. Tamen

la komandrajteco de nia samideano rilatas al tiu de brigadgeneralulo en la franca armeo. Ĉar nia generalulo ŝatas poezion, estas komunisto, verŝajne li neniam fariĝos ia Napoleono. Esperinde!...

Kial do je la eksteraĵo mi ne rekonis la gradon de tiu ruĝarmeano? Tute simple, ĉar li aspektis eĉ malpli komforte ol la plej simplaj germanaj aŭ francaj soldatoj. Li ne estis ornamaĉita per galonoj, kaj mi ne atentis pri la lanaj steloj, kiujn li portis ĉe la maldekstra brako.

Mi rakontas tion, ĉar tiu simpla fakto elokvente montras kiom diferencas la venkinta ruĝarmeado de la kapitalistaj armeoj.

\*            \*  
\*  
\*  
\*

Dum debata kunveno, kiun okazigis Moskva Klubo Esp-ista, mi havis okazon konatiĝi kun aliaj esp-istoj. Mi ankaŭ eksciis, ke Kotzin fariĝis komunisto – kaj ne plu okupiĝas pri esp-o. Devjatin estas nun en Kiev – kaj silentas.

Mi havis impreson, ke la esp. komunistoj preskaŭ hontas pri sia esperantisteco. Ĉar la gvidantoj de Komintern ne interesiĝas pri la afero, ŝajnas, ke niaj samideanoj timas sin kompromiti, farante propagandon en komunistaj rondoj. La severa disciplino komunistasufokis ĉe multaj la entuziasmon kaj la fervoron por esp-o.

Plie, la bedaŭrinda fiasko de E.S.K.I. – Esp. kom. organizaĵo pri kiu estis kelkfoje raportite en S.R. – kaŭzita pro maltrafaj klopodoj de senprudentuloj, ankaŭ kaŭzis disreviĝon kaj malkuraĝiĝon. Kompreneble la ekonomia situacio ankaŭ

malfaciligas la propagandon.

Ekzistas en Rusio multe da lertaj esperantistoj. La grundo ankaŭ estas plej bona por prisemado de la ideo pri lingva internaciigilo. Sed niaj rusaj samideanoj, se ili volas sukcese agi en komunistaj rondoj, devas nepre forlasi la malnovan, neŭtralisman propagandsistemon.

Esperable ili ekkonscios pri la grava rolo, kiun ili povas ludi en nia movado. Ili fine trovos la ĝustan vojon. Jam S.A.T. enradikiĝetis en kelkaj rusaj centroj. Mi plene interkonsentis kun la K-doj, grupiĝintaj ĉirkaŭ "La Nova Epoko". Kaj nedubeble niaj aranĝoj plej bone efikos por la sukceso de la mondlingva afero.

## La Kremlo

Ĉu mi provos detale priskribi tiun mirindaĵon, starantan meze de la urbo, apud la rivero Moskova? Certe ne. Tio superas mian kapablon. Plie mi bezonus multajn paĝojn de la gazeto, por konigi tiun mondfaman citadelon, kiu per siaj monumentoj rakontas la historion de pluraj jarcentoj de la cara regado.

Prezentu al vi, karaj legantoj, ĉirkaŭremparon, havantan periferion preskaŭ trikilometran, en kiu troviĝas plej mirinda amasiĝo de palacoj, preĝejoj, turoj, plej diversformaj konstruaĵoj. Imagu belan antaŭvesperon, kiam la sunradioj ardas; al la orumitaj kupoloj, sur kiuj sidas plej delikataj ornamaĵoj: krucoj, emblemoj de la carismo, kiujn la bolŝevikoj prave konservis, ĉar ili estetike harmonias kun la tuto. La vidaĵo estas senkompara, vere belega.

Kiam mi vizitis Drezen, mi trapromenis sur la placoj interne de l' Kremlo. Mi vidis la dikegan sonorilon nomatan: Caro-

Kolokol. Ĝi pezas 165 000 kilogramojn. Kiam oni provis loki ĝin en turon, la levaparatoj rompiĝis. La sonorilo falis teren, ankaŭ rompiĝis kaj de tiu tempo kuŝas surloke kiel atestanto pri malhumila intenco.

La Kremlo entenas ne nur la plej grandan sonorilon el la mondo sed ankaŭ la plej dikan kanonon. Ĝi estas nomata: Caro-Puŝa, pezas 49 000 kilogramojn kaj estas tre respektinda, tial ke neniam ĝi pafis – samkiel la Caro-Kolokol neniam sonoris.

Iun dimanĉon mi revenis en la Kremlon. K-do V. Polakov estis klopodinta por ke mi povu partopreni en vizito al la Granda Palaco, organizita por la studentoj de l' Orienta Lernejo.

Ni trapaŝis luksegajn salonojn, kie ĉie estas el oro, marmoro, multkostaj ŝtonoj kaj lignoj. En la Andrea Salonego, unu el la plej luksaj, okazas la kongresoj de Komintern. Sur la muro, vid-al-vide al la podio, kie sidas la prezidantaro, pendas malgranda portreto de Karl Marks. Malharmonie ĝi aspektas tie. Sed kiom elokvente parolas tiu simpla fakto!

En apudaj salonoj troviĝas longaj tabloj el abia ligno sur kiuj dum la kongresoj manĝas la delegitoj. Tio ankaŭ aspektas strange en tia loko.

La gardisto, maljunulo, kiu akompanas nin, tre pie rilatas al la ĉi-tieaj lokoj. Kiam li eniras iujn ĉambrojn li krucsignas. Jen kapeleto kie la caroj kutimis preĝi; jen la lito, kie kuŝis Napoleono; jen... sed tutan libron oni bezonus verki por priskribi tiujn silentajn atestantojn de mortinta pasinto...

Fluo da pensoj premas mian cerbon: La Rusa Laboristaro posedas tiujn riĉaĵojn. Formalaperis por ĉiam la despotismo kiu ŝtele amasigis ilin. Ĉu la komunistoj sukcesos starigi sociordon, kiu ankaŭ malaperigos mizeron kaj perforton? Jen la problemoj,

kiu senĉese stariĝas antaŭ min. Politike la Proletario venkis; sed ekonomie la venko ŝajnas ankoraŭ malproksima.

Ĉe "Narkompros"  
(Popola Komisarejo de Klerigado)

Mi precipe volis profiti mian ĉeeston en Moskvo por enketi pri la stato de l' popolklerigado. Bedaŭrinde dum aŭgusto libertempas la lernejoj. Mi do ne povis viziti funkciantan lernejon, kaj devis kontentiĝi per la informoj, kiujn liveris gvidantoj de la kleriga fako.

Iun tagon, akompanate de K-do Nekrasov, mi iris ĉe Narkompros. Tie ni eksciis, ke Lunaĉarski estas nun en Kaŭkazo, kie li ĝuas iom da ripozo. Forestas ankaŭ K-ino Uljanova Krupskaja, prezidantino de la Ĉefa Politik-Kleriga Komitato de la Respubliko. La anstataŭanto, K-do Maksimovski, akceptas nin. Li ne parolas france kaj la tuta intervjuo okazos per esp-o. Jen resumo.

"La edukado. Principe la edukado komenca, meza kaj supera estas deviga kaj senpaga. Sed pro materiaj kondiĉoj estas eble nur la komencan instruon aranĝi senpaga, dum la meza estas nun parte pagata. Tamen laŭ lasta decido de Narkompros en tiu ĉi lernoĵaro ankaŭ la meza lernejo estos senpaga. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj Narkompros intencas tion efektiviĝi nepre.

La supera klerigo estas donata laŭ 3 grupoj. 1) Ĉe l' universitatoj ekzistas t.n. laborista fakultato, kiu preparas por fundamenta universitata kurso laboristojn, delegatajn de specialaj komisionoj el sindikatoj. 2) Sukcesinte en la laborista fakultato oni jam povas partopreni en la fundamenta ĝenerala kurso laŭ fakoj. 3) Al la universitato estas krome delegataj por studado

ankaŭ aliaj elementoj (ne laboristoj) el diversaj respublikinstitucioj, partiaj, profesiaj ktp. Ĉi tiuj tri kategorioj ricevas tute senpage loĝejon, nutrandon, kaj studrimedojn.

En tiu ĉi jaro estas provata 4a kategorio, kiu ne devas superi 10-15% de studentaro kaj kiu konsideras la burĝaron: Oni povas tute libere studentigi al la Universitato, sed pagante sufiĉe altan sumon.

Universitatoj. Antaŭ la revolucio ekzistis 9 universitatoj en la tuta lando. Dum la revolucio estis kreitaj pluraj. La plimulto kreiĝis pro lokaj bezonoj kaj deziroj kaj multaj suferis grandan mankon de instruiloj kaj instruantoj. Atentante tutlandan planon, Narkompros malmultigis la universitatojn, pligrandigante la restigatajn. Nun oni kalkulas 15 universitatojn, kiuj pli-malplibone funkcias. En tiu ĉi nombro ne estas kalkulataj la t.n. popolaj universitatoj, komunistaj universitatoj kaj multaj aliaj specialaj kaj ĝeneralaj superaj lernejoj."

Adiaŭonte K-don M. mi prezentis al li unu ekzempleron de S.R. dirante, ke en tiu gazeto aperos la intervjuo. Aŭdante<sup>[4]</sup>, ke nia organo estas redaktata en esp-o mi ekvidis en la okuloj de K-do M. skeptikan rideton. Eble eĉ li pensis, ke li estas perdinta tempon akceptante nin. Tamen oni ankaŭ rajtas supozi, ke la lerta tradukado de K-do N. postlasis bonan impreson pri tiu peresperanta intervjuo.

\* \* \*

\*

La "Proletkult"



En la granda kleriga entrepreno de Narkompros, kio plej interesis min estis la t.n. Proletkult (Proletaria Kulturo). Ĉar Lunaĉarski forestis, oni konsilis, ke mi turnu min al Valerian Polanski, eminenta verkisto, kiu ludis unu el la plej gravaj roloj en tiu artrenoviga iniciato. Komence de l' entrepreno, li estis sekretario de l' Ekzekutiva Komitato Internacia de l' Proletkult, en kiu ni trovas la nomojn de Lunaĉarski (prezidanto), W. Herzog kaj M. Barthel (Germanio), N. Bombacci (Italio), Tom Quelch kaj W. Mac Laine (Britio), War Van Verstreiten (Belgio), R. Lefèvre (Francio), K. Tomann (Aŭstrio), Jon Read (Ameriko), J. Humbert-Droz kaj N. Brindkolf (Svisio).

Nun Polanski estas cenzurestro. La eldonantoj de "La Nova Epoko" kutimas viziti la cenzuroficejon por ricevi permeson pri finfina presado de sia revuo. Iun tagon mi do akompanis Nekrasov al tiu ejo, kaj tie trafis Polanski. Tro okupita li estis por konsenti tiumomente intervjuon. Li petis, ke mi vizitu lin hejme, vespere je la 9a.

Je la difinita horo, Nekrasov kaj mi estis akceptataj en la skriboĉambro de l' verkisto, kiu afable nin regalis per teo.

Polanski komprenas sed ne parolas france. La tuta intervjuo, kiu daŭris de la 9a ĝis la 11½ okazis per esperanta tradukado. Tutan notlibreton mi plenigis. La intervjuato parolis kun entuziasmo. Estis videble, ke li ŝatas tiun temon. Mi provu resumi liajn dirojn.

\*           \*

\*

"La laborista mondo sekvas diversajn vojojn por venki la burĝan movadon kaj atingi sian celon – la universalan komunismon. Naskiĝante kiel profesia kaj kooperativa movado, ĝi malvolviĝas en larĝan politikan movadon.

Sed la malnova mondo subpremas la proletariaron, ne nur sur la politika kaj ekonomia kampoj, sed ankaŭ ĝi tenas la laboristajn amasojn en morala servuteco, per la influo de sia kulturo, bazita sur la principo de l' "sankta" proprajo kaj de l' ekspluatado. Pro tia motivo stariĝos antaŭ la tutmonda proletariato la problemo ne nur konkeri la politikan povon, ne nur rekonstrui sur komunismaj principoj la ekonomian vivon anarki-individualistan de la burĝaro, sed ankaŭ venki la spiritan servutecon, la burĝan kulturon, kies influo tiom sentiĝis dum la imperialisma milito kaj ankoraŭ sentiĝas, malgraŭ la sociala revolucio, ĝis la proletariato, precipe dum la nunaj tempoj, estos devigata utiligi la burĝdemokratian inteligentularon.

La revoluciaj marksistoj ĉiam komprenis, ke la marksismo ne sin limigas je la politika aŭ ekonomia batalo; ĝi estas potenca revolucia movado intelekta, kiu ampleksas la politik- kaj ekonomisciencon kiel siajn konsistigajn partojn. Malgraŭ tio, la politikaj partioj ne sufiĉe atentis la intelektan laboron meze de l' proletariato. Ili serioze ne starigis la demandon, ĝin analizis, nek rilate al la teorio, nek rilate al la organizado.

La instrulaboro, farita de la politikaj partioj, de profesiaj unuiĝoj kaj klerigaj organizaĵoj ne konsistis en kolektado kaj sistemigo de la elementoj de l' proletaria kulturo; ĝi estis nur ordinara ĝenerala kulturo. Oni agis sen kritiko, sen konformiĝo al la proletariaj celoj, la vivo de la laboristaro plifirmiĝis en la malnovaj formoj; ĝi spegulis la burĝan medion kun ties pensmanieroj, sentimentagordoj kaj sociaj rilatoj.

La malnova burĝa mondo ĉirkaŭligis en ĝia tuta vivo la proletaron, per retaro el metodoj, principoj, antaŭjuĝoj. Ĝis nun la proletario ne sin liberigis en siaj sentoj kaj rezonoj el la influo de la burĝa psikologio; ĝis nun la vivo de l' laboristaro tenas per siaj radikoj al la burĝa vivmaniero, kaj tiu morala premado malhelpas la pionirojn de la nova vivo, ke ili libere kaj plene direktu sian revolucion ardon en kreadon de la estonta vivo.

La proletario devas krei sian propran kulturon, kiu fariĝos dum la marŝado de l' tempo, kiam la komunisma socio estos organizita kaj estos malaperintaj la klasoj, tuthomara ĝenerala kulturo.

Nia entrepreno difinas al si kiel celon organizi, t.e. ordigi, sistemigi la proletarian kulturon, kies disaj elementoj estiĝas ĉie, kie la pensoj kaj la sentoj malvolviĝis sur la kampo de opa laborado. La Proletkult konstruas tutan sian programon tiamaniere, ke la proletario povu sin armi per la nova scio, kulturi sian sentilaron per la nova arto kaj rekonstrui siajn sociajn rilatojn laŭ la nova spirito – reale proletaria, t.e. en opa laborista komuneco.

La tasko de l' revoluciintelekta movado estas duparta: En la unua parto ĝi konsistas en liverado al la proletario de la rimedo por rikolti la intelektan heredaĵon, ricevitan de la malnova mondo. Ĝis nun la proletario, kaŭze de politikaj kaj ekonomiaj kondiĉoj, ne havis aliron al tiuj valoraĵoj, kaj tamen estas valoraĵoj kiuj povas esti utiligataj en la rekonstruado de la nova vivo. Sed la proletario devas kolekti la akiraĵojn de la antaŭaj generacioj ne kiel obeema lernanto, sed kritikante ilin post ilia purigo en la hardilo de l' proletaria konscienco.

En sia dua parto la tasko konsistas en intelekta-krea laboro,

t.e. en la reorganizado de la sciencoj kaj artoj (poezio, pentro, skulpto, muziko, teatro ktp.) laŭ novaj principoj proletari-kolektivistaj. Nun sur ĉiuj kampoj, super la proletaria eksperimento neeviteble regas la burĝaj pensmanieroj; tion ni devas ŝanĝi.

K. Marks komencis tiun laboron; la proletariato devas ĝin daŭrigi kaj disetendi sur ĉiujn kampojn de la scio, de l' arto kaj sen helpo de la aliaj sociaj elementoj.

Por ke tiu laboro estu produktiva, estas necese krei taŭgajn kondiĉojn por malaperigi meze de l' proletariato mem la burĝajn antaŭjuĝojn, por ke ĝia verko ne estu ĝenata de la influo de la aliaj popolaj grupoj kaj enhavu en sia malvolviĝo karakteron esence proletarian.

Rilate al tiuj ĝeneralaj celoj, la Proletkult starigas al si specialajn problemojn sur la kampo de la scienco kaj arto aparte. La scienco estas rimedo por la organizado de l' socia laboro. En la manoj de la privilegiaj klasoj ĝi estas super-regad- kaj ekspluatrimedo; en la manoj de la proletariato ĝi devas fariĝi potenca ilo por ĝia lukto kontraŭ la naturo, venkorimedo kaj rekonstruilo de ĝia vivo. La tuta scienca materialo devas esti reesplorata, ne nur vidpunkte de ĝia valoro kaj ekzakteco, sed ĉefe ĝi devas esti ligata per unu sola esplormetodo, por ke la homo povu ricevi ĝustan kaj harmonian koncepton pri la universo. La scienca eksperimentado devas esti ekzamenata je la vidpunkto opa-laborista, sisteme eldirata kaj klarigata konforme al la kondiĉoj kaj postuloj de la proletaria verkado. Tiuj konoj ricevos larĝan disvastiĝon en la popolamasoj, helpe de la proletariaj Universitatoj, sciencaj Laborejoj kaj de la laborista Enciklopedio, en kiu la metodoj, la akiraĵoj de la scienco reorganizota laŭ la proletaria vidpunkto devas esti eldirataj kun

pleja harmonio, amplekso kaj simpla...

Unuvorte la Proletkult devas formi klerulojn, poetojn, kritikistojn, publicistojn, pentristojn, artistojn esence proletariaj; ĝi devas trovi novajn formojn de sociaj rilatoj kaj ellabori proletarian moralon, naskotan en la opa lukto kaj laborado.

La Proletkult estas la intelekta organizaĵo de l' proletario, kiel la komunista Partio estas ĝia politika organizaĵo kaj la profesiaj unuiĝoj ĝia ekonomia organizaĵo. La Proletkult sin bazas sur la industria proletario, kaj ĝia unua ĉelo estas la proletkult de l' fabriko, de iu ajn laborejo. Poste sekvas la korporacioj de la urboj, de la provincoj kaj fine la centra proletkult.

Komprenble tia intelekta kaj artrenoviga movado devas nepre esti internacia. Ni devas krei la internacian Proletkult por atingi la diktatorecon de la proletario ne nur sur la politika kaj ekonomia kampoj sed ankaŭ sur la kampo de la intelekta kulturo."

\* \*

\*

Tiuj deklaroj montras klare la celon kaj planon de la iniciatintoj de l' Proletkult. Aŭdante Polanski mi spertis, ke li estas plene konvinkita; li ne dubas pri la praveco de l' entrepreno. Senhezite, kvazaŭ profete li parolis. Kaj oni ne povas ne admiri la spiritkuraĝecon de tiu pioniro.

Ĉar la proletkultmovado ekzistas jam de kelkaj jaroj mi demandis pri la rezultaĵoj atingitaj. Pri tiu temo P. ne parolis kun tiom da certemeco. Li klarigis, ke nun li ne plu okupas oficon en

la Proletkult kaj pro tio ne povas citi tute precizajn faktojn.

Komence la Proletkult estis tute aparta, sendependa organizaĵo. Ĝi enkalkulis pli ol 500 000 lernantojn. Nun ĝi funkcias en la kadro de Narkompros, kaj tio estas bedaŭrinda, diris P. La Ŝtato postulas praktikan laboron : teatraĵojn, plakatojn<sup>[5]</sup> ktp. Eniris la organizaĵon burĝaj elementoj, kiuj fuŝas la aferon. De post la Nep malgrandiĝis la nombro de studentoj. Oni devis fari severan elekton. La profesiaj unuiĝoj elektas mem en sia medio la laboristojn kapablajn studentiĝi. Tiuj povas dediĉi sian tutan tempon al lernado, sed restas sub la kontrolo de la profesiaj unuiĝoj kun kiuj ili restas en senĉesa kontakto por ne perdi la proletarian influon.

Ŝajnis al mi, ke P. ne estas kontentigita de la rezultaĵoj. Li akcentis plue, ke Rusio ne estas sufiĉe industria lando por ebligi ekfloradon de vere proletaria artsento. La kamparano estas influata de la naturo, la metiisto de la tekniko. Necesas, ke la proletkult-movado enradikiĝu en landoj industriaĵ. Ĝis nun la movado kresketis en Germanio, Italio, Svedio, Ĉeĥoslovakio kaj Anglio. Notinde estas, ke en ĉi tiu lasta lando la Registaro malpermesas la eniron de artaj produktaĵoj el Rusio. Kaj tio pruvas, ke la Angloj komprenas la revoluciigan povon de l' arto. En Francio la movado estas apenaŭ konata, ĉar la tragedie mortinta R. Lefèvre ne povis dissemi la ideon. Pri Ameriko la samo okazis pro la morto de John Read.

Antaŭ ol adiaŭi mian gastiganton, mi demandis lian opinion pri esp-o. Li respondis, ke antaŭ multaj jaroj li lernis la lingvon, sed ĉesis opiniante ke artefarita lingvo ne estas vivpova ktp. Ĉar ĝuste R. Rolland pritraktas tiun punkton en sia artikolo mi profitis la okazon por konigi al P. lian opinion. Nekrasov kaj mi kompreneble varme subtenis nian vidpunkton, kaj fine P.

konfesis, ke eble li eraris. Mi aldiris, ke nia esp.-movado povas ludi gravan rolon en Proletkult. La uzado de logika, sennacieca lingvo nedubeble influas sur la sent- kaj penskapablon. Kaj en tiu simpla fakto kuŝas ebleco de renovigo de l' artoj.

? (N.d.l.kompilinto)Niavice ni parolis pri esp-o same entuziasme kiel P. pri Proletkult. Estis malfrue, ni forlasis la kvietan hejmon de la ĉefcenzuristo, trairante en mallumo grandan ĝardenon. Bojis hundo. Kaj la skeptika diableto, kiun ame mi nutras, flustris al mia orelo: Ĉu proletkultentuziasmulo estas pli aŭ malpli ridinda ol esperantoentuziasmulo?...

Ĉe la sidejo de l' "Proletkult".

Nedubeble la klarigoj de V. Polanski estas treege interesaj, sed ili estas nur teoriaj klarigoj; – kaj ĉefe mi deziris vidi proprokule la rezultaĵojn atingitajn de la Proletkulta Institucio.

Tiucele mi iris kun K-do Nekrasov, mia helpema kaj lerta interpretisto, ĉe la sidejon de l' Centra Komitato de l' Proletkult, kiu staras Vozdvijenka, 16.

Tie oni eniras sen iu ajn formalajo. Forestas deĵorantaj soldatoj. Junulinoj kun cigaredoj ĉe la lipoj petole saltadas en la koridoroj. Senceremonie ni eniras la skriboĉambron de la vic-prezidanto de l' C.K., K-do Tajdiŝ. Afable li akceptas nin, kaj aŭdinte, ke mi deziras vidi funkciajn kursojn, li klarigas, ke bedaŭrinde tio estas nebla. Estas nun la lerneja libertempo. Plie oni ne povas viziti la laborejojn, tial ke oni tie faras diversajn riparojn kaj ŝanĝojn.

Neniu tempo estis do pli maloportuna por viziti. Mi devis rezigne kontentiĝi per la klarigoj, kiujn bonvolis liveri K-do Tajdiŝ. Mi ne raportos ilin, ĉar pliparte tio estus simpla ripetaĵo.

Estas tamen notinde, ke la vic-prez. de l' Proletkult estas laboristo, kiu antaŭ nelonge laboris en fabriko. La prezidantoj K-do V. Pletnev, ankaŭ estis laboristo, lignaĵisto. Tamen, ĉi-lasta verkis la dramon "Lena", kiu trafis sufiĉe atentindan sukceson en la 1a Laborista Teatro de l' Proletkult (Moskvo).

K-do Tajdiŝ klarigis, ke "Lena" estas la nomo de rivero en Siberio, apud kiu troviĝas multaj orminejoj. Tie okazis en 1912 ribelo dum kiu multege da laboristoj estis mortpafataj de soldatoj. K-do Pletnev prenis tiun okazintaĵon kiel temon por sia verko.

Tiu teatraĵo estas verkita, enscenigita kaj ludita nur de proletkultanoj. La ĉi-apudaj bildoj<sup>[6]</sup> montras kiom originalaj estas la scenaj dekoraĵoj. Oni tamen rimarku, ke la aktoroj ne aspektas "kubisme" kiel la dekoraĵoj, kaj tia okulfrapa kontrasto kaŭzas malharmonion. Sed ne estas mia intenco kritiki la "kubismon". Mi simple konfesu, ke mi ne komprenas ĝin.

Nia interparolanto klarigis, ke la celo dum la prezentado estas igi la rigardantaron iel partopreni la ludon. Ifoje la aktoroj trapasas la parteron aŭ la galeriojn. Ili alparolas la publikon, improvizas pri iu aktuala temo kaj ĉiel penas streĉi la atenton. La ludado estas tiel vigla, rapida kaj senhalta, ke kvar scenoj ne daŭras pli ol 1½ horojn.

Kiom mi dezirus ĉeesti tian prezentadon! Sed bedaŭrinde la teatroj somere estas fermitaj. Nur image mi povas prezenti al mi la spektaklon.

Ŝajnas ke ĉio konkuras por ke mi povu nur supraĵe vidi la rusan vivon. Mi foriros kun ŝanĝiĝemaj impresoj, kun neniuj firma juĝo.

Tamen dankata estu K-do Tajdiŝ, kiu bonvolis liveri por nia revuo diversajn gravuraĵojn kaj fotojn. Ti-kiujn mi jam presigis



nedubeble montras laŭdindan deziron forlasi la trapaŝitajn vojojn. Oni ne povas ne admiri la spiritmaltimon de la proletkultanoj. Vigleco, vivanteco, ioma manko de teknikeco karakterizas iliajn verkojn. Tiuj ecoj verŝajne plej taŭgas por krei la antaŭviditajn ĉefverkojn de l' pioniroj de tiu artrenoviga movado. Regas kompreneble certa kaoso. Oni ankoraŭ ne ekvidas precizan direktivon, sed nur fortegan deziron forĵeti la pezan tradicion kaj krei ion novan. Ne dum detrua, liberiga periodo povas kreiĝi ĉefverkoj. – La penado liberiĝi de la malnovo estas eble la plej laŭdinda ĉefverko...

Antaŭ ol foriri el la proletkulta sidejo, ni ankaŭ intervjuis la direktoron de l' Scienca Sekcio, K-don Zander, profesoron de naturaj sciencoj. Tiu eminentulo estas proksimume kvindekjara, aspektas modeste kaj akcepteme. Lia sekretario, altkreska junulo kun duoncinika rigardo ŝajnas esti poligloto:

– "En kiu lingvo mi devas paroli?" li demandis. K-do Nekrasov sciigis, ke mi estas "Franco".

– "Nu, bone, mi parolos france", respondis la interpretanto en franca lingvo kun preskaŭ perfekta akcento.

Ni sidiĝis en komfortan brakseĝegon antaŭ la skribotablo de la Direktoro, kaj jen nia juna "scienculo" komencis veran paroladon pri la grandaj projektoj de l' Scienca Sekcio de l' Proletkult. Ĉiuj fakoj estis esplorataj. Senfine la parolanto klarigis pri ekonomiscienco, pri rilatoj inter la arto kaj la scienco, pri la historia materialismo, pri tutkompreno de l' universo, pri metodologio, tektologio kaj aliaj... logioj. Li detale klarigis pri la densaj programoj, pri... – estis videble, ke la parolanto volis mirigi nin.

Kelkfoje prof. Zander, kiu verŝajne iomete komprenas france, haltigis la parolanton por reĝustigi kelkajn punktojn. Post

mallonga paŭzo la interpretanto rekomencis siajn klarigojn, provante tamen pravigi la negravecon de siaj eraroj.

Kiam la parola torento kvietiĝis, ni demandis la nomojn de la profesoroj de la diversaj fakoj. Tiam ni eksciis, ke la mirinda plano estas nur... plano.

Per pli mallaŭta tono la juna "scienculo" konfesis, ke la Scienca Sekcio ekzistas nur de post kvar monatoj, ke ĝis nun neniu kurso okazis, ke oni nur demandetis al kelkaj profesoroj, ĉu ili konsentus instrui en ia aŭ alia fako, ke la ideoj de l' Scienca Sekcio ne estas akceptitaj de ĉiuj, sed nur de kelkaj organizaĵoj, inter kiuj la Sindikata Konsilantaro Moskva; ni unue devas propagandi niajn ideojn, akcentis nia interparolanto.

Propagando, propagando!

### Skizo pri la rega strukturo

Ampleksan studon oni devus fari por montri la funkciadon da l' nuna regado rusa. Tia ne estas mia intenco. Mi nur desegnu siluetan bildon per la elementoj, kiujn bonvolis liveri S-ano E. Drezen, kiu oficas en la administra fako.

Estas fakto, ke malgraŭ multaj jam publikigitaj studoj pri Rusio oni estas ĝenerale tre nescianta pri la soveta regado. Tial mi opinias, ke tia skizo interesos nian legantaron.

Aliparte estas neforgesinde, ke senĉese la situacio modifiĝas. Novaj dekretoj estas ofte eldonataj. Multaj projektoj pro diversaj malhelpaĵoj restas nur projektoj. Estas nur certe, ke ĉiuj estas konceptitaj por la profito de l' proletariaro, kiu, bedaŭrinde, tro ofte ne kapablas forskui la burĝan, malnovan vivkomprenon kaj tiele malebligas ilian realiĝon. Tial la rusaj gvidantoj eksperimente konstruas laŭeble novan socian ekvilibron,

adaptigeblan al la nunaj cirkonstancoj.

La regorganismoj: La leĝfara povo, kiel ĝi funkcias en la demokratiaj landoj, ne ekzistas. Anstataŭas ĝin la Tutrusia Kongreso de l' Sovetoj, kiu okazas ĉiujare. Tiu Kongreso elektas konstantan komisionon el tri cent membroj, kiun oni nomas Tutrusia Centra Ekzekutiva Komitato de l' Sovetoj, kies prezidanto estas Kalinin. Tiu organismo estas ruse, mallongigite nomata Vcik. Siavice Vcik elektas Praesidium'on (Prezidantaro). Dekretoj anstataŭas leĝojn.

La Sovnarkom (Soveto de popolaj komisaroj) aplikas la ekzekutivan povon. Lenin estas la prezidanto de tiu Soveto. Alia organismo estas la Sovnarĥoz (Soveto de popola mastrumado). La juĝojn aplikas tribunaloj, konsistantaj el popola juĝisto kun du helpantoj. Ĉi-lastaj devas esti laboristoj, kiujn proponas profesiaj sindikatoj. La kasacian povon posedas la popola komisaro por juĝaj aferoj.

Kiel oni vidas, la far- kaj leĝaplika aparato estas sufiĉe simpla. Malpli simpla estas la ekonomia strukturo.

Antaŭ la N.E.P. (Nova Ekonomia Politiko): Dum la jaroj 1918-20 la tuta industrio estis socialigata. Same ĉiuj bienoj. La fabrikoj estis transdonataj al Popolaj Mastrumkomitatoj. 80-90% el la bienoj ekposedis la kamparanaro; 10-20% konserviĝis kiel sovetbienoj, administrataj de ŝtataj terkulturaj oficejoj.

Dum la N.E.P.: La tero restas posedaĵo de l' Regno. Ĉiu povas uzi la teron, sed neniu rajtas ĝin vendi. Ŝtataj terkulturaj oficejoj distribuas la teron. Luo de tero povas okazi en certaj kondiĉoj. Ekzemple, edzino povas ludoni la teron de sia mortinta edzo por nutri la infanojn.

Ekzistas ŝtataj sovetbienoj<sup>[7]</sup>, kiuj servas kiel modelaj stacioj. Lastatempe oni ekstreme zorgis pri altigo de ilia nivelo de

mastrumado.

La granda, "peza" industrio restas je la dispono kaj posedo de l' Ŝtato, kiu starigis la specialajn trustojn por ĝia administrado. Malgrandaj fabrikoj povas esti fondataj kaj gvidataj de privataj personoj aŭ kompanioj. La malnovaj, antaŭe socialigitaj entreprenoj, povas esti je certaj (plej diversaj) kondiĉoj ludonataj de la ŝtato al privatuloj.

La Komerco: Ĝi estas preskaŭ absolute libera, ekskluzive oraĵoj, kiuj povas esti vendataj nur al la Ŝtato.

La Ŝtato, trustoj, sindikatoj kaj apartaj regnaj institucioj starigas siajn magazenojn por konkuri<sup>[8]</sup> kun la privataj entreprenoj. La celo estas starigi potencon ŝtatan komercaparaton, kiu estru la borson kaj obeigu al si la tendencojn de la malpli potenca komercistaro.

Valuto-financoj: La kurza falo iom post iom haltiĝas. La kaŭzoj estas: 1) firma budĝeto; 2) pligrandigo de la enspezoj; 3) malpligrandigo de la elspezoj, kaŭzata de la malpligrandigo (trifoja) de la armeo, de la ŝtata oficistaro, likvido de malprofitaj entreprenoj kaj ilia transdono al privatuloj.

Interesa, notinda iniciato estas la grenobligacioj, kiuj estas eldonitaj je 10 milionoj da ekzempleroj kaj venditaj ĉiu po unu pundo (16-17 kg) da greno. Ĉar la rikolto estis sufiĉe bona tiu spekulacio bone prosperis.

La ruĝa armeo. Pri la strukturo de la soveta regorganaro ne decus forgesi noti la ruĝarmeon. Ĝi estas klasa armeo: 52% da oficiroj estas ĉu laboristoj ĉu kamparanoj; 48% estas antaŭaj oficiroj de la carismo. Multaj iamaj generaloj, sub certa kontrolo, laboras en teknikaj fakoj. Ekzemple, Brussiloff, kies filo estas mortigita de Denikin'anoj.

Regas disciplino, ordo. La ruĝarmeanoj konscias pri la bezono

kaj celo de tiu defenda organo. – Organo, kiu ne nur defendas la sendependecon de Rusio, sed plie estas iel je la servo de la mondrevolucio en oportunaj cirkonstancoj.

Kvankam regas dum la deĵorado severa disciplino, ekster tiu tempo la ruĝarmeanoj estas civitanoj samrajtaj kiel la civiluloj. La soldatoj, promenante en la urbo ne salutas renkontatajn ĉefojn, kiel okazas en la aliaj landoj.

Parolante pri K-do Rozenblat, mi jam notis, ke oficiroj kaj soldatoj estas vestitaj per samaspekta uniformo. Precipe la ĉapo aspektas strange. Ĝi havas formon de kasko sur kiu kuŝas malalta, ronda kamentubeto. Tiu formo memorigas pri la mezepokaj kaskoj.

La militserva tempo daŭras 1½ da jaroj. Ĉiu 16-18-jaraj junuloj devige antaŭpreparas sin por la militservo.

### La salajro en Moskvo<sup>[9]</sup>

Tarifa sistemo enhavas 17 kategoriojn rilate diversan kvalifikon de laboristoj. Salajro de 1a kategorio rilatas tiun de 17a kategorio, kiel 1:7. La registaro dekretas ĉiumonate tarifon, kiu estas minimumo, sekve neniu rajtas pagi malpli, ol la dekretitan sumon. Tiu minimuma tarifo estas publikigata por 3 grupoj. La 1an grupon eniras laboristoj de metalindustrio, minejoj, elektroteknika industrio, transporto, poŝto, telegrafo; la 2an grupon eniras laboristoj de kemia kaj konstrua industrioj; fine la 3an grupon eniras laboristoj de ceteraj industrioj kaj de komisarejoj<sup>[10]</sup>.

Bazante sin sur minimuma tarifo, profesiaj unuiĝoj (sindikatoj) ellaboras ĉiu por laboristoj de sia faka industrio tarifojn por apartaj laborejoj, plialtigante la tarifon depende de

ekonomia stato de tiuj lastaj; ju pli firma estas la ekonomia situacio, des pli proksimiĝas la tarifo al plena kontentigo de vivbezonoj de laboristo.

De privataj entreprenoj la profesiaj unuiĝoj postulas por laboristoj salajron, plene kontentigantan iliajn vivbezonojn. La tarifo estas fiksata per speciala "kolektiva kontrakto" inter laboristoj kaj administracio de laborejo, kion peras la sindikatoj kaj al kiuj apartenas la rajto leĝe firmigi tiujn kontraktojn.

La ĉi-suba tabelo montras diversan grandecon de salajro dum septembro 1922.

kategorio	Monata salajro			Salajro en iu entrepreno de kemia industr. fiksita per kolektiva kon.
	1a grupo	2a grupo	3a grupo	
1	1 11550000	9900000	8500000	38800000
6	2 23100000	19800000	17000000	76800000
9	4 46200000	39600000	34000000	153600000
15	6,1 70455000	61391000	51850000	188160000
17	7 81620000	69300000	60200000	268800000

Por ilustru tiujn ciferojn, ni citu kelkajn prezojn, kontrolitajn por 1a de Septembro.

1 kg. da tritikpano ..... 150000

1 kg. da sekalpano .....	375000
1 kg. da viando .....	2500000
1 kg. da sukero .....	4000000
1 kg. da butero .....	6500000
1 kg. da terpomoj .....	175000
1 paro da virŝuoj simplaj .....	18000000

Al tiu salajro estas aldonenda la "paiok", t.e. naturajoj, konsistantaj el faruno, viando k.a. manĝaĵoj.

### La loĝejoj

Ne temas esplori ĉu ili estas komfortaj kaj puraj, sed nur ekkompreni kiel funkcias la uzado kaj konservado de ili.

Ekzistas sovetdomoj kaj sovethoteloj, mastrumataj de la Ŝtato; aliaj estas sub kontrolo de mastrumoficejoj, kiuj luas la loĝejojn.

La amplekso de loĝejo por ĉiu persono estas limigata.

La loĝantoj de ĉiu domo luprenita de mastrumoficejo formas inter si loĝejan kooperativon, kiu prizorgas kaj riparas la domon. 15-20% da spaco loĝeja restas je la dispono de la komunumo, kiu uzas ĝin por laborantoj, bezonantaj loĝejon.

Malgrandaj dometoj povas esti luataj al privatuloj.

### La Muzeoj

Ĉiuj, eĉ la egaj kontraŭuloj de l' bolŝevikoj, konfesas, ke Lunaĉarski ĉiel penis por konservi la artajn riĉaĵojn kaj sukcesis plene. La kolektaĵoj ĉu de granddukoj ĉu de riĉuloj apartenas nun al la regno kaj estas zorge aranĝitaj kaj konservataj. Tiuj kolektaĵoj estas nun je la vida dispono de ĉiuj havantaj cent mil

rublojn.

Efektive, oni devas pagi por viziti la muzeojn. Sed la prezo estas tre malalta, se oni konsideras, ke fundo da piroj kostas unu milionon. Estas do pli malkare regali siajn okulojn per vido de artaĵoj ol sian palaton per fruktoj.

Nur du muzeojn mi vizitis: la Tretiakofgalerion kaj la antaŭnelonge starigitan Tolstojmuzeon.

La Tretiakofgalerio enhavas mirindaĵojn. Multaj ĉi-tieaj pentraĵoj estas mondfamaj, kiel ekzemple tiu, prezentanta la caron Ivan la Terura post kiam li estas mortiginta sian filon. La tuta historio de Rusio estas tie rakontata de pentristoj.

Mi rimarkis ankaŭ kelkajn pentraĵojn de Francoj, inter kiuj mi notu la nomon de Carrière kaj Monet.

Kompreneble mi ne priskribos la tieajn artajn riĉaĵojn. Cetere mi devas konfesi, ke la vizitantoj pli interesis min ol la vizitaĵoj. Estis dimanĉe. Videble la plimulto da ĉeestantoj estis laboristoj. Emociite mi admiris kiel serioze, studeme kvazaŭ religisente ili rigardadis kaj sintenis en tiu sanktejo de l' arto.

La rusa popolo tiel longe tenata en malklereco per la carismo havas nun egan deziron kleriĝi, akiri la tutan sciencon, kiu faros el ĝi la indan gvidanton de ĉiuj aliaj popoloj. Mi konfuze sentis tion kaj dolĉiĝis miaj aliaj akraj, malbonaj impresoj.

\* \* \*

\*

Alian dimanĉon mi vizitis kun K-do Polakov la Tolstojmuzeon. Ĝi konsistas plejparte el fotoj, montrantaj la mortinton sub diversaj aspektoj. Ĉiam severa, malkvietaspekta,



neridema vidiĝas la apostolo de Jasnaja Polanja. El la kelkcentoj da fotoj, kiujn mi rigardis, nur du montras rideton sur la vizaĝo de Tolstoj. Kaj en ĉi tiuj du okazoj li estas kun infanoj.

En angulo, granda statuo el griza ŝtono montras la famulon en lia kutima sinteno: Li staras, estas vestita per bluzo ĉirkaŭligita per ŝnura zono; liaj manplatoj sin apogas kontraŭ la korpo kaj la dikfingroj rajdas sur la zono; la brovoj elstaras kaj kaŝas tute la okulojn. Tiu viro aspektas kvazaŭ forto el la naturo ĵetita sur la teron por doni iun orientadon al la ordinaraj homoj...

Pendas ĉe la muroj portretoj, prezentantaj Tolstoj'on dum diversaj periodoj kaj scenoj de lia vivo. Pentraĵo montras lian bienon en Jasnaja Polanja.

En iu ĉambreto troviĝas diversaj specimenoj de lia postmorta masko. Vidante tiun ĉi objekton oni povas supozi, ke la morto alportis pacon al la nobla, ĉiama spiritmalkvietulo: La trajtoj ne plu estas malglataj, hirtaj, sed dolĉigitaj, pacigitaj...

En montroŝrankoj troviĝas diversaj eldonoj de lia verkaro. Mi rimarkis unu libron en esp-o.

Oni finas la viziton en ĉambro, samforme, samaspekte aranĝita kiel tiu, kie mortis Tolstoj. Jen la lito, jen lia valizo; lia peza mantelo pendas alkroĉita ĉe la muro. Eniras dolĉa lumo. Impresiga, sugesta estas la kadro. Oni kvazaŭ sentas, ke la animo de l' nobla mortinto enfiksiĝis en la ĉi-tieaj objektoj. Iu desegnigis sur la muro la linion de la omibro, kiun faris la korpo kuŝanta en la lito.

Skribinte en la vizitlibro kelke da dankaj vortoj al la Soveta Registaro, kiu ebligis la starigon de tiu pia memorilejo, mi foriris kun emocio preskaŭ religia... Tolstoj. Lenin. Du gvidantoj de la homaro. Kaj tiel malsimilaj! Unu senĉese estis okupata pri la moralaj enmemaj problemoj; la alia juĝas ĉion laŭ la marksisma

vidpunkto, kiu instruas, ke la ekonomia medio kreas nian moralecon. La unua atentis ĉefe pri la individuo; la dua pri la socio.

Kiu pravus?

## Skismanoj

Elirinte el la Tolstoja Muzeo, K-do Polakov kondukis min en la preĝejon "Jesuo Savanto". Ĝia tuta internaĵo estas el marmoro diverskolora. Alta kupolo, ekstere orumita, kovras ampleksan spacon, kie povas kolektiĝi miloj da personoj.

Okazis diservo. Mia gvidanto klarigis, ke tie la diservantaj pastroj estas skismanoj el la t.n., antaŭ nelonge fondita, "Viva Eklezio". Nune okazas en Moskvo konferenco de tiaj ekleziuloj, kiuj reprezentas proksimume la trionon de la tutruslanda Ekleziularo. Tiu sciigo vekis ĉe mi intereson kaj mi demandis K-don P. pri la kialoj de la skismo.

La reakciema pastraro kaŝe ĉiam kontraŭstaris la sovetan regadon. Okazis dekreto pri rekvizicio de ĉiuj nebezonataj por diservo objektoj, por ke ili estu vendataj je profito de la malsatuloj.

La eklezia estro, patriarko Tiĥon, kontraŭstaris tiun dekretan kaj provis instigi ĝeneralan ribelon kontraŭ la Registaro. En kelkaj lokoj okazis imponaj demonstradoj de kreduloj, instigataj de la pastroj. La Tiĥonanoj eble estus sukcesintaj en sia entrepreno, se multaj pastroj ne estus malobeintaj la ordonojn de la patriarko. Tiuj pastroj subtenis la dekretan kaj helpis al la rekvizicio. Tiel skismo estiĝis. Kompreneble la Registaro ne malfavoris tiun movadon kaj Tiĥon estis devigata transdoni la estradon de la Eklezio al Supera Estraro, konsistanta el pastroj

akceptantaj la sovetan reĝimon. La ĉefo de tiu estraro estis la episkopo Antonin. Granda nombro da reformemaj pastroj grupiĝis ĉirkaŭ Antonin, kaj tiel estas fondita la "Viva Eklezio". Tiuj "viveklezianoj" deklaris, ke ili intencas forigi el la Eklezio la reakciemajn elementojn kaj plie simpligi la diservojn, tiel farante ilin pli kompreneblaj (?!) al la malkleruloj.

Dum la en Moskvo okazinta konferenco ili faris la jenan deklaron:

"La malamikoj de l' laborist-vilaĝana registaro estas ankaŭ malamikoj de l' novigata Eklezio. "Viva Eklezio" kontraŭstaras la kapitalismon kaj ekspluatadon de l' laboro."

"En sia agado "Viva Eklezio" sin apogas sur vilaĝanan pastraron, kiu estis ĉiam premegata de episkopoj, monakoj kaj vilaĝaj burĝoj."

"Fakto reala, nekontestebla kaj neŝanĝebla estas la disigo inter la Eklezio kaj la Ŝtato. Inter ili ekzistas neniu ponto. Ĉiu iras sian propran vojon."

Sed malgraŭ ŝajna unuanimeco la skismanoj ne interkonsentis pri ĉiuj demandoj. En la skisma "Viva Eklezio" naskiĝis dum la konferenco mem alia skismo. La episkopo Antonin iniciatis pli progreseman grupon, kiu titoliĝas "Eklezia Renesanco". Tiam la "Viva Eklezio" decidis la eksigon de Antonin.

Sed ŝajnas, ke tiu episkopo estas elturniĝema kaj multimema viro. La anatemojn de la "Viva Eklezio" li rebatos per tiuj de la "Eklezia Renesanco". Kiu kredulo povas nun scii kie estas la vera Eklezio?...

La religia potenco malnova ŝanceliĝas. Ĉu ĝi falos kiel falis la carismo? La grandaj skuoj de la Revolucio ne ankoraŭ senmoviĝis. Falas kadukaĵoj. Nova mondo naskiĝas en ruboj kaj

detruaĵoj. Kiel fartos la naskiĝinto?

Atentu! gigantaj vartistoj: Lenin, Trocki, k.a....

\* \* \*

\*

## Ĉe Vegetaranoj

Unuhora veturado per vagonaro, poste duonhora piedirado tra kampoj kaj jen, K-doj Nekrasov, Demidjuk kaj mi alvenas ĉe la vilaĝo Tajninskoe apud Moskvo. Tie troviĝas vegetarana laborkolonio. Ĝi konsistas el 37 personoj, el kiuj 20 infanoj ambaŭseksaj. La kolonianoj okupas sin per diversaj laboroj, ĉefe per terkulturado. Tie estas presata "La Nova Epoko". La infanoj estas instruataj ĉe la kolonio.

Nin akceptis S-ano Szabuniewicz, animo de la kolonio kaj eldonanto de "Teristo". Altkreska, nudpieda, nudkapa, san- kaj energiaspekta estas nia gastiganto. Flue kaj bele li parolas en esperanto. Sed esp-istoj estas en la kolonio. Nia lingvo ne estas lernigata al la infanoj. Mirigite pro tio mi demandis amindan junulinon, la instruistinon, se mi ne eraras, kaj ŝi respondis: "Esp-o ne povas nun utili al ili; tia instruado estus do sencela..."

Stranga vidpunkto! Mi opinias male ke esp-o devas esti la bazo mem de vere humana, sennacieca edukado. Doni al infanoj ilon, ebligantan interkonatiĝon kun individuoj el la tutmondo ŝajnas al mi la gravaĵo en nia esp-a movado kaj nepra necesajo en vere humaneca instruado. Nur tiel oni povos sennaciigi la menson de la venontaj generacioj.

Kaj mi demandas min: Ĉu tiuj kolonianoj ne tro atentis pri la oportunaĵoj de la kolonio? Ĉu ili ne emas malampleksigi sian

mondkomprenon proporcie al la rondeto en kiu ili vivas? Ĉu tiu pacaspekta oazo estas kvazaŭ nacieto fermata al eksteraj fluoj? Mi tre deziras ekscii pri tio.

Tiujn enmemajn demandojn mi ne komunikis al mia interparolantino. Mi silentis, aŭskultante ŝian muzikan voĉon. Estis belvetero. Forte ĝuante la pacigan kadron, la kvietigan atmosferon de tiu kampa loko, mi lasis min konduki al ia reva regiono. Kial diskuti? Estas multe pli agrable revii...

Ŝajnas, ke la spirito de Tolstoj vivas en la kolonio. Volonte mi restadus ĉi tie. Sed ĉu la bildo, kiun image mi prezentas al mi respondas al la realeco?

Mi demandis S-anon Szabuniewicz, ĉu li estas kontenta pri la funkciado de la kolonio.

– Ne tute, respondis li. Por ke ĉio bone prosperu estus necesa nur unu sola estro al kiu ĉiuj obeus. La ideala regado de la kolonio estus ia monarkio. Pro nia demokratio, liberecana mastrumado, okazas kelkfoje, ke rikoltado ekzemple malprosperas, tial ke, je la taŭga momento, ne konsentis ĉiuj kolonianoj partopreni urĝan laboron. Iuj, ne pro malbonintenco, sed verŝajne pro nekompreno, ne konscias pri urĝeco de iuj taskoj. Sed, aldonis S-ano S., ni tamen ĉiuj vivas pace kaj en sufiĉa bonstato – konsidere la nuntempon...

La eldonanto de "Teristo" estas entuziasma partiano de la socialista sistemo de Henry George. Ĉiuj socialistoj pli malpli scias, ke tiu sistemo forigas ĉian rajton je mastreco de l' tero. Kiel la akvo kaj la aero, la tero apartenu al ĉiuj. La amerikana socialisto konsentas nur pri rajto je transportebla propraĵo kaj rezultaĵoj de l' laboro. Por reĝustigi ĉion en la socio sufiĉus anstataŭigi ĉiujn impostojn per rento, difinota laŭ la valoro de la okupata tero kaj pagota de la okupanto.

En okpaĝa broŝureto Szabuniewicz koncize klarigas sian komprenon pri la efektivigebleco de la doktrino de Henry George. Ĉio okazus pace, senperturbe kaj venos "la regno de Dio" sur la teron.

Mi ne longe cerbumis por kompreni la "terismon". Pro tio mi ne intencas kritike rilati al ĝi. Tamen ĉe mi tuj estiĝas jena penso: kie troviĝas la instigilo, kiu movos la popolamasojn por apliki tiun sistemon? Ĝi povas allogi nur religiemajn idealistojn, ne la tutan proletaron. En la Marksana doktrino oni trovas solidan bazon: la klasbatalon. Ĝi estas fakto, ne teorio. Sekve la taktiko konsistas simple en utiligado de tiu klasbatala fakto por igi la kapitalismon "akuŝi" socialismon.

Sed niaj pacemaj Tolstojanoj ne konsentas pri klasbatalo. Ili ne volas rezisti perforte la perforton.

En tiu mia konstato ili vidu nenian riproĉintencon. Mi ne dubas pri ilia sincereco – kaj sinceruloj ne meritas riproĉon. Tre atentemaj pri la morala vidpunkto ili, miaopinie, ne sufiĉe taksas la ekonomian faktoron. Sed, bedaŭrinde, estas vero, ke kompanse la marksanoj malprave atentis ne sufiĉe pri la moralaj fortoj...

\*            \*  
\*  
\*

Ligna domo. Apuda teraseto kun tegmento kaj ĉirkaŭbarilo. Ombrioriĉaj arboj. Sesope ni sidas ĉirkaŭ tablo provizumita per bongustaj vegetaĵnutraĵoj.

Miaj gastigantoj tre deziras ekscii pri miaj impresoj. Kvankam ili ne estas tre bonaj, ŝajnas, ke, laŭdire de miaj kunmanĝantoj,

mi ne vidis la bildon sufiĉe nigra. Oni ne ŝatas la bolŝevikan reĝimon ĉi tie...

– Vi devus demandadi kamparanojn, proponis S-ano Szabuniewicz.

– Volonte.

Nu, manĝinte, ni vizitos iun "muĵikon", loĝantan proksime de ĉi tie.

## Ĉe kamparanoj

Alvenante ĉe la kamparano ni renkontis lin en lia korto. S-ano S. klarigis, ke mi estas "Franco", alveninta Moskvon antaŭ du semajnoj kaj deziranta interparoli kun iu "muĵiko".

Tiu ĉi estas altkreska, fortika viro kun longa nigra barbo, longaj haroj kaj malgrandaj okuloj. Parolante li faras gestojn kaj en lia sendenta buŝo vidiĝas salivŝaŭmo. S. resume tradukas liajn dirojn. Unue la kamparano volas scii, ĉu mi apartenas al iu politika partio. Aŭdinte, ke mi estas komunisto, li fariĝas sindetenema kaj tuj diras, ke ĉiuj partioj estas malbonaj. Nur afero estas necesa: labori. La partioj disigas la homojn.

Mi rimarkigis, ke ankaŭ la religioj disigas la homojn kaj okazigas iafoje furiozajn batalojn. Nu, tiaokaze la religio ankaŭ estas malbona, iom embarasigite respondis la kamparano...

– La Registaro forprenas ĉion, dum ni malsatas. Ĉiu devas labori kaj ĝui sian laborprodukton, li ripete akcentis.

Mi diris, ke tia estas ĝuste la devizo de l' komunismo. Li konsentis kun la devizo, sed aldonis, ke la komunistoj, kiujn li vidis, ne laboras, estas nur "sinjoretoj" bone vestitaj...

Ĉar mia interparolanto ne povis ne scii, ke ĉe la najbara kolonio oni eldonas gazeton kaj instruas infanojn, mi demandis

ĉu li konsideras tion kiel laboron. Li konsentetis, sed, miaopinie, tute ne estis konvinkita pri tio. Kredeble estas ĉe nia "muĵiko" iom da suspekto pri tia laboro. Kvazaŭ rekantaĵe li ripetis:

– Ĉiu devas labori... Venu iu, kiu diros tion, kaj al kiu ĉiuj obeos.

– Venu iu Mesio, mi konklude respondis, konstatante ĉe tiu kamparano mesianisman menson...

\*        \*

\*

Mi vizitis alian kamparanon, junan viron, kiu dum kelka tempo laboris en fabriko kaj revenis ĉe la kamparo pro manko de laboro. Lia domo el ligno, kiel ĉiuj ĉi-tieaj domoj, estas sufiĉe agrabla kaj pli loĝinda ol kelkaj kamparanaj domoj, kiujn mi vidis en Normandio kaj Bretonio. Sed oni rimarkigis al mi, ke ĉi tiu vilaĝo, proksima de Moskvo, tre malsimilas la aliajn, troviĝantajn malproksime de urboj. En tiuj vilaĝoj la "isbas" (dometaĉoj) estas malgrandaj kaj staras proksime unuj de aliaj. Kiam okazas incendio (proksimume ĉiudekjare), ĉiuj domoj en la vilaĝo forbrulas. Se kleruloj atentigas la kamparanojn pri la danĝero de tiu proksimeco, ĉi-lastaj respondas: "Mia patro konstruis tiel, nia prapatro ankaŭ konstruis tiel, ni devas fari same." Kaj ili rekonstruas domojn ĉe la sama loko.

Demandite pri kio li plendas, la juna kamparano respondis, ke li deziras pruntepreni monon por aĉeti bovinon, kiel estis fareble sub la cara reĝimo ĉe kreditbankoj...

Mi plene konsciis, ke ĉiuj miaj demandoj neniel povos konigi al mi la veran situacion de la rusaj "muĵikoj". Estus necese vivi



longatempe inter ili. Mi plue memoris, ke en Francio la kamparanoj kutimas ĉiam plendi interparolante kun urbanoj. En Rusio mi supozas, ke okazas same...

### La hotelo "Lux"

Ĉi tie estas gastigataj oficistoj de Komintern kaj delegitoj. Iuj havas apartan ĉambron, aliaj loĝas kelkope en la sama. En mia ĉambro ni estas kvar personoj. Sed en realeco estas multe pli da loĝantoj. Tiu ĉambro estas vera cimejo. Estis al mi neeble dormi en la lito kaj pasigis la noktojn sur kanapo, kie estis malpli da sangavidaj bestetoj. Komforto mankas: nur unu lavmeblo, kompanse estas telefonaparato. La hotela materialo estas ne bone zorgata. Ekzemple, la seruro de nia ĉambro tute fuŝfunkciis. Okazis, ke oni devis stari antaŭ la pordo tri-kvar minutojn, ĉiel provpenante ĝin malfermi per la ŝlosilo. La pordoj de la necesejoj estas difektitaj kaj ne povas esti fermataj. Rompitaj estas la levseĝoj. Ĉio estas malpura...

Ekzistas ĉi tie stranga kutimo: oni prefere laboras aŭ promenas nokte; tage oni dormas. Miaj kunloĝantoj enlitiĝas ĉirkaŭ la dua postnoktmeze kaj ronkas ĝis la 10a matene. Ili legas aŭ skribas je la elektra lumo kaj dormas dum alloge ridetas la suno. Estas la Moskva kutimo!...

Ĉe la unua etaĝo troviĝas legejo, kie ĉiulingvaj gazetoj (komunistaj aŭ burĝaj) estas je la dispono de la gastoj. Tiu loko estis salono, kiu vidigas postsignojn de antaŭa brilego. Blankhara virino mastrumas la legejon kaj havas fieran sintenon de mondumolino. Tre interesus min koni ŝian historion. Mil supozojn mi faras. La Revolucio faris tiom da ŝanĝoj!...

Ĉe la teretaĝo troviĝas restoracio. Ĝi estas malfermita de la

16a ĝis la 18a, kaj de la 21a ĝis la 23a. Oni alvenas, sidas ie ajn. El kajereta manĝrajtigilo oni detranĉas folion, liveras ĝin al kelnero kiu poste alportas nutraĵojn. Ne estas menuo, ĉiu ricevas samspecan manĝaĵon. Nigra pano laŭvole prenebla kuŝas sur la tablo. Oni ankaŭ povas mendi laŭvole malfortan teon. Nek bongustaj, nek abundaj estas aliaj nutraĵoj. Ĉe la dua manĝo oni ricevas plian porcion por la morgaŭa matena manĝo, kiu okazas en la ĉambro. Por tiu manĝo, teo kaj sukero estas liverataj por dek kvin tagoj. Ĉio okazas kiel en kazerno. Malfacile mi povus alutimiĝi al tia reĝimo. Ofte mi koleris pro tedaj klopodoj. Por ricevi la bezonan manĝrajtigilon plurfoje mi devis iri ĉe la kontoro<sup>[11]</sup> – kie cetere estis neeble min komprenigi. Dum kelkaj tagoj oni liveris al mi nur provizoran rajtigfolieton. Plurfoje venis K-do Nekrasov interprete klarigi mian specialan situacion. Pasis unu semajno antaŭ ol ĉio estu en ordo: Ĉu burokratio, neebla interkompreniĝo, indiferenteco de la oficistaro, "nitĉeveco"?...

Fulmotondro ! ofte bolis mia sango...

Ĉe la restoracio min tre interesis observadi la gastojn: ĉiujn tipojn, ĉiujn kostumojn, ĉiujn lingvojn. Kelkfoje mi manĝis sidante apud la japana delegito, K-do Katajama. Mi tre deziris demandi lin pri la situacio en lia lando. Neeble. Interkomprenigilo mankis. Per gestoj mi rilatis al la kelneroj. Mi povas diri nur: "ĉaj" (teo) kaj ne riskus voki per la tiel ofte uzata vorto: "Tovariŝĉ" (Kamarado), kiu estas treege malfacile prononcebla per buŝo kutimanta paroli france.

Preskaŭ ĉiuj fumas ĉi tie, kaj virinoj konkuras kun viroj. Kelkaj virinoj por montri kiom ili emancipiĝis, havas virseksan, senzorgan, sendecan teniĝon. Kaj tio estas simple groteska.

Jen antaŭ mi sidas junulino. Ŝi apogas la kubutojn sur la tablo. Ŝi maĉas pecon da nutraĵo kaj inter du maĉoj ekblovigas fumon

el sia cigaredo; poste metas ĝin sur la tablon, denove maĉas kaj ree ekfumigas sian cigaredon. Kaj tio daŭros ĝis la fino de l' manĝo. Neniu koketgesto vidiĝas ĉe tiu viriĝinta fraŭlino. Kiaj pensoj loĝas en tiu virina kapo? kiaj sentoj en ŝia koro? Eble tiun teniĝon instigas nur la deziro plaĉi per tia afekto, kiu vidigas, ke ŝi plene liberiĝis el la tiom riproĉitaj burĝaj antaŭjuĝoj.

Alpreninte la malvirtojn kaj la mankojn de viroj, iuj virinoj sendube opinias, ke ili liberiĝis. Kompatindulinoj!...

Ĉe alia tablo estas gejunuloj. En ilia sidmaniero estas malfacile distingi ilian sekson, ĉar la viroj havas longajn harojn kaj la virinoj mallongajn. La vestaranĝo estas preskaŭ sama. Kaj ĉiuj konkure fumadas.

Sed kelkloke estas pensemaj vizaĝoj; brilas inteligentaj okuloj; trairas, malatentante ĉion, decidemaj individuoj. Ili sendube portas gravajn respondecojn. Estas apostoloj de l' komunismo...

\*           \*

\*

Iun tagon venis por min intervjui redaktoro de "Rosta" (Zentral Information) K-do Abraham Katz. Li parolas ruse, germane kaj hispane sed ne komprenas france. Tiakondiĉe intervjuo estis neebila. Per gestoj kaj kelke da internaciaj vortoj, mi komprenigis, ke ne malproksime loĝas esperantisto, K-do Nekrasov, kiu povos interpreti. Ni decidis ekiri al li. Survoje, post kelkminuta marŝado, ni bonŝance renkontis K-don Futerfas. Mi klarigis al li la okazaĵon, kaj triope ni revenis ĉe la hotelo. Futerfas majstre tradukis rusen ĉiujn demandojn kaj respondojn.

La intervjuanto demandis pri mia misio en Rusio, pri miaj

impresoj, pri S.A.T., pri la Frankfurta Kongreso, kies telegramo estis antaŭ nelonge ricevita ĉe Komintern.

Nia esp-a movado tre interesis K-don Katz. Aŭdante la fluan tradukadon de Futerfas, li ne povis dubi pri la facilparolebleco kaj belsoneco de nia lingvo. Sed eksciante, ke S.A.T. enhavas nur 2000 membrojn lia intereso malvarmiĝis. Ni penis klarigi, ke ĝis nun esp-o precipe disvastiĝis en religiemaj kaj pacifistaj rondoj, ke S.A.T. ekzistas nur de unu jaro. Malgraŭ tiaj klarigoj estis videble ĉe la mieno de la aŭskultanto, ke ili ne forigis la fakton, ke nia revolucia esp-o-movado estas ankoraŭ malforta.

Pri tio la kamaradaro bonvolu pripensadi; mi ne dubas, ke ili alvenos al tiu mia konkludo: La gvidantoj de la revoluciaj organizaĵoj atentis nian movadon, nur kiam ĝi estos... atentinda – pro sia bona organizo kaj multmembreco. Al tio ni celadu. Ni ne esperu pri iuj ajn decidoj de komisionoj pli malpli kompetentaj, aŭ rezultantaj el intrigado kaj hazardo.

\*        \*  
\*  
\*  
\*

Ĉar estis malagrabla al mi kunloĝadi kvarope en ĉambro, kie ripozon kaj solecon ĝui mi ne povis, K-do Demidjuk proponis, ke mi venu en lian hejmon. Mi akceptis, kaj tie trovis plej afablan kaj bonkamaradecan gastigadon. Jam forpasis sep monatoj. Hodiaŭ estas agrable al mi denove danki al mia gastiginto kaj al lia edzino. Esp-o estas nedubeble forta ligilo kaj interamikiĝilo.

Se mi ne kunportis el Rusio kuraĝigajn impresojn pri la efektivebleco de l' komunismo, kiel teorie oni ĝin prezentas al

si, mi almenaŭ revenis pli konvinkita ol iam ajn pri la granda signifo de mondlingva movado. Por pripensema spirito ne povas esti ia dubo pri tio.

\* \* \*

\*

Ĉe kamarado "?"

Telefonsciigite pri mia vizito, K-do "?", je la difinita horo, akceptis min en sia loĝejo. Interpretiston ni ne bezonis: mia gastiginto parolas france, germane, angle, svede, arabe, kaj mi ne scias kiom da aliaj lingvoj. Kun perfekta akcento li parolas la francan lingvon; malofte mi rimarkis ian fremdecon en lia francelingva parolmaniero. Mi eĉ demandis min, ĉu mi rimarkus tiun fremdecon, se mi ne sciis, ke mia interparolanto estas Ruso, ne Franco? La Slavoj ja havas specialan kapablon por lerni lingvojn. Mi do gratulis K-don "?" pri lia perfekta scipoveco de l' franca lingvo:

– Nu, respondis li, tio klarigas al vi, kiel "bolŝevikoj" povas restadi en Francio, malgraŭ la severaj ordonoj de Poincaré, neniel altirante atenton pro la fremdeco de sia parolmaniero.

Cetere, estas fakto, ke malgraŭ ĉiaj baroj kaj malfacilaĵoj ni povas iri kaj restadi en ĉiuj landoj. Jam sur la ŝipo vi eksciis, ke mi revenas el Hindio. Tie, kompreneble, mi ne estis kiel Ruso, sed kiel "honestaj" franca burĝoj...

Ni ridis, – kaj la edzino ekpreparis samovaron.

– Kiajn impresojn vi ricevis dum via restado en Moskvo, kun demandema rideto demandis min la ruza trompisto de l' burĝaj policoj? Mi supozas, ke vi malfacile klarigas al vi la ĉi-tiean

situacion, ĉu ne vere?

Senhezite kaj malkaŝe mi konfesis, ke mia senreviĝo estas granda, konstatante, ke lando estrata de komunistoj vidigas, je plej alta grado, ĉiujn karakterojn de l' kapitalista regado. Kial surstrate estas tiom da almozetantoj – dum en la butikmontrejoj logas kukoj, fruktoj kaj ĉiuspecaj manĝaĵoj? Kial do ĉiupaŝe oni renkontas podetalajn vendistojn kaj kolportistojn? En butiko mi eĉ vidis luksajn ĉerkojn, kio montras, ke ĉe morto ankaŭ ne regas egaleco. Mi rimarkis vetkurĵumalojn. Virinoj sin prostituas... Rusio ja travivis teruraĵojn kaj estis alkondukita al ega ruiniĝo. Sed kial do kontrastas la vido de bonstataj personoj kun korŝiraj mizeroj?...

– Mi komprenas vian miron kaj disreviĝon, respondis K-do "?!". Sed ne forgesu, ke nun regas la N.E.P., t.e. restariĝo de l' kapitalisma sistemo. Ĉiuj de vi faritaj konstatoj estas ties konsekvenco. Ni, komunistoj, kun ega malĝojo kaj kolerego konstatas la efikojn de tiu renaskiĝanta kapitalismo. Sed la neceseco trudis ĝin al ni.

Antaŭ la N.E.P. ne estis videblaj tiuj karakterizaĵoj de l' kapitalisma reĝimo. Ĉiuj butikoj estis fermitaj, ĉiuj surstrataj bazaroj malpermesitaj. Ni provis severan aplikadon de l' socialisma sistemo. Principe ĉiuj civitanoj devis labori por la Ŝtato, kaj ricevi de ĝi la vivnecesaĵojn. La kamparanoj devis liveri senpage la nutroproduktaĵojn, kiujn la Provizum-komisarejo devis distribui senpage al ĉiuj laborantoj, je simpla prezento de ilia laboratestilo.

Bedaŭrinde la distribuorganoj ne bone funkciis; en kelkaj lokoj ili eĉ tute mankis. Kaj kie tiuj organoj ekzistis, okazis ofte, ke ili ne havis ion distribuendan. En fabrikoj laboristoj ne ricevis vivrimedojn. Tiam ili nature celis nur prilabori ion ajn por ĝin

vendi kaŝe. Malgraŭ plej severaj ordonoj, malgraŭ ke la "Ĉeka" ofte mortpafis "spekulantojn", fakte ĉiam okazis kaŝa negocado. Oni fine eĉ devis toleri publikan bazaron ĉe la Suĥarevska. La Polico "fermis la okulojn". Ĉiu pli malpli estis devigata kaŝe komercadi por konservi la vivon. Eĉ "Ĉekanoj" faris same. Alvenis momento, kiam la klarvidantoj el la komunistaro konvinkiĝis, ke la provo pri starigo de socialisma mastrumado fiaskis. Oni ne povas socialigi senhavecon. Socialisma stato postulas abundecon. Nur blindaj, fanatikaj komunistoj volis daŭrigi la provon. Lenin, la unua, komprenis la nepran necesecon malantaŭeniri sur la ekonomia fronto. Pro lia granda spirita kaj morala aŭtoritato fine preskaŭ ĉiuj komunistoj konsentis kun li, kaj la starigo de la N.E.P. okazis marton 1921.

Supraĵe rigardante oni efektive ĉe ni vidas ĉiujn karakterizaĵojn de kapitalisma mastrumregado. Tamen, fakte nia ekonomio ege diferencas je tiu de la aliaj landoj. Vi ja scias, ke la ŝtato posedas la ĉefajn industriojn kaj pro tio povas ĉiam trudi sian influon, – dum en landoj regataj de kapitalanoj la potenco, kvankam principe en la manoj de la registaro, fakte estas en tiuj de financistoj, kiuj trudas sian volon profite al siaj apartaj interesoj. Ĉi tie la ŝtato, estante la ĉefa kapitalposedanto, povas trudi sian influon anstataŭ ricevi ĝin de financistoj. En tiu fakto kuŝas la gravaĵo, kiu esperigas nin pri estonteco.

Kiam ni konstatis nian senpovecon funkciigi socialisman mastrumadon, la problemo staris jene antaŭ la Komunista Partio: ĉu la proletoj, kiuj firme tenas en manoj la politikan potencon devas ĝin forlasi al kapitalanoj aŭ konservi ĝin kaj meti je la servo de la ekspluatata klaso?

Ni decidis alpreni la lastan solvon.

Plorinda estas la jena konstato: neniu eŭropa lando entenas pli

malbonajn kondiĉojn por la starigo de socialismo ol Rusio, kaj nenie ekzistas pli forta kaj sincera deziro starigi ĝin. Karl Marks ja diris, ke socialismo povas naskiĝi nur el kapitalisma sistemo elkreskinta ĝis plena matureco. Ne tia estas la ekonomia stato ĉi tie, kie apenaŭ malvolviĝas la industrio. Prikonsideru, ke nur 6% el la tuta rusa popolo konsistigas la proletaron.

Se ne estus historia fakto, ke neniam kaj nenie la kampano sukcesis altrudi sian regadon, la tuta potenco en Rusio devus esti en la manoj de la terlaboristoj. Sed la ekonomiaj kondiĉoj malhelpas, ke ili unuiĝu kaj grupiĝu. Estas fatalaĵo: povas ekzisti nur aŭ kapitalistara regado aŭ proletara. La revolucio, okazigita de la proleta klaso tamen liberigis la kampanojn el subpremo de la grandbienuloj. Okazis rangegaliĝo. Malgrandiĝis la proporcio inter bienposedantoj kaj senterhavuloj, pligrandiĝis tiu de la mezbienuloj. Nia kampanaro fariĝis burĝeta. Ĝi fariĝis sendependa klaso, kiu post ekstermo de la grandbienuloj kaj kapitalistoj restas la sola klaso, kapabla kontraŭstari la proletaron. Sed tamen ĝi neniam povos akiri la politikan potencon pro la specialaj kondiĉoj, pri kiuj mi ĵus parolis...

K-do "?" parolis longe pri tiu temo; li kvazaŭ faris antaŭ mi lecionon pri marksismo, kaj estis konstateble, ke li posedas fundan konon de la verko de Karl Marks.

– Mi ja komprenas viajn klarigojn, diris mi, sed ili estigas ĉe mia spirito jenajn demandojn:

1) Kial do la Komunista Partio provis starigi socialisman mastrumadon en kondiĉoj konfesataj de la marksisma doktrino mem, kiel tute malfavoraj?

2) Mi aŭdis, ke la privataj entreprenoj pli bone prosperas ol la ŝtataj. Ĉu en tiu fakto, se ĝi estas vera, ne kuŝas granda danĝero por la ŝtata potenco?



3) Ĉu l' aplikado de l' politika potenco ne riskas enkonduki korupton en la Komunista Partio, aŭ almenaŭ moligi la klaskoncion de ĝiaj membroj?

K-do "?" enpensigis, ekbruligis cigaredon, dum la edzino prezentis la ĵus preparitan teon. Dum ni kirlis per kulereto la teon por kunmiksi lakton kaj sukeron, regis inter ni silento. Post momento, englutinte iom da teo, mia gastiganto ekparolis:

– Per viaj demandoj vi tuŝas gravajn taktik-, moral- kaj psikologiproblemojn. Por respondi ilin, kiel taŭgus, longa kaj metoda studado estus necesa. Cetere, se vi legas atente la komunistajn verkojn, vi certe jam rimarkis, ke tiuj demandoj estas amplekse pritraktataj.

Ĉu jam ni trovis la ĝustan solvon de ĉiuj problemoj, kiuj stariĝas antaŭ la komunistaj regadoj? Mi ne scias. Plurfoje Lenin mem konfesis, ke ni faris multe da eraroj kaj maltrafoj. La pli grava estas, ke ni kalkulis je proksime okazonta revolucio tutmonda. Ni eraris pri la dato. Revolucio fiaskis en Hungario, Germanio kaj Italio. Sed, ĉar la rusa proletaro jam estis konkerinta la politikan potencon, pro taktika motivo estis necese dekreti kaj provi la starigon de ekonomia mastrumado socialisma.

Ni volis, ke oni ne povu riproĉi al komunistoj, ke ilia regado similas tiun de la social-demokratoj. En la tempo kiam ni espere antaŭvidis tuteŭropan revolucion, nia provo pri starigo de pure socialisma sociaranĝo havis ĉefe propagandan valoron kaj celon, rilate al la aliaj landoj.

Ni ĉiam opiniis, ke la socialismo povas ekzisti nur laŭ internacia skalo. De tiu vidpunkto devas ĉiam esti rigardataj niaj agoj kaj klopodoj, se oni volas objektivite prijuĝi ilin.

En 1920 Lenin diris: "Se oni ne starigas en Rusio pli

perfektigita teknikon ol antaŭe, ne povas temi pri restarigo de la ekonomia vivo, nek pri komunismo. La komunismo, ĝi estas la soveta regado plus la elektrifikado<sup>[12]</sup> de la tuta lando, ĉar sen elektrifikado estas nebla la perfektigado de l' industrio. Tio estas longdaŭra tasko, kiu postulas almenaŭ 10 jarojn, kaj kondiĉe, ke oni igu aron da teknikistoj partopreni en ĝi. Estas klare, ke sen l' altiĝo de nia industrio ĝis la nuntempa granda mekanika produktado, la socialisma reĝimo restos nur aro da dekretoj, ligo de l' laboristaro kun la kampanaro por la batalo kontraŭ Kolĉak kaj Denikin, ekzemplo por ĉiuj nacioj de l' mondo, sed ne havos solidan bazon."

Kiel vi vidas, neniam ni havis la kredon, ke en la nunaj kondiĉoj pure socialisma reĝimo povas funkcii en Rusio.

Sed la historio ankaŭ instruas, ke ju pli malproksimen de sia deira punkto iras iu revolucia ondo, des malpli granda estas ĝia malantaŭeniĝo, kiam refluo okazos. Por detrui ĝisradike la feŭdan reĝimon, kiu ekzistis ankoraŭ en Rusio, kaj ŝanceli la kapitalistan sistemon; por forneniigi la hontaĵon, la barbarecon, la malhelpon al ĉia kulturo kaj progreso, la bolŝevika revolucio estis nepre necesaj. En Rusio, la proletara revolucio daŭrigis la burĝe demokratian revolucion, jam antaŭlonge okazintan en la aliaj okcidentaj landoj, kaj akcesore solvis ties problemojn. Nur la lukto decidis ĝiskigrade la proletara revolucio sukcesos preteriri la burĝan.

La N.E.P. markas punkton en la refluo de l' revolucia ondo. Ĉu ĝi devas reflui pluen? Mi ne scias. Tio dependas grandparte de la sintenado de l' alilandaj proletaroj. Pro taktika motivo ni okupis pozicion neelteneblan; pro la sama motivo ni malantaŭeniris ĝis la ŝtata kapitalismo.

Ĉu en Germanio, Francio kaj Anglio la kapitalistaro sukcesos

redoni firman ekvilibron al sia potenco? La estonteco respondos al tiu demando. Almenaŭ tiu ekvilibro povos esti nur provizora: Ĝi daŭros ĝis venonta, neevitebla mondmilito, kiun okazigos, kiel kutime, la diversaj ekonomiaj imperialismoj. Koncerne nin, la problemo nune konsistas en konservado de l' politika potenco por ĝin meti je la servo de l' mondrevoluoio. Por konservi tiun potencon ni estis devigataj retiriĝi sur la ekonomia fronto, sed tiu retiriĝo estas nur taktika necesajo tempa. La celo nia restas la starigo de l' komunismo kaj forigo de la sociaj klasoj. Ĉar ni konsideras, kiel Karl Marks, ke estas la historia misio de l' proletaro forigi la klasojn, ĉiuj niaj penadoj celas la profiton de l' proletaro tutmonda. Ni esperas, ke, pli malpli frue, en ĉiuj landoj la laboristoj komprenos tion. Ni restos en atenda situacio ĝis la proletara revolucio venkos en la landoj, kie la industrio grandamplekse jam malvolviĝis.

Kompreneble, se tiu venko malfruiĝas tro longatempe, oni pravos timi, ke la NEP-reĝimo infektos la organaron de l' proletara diktatoreco. Nun la danĝero ne estas granda. Mi eĉ opinias, ke tiel longe ĝis la malnovaj komunistoj havos en manoj la direktilaron, la kapitalisma veneno ne grave endanĝerigos la vivon de nia regado. Sed ja, ni konscias pri la danĝero. Ni venkis la eksteran malamikaron. Nun la batalo okazas inter la Ŝtato kaj la intema malamikaro: la naskiĝanta burĝaro. Tia batalo estas plena je embuskoj. Ni devas esti tre atentemaj por malhelpi la kaŝan, subfosan rodadon kontraŭ nia politika potenco.

Estas ja vere, ke fuŝfunkcias iuj ŝtataj entreprenoj, dum pli bone funkcias la privataj. Okazas malzorgaĵoj kaj ŝteltrompaĵoj ĉiuspecaj. Jen la bedaŭrindaĵo: la plimulto el la komunistoj estas honestaj kaj sindonaj, sed mankas al ili teknika kompetenteco. Ili devas iom post iom akiri kapablecon kaj spertecon en ĉiuj

fakoj de la ŝtata mastrumado, dum la kontraŭuloj posedas tiujn ecojn jam de longe. Estas ankoraŭ vere, ke komunistoj, ĉefe la nove varbitaj, celas iafoje nur profite adaptiĝi al la nuna situacio.

Kion fari? Mi ripetas, la klarvidantoj konscias pri la danĝero, pri la grandega tasko plenumenda. Sed, ĉar la alilandaj laboristoj ankoraŭ ne konkeris la potencon, ni do estas devigataj kontrakti kun la burĝaj registaroj por krei en Rusio la ekonomian kondiĉaron, kiu ebligos, en pli malpli proksima tempo, la malstarigon de la N.E.P. Sed estas neforgesende, ke tia plano povos fine efektiviĝi nur per la helpo de la tutmonda laboristaro kaj ĝia venko kontraŭ sia propra burĝaro. Se tiu venko ne okazos sufiĉe frue ni ne povos elteni la pozicion: la kapitalistaro tiam venkos ĉe ni kaj nia Revolucio restos en la Historio kiel la unua sensukcesa provo pri starigo de socialisma reĝimo.

La bolŝevika revolucio almenaŭ montris kiamaniere la proletara klaso povas konkeri kaj konservi la politikan potencon. Sur tiu kampo nia venko estas nekontestebla. La Pariza Komunumo fiaskis en tiu provo. Sed ni profitege lernis el tiu fiasko. La proletaro de la aliaj landoj ankaŭ profitos je nia sperto.

Hodiaŭ, kiel antaŭ kelkaj jaroj, ni ne dubas pri la neevitebleco de venonta tutmonda Revolucio. Temas nur pri kiam. La marksismo, kiel klarigo de la historiaj faktoj, estas vera ĝeneraltrajto. En tiu doktrino ni ĉerpas la plej certan direktivon...

K-do "?" parolis kun forta konvinko, kiel homo cerbuminta la demandon, kiun li pritraktas. Kun streĉita atento mi aŭskultis. En la buŝo de mia interparolanto mi retrovis kion jam kelkfoje mi legis en komunistaj revuoj. Dialektike tiaj klarigoj ja estas akceptindaj. Tion mi konfesis kaj aldonis: Estante mem komunisto, mi nature akceptas la marksanan teorion. Tamen mi

sincere konfesu, ke iafoje duboj eniras mian cerbon. La klarigo de la historiaj faktoj per la marksismo igas min memori pri la "Diskurso pri la Universala Historio" de l' fama franca episkopo Bossuet. Li majstre klarigis ĉion per la Evangelio: li per trafikaj argumentoj pruvis, ke eĉ la malamikoj de l' Katolikismo laboras por la triumfo de l' Sankta Eklezio. Tamen tiuj argumentoj, kiuj tiutempe ŝajnis valoraj, vekas rideton eĉ ĉe la nuntempaj apologiistoj.

– Kompreneble, oni ne devas konsideri la verkon de Marks kiel biblion, intermetis K-do "?".

– Nu, permesu, ke mi ankoraŭ starigu antaŭ vin unu demandon. Ni interkonsentis, ke abundeca stato estas necesa por la funkciado de socialisma reĝimo. Sed por krei tiun abundecon, intensa produktado estas necesa. Ĉu oni povas atingi tiun intensecon, kiam ne plu ekzistas la salajrinstigilo ĉe laboristoj kaj la persona gajnemo ĉe direktantoj? Rilate tiun punkton la eksperimento de via Revolucio povus esti, se ne absolute decidiga, almenaŭ tre instrua. Kion oni jam spertis pri tio?

K-do "?" direktis al mi esploreman rigardon, ekbruligis alian cigaredon, enpensiĝis momenton kaj ekparolis:

– Nu, vi ja scias, ke mi restis for de Rusio dum sufiĉe longa tempo. Nun apenaŭ de tri semajnoj mi revenis ĉi tien; sekve mi devas konfesi, ke via demando trovas min iom nepreparita, por ĝin respondi kiel decus. Cetere mi opinias, ke la ĝisnuna sperto farita tute ne sufiĉas por akiri certecon pri la plej trafikaj rimedoj uzendaj por veki kaj instigi laboremon. Estas ja certe, ke ni devis starigi en fabrikoj monpremiojn por diligenteco kaj konstanteco, ankaŭ laŭtaskan laborpagon, tajlorsistemon kaj aliajn rimedojn, uzatajn en kapitalistaj entreprenoj.

La popolamaso en sia granda plejmulto bedaŭrinde havas

nenian komprenon pri funkciado de komunisma mastrumado. Ĝia spiritstato estas tute formita de kapitalanaj influoj. Longdaŭra edukado estos necesa por aliigi tiun spiritstaton. Eble kelke da generacioj pasos antaŭ ol oni ne plu bezonos salajran instigilon por igi la laborantojn produkti samintense kiel sub la skurĝo de l' kapitalismo. La laboro devos esti glorata, kvazaŭ sanktigata kaj la nenionfaruloj konsiderataj kiel plej egaj krimuloj...

Interŝanĝinte kun K-do "?" plej diversajn konsiderojn pri tiu morala flanko de la Revolucio, ni revenis al pli praktikaj demandoj. Adiaŭonte mian gastiganton mi konklude demandis lin: Nu, post du tagoj mi forveturos. Estas antaŭvideble, ke mi estos superŝutata per demandoj kiam mi renkontos k-dojn. Kion mi respondu? Sincere dirite mi preskaŭ nenion komprenas pri la ĉi-tiea situacio. Mi observas, petas klarigojn kaj ĉiam trafas nur dubeŝancajn respondojn. Mi ne komprenas... Verŝajne mi estas pli malinteligenta ol iuj vizitintoj de Rusio, kiuj jam raportis firmtone, ĉu laŭdante kun entuziasmo, ĉu akre kritikante?...

– Se vi volas juĝi ĉion per via propra saĝo, respondis K-do "?", vi ja certe ne povas akiri firman konvinkon dum trisemajna restado ĉi tie. Kion mi diras!... Estas eĉ multaj Rusoj, kiuj komprenas nenion pri la okazintaĵoj de ili travivitaj. Pripensadu, observadu, kaj neniam forgesu, ke la vivo ne adaptiĝas al la teorio, sed ke la teorio devas adaptiĝi al la vivo. La praktiko montras tion, kio estas vera en la teorio. Kunportu nepre la firman konvinkon, ke la komunistaj gvidantoj celas nur la verajn interesojn de l' tutmonda proletaro. Kiam la alilandaj proletoj estos ankaŭ prenintaj en siajn manojn la regadon de l' socio, tiam eble, sed nur tiam, ni povos kun sukceso starigi komunismon...

Adiaŭinte K-don "?", mi revenis laŭlonge de la rivero

Moskova, kies akvaro malrapide fluas. La Kremlo radiis per ĉiuj oraĵoj de siaj kupoloj. Estis varme, kviete. Moskvo, la Meko de l' Mondrevolucio, aspektis tre paceme. Nur la ruĝa standardo, flirtanta super iu turo de l' Kremlo, simbole rememorigis pri la okazintaĵoj...

\*           \*

\*

## Foriro

Ĵaŭde, 31an de aŭgusto. (El mia notlibro).

Klopodoj pri forveturo. Mi pagis por la bileto kaj pasportvizoj (Letonia kaj Latvia) 81 600 000 rublojn. La oficistoj de Komintern zorgis pri tiuj aferoj. Je la 17a horo venos K-do kun la necesaj legitimaĵoj. Mi atendas. K-doj Polakov, Futerfas kaj Demidjuk ĉeestas en la hotelo "Lux". Ili afable akompanos min al la stacio. Estas jam la 17a kaj duono. Neniu venas. Mi malpacientiĝas...

– Nu, ĉu vere vi opinias foriri hodiaŭ, alparolas min franca K-do, kiu oficas ĉe Komintern?

– Certe!... Ĉi-matene mem oni sciigis min, ke ĉio estas preta por mia foriro. Jen, vidu, mia dorsosako estas jam bukfermita... La K-do mokeme ridetis kaj aldonis:

– Estu pacienca... Mi tre dubas ĉu vi foriros hodiaŭ. Mi ofte vidis ĉi tie personojn pli gravajn ol vi, kiuj atendis tutan semajnon antaŭ ol ili povis efektive forveturi...

Jam estas la 18a horo. Ni atendas...

– Allo!... ĉu estas K-do Lanty?

– Jes...

- Nu, vi ne povos forveturi hodiaŭ...
- Kial do?...
- Vi ne povos... Morgaŭ...

. . . . .  
 Vendrede, 1an de septembro. – Ĉu mi foriros? Jam denove mi bukis la sakon kaj atendas. Estas la 17a horo. La K-doj de "La Nova Epoko" ankoraŭ ĉeestas; ili nepre volas adiaŭi min ĉe la stacidomo. Ĉu do tutan semajnon ili devos veni al mi ĉiutage por ekscii ĉu mi foriros aŭ ne?...

Jen haltas aŭtomobilo antaŭ la pordo de la hotelo. Oficisto el Komintern elsaltas sur la trotuaron, venas al mi kaj sciigas, ke tuj li kondukos min aŭtomobile al la stacidomo. Mi ekĝojas, ĉar tre malatendema mi estas kaj doloras min ĉia prokrasto. Oni eble volas, ke mi kunportu je la lasta horo bonan impreson el Moskvo. Mi estas do veturigata kvazaŭ eminenta gasto. Ĉio estas bone prizorgata kaj unu horon antaŭ la ekiro de l' vagonaro mi jam ĉeestas en la stacidomo. Tie mi ekscias, ke mi veturos en unuaklasa vagono. Nu, bone, estis necese, ke mi venu Rusion por vojaĝi tiel komforte. Mi do profitu la okazon kaj ne faru malicajn rimarkojn...

Post kelka atendado, mia akompananto konatigas min al iu el la vagonaro, donas al mi ĉiujn necesajn legitimaĵojn kaj foriras...

K-doj Demidjuk, Futerfas kaj Polakov ne povis kiel mi uzi aŭtomobilon. Ili veturis per tramo kaj duonhoron poste alvenis ĉe la stacidomo, kie ili adiaŭis min plej ĝentile kaj bonkamarade...

Je la 19½ horo ekmoviĝas la vagonaro. En la kupeo estas kun mi du personoj, viro kaj virino. Ili parolas ruse. Mi aŭdas nur sonojn, kies signifon mi ne komprenas. Pri tio mi ĝojas. Tiel, sola mi restas kun miaj pensoj. Enpensiginte mi rigardas tra la



fenestron – kaj ne vidas kion mi rigardas, kio estas okulvidebla. Mi vidas kion mi ne rigardas: Ekaperas antaŭ min, kvazaŭ kinematografe, bildoj, kiujn jam plurfoje mi interesege rigardadis en Moskvo. Prezentiĝas obsede la ĉifonvestitaj almozpetantoj, kolportistoj, la ruinaĵoj, la oraĵoj de l' preĝejoj, la mirinda Kremlo, la ruĝa placo, t.n.. ne ĉar tie okazis revoluciaj scenoj, sed tial ke en la pasinta tempo ĝi estis la ekzekutejo. Sur tiu fama placo staras la plej strangega konstruaĵo, kiun iam mi vidis: la preĝejo "Sankta Bazilo". Neforgesebla bildo, montranta plej mirigan arkitekturstilon. Dekdu malsamaj turoj kun kupoloj diversformaj, diverskoloraj. Mi memoras pri Ivan la Terura, kiu en la dekkvara jarcento konstruigis tiun preĝejon; pri la malfeliĉa sorto de l' arkitekto, kiu, laŭordone de la imperiestro, estis senkapigata post la finkonstruo de la preĝejo; pri la legendo kiu diras, ke la tirano ordonis tiun senkapigon, tial ke la arkitekto, demandite ĉu li povus konstrui duan similan preĝejon, respondis jese. Ivan la Terura tiom fieris pri tiu konstruaĵo, ke li volis forigi ĉian eblecon pri konstruo de alia simila.

Ankaŭ ekaperas densa popolamaso, kiu sur la rondaj promenejoj, noktomeze, promenas kaj aspektas sufiĉe bonstate, kontente, memfide. Mi memoras pri aŭditaj paroloj, pri la tono per kiu ili estis eldirataj, pri sinteno de personoj, pri io sentebla, neklarigebla. Granda konfuzo regas en miaj pensoj. Kun bedaŭro mi konstatas, ke mi kunportas nur bildojn, nur impresojn, sed nenian firman definitivan juĝon pri la Rusia situacio.

Rapidas la vagonaro. Adiaŭ Moskvo!...

\* \* \*

\*

## Riga

Dimanĉe, 3an de sept. – Glate, senmalhelpo iris la vojaĝo. Mi alvenis ĉi tie je la 9a. Fiakristo kondukis min al esp-isto, kies adreson oni donis al mi en Moskvo: S-ano G. Lampert, juna studento, kiu plej afable sin metis je mia dispono por agrabligi mian restadon tie ĉi. Eksciinte ĉe la stacidomo, ke la vagonaro ĝis Berlin foriros nur je la 23a, S-ano Lampert proponis al mi veturi al Edinburg, kie ni pasigu la tagon ĉe la marbordo. Tiu banloko troviĝas je proksimume 20 km. de Riga, li diris. Kun plezuro mi konsentis iri tien kaj plej agrablan tempon mi pasigis kun mia akompananto. La unuan fojon li havis okazon uzi esp-on kun fremdulo. Tial kun kontento li povis sperti kiel bone oni interkompreniĝas. S-ano Lampert diris, ke nur de ses monatoj li lernis la lingvon. Estas notinde, ke li parolis flue kaj korekte.

Vespere ni revenis al Riga, kaj je la difinita horo mi ekveturis Germanion. Marde, 5an de sept. mi elvagoniĝis en Berlin. Mi finu ĉi tie la rakonton, ne ĉar mi diris, ĉion dirindan, sed tial ke malnoviĝis la okazintaĵoj kaj forpasis la intereso pri ili.

### Postvojaĝaj pripensoj

Mia rakontado jam alvenigis al mi multe da leteroj. Pluraj varme laŭdas, kelkaj (nur tri) akre riproĉas. La riproĉintoj estas komunistoj, almenaŭ ili sin nomas tiaj, kiuj diras, ke mi raportis pri Rusio kvazaŭ farus kontraŭulo de l' komunismo.

Ĉu vere? Fininte mian rakonton, mi rememorigu kion mi diris komence: "Ĉu mi estas tiel akrevida, tiel observova, ke mi sukcesis vidi la ĝustan fizionomion de vastega mondparto, kie ĉio ankoraŭ bolas, kie ĉio estas kvazaŭ en eksperimenta retorto? For de mi tia penso!... Mi promesas nur eldiri miajn impresojn, –

kaj impresoj ne estas juĝoj."

Certe mi ne estas tiel memfida, ke mi povu havi definitivan juĝon pri la Rusa Revolucio. Mi avertis la legantojn, kaj promesis diri kion mi vidis, kion mi sentis. Nur sincereco gvidis mian skribilon. Kaj se mia parolo iafoje koritraŭdiras iun kredon, des malpli bone! Sed mi povas diri nur mian penson. Mi avertis, ke mi ne juĝas, sed nur raportas. Ĉu do komunisto devas fermi la okulojn, kiam li vidas ion malbonan, malbelan? Ĉu komunismo estas nova religio, havanta dogmojn, kiujn neniu povas diskuti, neriskante esti konsiderata kiel herezulo?

Mi havas alian komprenon pri komunismo. Mi eĉ opinias, ke ili ne estas sagacaj komunistoj, ti-kiuj rilatas al la marka verkaro kiel kredulo al sankta Biblio.

Mi ja spertis kelkfoje, ke ekzistas en niaj rondoj tiaj kreduloj. Por ili la vivo devas adaptiĝi al la teorio; dum mi konsideras la marksismon nur kiel esplormetodon, kiu faciligas komprenon pri la malsimplaj, interplektiĝantaj historiaj faktoj. Vera komunisto estas, laŭ mia kompreno, ti-kiu aplikas la metodon kaj ne religie kredas je la doktrino. La doktrino povas en kelkaj punktoj esti erara, tiam la esplormetodo mem ebligas reĝustigon.

Tiel ĉiam faris Lenin. Nuntempe oni parolas pri leninismo, kaj mi antaŭvidas, ke tiu nova ismo simple estas revizado de l' marksismo. Tiel iom post iom oni aliigas la kredon de la komunista amaso, kiu nekonsciante pri tio sekvas novan direktivon. Kaj aliel bedaŭrinde ne povas esti.

La unuan fojon en la historio, la proletara klaso de vastega mondparto batalakiris kaj konservis la regan potencon. Ĝi provis apliki novan socimastrumadon. Sed la sperto montris, ke en la nunaj kondiĉoj estas neeble funkciigi socialisman ekonomion. Lenin ekvidis la nepran necesecon malantaŭeniri. La N.E.P.

okazis. Post tiu duonrestarigo de l' kapitala sistemo oni konstatas revigliĝon de la tuta ekonomia vivo.

Kion tio signifas? Kiu ne estas blindigita per teoria kredo, tiu devas, vole nevole, konfesi, ke la apliko de socialismaj principoj ne donas la rezultojn, kiujn ni antaŭvidis. Oni kompreneble povas longe diskutaĉi pri la kialoj de tiu fiasko, sed la faktoj parolas pli elokvente ol plej subtilaj rezonoj.

\*            \*

\*

Longe cerbuminte tiujn problemojn, okazis kelkfoje, ke mi demandis min: "Ĉu ci estas ankoraŭ komunisto?" Eble kelkiuj opinias, ke tia demando estas tre malinda. Des malpli bone! Tamen, ili ne koleru antaŭtempe. Ili aŭskultu.

Mi ne estas el tiu kategorio de homoj, kiuj fidele kaj dumvive restas alligitaj al iu religio, partio aŭ sekto en kiu la hazardo aŭ iafoje la profitemo metis ilin. Senĉese mi penadas orienti min en la labirinto de la diversaj teorioj kaj doktrinoj.

Antaŭmilite, dum pli ol 10 jaroj, mi partoprenis en la anarkia movado. Min entuziasmigis la idealo predikita de homoj kiel Reclus, Kropotkin, Nieuwenhuis kaj aliaj. Sed, en 1914, konstatinte, ke multaj anarkistoj agas tute same kiel socialistoj kaj aliaj patriotoj, dubo eniris mian spiriton. Tiam mi komencis alispirite prijuĝi la homojn, la teorion, kaj observi per tute aliaj okuloj. Ŝajnis, ke kolorigitaj okulvitroj defalis. Mi ĉesis kredi, mi diras kredi, je la anarkismo. Faktoj de mi antaŭe observitaj, kaj kiujn mi konsideris negravaj, ŝajnis al mi tiam treege atentindaj: Mi alvenis al la konkludo, ke la bela anarkia idealo, kapabla esti

direktivo bona por kelkaj superaj kaj noblaj spiritoj, kaŭzas treege detruajn efikojn ĉe individuoj, kiuj ŝirmas siajn malvirtojn per la mantelo de libereco kaj memregrajteco. Plie, analizante miajn ĉiutagajn agojn, mi demandis min, ĉu mi ĉiakaze plenumus mian devon, se iu socia forto ne ĝin trudus al mi. Kaj por esti sincera mi devis agnoski necesecon de reguloj, de disciplino, de submetiĝo de persona profitemo sub la ĝeneralan.

La anarkia teorio instruas, ke ĉio malbona en la mondo devenas de la Leĝo, de la regpovo, kiun individuoj aljuĝis al si, ĉu perforte, ĉu ruze, ĉu per iu ajn alia rimedo. Se tio estas vera, sufiĉus do forrenversi ĉiun ajn regpovon kaj starigi plenan liberecon por ke feliĉo kaj bonfarto regu en la socio.

Tio simple estas hipotezo, bezonanta eksperimenton por trafi ĉu pravigon ĉu malpravigon. Ĝis nun neniu tia grandskala eksperimento estis farita. Dialektikistoj povas do, kun ŝajna logiko, subteni tiun hipotezon. Plie, la ĉiutagaj malbonoj, okazigataj de la regpovo, povas esti utiligataj kiel pravigaj argumentoj.

Sed oni ankaŭ povas kolekti multe da faktoj, kiuj montras, ke kie ne ekzistas leĝoj okazas ega malordo, rabado kaj malebleco pri ĉia ajn kulturo.

Mi tamen ne intencas hodiaŭ ataki la pozicion de miaj antaŭaj "samkredanoj". Mi ne povas riproĉi al ili pro "kredo", kiun mi havis dum pli ol dek jaroj. Tiam, sincera mi estis, kaj nun volas nur same sincere konfesi, ke foriĝis tiu antaŭa kredo mia.

Por klarigi al si la evoluon de la homaro oni povas nur starigi hipotezojn, kiuj estas pli malpli facile pravigeblaj. La hipotezo sur kiu kuŝas la anarkia teorio ŝajnas al mi erara, tial mi aliĝas al alia, pli akordiĝanta kun la faktoj.

Mi ne neas, ke la regpovo plenigis la tutan historion je krimoj

kaj perfortoj. Mi ne dubas, ke estonte ankaŭ la regpovo krimos kaj perfortos. Sed la demando staras nun antaŭ mi jene: ĉu la homaro estus atinginta ian gradon de kulturo, se regemuloj ne estus trudintaj sian volon al la senvola amaso? Ne, kordolore mi devas respondi, se mi parolas sincere. Tial hodiaŭ mi hipotezas, ke, en la pratempo, ti-kiu trudis sian regadon, ĉu perforte, ĉu alirime, al siaj kunuloj ebligis tiel ian progreson, ian gradon de kulturo. Oni rimarku, ke mi ne diras, ke la regado kreas kulturon, sed "ebligas". Estas necese substreki tiun vorton. Komprenoble estus pli bone se ĉiuj interkonsente direktus siajn fortojn al iu difinita celo; sed estas konstatebla fakto, ke ne povas okazi ĉies interkonsento, almenaŭ pri la rimedoj uzendaj por atingi la celon. Sekve, anstataŭ opinii, laŭ la anarkia hipotezo, ke ĉio malbona en la homaj socioj devenas de perforto, leĝo aŭ regpovo, mi alvenis al tiu alia opinio, nome, ke perforto, eĉ tiraneco utilis en la pasinta tempo por progresigi la homaron. Se neniam estus ekzistinta en la senforma, senkaraktera homamaso iu perforto inteligenta neniu progreso estus okazinta.

Senleĝa socio estas ja alcelinda. – Povas esti, ke post jarcentoj ĝi estos ebla. Sed estas necese por tio, ke la homoj, ĉiuj homoj, estu atingintaj altan gradon de moraleco kaj perfekteco, kiu tute mankas al ni nuntempe.

Komprenoble oni povas rebati, ke la kulturo jam atingita de kelkaj civilizacioj ne valoras; ke pli enviinda, pli vivinda estus la situacio de afrikanoj, kiuj konas nek leĝojn, nek ĝendarmojn. Tio estas dialektike pravigebla. Sed estas tamen notinde, ke neniu el ti-kiuj tiele argumentas, iras vivi ĉe la afrikanaj senleĝuloj...

\* \*  
\*

Samkiel antaŭ 6-7 jaroj mi ekdubis pri efektivigebleco de la bela idealo predikita de preskaŭ sanktuloj kiel Reclus aŭ Kropotkin, same nun mi ekdubas ĉu socio povas funkcii, kiam forestas kapitalo, kiam ĉiu gajnemo kaj ŝparemo estas malebligata. Nur eta malplimulto da idealistoj povas labori, instigate de idealaj motivoj. En Rusio, ekzemple, la "komunistaj sabatoj" apenaŭ influis sur la amason. La ekzemplo de Trocki, portanta ferajn trabojn, lasis indiferenta la grandan plimulton.

Ĉu neniam socio ignoranta kapitalon povos funkcii? Tion mi ne scias. La estonto nur povas respondi tian demandon. Sed la sperto akirita dum la rusa Revolucio montras, ke nuntempe nur sociaranĝo bazita sur kapitala ekonomio povas vigligi la industrion kaj forigi malsaton. Tio estas ja bedaŭrinda konstato; sed utilas neniel fermi la okulojn, kiam oni sincere serĉas solvon de problemoj.

\* \*  
\*

Falinte de la alta idealeca turo, kie mi kutimis karesi kaj luli mian revon, mi sentas min hodiaŭ treege kontuzita. Dolora estas mia spiritstato.

Tamen sur la ruinaĵo de miaj kredoj staras sendifekta iu ideo: la internaciismo. La ĉiutaga vivo montras la pravecon de tiu ideo. Estas okulfrape, ke malgraŭ ĉiuj baroj la homaro iras, en sango kaj perforto, al pli kaj pli intima unueco. Ĉiuj problemoj

solvendaj, ĉu politikaj, ĉu ekonomiaj, stariĝas sur internacia skalo kaj trafas ĝustan solvon proporcie al ĝia internacieco. Ju pli da internaciemo regas en la mondo, des pli bonfartas la homaro; ju pli da naciemo, des pli da malamo, da malbono.

Neniam mi dubis pri tiu fakto. Tial hodiaŭ, kiam mi konsideras la diversajn, inter si batalantajn sociajn fortojn mi ne ŝanceliĝas por decidi al kiu mi devas aliĝi. El la diversaj organizaĵoj, kiuj alcelas la emancipon kaj altigon de la proletara klaso, la IIIa Internaciano enhavas pli da internaciemo ol ĉiuj aliaj. Konsiderante, ke tiu organizaĵo konsistas el malsamlingvanoj oni povas diri, ke ĝi entenas la maksimumon da internacieco eblan nuntempe. Kaj pro tio mi restas al ĝi fidele aliĝanta. Tial ke mi agnoskas la aŭtoritaton kaj akceptas la disciplinon de la IIIa Internaciano mi do restas komunisto.

Kiu ne estas ege egoista; kiu havas iom da sentebleco ne povas konsenti kun la nuna sociaranĝo. Estas kondiĉo pri ebleco de progresado senĉese kontraŭbatali kion oni juĝas malbona. Cetere mi apartenas al la proletara klaso kaj ne povus perfidi ĝiajn interesojn.

Nu, la Soveta Rusio kaj la IIIa Internaciano batalas profite al la Proletaro. Cetere, kiam oni vidas, ke la sovaĝa faŝismo malvolviĝas en preskaŭ ĉiuj landoj; kiam oni prezentas al si tion, kio okazos, se ne plu regus oriente la ruĝa sovetreĝimo, tiam oni ne povas ne subteni kaj defendi la Rusan Revolucion.

Ĝiaj gvidantoj estas grandparte sinceraj viroj, energiaj, harditaj kaj celkonsciaj. Malgraŭ multe da eraroj, cetere de ili mem konfesitaj, mi opinias, ke ili estas la pli kapablaj por gvidi la laboristaron en ĝia malfacila batalo kontraŭ la ekspluatistaron.

Mi restas konvinkita, ke la rusaj revoluciuloj faris ĉion eblan por starigi en Rusio socialisman sociaranĝon. Ili ne sukcesis. Sed



notinde estas, ke mi ne aŭdis iun dirantan: "Se mia partio havus la potencon, la provo pri starigo de socialismo ne fiaskus."

Ĉiuj do ni, samcelanoj, ĉu komunistoj, socialistoj, sindikatistoj aŭ anarkistoj, staras antaŭ malfacile solvebla problemo: la forigo de la nuna kapitalsistemo, la forigo de ĉia ekspluatado di la homo de la homo. [\[13\]](#)

Hodiaŭ mi opinias, ke la kapitalo estos ankoraŭ longe bezonata por funkciigi la socion. Se mi eraras, des pli bone. Sed se oni opinias necesa la kapitalon, oni almenaŭ celu starigi unuecan monon tutmondan.

Mia hodiaŭa opinio pri solvo de la socia problemo povus resume esti eldirata per du imperativaj propozicioj:

Estu unu sola mono.

Estu unu sola lingvo.

\*            \*  
\*  
\*  
\*

Mi nur priparoletis la ĉi-suprajn demandojn. Por studi ilin kiel decus multaj paĝoj estus necesaj. Tute mi ne intencis prezenti al la legantaro kompletan tezon, sed nur montri mian nunan spiritstaton. Mi celis altiri la atenton de la pripensemoj al problemoj, kiujn ĉiu revoluciano devas zorge prikonsideri. Ni ne estu kreduloj, sed nur sinceruloj senĉese kontrolantaj la pravecon de siaj opinioj.

E. Lanty.

Noto de la kompilinto:

Escepte de pluraj "absolutaj participoj", la evidentajn gramatikajn erarojn (tre malmultajn) mi korektis. Kelkajn kompreneblajn arkaismojn mi lasis, ekz.; proletario, internaciano. Anstataŭ: Trockij, fasĉistoj, Kaukazo, rezumi, konkiri – mi tajpis: Trocki, faŝistoj, Kaukazo, resumi, konkeri. La ĉi-paĝan uzadon de la neologismo "di" mi respektis.

## Piednotoj

1. ↑ Komunista internaciano.
2. ↑ Mi eksciis pli poste, ke dum la cara regado okazis same.
3. ↑ Li tamen antaŭnelonge verkis ruslingve pri la problemo de lingvo internacia broŝuron en kiu li provas pravigi la vidpunkton de la mondlingvanoj laŭ la Marksana Doktrino.
4. ↑ atentu! absoluta participo (N.d.l.komp.)
5. ↑ ? (N.d.l.kompilinto)
6. ↑ Tiuj bildoj, nerepresigeblaj, aperis en

S.R. de feb. 1923.

(N.d.l.komp.)

7. ↑ Pri tiuj bienoj oni rakontis al mi, ke ili tute fuŝfunkcias, ke la kamparanoj primokas ilin ktp. Sed tio estas por mi nur onidiro. Mi ne vizitis tiujn bienojn kaj sekve ne povas havi juĝon pri ili.
8. ↑ Pri tiu konkurado oni ankaŭ rakontas, ke la privataj entreprenoj tre pli bone prosperas ol la ŝtataj. Eĉ komunistoj konfesis tion al mi.
9. ↑ Ĉi tiujn notojn mi danke ŝuldas al K-do Demidjuk.

10. ↑ La ĉiutaga labordaŭro por maturaj manlaboristoj estas okhora, por kancelarioficistoj sehora. La labordaŭro estas sehora por ĉiuj 16-18-jaruloj. La infanoj malpli aĝaj ol 16 jaroj ne povas esti dungataj. En la fabrikoj regas la Tajlorsistemo. Ĉiu laboristo devas plenumi minimume difinitan taskon. Aliel ĝia salajro estas malpligrandigata. En certaj okazoj la sindikatoj permesas plilongigon de la labordaŭro. La invalideco estas prizorgata per procentaj sumoj devige pagataj de ĉiuj laboristoj.

11. ↑ Eble interesos la legantojn ekscii kioma estis la gastoprezio: Mi pagis 3½ milionojn potage. Malalta estis tiu prezo. Notinde estas, ke antaŭ la NEP ĉiuj ajn delegitoj estis senpage gastigataj. Nun la delegantaj organizaĵoj pagas mem por siaj delegitoj. Ĉar S.A.T. ne estas sufiĉe monhava, mi kompreneble pagis propramone.
12. ↑ Elektrifikado = anstataŭo de l' vaporforto per elektroforto.
13. ↑ = ekspluatado al la homo fare de la homo (N.d.l.komp.)

## Ĉu la Unua de Majo havas ankoraŭ sian dekomencon signifon?<sup>[1]</sup>

Sen tro granda sakrilegio oni povas eble starigi la demandon...

Nunjare la Unua de Majo fariĝis laŭleĝa festotago en lando, kies regantoj havas kiel ĉefan celon senindulge kontraŭbatali ĉion, kio ne estas pure nacieca. Kaj la respondecaj gvidantoj de la t.n. liberaj sindikatoj klarigas aprobe la aferon jene:

"La registaro volas, ke la Unuan de Majo la germana popolo atestu pri sia absoluta solidaro kun la proletaro. Kolegoj el la urboj kaj kamparanoj, vi estas la probatalantoj de la ideo pri la Unua de Majo! Ĉiam pensu kaj fieru pro tio!"

Mi ne mirus, se en la germana literaturo baldaŭ estos klarigate, ke ĉefe la germanoj havas la rajton kaj devon soleni tiun laborfeston. Por lerta naci-socialista sofisto estos tre facile starigi tian tezon, sin apogante sur la fakto, ke multaj el la unuaj pioniroj de la unuamaja movado estis germanoj aŭ germandevenuloj. Inter la "Martiroj de Ĉikago" oni ja trovas, ekzemple, la nomojn de Fischer, Engel, Schwab; kaj la tiutempe aperanta en Ĉikago germanlingva laborista gazeto (Arbeiter-Zeitung) ludis tre gravan rolon en la koncerna agitado.

Kiam, post trijarcenta persekutado, la kristanismo ricevis el la manoj de la romana imperiestro Konstanteno oficialan agnoskon, tio estis la signo, ke la kristana movado jam perdis sian revolucionan signifon, sian puran dekomencon karakteron. Iom post iom la kristanismo imitis la morojn de l' paganismo kaj la konsekvenca sekvo de tio estis, ke la persekutitoj fariĝis siavice persekutantoj. La hodiaŭaj sindikataj bonzoj, kiuj adaptiĝas al la Hitlera regado, agas simile al la episkopoj, kiuj benis la standardojn de Konstanteno.

En la jaro 1914 la internaciismo plene bankrotis; la samo denove okazas en 1933. Ĉie, kie en la mondo superregas la spiritojn la nacieca sento; ĝi estas la plej forta movilo, la plej taŭga regilo en la manoj de demagogoj.

Ĉiuj kompetentaj ekonomiistoj tamen interkonsentas, ke la nuntempa krizo povas trovi solvon nur per rimedoj, aplikotaj laŭ la tutmonda skalo. Tamen neniam estis pli forta ol nun la naciisma ideologio. Ne estas mia intenco insisti nun pri tiu kontraŭdiro al principoj ĝenerale akceptataj en marksistaj rondoj. Mi nur volas substreki la fakton, ke reala solidaro, vera unueca sento ne ekzistas inter la diversnaciaj proletoj.

La Internacioj ne multe diferencas de la Ligo de Nacioj. Kiam la cirkonstancoj tion ebligas, la diverslandaj internaciistoj amike interrilatas, kune kongresas kaj bombaste paroladas pri solidaro, pri tutmonda frateco ktp.; sed kiam aliiĝis la cirkonstancoj; kiam la nacia intereso tion postulaas, tiam montriĝas, ke la ligiloj tre facile rompiĝas. La sinteno de la germana sekcio en la II-a Internacio tute similas la sintenon de Japanio en la Ligo de Nacioj.

Ĉi-okaze mi povis noti, ke La kapitulaco de la

socialdemokrataro antaŭ Hitler ne vekis ĉe la francaj socialistoj grandan indignon, sed nur farizean senton: "Ho, ni, francoj tamen ne agus tiel, ne cedus senbatale." Per la barbo de K. Marks mi ne volus ĵuri pri tio. Mi prefere kredas, ke estas nur la nacieca sento, kiu ĉi-okaze ankaŭ parolas...

Sed eble iuj opinias, ke almenaŭ la III-a Internacio donas pli da garantio pri internacia solidaro. Nu, ni do prikonsideru la faktojn. Ekzistas abunda literaturo, en kiu oni povas legi, ke la ruĝa armeo ekzistas por la servo de l' tutmonda proletaro. Ĉu do la militdeklaro de Hitler al la komunista partio havis kiel sekvon, ke Voroŝilov ordonis la mobilizadon de la ruĝarmeanoj? Tute ne! Estas klare por ĉiu, kiu volas malfermi la okulojn, ke la armeo en Sovetio pli kaj pli alprenas naciecan karakteron, ke ĝia nura celo estas defendi la landon, kie oni "konstruas socialismon".

Sed jen pli signifa fakto: Estas en pluraj landoj starigitaj diversaj komitatoj kun la celo agitadi, por ke ĉie en la mondo la germanaj varoj estu bojkotataj. Ĉu Sovetio partoprenas en tia bojkotado? Ne, Germanio daŭre kaj grandkvante liveras maŝinojn k.a. varojn...

La legantoj bonvolu noti, ke mi nur konstatas faktojn kaj neniel celas riproĉi, aprobi, laŭdi aŭ mallaŭdi la Stalinan regadon. Ne estas mia temo ekzameni, ĉu estas eble aŭ ne konstrui socialismon en unu sola lando. Stalin diras: jes; Trocki diras: ne; nur la estonto povas doni tute certan respondon al tiu demando.

Oni almenaŭ permesu al mi diri, ke jam delonge mi povis fari sufiĉe da observoj, kiuj igis min akiri la firman konvinkon, ke jam en Sovetio la ideo, kiu subtenas la

entuziasmon de la "sturmuloj", ne estas la internaciismo, sed ia speco de patriotismo tre simila al tiu de la francoj post la revolucio de 1789-93.

Unuvorte, la naciismo estas nuntempe en la tuta mondo la ideo-forto – facile aliĝebla en pasion – la plej potenca kaj ĝi superregas la mensojn; ĝi estas la plej forta digo, la plej alta barilo, kiu malebligas racian evoluadon de la homaro. Necesas esti blinda por ne vidi, ke ĝenerale la klaskonscio tute ne kapablas kontraŭstari la nacikonscion ĉe la grandega plimulto de la homoj. Kial do provi trompi sin mem? Iluzioj estas ĉiam danĝeraj.

Ĉu povus aliel esti? Bedaŭrinde ne, ĉar neniam ĝis nun estis sisteme kaj persiste entreprenata tra la tuta mondo edukado, celanta tute, ĝisfunde detru la naciecan senton. Tia edukado ne povas cetere ekzisti sen komuna lingvo. Pro tio vole nevole, la internaciistoj agas nekonsekvence kaj maltrafas la celon. Per la flegado de sia nacia lingvo ili tenas viva la naciecan senton, kiu en eksterordinaraj cirkonstancoj fariĝas eksplodema pasio kapabla puŝi ilin sur batalkampojn. Plie la senĉesaj alvokoj por nacia liberiĝo, por nacia sendependeco ktp. povas nur helpi al demagogoj kiel Hitler k.a. superakvigi ĉian internaciismon per naciismaj ondegaj.

Do, nunjare en du grandaj landoj la Unua de Majo estis solenata per kanonpafoj, per regimentaj paradoj kaj similaj pompaj manifestacioj. Tia konstato estas pripensiga kaj rajtigas nin starigi la demandon, ĉu la laborista festo ne jam perdis sian dekomencon karakteron kaj signifon?

– Sed en Moskvo oni kantis la "Internacion" kaj tio montras la grandan diferencon inter la Stalina, kaj Hitlera

regado.

– Neniĉ mi intencis samigi la du regadojn; mi bone scias, ke en Germanio oni malpermesas ĉion marksisman, dum en Sovetio estas permesata nur tio, kio estas ortodokse marksista... Sed la rimarkigo pri la oficiala himno sovetia ne multe impresas min. En la "Marseljezo", la oficiala himno de Francio, estas konsilata mortigi reĝojn; sed jam delonge tiuj parazitoj kutimis tute trankvile aŭdi kaj saluti tiun kanton, okaze de oficialaj akceptoj. Ĉu la nuna franca respubliko reprezentas la idealon de la respublikanoj el 1789? Ĉu la katolikismo similas la frutempan kristanisman? Ĉu la papo havas ion komunan kun Jesuo-Kristo? – supoze, ke ĉi tiu lasta fakte ekzistis kaj ne estas pura mito. Ĉu...

Okaze de la nunjara Unua de Majo mi starigas tiujn demandojn, instige al la SAT-anoj, ke ili meditu pri la rekomendo, kiun faras al ni ĉiuj nia Statuto, nome, ke niaj opinioj neniam devas fariĝi senvivaj dogmoj. Tro longe, tro ofte ni estis trompataj per vortoj, stultigataj per insignoj kaj ĉiaspekaj ikonoj... Okaze de la Unua de Majo mi deziras, ke la SAT-anoj konsciu pli forte ol iam ajn, ke esperanto en la laborista movado ne devas esti konsiderata kiel bagatela, flanka afero, sed male kiel grava, nepre necesa ilo, kiel la bazo, la unua ŝtono sur kiu oni starigu la klasbatalajn organizojn.

Esperanto sen socialismo ne havas por ni grandan signifon; sed ni forte konvinkiĝu, ke socialismo sen mondlingvo estas lama, nekonsekvencna, kredeble fiaskonta afero.

Sed mi jam sufiĉe hertezumis. Bonvolu pardoni kaj pripensi...



\* \*  
\*

Reage al la ĉi-supra artikolo, M. Sampson sendis jenan leteron, al kiu E. Lanti rebatis en "Sennacieca Revuo" de junio-julio 1933:

"Estimata Kamarado,

Traleginta vian artikolon en S.R. mi miris pri ĝi. Vi faras du konstatojn, kun kiuj mi ne simpatias. Unue, vi opinias, ke Sovetio devus igi militon pro la Hitlera teroro en Germanio. Due, vi akuzas la germanan laboristaron pro manko de kuraĝo. Al ambaŭ konstatoj mi diras: "Stultaĵo!!" Se Sovetio farus militon, tio estus tio, kion deziregas la kapitalistoj, kiuj faras ĉion por instigi Sovetion ekmiliti. Ĉu la japana armeo ne forŝtelis vagonarojn, lokomotivojn ktp. de la Soveti-Ĉinia Fervojo? Kial? Unue por instigi Sovetion ekmiliti. Ne, ne pro naciismo, sed pro mondpaco Sovetio ne militos. – Pri la malkuraĝo de germana proletaro: la "Rote Fahne" ĉiam aperas, kaŝe, ankaŭ centmiloj da flugfolioj. Kaj miloj da ruĝfrontanoj, komunistoj kaj eĉ socialdemokratoj estas en malliberejoj, kie oni turmentas kaj fitraktas ilin.

Kion mi nun povas diri al miaj Sovetiaj K-doj, kiuj akuzis min esti malamikino al Sovetio kaj burĝino, ĉar mi restas en SAT? Kaj mi asertis al ili, ke mi neniam ion vidis en "S-ulo"

kontraŭ Sovetio, kaj ke Lanti estas nur unu homo kaj ne la tuta SAT-anaro; do mi ne estas devigata opinii same kiel li, kvankam li restas en SAT.

Ne, K-do Lanti, viaj opinioj ne fariĝos dogmoj. Se tio okazus, estus katastrofo. La 4-an de julio okazos en Parizo kontraŭfaŝisma konferenco. Mi scias, ke ĉeestos iuj germanoj; ili eĉ riskos multe por ĉeesti. Mi senadis salutleteron al la prezidanto kaj ege bedaŭras, ke mi mem ne povos partopreni. Vivu la kuraĝa germana proletaro! Vivu la ruĝfronto! Eble multaj mortos batalante, sed ili ne vendos la animon, kiel faris K. Makdonald kaj aliaj. Kumuniste la via.

M. Sampson.

Por respondi konvene al la ĉi-supra letero, mi devus verŝajne transpaŝi la limojn, kiujn ĉiu devas respekti, verkante por "S-ulo" aŭ "S.R.". Tion kompreneble mi ne faros; tiom pli, ke mi ankoraŭ okupas respondecan postenon en SAT. Estu do nur dirate, ke la celo de mia artikolo estis atentigi la legantaron al tiu fakto, ke la nuntempa internacioj estis tute nekapablaj organizi mondscale, ne eĉ eŭropscale, kontraŭfaŝistan batalon.

Noti la fakton, ke Sovetio, sub la Stalina regado, ne eĉ bojkotas la germanajn varojn, neniel signifas malamikecon al la Sovetia popolo. Tiuj varoj sendube necesas por "konstrui socialismon", sed ili estas haveblaj en Britio, Francio, Usono k.a. landoj. Mi tre miras, ke K-dino Sampson, kiel ano de la Brita Kompartio ŝajne ne scias, ke la bolŝevismo havas

nenion komunan kun la pacisma ideologio. Kaj se Sovetio faras ĉiajn cedojn antaŭ Japanio rilate al la ĉinia fervojo pro amo al la "mondpaco", mi ne povas klarigi al mi, kial en 1929 la ruĝa armeo batalis kontraŭ la ĉinojn ĝuste por konservi tiun saman fervojon. Tiu konstato ankaŭ ne estas montri malamikecon al Sovetio, tial ke mi tiutempe aprobis tiun batalon de la ruĝa armeo, kiam multaj revoluciuloj parolis pri "ruĝa imperialismo".

Fari la konstaton, ke Hitler povis kapti la regadon, nerenkontinte organizitan kontraŭagadon, kiel okazis en 1920 kontraŭ la "Kap-puĉon", tio ne estas dubi pri la batalpreto kaj kuraĝo de la klaskonscia germana proletaro. Estas vere, ke la Kompartio alvokis por ĝenerala striko. Kial tiu alvoko restis senefika? Jen demando, kiun mi ne povas esplori, tial ke mi tro severe prijuĝu la politikon kaj taktikon de la nunaj gvidantoj de Komintern, kaj tio ne estas permesita en SAT-organoj. Mi jam eble eĉ tro diris kaj sekve finos, petante la legantojn, ke ili bonvolu relegi atente kaj kompreneme mian artikolon por plene taksu la gravon de miaj "stultaĵoj".

E.L.

## Piednotoj

1. ↑ Tiu ĉi artikolo aperis en "Sennacieca Revuo" de la 10a de majo 1933. N.d.l. komp.


# EPILOGE...

De ekstere – De supre

Epiloge

Fine ni trafis la celon...

Marks ne estis marksisto...

 La teksto estas publika havaĵo (**public domain**). Detaloj pri la licenco troviĝas  
ĉe la paĝo de la aŭtoro: Eŭgeno Lanti.

# EPILOGE...

De ekstere – De supre<sup>[1]</sup>

Kiel la legantoj sendube jam scias per iu komuniko de la Direkcio, post kelkaj monatoj la gvidado de SAT devas transiri en aliajn manojn. Nun mi sentas min preskaŭ tute senŝarĝita je respondeco kaj povas do jam kvazaŭ de ekstere, de supre rigardi la aferojn. Ĉe tia pozicio, en tia spiritostato oni povas plej bone observi kaj senpasie prijuĝi.

Dum la lastaj tri jaroj nia komuna entrepreno estis tre forte skuata de detruaj ventoj el partieca fanatiko, el stulta miskompreno, metitaj en la servon de senskrupula intrigo. Al tiuj detruaj fortoj aldoniĝas la terura ekonomia krizo, kiu senlaborigas tre multajn el la plej sindonaj SAT-anoj. Kaj malgraŭ ĉio, nia Asocio eltenis; ĝi restas firma kaj alten flirtigas sian standardon, sur kiu restas skribite:

Esperanton en la servon de l' Proletaro!

Samlingvanoj ignoru inter si la landlimojn!

For la dogmojn!

Lojalon al ĉiuj klasbatalaj tendencoj!

Dum dek tri jaroj tiuj devizoj gvidsignis al ni la vojon. Kun trankvila animo ekrigardante hodiaŭ malantaŭen, mi gardas la konvinkon, ke ne ekzistas por nia laborista esperanta movado pli taŭgaj gvidiloj por antaŭenmarŝi al la celo.

Verdire la vojo estas multe pli longa ol komence mi supozis kun la entuziasmo de nove bakita esperantisto. En la jaroj 1919-20, vidante kiom malvigla estas la neŭtrala movado, kiom religiaĉe ĝi aspektas en la okuloj de klaskonsciaj laboristoj, mi opiniis, ke sufcos fari klaran apartigon for de la neŭtraluloj, por ke en la revoluciaj rondoj nia movado estu favore konsiderata kaj ke post kelkaj jaroj la laboristaj organizoj prenu sur sin la propagandon kaj instruadon de la lingvo kaj poste uzadu ĝin praktike. Tiu mia konvinko estis plifirmigata de la fakto, ke en aprilo 1920 disvastiĝis la famo, ke la Soveta Respubliko alprenis esperanton kaj decidis lernigi ĝin en ĉiuj lernejoj. Ĉe tia ekscio la fama pacista verkisto Romen Rolan skribis interalie jenon:

"...La decido, kiun alprenis la Soveta Registaro... estas historia okazintaĵo, kies konsekvencoj estas grandegaj: ĝi estos bonfarinta por la Homaro pli ol ĉiuj teoriaj diskutoj aŭ partiaj disputoj, en kiuj absorbiĝas la aktiveco de la okcidenta socialismo".

Ĉu do sen troa fantaziero ne estis eble tiam opinii, ke baldaŭ nia mirinde racia kaj facila lingvo estos grandskale metata en la servon de l' tutmonda revolucio? Por venki oni devas utiligi ĉiujn armilojn kaj esperanto estas ja unu el ili,

same kiel aeroplanoj kaj radio-aparatoj...

Post kelka tempo oni bedaŭrinde eksciis, ke la informo fakte estas tute senbaza. Tamen estis ankoraŭ permesite havi la esperon, ke finfine Komintern esploros la aferon kaj alprenos decidon favore al iu internacia lingvo. Cetere studkomisiono estis tiucele starigita okaze de ĝia II-a Kongreso. Sed la tuta afero estis nur rezulto de blufemaj idistoj, kiuj per tiu rimedo sukcesis dum kelka tempo trompi komunistajn partiojn el kelkaj landoj.

Post diversaj tiaj negativaj spertoj, faritaj ĉe partioj aŭ ĉe influhavaj personoj, mi baldaŭ alvenis al la konkludo, ke nia movado povas kreski nur malrapide kaj venki per la solaj fortoj de la esperantistoj mem. Tiom mi jam diris en la jaro 1922 en artikolo kun la titolo: "En la lumo de la sperto" aperinta en la malnova Sennacieca Revuo.

Ĉu post dek jaroj la situacio multe aliiĝis? Ĉu oni povas esperi, ke baldaŭ nia lingvo estos alprenata kaj uzata grandskale de la laboristaj organizoj? Ĉu la Soveta Registaro priatentas nun esperanton en siaj kvinjaraj planoj? Al ĉiuj tiuj demandoj oni povas nur nee respondi.

Estas vere, ke nia movado pli kaj pli altiras al si la atenton de gvidantoj; estas fakto, ke malgrandiĝas la nombro de tiuj, kiuj mokete levas la ŝultrojn ĉe la aŭdo de la vorto esperanto. Sed estus trompi sin mem, se oni konkludus el tio, ke proksima estas nia venko.

Kiam en kapitalistaj landoj oni propagandas esperanton al laboristaj gvidantoj, ili respondas iafoje jenon: "Ni faru unue la revolucion kaj poste ni okupiĝos pri la lingva demando." Nu, en Sovetio la revolucio estas farita: kiel statas tie nia

afero? Se ni esploras la faktojn kun tute malfermitaj okuloj, ni konstatas, ke la esperanto-movado estas konsiderata de la tieaj gvidantoj nur kiel eksperimento, kiu indas atenton, sed kondiĉe, ke la esperantistoj konfesu, ke ilia lingvo neniel povas pretendi fariĝi komuna kulturilo por ĉiuj popoloj. Ne kredu, karaj legantoj, ke mi pentras per nigraj koloroj. Vi juĝos mem per kelkaj citoj el la tezoj prilaboritaj de la „brigado de lingvo-konstrua fako kaj akceptitaj de la Sciencesplora Instituto de la Lingvo ĉe la Popolkomisario de klerigo RSFSR en Moskvo" kaj publikigitaj en la III-a n-ro de "La Nova Etapo":

"... oni devas opini, ke ĉiuj provoj starigi la demandon pri komununiversala lingvo nunmomente kiel vican aktualan taskon estas antaŭtempaj kaj utopiaj..."

"... La belanimaj celadoj de d-ro Zamenhof kaj de l' esperantistaj burĝaj propagandistoj al frateco de popoloj kaj al tutmonda harmonio objekte estis, kiel ĉiuj etburĝaj iluzioj, helpilo de imperiismo. La plej bona montrilo de tio estas la provoj de la internacia socialfaŝismo kontraŭmeti la esperantistan movadon al la proleta internaciismo kaj la ĉiam pli kaj pli ardiĝanta batalo interne en la monda esperantista movado."

"... La kunproksimiĝo de naciaj lingvoj, kiu kondukos al unu monda lingvo, okazas sendepende de esperanto."

"... En la disvolviĝ-procedo de la burĝa socio estis kreitaj sennombraj projektoj de helpaj lingvoj inter kiuj plej vivkapabla sin montris la projekto konata sub la nomo "lingvo esperanto". Ni ne devas tamen malakcepti utiligon ankaŭ de aliaj internaciaj lingvoj, se ilia disvastigiteco faras



tiun utiligon ebla..."

Mi dezirus pli amplekse citi, se la loko permesus; sed mi opinias, ke la ĉi—supraj citoj sufiĉas por konvinki la legantojn, ke nia afero en Sovetio estas tute miskomprenata kaj ne troviĝas en tre favora situacio. Ni tute ne povas esperi, ke baldaŭ Komintern solvos la lingvan problemon laŭ niaj ĉiamaj postuloj. En la tuta tezaro oni vane serĉus iun eldiron, kiu povus esperigi, ke post pli malpli longa tempo esperanto fariĝos la oficiala lingvo ĉe la internaciaj Kongresoj de Kominten kaj por la publikiĝo de dokumentoj kun tutmonda intereso.

Ni sekve devas daŭrigi la batalon kaj tiucele ni bezonas ĉiujn niajn unuigitajn fortojn. Pli firme ol iam ajn ni konvinkiĝu, ke la venko venos nur de malsupre kaj per la faroj de la esperantistoj mem.

Ĉe la konstato, ke longa, tre longa estas la vojo ĝis la fincelo, eble kelkaj Kdoj perdos la emon daŭrigi la iradon. Al tiuj malkuraĝemuloj mi diru: "Ne la celo estas la ĉefa afero, sed la antaŭeniĝo al ĝi. En la irado mem, en la batalo mem ni devas trovi la necesan instigilon por daŭrigi." Okaze de ĉi tiu 400—a n-ro permesu al mi fari konfeson. Dum dek-tri jaroj mi batalis por nia komuna afero; ĉe la komenco mi havis iluziojn; hodiaŭ ili estas for; la celo ne ŝajnas al mi atingebla dum mia pli ol duone forvivita vivo; survoje mi ricevis mokojn, malicajn kritikojn kaj eĉ insultojn; tamen neniel mi bedaŭras mian ekiron. Male, mi forgesas ĉion tiurilate — kaj ĝojas ĉe la penso, ke la insultintoj devis almenaŭ uzi esperanton por eldiri siajn malicaĵojn. Insultado forigas fremdon. Tio estas tre grava!.. Pripensu tion, Gek-doj.

Fremdo estas pli malbona eco ol malestimo. Fremdo estas nerenversebla baro sen komuna lingvo, dum malestimo povas iafoje esti kaŭzata de kalumnio aŭ miskompreno kaj sekve foriĝas tuj kiam malaperas la kaŭzo. Fremdon forigas esperanto kaj tio estas netaksebla merito. Eĉ se mi havus nun la certon, ke neniam nia lingvo fariĝos ĉies posedaĵo, mi tamen nenial bedaŭrus esti dediĉinta al ĝi tempon kaj energion kaj daŭrigus la batalon. Plej alcelinde estas penadi por senĉese plilarĝigi sian horizonton. Esperanto jam nun donas tiun eblon. Krome la Zamenhofa artefaritaĵo fariĝis mia hejma lingvo, kaj la konstato, ke ĝi kvazaŭ fremdigas la francan lingvon en mia menso, estas por mi tute aparta, tre neordinara plezuro, kiun mi bedaŭrus ne ĝuadi.

Volante de nun esti nur simpla soldato en nia SAT-ana armeo, mi tamen sentas min pli forte ligita al ĝi ol iam ajn antaŭe kaj restas ĉiam preta bataladi por ties sukceso. Sed en ĉi tiu kvazaŭa "cigna kanto" mi deziras konvinki la junajn batalantojn pri tio, ke la fincelo devas esti nur flanka afero en iliaj zorgoj kaj esperoj. Insiste mi rediras: vi trovu en la agado mem, en la uzado mem de la lingvo la ĉefajn instigilojn por antaŭenmarŝi.

Se mi ne timus miskompreniĝon, volonte mi proponus, ke sur nian standardon oni skribu novan frazon, nome "Ni estu unue esperantistoj, SAT-anoj".

En mia penso tio signifas, ke oni ne povas esti konsekvenca anarkisto, komunisto, socialisto, ne celante detruiri la lingvajn barojn, kiuj apartigas, fremdigas la homojn. Paroladi pri tutmonda unuiĝo de la laboristaro kaj obstine ignoradi esperanton, tio estas ĉu stulto, ĉu malsincero, ĉu

kaŝa aŭ nekonscia ekspluatemo. Esti en SAT unue esperantisto, tio ne signifas, ke en sia partio, en sia sindikato oni ne devas esti ankaŭ tie unue partiano, unue sindikatano. Tio nur signifas, ke por akceptigi esperanton al niaj organizoj ni devas esti unuigitaj, kaj nia unueco povas esti garantiata nur se en la esperantaj rondoj ni vole bridas niajn personajn politikajn konvinkojn. Se tion estus kompreninta la granda nombro da K-doj, kiuj aliĝis al SAT ekde ĝia fondiĝo, ĉi tiu 400-a n-ro povus esti eldonita 20 000-ekzemplere. Ni meditu pri tiu fakto, se ni sincere deziras sukcese almiliti la laboristajn organizojn, por trudi al ili esperanton...

Sed, kiam oni prikonsideras la situacion, en kiu nuntempe baraktas la homaro, eble estus pli saĝe gratuli al si, ke nia gazeto povis atingi ĉi tiun 400-an numeron. Do, antaŭen! por ke ĉe la 500-a la estonta gvidanto povu paroli pli entuziasme. Kun neŝanceliĝa unuecemo kaj kun la certo, ke ili faras utilan kaj pozitivan laboron, la SAT-anoj spitu la batojn de l' sorto kaj antaŭeniru.

E. Lanti.

\*            \*  
\*  
\*  
\*

**Piednotoj**

1. [↑](#) "Sennaciulo" de 12.1.1933

## Epiloge<sup>[1]</sup>

Lastatempe mi ricevis relative multajn leterojn de K-doj, kiuj diras sian bedaŭron kaj eĉ ĉagrenon pro mia decido forlasi la gvidadon de SAT. Kelkiuj insistas, por ke mi ne persistu en mia decido. Nature tiuj simpatiesprimoj ne lasas min indiferenta kaj mi dankas pro ili; sed nenio povus kontraŭpezi mian deziron tute liberiĝi el respondeca posteno.

Jam de kelkaj jaroj mi sentas min kvazaŭ katenita per la penso, ke senĝena, tute senrezerva esprimo de miaj ideoj povus eble malutili al nia organizo. Kvankam mi neniam celis, nek eĉ deziris, ke mia persona kompreno pri diversaj soci-politikaj aferoj fariĝu la oficiala vidpunkto en SAT, tamen la sperto montris, ke ekzistas la emo ĉe multaj personoj konsideri miajn dirojn kiel ion oficialan. Tia stato estas bedaŭrinda, sed praktike neŝanĝebla aliel ol per demeto de ĉia respondeco en la gvidado de nia Asocio.

Oni do ne kredu, ke mia decido rezultas de ia subita kaprico; fakto estas, ke jam delonge mi intencis forlasi la gvidpostenon. Sed kompreneble tion mi ne farus, kiam ardis la batalo, kiu devis decidi, ĉu SAT restos aŭ ne la organizo, kia ĝi estas ekde sia fondiĝo. Ili grave eraris, tiuj blufuloj, kiuj opiniis, ke sufiĉos superŝutadi min per kritikoj, riproĉoj kaj eĉ insultoj, por ke mi lasu ilin libere fari el nia sendependa Asocio filion de politika partio.

Inter tiuj skismigintoj, kelkaj sendube estis sinceraj. Mi memoras, kun kia entuziasmo ili kriis sian kredon pri proksima forfalo de la kapitalismo, pri la certo, ke ilia partio baldaŭ kaptos en la manojn la regpotencon. En iliaj okuloj sufiĉis dubeti pri tio, por esti rigardata kiel kontraŭrevoluciulo, kiel socialfaŝisto. Ho ve! jam du-tri jaroj forpasis kaj kion ni vidas? En la sola lando, kie la kompartio konsistigis amasmovadon, la alsalto-taĉmentoj de Hitler povas preskaŭ sen ia kontraŭstaro okupi urb- kaj sindikatdomojn. Flago kun svastika insigno (hoko-kruco) flirtas sur la Libkneĥta Domo en Berlino... Kaj ĉe la horizonto nenia ruĝarmeo vidiĝas, venanta por defendi la komunistojn. Plorindaj konstatoj! Kaj kiom mi dezirus male konfesi, ke mia skeptiko estis senbaza! Estas ja dolore pravi en tiaj cirkonstancoj... Kiu do ne vidas klare hodiaŭ, ke la laboristaj esperantistoj pli ol iuj aliaj havas intereson ne utiligi nian lingvon por agiteca propagando, se ili volas trafe servi la esperantan aferon?

Ĉiam mi batalis, por ke nia peresperanta entrepreno ne havu politikan programon, ne difinu al si politikajn taskojn, sed povu tamen per sia inform- kaj eduklaboro esti utila al ĉiuj laboristaj organizoj; mi ja konsiderus kiel ian perfidon, se SAT konsentus servi nur al unu partio – kia ajn ĝi estas. Nia movado retrovis sian spiritan ekvilibron; ĝi havas antaŭ si rektan vojon kaj ne ekzistas nun granda danĝero, ke ĝi deflankiĝu, sekve de malhonestaj aŭ fanatikulaj artifikoj.

Movado devas ekzisti sen kuratoroj kaj vole nevole ĝis nun la fondintoj de SAT ludis tian rolon. Ĝi eble estis necesa en la komenca tempo, sed mi opinias, ke nun ĝia pluigo povus

eĉ esti malbona. Estas necese, ke aliaj manoj ekprenu la direktilon. Tial mia nekontraŭstarebla deziro demeti ĉiun oficialan rolon, ne povas domaĝi al nia komuna entrepreno.

Kompreneble la fakto, ke mi ne plu tenos la direktilon, neniel signifas miaflanke seninteresiĝon pri la gvidado. Mi ja restas SAT-ano kaj estas la devo de ĉiu interesiĝi pri la vivo kaj stato de sia organizo.

Nun sentante min preskaŭ liberigita de respondeco, mi emas ĵeti ekrigardon malantaŭen por ĉerpi instruojn el la faritaj spertoj. Proze mi intencas kanti mian "cignan kanton", se la legantoj permesos, t.e. se ilin ne tedos tiu mia projekto. Ĉar por plenumi tiun taskon restas ankoraŭ kelkaj monatoj, mi do povos ere liveri miajn pensojn kaj en tioma kvanto, en tia formo, ke al neniu ili donos kapdoloron. Verŝajne mi ankoraŭ herezumos, eble eĉ pli ol kutime, tial ke mi jam sentas pli libera mian plumon. Ĉiu do bonvolu ne forgesi, ke mia nura celo estas instigi la leganton al memstara pensado. Nenial mi deziras, ke miaj ideoj estu sen kritiko akceptataj; male oni rilatu al ili kritike, antaŭ ol ilin akcepti aŭ rifuzi.

Kompreneble du plus du estas kvar. La plej profunda cerbumado pri tio ne povas alkonduki al alia konkludo. Sed tia konstato neniel signifas, ke veroj devas esti krede akceptataj. Per kredeca akcepto ili perdas sian efikon: ili fariĝas kvazaŭ senkarnaj mumioj, kiujn diversspecaj religiuloj respektas, adoras en luksaj, senutilaj maŭzoleoj...

Sufiĉa prologo, ĉu ne? al mia epiloga babilado. Ĝis la!...

E.L.

\* \*  
\*

## Piednotoj

1. [↑](#) "Sennaciulo" de 25.3.1933.



## Fine ni trafis la celon... [1]

Estis jam malfrue en la nokto, kaj mi pretiĝis enlitiĝi, kiam oni insiste sonorigis ĉe la sojlo de mia loĝejo. Malferminte la pordon, kun granda miro mi ekvidis la bolŝevikan esperantiston Fermal kaj la menŝevikan Maraŝ. Kion, diablo! volas tiuj entruduloj mi pensis? Sur la vizaĝo de la du neatenditaj kaj nedezirataj vizitantoj radiis esprimo de kontento kaj de entuziasmo, kaj tuj ekparolis Fermal:

– Pardonu, K-do Lanti, sed ni estas certaj, ke vi ne riproĉos al ni, kiam vi ekkonos la celon de nia vizito. Ni alportas al vi tiom eksterordinare gravan novaĵon, ke vi eĉ dankos al ni pro tio, ke ni ne volis eĉ unu solan horon prokrasti ĝian konigon al vi...

Invitinte la du gajmienulojn, ke ili eniru mian ĉambron, mi diris komplezeme:

– Nu, bonvolu sidiĝi; mia aŭdorgano estas streĉegita por aŭskulti vian raporton...

Tiam per iom knaranta voco Maraŝ ekparolis:

– Kiel vi certe scias, antaŭ kelkaj monatoj la supera instanco de la II-a Internacio sin turnis al tiu de la III-a kun propono pri aranĝo de unuecfronta agado kontraŭ la faŝismon. Unue venis el Moskvo ne tre favora respondo, sed post kelkaj personaj intertraktoj de la gvidantoj finfine estas nun atingita plena interkonsento, kiu esperigas post kelka

tempo ne nur unuecfrontan agadon, sed eĉ rekuniĝon de la disigitaj fortoj en unu saman organizon. Tial ke mi kaj Fernal havas sufiĉe intiman kontakton kun la gvidantoj de niaj respektivaj partioj, ni povis esti jam informitaj pri la okazaĵo, pri kiu ĉiuj komunistaj kaj socialistaj gazetoj morgaŭ larĝe raportos...

– Ni tamen ne venus ĝeni vin nur por sciigi tion, se en la interkonsento farita ne estus ankaŭ tre grava decido pri esperanto, intermetis Fernal.

– Kompreneble, akcentis Maraŝ, prezentante al mi paperfolion kun peto, ke mi bonvolu mem konatiĝi per propraj okuloj kun la eksterordinare grava teksto, kiu fakte signifas la definitivon venkon de esperanto en la laboristaj rondoj.

Preninte en la manojn la folion, kun streĉa atento kaj granda surprizo mi legis jenon:

"... Kiel plia signo, ke la interkonsento farita inter ambaŭ organizoj (II-a kaj III-a Intemacioj) signifas radikalan ŝanĝon en ilia ĝisnuna politiko kaj taktiko, estas decidite fari ĉiujn necesajn aranĝojn, por ke la internacia lingvo esperanto fariĝu kiom eble plej baldaŭ la oficiala lingvo por ĉiuj internaciaj rilatoj. Tiu decido estas motivigita per la sekvaj konsideroj:

"1) La finfina emanĉipiĝo de l' proletaro povas okazi nur mondscale; konsekvence necesas, ke la laboristoj el ĉiuj landoj estu pli kaj pli intime interligitaj kaj sentu sin solidaraj. 2) Bedaŭrinde la malsamlingveco tre malhelpas, ke la simplaj laboristoj sentu kaj spertu solidaron. 3) Tia stato plie estas unu el la kaŭzoj de la facilo, laŭ kiu demagogoj kiel

Musolini kaj Hitler povas utiligi la naciemon de la popolamasoj por trompi kaj sklavigi ilin. 4) La naciismo ja estas unu el la plej intensaj kaj danĝeraj ideofortoj kaj pasioj, kiuj impulsas la homojn; sekve ĉiu taŭga rimedo por kontraŭbatali la naciemon devas esti aplikata kaj esperanto nekontraŭdireble estas unu el tiaj rimedoj.

"Por efektiviĝi tiun nian decidon, jenaj praktikaj aranĝoj estu senprokraste farataj: a) Entrepreni en la gazetaro viglan kaj daŭran propagandon por esperanto; b) ekstrakti kun la laboristaj esperantaj organizoj, por ke ties membroj helpu nin en la efektivigo de nia decido; c) rekruti ĉiujn spertajn kaj sufiĉe klerajn esperantistojn por komisi al ili la tradukadon en esperanton de ĉiuj gravaj verkoj kaj dokumentoj necesaj por la klerigado kaj informado de la tutmonda laboristaro; d) aperigi komence monatan kaj iom poste dusemajnan gravan revuon en esperanto; e) postuli, ke post unu jaro neniu nova funkciulo aŭ oficisto povos esti akceptata, se li ne scipovas esperanton; f) en la landoj, kie la regado jam estas en la manoj de reprezentantoj de l' proletaro, tie esperanto estu devige instruata en la lernejoj..."

– Mi apenaŭ povis kredi je miaj okuloj kaj suspekteme rigardis al Maraŝ kaj Fermal: "ĉu tio ne estas mistifiko", mi pensis. Sendube Fermal vidis mian suspekton kaj li eldiris:

– Ni komprenas vian miregon, K-do Lanti, sed tiu teksto estas tute aŭtentika kaj morgaŭ vi povos legi ĝin en la partiaj gazetoj. Cetere por montri al vi, kigrade aliĝis la spiritostato de la gvidantoj, eksciu, ke jam Trocki estas survoje al Moskvo, kie de nun li kunlaboros bonkamarade kun Stalin. Simile okazas en Sovetio rilate al malliberigitaj

anarkistoj kaj menŝevikoj.

Aliparte en la 30-paĝa raporto el kiu ni kopiis la tekston, kiun vi ĵus legis, estas deklaroj tre signifoplenaj pri la nova sinteno de la komunistaj kaj socialistaj gvidantoj. Ambaŭ konfesas tute malkaŝe kaj sincere, ke ili faris en la pasinto multajn erarojn kaj ne taksis je ĝusta valoro plurajn faktorojn, kiuj tamen ludas grandan rolon en la evoluo de l' socioj. La kreskanta minaco de l' fasismo finfine saĝigis niajn gvidantojn kaj tial ili decidis ĉesigi la fratbatalon...

. . . . .  
. . . . .

Mi frotis al mi la okulojn kaj mirigite konstatis, ke estas tute mallume en mia ĉambro. Kio do okazis? Ĉu mi songis? Kie estas Fermal kaj Maraŝ? Malaperintaj!...

Ne povas esti dubo: mi faris belan, tre belan songon...

E.L.

## Piednotoj

1. ↑ "Sennaciulo" de 25.4.1933.

## Marks ne estis marksisto... [1]

Laŭ mia promeso ĉi tiuj epilogaj diroj ne devas esti enuaj kaj kaprompaj. Mi kutimas plenumi promesojn, libere faritajn, sed ĉu estas eble paroli pri marksismo, ne devigante la leganton dormige cerbumi? Eble jes. Almenaŭ mi provos. Bonvolu aŭskulti jenan anekdoton:

Antaŭ dektri jaroj, ĉe la fondo de SAT en Prago, mi havis la okazon konatiĝi kaj interparoli kun K-do, kiu jam de longe estas profesoro pri marksismo. Dum nia interparolo li demandis:

– Ĉu vi konas persone la aŭtoron de tiu serio da artikoloj, aperintaj en "Esperantista Laboristo" kun la titolo: "For la Neŭtralismon!" kaj subskribitaj "Sennaciulo"?

Aplombe mi respondis, ke ne. Kaj por trankviligi mian konsciencon, mi diris al mi: nur saĝuloj ja konas sin mem.

– Almenaŭ mi estas certa, ke li estas marksisto, aldiris mia interparolanto.

Verdire, kiam mi aŭdis tiujn vortojn, mia surprizo estis granda. Tiutempe mi eble jam ne estis leginta eĉ "La Komunistan Manifeston". Ĝis tiam la socipolitikaj aŭtoroj, kun kies verkoj mi konatiĝis, estis Bakunin, Kropotkin, Reklu, Grav k.a. anarkistaj teoriuloj. Forpasis relative multaj jaroj. La tutan verkaron de Marks mi funde ne studis; tamen el ĝi kaj pri ĝi mi legis multon. Malgraŭ tio mi ne kuraĝus

diri, ke mi estas marksisto. Tion mi tute ne scias kaj eĉ ne deziras scii. Starigante soci-politikan demandon, neniam mi ekhavas la personon traserĉi en la verkoj de Marks por trovi respondon. Mi havas la konvinkon, ke neniu el la plej kompetentaj komentistoj de Marks povas prave havi la pretendon scii, kiuj estus la pensoj, la sinteno de ilia majstro antaŭ nuntempaj problemoj.

Sendube estas interese scii precize, kiel okazas la ekspluatprocezo de la kapitalo super la laboro. Tion montris Marks tre klare. Sed tia scio ŝajnas al mi nur flanka afero. Koni la kaŭzojn de malsano ne ĉiam sufiĉas por resanigi pacienton. Doni bonan recepton povas esti tute vana afero, se la malsanulo ne scias, ne povas aŭ ne emas apliki ĝin. La persona, sugesta influo de kuracisto povas iaforte pli efiki ol medikamento. En la vivo de l' socioj psikologiaj faktoroj, senpezaj fortoj ankaŭ ludas gravan rolon. Eĉ en ĥemia komponaĵo katalizaj fenomenoj estas necesaj por ĝin modifi. Ĉu Marks, kaj ĉefe la t.n. marksistoj, taksas sufiĉe alte tiajn faktorojn? Mi emas kredi, ke ne. La klarigoj, kiujn ekzemple ili donas pri la lastatempaj okazintaĵoj en Germanio, ŝajnas al mi tute ne sufiĉaj, ne konvinkaj.

En la antaŭparolo al "[Naciismo](#)" mi parolis pri la forto de ideoj kaj la Hitlera movado tre bone pravigas kaj ilustras tiun vidpunkton. En Germanio la socialisma ideo jam forte penetris en la mensojn de l' proletaro; sed la naciismo restis tamen tre forta, tial ke neniu partio penadis ĝisradike detrui tiun ideon per laŭcelaj rimedoj. Sufiĉis do al lerta demagogo kunigi tiujn du ideojn (naciismo kaj socialismo) por starigi movadon, kiu donis al li la regadon super la lando.

Sed ne estas mia intenco pritrakti nun tiun temon. Mi celas nur altiri denove la atenton de la SAT-anoj al tio, ke estas ĉiam danĝere akcepti iun ajn teorion, doktrinon senkomprene, blinde, fide al ĝiaj komentistoj. Tia akcepto signas ĉe la ano religieman spiritostaton. Kiam homoj sin demandas unue, ĉu ĉi tio aŭ tio konformas aŭ ne kun iu doktrino, anstataŭ senantaŭjuĝe esplori la realaĵon, la krudajn faktojn, tio estas signo de spirita malviglo kaj kondukas neeviteble al starigo de nova religio kun novaj pastrokomentistoj. Ekzemple, kiam sovetiaj teoriemuloj komencis cerbumi por doni marksisman pravigon pri la ekzisto de esp-o, estas nekredeble, kiom da sensencaĵoj ili eldiris, kiom da ridindaj skolastikaĵoj ili elpensis...

Ĉe la VIII-a Kongreso de SAT, kiun partoprenis pluraj sovetiaj K-doj, la SAT-anoj agis tre saĝe, akceptante unuanime aldonon al nia Statuto, laŭ kiu ni ĉiuj devas zorgi, ke niaj opinioj neniam fariĝu nediskuteblaj dogmoj.

Se la marksismo difinis ĝuste la vojon, kiun nepre sekvos la homa socio, la venko de Hitler povas esti nur nelongdaŭra. Lia fajra detruado al la marksistaj libroj estas do tute vana entrepreno. Sed, sammotive, ne multe helpas al la sukceso de l' marksismo la aserto, ke ĝi estas la vero, la sola, kiu devas esti oficiale kaj devige encerbigata...

Sur la propagandiloj, kiujn ni eldonis antaŭ dektri jaroj, mi relegas interalie jenon:

"La ideala socio ne devenos tute preta el Revolucio, kiun kelkiuj prezentas al si kiel panaceon. Estas do nepre necese sin prepari, sin ekzercadi al la tasko de mondcivitanoj, forigante el si mem la nenaturajn naciecojn, kiujn la ŝtata,

enlanda edukado metis dum nia infanaĝo en niajn kapon kaj koron. SAT celas kutimigi sian anaron al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo. Ĝi zorgas pri la kreado de spiritostato, kiu harmonios kun la estonta socio, kiam la perforto nuna, la ekonomiaj, lingvaj kaj ŝtataj limoj ne plu ekzistos. SAT celas krei sennaciecan popolon."

Mi ne scias, ĉu tiuj diroj estas aŭ ne marksistaj. Skribante ilin, tiam mi tamen estis bolŝeviko, ĉar partia membro-karto kuŝis en mia poŝo; tiam miaj sampartianoj ne malaprobis tian "idealismon". Ĝi ne ankoraŭ fariĝis herezaĵo. Hodiaŭ, rigardante al la disigita laborista movado, certe neniu asertos, ke tia stato estas la rezulto de troa idealismo: ĉie regas suspekto, malamo, fanatiko, mensogo, fratbatalo. Tial, pretiĝante forlasi la gvidpostenon, mi emas memorigi al la K-doj la principojn, kiuj ekde la komenco signis al ni la vojon. Miaopinie, ili restas same taŭgaj hodiaŭ; ili certigis la sukceson de SAT dum multaj jaroj kaj nur kiam fanatikuloj kaj "realistoj" volis ignori ilin, venis la disiĝo kaj malprospero.

Al tiuj, kiuj sin nomas marksistoj, mi volas memorigi, ke iun tagon, aŭdinte, ke ekzistas "marksistoj", Marks mem pikparole eldiris: "Mi almenaŭ ne estas marksisto!.." La genia aŭtoro de "La Kapitalo" sendube jam ĉagreniĝe antaŭvidis, ke liaj instruoj fariĝos por kelkaj el liaj disĉiploj dogmaj, senvivaj parkeraĵoj.

E.L.



# Piednotoj

1. [↑](#) "Sennaciulo" de 25.5.1933.

## Principoj de unueco<sup>[1]</sup>

Jam de kelka tempo oni diskutas en lab. esp-aj gazetoj pri kunigo de ĉiuj proletaj esp-istoj en unu solan organizon. Al tia demando certe rilatas simpatie ĉiu sincera K-do. Sekve, ni ĉiuj devas bone pripensi la aferon, cerbumi por trovi la plej facile ireblan vojon kaj tiucele difini la gvidprincipojn, kiuj donu la ĝustan orientadon kaj certigu eviton de erarpaŝoj.

Por pristudi tiun problemon, ĉu ni staru ĉe pure abstrakta pozicio? Aŭ ĉu ni prikonsideru la faktojn tiaj, kiaj ili estas, la realaĵon sub ĝia kruda aspekto? Ĉiu certe konsentos, ke la lasta vidpunkto estas la sole taŭga.

Larĝtrajte, unueco ekzistis pere de SAT ĝis la jaro 1930. Kial ĝi rompiĝis? Ĉu la principoj metitaj en la Statuton de la Asocio estis ne ĝustaj, ne celkonformaj? Al tiuj demandoj mi respondos, paroligante faktojn. Ĉiu persono, kiu volos esplori senpasje kaj serioze la historion de nia movado, helpante sin per la dokumentoj, troveblaj en protokoloj de kongresoj aŭ aliaj presaĵoj, nepre alvenos al sama konkludo kiel la mia.

Sed antaŭ ol komenci tiun esploradon, mi opinias necese atentigi la legantojn, ke ili ne havas respondecon en la gvidado de SAT kaj sekve parolas nur en mia propra nomo. Eble la nuna Plenum-Komitato aliel prezentas al si la

problemon... Mi ne havas alian celon, alian deziron ol helpi al Gek-doj prijuĝi mem la demandon.

## I.

La unua principo, kiu direktis ĉe la fondo de SAT estis, ke necesas apartigi laŭklase la esperantan movadon; ke tia apartigo estas necesa en la intereso mem de l' tuta esp-a movado. En la tri eldonoj de "For la Neŭtralismon!" oni ja povas legi:

"Kiam esp-o sukcesas en burĝaj rondoj, mi kompreneble ĝojas. Konvinkita mi estas, ke universala lingvo entenas econ revoluciigan. Samkiel cetere ĉio scienca: Internaciismo estus ja nur revo, se ne ekzistus fervojoj, telegrafo, aviadiloj ktp. Vole nevole la scienculoj laboras por tutmonda revolucio..."

Al tio konsentis ĉiuj SAT-anoj. Neniam do temis ĝeni aŭ detruigi la neŭtralan movadon. Tamen iu persono, kiu ĉe la fondo de SAT ne tuj aliĝis kaj dume preferis koketi kun neŭtraluloj, konigis siajn sekretajn pensojn en novembro 1929. Senbrida komandemo kiaj regemo montriĝas en jena cito, ĉerpita el la n-ro 1 de "Kunligilo", konfidenca bulteno, kiun ricevis en la tempo de l' preparo al la skismo, nur la anoj de la Komunista Frakcio, kaj kiu venis en miajn manojn per iu mistera vojo:

"Fakte por ni SAT estis ĝis nun valora de du vidpunktoj: 1) kiel movado frakasanta kaj iom post iom per si anstataŭanta la neŭtralan movadon esp-an kaj 2) kiel asocio prezentanta certajn eblojn doni informojn pri la lab. kaj la klasbatala movado al la SAT-anoj kaj per ilia helpo al la

laboristoj-proletoj diverslandaj.

"La klasbatalaj esp-istoj kaj intelektaj fortoj per ili reprezentataj estas jam nun sufiĉe maturaj por povi ankaŭ memstare, sen interveno de politike senforma asocio simila al SAT, daŭrigi la laboron de la frakasado kaj anstataŭado de neŭtrala movado..."

Parolinte poste pri "fals-Marksista gvidado de SAT" kaj pri "fuŝa oportunisma filozofado", la konspiranto daŭrigas:

"Se tiu fuŝado oportunisma daŭros kaj se ni ne povos en la kadroj de SAT ĝin malhelpi, tiam nature ni devos konstati, ke SAT perdas por ni ĉian valoron... ke ĉiuj klaskonsciaj kaj klasbatalpretaj revolucianoj devas foriri el SAT kaj serĉi novajn vojojn por efektiviĝi sian revolucion agitpropagandan peresperantan laboron inter la laboristoj diverslandaj."

Tiu ridinda pretendo kaj maldelikata ruzo estas anonime esprimitaj. Sed mi timas neniun dementon, asertante, ke ili estas de E. Drezen, kiu iniciatis kaj gvidis la tutan skisman entreprenon en nia movado.

Ni do notu bone en la memoron, ke jam en la jaro 1929 ekzistis sekreta organizo celanta: 1) Trudi al SAT taskojn, kiujn ĝi neniam havis antaŭe; 2) tiucele kapti ĝian gvidadon; 3) en okazo de malsukceso fari skismon. Se la spaco permesus, mi povus liveri pri tio multajn aliajn pruvojn, ĉerpitajn el la 9 n-roj de "Kunligilo", kiujn mi posedas kaj konservas por plene informi eventuale personojn, kiuj havas en tio intereson.

## II.

La dua principo, kiu ĉiam havis la unuaniman aprobon en ĉiuj niaj kongresoj, estas eldirita en la gvidrezolucio, voĉdonita ĉe la fondkongreso de SAT en Praha:

"Konsiderante: a) ke la ĉefa tasko de nia Asocio povas neniel esti politika, ĉar jam ekzistas klasbatalaj organizoj; b) ke samkiel antaŭ 20 aŭ 50 jaroj estis nepre necese, ke ĉiuj praktikantoj de esp-o – ĉu pastroj, ĉu anarkistoj, ĉu policanoj – ariĝu por montri per faktoj, ke artefarita lingvo povas esti uzata en la praktiko, estas nun necese, ke ĉiuj esp-istoj, anoj de diversaj klasbatalaj organizoj, ariĝu en unu solan Asocion por montri al la proletaro, per imponaj faktoj, kiom utilega estas esp-o por la batalo kontraŭ la kapitalisma sistemo."

Kiaj estu tiuj "imponaj faktoj", kiuj konvinku la proletaron pri la utilego de esp-o? Ili povas esti nur jenaj: kongresoj, ampleksaj kaj ofte aperantaj gazetoj, abunda kaj valora literaturo, informaparato liveranta sciigojn al lab. nacilingvaj gazetoj, praktikaj servoj inter la esp-istoj.

Ĉion tion provis plenumi SAT kaj kelkrilate ĝi sukcesis: okazis ja ĉiujare impona kongreso kaj "S-ulo" estis antaŭ la skismo 12-paĝa, semajna, kaj publikigis la materialon de informaparato en la rubriko: "Esperanta Servo".

### III.

La tria principo estas, ke por la prosperigo al nia movado, ĝi devas esti dufaka: 1) poresp-a (LEA-oj); 2) peresp-a (SAT) kaj ke mondlingvanoj nenial devas organiziĝi internacie, sed sennaciece.

Kiam oni vidas, ke la naciismo venke antaŭeniras ĉie en la mondo; kiam oni ĉagrene konstatas, ke unu post la alia naciaj sekcioj de diversaj Internacioj fiaskas en sia laboro kaj malaperas antaŭ la faŝismo, ŝajnas al mi tute superflue argumentadi por montri la pravon de tiu lasta principo...

\* \*  
\*

Tiuj tri principoj estas tute klare eldiritaj en la Statuto de SAT, kiu estis referendumo akceptata de grandega plimulto. Tamen okazis skismo. Ĉu pro maltaŭgeco de la Statuto? Ĉu pro malobeo al ĝi? La faktoj parolu: Kiel ni vidis, nia Asocio ne havas politikajn taskojn kaj ĉiuj tendencoj povas esti en ĝi reprezentataj. Kontraste, en la Statuto de IPE ni trovas:

"... b), unuigas, organizas kaj gvidas ĉiujn proletajn esperanto-organizojn kaj esperantistojn sur bazo de la revolucia klasbatalo, de la dialektika materialismo, de proleta internaciismo."

Kion signifas tio? Tio signifas tute klare, ke la anarkistoj, sindikatistoj, ISK-anoj k.a. kiuj ne riverencas senrezerve antaŭ la dialektika materialismo, ne povas havi lokon en IPE. Kaj en la gvidrezolucio, akceptita ĉe la fondkongreso de la skisma organizo, oni legas interalie jenon:

"7. IPE plej akre plu batalos kiel kontraŭ oportunisma sennaciismo, tiel ankaŭ kontraŭ la reformisma ideologio de la socialdemokratio, subtenantaj la imperialismajn rabadojn kaj militojn, kiuj plenumas la taskon deteni la laboristojn de

klasbatalo kaj malhelpi la efektivigon de la ruĝa unueca fronto."

Nu, ankaŭ sennaciistoj kaj socialdemokratoj devas stari ekster IPE.

Sed iu povus argumenti jene: la grandega plimulto de la organizitaj laboristoj akceptas la dialektikan materialismon kaj pro tio nur ĝi povas konsistigi la larĝan konstruan bazon por nia movado. Feliĉe tia sofismo estas okulfrape videbla. La sperto ja instruas, ke la anoj de tiu marksisma doktrino eĉ ne konsentas inter si pri ĝia apliko. Ekzistas diversaj skoloj, kiuj pretendas pli bone unuj ol la aliaj kompreni kaj instrui tiun teorion. Sufiĉas mencii la nomojn de Kaŭcki, de Stalin, de Trocki por ke oni tuj konsentu pri mia diro. Kaj lastatempe, la eksprezidanto de Komintern, Zinovjev, estis sendata en malliberejon por tie lerni dum 10 jaroj la ĝustan komprenon pri apliko de marksismaj principoj.

Ekrigardante super la historion de la lab. movado, oni ekvidas, ke en ĝi estis senĉesa dissplitiĝo, rekuniĝo, denove skismiĝo ktp. Sekve, se oni volas sincere kaj prudente difini la principojn, kiuj ebligu al ĉiuj lab. esp-istoj senescepte kuniĝi en saman organizon kaj tie daŭre kunlabori, la unua kondiĉo estas rifuzi kiel oficialan, iun ajn apartan vidpunkton de iu ajn el la nun ekzistantaj organizoj. Tial ke nia movado ne povas, kaj sekve ne devas, ludi politikan rolon, plenumi pure politikajn taskojn, estus ja tute malsaĝe trudi al ĝi iun ajn soci-politikan programon.

Kiuj parolas pri unueco kaj pli malpli kaŝe pretendas trudi la vidpunkton de sia propra partio, tiuj ne parolas sincere, se ili estas inteligentaj. Se ili estas sinceraj, fanatiko blindigas

ilin. Ambaŭkaze tiaj predikantoj pri unueco estas neniel atentindaj...

\* \*  
\*

El tiu rapida ekzameno super la problemo vidiĝas klare, ke la principoj, laŭ kiuj fondiĝis SAT, antaŭ 14 jaroj, estas la sole ĝustaj kaj ke la skismo, okazinta en nia movado, rezultas de tio, ke tiujn principojn forgesis, malatentis aŭ konscie malobeis parto el niaj Gek-doj. Pri la konscia malobeo, pri la decida intenco rompi nian unuecon, ni cetere trovas pruvon, cinike konfesitan, en la n-ro 44 de "Intemaciisto", julio 1932:

"Kun ĉiu tago pli klariĝas la neeblo, konservi iujn mezajn poziciojn inter la reakcia burĝaro kaj la batalanta por sia liberiĝo proletaro. En tia situacio estiĝas tute komprenebla la fakto, ke ankaŭ la proleta esperantistaro rompas decidplene ne nur kun la neŭtrala, fakte burĝa esperanta movado, sed ankaŭ kun la nebulecaj, fakte oportunistaj, malklasbatalaj ideoj de supernacia kaj supertendenca SAT.

"Se tio ne okazus, la proleta esperantistaro ne meritus la nomon proleta kaj la tuta "proletesperantismo" devus esti konsiderata kiel tromplogilo por laboristoj, certacele utiligata de la burĝaro. La skismo en SAT, la apartiĝo de la revoluciaj elementoj for de la elementoj oportunistaj kaj renegatrevizionistaj estis necesa kaj antaŭdifinita deper la tuta logiko de la disvolviĝantaj sociaj interbataloj." (La substreko estas nia.)



La supra skisma deklaro estas subskribita E. Drezen kaj destinita al la unua kongreso de IPE. Kion li sekrete diris en la konfidenca "Kunligilo" du jarojn antaŭe, tion li malkaŝe konfesas, kiam la delonge preparita skismo estas efektivigita... Tiaj estas la faktoj, kiujn mi ne volas komenti, ĉar eble bonanimaj personoj dirus, ke mi parolas pasie.

– Nu, flustras al mi en la orelon iu el tiuj naivaj, kredemaj homoj, kiuj nepre volas trovi pravigon al la plej fiaj kaj malsaĝaj faroj, vi mem faris skismon en la esp-a movado, kriante: "For la Neŭtralismon!" ĉu do ne estas ĝuste opinii, ke 10 jarojn post la fondo de SAT venis ankaŭ la tempo por fari similan rompon en nia movado?

Por montri la senvalorecon de tiu argumento, mi faros nur du rimarkigojn kaj kelkajn mallongajn citaĵojn: 1) Hodiaŭ, kiel antaŭ 14 jaroj, mi havas la konvinkon, ke laŭklasa apartigo de la movado estas necesa, kaj sekve nun ne parolas pri rekunigo de la burĝa kaj proleta movadoj. 2) La sperto montris, ke SAT estas viv- kaj laborkapabla.

Kaj nun ni aŭskultu la konfesojn, faritajn ĉe la lasta kongreso – pardonu! mi eraras, temas nur pri "konferenco" de IPE. Kiel mi diris komence, nur la faktoj kvazaŭ parolu. Sed por ke ili estu tute klare kompreneblaj, necesas antaŭe memori, ke la skismigintoj celis frakasi la neŭtralan movadon kaj detruigi SAT-on. Tiucele estis starigitaj IPE kaj ISLK (Internacia Sekretariaro de la Lingvo-Komisionoj):

"Ĉu hodiaŭ ni kapablas grandskale entrepreni la organizadon de kolektiva korespondado? Certe ne! La lingvonivelo de IPE-membraro estas hontinde malalta; tiom,

ke nur etan frakcion de la tuta anaro ni povas taksi tradukkapablaj."

.....

"En "Sur Posteno" estas pli da enigmoj ol troviĝas sur la dorsa paĝo." (Estas delikata maniero de la aŭtoro por diri, ke la IPE-gazeto estas fuŝredaktata.)

.....

"La fakto, ke ekzistas tia aferstato en la lingvo-kampo, per si mem pruvas ke ISKL plene fiaskis en sia laboro."

.....

"Kelkaj montras kontraŭstaron al Plena Vortaro, dirante, ke ĝi havas multajn mankojn. Tion mi povas konsenti. (Verŝajne la K-do parolas pri la unua eldono. E.L.), sed ni konstatas ankaŭ, ke ĝis nun ĝi estas la sole taŭga kaj uzinda verko por nia celo... kaj la konferenco sagace agis, decidante, ke la Plena Vortaro estu provizore la akceptita vortaro de IPE..."

Jack Kane, Sekretario, LK por BLEA "Sur Posteno", n-ro 26, oktobro 1934.

Ĉu tiu konfeso de honesta, sed trompita K-do ne pruvas plej evidente, ke la tuta skisma entrepreno de la fondintoj de IPE estis nur detrua kaj malutila al la tuta esp-a movado? Trompo, blufado kaj ŝtelo ne konsistigas bazon por starigi fortan, labor- kaj vivkapablan organizon. La estonto pli kaj pli montros la pravon de mia aserto...

Oni povas rigardi ĉiujn flankojn de l' problemo kaj vidiĝos, ke por ebligi kaj certigi unuecon en nia movado, ne ekzistas aliaj principoj, ol tiuj, kiujn alprenis la fondintoj de SAT – kaj kiuj estis aprobataj dum preskaŭ dek jaroj de plej diverstendencaj Gek-doj. Kiuj deziras sincere la kuniĝon de ĉiuj lab. esp-istoj en unu solan organizon, tiuj devas agnoski tiujn principojn kaj ilin obei.

Mi scias, ke oni povas starigi plurajn demandojn, rilate al la praktika funkciado de la Asocio, la eblo starigi sekciojn kaj politikajn frakciojn, kiuj rajtas uzi la aparaton de la ĝenerala organizo por siaj apartaj celoj, solvas kontentige multajn problemojn. Pri tio kaj pri multo alia la Legantoj trovos klarigojn en "[La Laborista Esperantismo](#)".

Kiel jam dirite, mi parolas kiel simpla SAT-ano kaj tute ne celas ial ajn trudi mian propran vidpunkton. Neniu pensu, ke ĉi tiu skribaĵo signas ĉe mi deziron rehavi gvidan postenon en nia movado. Diablo kompatu!... Per ĉiuj revoluciaj sanktuloj, kies kadavroj zorge konservas, respekteme honoras materialistaj piuloj, mi ĵuras, trifoje ĵuras! ke tia penso ne povus naskiĝi en mia kapo. Tro granda estas mia ĝojo senti min libera herezadi laŭplaĉe!... Nenial mi povus

refariĝi silenta pri kelkaj aferoj, kiel okazis dum pluraj jaroj en la intereso de la unueco...

E. Lanti.

## **Piednotoj**

1. [↑](#) "Sennaciulo" de 25.2.1935.

# DISKUTEJO

[Peto al K-do E. Lanti](#)  
[Ni bezonas marksistan papon](#)

© La teksto estas [publika havaĵo](#) (*public domain*). Detaloj pri la licenco troviĝas  
ĉe la paĝo de la aŭtoro: [Eŭgeno Lanti](#).

# DISKUTEJO

## Peto al K-do E. Lanti

Nur nun venis en miajn manojn la interesa letero de K-do Lanti (aprila "S.R."). Pri ĝia enhavo mi havus nur laŭdon, se mi ne trovus en ĝi ion, kio (kvankam relative vera) povus naski miskomprenon kaj konfuziĝon. Tial mi faras ĉi-subajn rimarkojn, esperante ke la legantoj penos esplori, ĉu ili estas pravaj.

K-do L. konstatis, ke "ne sufiĉas kvankam necesas ke la popolo ĝuadu bonajn materiajn vivkondiĉojn, por ke ĝi leviĝu al kulturo." Iom poste li skribas: "certe estas granda eraro kredi, ke la ekonomiaj kondiĉoj determinas la spiritostaton de l'homo". Por pruvi, ke li (Lanti) pravas, li komparas la japanojn kun la aŭstralianoj. La unuaj vivas sub multe pli malbonaj ekonomiaj cirkonstancoj, ol tiuj sub kiuj vivas la lastnomitaj, kvankam la aŭstralianoj atingis malpli altan kulturnivelon, ol la japanoj. Tio ĉi do evidente kontraŭdiras la "marksisman kredon", ke la ekonomiaj kondiĉoj naskas la spiritostaton de l' homo. Nu, en tiu ĉi aserto kuŝas la ĝermo de eventuala miskompreno kaj konfuziĝo. Ĝi estas eraro, kiun jam faris multaj marksistoj kaj antimarksistoj.

Kion do Marks celis diri per sia tezo: La socia pozicio determinas la spiritostaton de l' homo? Ĉu tion, ke nur la socia situacio, la ekonomiaj cirkonstancoj, en kiuj vivas la homo, kreas tiun spiritostaton? Certe ne! Ankaŭ Marks kaj Engels tre bone konsciis la fakton, ke ankaŭ aliaj faktoroj ludas en tio gravan rolon. Ekzemple, tradicio, naciaj kulturnvelo, religio, kutimoj kaj moroj. Ili kune formas iun spiritostaton de l' homo; ne nur la ekonomiaj cirkonstancoj. Bonan ateston pri tio donas al ni la marksisto L. de Jong en sia verko "Nuntempa Marksismo". Li demandas al ni: "pro kio la katolikaj laboristoj tute aliel opinias pri la hispana milito, ol ni, socialistoj?" Kaj tiukoncerne li atentigas nin pri la influo de l' tradicio kaj religia edukado, kiuj ankaŭ – kaj grave – determinas ies spiritostaton. Oni do estu singarda, rilate al la tezoj, kiujn Marks kaj Engels fiksas en sia verkaro. Ili ne estas absolutaj veroj, ĉar absoluta vero ne ekzistas!

Alia eraro, kiun precipe antimarksistoj jam ofte faris, estas diri ke Marks malpravus, kiam li skribis: "la kapitaloj konstante kreskos, kaj ariĝos en la manojn de ade etiĝanta aro da kapitalistoj". Tiun tezon oni interpretas tiel, ke finfine do unu kapitalisto disponos pri la kapitalo, sekve nur tiu unuopulo finfine estos la sola reprezentanto de la kapit. sistemo...! Estas ja tre evidente, ke tion Marks ne celis aserti. Li parolis nur pri difinitaj tendencoj en la disvolvado de l' socio. Kaj ankaŭ lia tezo: "la ekonomiaj kondiĉoj determinas la spiritostaton de l' homo" estas nur tendenco, ne absoluta vero! La fakto do, ke la aŭstraliaj laboristoj atingis malpli altan kulturnivelon ol tiu de la japanoj, pravas ne, ke la "marksisma kredo" mistrakis, sed ke ankaŭ aliaj faktoroj

ludas en tio gravan rolon. Se do K-do Lanti bonvolos nin informi pri tiuj aliaj faktoroj – historio, religio, familivivo, tradicio, politika regstemo, tiel en Japanio, kiel en Aŭstralio, ni pli bone povos ekzameni tion: kio kune determinas la spiritostaton de l' homo. Samtempe ni tiam rigardu, ĉu la tezo de Marks estas erara, aŭ erare komprenata...

(Sennacieca Revuo, aŭgusto '38) Nieuwenhuizen, Hago.

\*        \*  
\*  
\*

Al tiu ĉi-supra vidpunkto E. Lanti rebatis en la januara numero de "S.R.", 1939, sub la titolo:



## Ni bezonas marksistan papon

Kun intereso mi legis pri la "peto", kiun faris al mi K-do Nieuwenhuizen en la aŭg.-sept. n-ro de nia Revuo. Kaj mi danke notas, ke li ne suspektis, ke mi estas subaĉetita de Hitler aŭ de l' Japana registaro, pro tio ke mi ne konsentas cent-po-cente kun kion diris la fama aŭtoro de l' Kapitalo...

Estas tre notinde, ke K-do N. rimarkigas en sia artikolo, ke eĉ marksistoj eraras, rilate al la ĝusta kompreno de l' penso de Marks. Cetere, ĉiu scias, ke la "marksisto" Kaŭcki ne interkonsentis kun la "marksisto" Lenin; ke Stalin kaj Trocki akuzas sin reciproke pri "perfido al la marksismo"; ke kompetenta kaj aŭtoritata "marksisto" kiel Buĥarin devis esti pafe elmondigita kune kun multaj aliaj "marksistoj", pioniroj de l' rusa revolucio kaj kunbatalintoj de Lenin, tial ke ili herezis, rilate la novan dogmaron.

Kiam oni konstatas, ke en la marksista mondo ne eblas atingi ĝeneralan interkonsenton pri la ĝusta senco de la instruo de l' Majstro, pri la senerara kompreno al lia vidpunkto, naskiĝas nepre en la cerbo la penso pri neceso de ia marksista papo.

En la katolika eklezio teologoj interdisputis dum kelkaj jarcentoj pri diversaj punktoj de l' dogmaro, ĝis en la jaro 1870 finfine koncilio decidis, ke la papo estas dogme neerarpova. Ortodoksa katoliko firme kredas, ke la Estro de

sia Eklezio ricevas inspiron de Dio mem, kiam temas decidi pri dogmaj aferoj.

Bedaŭrinde ĝis nun neniu kongreso de Komintern decidis, ke pri la ĝusta interpreto de l' Marksa penso kompetentas nur unu sola homo. Tamen, praktike, Stalin iel ludas la rolon de papo kaj eble iun belan tagon la tuta mondo mire ekscios, ke la spirito de Marks ne mortis kun lia korpo, sed ke ĝi daŭre vivas kaj ke Stalin telepatie komunikas kun ĝi. Tiam ni povos pridiskuti la "veran" penson de la plej aŭtoritata fondinto de la Unua Internacio. Dume ni ĉiuj restas en granda embaraso kaj mi dubas, ĉu L. de Jong, la aŭtoro de l' verko "Nuntempa Marksismo", povos akiri sufiĉan aŭtoritaton por ke lia interpreto pri tiu doktrino estu konsiderata kiel la sole ĝusta.

\* \*  
\*

Rilate al la parto el mia letero, kiun kritikis K-do N., kiam mi verkis ĝin, tiam mi pensis pri jenaj eldiroj de Marks kaj Engels:

"Ne la konscio de l' homoj determinas ilian staton, sed male ilia socia stato determinas ilian konscion." (K. Marks, Al la Kritiko de l' Politika Ekonomio, Antaŭparolo).

"La determinantaj kaŭzoj de tiu aŭ alia socia metamorfozo aŭ revolucio ne devas esti serĉataj en la kapoj de l' homoj, sed en la metamorfozoj de l' produktado kaj de la interŝanĝado." (F. Engels, La Revolucio de l' Scienco, de s-ro Diring/Dühring).

Se tiuj frazoj ne estas simpla ĵonglado per vortoj, ŝajnas al mi evidente, ke la aŭtoroj de La Komunista Manifesto opiniis, ke la Ekonomio<sup>[1]</sup> determinas la politikajn, jurajn, religiajn, filozofiajn formojn, unuvorte, ĉiujn aspektojn de la intelekta kaj morala vivo. Tial mi pensis, ke estas utile substreki la fakton, ke la aŭstraliaj laboristoj havas ĝenerale malaltan kulturnivelon, kvankam ili vivas en relative bonaj ekonomiaj kondiĉoj.

Sed mi ne dubas, ke lerta dialektulo<sup>[2]</sup> povus verki dikan libron por pruvi, teze, antiteze kaj sinteze<sup>[3]</sup>, ke en tiu mia konstato la kontraŭdiro al la Historia Materialismo estas nur ŝajna. La sama ankaŭ "pruvus" facillange, ke ne ekzistas reala kontraŭdiro al la Marksa teorio en tiu fakto, ke proletdevena homo, Hitler, sukcesis starigi potencan movadon, kiu detruis la komunistajn kaj socialistajn organizojn en lando, kie ekzistis la objektivaj kondiĉoj, antaŭdifinitaj de Marks, por la starigo de socialisma socio. Similan rimarkon oni povas fari rilate al tiu nemalpli signifa fakto, ke Lenin, Trocki, Buĥarin k.a. burĝdevenaj bolŝevistoj sukcesis kapti la regadon en lando, kie la menciitaj kondiĉoj tute ne ekzistis.

Sed mi mem ne estas tiel lerta dialektikulo – aŭ harfendemulo – por povi akordigi tiajn faktojn kun la teorio de Marks. Dum ili ŝajnas al mi facile klarigeblaj per la forto de ideoj. En nia epoko la plej potenca kaj efika ideo-forto estas nekontraŭdireble la naciismo. Se aliflanke oni konsideras, ke la germana laboristaro estis forte saturita per socialisma ideologio, kies konsista parto, la internaciismo, ne funde, esence kontraŭis al la naciismo, aperas klare, ke Hitler

bezonis nur kunligi la du ideojn per sia naci-socialismo por starigi mirinde fortan movadon.

En la cara, aŭtokrata imperio, konsistanta el pli ol cent diversaj popoloj, la naciismo ne profunde enradikiĝis kaj ne povis tie esti konsiderata kiel potenca ideoforto. Aliparte, la aristokrata reganta klaso jam estis rapide perdanta sian spiritan forton, kiam eksplodis la milito, kaj la malvenkoj de la caraj armeoj donis al ĝi la lastan baton. Tiel estiĝis favora stato, tre bona grundo por la dissemado de la demokratia ideologio. Necesas ne forgesi, ke en Rusio la revolucio venkis kun la agitvortoj: "La tutan regadon al la Sovetoj!".

Origine la soveta registemo estis ja eĉ pli demokratia ol tiu jam delonge funkcia en Britio, Francio, Usono k.a. kapitalistaj landoj.

Sed tiam en Rusio inter la burĝdevena intelektularo ekzistis konsiderinda nombro da teoriuloj kaj "profesiaj" agitistoj, kies menso estis saturita de alia ideologio: la marksismo. Inter ili la plej agemaj estis la bolŝevistoj, kiuj organiziĝis en partio kun "fera disciplino" (kion poste Musolini kaj Hitler sukcese imitis). Armita per ideologio kun scienca etiketo (Marksistoj kutimas nomi sian doktrinon "scienca socialismo") bone organizitaj kaj lerte gvidataj de Lenin, ili sukcesis bonuzi eksterordinare favorajn cirkonstancojn por kapti la regadon super vasta mondparto. En tiu okazo la marksismo efikis kiel ideologio, simile kiel la naci-socialismo en Germanio.

Sendube estas superflue diri, ke miaopinie ne ekzistas socialismo en Germanio, nek en la lando antifraze nomita Sovetio. Sed tio estas alia demando, kiu staras ekster la temo,

kiun mi nun traktas. Mi celas nur montri, ke Ideologio estas forto, efikanta forto en difinitaj cirkonstancoj.

Tio neniel signifas, ke la Ekonomio estas malatentinda. Estus simila eraro al tiu, kiu konsistas el malatento aŭ subtakso al la ideoj. Ideologio povas efiki nur en iaj favoraj kondiĉoj. Kaj la Ekonomio kondiĉas, ne kaŭzas, la agadon de l' homoj, tial ke ili agas nur se en ilia cerbo naskiĝis la ideoj, kiuj instigas al la agado.

Laŭ tio, kion diris K-do N. pri la verko de L. de Jong, mi supozas, ke tiu aŭtoro ne estas tre ortodoksa marksisto, rilate al la Moskva konfesio. Sekve, povas esti, ke mi ĝenerale povus konsenti kun lia vidpunkto. Mi eĉ emas kredi, ke se Marks vivus, li mem konsentus, ke la eventoj ne tute pravigis lian teorion kaj verŝajne li ĝin revizus. Sed pri tio estus tute senutile diskutadi. Se Jezuo Kristo (supoze ke li efektive iam vivis, kio ne havas ĉiesan konsenton) revenus sur la teron, li certe ankaŭ ne konsentus kun la kristanismo, kiel ĝi estas klarigata kaj mastrumata de l' papo. Tamen, se oni volas kritiki la katolikismon, necesas prikonsideri ĝin en ĝia hodiaŭa formo, en ĝia reala, konkreta ekzisto. Same ni devas fari, rilate al la marksismo. Tiu doktrino ja estas devige kaj senkonkure instruata al 170 milionoj da homoj sur unu sesono de l' mondo. Kaj plie ekster Sovetio kelkaj milionoj da fervoraj adeptoj rigardas al Moskvo sammense kiel katolikoj al Romo...

La mariksismo fariĝis en la praktiko nova dogmaro kaj ĝi jam havas siajn ekzegezistojn, kiuj disputas inter si. Espereble, iu venonta kongreso de Komintern, imite al la katolika koncilio el 1870, deklaras, ke pri dubaj punktoj

decidas Stalin, la "patro de l' Sovetia popolo", la "tre amata gvidisto de l' mondproletaro" ktp. ks. Ni ja bezonas nepre marksistan papon, por ĉesigi la tedajn kaj senfinajn interdiskutojn pri la sole ĝusta interpreto al la doktrino de Marks.

Dume oni povas praktike konsideri, ke la "vera" marksismo estas tiu, kiu estas oficiale kaj devige instruata sur unu sesono de l' mondo kaj fervore propagandata per la naciaj sekcioj de Komintern.

\*            \*  
\*  
\*

Jam delonge mi observas la malvolviĝon de tiu nova dogmo kaj notas ties konsekvencojn. En Sovetio la arto kaj scienco estas "marksistaj". Al ĉio oni aplikas la dialektikan rezonmanieron Hegelan. Eĉ tajloroj devas "dialektike" tranĉi vestojn. Kaj kompreneble devis nepre okazi, ke ankaŭ la lingva demando fariĝu objekto de marksisma esploro. En la kajero tria (1932) de La Nova Etapo oni ja povas legi tezon, kies enkonduko havas jenan titolon: "Marksisma Lingvoscienco turnas sin vizaĝe al la problemo pri lingvo internacia."

Estas iel bedaŭrinde, ke la esperanta gazetaro preskaŭ tute ignoris tiun ellaboraĵon. Se oni demandus min pri la kialo de tiu ignoro, mi vere ne scius kion respondi precize. Almenaŭ estas por mi klare, ke la Moskvaj "lingvoscienculoj" fiaskis en sia provo akordigi la movadon por artefarita lingvo kun la

"marksleninisma lingvistiko", kiu antaŭdiras la kunfandiĝon de l' naturaj lingvoj naciaj en unu solan.

Tial ke mi estas esperantisto, t.e. ano de artefarita lingvo, mi ofte ne povas deteni min kontraŭbatali la novan dogmaron, kiu povas nur ĝeni, bari al la antaŭeniĝo de nia movado. Proleta esperantisto devas nepre noti en la memoron la tre ĉagrenan fakton, ke post la apero de la menciita tezaro, la esperanto-movado en Sovetio ekdormis, pli kaj pli malvigligis, tiagrade, ke la sidejo de l' blufe vegetanta IPE devis translokiĝi el Leningrado al Londono.

Mi diris sufiĉe, por ke K-do N. kaj la legantoj de nia Revuo komprenu, kial mi ofte emas pafi sagon al teorio, kiun mi opinias ne nur erara, sed eĉ tre danĝera por nia mondlingva afero. Kaj se la Red. de "S.R." konsentos, volonte mi kritike konigos la esencon de l' Moskva tezaro, kies logika sekvo por esperanto en Sovetio rezultigis similan staton al tiu ekzistanta en Germanio.

Oni sendube rebatos al mi, ke inter la esperantistoj estas relative multaj marksistoj kaj sekve... Sed tio fakte pruvas nenion. Ne ĉiuj kristanoj estas katolikoj; tamen la Biblio estas sankta libro por ĉiuj tiuj kreduloj. Kaj oni povas facile konsenti, ke la forto de l' katolikismo, kompare al la aliaj kristanaj eklezioj, rezultas ĉefe de tio, ke ĝi havas papon. Simile al la katolikoj, la marksistoj, kiuj deziregas la triumfon de sia kredaro, devas do celkonforme ankaŭ konsenti, ke ili nepre bezonas ian papon...

Dume, SAT restas laŭstatute sendogma organizo; tial hodiaŭ mi riskis hereze paroli. Kaj se K-do N. havas apartan

komprenon pri la Marksa doktrino, li bonvolu noti, ke miajn sagojn mi direktas nur al la dogmeca, papeca marksismo.

E.L.

Melburno, 18.10.38.

## Piednotoj

1. ↑ Mi uzas ĉi tiun terminon laŭ la senco 3a en P.V.:  
situacio de institucio aŭ regno laŭ vidpunkto de riĉo kaj  
materia prospero.
2. ↑ tiel! – verŝajne = dialektikulo (N.d.l.komp.)
3. ↑ La fama dialektiko Hegela, kiun aplikis Marks kaj  
Engels, estas nur vorta ĵonglado, kiu eĉ ne havas la  
econ esti io vere nova, originala. Fakte ĝi estas nur  
kruda aliiĝo de l' pli profunda kaj subtila koncepto de  
Heraklito, kiu vivis 400 jarojn antaŭ J.K. La antikva  
filozofio greka ja instruis pri eterna aliiĝo de la aĵoj, pri  
la kunekzisto de kontraŭaĵoj ktp.



## Pri la morto de Bubo

..... Malfacile mi povŭs klarigi la sentojn, kiujn vekis ĉe mi la legado super la "nekrologo", kiun verkis pri si mem nia priplorinda K-do Bubo. Jen mi sentis admiron pri lia kuraĝo, jen aprobon al lia kompreno pri nia stulta kaj krimplena epoko kaj jen ielan konscienciproĉon...

Eble mi ja kulpas iomete pri la sinmortigo de tiu aminda, fidinda, brava junulo. Mi nun memoras, ke foje mi ekskursis kun li dum tuta tago en la Arbaro de Fontenblo. Tiam mi havis la okazon eldiri al li mian pesimisman komprenon pri la vivo, kiu tro ofte aperas al mi kiel granda tragedi-farso. Verŝajne lin impresis forte jena mia diro: "...Nu, kiam mi ne plu trovos intereson en la farso, tiam verŝajne mi venos ĉi tien kaj faligos la kurtenon en iu densejo, kie mia kadavro putros sen ia ĝeno por la homoj kaj profite, bonfare al la insektoj, vulpoj k.a.s. bestoj, kiujn gastigas la arbaro..." Ni sidis sur arbotrunko, uragane faligita antaŭ kelkaj monatoj; vesperiĝis; la horizonto ruĝiĝis kaj poste bruniĝis; ĉio estis silenta; ambaŭ ni ankaŭ mutiĝis kaj enpenŝiĝis... Tiam for de mi estis la penso, ke tiu junulo, mia akompananto, mia kvazaŭa filo spirita tediĝos pli frue ol mi ĉe la tragedi-farso...

Post tiu ekskurso mi neniam plu havis la okazon revidi nian funebratan K-don. Sed post mia foriro el Francio kelkfoje ni interŝanĝis leterojn. En iu paperujo mi ĵus retrovis

kaj sendas lian lastan (1.5.38); eble vi opinios, ke ĝi estas ial koniginda al la SAT-anaro. Kaj nun mi ja ĉagrene pensas, ke miaj skribaĵoj ne estis sufiĉe kuraĝigaj; eble mi ŝercis, ironiis, kiam konvenus kun ega seriozo doni al tiu korp- kaj animmalsana kompatindulo vivinstigojn. Mi devus insiste diri, ke la vivo de konscia sennaciisto pli valoras ol tiu de dek mil internaciistoj, ol tiu de cent mil naciistoj, ol tiu de unu miliono da ŝovinistoj. Vi ja scias, ke miaopinie la internaciismo estas nur ia bremse haltigita naciismo kaj la ŝovinismo la logika kaj tute natura konsekvenco de l' naciismo. La tri ismoj signas nur gradojn de la sama malsano mensa: la patriotismo. Mi devus nepre konvinki tiun sinceran sennaciiston, ke la epilepsio ne estas tiel terura malsano, kiel oni pensas unuavide. Eminentaj homoj estis epilepsiuloj; tia eĉ estis Sankta Paŭlo, la fondinto de l' katolikismo. Mi ja tre bedaŭras, ke nia memoriginda K-do ne trovis en miaj leteroj sufiĉan instigon por vivi, por batali kaj spiti al la diverskoloraj registoj aŭ regaspirantoj. Prefere morti per la kuglo de patrioto ol sin mem mortigi. La devo de sennaciistoj estas provi saĝe vivi eĉ inter frenezuloj.

Sed nun iel konsole mi pensas, ke verŝajne nia kara Bubo estis tamen la viktimo de l' naciismo. En sia nekrologo li parolas pri amatino, kiu "longe hezitis kaj suferis", por liberiĝi el tradicia moro miljara. Sur la paĝo 60-a de "S-ulo" jenan frazon mi ruĝe substrekis: "Finfine pruvigis ke, por ŝi, familiaj kaj religiaj sentoj pli inkrustiĝis ol homaranismo. Tre, tre doloriga konstato..."

Ĉu vi scias, ke la aludita persono estas judino? El tio evidentiĝas, ke la juda naciismo, kies konsisto estas rasa kaj

religia, latente estas same malbonfara kiel ĉiu ajn alia kaj pro tio ankaŭ kontraŭbatalinda. La juda nacirasismo ne estas nun danĝera; sed en la Biblio mem ni povas trovi, ke kiam judoj akiris la regadon, tiam el persekutatoj ili facile fariĝas persekutantoj. La ĉapitro pri Ester ategtas pri tio.

Mi volas konvinkiĝi, ke Bubo estas viktimo de l' naciismo. Kaj en tiu fakto mi trovas plian motivon, por senindulge kontraŭbatali tian peston. Pro la nuntempa persekuto al la judoj en Hitlerio, mi scias, ke estas maloportune eldiri publike kion mi pensas pri judismo; tamen mi rajtigas vin uzi mian leteron laŭ via bontrovo. Mi abomenas la Hitleran rasismon, sed tio ne estas kaŭzo por ŝati la judan...

Dume mi ne ŝanĝas mian koncepton pri la vivo, nome, ke ĝi estas granda tragedi-farso.

.....

E. LANTL

(El letero de Lanti en Bonaero, 8.7.1939, kaj aperinta en "Sennaciulo" de sept.-okt. 1939).

# TRO PLENA GRAMATIKO...

Plena titolo: "Tro Plena Gramatiko k ne suface Plena Vortaro".

Tiu ĉi verkaĵo aperis en "Sennacieca Revuo" de majo 1939. La pritraktita libro estas:

Dr. K. Kalocsay – G. Waringhien: PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO, kun detala komentario pri Vorto kaj Frazo. II-a Tralaborita eldono. Eldonis: Literatura Mondo, BUDAPEST, 1938.

En la esperanta movado svarmas homoj, kiujn ĉefe interesas la lingva flanko de la afero. Multaj estas poliglotoj kaj la lernado de artefarita lingvo estis por ili nur okazo por kontentigi sian apartan lingvolernemon. Tiel mi klarigas al mi la fakton, ke tiu ĉi verko aperis en dua "tralaborita" eldono. La tralaborado postulis 118 pliajn paĝojn.

Sengale mi diras, ke la Red. de nia Revuo faris malspritan ŝercon al mi, sendante tiun dikan volumon, tiun pezan verkon

por recenzi. Senhonte mi konfesas, ke neniam mi havis sufiĉe da kuraĝo por tutlegi la ekzempleron de la unua eldono, kiun mi posedis. Sed la recenzotan mi konsideris kiel devon legadi ĝis la lasta paĝo. Longan tempon mi bezonis. Tre ofte mi kaptis ian ajn pretekston por formeti la volumon, kies legado donis al mi kapdoloron. Finfine mi atingis la lastan paĝon kaj do provos nun laŭdeve trarecenzi la... "tralaboritan eldonon".

Por esti tute sincera, mi almenaŭ tuj deklaras, ke mi kontente faris du tre interesajn konstatojn: S-roj Kaloĉai kaj Varingjen liveras – verŝajne senintence – valorajn pravigojn pri la lingvo-uzo el la SAT-gazetoj. La afero estas sufiĉe grava, por meriti mencion kaj eĉ citojn. Oni ja ne devas senpruve aserti.

La unua konstato rilatas al la forlaso de l'sufikso ec ĉe radikoj kun adjektiva (do eca) karaktero. Kiu deziras korekte uzi la lingvon kaj tiucele studas la verkojn de Zamenhof k.a. "bonaj aŭtoroj", tiu baldaŭ konstatas, ke ĉe ili estas neeble eltrovi regulon pri la uzado de tiu sufikso. Oni simple konstatas, ke ĝi estas almetita aŭ forlasita tute hazarde, laŭ la humoro aŭ kaprico. La legantoj povas mem fari la eksperimenton kaj ili vidos, ke tiuj aŭtoroj uzis, ekzemple, la vortojn: larĝo aŭ larĝeco, longo aŭ longeco, neceso aŭ neceseco, oportuno aŭ oportuneco, profundo aŭ profundeco ktp. en samaj kazoj, por esprimi la tute saman ideon.

Tial ke la aŭtoroj de ĉi tiu gramatiko ankaŭ sammaniere uzas la sufikson ec, ili elpensis jenan vere tro subtilan klarigon: "Post adjektivaj radikoj ĝi (ec) signas, ke la abstrakto esprimita de l'flankelemento estas rigardenda kiel kvalito" (pĝ. 87). Bedaŭrinde, – por la harfendemuloj – sur la

pĝ. 41 la leganto povis jam noti jenon: "Inter abstrakt(aĵ)o (?! la parentezo estas mia) kaj kvalito ne ekzistas esenca diferenco (substreko mia). Se tiel estas, laŭ la opinio mem de s-roj K. kaj V. – kaj mi tute samopinias kun ili tiurilate – kiel do la kompatindaj simpluloj, kiuj celas uzadi korekte nian lingvon, povos decidi, kiam ili devas aldoni aŭ forlasi la sufikson ec ĉe adjektivaj radikoj? Ili vane cerbumos kaj finfine decidus ankaŭ hazarde, kaprice...

Sed niaj subtilaj gramatikistoj sendube pensis, ke la embaraso de simpluloj ne estos per tio sufiĉe granda kaj en tiu sama ĉapitro ili aldonis jenan rimarkon: "Laŭ la principo de sufiĉo oni povas multfoje (do ne ĉiam! mia rim.) ellasi la sufikson ec antaŭ adjektivaj radikoj, ĉar abstrakto kaj kvalito estas konceptoj tiel parencaj, ke ilia intermikso apenaŭ estigas konfuzon. La "bono de patro" estas samsignifa al la "boneco de patro". La tradicio lingva (subst. mia) tamen ankoraŭ (subst. mia) insistas pri la eco-formoj" (pĝ. 87).

Ĉe la ektrovo de tia perlo, kia estas la "tradicio lingva", tiam mi ne povis deteni min ekridi. Klare aperis antaŭ miaj okuloj la erara metodo laŭ kiu laboregadis la aŭtoroj de ĉi tiu gramatiko. La "tradicio lingva"! Kion signifas tio? Ho! tute simple jenon: "Zamenhof k.a. "bonaj aŭtoroj", inter kiuj ni certe estas, aplikis senregule la sufikson ec kaj sekve ni devas nepre elpensi klarigojn por pravigi nin ĉiujn..." Tia ideo, konscie aŭ ne, gvidis la du eminentajn aŭtorojn. Nu, mi kuraĝas aserti, ke tia labormetodo estas erara, rilate al esperanto, racie artefarita lingvo, kiu esence diferencas de l'naturaj lingvoj.

Se anstataŭ celi al la pravigo de absurda tradicio, s-roj K.

kaj V. estus dirintaj al si: "La uzado de l' sufikso ec ĉe adjektivaj radikoj estas kaosa, necesas do difini simplan kaj klaran regulon", tiam ili facile starigus proksimume jenan: "La aldono de ec ĉe radikoj kun adjektiva karaktero estas pleonasma, balasta kaj sekve evitinda; kvankam nenecesa, ĝi tamen estas, en kelkaj tre malmultaj kazoj, pravigebla per eŭfonia konsidero."

La kompatinda uzanto de nia lingvo, kiu serĉas en tiu gramatiko regulon por uzi korekte la sufikson ec, trafos en grandan embarason, tial ke li ne povos pli bone ol s-roj K. kaj V. mem distingi, kiam temas pri abstrakto aŭ kvalito kaj kiam efikas aŭ ne la leĝo de sufiĉo. Kaj tiam li sekvos la senregulan, absurdan "tradicion lingvan".

Sed kelkaj legantoj certe pensos, ke por apliki la regulon, kiun mi skizis pli supre, necesas, ke l' radikoj de nia lingvo havu gramatikan karakteron. Jes ja! Kaj en la Plena Vortaro mi insistis, por ke tiu karaktero estu signita per -a, -e, -o, -i ĉe la fino de radikoj adjektivaj, adverbaj, substantivaj kaj verbaj. Mi tamen scias, ke ne ĉiuj Akademianoj interkonsentas pri la ekzisto de gramatikaj kategorioj. Nu, mi gratulas al s-roj K. kaj V., ke ili sukcesis trafe montri ties neceson:

"La principon de la kategoria divido starigis de Saussure, Zamenhof ĝin aprobis en sia privata letero al li (Originala Verkaro, pĝ. 455). La Akademio ĝis nun ankoraŭ ne rekonis la principon, sed en la "Principo de Neceso kaj Sufiĉo" kaŝe jam enestas ĝia akcepto.

Cetere Zamenhof mem skribas en privata letero al Th. Cart: "Por stuki, kiel por stampi, mi volis doni al la radiko

signifon verban" (Originala Verkaro, pĝ. 539.). Tio evidente pruvas, ke li atribuis al nudaj radikoj gramatikaj karakteron. Sekve stuk kaj stamp estas egalvaloraj al stuk(i), kaj stamp(i), (pĝ. 36)."

Por pravigi la neceson de tia kategoria divido, sufiĉas simple mencii la bone konatan ekzemplon pri komb' kaj bros'. Se oni ne scias, ke la unua estas verbo kaj la dua substantivo, tiam ne eblas kompreni, ke kombo estas ago kombi kaj broso ilo por brosi.

La alia konstato, kiun mi kontente notis, estas, ke la aŭtoroj de l' "Pl. Gr." liveras kelkajn bonajn argumentojn, favoraj al la sinteno de S.A.T., rilate la demandon -ujo, -io ĉe landnomoj. Estus superflue insisti pri tio per ampleksa citado. Tamen mi opinias utile konigi jenajn konkludojn kaj rimarkojn, kiuj troviĝas sur la pĝ. 105:

"Oni vidas, ke tia uzado de -io estas nur la plivastigo de ties Z-a apliko. Estas sendube, ke ĝi troviĝas en multaj internaciaj formoj, do ekz-e Hungario, Italio ktp. estas uzeblaj laŭ la 15-a regulo de la Fund. Gram. Etendi la uzon de -io ankaŭ al aliaj landoj (Belgio, Britio ktp.) povas okazi per analogio, grave rolanta en ĉiuj lingvoj. Aliflanke, la plia rekonebleco internacia estas ĉe la landnomoj multe pli grava ol cetere. Kaj, eĉ kie la formo ne estas internacia, -io malpli deformas la vortojn ol -ujo. Krome: -io estas nur aldono, anstataŭanta la trian sencon de -ujo, same kiel aĉ anstataŭas unu el la du sencoj de fi-; poste, ĝi povas esti (kaj estas) paralele uzata kun -ujo, sen ia miskompreno. Do ĝi plene plenumas la postulojn, kiujn Z. metis en la Antaŭparolo de la Fundamento pri enkonduko de novaĵoj.



"RIM. La propono, pro siaj evidentaj avantaĝoj, estis favore akceptita de granda parto de l' E-istaro. Ĝian ĝeneralan akcepton, tamen, malhelpis la rifuzo de la Lingva Komitato, kiu decide malaprobis la novan sufikson. Sed, krom multaj neŭtraluloj, ĉiuj laboristaj rondoj uzas la io-formojn malgraŭ la oficiala malaprobo. Tiel la E-istoj dividiĝas nun en io-anojn kaj ujo-anojn. Laŭ la nuna stato de la afero, la unueco ŝajnas pli facile atingebla per la cedo de la Lingva Komitato ol per plua rezisto kontraŭ la sufiksoido.

"Oni devas diri kelkajn vortojn pri tiu decido de L.K., ĉar multaj ĝin miskomprenas, opiniante ke la uzado de -io estas sendisciplina ago.

"Nu, L.K. havas la rajton ekzameni ĉiun novaĵon kaj ĝin oficialigi aŭ ne. Sed ĝi rajtas nek trudi novaĵon, nek malpermesi vaste uzatajn formojn, ĉar tio estus kontraŭa al la libera evoluo kaj, krome, tute senŝanca. La sola gvidpunkto, kiu povas ĝin gvidi, estas la grado da uzateco. Do tiu rifuzo, ĝuste komprenate, signifas nur, ke L.K. juĝis la sufiksoidon -io ankoraŭ ne sufiĉe elprovita kaj uzata, por ĝin oficialigi. Ĉio plua estus ja transpaŝo de agosfero."

Estas interese rimarkigi, ke la kunlaborantoj al la SAT-organoj ĉiam havis la plenan liberon uzi laŭplaĉe la formojn -ujo, -lando aŭ -io ĉe landnomoj. La sperto montris tute klare, ke l' granda plimulto el ili pli ŝatas la lastan formon, kiu estas pli mallonga, pli malpeza kaj pli internacia. Cetere, S.A.T. ne iniciatis la aferon; ĝi simple imitis la ekzemplon de l' tiama U.E.A., kies gvidanto, Hektor Hodler, ne timis la tondrojn de kelkaj fanatikaj ujo-anoj. Sed li mortis kaj liaj heredintoj ne estis same kuraĝaj; ili forlasis la uzadon de -io, uj-umis

discipline kaj... formanĝis lian heredaĵon. Sed tio estas alia temo – negramatikeca...

\* \*  
\*

Mi jam diris, ke por klarigi la metodon, kiun aplikis la aŭtoroj de tiu ĉi verko, mi ne trovas alian motivon ol tiun, ke ili celis ĉefe pravigi ĉion, kio troviĝas en iliaj propraj verkoj – kaj nur tion. Plifirmigas mian opinion la konstato, ke ili ignoras la "tradicion lingvan", kiam ĝi povus pravigi formojn, tute klaraj, simplaj kaj vere esperantecaj, t.e. kiuj konformas al la vera spirito de nia lingvo. Mi aludas al: alial, aliam, alie (kun loka signifo), aliel, aliom (alies, alio kaj aliu estas sen ia malaprobo menciataj). Tiuj formoj naskiĝis spontane ĉe homoj, kiujn logis la plej ŝatinda parto el nia lingvo: la tabelo de korelativaj vortoj; ĉe esperantistoj kiuj ne uzas nian lingvon diletante, sed necese kaj ĉiutage. Tiu komplemento al genie elpensita tabelo de adverboj eĉ troviĝas en iu pol-esperanta gramatiko; sed ne estis loko por ĝi en la 488-paĝa "Pl. Gr.". Kiel estas klarigebla tia malatento? Nu, eble tiel: "Ni, eminentaj kunlaborantoj de Literatura Mondo kun ĝiaj 500 abonantoj, havas aŭtoritaton kaj influon, kiun ne povas pretendi la simpluloj de "S.R." kun ĝiaj 1200 abonantoj kaj de "Sennaciulo" kun ĝia pli ol 6000-ekzemplera eldonkvanto. Sekve, la lingvaĵo uzata en tiaj proletecaj organoj estas neniel<sup>[1]</sup> atentinda, neniel studinta en nia "Plena Gramatiko".

Ke tia konsidero estis la konscia aŭ nekonscia impulso ĉe

niaj gramatikistoj, pri tio mi trovas pruvon en jena rimarko, presita sur la pĝ. 173:

"Ekzistas en la Fundamento aparta pronomo por la dua persono singulara: ci, cin, je ci. Sed ĝi neniam estis vere uzata; oni trovas ĝin kelkfoje en poezio, por traduki nacilingvan nuancon, kaj en la esprimo ci-diri al iu".

Kiuj partoprenis SAT-kongresojn kaj havis la okazon konatiĝi kun la drone mortintaj Gek-doj Ozere, tiuj scias, ke ili ĉiam ci-umis dum konversacioj kaj diskutoj. Kaj mi ne dubas, ke en amleteroj, skribitaj ĉe diversaj latitudoj, oni povus ofte legi: Kara Ci! Cetere Julio Bagi mem abunde ci-umas en sia romano "Hura!". Sed s-roj K. kaj V. malŝatas tiun trivialan pronomon – kiu tamen estas uzata en poezio – kaj ŝajne bedaŭras, ke ĝi troviĝas en la Fundamento.

Rilate al formoj, kiuj ne enradikiĝis estas menciita (pĝ. 195) "Ti-kiuj proponita de Lanti". Fakte mi proponis nenion kaj en miaj verkoj nenie troviĝas "ti-kiuj". En la komenco de mia esperanta kariero mi uzis tiun formon, imite al kelkaj Sovetiaj K-doj. Tiam ofendis mian orelon, ekzemple, frazo kiel jena: "Ĉiuj tiuj, kiuj aprobas la proponon, levu la manon". Sed poste mi rimarkis, ke oni povas klare esprimi tiun saman ideon jene: "Kiuj aprobas la proponon, tiuj..." La forlaso de "ĉiuj" kaj la alilokigo de "tiuj" tute kvietigis mian aŭdsenton. Tial malaperis la formo pri kiu estas funebre parolite en la "Pl. Gr.". Se "ti-kiuj" ne mortus, estas dube ĉu ĝi havus la honoron esti menciata en tiu verko...

Pruve al tio, ke la metodo aplikita de niaj du aŭtoroj en la verkado de sia gramatiko estas misa, mi plie citu jenon:

"Kiel oni vidas, Z. ordinare ne uzas artikolon antaŭ jena

kaj jeno, ĉar ili estas per si mem difinitaj (subs. mia); tamen ties uzado pli kaj pli oftigas" (pĝ. 182).

Jes ja! tiu balasta, erara uzo de la troviĝas tre ofte en la "Pl. Gr." mem. El tiu konstato oni povus malice argumenti, ke ties aŭtoroj uzas fuŝe, ne Zamenhofs nian lingvon. Mi preferas rimarkigi, ke hazarde mi notis: "en jena signifo" (pĝ.226), "...oni trovas jenajn" (pĝ.269) "...en jena frazo" (pĝ. 285), "...laŭ jenaj turnoj" (pĝ. 359). Tiel ke la kompatinda lernemulo, kiu serĉos regulon pri la uzo de la trafos denove en grandan embarason per studado super la "Pl. Gr."

Kaj tra la tuta volumo oni konstatas, ke la oftege uzata vorto "certa" estas iafoje dubesenca; oni nemalofte hezitas por decidi ĉu temas pri neduba afero aŭ pri ja, iu, kelka. La "lingvuzo", la "tradicio lingva" kaj similaj ridindaj tialoj, per kiuj la gramatikistoj kutimas klarigi ĉiujn absurdaĵojn el la naciaj lingvoj, estas aplikataj al esperanto – kiun ni kutimas prezenti al la publiko kiel simplan, racian lingvon...

Sed kiam la "lingvuzo" kaj oficialaj difinoj de vortoj ne plaĉas al niaj aŭtoroj, tiam ili simple ne atentis ilin. Ekzemple, ili uzas la verbojn "klasi" kaj "ordi" kun transitiva senco. Tamen la radiko de tiuj vortoj estas substantiva (klaso kaj ordo) kaj sekve por akiri sence transitive la almeto de ig estas logike necesa. En la "Pl. Gr.", kies kunaŭtoro estas s-ro V., tiu neceso estas montrita. Nu! mi ne dubas, ke s-roj K. kaj V. povus verki 100 paĝojn por rebati al mi, ke laŭ la leĝo de sufiĉo la formoj klasi kaj ordi kun transitiva senco estas tute kompreneblaj. Kaj mi devus konfesi, ke ja tiel estas. Ofte la kunteksto ebligas diveni, ĉu verbo estas uzata

transitive aŭ ne. Tamen, ekzemple, ĉe la lego aŭ aŭdo de ordi, la unua ideo, kiu prezentiĝas, estas: esti en ordo kaj ne: fari ordon. Por ĉi tiu lasta ideo la almeto de ĵg ne estas superflua; same ĵĝ, se temas pri afero, kiu fariĝas orda per si mem. Almenaŭ estas multe pli facile pravigi la meton de ĵg al substantiva radiko por transitive verbigi ĝin, ol la almeton de ec ĉe adjektiva radiko.

Bedaŭrinde, por la harfendemuloj, sur pĝ. 113 troviĝas jena frazo: "Post adverbaj radikoj kaj prepozicioj validiĝas (subs. mia) la adjektiviga efiko de ĵĝi..." Tamen, la radiko valid estas adjektiva kaj ne verba kun transitiva senco; la aldono de ĵg estas do tute ne necesa por doni al tiu vorto netransitivan verban sencon; validi = esti valida, do validas. Kaj mi dubas, ĉu niaj gramatikistoj, malgraŭ sia skolastika talento, sukcesus liveri eĉ ŝajnvalorajn argumentojn por pravigi tiun monstran "validiĝas"...

Alian pruvon, ke s-roj K. kaj V. malŝate rilatas al la "lingvuzo", kiam tiu facila kaj obeema klarigilo ne akordiĝas kun ilia gusto, mi trovas en la ĉapitro pri Interpunkcio. La vorto parentezo estas oficiala kaj jene klarigata en la "Pl. Vor.": "1) Signoj per kiuj oni apartigas de la kunteksto kompletigan aŭ klarigan frazon aŭ vorton. 2) Frazo aŭ vorto tiele apartigita." Sed sur la pĝ. 459 de l' "Pl. Gr." oni povas legi pri parentezo: "Kelkfoje oni uzas tiun vorton ankaŭ por nomi la krampojn, sed tio estas evitinda". Kiam oni scias, ke tia uzado estas ne "kelkfoja", sed ĝenerala, ne povas esti dubo, ke en ilia tuta argumentado niaj aŭtoroj estis gvidataj de sia persona gusto. Per tia konstato oni rajtas konkludi, ke la "tradicio lingva" kaj la "lingvuzo" estas do plej ofte

senvvaloraj klarigiloj.

Kiel la legantoj sendube scias, jam delonge ekzistas en Esperantio la "Dramo ata-ita". Akademianoj kaj L.K.-anoj disputas inter si kaj ĝis nun neniu interkonsento povis okazi. Komprenoble en la "Pl. Gr." tuta ĉapitro estas dediĉita al tiu demando. Sed vane la aŭtoroj provis difini regulojn, kiujn ĉiu povus akcepti. Ekzemple, Teo Jung en "Heroldo de Esp-o" eldiris lastatempe sian malaprobbon al la solvo proponita de s-roj K. kaj V. La afero ŝajnas al mi tute ne grava kaj mi mencias ĝin nur kun la celo montri, ke ne eblas diktatore gramatikumi. Cetere, Zamenhof mem kelkfoje diris, ke oni ne devas kateni la lingvon per tro rigoraj reguloj. Pri la "dramo ata-ita" mi simple rimarkigos, ke ĝi ofte estas nur afero de stilo, ne de gramatiko. Verkisto povas iam pensi kaj akcenti la momenton dum kiu okazas la ago, kaj aliam li pensos kaj akcentos la rezulton de la ago. Kion li devas senĉese celadi, tio estas liberigi sin el la influo de naciaj lingvoj. Konklude pri tiu punkto mi notas, ke la aŭtoroj de l' "Pl. Gr.", kiuj estas lertaj dialektikuloj, ne sukcesis verki la lastan scenon de l' "dramo ata-ita". Espereble la rigardantoj ne atendos, ke falu la kurteno kaj ili foriros, akirinte la konvinkon, ke la "dramo" simple estis malsprita farso...

En ĉi tiu verko troviĝas kelkfoje mencio pri la leĝo de analogio. Ĉiu vera esperantisto, kiu atente observas la vivon de sia lingvo, povas ofte rimarki la efikojn de tiu leĝo. Ekzemple, mi trovis antaŭnelonge la formon "Holandujo" en gazeto, kie oni kutime uj-umas fervore. Se ne ekzistus en Esperantio la i-uma tendenco, mi ne dubas, ke post pli malpli longa tempo oni povus legi, ekzemple: Alĝerujo, Aŭstralujo,

Azujo, Siberujo, Tasmanujo ks. Oni do povas tute konsenti kun s-roj K. kaj V., kiam ili substrekas la influon de tiu leĝo per ekzemploj, ĉerpitaj el la Zamenhofa verkaro.

Sed mi ne rimarkis, ke niaj aŭtoroj konscias pri alia leĝo: tiu de minimuma peno. Ĉiu scias, ke sufiĉas diri al iu: "Bonan tagon", por ke li komprenu jenan tutan frazon: "Al vi mi deziras bonan tagon." Temas pri elipso de superfluaĵ vortoj. Sed la sama leĝo de minimuma peno ankaŭ influas sur la formon de vortoj mem. Mi mencias fakton, kiun oni povis konstati en la SAT-movado. En ties komenca tempo la oficialaj vortoj proletario kaj proletariaro estis ofte uzataj. Sed tiuj formoj estas pezaj. Iam tute spontane kaj nature iu diris: "proleto", "proletaro", kaj ĉiuj aŭskultantoj bone komprenis. La sekvo estis, ke iom post iom la oficiala formo estis forlasita kaj jam delonge en la lab. esp. movado oni ĉiam uzas la pli simplan formon.

Kiam la vortoj proleto kaj proletaro aperis en la SAT-organoj, tiam d-ro Diterle el Lajpcig skribis al mi proteste, klarigante, ke tia "kripligo" de l' latindevena "proletarius" estas neallasebla, ke ĝi "ofendas la lingvosenton de ĉiu klerulo..."

Mi respondis al la eminenta latinisto (almenaŭ latinemulo), ke la proletoj bedaŭrinde – aŭ feliĉe – estas tute indiferentaj al tia lingva konsidero. Ili eble povus interesiĝi pri la opinio de l' rektoro E. Buarak (Boirac), kiu diris, ke "esperanto estas la latino de l' demokratio", sed kondiĉe, ke ĝi estu, aŭ fariĝu, kiel eble plej simpla kaj malpeza. Jaroj forpasis. S.A.T. iniciatis la eldonon de vortaro. Tiam lange aŭ plume mi interrilatis kun s-ro Groĵan-Mopen preskaŭ ĉiutage. Foje

mi donis al li, interalie, slipon kun difino pri la vorto proleto. Senproteste li akceptis ĝin kaj jam de pluraj jaroj pli ol dek miloj da homoj – ankaŭ senproteste – legis tiun difinon en la Plena Vortaro. Kompreneble la oficiala Proletario ne forestas, sed ĝi estas menciita kun la nura indiko = proleto. Tamen, s-ro G.M. ankaŭ estis latinisto. Eble lia "lingvosento" komence ofendiĝis, kiam li legis la simpligitan formon. Sed kiel diligenta leganto de l' SAT-gazetoj, li verŝajne iom post iom alkutimiĝis kaj jen kial proletario estis forpuŝata. Hodiaŭ, se en SAT-kongreso iu aŭdigus la vorton "proletario", eble multaj komprenus, ke temas pri ario, kiun kantas proletoj...

\*            \*  
\*  
\*

Supozeble, kelkaj legantoj opinios, ke mi forflankiĝis de l' temo. Tute ne! Male, mi staras en la centro de l' gramatika tereno. Temas ja ekkompreni pri la leĝoj laŭ kiuj evoluas – ne ĝuste, laŭ kiuj devas evolui nia lingvo. Mi ja konscias, ke tiuj leĝoj estas relativaj. Se esperanto estus uzata nur de kleruloj kiel d-ro Diterle k.a., la formo proleto neniam venkus. Sed se oni konsentas al ĉi tio, ke la elementuloj (unuagradaĵ instruoj), ordinare proletoj, pli bezonas esperanton ol la profesoroj kaj poliglotoj, la konsekvenco estos, ke ne ĉi-lastaj devas esti ordonpovaj en Esperantio. Ili plej ofte kapablas nur kompliki nian simplan lingvon kaj ĝin ŝarĝi per kaprompaj reguloj, kies lernado forpelos la varbitojn. Por antaŭenpuŝi nian movadon, necesas esti ĉiam



tre atenta al ĉio, kio povas racie simpligi nian lingvon. La rolo de esperantista gramatikisto devas esti la formula eltrovo de reguloj, per kies oboe nia lingvo povas evolui laŭ kiel eble plej racia plisimpliĝo kaj samtempa pliriĉiĝo.

Neniu scipovas esperanton. Zamenhof mem ne ĉiam kapablis uzadi sian lingvon laŭ ĝia racia spirito. Tro ofte li estis influata de l' naciaj lingvoj, kiujn li sciis. Sed li estis neniel diktatorema kaj aŭtoritativa. Li donis konsilojn kaj ne ordonojn. Lia celkonformemo estis granda, sed li konsciis pri sia erarpovo. Nun, post 50-jara ekzisto de esperanto, la gramatikistoj, kiuj prenas sur sin la taskon difini regulojn, sin apogante sur la eraroj de la aŭtoro de nia lingvo, sur la aŭtoritato de "bonaj aŭtoroj" kaj sur la "tradicio lingva", tiuj iras laŭ malĝusta vojo; tiuj faras al nia afero malbonan servon. Ne pro tio, ke Zamenhof k.a. diradis, ekzemple: "... enkonduki esperanton en la lernejojn", la esperantistoj devos eterne uzi tiel balaste la akuzativon. Tial ke l' nacieca influo kontrabande oficialigis la formojn "pacifismo" kaj "pacifisto", tio ne signifas, ke la sennaciemuloj – la plej konsekvencaj esperantistoj – ne havas la rajton uzi la pli simplajn kaj pli esperantecajn vortojn: pacismo kaj pacisto. Kaj se la "tradicio lingva" povas pravigi la formojn "virgulino", "belulino" k.s., ili tamen neniel estas racie pravigeblaj, tial ke ĉiu esperantisto facile komprenas, kio estas ino virga (virgino) kaj ino bela (belino). La hazardo kaj kaprico, kiuj tro longe regis kaj ankoraŭ regas — en la elekto de vortoj kaj formoj, povus same maltrafe enkonduki la formon "amatulino" anstataŭ amativo

Niaj gramatikistoj devus kompreni, ke rilate al esperanto,

artefarita lingvo, ili ne devas apliki metodon, kiu taŭgas nur por naciaj lingvoj, en kiuj svarmas absurdaĵoj. Ili devus penadi por difini leĝojn, laŭ kiuj oni povas plej simple kaj tamen klare eldiri siajn pensojn. Bedaŭrinde s-roj K. kaj V. laŭiris la trabatitan, la skolastikan vojon kaj riverencis antaŭ la "tradicio lingva". Vane ili diras en sia antaŭparolo: "...ni devis forgesi ĉiujn naciajn sistemojn kaj konstrui ian absolutan gramatikon bazitan sur la racio." Se tion ili fakte celis, mi opinias, ke ili plene fiaskis. Cetere oni trovas en tiu antaŭparolo mem refuton al ilia aserto. Racio ne obeas tradicion. Kaj tamen oni povas legi sur la pg. 9:

"Kiu sin bazas nur sur la Fundamenta gramatiko, tiu komencas tie, kie la unuaj verkistoj de Esp-o: por li ne ekzistas tiu lingva trezoraro, kiu evoluis (hazarde, kaprice, malracie – mia rimarko) per la penoj de tiel multaj aŭtoroj. Tiu trezoraro prezentas propre la lingvan "spiriton"; ĝin ni volis kapti en regulojn kaj transdoni en facile konsultebla libro."

Ne! La "spirito" de nia lingvo ne troviĝas ĉe aŭtoroj, kiuj estas pli malpli sub la influo de naciaj lingvoj. Neniu esperantista verkisto ĝis nun sukcesis tute liberiĝi el la nacieca influo. (Kaj mi mem ne havas tian pretendon). Sekve estas vana penado serĉi en tiaj verkoj la veran spiriton de nia lingvo. La "tradicio lingva" plej ofte ofendas tiun spiriton mem, kiu cetere nun ekzistas nur en embria stato. La vera spirito de nia lingvo estas sennacieca; la esperantistoj devas streĉi sian tutan forton por formeti la naciecan influon. Kaj la celo de gramatikisto devus esti la starigo de simplaj reguloj sentradiciecaj.

Malgraŭ siaj 488 paĝoj la "Pl. Gr." ne povis doni al mi konsilon pri duba punkto, kiu antaŭnelonge stariĝis antaŭ mi ĉe relego de letero, kiun mi skribis antaŭ du jaroj. Jen pri kio temas: "Mi pagas ĉi tie trione malpli ol en Tokio..." ĉu ne devus esti obl anstataŭ on? La ideo ja estas obliĝi la malplion. Sed mi ne faris ŝanĝon pro jena konsidero; on kaj malpli havas malpliigan efikon kaj obl pliigan. Ilia kunigo sekve povus nur konfuzi. Cetere mia korespondanto tre bone komprenis, kion mi volis sciigi al li. Sekve, kial cerbumadi pri klara afero. Nu, tia demando k.a. similaj povos esti okazo por s-roj K. kaj V. aldoni almenaŭ 100 pliajn paĝojn al la tria eldono. Kaj nun mi komprenas, ke por trarecenzi ĉi tiun verkon mi devus ankoraŭ longe skribadi. Se tiel mi farus, la Red. de nia Revuo sendube opinius, ke miavice mi volas repage embarasi lin...

Konklude mi do sincere kaj senmallice konfesas, ke la tutlegado de tiu verko lasis al mi la malagrablan impreson, ke jam de 20 jaroj mi uzadas nian lingvon, nesciinte – kaj nun eĉ malpli – ĝiajn gramatikajn regulojn... Kompatinda popolo esperantista! Ĝi nun disponas je tro Plena Gramatiko, dum mankas sufiĉe Plena Vortaro. – En ĉi-lastata verko ja ne troviĝas geografiaj kaj historiaj nomoj. S-roj K. kaj V. pli utile aplikus sian kleron kaj erudicion per ties kompilado ol per skolastika provo klarigcele malklarigi nian simplan lingvon...

Se mi kapablus kiel la Budapeŝta gramatikisto rajdi Pegason<sup>[2]</sup>, mi provus fari versojn pri jenaj bildoj, kiuj nun aperas antaŭ miaj okuloj: Kaloĉai, kun kalva kapo burĝe

klaskonscia<sup>[3]</sup>, ne ŝparas paperan rismon<sup>[3]</sup> por sia vero skolastika. Sed li trafis en abismon<sup>[3]</sup>, tial ke li ne estas komprenata. Kaj li suferas teruran skismon<sup>[3]</sup> pro -ita kaj -ata. Kaloĉai kun kalva kapo burĝe klaskonscia<sup>[3]</sup>.

Prefere mi rekomendu al la legantoj la solan regulon, kiun mi mem ĉiam provis obei; ĝi estas eldirita de s-ro Teofilo Kar (Cart), la mortinta prezidanto de la Akademio: "Kio en nia lingvo estas klara, tio estas bona, eĉ se ĝi ne estas gramatike korekta; kaj ĉio, kio estas gramatike korekta kaj tamen ne klara, tio estas malbona" (laŭmemore citita). Kaj mi aldonu: Kiam vi skribas en esperanto, pensu, ke tiam vi estas civitano de Esperantio kaj sekve devas streĉi la volon por senigi vin je ĉia nacieca influo...

E. Lanti.

Nov-Zelando, Februare 1939.

## Piednotoj

1. ↑ Verŝajne K. kaj V. dirus: neniamaniere, simile al la ŝatataj tiamaniere k.s. pezaj – sed naciecaj formoj.
2. ↑ Mitologia ĉevalo flugilhava, kiun rajdis poetoj. Red. de S.R.
3. ↑ [3.03.13.23.33.4](#) Tiuj esprimoj troviĝas en la portreto, kiun faris Kaloĉai pri Lanti en "Rimportretoj". Red. de S.R.

## Letero al K-do Lanti

(Respondo al la Recenzo pri la "Plena Gramatiko", kiu aperis en n<sup>o</sup> 75)

Kara Lanti,

Mi petas pardonon, ke mi skribas al vi pri tiu via recenzo de la "Plena Gramatiko" ("S.R.", majo 1939). Ne ĉar mi volas rebati viajn kritikojn kaj pruvi plurajn malĝustaj kaj eĉ maljustaj; tio estus facila, sed mi opinias, ke, kiam homo publikigas libron, li per tio mem elmetas sin pasive al ĉiaj kapricoj de la publiko: tia estas la leĝo de la literatura vivo, kaj estus naive kaj ridinde plendi pro ĝi.

Mi do, ekzemple, ne respondos al via argumentado pri ci per la facilakonstato, ke citi la kutimon de 2 kamaradoj aŭ la provon de 1 aŭtoro en 1 libro ne sufiĉas por pruvi la vastan uzatecon de tiu pronomo; mi ne trankviligos vian belan indignon pri la diferenco starigita inter krampo kaj parentezo per la rimarko, ke oni diras tre ofte "inter krampoj" kaj neniam "inter parentezoj", aŭ ke la vorto estas ankaŭ oficiala kaj jene klarigita en la P.V.: "Tipografia signo montranta komencon kaj finon de parentezo" (kio pravigas la noton de

la P.G.); mi ne demandos vin, kial unuflanke vi riproĉas al ni ne liveri striktan regulon pri jena, obl aŭ on – kaj aliflanke konfesas, ke "ne eblas diktatore gramatikumi"; ktp.

Sed inter tiuj detalaj punktoj enŝoviĝis unu ĝenerala teorio, kiu prezentas ĉefan intereson por la vivo kaj la estonteco de nia lingvo. Nur pri tiu ĉi mi petas de vi la permeson iom vaste diskuti.

Via tezo, se mi bone komprenis, estas jena: la naciaj lingvoj estas plenaj je idiotismoj, absurdaĵoj kaj "kaprompaj reguloj"; respondumaj pri tiu kompatveka stato estas la "profesoroj, poliglotoj, latinemuloj, skolastikuloj, harfendemuloj"... kaj aliaj gramatikistoj, kiuj por sia propra plezuro senlime komplikigas la lingvon. Nu, Esp-o estas artefarita lingvo, bazita sur la racio: tial ĝi estas simpla. Se oni lasas la profesorojn ktp (vidu ĉi-supre) ekregi super ĝi ili same terure malfaciligos ĝin kaj la "kompatinda popolo esperantista" perdos, ĝin lernante, siajn harojn (ilin efektive fendadas la profesoroj ktp.) kaj ricevos interŝanĝe nur kapdolorojn. Sed feliĉe fondiĝis la sennacieca movado: ĝi starigos sennaciecan lingvistikon, bazitan sur sennaciisma principo, kaj tiel elsavos la lingvon el la burĝaj manoj de la profesoroj ktp. Amen.

Tiu tezo ne sonas fremde al miaj oreloj. Se mi ne eraras, mi jam aŭdis, antaŭ kelkaj jaroj, saman argumentadon – krom la sola diferenco, ke la vorton "sennacieca" anstataŭis la vorto "marksist-leninista". Kaj, se oni bone memoras, inter tiuj, kiuj plej laŭte mokis tiun fantazion starigi "marksist-leninistan" sciencon kontraŭ kaj super la scienco senepiteta, troviĝis ia Lanti... Sed la hieraŭan ni ne bedaŭru.

La ĉi-supra tezo estas erara kaj en sia principo kaj en sia konkludo. En sia principo: mi ne volas kontesti, ke la naciaj lingvoj estas malsimplaj. Sed tiun malsimplecon oni ŝuldas, tute ne al la gramatikistoj, kiuj aperis nur, kiam la lingvoj jam tute elformiĝis, sed al la popolo mem, al la "elementuloj-proletoj", pri kiuj vi faras al vi tiajn kortuŝajn iluziojn. Se vi estus studinta iom la lingvistikon, anstataŭ ĝin primoki, vi estus konstatinta, ke la kaŭzo de tiuj absurdaĵoj estas preskaŭ ĉiam tiuj leĝoj pri analogio kaj pri minimuma peno, kiujn vi tiel alte laŭdas! Kaj ĉar tiuj leĝoj, kiel vi mem tre ĝuste rimarkas, efikas plej intense ĉe la popolo, malplej ĉe la kleruloj, ni rajtas diri, ke la popolo respondumas pri la ĥaosa stato de la lingvo, kiun ĝi parolas! Kaj tiun mian aserton mi povus apogi per mil kaj mil pruvoj. Cetere, ĉu la simpla saĝo ne sufiĉas por aserti, ke la lingvojn, kun ĉiuj iliaj mankoj kaj tuberoj, estigis la amaso de nekulturitaj vilaĝanoj aŭ laboristoj? La kapablon ĝuste kaj racie uzadi la lingvon la eco de proleto ne pli entenas en si mem, ol la kapablon skulpti bareliefojn aŭ komponi simfoniojn. Kaj aliflanke, ĉu la ĉiutaga observo ne montras, ke ne ekzistas unu gramatikisto, kiu sukcesis enkonduki novan vorton aŭ parolturnon en sian propran lingvon? Se vi pli bone konus tiujn gramatikajn monstrojn, vi vidus, ke plejofte estas ili, kiuj provis simpligi, klarigi la popolan lingvon: foliumu nur la admirindajn gramatikistojn de la 17-a franca jarcento, la "Grammaire de Port-Royal" ekz-e, kaj vi konscios, kian klarecon, kian logikon ili penis enmeti en la francan lingvon.

Sed vi lasas vin peli de blinda klaskonscia antaŭjuĝo kontraŭ la specialistoj. Vi ne pardonas al ili, ke, por science

difini kaj studi sian materialon, ili bezonas apartan terminaron, apartan klasifikon, apartajn metodojn. Vi ne riskus moki la elektristojn, ke ili "skolastikas" pri ĵuloj, kulomboj, rezistancoj, cirkvitoj ktp – ĉar pri la elektro vi konscias, ke vi ne kompetentas. Sed pretekste, ke la studobjekto de la lingvistoj estas la lingvo, kiun vi aŭtomate parolas, vi imagas al vi, ke vi kompetentas pri ilia scienco kaj rajtas akuzi ilin pri ĉiaj krimoj. Bonvolu kredi, amiko, ke mi laboris dum kvar jaroj antaŭ ol klare kompreni la metodojn de la lingvistiko kaj kapabliĝi ilin korekte apliki, kaj ke de tiam mi plu studadas kaj lernadas. Tion mi ne diras por vekivan miron aŭ kompaton; tion mi diras por montri al vi, ke la lingvistiko estas scienco, kun neevitebla inicado kaj akirenda metodologio, ĝuste kiaj la fiziko aŭ la antropologio; ke ne povas esti la burĝa lingvistiko kaj ia proleta, ĝuste kiel ne povas esti ia stalinisma kemio aŭ ia rasisma algebro; ke la instruoj de la lingvistiko aplikiĝas al Esp-o tute same kiel al aliaj lingvoj.

"Sed Esp-o, vi respondos, estas artefarita lingvo!" – Nu, kion tio signifas? Tio estas interesa informo por la historio de la lingvo, sed tio neniel utilas por ĝia nuna konsisto. La proleto aŭ la poligloto, kiu nun lernas Esp-on, lernas ĝin kiel vivantan lingvon, ne kiel konvencian kodon. Se ĝi estus nun vere nur artefarita lingvaĵo, tiuj leĝoj pri analogio aŭ pri minimuma peno ĝuste ne efikus super ĝi! Ĉu vi opinias, ke la maristaj signalistoj submetas al tiuj leĝoj la formulojn de siaj flago-kodoj? Ĉu vi iam rimarkis aplikon de tiuj leĝoj en la mors-telegrafado? Ĉu en la kemiaj formuloj aŭ en la algebraj ekvacioj? Jen tamen perfektaj ekzemploj de artefaritaj, pure



artefaritaj lingvaĵoj?

Esp-o estas nun lingvo, kaj, kiel ĉiuj vivantaj lingvoj, influata de multaj ne-raciaj fortoj. Kaj se, kiel vi deziras, la proletoj fariĝus ordonpovaj en Esperantio, la lingvo fariĝus pli kaj pli simila al la naciaj. Ĉar mi ne kuraĝas kredi, ke la aliĝo al tiu- aŭ alia-numera Internacio aŭ al Sennaciismo povas funde ŝanĝi la pensan mekanismon de homo. Ĉiam la homo bezonas kaj volos esprimi, ne nur siajn ideojn, sed, kaj antaŭ ĉio, siajn sentojn; kaj, same kiel okazis ĝis nun, la esprimado de la ideoj mem estos preskaŭ ĉiam miksitaj kun tiu de la sentoj, estos sente kolorigita. Kaj la sento estas la ĉefa fonto de ĉiuj lingvaj mallogikaĵoj, neraciaĵoj... Vi mem, kara Lanti, kiu kredas vin tiel raciema, kial do vi tiel ŝatas la ironion kaj provas ironie prezenti viajn tezojn? La ironio, kiu instigas vin ŝajnesprimi la malon de via penso kaj iel inversigas ties signon, la ironio estas interveno de la sentoforto en la paroladon: pure racie konstruitaj estuloj ne nur ne uzus, sed eĉ ne komprenus la ironion!

Kompreneble, ne ĉio estas erara en via argumentado. Vere estas, ke Esp-o estas relative pli racieca lingvo ol la naciaj. Sed por konservi tiun relativan raciecon oni devas fidi ne al la instinktoparolaj proletoj, kiuj ĉiel<sup>[1]</sup> ĝin difektos, nek al la matematikismaj teoriuloj, kiuj ĝin ĝismorte perfektigos (memoru pri Ido!) – sed al la verkistoj, kiuj ĝenerale posedas bonan lingvosenton, kaj al la gramatikistoj kiuj ĝin klarigas per raciaj formuloj. Mi tute ne ŝatas la ekstremajn poziciojn; inter la nepra raciigado kaj la blind-instinkta evoluado, mi opinias, ke ni devas trovi kaj sekvi la ĝustan mezon.

Nek tiujn, kiuj volas anstataŭigi interakto per la pli logika aktintero, nek tiujn, kiuj skribas: "pravigi formojn, tute klaraj, simplaj kaj vere esperantecaj", mi aprobas. Kontraŭe al Cart, mi aŭdacas kredi, ke oni povas kunigi la stilan klarecon kaj la gramatikan korektecon, kaj ke oni devas oferi unu al la alia nenium el tiuj du ĉefaj principoj. Kaj precipe mi aŭdacas konsili, ke oni parolu nur pri la aferoj, kiujn oni konas. Nekompetenteco estas ja solida supereco, sed ĝin oni ne devas trouzi.

Simpatie via,

G. Waringhien, SAT-ano n° 17296.

\*            \*

\*

## Piednotoj

1. [↑](#) Ankaŭ mi scias... tabelumi!

## Responde al K-do G. Varingjen

Kara K-do Profesoro,

La legantoj mem respondu la demandon, ĉu fakte mi argumentis malĝuste pri la "Plena Gramatiko" kaj maljuste al ties aŭtoroj. Mi do simple petas, ke ili bv. relegi mian recenzon antaŭ ol konkludi pri tiu demando. Oni ne povas esti juĝanto kaj juĝato, kaj en la koncerna afero tiu aksiomo jura valoras por ni ambaŭ, ĉu ne? Sed mi povas almenaŭ certigi, ke se fakte mi estis maljusta al vi, tion mi tre bedaŭrus, tial ke mi daŭre havas por vi grandan estimon. Kaj eble ĝuste pro tio, ke ju pli mi admiras vian laborkapablon kaj vian fervoron por nia komuna afero, des pli mi bedaŭras, ke vi elspezis vian energion laŭ malĝusta direkto, kiam vi verkis vian vere monstran Gramatikon. La Esperantistaro absolute ne bezonas tian verkon kaj mi havas la konvinkon, ke ĝi eĉ povas nur malutili.

Ne necesas havi grandan imagpovon por prezenti al si la fiuzon, kiun malamiko de esp-o povus fari je tiu 488-paĝa volumo. Jen aŭskultu: „Estimataj ges-roj, vi ĵus aŭdis elokventan pledon por esp-o; oni rakontis al vi pri ĝiaj mirindaj kvalitoj, pri ĝia facila lernebleco ktp.; vi, ekz-e, aŭdis pri ĝiaj 16 reguloj simplaj kaj parkereblaj en mallonga tempo ktp. ks.; nu, Ges-roj, oni aplombe trompis vin; jen

rigardu, mi tenas en la mano ekzempleron de esp-a gramatiko; ĝi estas 488-paĝa! Ĉu do tiu dokumento ne pruvas plej evidente, ke la Zamenhofa elpensajo ne estas la mirindaĵo, kiun blufuloj trompe prezentas al vi..." ktp. ktp. ks.

Kompreneble vi povus rebati, ke mi tro fantazias, ĉar ĝis nun via verko en sia dua eldono ne estis tiele uzata de demagogo. Nu, bone, ni eĉ volas esperi, ke tiu latentaj danĝero neniam konkretiĝos; tamen ĝi ekzistas...

Sed prefere vi meditu pri jena fakto: Lanti, mia amiko, kiu uzas ĉiutage esp-on jam de 20 jaroj, se la finlego de la "P.G." ricevas la malagrablan impreson, ke li neniam konis la esp-ajn regulojn kaj sentas sin tiurilate pli malklera ol antaŭ la legado. Kaj la fakto, ke nur mi kuraĝas publike fari tian konfeson, ne emigu vin pensi, ke aliaj esp-istoj ne havis similan impreson. Eble ĝi ne estis ĉe ili tiel forta, kiel ĉe mi, pro la simpla tialo, ke ili nur trafolumis la pezan volumon, metis ĝin poste en ŝrankon kaj kontentiĝis per la penso, ke ili havas en sia dispono "sciencan" verkon, kiu respondas al ĉiuj lingvaj demandoj pri esp-o. Mi povus mencii la nomon de almenaŭ 20 esp-istoj el diversaj landoj, kiuj konfesis al mi, ke ili ja posedas ekzempleron de "P.G.", sed ke ĝi tute ne utilas al ili. Kaj – pli grave, pli meditante – mi observis ĉe tiuj esp-istoj ian elreviĝon, kiu antaŭsignas senfervoriĝon en nia movado. Ili ja malklare ekvidis, ke nia lingvo tendencas fariĝi same komplika kaj malfacila kiel la naciaj. Pro tiaj konstatoj mi akiris la konvinkon, ke vi, tre estimata K-do Profesoro, bonintence faris malbonan servon al nia afero...

\* \*  
\*

Sed mi ne devas forgesi, ke vi precipe skribis por inviti min al diskuto pri tezo, kiun viasupoze mi defendas. Nu, vi faras al mi grandan honoron, sed ĉu konvenas, ke mi akceptu vian inviton, ĉar vi rimarkigis, ke mi ne havas kompetenton en lingvistiko? Tiam, cetere mi ne pretendas havi. Tamen, malgraŭ tiu manko, mi ne timas deklari, ke via peraŭtoritata argumento ne multe impresas min. Kaj jen tial: estas kontrolebla fakto, ke preskaŭ ĉiuj lingvistoj kontraŭas la ideon pri viveblo de artefarita lingvo. Por faciligi la kontrolon, mi citu el iu verko de d-ro Alberto Doza (Dauzat): "Nekontraŭdireble, la malnova ideo pri universala lingvo, komuna al ĉiuj homoj, estas nura ĥimero..." (La Prilingva Filozofio, p.45 – La Philosophie du Langage, Bibliothèque de Philosophie scientifique, Paris, 1927). Tiu aŭtoro, kies kompetenton vi kredeble agnoskas, dediĉis tutan ĉapitron al la demando pri artefaritaj lingvoj, por science, "kompetente" pruvi, ke la afero estas utopia. Vi certe scias, ke ankaŭ Vendries eldiris la saman opinion antaŭ nemultaj jaroj.

Sed kredeble vi tuj pensos, ke A. Meje (Meillet), kies aŭtoritato estas pli granda ol tiu de la du aŭtoroj ĵus menciitaj, eldiris favorajn vortojn pri nia afero. Jes ja, kaj siatempe (en 1920) mi publikigis leteron de li en La Laborista Esperantisto. Tiam mi ne hontis ĝeni lin per demandoj kaj, ne sciante kiel vi, ke mi estas analfabeto en lingvaj aferoj, li bv. favori min per respondo. Sed ni ne

forgesu, ke tiu mondfama lingvisto skribis jenon en sia verko "La Lingvoj en la Nova Eŭropo": "La esp-istoj agis tre naive, kiam ili tradukis en esp-o (intence mi forlasas la akuzativon) verkojn literaturajn, kiuj estas universale konataj. La literaturo estas fako, en kiu oni absolute ne povas utiligi artefaritan lingvon." (El la menciita verko, p. 326).

Nu, ĉu mi, kiu uzas esp-on pli facile ol mian gepatran lingvon, kiu praktikis ĝin kun homoj el ĉiuj mondpartoj, povas riverenci antaŭ la "kompetento" de d-ro Doza kaj humile konfesi, ke ja estas miaflanke ridinda pretendo havi opinion pri lingvaj aferoj? Kaj ĉu la du aŭtoroj de "Pl. Gr.", kiuj nemalofte literaturumas, proze kaj poezie, devas sin klini antaŭ la verdikto de l' fama profesoro ĉe la Pariza Universitato? Ambaŭkaze nur nea povas esti la respondo. Plie, mi pensas, ke Zamenhof ankaŭ ne estis lingvisto kaj tamen arogis al si la pretendon doni al la tuta mondo artefaritan lingvon. Pro tiuj konsideroj, malgraŭ mia senkompetento, mi ne timis eldiri mian opinion pri via verko kaj akceptas vian inviton diskuti pri nia komuna afero.

\* \*  
\*

Sed tuj mi konfesu, ke difinitan "tezon" mi ne havas. Krome mi deklaras insiste, ke mia vidpunkto pri la evoluo de nia lingvo havas absolute nenion komunan kun la "marks-leninista" lingvistiko. Ega estas mia miro, ke vi povis supozition. Ŝajne vi forgesis, ke en la "Tezoj pri internacia lingvo,

prilaboritaj de la brigado de lingvokonstrua fako kaj akceptitaj de plenkunsido de la Sciencesplora Instituto de la lingvo – ĉe la Popolkomisaro de klerigo R.S.F.S.R. Moskvo" kaj publikigitaj en "La Nova Etapo", kajero tria, dum la jaro 1932-a, oni povas interalie legi jenon: "6. En la disvolviĝ—procedo de la burĝa socio estis kreitaj sennombraj projektoj de helpaj lingvoj, inter kiuj plej vivkapabla sin montris la projekto konata sub la nomo "lingvo Esperanto". Ni ne devas tamen malakcepti utiligon ankaŭ de aliaj internaciaj lingvoj, se ilia disvastigiteco faras tiun utiligon ebla."

Ĉu iu ajn esp-isto povus konsenti kun tia tezo? Bonv. do memore noti, ke nenium el miaj antaŭaj kritikoj pri la "Moskva lingvoscienco" mi malkonfesas. Kaj plie, favoru min, ne supozante, ke pri la proletaro mi opinias, ke ĝi posedas senspertan sciencon pri lingvaj aferoj. Tute ne! Mi krome konsentas kun vi, ke en la naciaj lingvoj la gramatikistoj estas senpovaj por influi ilian evoluon.

Kaj nun, supozante, ke ne plu ekzistas miskomprenoj inter ni, la esencan problemon mi alfrontas. Ĉu la leĝoj, kiuj efikas en la malraciaj lingvoj naciaj, ankaŭ valoras por nia sennacieca lingvo, racieme (mi ne diras: racie, tial ke, bedaŭrinde, Zamenhof ne plene sukcesis tiurilate) artefarita? Kaj se oni maljesas al tiu demando, ĉu la aŭtoroj de esp-a gramatiko ne devas apliki alian metodon ol tiun de la lingvistoj, kiuj esploras naciajn lingvojn?

Kvankam mi estas viadire analfabeto en lingvistiko, tamen mi scias, ke A. Meje skribis jenon: "La lingvistikaj leĝoj ne estas ĝeneralaj kiel tiuj de l' fiziko kaj kemio, sed specialaj al iu lingvo kaj al iu epoko." (Historia lingvistiko... p. 16, laŭ

cito de Doza en "Prilingva Filozofio" p. 290).

Kaj alipaĝe la sama aŭtoro substrekas: Meje demonstris, ke rilate al la lingvistikaj leĝoj oni ne devas paroli pri necesoj, sed nur pri ebloj.

Se tiel estas, ŝajnas al mi, ke aŭtoro de esp-a gramatiko ne devas esti gvidata en sia laboro per la "tradicio lingva", li devas, imite al nia Majstro, racieme streĉi la volon por ne fuŝi la apartan econ de nia lingvo, kiu estas ĝia artefariteco – kaj tiu eco fontas en la racio. Mi havas la firman konvinkon, ke vere esperanteca gramatiko povus ege influi sur la evoluon de nia lingvo, kaj tiu mia senkompetenta opinio almenaŭ ne kontraŭas al la aŭtoritataj asertoj de A. Meje. Inter la esp-istaj laboristoj mi ĉiam rimarkis grandan deziron uzi korekte la lingvon – kaj ankaŭ elreviĝan malkontenton, ĉe la konstato, ke ne eblas ekscii, ĉu oni devas diri, ekz-e, "eterno" aŭ "eterneco", "avido" aŭ "avideco", "malriĉo" aŭ "malriĉeco", "justo" aŭ "justeco", "la jena" aŭ simple "jena" ktp. ks., ĉar Zamenhof mem uzis kaprice tiujn duoblajn formojn por esprimi tute la saman ideon. Kelkfoje sur la sama paĝo de verko oni povas fari tian bedaŭrindan konstaton. La rolo de gramatikisto estus do difini simplajn kaj klarajn regulojn por uzi kompreneble nian lingvon anstataŭ celi per subtilaĵoj liveri pravigon pri ĉiuj kontraŭecaj formoj Zamenhofaj – aŭ pri siaj propraj. Kaj tion farante, li pli inde honorus al nia Majstro, ol per la provo pravigi liajn mankojn per skolastikeca rezonado.

Ĉar, laŭ la aŭtoritata opinio de Meje, la lingvistikaj leĝoj rilatas nur al iu lingvo, kaj, koncerne tiun lingvon mem, nur al iu epoko de ĝia vivo, mi senĝene asertas, ke nunepoke la



profesoroj kaj aliaj intelektuloj pli malbone influas la evoluon de nia lingvo ol la elementuloj, kiujn vi kulpigas. La unuaj komencas ordinare verki aŭ traduki tuj post la lernado de esp-o, antaŭ ol esti akirintaj esperantecan senton per longa praktikado de la lingvo kaj do tute nature ili tendencas enkonduki idiotismojn. Kaj la plej danĝeraj el tiuj fuŝuloj estas la poliglotoj, kiuj opinias havi kompetenton en nia afero, tial ke ili povas citi el kelkaj lingvoj por pravigi siajn absurdaĵojn. Ordinare poliglotoj havas la cerbon plena je vortoj kaj sendube pro tio ne restas loko en ilia pensorgano por originalaj ideoj. La duaj, t.e. la elementuloj, povos malboninflui sur la evoluon de nia lingvo nur, kiam ĝi fakte estos jam venkinta. Bedaŭrinde, tiu danĝero ne estas baldaŭa, dum la malbona influo de iaj intelektuloj estas nuna...

Por pravigi mian aserton, mi denove mencias la bedaŭratan K-don Ozere, kiu fuŝe skribis kaj parolis en franca lingvo kaj tamen flue kaj korekte uzis esp-on. Kaj en la maja n-ro de "S-ulo" vi povis legi la nekrologon, kiun verkis pri si mem K-do Bubo antaŭ ol sin mortigi. Jen denove ekzemplo de simpla laboristo, kiu penadis uzi korekte nian lingvon kaj flue ĝin parolis. (Li ankaŭ ci-umis; cetere mi mem ci-umas kun kk. personoj.) Kaj ĉu do ne estas la ĉarpentisto Haber, kiu iniciatis la eldonon de gramatiko por franclingvanoj kaj verkis ĝin en kunlaboro kun simpla instruisto! Tiu gramatiko jam atingis la eldonkvanton de 32.000 ekzempleroj, kaj ĝi eĉ trovis la ŝaton de neŭtraluloj, kiuj petis la permeson fari apartan eldonon, en kiu forestas la socialismaj esprimoj. Mi povus mencii amason da tiaj faktoj, por pruvi tute klare, ke via aserto pri la malbona infuluo de la

elementuloj sur nian lingvon estas tute, absolute senbaza nunepoke. Ne la proletaj esp-istoj kreis la "tradicion lingvan", antaŭ kiu vi riverencas en via tro plena gramatiko. Estas la "bonaj aŭtoroj", kies erarojn, mankojn, idiotismojn vi penadis pravigi per subtilaĵoj.

Neniel mi volas, ke la proletoj estu ordonpovaj en Esperantio. Mi deziras nur, ke gramatikistoj penadu per ĉiuj fortoj por doni al ili esperantecajn lernilojn kaj tiaj, en la nuna stato de nia afero, ne devas speguli la absurdan "tradicion lingvan", kiu valoras nur por naciaj lingvoj. Se la ĝisnuna tendenco naciece malsimpligi nian lingvon daŭre kreskus, ne necesas esti profeto, por antaŭdiri, ke esp-o fariĝus ne plu taŭga ilo por la simpla popolo. Kaj mi opinias, ke la homoj, kiuj penadas per ĉiuj fortoj por liberigi sin je ĉia nacieca influo, t.e. la sennaciistoj (do ne ĉiuj SAT-anoj) ne povas resti indiferentaj antaŭ la skolastikeco de gramatikistoj.

Vi komplezis diri, ke "ĉio ne estas erara en mia argumentado". Nu, mi ankaŭ ne pensas, ke ĉio estas mallaŭdinda en via verko. Ekz-e, sur la p. 327 mi tre kontente legis jenon: "Frazo kiel: ŝi ekvidis siajn fratinojn leviĝantajn el la maro<sup>Z</sup> ŝajnus hodiaŭ nekorekta kaj devus esti ĝustigita en: leviĝantaj aŭ leviĝi." Tute prava estas via instigo ne uzi balaste la akuzativon. Kaj mi sekvis vian konsilon, kiam mi skribis la frazon, kiun vi kritikis. Konfesu, ke tre maltrafe vi elektis vian ekz-on! Mi forlasis la akuzativon ĉe tri vortoj, tial ke ĝi ne estis necesa por la klaro (antaŭ la vortoj sen akuzativo oni tuj subkomprenas la subjekton: kiuj. Se vi scias "tabelumi" mi ankaŭ povus facile lerni la

harfendadon) kaj tiel evitis la sonon ...ajn, kiu vere tiklas malagrabla la aŭdsenton, kiam ĝi estas sinsekve tro ofte ripetata. Malgraŭ la forlaso de tiu balasta akuzativo la frazo restas tute klara kaj la aŭdsento estas kvietigita. Jen kio devus esti regulo obeinda.

Mi protestus se iu proponus tute forigi la akuzativon el nia lingvo. Ĝi ja ofte estas necesa por la klaro kaj ĝi ebligas pli grandan liberon en la aranĝo de frazoj. Kaj mi preferas diri: la muso kuras sub la liton, ol al sub la lito, kiel en Ido...

Malgraŭ mia nekompetento – ĝuste pro tio, vi sendube pensos – mi povus verki centojn da paĝoj pri tiu temo. Sed mi nun pensas, ke la lingvisto Fr. Paŭlhan estas tute prava, kiam li rimarkigas, ke "...vorto neniam havas tute la saman signifon por du malsamaj personoj, nek por la sama persono en du malsamaj momentoj". (La Duobla Funkcio de la Lingvo, p. 27 – 1929). Verŝajne pro tio, vin mi ne kapablus konvinki, nek vi min.

Almenaŭ ne dubu pri mia sincero kaj pensu, ke mi precipe estas severa al miaj amikoj.

Jam delonge mi perdis la esperon, ke nia afero antaŭeniros grandpaŝe. Antaŭ 20 jaroj mi esperis multon de la Internaciista Movado Laborista – kiel aliaj samideanoj celis akiri solvon per la Ligo de Nacioj. Ni ĉiuj estis tre naivaj. La esperanta movado malvolviĝos paralele al la aliĝo de l' homa spirito laŭ racieca tendenco. Ĉio, kio povas helpi en tia metamorfozo, tio havas mian simpatian – kaj ĉio, kio restas ligita al la tradicio, al la rutino, al la skolastiko, tio vekas mian indignon. Tial nedankeme – kaj senkompetente – mi kuraĝis malaprobe recenzi vian verkon...

Kun simpatio kaj estimo

E. Lanti, SAT-ano 1.

## FOR LA IDISMON!

Tial ke s-ro K. Minor tradukis la verkon **Natan la Saĝulo**, tio ne pruvas nepre, ke li mem fariĝis pro tio tute saĝa. Almenaŭ lia rezonado prilingva en la julia n-o de **La Lernanto**<sup>[1]</sup> (Kompatindaj lernantoj!) emigas min pensi, ke lia saĝo estas kelkrilate mankohava.

"Oni ne uzu a-vortojn substantive..." ordonas nia honorinda L.K.-ano<sup>[2]</sup>. Ĉu vere? Tia ordono estas tro aplomba kaj eĉ ofenda al la aŭtoro de nia lingvo. Zamenhof ja multfoje uzis a-vortojn substantive. Pri tio mi estas tute certa, kvankam nun mi ne havas ĉemane la verkaron de nia Majstro por kontroli kaj ĉefe cite ĉerpi ekzemplojn<sup>[3]</sup>. Kaj insistas Minor klarige: "Oni ne diru ekzemple "la riĉaj estas enviindaj". Se tiel oni volas instrui al la lernantoj, necesas ankaŭ aldoni: "**Ne legu Zamenhofajn verkojn; ne imitu la stilon de la aŭtoro de esperanto...**"

Kvankam tia Minora instruo sur la paĝoj de SAT-gazeto estas vere incita, tamen ni sobre ekzamenu la aferon. Kial s-ro Minor havas tian komprenon pri nia lingvo? Senhezite mi respondas: tial ke li estas ido-ema. Kio karakterizas idiston, tio estas lia logikemo, – lia deziro importi sur la lingvan kampon disciplinon, kiu taŭgas nur en matematika fako. Evidente, pli logikas diri: "La riĉuloj estas enviindaj" ol "la

riĉaj estas enviindaj". Tamen ambaŭ formoj estas tute klaraj, tial ke eĉ la plej etcerba leganto kapablas scii, ke en la dua formo la vorto **homoj** estas subkomprenata.

Jes ja, s-ro Minor rezonas kiel la idistoj; li volas, ke nian lingvon regu la absoluta logikeco, la matematikeca spirito de Kutura (Couturat), kiu taŭgas nur rilate abstraktaĵojn, sed ne estas allasebla en la lingva fako, tial ke en ĝi la **sent**o vole-nevole ludas rolon. Lingvo ne estas io abstrakta kiel ciferoj, nombroj kaj matematikaj signoj. En la funkciado de lingvo la emocio, la pasio efikas ne malpli forte ol la racio.

Kiam oni ekkomprenis la konscian aŭ nekonscian idomon de K. Minor, tiam oni facile klarigas al si, kial li ekbatalas kontraŭ la formoj **aliel**, **aliam** ks. Logike ja devus esti "aliiel" ks. Sed li ŝajne ne scias, ke en tia kazo la leĝo de **minimuma peno** efikas. Se sufiĉas uzi la plej simplan formon por esti komprenata, nenia logikeca, teorieca konsidero povas en la praktiko kontraŭpezi sukcese la simpligemon.

Rilate al la alpreno de tiuj ŝajn-neologismoj efikis alia lingva leĝo, nome, tiu de **analogio**. Kiu funde lernis kaj asimilis la tabelon de korelativaj vortoj, – miaopinie ĝi estas la plej genia elpenŝaĵo el nia lingvo, – tiu tute nature kaj senkonscie eldiras frazojn kiel ekzemple jenajn: **Ne tiel rapidu, aliel mi ne povos akompani vin plu! Ies mensogo ne pravigas alies trompon. Ne ĉiam ni estis amikoj, tamen iam kaj aliam ni servis al ni reciproke. Ĉi tie estas malagrabla, ni iru alien.** K.s.

Jam ekzistas en Esperantio kelkaj homoj, por kiuj esperanto ne estas "helpa lingvo", sed la ĉefa, la hejma

esprimilo. Mi opinias, ke tiaj esperantistoj konsistigas pli bonan fundamenton por la estonto de nia movado ol teoriumado logikeca. Almenaŭ mi havas la firman konvinkon, ke la lingvaj rezonaĵoj de K. Minor ne devus aperi en **La Lernanto**. Ili neniel povas helpi lernantojn kompreni kaj ŝati nian lingvon.

Prefere oni instruu pri diversaj manieroj, formoj, por eldiri la saman penson; oni kritiku la pezajn esprimojn kaj malklarajn frazojn, tro ofte renkonteblaj en la gazetaro kaj libraro. Oni provu konvinki la novan generacion esperantistan pri tio, ke nia lingvo entenas latente trezorojn, kiujn Zamenhof mem ne povis elfosi. Esperanto ne venkos per la komercistoj kaj turistoj. Tiu kampo jam estas okupita de la angla lingvo. Esperanto sin trudos per sia literaturo, kiam troviĝos geniaj homoj, kiuj, ensuĉinte la esencon de l' Zamenhofa iniciataĵo, verkos **sennaciece** por tutmonda publiko. Kaj pro tiu konsidero ankaŭ oni devas elkrii: **For la idismon**, ĉar la aŭtoroj de tiu abortaĵo ne volis, ke artefarita lingvo estu literatureca.

Espereble s-ro Minor pruvos al mi "substantive", ke li estas **saĝulo**, ne sentante sin ofendita per ĉi tiu mia senpretenda skribaĵo.

E.L. ITANŜA.

(En "Sennaciulo", 25 oktobro 1937)

## Piednotoj

1. ↑ Monata aldono por lernantoj, kiu aperis en **Sennaciulo** antaŭ 1940.
2. ↑ **Lingva** Komitato (Notoj de la komp.)
3. ↑ La aserto de la aŭtoro estas tute prava. Ni mem ne havas tempon por trofoliumi la verkaron de Zamenhof, sed almenaŭ la legantoj notu, ke en **Plena Gramatiko** de Kalosĉe kaj Varingjen troviĝas pluraj ekzemploj cititaj. Noto de la red. de S-ulo.



## Ĉu idismo?

Leginte la artikolon "[For la idismon!](#)" en n-ro 458, mi povas trankviligi s-ron E.L. Itanŝa: mi ne sentas min ofendita. Sed li estas malprava, nomante miajn vidpunktojn Idismo. Ili estas nur la rezulto de Esperanta Fundamentismo.

S-ro Itanŝa ripetas la malnovan aserton, ke "lingvo ne estas matematiko". Tiu aksiomo estas ĝusta tute ĝenerale, sed mia opinio estas (kvankam mi ne estas matematikisto kaj eĉ ne havas specialajn matematikajn inklinojn kaj kapablon), ke en aglutina lingvo, kia estas esp-o, la vortfarado funkcias matematike, algebre.

Se la sola aŭ ĉefa gvidilo en esp-o estus la klareco, oni povus – ekzemple – uzi la akuzativon (kiu ja faras tion da malfacilaĵo al la plimulto da esp-istoj!) nur en tiuj okazoj, en kiuj neklareco rezultus el ĝia neapliko. La konsekvenco estus lingvo plena je esceptoj. Kaj jen la ĉefa kialo de mia (laŭ kelkaj s-anoj troa) logikeco rilate la vortfaradon en esp-to: Mi volas defendi kion eble plej longe kaj ĝis la maksimuma eblaĵo la sen-esceptecon de esp-o, kiu estas unu el niaj plej gravaj bataliloj. "Predikante" ĉiam kaj ĉie nepran (aŭ maksimuman) logikecon, mi tion tamen ne faras kredante, ke pleja logikeco kaj senescepteco povus iam esti atingita ĉe ĉiuj esp-istoj. Mia vera idearo estas la jena:

Preskaŭ ĉiuj esp-istoj neatentas unu el la ĉefaj diferencoj

inter esp-o kaj ĉiuj "naciaj" lingvoj: En la "naciaj" lingvoj la parolata lingvaĵo estas tio unua, baza, primara, kaj la skribata (literatura) lingvaĵo estas tio konsekvenca, sekundara. La aŭtoroj skribas siajn "nacilingvajn" verkojn kvazaŭ sur la bazo de la parolata lingvaĵo, kaj la poetoj plibonigas kaj plibeligas la parolatan lingvaĵon en kaj per siaj verkoj. – En esp-o la skribita lingvaĵo estis (kaj estas) tio unua, baza, primara, kaj la esp-istoj, kiuj parolas nian lingvon, imitas kiom eble plej bone la skribitan literaturan lingvaĵon de Zamenhof kaj aliaj bonaj aŭtoroj. (Tial mi malaprobas la klopodojn de kelkaj el niaj literaturistoj, kiuj volas krei "literaturan esperanton", kredante, ke la afero estas sama en esp-o kiel en la "naciaj" lingvoj, kaj tute forgesante, ke – krom en kelkaj partoj de la Zamenhofa Proverbaro, [La Gimnazio](#) kaj [La Revizoro](#) – al esp-o preskaŭ tute mankas familiparola lingvaĵo.) La esp-istaro, imitante la lingvaĵon de niaj verkistoj, same facile (aŭ same malfacile) imitus la maksimume logikajn formojn, se la aŭtoroj klopodus (laŭ miaj kaj aliies rekomendoj) eviti la neologismajn nelogikaĵojn, kiuj estas esceptoj en nia lingvo. Eĉ se ĉiuj aŭtoroj kaj bonaj oratoroj nur uzus tute logikajn, do tute fundamente regulajn, formojn, la komencantoj kaj mezspertaj parolantoj ne povus perfekte imiti tiun senesceptan, tute logikan esp-on; ili sekvus la leĝon pri "minimuma peno" kaj uzus la nematematikan esp-on, kiun E.L. Itanŝa ŝajne aspiras. Mi ne diras, ke tio estas terura afero, ĉar iom post iom pli kaj pli multaj esceptoj eniĝos en nian lingvon, kaj neniu kaj nenio povas tion malhelpi. Sed ni povas fari ĉion eblan por konservi la maksimuman regulecon de esp-o kiom eble plej

longtempe, ĉar unu el la plej eblaj efikaj varbiloj por esp-o estas, ke ni povas diri: "Esperanto ne havas esceptojn!" Kaj tion ni ne povas diri, se ni aprobas la nelogikajn, neregulajn formojn; tion ni povas diri nur, se ni kontraŭbataladas ilin kiel malkorektaĵojn.

**Charles Minor, L.K.**

**P.S.** – Ĉar mi rekomendis, ke oni ne uzu adjektivon substantive, vi akre riproĉas min, indigne rifuĝante malantaŭ la dorson de Zamenhof. Tamen, en la sama artikolo vi senhezite parolas pri "la estonto de nia movado", kvankam Zamenhof klare diris (Lingva Resp. 46), ke "la vorto **estonto** povas signifi nur **estonta persono**, sed ĝi ne povas signifi **estonta tempo** aŭ **estonta afero**". Strange!

("Sennaciulo" de 25. novembro 1937)

## Quandoque bonus dormitat Homerus <sup>[1]</sup>

La samon oni povas diri pri Zamenhof. Sed la aŭtoro de esperanto estis tolerema kaj nemalofte diris, rilate al tiklaj demandoj el nia lingvo, ke oni lasu al la vivo mem la zorgon ilin respondi. Se la vorto "estonto" povus signifi nur: "estonta persono", la aldono de **ec** ne donus al ĝi tempan sencon. En "Plena Vortaro" ambaŭ formoj (estonto kaj estonteco) estas allasataj por la senco de venonta tempo. Sekve la kunteksto kaj P.V. certigis, ke mia penso estos komprenebla de ĉiu esperantisto...

Se en viaj klarigoj al **lernantoj** vi estus dirinta: "kvankam Zamenhof k.a. bonaj aŭtoroj ne malofte uzis adjektivan formon kun substantiva signifo, tamen mi ne konsilas imiti ilin tiurilate...", mi ne kaptus skribilon por eldiri mian proteston. Ĉiaokaze via rimarko neniel povas refuti mian artikolon, kiu celas montri, ke en la vivo de lingvo ĝenerale venkas la plej simplaj formoj kaj ne pedanta logiko.

E.L. Itanŝa.  
("Sennaciulo", 25. januaro 1938)

\* \* \*

# Piednotoj

1. ↑ Tiu latina diraĵo signifas, ke eĉ bona aŭtoro ne estas ĉiam egalkvalita. Respondo al la [postskriba noto de Ch. Minor.](#)

# NE ANKORAŬ EKZISTAS MONDLINGVO

Ĉe lego de tiu ĉi titolo verŝajne kelkaj legantoj skuetos la kapon, pensante, ke la subskribinto de ĉi tiu artikoleto estas malsaĝa aŭ, en la plej bona kazo, malsprita ŝerculo. Tamen la faktoj ĉiutage pravas, ke esp-o, kia ĝi estas uzata en la praktiko, ne tute solvis la problemon pri tutmonda interkompreniĝo.

En nia esp-ista vivo tra multaj landoj mi plurfoje havis la okazon konstati, ke ne sufiĉas elparoli la nomon de **objektoj** per la samaj sonoj por atingi kompletan interkompreniĝon. Necesas ankaŭ fari la samon pri propraj nomoj. Mi citu nur unu tipan ekzemplon. Foje oni demandis min pri "K-do Bo-u-bo-u" (prononcata en 4 silaboj), kaj mi respondis, ke tiun personon mi tute ne konas kaj eĉ la unuan fojon aŭdas tiun nomon.

– Vi ne konas? mirigite aldonis la demandinto, sed li estas via samlandano kaj tre aktiva en la movado...

– Bonvolu skribi tiun nomon, mi petas.

Tiam mia kunparolinto elpoŝigis sian krajonon kaj skribis: "Boubou".

– Nu, jes, mi konas, sed vi devus elparoli: "bubu".

Kompreneble ni ambaŭ ridegis ĉe la konstato, ke

nacilingva ortografio kaj ĝia esp-a prononco povas tiom malsimili...

Estus malsaĝe kredi, ke tia demando estas neniel grava kaj nur amuza. Fakte en la estonto propraj nomoj pli kaj pli estos uzataj en nia lingvo. Kaj jam nun, okaze de la "incidento" (jure milito ja ne ekzistas!) ĉino-japana, disaŭdigejoj spertas grandajn malfacilojn, rilate al propraj nomoj. Ateston pri tio mi trovis lastatempe en anglalingva ĵurnalo. Jen ĝi estas:

"... La informistoj de B.B.C. havas siajn proprajn premsonĝojn pro la ĉin-japana konflikto. En la komunikoj por ĉiu nova bulteno ili devas elparoli la nomojn de japanaj kaj ĉinaj urboj kaj vilaĝoj, tiujn de generaloj, ŝtatistoj ktp. kaj ili konstatas, ke tio estas ekster ilia kapablo. Ĉefe la japanaj nomoj kaŭzas la plej grandan ĝenon, tial ke la informistoj ne estas familiaraj kun la japanaj vokaloj kaj ne komprenas la simplan fakton, ke la silaboj ne estas akcentataj. Specialaj atentigoj estas faritaj al la ambasadorejoj de ambaŭ landoj koncernataj kaj ankaŭ al kompetentuloj..."

Tiurilate la esp-istoj havas nenion konkretan por proponi. La problemo pri tutmonda interkompreniĝo restos nesolvita – eĉ principe – ĝis la propraj nomoj estos esperantigitaj kaj publikigitaj kun aldonaj mapoj koncerne la geografiajn. Dume la SAT-anoj povus instige helpi al la solvo de tiu problemo per la esperantigo de sia propra nomo. Estas plorinde ke en Esperantio troviĝas ankoraŭ tiom da homoj, kiuj trudas sian naciecon per tabueca respekto al nacia ortografio. Sendube tiaj naciistoj emos tuj rebati, ke en esp-o mankas literoj por transskribi tute **precize** sian nomon. Nu, sed tiu precizo tute ne necesas. Sufiĉas, ke en Esperantio ĉiu sciu, ke tiu aŭ alia persono nomiĝas per tia aŭ alia kombino el esperantaj literoj aŭ sonoj.

Evidente Esperantio ankoraŭ ekzistas nur pli-malpli ideale, kvankam troviĝas jam esp-istoj en ĉiuj partoj de l' mondo. Ne eblas ignori la realaĵojn, la naciojn kun iliaj leĝoj ktp. Ne eblas malatenti la impostkolektiston... Sed en neniu lando estas malpermesite havi "plumnomon", pseŭdonimon. Tiajn havas multaj verkistoj. Volter laŭleĝe sin nomis Arue (Arouet). Se esp-istoj sennaciecigus sian propran nomon, tio estus signo, ke ili celas kondukti esperantiste en Esperantio. Ĉu tio estas troa postulo?

Respekto al la nacia formo de sia propra nomo tio estas signo pri konscia aŭ nekonscia naciismo. Propra nomo ja pensigas pri familio, kio estis la unua formo de patrio<sup>[1]</sup>, pri regiono, lando, tradicio kaj ĉio cetera, kio premŝvebas super la popoloj kaj konsistigas la spiritan atmosferon, kiu ebligas militojn.

Bagatelaĵo! kredeble pensos oportunistoj. Eble! Sed la vivo ĝenerale konsistas el malgravaĵoj. Kiu ne kapablas rilati racie al bagatelo, tiu ankaŭ ne povos kondukti saĝe en grava okazo. Kiu povas elporti pezan ŝarĝon, tiun ne ĝenas malpeza. Sed la samo ne estas direbla en inversa propozicio.

**"SAT-anoj celas al sennacieca sent-, pens- kaj agadkapablo"**, estas dirite ekde la fondiĝo de la Asocio. Tiu moto ne devas esti nura surpaperaĵo. Ni ĉiam kaj ĉiarilate agu racie kaj konsekvence: ni montru per nia sinteno antaŭ "malgravaĵoj", ke ni penadas senĉese por formi nian menson konforme al la celo. Tion farante ni helpas laŭpove al la estiĝo de reala mondlingvo.

**Narazu Mono.**



# Piednotoj

1. [↑](#) Pri tio oni legu en [Naciismo](#) de E. Lanti.

## VI DO EKSCIU...

K-do Ŝiranu Henĵin ŝajnas tre naiva; sed lia sciemo estas certe laŭdinda. Tial mi komplezas doni al li kelkajn klarigojn.

La marksismo estas scienco kaj kiel tia ĝi atentigas nur **faktojn**. Kaj estas konstatebla **fakto**, ke en la rilatoj inter la homgrupiĝoj decidas la forto. Konkrete, moralaj principoj ne ekzistas; eĉ idealistoj konsentas pri tio. Sekve, ĉu do ne estas ridinde preni fikcion kiel konstruan bazon? La celo ja pravigas, sanktigas la rimedojn. Kaj mi ne havas eĉ iom da dubo, ke nia genia gvidanto Stalin havas bonan celon, nome konstrui socialismon sur unu sesono de l'mondo.

La **fakto**, ke vi baldaŭ sentas kapdoloron, kiam vi cerbumas pri sociaj demandoj, pruvas klare, ke etcerbuloj kiel vi bezonas la gvidadon de fortvolaj homoj, kiuj montras la irendan vojon. La vorto "stalin" en la rusa lingvo signifas **ŝtalon**. La **fakto**, ke nia Gvidanto alprenis tiun nomon, pruvas klare, ke li estas la kapabla homo por gvidadi la Bolŝevistan Partion kaj per ĝi la Proletaron el la tuta mondo.

Via demando, kial Zinovjev, Buĥarin k.a. famaj bolŝevistoj fariĝis perfiduloj, havas nenan sencon. Nur ili mem povus klarigi la motivojn, kiuj instigis ilin opozicii al Stalin. Ili estas elmondigitaj; sekve ridindas starigi neresponeblan demandon.

Kio faras la forton de nia Partio, la bolŝevista, tio estas la

**fera disciplino**, kiun ĝi postulas de siaj anoj. Kiel mi jam diris, la marksismo estas scienco kaj ĝi esploras **faktojn**. Nu, estas **fakto**, ke antaŭ 404 jaroj Ignaco de Lojola fondis la **Societon de Jezuo**, kiu ludis en la Historio treege gravan rolon. Malgraŭ persekutoj en diversaj landoj, malgraŭ tio, ke la papo Klemento la Dekkvara eĉ malstarigis ĝin dum kelkaj jaroj, malgraŭ ĉio, neniu neas, ke ankoraŭ nun la jezuitoj tre efike agadas por la prospero de la katolika eklezio. La forto de la Societo de Jezuo kuŝas ĉefe en tio, ke ĝiaj anoj kadavre obeas (**perinde ac cadaver**). Tia **fakto** kredeble inspiris Lenin-on, kiam li starigis nian Partion.

Kompreneble la jezuitoj eraras en sia celo, tial ke ili kredas je la neerarpoveco de l' papo, kiu estus inspirita de Dio, kiam temas pri dogmaj aferoj. Sed ni, bolŝevistoj, armite de l' scienca doktrino de Marks, ne povas erari. Se necesas, ni do mortigas, malliberigas kaj kalumnias kun tute pura konscienco, tial ke sankta estas nia celo – kaj tial ke ni posedas la veron.

Estas tute ridinda konsidero atenti pri la ebla sincero kaj honesto de niaj kontraŭuloj; la **fakto** estas, ke **objektive** ili estas ĝenuloj, malhelpuloj, fuŝuloj. Scienco ne konas sentimentalajojn, sed nur **faktojn**. Kiu ne estas kun ni, tiu estas kontraŭ nin kaj sekve estas nia devo iel aŭ aliel senpovigi ĉiun kontraŭulon. Ĉio, kio baras sur la vojo al nia celo, la superregado, tio devas ĉiel esti forigata; ĉiun opoziciulon oni devas ekstermi...

Mi ne volas fini ĉi tiun tro koncizan respondon, ne rimarkigante, kiom ridinda fakte estas via sciemo. Ni, bolŝevistoj, ne rompas al ni la kapon por ekscii, ekzemple,

kial niaj gvidantoj iafoje ŝanĝas la agitvortojn. Hieraŭ ni akre kritikis aferon kaj hodiaŭ laŭdas ĝin fervore. La ŝanĝo estas nur taktiko kaj ne konvenas, ke simplaj soldatoj, kiuj iras al batalo, pridiskutu la ordonojn de la stabo. Nia Partio estas armeo kaj nia fera disciplino faras ĝin forta.

Cetere ni neniel dubas, ke per la marksisma dialektiko laŭ tezo, antitezo kaj sintezo oni povas facile pravigi science ian ajn ŝajnan kontraŭdiron.

Espereble vi, ho! kompatinda Ŝiranu Henĵin, ne plu cerbumados pri tiaj problemoj kaj tiel evitos kapdoloron. Vi simple aliĝu al nia Partio kaj ĝuadu kun ni la volupton obeadi al nia genia Stalin, la ŝtala homo, la gvidanto de l'mondrevolucio.

**Tomodaĉi.**

("Sennaciulo", 25. Novembro 1938)

# VIVU LA NEŬTRALISMO!

Laŭstatute SAT devas rilati lojale kaj akcepteme al ĉiuj tendencoj, ekzistantaj en la laborista movado tra la tuta mondo. Tial mi ne dubas, ke ĉi tiu artikolo trovos bonan akcepton sur la paĝoj de "S-ulo". La tendenco, kies esencon mi elmontras per prikonsidero super faktoj kaj aŭtentikaj dokumentoj pli kaj pli fortiĝas kaj eĉ nun tute regas en la komunistaj partioj diverslandaj.

Kiam Lanti ekkriis sian faman: "[For la Neŭtralismon!](#)", tiam ne ekzistis en la revolucia movado la tendenco, pri kiu mi parolas. Nenial do mi intencas kritiki lian tiaman vidpunkton. Sed la SAT-anoj ne estas dogmuloj, ĉu ne? Ili sekve ne devas rilati al tiu verketo kiel al ia biblio. Dek kvin jaroj ja forpasis de kiam ĝi aperis. Kaj la fakto, ke preskaŭ 10 000 ekz-oj en tri eldonoj estas disŝutitaj tra la esp-a mondo, ne povas forigi la fakton, ke la ideoj esprimitaj en tiu broŝuro ne plu estas taŭgaj por la nuntempa situacio...

En 1922, kiam Lanti verkis sian tezon, tiam revolucia spirito ardis en la laborista movado. Tiam Lenin, Trocki, Zinovjev k.a. gvidistoj de la **Oktobra Revolucio** direktis siajn akrajn kritikojn al ĉiuj kapitalistaj registaroj kaj precipe al la **Ligo de Nacioj** – tiu "kaverno el kapitalistaj banditoj". Sed jam de tri jaroj, Sovetio aliĝas tiun institucion, en kiu K-do Litvinov ludas gravan rolon. Kaj ĉu necesas rimarkigi, ke

Trocki kaj Zinovjev fariĝis "kontraŭrevoluciuloj"? La unua devis esti ekzilita kaj la dua per pafado elmondigita. Sufiĉas mencii tiujn faktojn, por ke ĉiu bone komprenu, ke multo aliĝis en la mondo. Necesas do prikonsideri novan situacion kaj ne dogmece rilati al la diritaĵoj Lantiaj...

Cetere antaŭ dek kvin jaroj Sovetio estis malamata kaj atakata de ĉiuj kapitalistaj landoj, dum nuntempe ĝi rilatas amike kun pluraj el la plej potencaj kaj eĉ pli-malpli sekrete alianciĝis kun Francio kaj Ĉeĥoslovakio. Plej evidenta pruvo pri la forto de la **Proleta Ŝtato!** La Ruĝa Armeo ja estas nun respektata; ĝiaj marŝaloj kaj generaloj eĉ estas ordene honorataj. En la Lenina tempo la burĝa patriotismo estis de la gvidantoj de **Komintern** konsiderata kiel reakcia ideologio kaj la socialistoj nomataj "perfiduloj", "renegatoj" k.s., tial ke ili ne konsentis al tiu vidpunkto. Nun socialistoj kaj komunistoj kamaradece partoprenas en unuecfronta agado kaj la patriotismo de la lastaj eĉ superas tiun de la unuaj.

Por pruvi, ke ni staras antaŭ tute nova situacio, mi povus mencii multe da aliaj similaj faktoj<sup>[1]</sup>. Sed mi volas ŝpari la lokon en nia gazeto kaj fidus al la memorkapablo kaj observemo de ties legantoj. Se iuj forĝis aŭ volas kontroli, tiuj bonvolu relegi tekstojn, publikigitajn de **Komintern** ĝis la jaroj 1928 proksimume.

Ni do staras antaŭ nova tendenco, antaŭ tute nova situacio kaj sekve necesas fari en nia Asocio la necesajn aliigojn. Ne estus normale kaj saĝe, se la spirito, kiu gvidis la plumon de Lanti, kiam li verkis "For la Neŭtralismon!" ankoraŭ gvidus nian movadon, ĉar la cirkonstancoj ne plu estas la samaj.

Hodiaŭ la ĝusta signal- kaj batalkrio devas esti: **Vivu la neŭtralismo!** Tial ke kompartianoj fariĝis tre bonaj patriotoj; tial ke Sovetio aliĝas al la **Ligo de Nacioj**, estus tute nenormale, se ni ankaŭ ne kunlaborus kun la neŭtralaj esp-istoj. Unue ni devas senprokraste alten levi la standardon de la "Unueca Fronto" kaj voki ĉiujn esp-istojn, ke ili kunariĝu. Poste ni faru la necesajn preparojn por la kunfandiĝo de SAT, de IPE, de UEA kaj de IEL. Gvidantojn por tia granda unueca organizo ni certe trovos taŭgajn. Generalo el Francio, episkopo el Hungario, kelkaj grandkapitalistoj el aliaj landoj kune kun, ekz-e, unu policisto el Sovetio kaj unu el Japanio kaj ni havas stabon, kiu certe kondukos nin al venko...

Karaj K-doj! mi petas, ke cetere vi prikonsideru kaj primeditu jenajn tri gravajn kaj karakterizajn faktojn: 1) Nia majstro Zamenhof estis judo; 2) Hitler malamas judojn kaj persekutas ilin; 3) esperanto estas malpermesita en Germanio. Sekve estas nia sankta devo esp-ista fariĝi pretaj por entuziasme partopreni en milito kontraŭ tiun landon. Heroe kaj sen ia konscienciproĉo ni buĉu, ekstermu Hitleranojn. Certe la ruĝarmeanoj sovetiaj ne lasos sin venki de la germanoj, kiel tio okazis kun la caraj soldatoj dum la lasta milito...

Al la naivaj, bonkoraj pacistoj mi simple diru: Vi devus honti pro via pretendo pli bone, ol kristanaj pastroj kaj budaistaj bonzoj, klarigi la sanktajn instruojn de Jesuo kaj Budao. La sperto ja montris jam de jarcentoj, ke kristanoj kaj budaistoj estas bonaj soldatoj kaj heroe kondukas dum militoj. Tamen Jesuo kaj Budao ankaŭ malaprobis perforton. Teologoj el ĉiuj religioj facile klarigas la kontraŭdiron, kiu

ŝajne ekzistas inter la dummilita konduto de eklezianoj kaj la instruo de la religi-fondintoj. Ni, marksistaj dialektikuloj, same facile povas klarigi pri la neceso partopreni militon por akiri la pacon. Cetere jam kelkfoje la gvidanto de l' Monda Proletaro, nia genia kaj amata K-do Stalin, tre bone sukcesis konvinki la sovetian popolon, ke la restarigo de novaj klasoj – ne ĝusta vorto – **kategorioj** da homoj en la socio tute akordiĝas kun la principoj elmetitaj de Marks kaj Lenin. Neniu ortodoksa katoliko pretendas esti pli saĝa ol la papo. Ĉu ni, revoluciuloj, havu la pretendon esti pli komprenpovaj, pli kleraj ol la Gvidanto de l' Revolucio?

For la dogmojn! Nova situacio postulas novan taktikon. Forpasis la tempo, kiam necesis fari skismojn en la esp-a movado. Mi ne dubas, ke la IPE-anoj estos la plej fervoraj batalantoj por la rekuniĝo de ĉiuj esp-istoj en unu solan vere neŭtralan Asocion tutmondan.

Vivu la neŭtralismo!...

**Arigato Gozaimasu.**

(verŝajne 1936)

## Piednotoj

1. ↑ Ekzemple, en "Popola Fronto" (N-o 11) oni bone konscias pri la nova situacio, skribante: "...oni neniel devas resti naive katenataj al niaj ĉiamaj, ŝablonaj, apartaj programoj de partioj, sindikatoj aŭ organizoj



kun multaj kvereloj inter si, tro ofte nur pro simplaj eksteraj detaloj. Ni uzu ankaŭ novajn procedojn por lukti... ni estas firme certaj, ke la kunfandiĝo de la laboristoj kun la liberalaj intelektuloj sen forgeso pri la progresemaĵ, kvankam hezitemaĵ, etburĝoj en ampleksa Popola Fronto favoras la kontraŭfaŝisman lukton... Nur blindaj dogmemuloj rajtas ne kompreni la aperon de tiuj sociaj fenomenoj en la aktuala situacio. Krome, la teorio pri dividiĝo de la homoj en du solaj klasoj ricevis, laŭlonge de la tempo, fortan skuon..."

## EL LA NOTLIBRO DE ALFESTO

En Hindio la naskiĝo de filino estas konsiderata kiel malfeliĉo. Tio rezultas de la rito **sati**, laŭ kiu vidvinoj ne rajtas reedziniĝi kaj devas esti brulmortigitaj sur la ŝtiparo kie la kadavro de la edzo cindriĝas.

Estas bone konata fakto, ke la imperialistoj ĉiam celas limigi la liberon de l' konkeritaj landoj. Ne mirige do, ke la angloj faris ĉion eblan por ĉesigi la praktikadon de tia rito.

Kiam la hindoj estos sukcesintaj forpeli la anglojn el sia lando, tiam tiu interesa moro povos denove esti praktikata tute libere kaj ne senmotive kiel nun la naskiĝo de filino estos konsiderata kiel malfeliĉo.

Almenaŭ estas tre notinde, ke ideoj efikas longe post kiam ili ne plu havas konkretan bazon. Komprenige mi aldiru, ke la rito **sati** estis praktikata dum dudek jarcentoj. – Kaj malgraŭ tio ne mankis malsatantoj en Hindio...

\*

La tuta anglolingva gazetaro protestas, kiam aviadistoj bombe mortigas virinojn kaj infanojn en Ĉinio kaj Hispanio. Sed pri tio tre notinda estas la opinio de la "Pandit Nehru", eksprezidanto de la **Hindia Kongreso Nacia**. Antaŭ ne tre longa tempo li diris interalie:

"La protestoj de l' britoj pri bombĵetado estas konsiderataj kiel fia ŝerco tra la tuta mondo. Mi vidis la rezultaĵojn de tia bombĵetado kaj verŝajne ne forgesos pri ties teruraĵoj. Sed ne ekzistas esenca diferenco inter bombĵetado en Katalunio kaj tiu ĉe la nord-okcidenta limo de Hindio fare de britaj aviadistoj..."

Ne senmotive oni parolas iafoje pri la brita hipokrito.

\*

Kiel ĉiu scias, Hitler "liberigis" 3 500 000 da germanoj, kiuj restis dum dudek jaroj sub la ĉeĥoslovaka "jugo". Li tiel aplikis la saĝan principon de Lenin, Uijlson k.a.s. famuloj pri la rajto de l' popoloj al sindispono. Sed tio kaŭzis, ke s-ro Benes ekŝiĝis el sia posteno. Lin anstataŭis generalo Sirovi.

Tiam koleris kaj tre ĉagreniĝis la ĉeĥaj patriotoj pro la mallongigo al la limo de sia lando<sup>[1]</sup>. Generalo Sirovi saĝe kvietigis ilin, dirante, ke ne utilas ĝemi kaj protesti; li konsilis, ke ĉiuj simple sin dediĉu al la defendo de la nova, plimallonga landlimo.

Kio gravas por generalo? Nur tio, ke estu limoj kaj ne ilia longo. Evidente, se mankus landlimoj, por kio utilis generaloj?...

\*

Nekontraŭdireble Ĉeĥoslovakio ne estis konstruita laŭ la nacieca principo, pro kiu ĉiu konsekvenca internaciisto devas esti preta mortigi kaj morti. Sed ankaŭ Hitler perfidas tiun

sanktan principon, ĉar kelkaj centmiloj<sup>[1]</sup> da ĉeĥoj nun troviĝas sub lia regado.

Malica babilulo povus argumentadi, ke la britaj imperialistoj sekrete ĝojas pro tio. Kiam Britio estos diplomatie kaj armile preta por militi, tiam ĝi trovos en tiu fakto traŝan pretekston por postuli, ke Ĉeĥoslovakio restu bufro sur la vojo Berlino-Bagdado.

Sed mi konfesas, ke Ĉamberlen estas prudenta homo. Nur malsaĝuloj ja konsentus militi, kiam tre dubaj estas la ŝancoj venki.

\*

Kiam homoj konsentas soldatiĝi kaj discipline obei, tiam pli-malpli frue ili fariĝas simplaj iloj en la manoj de siaj estroj. Bona pruvo pri tiu aserto troviĝas en letero de Indalecio Prieto al Ferdinando de los Rios, "socialista ambasadoro en Vaŝingtono"<sup>[2]</sup>:

"... Finfine solviĝis la plej grava demando pri la purigo en nia ariergardo. En Katalunio la aparato de F.A.I. (Iberia Federacio Anarkista) kaj de C.N.T. (Nacia Konfederacio de l' Laboro) estas nun malorganizitaj; iliaj plej danĝeraj elementoj estos mortigitaj aŭ malliberigitaj... La purigo tamen ne estas ankoraŭ kompleta. Sed, ĉar la plej forta rezisto jam cedis, estas al ni facile praktiki senperfortan kaj senpenan, sed vere efikan subpremon tiel ke tre baldaŭ la faraĵo estos plenumita... Cetere, ni decidis fari ĉe diversaj frontoj serion da ofensivoj, en kiuj ni utiligos unue la elementojn de F.A.I. kaj de C.N.T. kiel trupojn por la unuaj atakoj. Plie, ni decidis transloki tiujn elementojn al la plej danĝeraj lokoj. Tiele la ribelemuloj mem helpos por kompletigi la purigadon..."

Tia cinika, senkora konfeso de fipolitikulo estas vere naŭza kaj ne indas eĉ komenteton.

\*

Inter la esperantistoj estas multaj poliglotoj, kiuj venis al nia movado nur pro lingva intereso. Se tiaj troviĝas inter la legantaro de "S-ulo", ili do eksciis, ke jam de pluraj monatoj ekzistas en Filipino oficiala lingvo, nomata **tagalog**. Kiam prezidanto Manuelo Kuezon (Quezon) faris tiun decidon, li prave emfazis: "Nacia lingvo estas necesa rimedo por firmigi nian nacian unuecon."

Tiu naciisto agas konsekvence kun siaj principoj. Same Hitler, kiu malpermesas la instruadon de esp-o en Germanio. Sed kion oni devas pensi pri la internaciistoj, kiuj jam de preskaŭ unu jarcento pretendas labori por unuigi la proletojn el la tuta mondo kaj tamen neniam faris ion pozitivan por forigi la lingvajn barojn kaj daŭre ignoras nian esp-an agadon?

Pri tiu demando oni nepre staras antaŭ dilemo: ili estas ĉu perfiduloj aŭ sentaŭguloj. Se lab. gvidistoj konscias pri la granda signifo kaj valoro de mondlingvo kaj tamen faras nenion por ties efektivigo, ili ja perfidas, kaj kiuj ne komprenas la neceson de komuna lingvo por unuigi la proletojn el ĉiuj landoj, tiuj estas vere tro etcerbaj kaj sekve absolute ne taŭgas por gvidado.

Sed ne malpli etcerbaj estas la esp-istoj, kiuj fidis kaj obeas al tiaj gvidistoj.

\*

Ho! mi scias, ke K-do Ortodoksulo povus rebati: "Vi mis prezentas la demandon. Gvidantoj de l' mondrevolucio konigis sian opinion pri la lingva problemo. Nia majstro Lenin diris kaj lia mildanima, bonkora kaj genia disĉiplo Stalin ripetis, ke iun belan tagon la lingvoj kunfandiĝos. Vi rememoru jenan eldiron de Stalin ĉe la 16-a Kongreso de Tutsovetia Komunista Partio:

"Rilate al la pli malproksima perspektivo pri naciaj kulturoj kaj lingvoj, mi do ĉiam akceptis kaj daŭre akceptas la Leninan koncepton, laŭ kiu en periodo de mondskala venko de l' socialismo, kiam ĝi firmiĝos kaj eniros la moraron, tiam la naciaj lingvoj neeviteble devos kunfandiĝi en iun komunan lingvon, kiu, kompreneble, estos nek rusa, nek germana, sed io nova."

Mi tute ne forgesis kaj do bone konas tiun Stalinan eldiron. Sed ties pravigojn mi vane serĉis. Mi ne povas kontentiĝi per asertoj sen pruvoj. Kial kaj kiel okazos tia kunfandiĝo? Ŝajne per ia miraklo!

La diro de Lenin kaj ties ripeto de Stalin estas samvaloraj kiel la bibliaj profetaĵoj. Fakto estas, ke nenia signo pri ebla estonta kunfandiĝo ekzistas. Male, oni ĉie povas rimarki tendencon al apartiĝo. En Irlando oni revivigas la gaelikan lingvon. Norvegoj klopodis dum la lastaj dekoj da jaroj por atingi, ke ilia lingvo pli kaj pli malsimiliĝu al la dana kaj sveda lingvoj. Kemal Ataturk instrukiis, ke la turka lingvo estu "purigita" per elĵeto de ĉiuj arabaj, persaj, grekaj, francaj kaj aliaj fremdaj vortoj. Ĉie estas rimarkebla tendenco al pli kaj pli pura lingvo.

Sekve la antaŭdirita kunfandiĝo lingva povos nur **mirakle**

okazi. Mi ne kredas je mirakloj kaj ne timas diri, ke malgraŭ tio, ke Lenin havos 40-metran statuon ĉe la supro de l' projektita 400-metra palaco de l' sovetoj, tamen tio neniel povos forigi la fakton, ke rilate la lingvan demandon, li eldiris egan sensencaĵon.

La plej lerta sofisto ne kapablos liveri eĉ ŝajnvalorajn argumentojn por pruvi, ke la japana lingvo kunfandiĝos kun la rusa kaj ĉi tiu lasta kun la itala ktp. ks. Dume la simpla saĝo kaj nia ĉiutaga sperto diras al ni, esp-istoj, ke en la daŭro de kelkaj jaroj ĉiuj komunistoj, socialistoj, anarkistoj, pacistoj, unuvorte ĉiuj internaciistoj, povus ellerni esp-on kaj praktikadi ĝin. Jam 18-foje SAT pruvis per siaj kongresoj, ke simplaj laboristoj povas interparoli, eĉ pasie interdiskuti en la sennacieca lingvo Zamenhofa.

Insiste mi do rediras: la gvidistoj de la laborista movado, kiuj **ignoras** (mi substrekas la vorton kaj petas la legantojn, ke ili ĝuste komprenu ties signifon) tiel gravan fakton, kiel estas la eksperimento, farita de SAT, ne indas je nia admiro. Male, la SAT-anoj devas forte konscii, ke ili faras pli utilan, pozitivan laboron ol la famuloj de la diversaj Internacioj, kiuj ĝis nun kapablis nur liveri la kampon por la stariĝo de diverskoloraj faŝismoj.

\*

Gvidistoj kaj oratoroj estas ĝenerale popularaj kaj ofte aplaŭdataj, ĉefe pro tio, ke ili flatas al la popolo kaj antaŭdiras, kion ĝi deziras aŭ esperas.

Tuj post la venko de Musolini, ĉe kongreso de **Komintern**

en Moskvo, Klara Zetkin antaŭdiris, ke la faŝismo en Italio ne povos daŭri pli ol ses aŭ dek monatojn. Ŝi "dialektike" argumentis per cito de nombroj pri karbo, ferminaĵo, petrolo, "proporcio de fortoj" kaj similaj marksistaĵoj. Neniu kongresano kontraŭdiris, kaj ŝi estis aplaŭdata. Dekses jaroj forpasis kaj Musolini ankoraŭ regas.

Kiam la itala diktatoro estis entrepreninta konkeri Etiopion, tiam mi havis la okazon aŭdi pri tiu temo paroladon de fama, tre elokventa oratoro anarkista. Li argumentis, ke tia faro de Musolini estis pruvo, ke la ambicio stultigis lin kaj ke ne povas esti dubo pri la baldaŭa forfalo de la itala faŝismo. Longan, varman aplaŭdadon ricevis la oratoro. Sed Etiopio estas konkerita kaj daŭre regas la "stultiĝinta" diktatoro.

Feliĉe por gvidistoj kaj oratoroj malmulte da homoj havas bonan memorkapablon...

\*

Iu oratoro el la antikva Grekio, Fosion, se mi ĝuste memoras, neniam flatis al sia aŭdantaro kaj ne timis eldiri malplaĉajn aferojn. Iun tagon, jen aŭdiĝas aplaŭdoj kaj mirigite li demande ekkrias: "Ĉu senatente mi diris sensencaĵon?".

\*

Sennaciisto povas, ho ve! morti pro (kaŭze de) patrio, sed ne por (favore al) tiu moderna diaĵo.



\*

La plej aŭtoritataj teoriuloj pri la socialismo, konsiderata laŭ siaj diversaj tendencoj, ne estis proletoj: SenSimon estis grafo, Kropotkin estis princo kaj Marks, Jores, Lenin, Buĥarin k.a. mortintoj, estis burĝdevenaj intelektuloj. Sekve la socialismo ne estas doktrino de l' proletaro, sed por la proletaro.

\*

Ĉiu soci-politika doktrino estas pli-malpli nura metafizikaĵo. Tial la proletoj prefere fidu al sia simpla saĝo kaj neniam, nenial konsentu batali, morti aŭ mortigi por la sukceso de iu doktrino kontraŭ alian. Sed batalo por akiri pli bonajn labor- kaj vivkondiĉojn, rilatas al **io konkreta**.

("Sennaciulo", 25. aprilo 1939)

## Piednotoj

1. ↑ [1,01,1](#) Tiuj ĉi linioj estas verkitaj en decembro 1938. La legantoj bonvolu atenti pri tio! – Red. de "S-ulo".
2. ↑ Citita laŭ "L'Espagne Nouvelle" (Nîmes), N-o 48-49, de 13.5.1938.

## ĈU PRAVE?...

Ni ricevis ĉi tiun leteron, kiun unuamove ni ĵetis en paperkorbon. Tamen, post plua pripensado ni reprenis ĝin el la ujo, denove legis kaj alvenis al la konkludo, ke kelkrilate tiu skribaĵo estas pripensiga kaj sekve presinda. Se ni eraris, la legantoj bv. indulgi nin. Estas almenaŭ menciinde, ke ni tenas la ekz-on de la gazeto preparolita en la letero. **Red.**

Karkason, 25-4-39

Estimata – sed ĉu estiminda? – Redakcio,

Sampoŝte mi sendas al vi ekz-on de nia franclingva organo **Nova Tero** (Terre Nouvelle), por ke vi estu informita pri la ekzisto de nia movado. Per la emblemato (falĉileto kaj martelo, sidantaj sur kruco) kiu kuŝas apud la titolo, vi tuj komprenos, ke ni volas iri man-en-mane kun niaj bolŝevistaj K-doj. Per la alpreno de ilia propra emblemato kaj nia deziro pri kunlaboro, ni ne dubas, ke finfine ili ankaŭ akceptos la nian. La kruco ja estas proleta emblemato, ĉar sur ĝi martiriĝis Jezuo Kristo, la ĉarpentista filo el Nazareto.

Sed ne por diri tion, mi ekprenis la skribilon. La motivo estas pli grava, kaj sendube ĝi estos por vi tre surpriza. Bonvolu noti profunde en vian memoron, ke per ĉi tiu letero mi uzas esperanton por la lasta fojo. Kial? vi sendube de-

mandos, kunŝovante la brovojn. Bonvolu ne tro ekscitiĝi kaj plue legi. Via surprizo kredeble pligrandiĝos...

Leginte reklamon en iu el viaj gazetoj pri "Vortoj de K-do Lanti", mi antaŭ kelkaj monatoj mendis ekz-on kaj legadis ĝin jen kontente, jen incite kaj eĉ foje kun koleriĝo... Mi povas tamen danki al tiu aŭtoro, ke sur la 31-a paĝo li rekomendas legi la Bibliion. Tia neantaŭvidebla rekomendo igis min pensi, ke mi, kristano, neniam tutlegis tiun sanktan verkon. Mi sentis konscienciproĉon kaj por kvietigi min, senprokraste mendis ekz-on de la esp-a eldono. Jam de unu semajno mi ricevis ĝin kaj kun granda surprizo legis jenon sur la paĝo 12-a:

"1 – Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero.

2 – Kaj kiam ili ekiris de la oriento, ili trovis salon en la lando Ŝinar kaj tie ekloĝis. 3 – Kaj ili diris unu al alia: Venu, ni faru brikojn kaj ni brulpretigu ilin per fajro. Kaj la brikoj fariĝis por ili ŝtonoj, kaj la bitumo fariĝis por ili kalko. 4 – Kaj ili diris: Venu, ni konstruu al ni urbon, kaj turon, kies supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero. 5 – Kaj la Eternulo malleviĝis, por vidi la urbon kaj la turon, kiujn konstruis la homidoj. 6 – Kaj la Eternulo diris: Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj ili ne estas malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari. 7 – Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia. 8 – Kaj la Eternulo disigis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero, kaj ili ĉesis konstrui la urbon. 9 – Tial oni donis al ĝi la nomon Babel, ĉar tie la Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta tero kaj de tie la Eternulo disigis ilin sur la supraĵon de la tuta tero."

Estimata, sed ne estiminda Redakcio, la legado de tiu sankta teksto malfermegis miajn okulojn kaj mi klare ekkomprenis, ke grave mi pekis, ekde la tago, kiam mi

komencis lerni esperanton. Al ĉiu sincera kaj komprenema homo, kiu legis la Bibliion, devas esti evidente, ke Dio ne volas, ke la homoj havu komunan lingvon. Konsekvence, la Zamenhofa entrepreno estas diabla afero kaj nun mi tre bone komprenas la signifon de SAT. Kiam mi aliĝis vian organizon, tiam mi efektive sataniĝis. Sed hodiaŭ mi sunklare vidas mian eraron, sentas egan konscienciproĉon kaj sincere pentas. Via Asocio ja estas diabla entrepreno kaj ĉiu kristano nepre devas senkompate kontraŭbatali ĝin. Per ĉi tiu letero mi do informas vin, ke mi ekŝiĝas el via satana organizo kaj de nun ĉiel provos forgesi esperanton kaj reakiri senpekan staton. Kun la helpo de Dio, kiu sendube uzis oblikvan vojon por konduki min laŭ ĝusta vojo, mi esperas, ke, post plimalpli longa tempo, Zamenhof, esperanto kaj precipe SAT restos en mia memoro nur kiel malagrabra inkubsonĝo el mallumega, senstela nokto.

Mi jam diris sufiĉe por ke sur viaj vizaĝoj aperu satana ridetaĉo; tamen mi volas aldoni kelkajn klarigojn pri miaj nuna spiritostato kaj kompreno pri aferoj. Leginte kaj komprenante la dirojn pri Babel, mi nun havas la konvinkon, ke pli bone mi nun komprenas la veran signifon de la artikolo, kiu aperis en la 475-a n-ro de "S-ulo" kun la subskribo **Tomodaĉi**.

Niaj bolŝevistaj K-doj havas bone prilaboritan tezon pri artefaritaj lingvoj. Per ĝi oni povas klare kompreni, ke estas hereza la pretendo de utopiuloj, kies celo estas, ke esperanto fariĝu mondlingvo. Kaj la fakto, ke Lenin diris, ke Stalin ripetis, ke iam la lingvoj kunfandiĝos en unu solan, neniel kontraŭas al la Biblia diro. Oni bonvolu nur noti zorge en la

memoron, ke la marksisma lingvoscienco kondamnas la pretendon kaj agadon de la esperantistoj ĝenerale kaj precipe tiun de l' sennaciistoj. Kiel ĉiu scias, niaj bolŝevistaj K-doj refariĝis tre bonaj patriotoj kaj konsekvence ili ne povas deziri, ke la naciaj lingvoj fariĝu nur dialektoj, dum esperanto ludus la rolon de kultura lingvo tutmonda.

La sola tikla punkto kuŝas en tio, ke laŭ la Biblio estas evidente, ke Dio ne volas, ke la homoj havu nur unu lingvon, dum Lenin antaŭdiris, ke iam la naciaj lingvoj kunfandiĝos. Iu herezulo foje rimarkigis, ke nenia signo vidiĝas pri tia kunfandiĝo estonta. Tiurilate mi plene konsentas kun **Alfesto**<sup>[1]</sup>. Sed tiu tro memfida SAT-ano forgesis, ke Dio estas ĉiopova. Plie, Liaj intencoj estas nediveneblaj. Sekve, ĉiu kristano devas konsenti al tio, ke Dio povas same permesi la ekziston de nur unu sola lingvo, kiel Li malpermesis tion antaŭ multaj jarmiloj. Dio ne malofte faras miraklojn<sup>[2]</sup> kaj sekve la herezuloj malprave cerbumas por kompreni kiel povos okazi la kunfandiĝo de la lingvoj en unu solan, laŭ la marksista tezo.

Mi ne bezonas insisti pri la gravega signifo de mirakloj; per ili ebeniĝos la vojo, laŭ kiu ni, kristanoj, povos kunlabori amike kun niaj bolŝevistaj K-doj. Tiel praviĝas la interplektiĝo de la kruco, falĉileto kaj martelo. Tia trielementa emblemo, cetere, pensigas pri la Sankta Triunuo: La **Patro**, la **Filo** kaj la **Sankta Spirito**. Kiam en Moskvo oni estos komprenita, kiel mi mem, la profundajn kaj subtilajn verojn, kiuj sin kaŝas en la Biblio, tiam mi ne dubas, ke ni povos solidare bataladi kun Stalin por ekstermi ĉiajn

herezulojn.

Vi, diablaj SAT-anoj, aŭdu kaj komprenu... Sensalute

P.P. Dupont-Durand, "Terre Nouvelle",  
12, rue Pasteur, Carcassonne (Aude)  
("Sennaciulo", 25. majo 1939)

## Piednotoj

1. ↑ Komp. la aluditan artikolon kun titolo: **El la notlibro de Alfesto** en n-o 476 de "S-ulo".
2. ↑ Ekzemple, ĉu la aliĝo de Sovetio al la Ligo de Nacioj ne estas vera miraklo? Ĉiu ja bone scias, ke Lenin konsideris tiun institucion kiel "kavernon de imperiistaj banditoj".

# EL LA NOTLIBRO DE ALFESTO

Vortoj! vortoj! Kaj kiel efikaj tamen, kiam ili estas aplombe eldiritaj de demagogo kun forta, bela voĉo, kun mieno de profeto!...

Kaj ĉe tia bedaŭrinda konstato mi fariĝas pli ema konsenti, ke inteligenta homo povas sincere kredi je la ekzisto de senlime bona kaj ĉiopova dio, kiu tamen toleras la malbonon en la mondo, kiun li mem kreis.

\*

La papo el Romo havas siajn apologiistojn; al tiu el Moskvo – bv. pardoni, mi pensas pri K-do Stalin, la "Patro de l' popoloj", la "Gvidanto de l' mondproletaro" – ankaŭ ne mankas sufiĉe bone pagataj "inĝenieroj poranimaj". En Sovetio ja ekzistas specialaj lernejoj, kie oni povas akiri la arton pravigi ion ajn – laŭ la maniero uzita de la Nederlanda SAT-ano en la aprila n-ro de "S.R."

Mi ne dubas, ke tiu K-do argumentis sincere kaj bonintence, tial mi nomis lian rezonon **paralogismo**. – Sed plej ofte la rezonado de la "poranimaj inĝenieroj" estas karakterize sofisma.

\*

Jen ekzemplo de sofista rezonado per la apliko de la marka dialektiko. Kio karakterizas nian epokon, tio estas la **naciismo** (tezo); la naciismo generas sian malon: **sennaciismo** (antitezo) kaj el tiuj du maloj rezultas la **internaciismo** (sintezo).

\*

Oni ne kredu, ke mi fantazias. Sur mia tablo kuŝas libro, kies titolo, sufiĉe signifa, estas: **La Naciismo kontraŭ la Naciojn**. La tezo de la aŭtoro (Henriko Lefebr) estas montri, ke la internaciistoj estas la plej bonaj amikoj de l' nacioj, alivorte la plej bonaj patriotoj.

\*

Sed estas rimarkinde, ke tia tezo tre parencas al la Hitlerismo. La plej aŭtoritata teoriulo de tiu ismo estas Alfredo Rosenberg. Lin ankaŭ oni povus nomi "pornanima inĝeniero". Mi posedas la tekston de parolado, kiun li faris en 1934 antaŭ fremdaj studentoj, kiuj vizitis Berlinon. Jen peco el tiu dokumento:

"Kio estas esenca en la naci-socialismo, tio estas, ke ĝi respektas alies naciecon kaj faras nenian prikulturan propagandon por trudi siajn ideojn al fremdaj landoj. Tiu kunlaboro de l' nacioj, fondita sur la nacia fiero kaj sur la respekto al la aliaj naciaj apartaĵoj, ebligas veran pacon, por kiu ni ĉiuj devas kunlabori."

\*



Sennaciisto ne lasas sin trompi per vortoj; li atentis nur faktojn. Kaj la historiaj faktoj instruas, ke la homaj socioj evoluis el klanoj al tribo, el triboj al civito, el civitoj al provinco, el provincoj al nacio. Sekve, oni povas racie antaŭvidi, ke la nacioj ankaŭ malaperos por konsistigi pli grandan unuon.

Ĉio, kio kontraŭas al tiu historia procezo, tio estas esence reakcia. Kaj reakciuloj estas ĉiaj ajn patriotoj. Sed mi volonte konsentas, ke ili havas la rajton oferi sian propran vivon antaŭ la altaro de sia idolo...

\*

Eĉ se la modernaj diaĵoj, t.e. la nacioj, devus ĉiam ekzisti, tamen sennaciisto neniam konsentos libere partopreni al la defendo de iu patrio kontraŭ alia.

Se saĝa homo estas perforte tenata en frenezulejo, tio ne signifas, ke li ankaŭ devas konduki kiel frenezulo. Bedaŭrinde, por vivi saĝe inter malsaĝuloj, tio postulas multe da energio kaj pacienco.

\*

Mi scias laŭsperte, ke la plej malfacile transireblaj limoj estas la lingvaj. Kaj tamen per esperanto oni povas facile faligi tiujn barojn...

Limoj nepre restu, por ke vivu kaj bonstatu gvidistoj, generaloj, pastroj, interpretistoj, k.s. parazitaj.

\*

– Vi fariĝas ŝovinista ano de Esperantio, ŝerce diris al mi iu samideano.

– Nu, eble, sed tia ŝovinismo povus esti danĝera nur por la loĝantoj de Marso...

("Sennaciulo", 25. aŭgusto 1939)

# AFORISMOJ

La Homaro devos unuiĝi, se ĝi ne volas pereii.

Por ke la Homaro unuiĝu, estas necese, ke la homoj povu interkompreniĝi.

La SAT-anoj perfekte pravas, ke esperanto estas taŭga interkomprenilo tutmonda.

La partoprenantoj de l' SAT-Kongresoj donas ĉiujare novan pruvon pri eblo de unuiĝo super la landlimoj.

SAT devas fariĝi la embrio de mondregno kun esperanto kiel oficiala lingvo.

Pionire la SAT-anoj faras pli pozitivan laboron ol la politikaj agitistoj, kiuj, vole-nevole, estas oportunistoj.

Ni semu, por ke aliaj povu estonte rikolti.

SAT estu konstruata sur rokoj el fido, honesto, lojalo kaj amo.

SAT-ano ne estas esperantano, sed esperantisto.

La nobla celo Zamenhofs ne povas esti atingota per malnoblaj rimedoj.

SAT mem agnoskas neniun dogmon, politikan aŭ religian, sed ne forpuŝas dogmanojn.

Dogmo estas ia mumio spiriteca.

SAT kontraŭbatalas ĉian makiavelismon kaj jezuitismon.

SAT-ano oferas kaj ne atendas rekompencan.

Trankvila konscienco estu SAT-ana virto.

Nur la konscio esti farinta ion bonan kaj celkonforman povas ies konsciencan trankviligi.

Multaj esperantistoj el la terorlandoj estas spirite kaj kore SAT-anoj. Ni pensu pri ili kaj profitu ĉiun oportunon por ilin kuraĝigi.

("Sennaciulo", 25. aŭgusto 1939)

Por meriti la nomon HOMO, necesas havi idealon. Kaj ju pli alta, nobla, estas tiu idealo, des pli ni homiĝos per konstanta volstreĉado al ĝi.

Por antaŭeniri sur la vojo al homeco, esperanto estas bona, eĉ necesa ilo. Tio tamen ne signifas, ke ĉiu ajn esperantisto

povas jam nun fariĝi homo. Se por transiri riveron, oni konstruas ponton, tio ja ne garantias, ke ĉiuj transirantoj uzos ĝin por nobla, bona celo.

La egoismo kondiĉas la vivon, kaj ĉiu besto, ĉiu homo estas egoismema. Sed ekzistas stulta egoismo: tiu, kies konsekvencoj malprofitigas la egoistojn mem. Racia egoismo homa povas nur celi al la utiligado de ĉiuj riĉaĵoj ekzistantaj sur nia planedo. Tia celo estas atingebla nur per ĉies interhelpo.

("Sennaciulo", oktobro 1948)

Niĉe, la fama filozofo, uzis la vorton "superhomo" por kvalifiki sin, kiu sin levis super sian homecon. Sed, eble, estus preferinde diri, ke la ordinaraj dupieduloj, kies menson karakterizas absolutismo, naciismo, stulta egoismo, estas nur subhomoj.

Stulte egoistaj estas ĉiuj naciistoj, ĉar ilia konduto havas kiel rezulton, ke ilia lando elĉerpiĝas por celoj detruaj kaj sekve malfprofitdonaj.

La patriotismo de l' regatoj estas nur rimedo uzata de l' regantoj, por efektivigi siajn ambiciajn planojn. La regantoj ja ne batalas mem.

("Sennaciulo", junio 1946)



# AMARE

Homo povas esti hodiaŭ bolŝevisto kaj morgaŭ faŝisto aŭ inverse. Pri tio ekz-oj abundas. Sed por fariĝi esp-isto, necesas unue lerni la Zamenhofan lingvon, kaj tio postulas relative longan tempon. Kaj kiam homo akiris sufiĉan scion je esp-o, tio ankoraŭ ne signifas kompletan esp-istecon. Tia kvalito akiriĝas nur per plurjara **praktikado** de nia lingvo kun homoj el ĉiuj mondpartoj.

Kiu ĝojas ĉe ricevo de letero, ekz-e el Ĉinio, en kiu estas dirite, ke lia korespondantino, ekz-e el Nov-Zelando, malsaniĝis kaj suferas, nur tiaulo estas vera esp-isto.

\*

Mi konas personojn, kiuj povas bele deklami kaj kanti en esp-o ĉe vesperkunveno, kaj kiuj tamen ne estas esp-istoj. Kaj tre malagrablan senton mi ĉiam spertas ĉe la konstato, ke homoj emas papage parkeri kelkajn strofojn, por havi la eblon paradi sur podio antaŭ multnombra ĉeestantaro kaj ricevi aplaŭdojn.

\*

La surmeto de insigno ĉe jaketa butonruo plej ofte signifas nenion precizan, rilate al la vera adepteco de ties surmetinto. Ja ne eblas per tio tuj ekscii ĉu la insignoportanto estas sincera, lojala, fervora ano de la movado, partio aŭ kredo, kies insignon li elmontras.

Sed eblas preskaŭ tuj ekscii, ĉu la portanto de kvinpinta verdostelo estas, aŭ ne, esp-isto: sufiĉas ja lin alparoli en nia lingvo kaj atendi respondon al demando...

**–Iuelie Alienema–**

("Sennaciulo", aŭgusto 1946)



## FOR LA DOGMOJ!... EL S.A.T.

– Kion signifas tio?

– Simple tion, ke dogmanoj povas esti SAT-anoj.

– !?...

– Vi ne miru: se aliel estus, tio signifus, ke la SAT-Statuto mem estas ia dogmo. Miaopinie, al nia organizo povas aliĝi ateistoj, budaistoj, deistoj, katolikoj, mahometanoj, ortodoksanroj, protestantoj ktp., same kiel aliĝas anarkistoj, komunistoj, pacistoj, sennaciistoj, socialistoj ktp.

Sed ili ĉiuj devas konsenti, ke ilia kredo aŭ konvinko respektiva povu esti kritikata en la SAT-organoj. Ties redaktoro devas nur atenti, ke la kritikado okazu ĝentile, seninsulte.

Iel ni ĉiuj estas kreduloj. Ekz-e, kiam ni ekveturas, tiam ni kredas, ke la veturilo atingos la celitan lokon. Tamen ne ĉiam tiel okazas. Kaj ĉu ne estas konstatebla fakto, ke ateistaj patriotoj kuniĝas kun kiaj ajn religianoj, kiam ili **kredas**, ke ilia lando estas defendinda?

Mi antaŭaŭdas K-dojn, kiuj demandas:

– Ĉu do vi deziras, ke SAT neŭtraliĝu? Ĉu vi pentas esti kriinta: FOR LA NEŬTRALISMON! antaŭ 25 jaroj?

– Neniel, nenial, mi bedaŭras tiun krion. La burĝa neŭtralismo, kiu celas nur la alprenon de esp-o, estas ia hipokriteco, ia trompo por la ekspluatata klaso. Neniun

profiton ricevus la proletaro, se ĉiuj ambasadoroj, konsuloj, militistoj k.s. parazitoj el la tuta mondo parolus nian lingvon...

Sed nemalofte okazis, ke katolikaj kaj protestantaj laboristoj strikis. Kaj por aliĝi al sindikato aŭ kooperativo ne necesas nepre esti ateisto aŭ t.n. liberpensulo. Eĉ en komunistaj kaj socialistaj partioj troviĝas anoj el diversekleziaj religioj. Sekve, kial ne estu same en SAT?

Mi ne kredas, ke la kristanaj SAT-anoj, ekz-e, volus devigi min, aŭ iun ajn alian agnostikiston, partopreni en la konstruado de preĝejo aŭ en la vivtenado al pastro. Sed mi ne estas tute certa, ĉu ĉiu ateista kultanto al putranta karno tolerus, ke mi staru antaŭ la maŭzoleo de Lenin kun ĉapelo surkape...

Ne malmultaj ateistoj estas dogmanoj. Sur metafizika kampo, plej ofte la neo aŭ la aserto nur signas ian kredon ĉe la neantoj kaj asertantoj. Mi mem ne kredas je la ekzisto de Dio, sed ne ĝin neas.

For la dogmoj!... el SAT, tio signifas, miakomprene, ke la diversspecaj dogmanoj, kiuj konsentas kunlabori laŭ la spirito de ties Statuto, akiris sufiĉan toleremon, por ke ilia dogmaneco ne plu estu danĝera.

Sed, kompreneble, nur la sperto povas pruvi, ĉu tiuj miaj diroj estas aŭ ne pravaj. Mi ne asertas kaj nur hipotezas. Aliel mi mem estus dogmano.

**E. LANTI.**

("Sennaciulo", aŭgusto 1946)



# ONI POVAS BEDAŬRI ESTI ESPERANTISTO

Mendoza, Septembro 1939.

Al la Redakcio de "Argentina Esperantisto":  
Estimataj Samcelanoj!

Kiel promesite, mi volas kontribui al la redaktado de via gazeto per modesta artikolo. Por ĝin verki mi nun sidas ĉe tablo kaj tenas skribilon. Sed neniam antaŭe mi sentis tiel forte, kiel nun mian nekapablon esprimi ĝuste, trafe miajn pensojn. Tial sendube sin trudas al mi en tiu ĉi momento frazo de l' franca verkisto Gustavo Flouer (Flaubert): "La homa parolo iel similas al fendetiĝinta kaldrono sur kiun oni tamburas melodiojn, kiuj taŭgas por dancigi ursojn, dum oni volus kompatemigi la stelojn". Jes ja, mi konscias pri la senpoveco de vortoj por esprimi, kion mi sentas, pensas kaj volus sentigi, komprenigi al aliaj homoj...

Vi atendas de mi artikolon, per kiu mi klarigu al viaj legantoj la utilon, neceson de esperanto. Kvankam multfoje mi plenumis, pli-malpli sukcese, tian taskon, ial nun mi sentas embarason. Antaŭ kelkaj jaroj mi publikigis en "Sennaciulo" artikolon kun jena titolo: "[Mi ĝojas esti](#)

esperantisto". Ĝi trovis bonan akcepton en Esperantio, ĉar tradukita ĝin represis angla, franca, holanda, norvega kaj sveda gazetoj. Kaj nun mi sentas la emon titoli ĉi tiun mian skribajon jene: "Mi ĉagreniĝas pro mia esperantisteco".

Kiel vi scias, jam de kvar jaroj mi sencele migras ĉirkaŭ nia eta planedo, kaj antaŭ ol forlasi Eŭropon, mi estis vizitinta ĉiujn landojn de tiu terparto, riĉa je landlimoj kaj pli kaj pli freneziĝantaj homoj. Kaj ĉiam dum miaj vojaĝoj mi rilatis nur kun esperantistoj, same kiel okazis, kiam mi estis en Bs. Aires kaj nun okazas en Mendoza. Tio signifas, ke en ĉiuj mondpartoj mi havas gekonatojn, eĉ geamikojn; sekve da ili mi havas en Britio, Francio, Germanio, Polio, kie homoj amasigis montojn da tre perfektaj mortigiloj kaj lastatempe komencis ĝin uzadi por reciproka buĉado. Ĉe tia penso doloras mia koro kaj mi ja ĉagreniĝas pro tio, ke miaj eŭropaj geamikoj estas en danĝero. Se mi ne estus esperantisto kaj sekve ne havus la okazon akiri amikojn ekster Francio, kie la hazardo faris, ke tie mi naskiĝu, tiam mi timus nur pri francoj kaj nur al ili irus mia kompatato. Sed, pro mia esperantisteco, la kampo por mia kompatato pligrandiĝis kaj sekve ankaŭ pligrandiĝas mia ĉagreno. Kaj tial mi nun ja sentas la emon diri, ke mi bedaŭras esti esperantisto.

Verdire, nur mia koro emas tiel paroli: malgraŭ ĉio mia cerbo pensas, ke prave mi agis, dediĉante mian vivon al la esperanta afero. Konvinkita mi restas, ke la energio kaj cetero, kiujn mi elspezis por nia movado konsistigas pozitivan laboron, kvankam ĝi ne vidiĝas konkrete en blindetaj okuloj. Sed ne malofte okazas, ke kulturistoj ne rikoltas el la semitaj

grajnoj, kaj tamen ili ne haltas pro tio, sed male semas, semadas senlace.

Kio ĉefe karakterizas nian epokon, tio estas, ke, rilate al la evoluo de l' homaj socioj, malnovaj ideologioj montriĝas eraraj kaj fiaskas. La Ligo de Nacioj jam tute kadukiĝis kaj ludas nun nenian rolon en la ordigo de la mondaferoj. La diversaj Internacioj laboristaj, religiaj aŭ revoluciaj montriĝis tute senpovaj por influi sur la historian procezon. Ankaŭ la porpacaj alvokoj de l' papo aŭ de aliaj religiaj gvidistoj sonas kiel voĉoj en dezerto.

La mondo baraktas en nebulo, rilate al sia estonto. La tekniko faris gigantajn pasojn antaŭen; la produktofortoj atingis tian gradon, ke se ili estus saĝe utiligataj, ĉiuj homoj sur la tero povus havi modestan komforton kaj ĝui sekuran bonstaton. Sed malgraŭ tiu grandega revolucio teknika, la spirito de l' homoj restas konservativa kaj iliaj gvidistoj serĉas solvon al la nuntempaj problemoj per rimedoj, kiuj eble taŭgis antaŭ unu jarcento, sed kiuj estas absolute maltrafaj nuntempoke.

La leganto bonvolu atenti, ke mi uzas intence la vorton "gvidisto" kaj ne gvidanto. Pri tiu demando mi donis klarigon en la revuo "Herezulo", kiun mi eldonis antaŭ kelkaj jaroj.

Kaj neniu potenca kaj aŭtoritata voĉo ekzistas nuntempe por aŭdigi vere saĝajn kaj trafajn parolojn, kiuj povus konvinki la homojn pri neceso iri laŭ alia vojo ol la ĝis nun sekvitaj. Certe, se ekzistus tia voĉo, ĝi tamen ne estus aŭdata, tial ke la popoloj estas nun surdaj por prudentaj paroloj. Kaj vane oni provus komprenigi al ebrulo, ke troa trinkado de alkoholo estas malbona por la sano: por tion fari, necesas

atendi, ke la ebrio forpasu kaj ke la ebriiĝinto sentu kapdoloron. Certe venos la tempo, kiam la eŭropaj popoloj sentos dolorojn, post la terura ebriiĝo nuntempa kiu kaŭzas, ke ili buĉas sin unuj la aliajn kaj detruas siajn riĉaĵojn.

Sed la ebrio eble daŭros longe kaj rezultigos neripareblajn difektojn. Dume en Ameriko la homoj nun ne estas milite ebriaj. Ili do havas la bonŝancon ĝui pacon kaj povas labori por teni sekura la civilizon kaj eĉ ĝin antaŭenpuŝi.

Antaŭ kelkaj tagoj la fama aviadisto Lindberg averte alparolis la usonan publikon kaj el liaj diroj mi substrekis jenajn: "Ni devas nepre stari ekster la eŭropaj aferoj aŭ daŭre stari en ili. Se ni ekmilitas por defendi la demokration eksterlande, estas ŝancoj, ke ni perdos ĝin enlande... Se Eŭropo detruigĝos per milito, la plej granda espero por la okcidenta civilizo kuŝas en Ameriko..."

Verŝajne tiam Lindberg pensis nur pri Usono, sed mi opinias, ke li konsentus al tio, ke ankaŭ Sud-Ameriko povas kaj sekve devas partopreni en tiu civilizsava laboro. En Ameriko 80 milionoj da homoj parolas la hispanan lingvon kaj tiuj devas nepre konkuri kun anglolingvanoj por starigi en ĉi tiu vasta kaj riĉega kontinento socistaton, kiu povos fariĝi modela por aliaj popoloj.

Cetere, en la suda hemisfero, krom la angla kaj hispana lingvoj ankaŭ la portugala estas parolata de 45 milionoj da homoj. Sekve, la lingva problemo ekzistas en la "Nova Mondo" same kiel en la "Malnova", kvankam ne laŭ tiel akuta maniero.

Mi diris pli supre, ke la homaro devas nepre trovi kaj sekvi alian vojon ol la ĝis nun sekvitajn, por eviti forfalon de l'

civilizo; mi bedaŭras la mankon de kvazaŭa profeto, kiu signus tiun vojon kaj kies aŭtoritato imponus al la mondo. Sed ne necesas esti grandcerba geniulo por almenaŭ ekvidi la direkton al kiu ni devas antaŭeniri; ne necesas esti eksterordinare klarvida por distingi tion, kio estas nepre **necesa** por nia orientiĝo. Ni celas pacon kaj bonstaton en la mondo; ni deziras, ke la homoj interfratiĝu. Nu, ĉu do tio ne postulas **unue** interkompreniĝon kaj sekve komunan interkomprenilon? For de mi la ideo, ke sufiĉas paroli la saman lingvon por rilati frate kun aliaj homoj. Tiu kondiĉo ja ne estas sufiĉa kaj tamen ĝi estas **necesa**. Tial ĉiu agado, ĉia penado por faligi la lingvajn barojn inter la homoj estas bonfara kaj laŭcela, kaj iel ĝi helpas en la serĉado de la espereble eltrovota vojo sekvenda.

Karaj gesamideanoj, ĉu ne eblas, ke vi sentu, kompreneble iomete, kion mi mem tiel forte sentas kaj klare komprenas, ke la tempo kaj energio dediĉita al esperanto efikas laŭcele kaj pozitive.

Ekzistas multaj bonintencaj homoj, sed blindetaj, kiuj diras: "Esperanto estas ja bona afero, sed nuntempe pli urĝaj taskoj postulas niajn zorgojn"... Tiuj homoj pensigas min pri domkonstruistoj, kiuj komencus sian laboron ĉe la tegmento kaj malzorgus fundamentajn angulŝtonojn. Ĉiu mezinteligenta homo povas ellerni nian lingvon kaj per tia faro, per ties praktikado (kiu postulas adekvatan organiziĝon) estas alportata iom de la necesa mortero, kiu garantios la solidon de l' konstruado. Per la skriba aŭ parola praktikado de Esperanto kun homoj el diversaj landoj aŭ rasoj, oni akiras la necesajn ecojn por povi efektive senti fratecon kun homoj el



ĉiuj mondpartoj.

Mi parolas laŭsperte kaj povus menciigi multajn faktojn. Jen unu el la plej tipaj. Survoje al Japanio, la ŝipo, kiu portis min, haltis en Hong-Kong kaj tie venis renkonte al mi ĉina kaj japana esperantistoj. Kun ili mi iris en la urbon kaj tie ni trioje promenis kaj interbabilis. Ambaŭ flavhaŭtuloj neniam antaŭe havis la okazon paroli kun blankhaŭtulo esperante. Mi asertas, ke ni sentis realan interfratecon kaj mi estas konvinkita, ke, se ni uzus, ekzemple, la francan lingvon kiel interkomprenilon, tiu sento ne estus tiel intensa, tiel vigla. La fakto, ke Esperanto ne estas nacia lingvo donas al ĝi specialan econ, nefacile klarigeblan per vortoj, sed sperte tre senteblan.

Nu, mi promesis verki artikolon kaj jen mi rimarkas, ke nur leteron mi verkis. Bonvolu do pardoni. Sed eble ne gravas la formo laŭ kiu mi eldiris miajn pensojn. Ĝi ebligas al mi saluti al la gesamcelanoj kun kiuj mi ne havis la okazon kaj plezuron konatiĝi, dum mia restado en la Argentina provinco de mia lando Esperantio...

Al ĉiuj koran kaj esperantistecan saluton de via

**E. LANTI.**

("Sennaciulo", februaro 1940)

# TROMPO, NEBULO, EKBRILETO

Kiam mi diras, ke jam ekzistas en Sovetio nova ekspluatanta klaso, tiam mi eĉ ne uzas tute taŭgan terminon; eble la vorto **kasto** estus pli ĝusta, tial ke nur la filoj, parencoj aŭ amikoj de l' teknokratoj havas ŝancon eniri la lernejojn, kie oni akiras la necesajn diplomojn por okupi la alte salajratajn postenojn.

En la kadro de artikolo ne eblas bildigi sufiĉe detale la realan situacion en Stalinio. Mi ŝatus almenaŭ, ke la legantoj akiru la deziron informiĝi pri Sovetio per aliaj organoj ol tiuj, kiuj simple diskonigas la oficialan blufon el Moskvo. Kaj tiucele mi menciuj tre karakterizan fakton. Antaŭ kvar jaroj s-ro Mercje, unu el la francaj grandkapitalistoj, vizitis Sovetion kaj post sia reveno en Parizon verkis libron pri siaj observoj en tiu lando. Mercje estis teknikulo, kiu kutimas prikonsideri aferojn objektivaj kaj eĉ sen antaŭjuĝoj. Li konvinkiĝis, ke la **liberalisma** kapitalismo tendencas al kompleta kolapso, kaj sekve ke ĝi devos trovi aliajn normojn de funkciado ol la ĝisnunajn. Aliel la nuna ekspluatanta klaso pli kaj pli perdos siajn avantaĝojn. Nu, tiu teknikulo eldiris la opinion, ke kun kelkaj modifoj oni povus alpreni kaj apliki la sistemon, kiu funkcias en Sovetio. Tie la direktoroj de fabrikoj ne timas strikojn. La sovetiaj sindikatoj ludas similan rolon al tiu de l' faŝistaj korporacioj; unuvorte, ĉio estas organizita laŭ

maniero, kiu sekurigas la privilegiojn de la teknokratoj. (La vorto "teknokrato" ne troviĝas en "P.V.". Lanti celas tiujn, kiuj regas super la tuta ŝtata aparato. Red. de "S-ulo").

En Sovetio regas ruĝa faŝismo, funkcias ŝtatkapitalismo, sed la emblemo de la regno estas la martelo kaj la falĉileto. Al tiuj du objektoj nun povas enplektiĝi la hokokruco, kiel simbolo de la amikiĝo inter la bruna kaj ruĝa faŝismoj. Iafaĵe oni kredas sonĝi, kaj malfacile oni imagas tian situacion. Por klarigi al si la nunan sintenon de Kominterno, necesas kompreni, ke jam de dek jaroj ĝi fariĝis nur propagandaparato por nacipolitiko de Stalin. Ĉiuj grandaj ŝtatoj elspezas konsiderinde por sia propagando eksterlanda. Stalin, tre lerte, utiligas tiucele la naciajn sekciojn de Kominterno, t.e. la kompartiojn.

Kvankam mi neniam estis tute ortodoksa marksisto, tamen mi apartenis al la franca kompartio ekde ĝia fondiĝo ĝis 1928. Tiun jaron Stalin deklaris en iu kongreso, ke oni povas konstrui socialismon en unu sola lando, kiam ĝi estas tiom riĉa kaj vasta, kiom estas Sovetio. Ĉe tiu fama deklaro de Stalin, kiu kontraŭas la opinion de Lenin, mi firme konvinkiĝis, ke la esperoj, kiujn la proletaro metis en Kominterno ne plu havas realan bazon. Mi do ekŝiĝis el la partio kaj de tiam observis kaj notis kun tute malfermitaj okuloj la okazaĵojn en Sovetio. Dum kelka tempo mi emis pensi, ke se Lenin vivus aŭ se Trocki gvidus en Kremlo, anstataŭ sidi en ekzilo, la situacio en Kominterno estus alia. Nun tian iluzion mi ne plu havas. Mi eĉ akiris la konvinkon, ke ne estus granda diferenco, se Trocki diktatorus anstataŭ Stalin. La fama ekzilito, cetere mem havas sian parton de

respondeco en la sovetiaj okazintaĵoj. Kiam li ordonis, ke oni pafadu al la ribelintaj maristoj el Kronŝtad, kiuj simple volis, ke la sovetoj funkciu libere, demokrate kaj ne estu nur aparatoj en la manoj de l' kompartio, tiam la eks-estro de l' Ruĝa Armeo faris la unuan paŝon direkte al la starigo de ruĝa faŝismo...

Mi eĉ eltrovis antaŭ kelkaj monatoj, ke Lenin mem povas esti rigardata kiel la spirita patro de l' faŝismo. En 1904 li ja skribis jenon: **"Oni devas identigi la individuon kun la amaso, la amason kun la partio, la partion kun la ŝtato"**.

Musolini, Stalin kaj Hitler tre sukcese aplikis tiun belan principon!...

Mi ne dubas pri la sincero kaj honesto de l' fama marksisto, kies enbalzamigita kadavro kuŝas en maŭzoleo, staranta en Moskvo. Sed mi konvinkiĝis, ke la senetikeca Historia Materialismo ne liveras al la laboristaro, al la homoj, kiuj celas pacon kaj bonstaton en la Mondo, taŭgan fundamenton ideologian. La okazintaĵoj el la 20 lastaj jaroj pruvas tion tute klare. La laborista kaj revolucia movado devas trovi alian vojon ol la ĝis nun sekvitajn.

Nunepoke la homaro palpe baraktas en nebulo. Neniu stelo montriĝas; neniu aŭtoritata voĉo aŭdiĝas por eldiri la vojon irendan. Eĉ seniluziigintaj homoj reiras al malnovaj superstiĉoj. La scienco kaj tekniko faris mirindajn progresojn, sed la homa menso ne progresis paralele; ĝi malfruas je unu jarcento kaj en tio grandparte kuŝas la ĉefa kaŭzo de l' nuna ĥaoso en la homaj interrilatoj.

Mi ne pretendas esti eltrovinta savan vojon, sed mi kredas, ke ĝi almenaŭ devas konsisti el la sintezo de religieco (ne

dogma) kaj racieco. Firme konvinkita mi estas, ke la Marksista, Lenina vojo estas grandparte erara. La homoj ne liberiĝos memvole oferante sian individuan liberon al "fera disciplino" partia. La libero estas unu el la kondiĉoj de l' homa digno. La bolŝevistaj gvid- kaj regprincipoj eble taŭgas por socioj el formikoj, el termitoj, sed ne por **homaj** socioj.

Aliparte, necesegas, ke la homeco superregu la naciecon. Oni ne diru, ke tio estas nebla. Jam dum kvar jaroj mi spertas tra la mondo, ke oni povas amikiĝi kun homoj el ĉiuj landoj, el ĉiuj rasoj. Sed tiucele necesas funde posedi komunan lingvon nenaciecan. Tia lingvo ekzistas ja de 50 jaroj. Ĝi nomiĝas Esperanto kaj jam havas relative riĉan literaturon. Tiu lingvo estas mia preferata kaj plej ofte uzata esprimilo. Kiam, ie ajn tra la mondo, mi troviĝas inter miaj samlingvanoj, tiam mi sentas min hejme. Estas mia plej granda ĝojo intima, konscii, ke per tia konduto mia, mi havas nenian respondecon en la naciecaj frenezaĵoj, kiuj konkrete aŭ latente minacas ĉie la homaron.

Estus eraro kredi, ke ĉiuj esperantistoj havas saman spiritostaton kiel mi. Esperanto per si mem estas nur ilo, kiun oni povas utiligi por bonaj aŭ malbonaj celoj. Same kiel aeroplano povas esti utiligata por transporti bombojn aŭ kuracilojn. Sed por mia sennacieca idealo, esperanto, universala lingvo, estas nepre **necesa**, kvankam ne sufiĉa.

Mia migrado tra la mondo estas giganta pruvo pri la reala forto kaj taŭgeco de nia movado. Ekzistas neniu neceso malesperi pri tiu movado, kvankam la milito terure obstaklas ĝin.

Karaj k-doj, fidelaj S.A.T.-anoj, mi varme salutas vin  
ĉiujn.

**Via E. Lanti.**  
("Sennaciulo", aprilo 1940)

# VIVA LINGVO ARTEFARITA: ESPERANTO

Gesinjoroj.

La Ĉilia Esperanto-Ligo petis, ke mi faru paroladon pri la temo: **artefaritaj lingvoj**. Post ia ŝanceliĝo mi konsentis. Tamen mi havas neniun titolon, kiu rajtigas min aŭtoritate pritrakti temon antaŭ distinginda publiko. Lingvisto mi ja ne estas kaj eĉ malpli poligloto. Kompatindan nekapablon mi havas rilate al lingvolernado. Jam de unu jaro mi estas en Sud-Ameriko kaj tamen ne eblas al mi konversacii en hispana lingvo. Mi nur povis akiri sufiĉan scion por legi viajn ĵurnalojn kun ofta uzo de vortaro. Per la okuloj mi do iom scias vian lingvon, sed ĝi restas fremda al miaj oreloj kaj lango. La samon mi povas diri pri la angla lingvo, kvankam mi vivis dum preskaŭ du jaroj en Aŭstralio kaj en Nov-Zelando. Mi konfesas al vi, ke iafoje mi sentas ian kolereton ĉe la konstato, ke homoj uzas malsamajn vortojn kaj sonojn por nomi samajn objektojn – dum la samaj bestoj el la tuta mondo blekas same. Ili do tiurilate superas la homojn...

Kredeble la poliglotoj fieregas pro tio, ke ili povas esprimi la saman penson per pluraj lingvoj. Se kelkaj hazarde troviĝus en tiu ĉi ĉambrego, mi petas al ili pardonon, sed pri plurlingveco mi emas konsenti la opinion de Frederiko Niĉe

(Nietzsche):

"La lernado de pluraj lingvoj plenigas la cerbon per vortoj, anstataŭ per faktoj kaj ideoj; tamen, tiu organo, ĉe ĉiu homo, povas enteni nur limigitan kvanton da enhavo."

La fama kriminalisto itala Lambroso samopiniis tiurilate. Li ja skribis:

"La lernado de lingvoj estas preskaŭ ĉiam elspezo de intelekta energio, kiu neniel perfektigas la rezonkapablon."

Gesinjoroj. Mi jam diris sufiĉe, por ke vi nun ne atendu aŭdi disertadon pri apartaj kvalitoj de naturaj aŭ artefaritaj lingvoj. Kaj tamen mi devas pravigi mian ĉeeston antaŭ vi, ĉi tiun vesperon. Temas ja konvinki vin pri la reala ekzisto de **viva lingvo artefarita**.

Se mi estas ĝuste informita, antaŭ kelkaj jaroj, en ĉi tiu sama loko, iu profesoro demonstris, ke idiomo artefarita ne povas esti vivkapabla. Sendube vi konas la anekdoton pri Diogeno, la cinikulo, kiu ekmarŝis, aŭdante disĉiplon de Parmenid, neanta la ekziston de moviĝo en la mondo. Nu, se mi ĉeestus la menciitan paroladon, mi ne ekmarŝus kiel la fama filozofa greka, sed certe ne povus deteni min ekkrii en esperanto mem mian proteston kontraŭ pure teoria aserto, kiu malatentas la faktojn.

Mi scias, ke estas malbonguste paroli pri si mem. Bonvolu do indulgi min, se tion mi tamen faros. Sed la sola pravigo pri mia ĉeesto antaŭ vi estas iel atesti per mia propra ekzemplo, ke esperanto estas viva lingvo, parolata kaj skribata en ĉiuj mondpartoj. Eksciu do, ke post dudekjara praktikado tiu lingvo fariĝis al mi pli familiara ol la franca, mia lingvo gepatra. En ĉi tiu momento mi preskaŭ havas la



impreson paroli fremdan idiomon. Cetere mi intencis paroladi en esperanto kaj petis al la estraro de Ĉilia Esperanto-Ligo, ke oni aranĝu la aferon tiel, ke mia teksto estu tradukota en hispana lingvo. Oni rebatis al mi, ke en Santiago estas multaj personoj, kiuj komprenas la francan lingvon kaj mi ne insistis en mia intenco uzi mian preferatan idiomon. Ĉu mia cedemo estis prava aŭ ne, nun mi ne scias...

Prezentu al vi, ke esperanto estis mia lingvo hejma dum 11 jaroj. En Paris mia kunulino estis angla esperantistino. Ni kutimis lui al esperantistoj unu ĉambron de nia apartamento; tiel ke vivis kun ni laŭvice aŭstro, bulgaro, japano, svedo kaj germano. Ĉi tiu lasta estis nia gasto dum 5 jaroj. Tial en mia hejmo aŭdiĝis nur esperantaj paroloj. Plie, mi tiam kutimis esti for el Francio almenaŭ du monatojn ĉiujare. Mi do povis viziti ĉiujn landojn de Eŭropo. Ĉie mi trovis geesperantistojn, por helpi kaj gvidi min. Kaj se mi aldonos, ke jam de 4 jaroj migras mi de kontinento en alian kontinenton, kaj havante rilatojn nur kun esperantistoj, vi certe komprenos, ke la artefarita lingvo povis kvazaŭ penetri en mian karnon, tiagrade, ke mi fariĝis **ĝismedola esperantisto**; kio rajtigas min aserti, ke esperanto estas **viva lingvo**.

Gardu vin kredi, ke mi estas eksterordinarulo. Fakte, tra la mondo jam ekzistas kelkaj dekmiloj da personoj, kiuj flue parolas esperanton; almenaŭ 150 000 povas ĝin legi kaj skribi sen tro granda peno. Kaj ĉi tiuj lastaj povus facile akiri kompletan scion de la lingvo, se vivcirkonstancoj devigus ilin tion fari. Ekzistas jam infanoj, kies gepatra lingvo estas esperanto. En 1928, mi ja konatiĝis en Germanio kun

kvinpersona familio en kiu la artefarita lingvo estis ĉiam uzata hejme.

Kiel ĉefan pruvon, ke esperanto estas viva lingvo, mi mencias okazintaĵon, kontrolebla per dokumentoj kaj kiun mi travivis en Amsterdam dum la jaro 1931-a. **Sennacieca Asocio Tutmonda** (organizo, kiun mi fondis en 1921) okazigis en tiu urbo sian 11-an kongreson. Ĉeestis 400 personoj el 25 diversaj landoj. Inter la ĉeestantoj troviĝis relative forta malplimulto, kiu opoziciis al la Plenum-Komitato de la organizo. Pluraj ĵurnalistoj venis en la kongresejon, por tie observi, kiel elmontriĝos kongreso de esperantistoj. Laŭ tio, kion oni raportis al mi, tiuj informistoj pensis ke la kongresanoj simple legos sian paroladon, aŭ papage eldiros ĝin, post parkerado. Sed certe ĉio ĉi tio estos malbrila kaj senviva...

Sendube vi demandas vin, kiaj estis la temoj, kiuj povis tiaokaze ebligi pasie vivajn diskutojn. Necesas do, ke vi sciu ke S.A.T. ne estas organizo, celanta nur la propagandon de esperanto. Ĝi ĉefe havas kiel taskon uzadi ĝin **praktike** por unuigaj celoj de universala interfratigo. Laŭstatute, S.A.T. estas malferma al ĉiuj esperantistoj, kiuj, laŭ diversaj vojoj, celas starigi pacon kaj juston inter la homoj. Vi do ne miros eksciante, ke en tiu asocio troviĝas homoj el diversaj tendencoj politikaj. Nu, en tiu epoko la esperanta movado estis tre prospera en Sovetio. En 1931, la taktiko el Moskvo ne estis tiu de l' **Popolfronto**, kiel ĝi ekzistas nun en via lando. Tiam la ortodoksaj komunistoj, t.e. la Stalinanoj, havis kiel instrukciojn "bolŝevistigi" ĉiujn organizojn, al kiuj ili apartenas. Estis do tute normale, ke la komunistaj anoj de

S.A.T penadu, por meti ĝin serve al la Moskva politiko. Prave aŭ malprave, mi kaj la aliaj respondecaj gvidantoj de la Asocio estis senhezitaj kontraŭuloj de la Stalina strategio...

Nun vi povas prezenti al vi la atmosferon de la kongreso: la diskutoj estis ekstreme vivecaj kaj pasiaj. Iafoje en la du partioj kelkaj anoj tro ardaj interŝanĝis kolerajn atakparolojn. Tial la ĉeestantaj ĵurnalistoj estis tre forte impresataj per tia sceno. Ĉiuj konvinkiĝis, ke esperanto estas viva lingvo!... Iu el ili eĉ malicete raportis en sia gazeto, dirante, interalie: "Ne povas esti dubo, ke esperanto estas viva lingvo; mi aŭdis kongresanojn, kiuj insultis sin reciproke..."

Mi ne kuraĝus aserti, ke estas dank'al tiu kongreso kaj al la ĵurnalistaj raportoj, ke la esperanta movado estas tre prospera en Nederlando. Sed estas fakto, ke en tiu landeto la esperantista organizo laborista nombras pli ol 5 000 anojn. En tiu anguleto el Eŭropo certe troviĝas almenaŭ 15 000 esperantistoj.

Se mi ne timus trouzi vian atenton, mi povus mencii multe da similaj faktoj, kiuj pruvas pli bone ol ĉiu ajn teoria disertado, ke, post 53-jara ekzistado, esperanto reale fariĝis viva lingvo. Konvenas tamen, ke vi eksciuj pri la ekzisto en ĉiuj landoj de almenaŭ unu organizo, kies celo estas diskonigi kaj instrui esperanton; plie, ekzistas 4 inter naciaj organizoj: Universala Esperanto-Asocio, Internacia Esperanto-Ligo, Katolika Unuiĝo kaj S.A.T., pri kiu mi jam parolis. La esperanta Biblioteko enhavas proksimume 5 000 volumojn. Verkoj de Dante, de Gete (Goethe), de Moljer (Molière), de Puŝkin, de Ŝekspir (Shakespeare), de Strindberg ktp, ktp. estas tradukitaj en esperanto. Mi mem tradukis [Kandid](#) de

Volter. Pri tio mi kredas menciinda jena **fakto**. Kiam mi estis en Japanio, tiam oni montris al mi japanlingvan eldonon de tiu sama verko. Jen banalaĵo! vi eble pensas. Jes, sed malpli banale estas, ke la tradukinto konfesas en sia antaŭparolo, ke la esperanta eldono tre helpis lin kompreni plurajn frazojn el la originalo...

Volter mem diris: "Unu el la plej egaj malfeliĉaĵoj en la vivo estas la multlingveco". Se hazarde la animo de l' fama verkisto filozofa migrus en la Niponan imperion, kaj se ĝi povus kompreni la menciitan antaŭparolon, certe granda estus ĝia ĝojo ĉe la konstato, ke universala lingvo, artefarita kaj tamen viva, helpis al regatoj de l' Mikado kompreni la ironion el **Kandid**.

Prave diras italoj: **Traduttore, traditore** (tradukisto, perfidisto). Povas esti, ke mi mem iom perfidis al Volter; sed tion mi certe faris en malpli alta grado ol ĉiuj, kiuj tradukis liajn verkojn nacilingve. Rajtigas min tion diri la atesto de esperantistoj, sciantaj la francan lingvon, kiuj komparis mian tradukon kun tiuj ekzistantaj en ilia respektiva lingvo nacia. Ekzemple, profesoro "Wajsblum" el Varsovio, skribis al mi jenon en ĉi tiu 16-paĝa letero:

"Mi konas **Kandid**-on en la originalo kaj en du bonegaj tradukoj (pola kaj germana), sed mi konfesas sincere: mi estis mirigita pro la laŭvorteco kaj samtempe – se oni povas diri – laŭspriteco de la esperanta traduko. La tuta subtilo kaj ĉarmo de l' franca prozo el la 18-a jarcento konserviĝis en nia lingvo, dum en la aliaj ili estas ĉiam nur pala rebrilo".

Nu, ĉu do la fakto, ke la artefarita esperanto povis sukcese konkuri kun la pola kaj germana lingvoj ne estas plej certa

pruvo, ke ĝi estas la racia solvo al la problemo pri forigo de la lingvaj baroj inter la popoloj?

Mi ankaŭ tradukis filozofian eseon de la belga profesoro Paŭlo Ĵil (Gilles): **Skizo pri filozofio de la homa digno**, kaj mi kredas esti fidele transdoninta la penson de la aŭtoro.

Inter la malmultaj libroj, kiujn mi kuntrenas dum mia migrado, jen **La Sankta Biblio**, tradukita de Zamenhof, la aŭtoro mem de esperanto; jen **La Komunista Manifesto** en sia tria eldono; jen **La Maksimoj de La Roŝfuko** (Rochefoucauld); jen **Kontrakto de la Ligo de Nacioj** kun komparaj tekstoj en angla kaj franca lingvoj; jen **Al Eterna Paco** de Kant; jen **Monadologio** de Lejbniz. Krome, jen japana revuo, kiu anoncas la aperon de la kvina volumo de historio pri la **Imperio de la Leviĝanta Suno**, kiu festas nunjare la 2 600-an datrevenon de sia stariĝo – se ne mensogas la tradicio...

Mi menciis al vi nur tradukojn, sed ekzistas ankaŭ originalaj verkoj, kvankam en malpli granda proporcio. Nun la vivo de homo ne sufiĉus por legi ĉion, kio jam aperis en esperanto, kune kun tio, kio daŭre aperas.

Kaj, ĉar mi prenis kiel taskon pruvi al vi nur per **faktoj** la vivantecon de esperanto, mi volas bonuzi la okazon, montri al vi ĉi tiun gravan revuon "El Auto Argentino", kiun hodiaŭ mem mi ricevis el Buenos Aires, kaj en kiu troviĝas artikolo, tradukita al esperanto kaj unue aperinta en la ĉina revuo **Voĉoj de Oriento**.

Estas menciinde, ke en ĉi tiu revuo troviĝas ankaŭ portreto kaj intervjuo je profesoro G.F. Nikolai, kiun vi sendube konas, ĉar li instruas en via Universitato. Nu, antaŭnelonge

mi ricevis de tiu fama aŭtoro de **Biologio de l' Milito** leteron el kiu mi citu almenaŭ frazon, kiun mi substrekis per ruĝa kraĵono:

"La celojn de la esperantistoj mi konas kaj tutkore aprobas." En alia parto de sia letero s-ro Nikolai diras, ke li scipovas legi esperanton. Se okaze la aŭtoritato de famuloj povus favore influi sur vin, mi povas menciis, ke Henriko Barbus (Barbusse), Romen Rolan (Romain Rolland), la glorie fama scienculo Alberto Ajnstejn (Einstein), inter aliaj, bonvolis siavice esti honorprezidantoj de kongresoj de S.A.T. En 1926, nia organizo okazigis sian Sesan Kongreson en Leningrad kaj tiam eĉ la tiama popolkomisaro Lunaĉarski konsentis ankaŭ esti ties honorprezidanto.

Ĉar mi menciis la nomon Barbus, vi permesu, ke mi citu unu el liaj multaj diroj, favoraj al la lingvo universala: "**Esperanto estas la A, Bo, Co de la internaciismo...**"

Tiaokaze mi ne povas deteni min diri, ke se la fama verkisto parolis prave, tio signifas, ke li mem estis analfabeta internaciisto, ĉar li ne ellernis tiun lingvon. Kaj ĉiuj anoj de la diversaj Internacioj, kiuj ne estas esperantistoj, ankaŭ estas tiurilate analfabetaj.

Se tio ne estus ekstertema, mi povus longe priparoli kritike tiun fakton kaj montri ties bedaŭrindajn konsekvencojn. Mi nur diros, ke estas ĉiam preferinde atenti la farojn de homoj ol iliajn dirojn. Faktoj estas pli konvinkaj ol paroloj. **Verba movent, exempla trahunt** (paroloj emocias, ekzemploj altiras), diras latinistoj. Kaj, rilate al la teorioj, kiuj malatentas la faktojn, mi anticipe diru, ke ili estas nur vana **ĵonglado** pervorta.

Esperanto estas viva lingvo. Tamen, malgraŭ ĉiuj faktaj pruvoj, kiujn oni povas kolekti, la plimulto el la lingvistoj daŭre neas la eblon starigi universalan lingvon. Ekzemple, en la tre serioza ĵurnalo franca "Le Temps" (La Tempo), n-o de la 28-a de februaro 1940, oni povis legi frontpaĝe jenon:

"Scienculoj demonstris, ke lingvo komuna al ĉiuj homoj estas ĥimero kaj ke la multlingveco estas nepre necesa. Ili plie demonstris, ke lingvo konsistigas per si mem propran organismon, kiu fidele spegulas la apartan karakteron de l' popolo, kiu ĝin parolas, kaj kiu, siaflanke, reagas laŭ decidiga maniero sur la disvolviĝon de la spirito de tiu popolo."

Eble ne ĉio estas erara en tiu aserto. Laŭ mia propra sperto volonte mi konsentas, ke la praktikado de iu difinita lingvo povas influi sur la menson de ties praktikantoj. Kaj tial ke ĉiuj naciaj lingvoj estas plenaj je mallogikaĵoj kaj ridindaj esceptoj, eble estas kelkrilate pro tio, ke la mondhistorio plenas je krimoj kaj frenezaĵoj. Kaj oni sekve povas sin demandi, ĉu la praktikado de simpla kaj racia lingvo, kia estas esperanto, ne havos bonan influon sur la evoluon de l' homaro?

Sed nun ne temas pri tio kaj mi ne volas tro paradoksumi. Mi ja nur celas konigi al vi la ĝeneralan opinion de lingvistoj, nome, ke ĉiu lingvo konsistigas per si mem vivan organismon kaj sekve, ke la pretendo artefari lingvon iel similas al la provoj retorte krei vivan estaĵon.

Tiun tezon, ekzemple, defendas d-ro Albert Doza (Dauzat) en sia verko "**La Philosophie du langage**" (Prilingva

Filozofio) nove aperinta en 1927; same profesoro J. Vendries en "**Le Langage. Introduction Linguistique à l'Histoire**" (La Lingvoj en la Nova Eŭropo), eldonita en 1918, li dediĉis tutan ĉapitron al la artefaritaj lingvoj kaj el ĝi mi citos tre karakterizan ateston pri esperanto:

"La eblo starigi artefaritan lingvon, facile lerneblan, kaj la fakto, ke tiu lingvo estas utiligebla, estas pruvitaj per la praktiko. Vana estas ĉiu teoria diskutado: esperanto funkciis."

Kaj li klarige aldonas:

"Lingvo estas socia institucio tradicia. La volo de l' homo senĉese intervenas en la lingvo."

Sed mi ne volas trompi vin kaj do ne kaŝos, ke ne senrezerva estas la aprobo de l' fama lingvisto. Ekzemple, li neas, ke esperanto povas havi literaturan valoron. S-ro Meje mortis antaŭ du jaroj. Nu, mi petas pardonon al lia ombro, sed mi asertas, ke li ne sufiĉe zorge viŝis siajn okulvitrojn, kiam li komplezis exploreme ekrigardi al esperanto. Mi ne estas poeto, nek literaturisto, kaj povus kontentiĝi per la atesto de la eminenta scienculo. Sed estas **fakto** – kaj tion mi persone bedaŭras – ke esperanto estas pli uzata por literaturo ol por tekniko.

Cetere, Zamenhof mem, tuj ĉe la komenco de sia elpenŝaĵo, ekrajdis Pegason kaj donis al ni poeziaĵojn, iom naivaj, sed emociplenaj, kaj kiuj baldaŭ kaptis la koron de la unuaj adeptoj de la nova lingvo. [La Vojo, Ho! mia kor'](#) estas ankoraŭ nun ŝate deklamataj kaj aŭskultataj en preskaŭ ĉiuj esperantaj grupoj. Kaj la himno [La Espero](#) estas kutime kantata ĉe la komenco kaj fino de esperantaj kongresoj.



Mi jam diris mian bedaŭron, ke esperanto ne estas pli uzata por verkoj de scienco kaj **flegma** racio. Sed la demando ne koncernas miajn preferojn; temas konstati **faktojn**. Jen unu tute freŝdata. Ĝus aperis ĉi tiu 272-paĝa volumo, **Leteroj de E. Lanti**, kiu konsistas el leteroj, kiujn mi skribis en diversaj partoj de l' mondo kaj kiujn eldonis miaj amikoj. Nu, eble netrafe, sed sen ia dubo bonintence, ili almetis, iel antaŭparole, relative longan poeziaĵon, kiun dediĉis al mi hungara samideano, kiam mi forlasis Eŭropon.

Pri la literatura valoro de esperanto mi mem ne havas opinion. Sed mi povus citi multe da atestoj favoraj. Jen almenaŭ unu de homo, kiu persone ne timis komplimenti al la Muzoj en la Zamenhofa lingvo mem. S-ro Karlo Boduen (Baudoin), profesoro ĉe la Universitato de Ĝenev (Svisio) skribis interalie jenon:

"En la diskutoj pri internacia lingvo oni ne sufiĉe atentis jenan flankon de la demando: inter la diversaj projektoj ĝi (esperanto) estas la sola lingvo literatura kaj per tio akiris vivon kaj estas vivkapabla. Esperanto realigis ĉi tiun lertaĵon ekvilibri la **muzikon** kun la **algebro**, la emociecan esprimkapablon kun la logikeca esprimkapablo..."

Por la personoj, kiuj volus kontroli ĉe la fonto tiun entuziasman ateston, mi aldonu, ke ĝi aperis en la revuo "Clarté" (Klaro), la 17-an de julio 1920. Tiun gazeton eldonis tiutempe Henriko Barbus en Paris.

La fakto, ke esperanto estis ĝis nun pli uzata por literaturo ol por scienco kaj tekniko estas, miaopinie, klarigebla per tio, ke ĝenerale la esperantistoj estas idealistoj, homoj, kiuj revas pri homaro pli bonstata ol la nuntempa, pri senmilita mondo,

en kiu regus interfrateco. Mi konfesas, ke tia celo estas vere tre malaktuala; kaj eble tio klarigas, kial la mondlingva movado ne progresas proporcie al la fervoro de siaj adeptoj.

\*

Mi konjektas, ke inter la afabla aŭskultantaro estas kelkaj personoj, kiuj preferus aŭdi, ĉu esperanto estas facile lernebla. Al tiu demando mi respondas: jes kaj ne. Jes, se temas nur akiri la kapablon legi kaj komprenigi sin; ne, se oni celas eltrovi la kaŝitajn trezorojn, kiujn ĝi entenas. Por funde koni esperanton, necesus esti tute forgesinta sian gepatran lingvon; necesas, plie posedi laŭ tre alta grado logikecan, raciecan pensmanieron. Neniu nuntempe scipovas senmanke la artefaritan lingvon. Ties aŭtoro mem ne sukcesis tute senigi sin je la influo de naciaj idiomoj dum la praktikado de sia propra elpensajo.

Sed kredeble mi nun emas paradoksumi. Kiu lernas nacian lingvon, tiu ne celas ĝin uzadi pli bone ol ties klgsikuloj. Sufiĉas scii legi iliajn verkojn kaj ĉefe esti kapabla komprenigi sin ĉe hotelo aŭ restoracio, se oni troviĝas en la koncerna lando. Por akiri tian scion de esperanto, oni bezonas dudekoble malpli da tempo.

Antaŭ proksimume dek kvin jaroj, mi legis, ke s-ro Bode (Baudet), tiam prezidanto de la Paris-a Komerca ĉambro, metis en sian poŝon esperantan gramatikecon kun vortareto, kiam li ekveturis al Italio, por ĉeesti, en Milan, konferencon, organizitan kun la titolo **Esperanto kaj Komerco**. Dum la vojaĝo s-ro Bode dediĉis sian tutan tempon al la lernado, kaj

du tagojn poste li povis legi raportojn kaj kompreni preskaŭ ĉion el la esperantaj paroladoj. Mi ne scias, ĉu tio estas tute vera. Je tia "heroaĵo" mi mem ne estus kapabla. Sed mian nekapablon pri lingvolernado mi jam konfesis al vi. Kaj malgraŭ tio, estas fakto, ke mi tamen sukcesis akiri pli perfektan scion de esperanto ol de mia gepatra lingvo. Ne miru vi! Prefere aŭskultu la opinion de la jam menciita lingvisto, A. Meje, pri tiu naciaĵo:

"La uzado de la franca lingvo fare de duonklerulo ridetigas preskaŭ ĉe ĉiu frazo tiujn, kiuj, dank'al sia ĝenerala kulturo kaj al la lernado, kiun ili faris pri la ekzakta signifo de l' vortoj, scipovas sian lingvon... **Necesas ne konscii pri malfacilaĵoj por konsenti sen timtremo skribi kelkajn liniojn en franca lingvo.**"

Kaj tion diris tiu eminenta fakulo rilate al la francoj mem! Kiom da tempo devas do dediĉi alilandulo, por funde scipovi la lingvon de Volter kaj Anatol Frans (France)? Kaj la samon oni povas diri pri ĉiuj aliaj lingvoj naciaj.

Ĉar intence mi limigas min je faktoj, jen unu tre freŝdata. Ĝi troviĝas en letero skribita en Buenos Aires, la 16an de ĉi tiu monato. Ties subskribinto estas juna komizo. Aŭskultu lian konfeson:

"Kion mi scias, tion mi mem lernis; mi ja vizitis lernejon nur ĝis la tria klaso kaj en provinco, kie instruistinoj ĝenerale ne estas tre kleraj. Poste mi devis helpi miajn gepatrojn kaj nur tre malofte havis la okazon ĉeesti specialajn kursojn. La hispanan lingvon mi malbone skribas kaj parolas; se lastatempe mi iomete kleriĝis, estas dank'al esperanto. Lernante ĝin, mi ja ankaŭ lernis la nacian lingvon."

Ĉu do ne kuŝas en tiu konfeso de simpla homo plej bona pruvo pri la facila lernebleco de esperanto? Kaj ĉu ne estas ankaŭ tre notinda la fakto, ke esperanto helpas lin lerni sian gepatran lingvon? Longan komenton mi povus fari pri tiu lasta punkto, se tio ne estus ekster la kadro per kiu mi limigis min. Kaj se iu inter la aŭdantaro havus la plej etan dubon pri la aŭtentiko de ĉi tiu dokumento, li povas sin turni al mia korespondanto, Johano Sabate, Gazcon 1454, Buenos Aires.

Tiaj faktoj estas grandnombraj. En Francio pluraj laboristoj faris al mi similan konfeson; kaj mi povis rimarki, ke ili uzis esperanton pli korekte ol la francan lingvon.

**Sin bazante sur tiaj kaj similaj faktoj, oni rajtas aserti, ke se la lernado de fremdaj lingvoj estus ĉie anstataŭata per tiu de esperanto, rezultus de tio grandega ŝparo da tempo kaj energio kaj tre profitus la homa interkompreniĝo.**

Kial do tia simpla kaj racia solvo ne ankoraŭ sin trudis? Mi ne estus embarasata, por respondi tiun demandon, sed tio postulus relative longan priparoladon kaj ĝi estas ekster mia temo. Mi ja celis nur pruvi, ke esperanto estas viva lingvo, kaj mi kredas esti farinta tion pli-malpli konvinke...

\*

Kaj nun ne demandu min, ĉu mi kredas je la definitiva sukceso de mia **kara lingvo**. Por mi, persone, ĝi jam venkis, ĉar de kvar jaroj mi rilatas nur kun esperantistoj. Per esperanto mi akiris geamikojn, ĉie, kien mia migremo puŝis min. Se mi ne timus paroli tro paradokse, mi konfesus mian

maloftan nedeziremon, ke ĉiuj homoj parolu esperanton. Ial mi ja preferas, ke la esperantista popolo, dislokita tra la tuta mondo, konsistu ĉefe el idealistoj, similaj al mi, kiu tre ofte havas la senton esti naskiĝinta tro frue en tro malnova mondo...

Mi eĉ konfesos al vi, ke en ĉi tiu milita tempo mi preskaŭ bedaŭras esti esperantisto. Mi havas geamikojn en Danio, Norvegio, Britio, Germanio, Italio, Japanio ktp. – eĉ en Francio!... Se mi ne estus lerninta la artefaritan lingvon, estas tre verŝajne, ke da ili mi havus nur en ĉi tiu lasta lando, kie mi hazarde naskiĝis kaj edukiĝis, kaj sekve timus kaj kompatus nur pri francoj. Tio verŝajne ŝajnas al vi nekredebla, nekomprenbla, sed estas nur iaj provincoj de mia patrio **Esperantio**.

Se troviĝas inter vi idealistoj – kaj pri tio mi ne volas dubi – kiuj deziras akiri la esperantan civitanecon, tiuj eksciu do, ke oni povas lerni esperanton eĉ sen la helpo de instruisto. Mi mem lernis ĝin ĉe la fronto dum la milito el 1914-18 – kiu devis esti la lasta... Kiam mi estis mobilizita, tiam mi kunportis en mia dorsosako lernolibron kaj vortaron, kaj ĉirkaŭ la fino de 1915 mi jam povis korespondi en esperanto.

Tiu lingvo havas vere mirindan econ: du homoj, loĝantaj antipode unu de la alia, kiuj lernis ĝin nur per libroj, povas tamen interkompreniĝi, se hazarde ili renkontas unu la alian. Ĉar mi alprenis kiel metodon argumenti nur per mencio de faktoj, mi finos, konigante al vi unu, kiun vi povos tuj kontroli. Mi ekvidas inter la aŭskultantoj iun, kiu ne komprenas mian nunan paroladon, nome s-ron Garcia. Ĝis antaŭ ses monatoj, tiu junulo neniam havis la okazon paroli

en esperanto kun fremdulo. Nu! kiam mi venis en Santiagon kaj renkontis lin, tiam ni tuj povis interkompreniĝi.

Estimataj aŭskultantoj, bonvolu permesi, ke mi traduku mian diron al s-ro Garcia, kaj poste li mem povos atesti, ĉu mi diris aŭ ne la veron.

(S-ro Garcia ekstaris kaj hispanlingve konfirmis la diron).

Gesinjoroj! mi preterlasis fari historian skizon pri la multaj artefaritaj lingvoj. Tio tamen estus al mi tasko tre facila, kaj mi povus senpene alpreni sintenon de erudiciulo. Mi volis limigi min nur je la mencio de esperanto, tial ke ĝi fakte estas la sola, kiu sukcesis fariĝi viva. Mi menciis tamen Volapukon, kiu vivetis dum kelkaj jaroj kaj mortis en 1884, tial ke la sperto montris, ke ĝi ne estis tute taŭga. Male, evidentiĝis, ke esperanto perfekte solvas la problemon pri tutmonda interkompreniĝo. Ĉiuj lingvaj projektoj, kiuj naskiĝis post esperanto, restis nur... projektoj. Oni ne malkovras dufoje Amerikon...

Konvenus, ke mi preparoletu la strukturon de la lingvo elpensita de d-ro Zamenhof el Polio. Tion mi tamen ne faros, tial ke mi ne devas trolongigi mian paroladon, kaj precipe tial ke tia preparado iel ŝajnas al mi superflua. Se inter vi kelkaj personoj konvinkiĝis pri la utilo de universala lingvo, tiuj havas kiel devon lerni esperanton. Tion farante, ili mem konstatos ties simplon, regulecon, logikecon kaj senliman kapablon je termina pliriĉiĝo.

Kiel mi diris al vi komence, jam de 4 jaroj mi estas for el Francio, kaj la lingvo de la lando, kie mi naskiĝis, preskaŭ fariĝis fremda al mi. Kaj – ĉu tio estas konfesinda? uzante nun nacian lingvon, mi spertas senton, kvazaŭ mi pekas; mi

kredas aŭdi riproĉojn de la anoj el mia regno ideala Esperantio.

Tamen la franca lingvo ludis dum longa tempo la ĉefan rolon en la internaciaj rilatoj, ĉefe sur la diplomatia kampo. Sed forpasis tiu lingva hegemonio. Ĉe la Ligo de Nacioj, en Ĝenev, kaŝa lukto okazis inter la angla kaj franca lingvoj. Kaj el tio oni povas konkludi, ke neniuj nacia lingvoj povas esti akceptata kiel internacia – krom se la brit-usona imperialismo konkerus definitive la tutan mondon...

Restas al mi nur danki vin pro via atento kompleza. Estu tamen aldonite, ke mi estas preta respondi al la demandoj, kiujn eventuale vi dezirus fari.

**E. LANTI**

(Tiun paroladon Lanti faris franclingve en la Universitato de Santiago, 29-4-1940. Ĝi aperis en esperanto en "Sennaciulo", julio 1946)

## EL LE TERŬ AL K-DO L.

26-4-39

"... Nun, kiam finiĝis la Hispana tragedio, mi povas tute malkaŝe diri al vi, kion mia intuicio diris al mi, kiam, en Portugalio, mi eksciis pri la komenciĝo de l' milito. Kvankam mi ne povus tiam argumenti per racia metodo; kvankam mi ne povus per konkretaj faktoj liveri pruvojn pri mia **...sento**, tamen mi jam havis la konvinkon, ke Franko venkos. Kaj, plie, la konversacioj, kiujn mi havis en Valencio kun kelkaj stalinanoj konvinkis min, ke se ili venkus, la situacio por la herezuloj el mia speco ne estus pli bona ol sub la regado de Franko. Kompreneble, mia simpatio estis por la K-doj el la "Internacia Brigado" kaj por la C.N.T.-anoj. Sed tio ne forigas la fakton, ke mi havis la konvinkon, ke ili elspezas mise, vane sian energion. Kaj tiam mi sendis al "S-ulo" la tekston de penso de Konfucio: **Se iu falis en puton, ne ĵetu vin en la puton por savi la falinton.** Mi petis al la Red., ke tiu penso estu diklitere presita. Tiel okazis, se mi ĝuste memoras. Verŝajne tre malmultaj legantoj komprenis la aludon al la Hispana tragedio. La anarkistoj el Katalunio, kaj el alie, estas vere tre naivaj, pensante, ke oni nun povas starigi senŝtatan socion, aŭ eĉ socialismon, en iu aparta loko sur nia planedo. Eĉ la tiama Bluma registaro ne permesus tion en Katalunio. Estas tre malagrabra vero, sed vero, ke



vole-nevole la homoj fariĝas pli kaj pli interdependaj tra la tuta planedo. Ni pereos, slaviĝos aŭ liberiĝos ĉiuj kune, sed ne aparte. La kapitalistaj landoj ĉesigis siajn atakojn al Sovetio, kiam ties gvidistoj konvinkiĝis, ke tie la konstruado de vera socialismo fiaskis...

Por mi tio estas sunklara. Kio estas al mi ne malpli klara, tio estas, ke la gvidistoj kaj gvidaviduloj neniam konsentos proprincipiative forlasi sian regadon aŭ regemon. Kaj por konservi ĝin ili trompos la popolon. Ĉi tiu lasta devas akiri tian spiritostaton, ke ĝi ne konsentu defendi ian ajn regadon kontraŭ alia. Ĉinaj kulioj mortas sen ia ajn profito pro la gloro de Ĉang-kai-Ŝek k.a. registoj. Simile okazis en Hispanio. "Anarkistaj" **ministroj** en iu "maldekstra" registaro vere naŭzas al mi...

Kiam oni forte konvinkiĝis, ke la mondo devas nepre unuiĝi – aŭ refali en primitivan barbarecon – tiam la unua faro, la unua devo, estas fari tion, kio estas al ni **ebla, jam nun** por prepari, **kondiĉi** la unuiĝon. Vi certe divenas, ke mi aludas nian esp-an aferon. La revoluciuloj, kiuj eĉ ne kapablas liberigi sin de la nacieca lingva influo estas vere tro stultaj por efike labori por la starigo de paca, harmonio tutmonda. Kaj la esp-istoj, kiuj kondukas kvazaŭ ili ne estus tiaj, ŝajnas al mi same malsaĝaj kiel estus kamparano, kiu surmetus siajn dimanĉajn vestojn por prizorgi sterkon.

Eble mi jam skribis tion al vi, sed mi ne laciĝos ripeti: Nuntempe la sola **devo**, kiun havas konscia sennaciisto, tio estas fari **ĉion eblan**, por ne viktimiĝi en la frenezaĵoj de naciistoj kaj internaciistoj. Sed tion ili eĉ ne devas diri

publike..."

# EL LETERO AL PARIZAJ SAT-ANOJ

Santiago, 5-2-1940

"... Jam de pluraj jaroj mi havas la senton, ke mi vivas en granda frenezulejo, el kiu ne eblas forkuri. Sed lastatempe pli forta ol iam ajn antaŭe estis tia sento. Ĉar ne eblas al mi freneziĝi por adaptiĝi al la medio, nemalofte mi cerbumadas pri la demando, ĉu ne estus saĝe imiti al niaj gek-doj Aspes kaj Bubo...

Sendube vi pensos, ke nun mi troviĝas en mondparto, kie la homoj ne estas tiel frenezaj kiel en Eŭropo. Estas vere, ke sur la Amerika kontinento ne tondras nun mortige kanonoj, nek eksplodas bomboj. Tamen mi ne havas eĉ ombron da dubo, ke la ĉi tieaj homoj estas same frenezaj, kiel tiuj el Eŭropo. Ili estas ĝismedole infektitaj per la malsano, kies nomon vi mem konas; nur la stato de la infekto nun ne estas akuta. Ĉilio estas unu el la plej infektitaj landoj kaj tamen nenie alie mi vidis tiom da mizeruloj, da almozpetantoj kaj da ĉifonvestitaj homoj. Estas apenaŭ kredeble! Sed ĉiuj fieras pro sia ĉileco. Kaj ili eĉ havas ĉiujare specialan feston (Fiesta del Roto Chileno) por soleni sian ĉifonulecon...

La esp-a movado apenaŭ ekzistas. Prezentu al vi, ke la surpapere ekzistanta ĉilia Esp-Ligo havas prezidanton kiu neniam lernis, nek lernos nian lingvon. Fakte mi rilatas, de tempo al tempo, nur kun du esp-istoj. Vi do facile komprenos, ke mi sentas min ekzilita. Tial viaj rakontoj pri la

Kopenhaga Kongreso forte vibrigis la kordojn de mia koro kaj mi nun sopiras al regiono de Esperantio, iom pli loĝata ol la ĉi tiea. Vi sendube komprenas, ke mi aludas al mondo, kie la homeco superregus la naturan amon, kiun povas senti homo por la loko, kie li naskiĝis aŭ longe vivis.

Ĉu eblas esperi, ke tia homeco, kiun oni povas sperti en la diversaj ĉefurboj de Esperantio, t.e. la urboj, kie okazas SAT-Kongreso, iam fariĝos ĝenerala? Mi ne scias. Almenaŭ mi ne dubas ke ĉio, kion oni povas fari tiucele igas la vivon vivinda. Kaj tiurilate la SAT-Kongresoj havas netakseblan meriton. Viaj simplaj rakontoj pri spertoj dum la Kopenhaga Kongreso pruvas tion al mi tre klare.

Kaj tia konstato, parenteze dirite, sentigas al mi naŭzon ĉe la penso, ke ekzistas homoj, kapablas bonuzi nian lingvon, kaj kiuj tamen ne partoprenas la esp-an vivon, tial ke per tio ili ricevus neniom da profito, tial ke ilia politika kariero povus eĉ iom domaĝi pro elmonro de esperantisteco – Tial ke ne eblas **marksiste** pravigi nian movadon...

Mi ne konas la celon al kiu sin direktas la Homaro; mi eĉ ne scias, ĉu ĝi havas celon. Sed pli kaj pli firmiĝas mia konvinko, ke la **idealismo**, la **religieco** (ne dogma; mi uzas la vorton laŭ ĝia etimologia senco) estas same necesa, por unuigi la popolojn, kiel ĉiaj utilaj teknikiloj.

Tial ke malofte mi rilatas ĉi tie kun esp-istoj, mi sentas min nun en ekzilo. Sed per la cerbo, per la koro mi estas kun vi, karaj SAT-Amikoj, kaj mi emas kredi, ke iaj nevideblaj fadenetoj interligas nin.

Ni ĉiuj provu vivi saĝe, eĉ inter frenezuloj, kaj vi memoru la konsilojn de E.L. Itanŝa en sia artikolo kun titolo: Ĉiu plenumu sian devon ("S-ulo", nov. 1937).

Elkoran saluton de via

**E. Lanti"**

## EL LETERO AL K-DO D.

Santiago, 15-9-40

"... Jes, vi pravas, en Eŭropo la esp-a afero eniris katakomban periodon. Sed mi scias, ke en Germanio ni havas bonajn kaj fidelajn amikojn. Mi tenas leteron de unu K-do el Bilefeld, ricevitan kelkajn tagojn antaŭ la eksplodo de l' milito, en kiu li diras, ke esp-o vivos en li ĝis lia morto. Kaj lia filo ne timis iri renkonte al la karavano el kongresanoj, kiuj transiris Germanion, voje al Kopenhago. Tiu K-do, kies nomon ne necesas, ke mi menciu, sciigis min pri aliaj eks-SAT-anoj, kiuj pensas kaj sentas tute kiel li mem. Tiu K-do estis pli kuraĝa ol aliaj; li ja neniam rezignis korespondi kun mi, post la venko de Hitler. En "Leteroj" la 37-a kaj 43-a estas al li adresitaj. Tio pruvas, ke la teruro estas eĉ iom malpli granda en Hitlerio ol en Stalinio. Mi scias, ke en Sovetio ankau estas K-doj, kiuj restis fidelaj, sed neniu kuraĝus korespondi kun mi. Cetere tio signifus eble kuglon en la kapon, almenaŭ longdaŭran enkarcerigon.

Tre interesis min via rakonto pri pastro "Stellacci". Ĉar mankas al vi gazetoj, mi pensas, ke eble vi havas intereson legi la antaŭparolon, kiun mi verkis por 260-paĝa libro, kiun mi tradukis. Mi ankaŭ komunikas al vi kopion de letero, kiun mi sendis al iu "ateisto", Stalinano, kiu estas certe pli etcerba ol multaj deistoj. Cetere, la sola esp-isto, kiu konsentas rilati kun mi ĉi tie estas iu katoliko; sed mi kredas, ke li ne estas

tute ortodoksa. Cetere, vi eble rimarkis, kion mi skribis el Madrido (letero 19-a) pri "preĝejoj bruligitaj". Mi do ne bezonas insisti, por ke vi komprenu mian starpunkton tiurilate. Sed eble menciinda al vi estas la fakto, ke mia kvarjara konduto tolerema kun pastro dum la mondmilito havis kiel rezulton, ke li perdis la kredon kaj ĉe la malmobiliziĝo li denove ne vestis sin per sutano kaj provis akiri vivrimedojn aliel ol per pastreco. Bedaŭrinde li malsukcesis, mizeriĝis kaj post 6 aŭ 7 monatoj iris al la episkopo pente kaj petante absolvon. Li ricevis postenon kiel kapelpastro en monakinejo. Tiam mi ankoraŭ korespondis kun li kaj eĉ foje havis lian viziton en Parizo. Li klarigis al mi, ke li ne retrovis la kredon, sed estis devigita denove surmeti sutanon. Li aldonis, kun la celo pravigi sin antaŭ miaj okuloj, ke en sia nova posteno li ne bezonas varbi al sia religio, ĉar ja la monakinoj estas ĝismedole kredantaj, kaj sekve li faras sian pastran laboron, kvazaŭ kontraŭmilitisto, kiu laboras en fabriko, kie oni produktas armilojn. Mi ne riproĉis al li, nek kritikis lian konduton, sed li sentis, ke tamen mi ne aprobas lian konduton kaj iom post iom li ĉesis rilati kun mi letere.

Sed pli menciinda estas la fakto, ke li perdis la kredon ĉefe pro tio, ke li povis observi ateiston, t.e. min, kies konduto estis eĉ kelkrilate pli bona ol tiu de kelkaj el liaj kolegoj (en la ambulanco estis 13 pastroj). Kompreneble ni multe diskutis, senpasie, kun la sola celo trovi la veron. Mi legis librojn, kiujn li rekomendis al mi, kaj li same legis miajn preferatajn aŭtorojn. Li konfesis al mi la perdon de sia kredo nur kiam finiĝis la milito kaj ĉe aŭdo pri baldaŭa

malmobiliziĝo. Notu, ke tiu pastro, antaŭ la milito, estis la sekretario de episkopo kaj tiam en bona situacio por fariĝi mem episkopo post pli-malpli longa tempo. Kredulo povus pensi, ke la diablo punis tiun pastron, pro tio, ke li konsentis amike rilati kun ateisto. Sed mi opinias, ke se mi mem estus maltolerema, insultema ktp. neniel mia tia konduto povus efiki malkredige sur tiun pastron.

Kvankam mi ne kredas je la ekzisto de dio, tamen jam de kelkaj jaroj mi ne plu nomas min ateisto. **Nei** la ekziston de dio **estas ia kredo. Nei** ja estas **aserti**. Sed estas evidente, ke la Dio el la Biblio ŝajnas al mi vera monstro, neniel adorinda. La tuta **Malnova Testamento** parolas preskaŭ nur pri la kolero, venĝemo, murdado de la "Eternulo Cebaot". Estas al mi evidente, ke tian monstron elpensis la tiamaj hebreoj mem. Nu, mi sufiĉe babilis pri tiu temo..."



# EL LA NOTLIBRO DE LI-ŜI

Meksiko, 29-5-41

1. Volupto estas ia spiro - aŭ ŝvito de la eterna plasmio universala.
2. Vi ne amas vir(in)on, se vi ne kapablas senti specialan plezuron ĉe la penso, ke li-ŝi nun ĝuas volupton en alies brakoj.
3. Ho! plifortiĝas mia amo al mia amat(in)o ĉe la ekscio, ke li-ŝi povus sentigi volupton al tiu bonkora kriplul(in)on.
4. Mi preferus morti pro malsato, ol partopreni festenon, al kiu mi ne estis invitata...
5. Vi malsatas kaj ne mi, tamen mi konsentas volonte doni al vi manĝaĵon. Virino kaj ne viro kapablas fari tian komplezon. El tio oni do povas konkludi, ke la virino superas la viron.
6. Vera amo gea ĉiam entenas amoron, sed ne ĉiu amoro entenas amon.
7. Amoro povas esti arto el la plej delikata kaj subtila speco, sed en tiu fako artistoj ankaŭ estas malmultaj.
8. Gravediĝo estas ia absceso de la universala plasmio. Kaj ju pli da arteca amoro, des malpli la universala plasmio malsaniĝas.
9. Ne ĉiu palato povas ĝue gustumi ĉampanon; ne ĉiu vizitanto de la insulo Citereio kapablas ĝuadi ties belaĵojn kaj ravan klimaton; ne ĉies oreloj taksas ĝuste muzikaĵon de Betoven; ne ĉiu cerbo kapablas kompreni filozofion; ne ĉiu

mistikemulo sukcesas atingi ekstazon. Kiu posedus ĉiujn tiujn kapablojn, tiu estus dio.

10. Ekstazo estas ia senalkohola ebriaĵo, ia senseksa volupto, ia sencerba penso, ia senorgana vivo nepersona.

11. – Ĉu via konscienco riproĉas al vi?

– Ne!...

– Kiel do vi zorgas por ke neniu eksciu pri via faro?

– Tial ke mi timas malaprobon de miaj konatoj.

– Sed ĉu ili mem ne agus same kiel vi en samaj kondiĉoj kaj cirkonstancoj?

– Mi kredas ke jes...

– Vi do ĉiuj estas hipokrituloj...

12. Bestoj ne ebriiĝas, ne falas en ekstazon, sed ili povas sperti volupton. Bedaŭrinde por ili – aŭ feliĉe – ili ne kapablas rezonadi pri ĝi.

# PAROLADO ĈE RADIOSTACIO

## X.E.W.I

Meksiko, 31-5-41

Estimataj geaŭskultantoj,

En mia antaŭa babilado mi konigis al vi, en ironia formo, mian spiritostaton tiaman. Ĉu vi ĉiuj ĝuste komprenis? Estas dube. Ne sufiĉas esti samlingvanoj, por ĉiam perfekte interkompreniĝi. Necesas plie, ke la parolanto kaj aŭskultantoj estu en la sama spiritostato kaj havu la saman intereson pri la temo. Tiaj kondiĉoj tre malofte ekzistas.

Aliflanke, oni devas scii, ke, krom se temas pri sciencaj aŭ teknikaj terminoj, la vortoj ne ĉiam havas tute precize la saman signifon. Lingvistoj instruas, ke la vera senco de vorto varias laŭ cirkonstancoj, laŭ la humoro de la parolanto kaj sekve ankaŭ laŭ tiu de la aŭdanto. Samaj aŭskultantoj povas do ne tute same kompreni la aŭditajn vortojn.

Eĉ rilate al teknikaj terminoj, povas okazi, ke homoj ne havas pri ili tute precize la saman komprenon. Ekzemple, ekzistas personoj, por kiuj la tempo pri rendezuo signifas iun difinitan horon, iun precizan minuton, dum por aliaj, temas nur pri malpreciza momento en la mateno, tagmezo aŭ vespero. Ne ĉiuj homoj ja alvenas akurate ĉe kunveno aŭ rendezuo. Kaj horaro de fervojo havas precizan signifon por pasaĝeroj, nur se la trajnoj foriras je la difinita tempo.

Kelkparte mi parolis ironie, kaj vi scias, ke la ironio

konsistas en tio, ke oni diras la malon je tio, kion oni pensas. Jen stranga esprimmaniero, ĉu ne? Sed konvenas ne forgesi, ke etimologie, la vorto ironio havas demandan signifon. Kiam mi diris mian emon dizerti el Esperantio kaj reiri en mian patrimon, Normandio, por tie bataladi, por ke ĝi liberiĝu el la jugo de Francio kaj akiru sian noblan sanktan suverenecon, tio iel signifis demandi vin: "Ĉu tiel mi faru?"

Personoj, kiuj ne scias tion, kio estas Esperantio kaj kiuj batalis mem por la sendependigo al sia naskiĝlando, ekz-e, Irlandanoj, Ĉekoj, Poloj, Araboj, Koreoj, k.a., tiuj certe ne komprenus la ĝustan sencon de miaj paroloj kaj sen heziti ili pensus: "Certe! li devas reiri en sian patrimon, se li havas oportunon." Sed malnovaj esp-istoj, kiuj konas min persone aŭ per miaj skribaĵoj, ne povus kredi, ke tion mi fakte emis fari.

Tio klare pruvas, ke la ĝusta signifo de parolo dependas de diversaj cirkonstancoj. Se estas aŭdintoj de mia antaŭa parolado, kiuj miskomprenis ties kelkajn partojn, ili do bonvolu memore noti, ke neniel mi intencas dizerti el Esperantio.

Vere ne mankas tialoj, kiuj povas vekti dubon en nia spirito kaj nutri pesimismen en nia animo pri la sukcesblo de mondlingvo. Sed oni ankaŭ povas trovi esperigajn motivojn. Verŝajne, en la komenco de sia partopreno en nia movado, ĉiu esp-isto havis pli-malpli forte la iluzion, ke nia lingvo rapide disvastiĝos. Kaj, post kelkaj jaroj, ĉe la konstato, ke la granda publiko tute ne atentis aŭ eĉ mokas nian aferon, multaj seniluziigis kaj forlasis la movadon.

Ĝenerale, la personoj, kiujn interesas nur la lingva flanko

de la esp-a afero, tiuj ne restas al ĝi longe ligitaj. Mi aludas al tiuj filistroj, kiuj lernis nian lingvon, nur pro motivoj profitcelaj.

Ĉe tia konstato mi jam delonge konvinkiĝis, ke la disvastiĝo de sennacieca lingvo povas okazi nur paralele al la aliĝo de la homa menso. Por mi estas klare, ke **la nuna freneza stato de l' mondo kaj la indiferento de l' publiko por nia afero havas la saman kaŭzon.**

La homa menso estas ia komplekso el du ĉefaj tendencoj: unu estas **mistike spekulativa** kaj la alia **racieca**. Mi kredas, ke ĉi tiu lasta tendenco pli kaj pli malvolviĝos malprofite al la unua, kaj tiel pli kaj pli taŭgiĝos la grundo, por la dissemado de la esp-aj grajnoj. La scienco kaj ĝiaj teknikaj aplikoj influas ja favore al la malvolviĝo de la racieca tendenco. Sed oni devas ne malatenti la fakton, ke, ekster sia fako, eĉ scienculo povas esti superregata de la mistike spekulativa tendenco.

Malgraŭ ĉio ni povas esperi, ke en pli-malpli longa tempo post kelkaj generacioj, la racieca tendenco superregos en la cerbo de multaj milionoj da homoj kaj tiam rilate al la lingva problemo, ili alprenos la racian solvon, kiun proponas la esp-istoj.

Kiel povus nuntempe progresi rapide nia movado, kiam lingvistoj, fakuloj, ancorau skribas dikajn librojn, por "pruvi, ke artefarita lingvo estas kimera afero? Ni ĉiuj tamen scias, ne spekulative sed **laŭsperte**, ke tia sciencula, sed ne scienca aserto estas ega sensencaĵo.

Sed tio ne signifas, ke tiuj lingvistoj ĉiel eraras en siaj fakaj studoj. Ekz-e, mi tute samopinias kiel ili, kiam ili diras,

"ke lingvo fidele spegulas la apartan karakteron de l' popolo, kiu ĝin parolas, kaj aliflanke, ke ĝi reagis laŭ decidiga maniero sur la malvolviĝo de la spirito de tiu popolo".

Estimataj gesamideanoj, mi deziregas, ke tiu aŭtoritata diro engravuriĝu en la cerbo de ĉiuj esperantistoj; mi ŝatus ke ĉiu el ili spertu mem per sia propra eksperimento la pravon de tiu aserto.

Kompreneble, tian eksperimenton povas fari nur ĝismedolaj esp-istoj, t.e. homoj, kiuj praktikadas nian lingvon ĉiutage, kaj ne simplaj diletantoj. Almenaŭ mi mem povis konstati, ke la praktikado de la sennacieca lingvo kondukis min al klara kompreno pri problemoj, kiuj neniam ricevos taŭgan solvon, ĝis Esperantio estos fariĝinta jura konkretaĵo.

Se Hitler estus praktikinta esp-on, ekde sia junaĝo, mi asertas, ke li ne estus Hitler... Kaj se Ĉeŭrĉil ne estus konvinkita, ke la angla lingvo devas fariĝi la mondlingvo, kaj ke ĉiuj popoloj devas esti pli-malpli dominioj de la anglolingvaj ŝtatoj, t.e. Britio kaj Usono, li ankaŭ ne estus... Ĉeŭrĉil.

La francoj ankaŭ iam pensis, ke ilia lingvo fariĝos internacia; ĝis antaŭ duonjarcento la francan lingvon ja uzis ĉiuj diplomatoj kaj nur la franca teksto de la kontraktoj internacioj havis juran valoron. Forpasis tiu tempo!...

Dume, en Ĉinio kaj Japanio oni lernas kaj praktikas esp-on. Tie aperas esp-aj gazetoj kaj libroj; embrie vivas nia afero ĉe la flavhaŭtaj popoloj, kiuj en la estonto ludos pli kaj pli gravan rolon en mondpolitiko... Ŝajnas al mi tute racie pensi, ke tiuj popoloj iam rifuzos akcepti eŭropan lingvon nacian, kaj alprenos la racian esp-on sennaciecan.

Kiel mi diris komence, se ne mankas malkuraĝigaj motivoj, ankoraŭ ekzistas aliaj, esperigaj. Mi pensas, ke pesimisma spiritostato estas bedaŭrinda, se ĝi malebligas agadon: sed blindeta optimismo iel estas danĝera; tial ke eventuala malsukceso povas forblovi ĉe entuziasmaj optimistoj ĉian agemon pluan. Optimistoj, ekz-e, sin turnis al la Ligo de Nacioj, por atingi alprenon de esp-o. Vanaj klopodoj! naiva espero: esp-o sukcesos nur per la espistoj mem...

Nia plej grava tasko nuna estas teni nian lingvon viva; estas lertiĝi en ĝia uzado. Eĉ Hitler kaj Stalin ne povas malebligi tion. Tiuj tiranoj ne kapablas tute malhelpi, ke en la landoj, kie ili perfortas, esp-istoj parolu hejme en nia lingvo, traduku librojn, pensu, preĝu en esp-o. La estonto dependas de la estanta embrio, kiun konsistigas la nunaj esp-istoj, disaj tra la tuta mondo.

Per laŭcela praktikado de nia lingvo oni kvazaŭ eniras novan mondon, novan vivon, kaj spertas specialan, ne facile klarigeblan plezuron de la konscienco, ĉe la penso, ke oni ne havas respondecon en la internaciaj frenezaĵoj, kiuj faras el la tero inferon.

Karaj gesamideanoj! ni persiste penadu per ĉiuj fortoj fariĝi ĝisostaj, ĝismedolaj esp-istoj kaj ni tiel boncele uzos nian tempon kaj energion. Kiuj volas konstrui pacan mondon kaj ignoras esp-on, tiuj similas al infanoj, kiuj marborde faras konstruojn el sablo.

Hardiĝu nia volo, fervoriĝu nia koro kaj ne laciĝu niaj manoj, por hisi kiel eble plej alten la verdan standardon...





# TRIA PAROLADO ĈE RADIOSTACIO X.E.M.I.

Meksiko, 9-8-41

Estimataj gesamideanoj,

Jam forpasis pli ol du monatoj, de kiam mi babilis antaŭ ĉi tiu aparato. La temo de mia antaŭa parolado estis niaj lingvo kaj movado.

Hodiaŭ mi priparolos la saman demandon, tial ke ĝi estas plurfaceta.

Mi diris, ke ne mankas motivoj por esti pesimista rilate al la finvenko de nia afero. Sed oni eĉ povas argumenti, ke dio, almenaŭ tiu de la [Malnova Testamento](#), ne volas, ke ekzistu nur unu sola lingvo. Por pravigi mian diron, mi malfermu la Bibliion. Sur la paĝo 12-a de la esp-a eldono oni ja povas legi jenon:

"1. Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero. 2. Kaj kiam ili ("la gentoj de la filoj de Noa") ekiris de la oriento, ili trovis valon en la lando [Ŝinar](#) kaj tie [ekloĝis](#). 3. Kaj ili diris unu al la alia: Venu, ni faru brikojn kaj ni brulpretigu ilin per fajro. Kaj la brikoj fariĝis por ili ŝtonoj, kaj la bitumo fariĝis por ili kalko. Kaj ili diris: Venu, ni konstruu al ni urbon kaj turon, kies [supro](#) atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero. 5. Kaj la Eternulo malleviĝis, por vidi la urbon kaj la turon, kiujn konstruis la homidoj. 6. Kaj la Eternulo diris: Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj jen, kion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari. 7. Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la

parolon de alia. 8. Kaj la Eternulo disigis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero, kaj ili ĉesis konstrui la urbon. 9. Tial oni donis al ĝi la nomon Babel, ĉar tie la Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta tero kaj de tie la Eternulo disigis ilin sur la supraĵon de la tuta tero."

Sofisto povus rebati, ke la esp-istoj ne celas atingi, ke la homoj havu nur unu lingvon, sed male, ke estu unu plia, tiel ke ĉiu homo havu sian gepatran lingvon nacian kaj krome esp-on. Tia certe estas la starpunkto de la granda plimulto da esp-istoj. Ja, nur la malmultaj sennaciistoj deziras, ke nia lingvo fariĝu la unika kaj ke la naciaj lingvoj arkaikiĝu kiel la sanskrito, la latino k.a. Sed eĉ la ortodoksa starpunkto de esp-istoj, kiuj tamen celas, ke ĉiuj homoj sur la tero povu interkompreniĝi, estas neniel pravigebla antaŭ la okuloj de la Biblia Eternulo: li ja konfuzis la tiaman unikan lingvon, por ke la homoj ne plu povu interkompreniĝi, por ke ili ĉesu fari konstruon, kiu ebligus al ili eniri la ĉielon.

Ŝajnas al mi tute evidente, ke la Eternulo volas, ke la tero estu ia infero, kaj por atingi tion, li opiniis, ke unu el la plej bonaj rimedoj estas la ekzisto de multaj lingvoj kaj sekve la neeblo por ĉiuj homoj interkompreniĝi. La plej subtila ekzegezisto neniam sukcesos antaŭ miaj okuloj tiri alian konsekvencon el la citita teksto.

Estimataj geaŭskultantoj, koncerne la temon, vi aŭdis la dirojn de Moseo en la **Genezo**. Nun mi konigu al vi la opinion de la kredantoj je la biblio laŭ Karlo Marks. Unuapense oni povus kredi, ke la t.n. komunistoj el la Moskva eklezio devas nepre favori la esp-an aferon. Grava eraro!

En la jaro 1932, "Tezoj pri Internacia Lingvo" estis

akceptitaj de la popolkomisario de klerigo, en Moskvo. Ili aperis en "La Nova Etapo", kajero tria, revuo, kiu tiam estis eldonata en Sovetio. La teskto plenigas 3 paĝojn de la menciita gazeto kaj sekve ne eblas, ke mi tute legu ĝin al vi. Almenaŭ necesas, ke mi diru, ke tiuj tezoj havas kiel bazon jenan eldiron de Stalin: "... la naciaj lingvoj devos neeviteble kunfandiĝi en unu komunan lingvon..."

Per kia miraklo tiu kunfandiĝo okazos? vi eble demandas vin. Tian demandon mi ne povas respondi, tial ke en la tezoj mankas ĉia klarigo pri tio. Sed ŝajne ties verkintoj havas neniun dubon, ke tiel okazos, ĉar ili konkludas jene:

"La kunproksimiĝo de naciaj lingvoj, kiu kondukos al unu monda lingvo, okazas sendepende de esperanto."

Cetere, Lenin mem estis kontraŭulo de nia lingvo, kiel asertis lia fratino, J. Uljanova, dum 1930 en rusa revuo. Kaj al la urbestro el Stokholm, Karl Lindhagen, kiu dum konversacio provis interesigi la faman bolŝeviston pri esp-o li respondis: "Ni jam havas tri mondlingvojn kaj la rusa estos la kvara."

Rilate al la opinio, ke la naciaj lingvoj iam kunfandiĝos en unu solan, eble utilas rimarkigi, ke ne estas videbla ia ajn signo pri tio. Estas vere, ke samaj terminoj, sciencaj kaj teknikaj, eniras la vortaron de ĉiuj naciaj lingvoj, sed tio neniel influas sur ilian strukturon kaj karakteron. Ekzistas eĉ tendenco "purigi" la naciajn lingvojn je ĉio fremda. Sekve, la opinio, ke iam la naciaj lingvoj kunfandiĝos estas absolute fantazia kaj povus okazi nur per ia miraklo.

Sed la apero de la Staline ortodoksaj tezoj havis kiel rezulton, ke en Sovetio la floranta esp-a movado velkis iom

post iom, tiagrade, ke "La Nova Etapo", en kiu ili estis publikigitaj, jam de longe mortis. Sovetlanda Esperantista Unuiĝo ĉesis funkcii kaj la esp-a movado en Stalinio eniris katakomban periodon. La verda standardo ne plu flirtas en Moskvo...

Kaj nun ni rigardu al Berlino. En 1935 aperis en **Germana Scienco, Eduko kaj Popola Klerigo**, oficiala organo registara, jena klarigo pri nia afero: "La zorgo pri artefaritaj mondlingvoj kiel esperanto ne havas lokon en la nacisocialista ŝtato. La uzado de tia lingvo kaŭzas malfortigadon al la esencaj valorajoj de la popola karaktero..."

Kaj la 20-an de junio 1936 la supera komandanto Himler dekretis: "...la kreo de internacia mikslingvo kontraŭas la principojn de l' nacisocialismo kaj sekve ĉiuj artlingvaj organizoj estas nedezirataj kaj devas likvidiĝi..."

Ĉu do ni miru, ke en tiaj kondiĉoj nia afero stagnas? Miriga estus la malo. Kaj tial mi diris en mia antaŭa parolado, ke ne mankas motivoj pesimisme influaj. Tamen mi certigas al vi, ke malgraŭ ĉio mi sentas min kore kaj anime ligita al la esp-a movado. Mi eĉ ne plu starigas al mi la demandon, ĉu esp-o venkos aŭ ne? Por mi ĝi jam venkis, ĉar de kvin jaroj mi vivas en Esperantio, en tiu senco, ke mi rilatas nur kun esp-istoj. De Narvik ĝis Velington (Nov-Zelando), de Paris ĝis Tokio, ĉie en mia migrado mi povis elturniĝi, dank'al la helpo de esp-istoj. Mi akiris geamikojn en ĉiuj mondpartoj kaj spertas, ke la Hitleranoj estas pravaj, kiam ili diras, ke la praktikado de artefarita, do sennacieca, lingvo povas nur difekti la naciecon ĉe ties uzantoj.

Jes ja, por mi esp-o jam venkis, kaj iafoje mi pensas, ke ne estas dezirinde, ke ĉiuj homoj lernu ĝin. Tion faru nur idealistoj, kiuj kapablas kompreni kaj ŝati la **internan ideon** Zamenhofan. Sed de tiaj homoj ekzistas milionoj kaj milionoj, kiujn ni ne ankoraŭ sukcesis varbi. Sekve, vasta estas nia kampo, kiam revenos pli favoraj cirkonstancoj ol nun.

Dume, karaj gesamideanoj, mi vokas al vi, por ke ĉiutage vi praktikadu nian lingvon dum pli-malpli longa tempo. Nuntempe la esp-istoj estas kvazaŭ grajnoj, kiujn oni devas teni bonstataj, ĝis la venonta semtempo. Ni esperu, paciencu kaj persistu. Ĝis!...

esperu,

**E. LANTI.**

# EL LA NOTLIBRO DE ALFESTO

13-9-41

1. La homo inventis la biciklon kaj per ĝi plirapidigas sian iradon. Sed kiam la inventinto mem sidas sur sia propra elpenŝaĵo, tiam li fariĝas kvazaŭ sklavo de ĝi kaj nepre devas obei al specialaj leĝoj biciklaj.

2. Per si mem esp-o estas simple interkomprenilo, kaj oni praktikus ĝin nur kun samnacionoj, ĝi neniel difektas la nacian senton ĉe ties praktikantoj. Sed tia uzado estas sencela, ĉar samnacionoj ne bezonas sennaciecan lingvon por interkompreniĝi.

Zamenhof elpensis sian lingvon por faligi la barojn, kiuj apartigas malsamnacionojn. Kaj naciisto povas prave timi, ke longdaŭra kaj laŭcela praktikado de tia lingvo difektos la nacian senton de la esperantistoj.

3. La kanonoj ne havis kiel **celon** malaperigi la feŭdan reĝimon; tamen ilia uzado havis tiun rezulton, tial ke la fortikaj kasteloj de l' feŭdaj nobeloj ne povis rezisti kontraŭ kanonado.

Similan rolon ludas aeroplanoj kaj esp-o rilate al la naciaj reĝimoj.

4. Naciista esp-isto aspektas antaŭ miaj okuloj kiel kuracisto, kiu receptus malbonefikan medikamenton por paciento.

5. Estas malprudente eldiri tiajn ideojn, sendube pensos kelkaj legantoj. Eble!... Tamen oni bonvolu prikonsideri jenajn faktojn: 1) la granda publiko indiferentas al nia afero; 2) la personoj varbitaj nur pro pure lingva motivo ĝenerale ne restas ligitaj al la movado, tial ke baldaŭ ili spertas, ke per esp-o oni ne povas akiri materian profiton; 3) restas fidelaj kaj estas agemaj nur tiuj, kiujn kvazaŭ infektis la "interna ideo" Zamenhofa.

Nu, estis tiu **internideismo**, kiu savis esp-on en kriza tempo. Oni ja neniam devas forgesi, ke la aŭtoro de **ido**, De Bofron, estis unu el la unuaj, kiuj malaprobegis tiun Zamenhofan koncepton. Kaj esp-o venkis ne pro sia supereco, sed tial ke jam ekzistis sufiĉe forta kerno el pioniroj, kiuj, pli-malpli konscie, estis ligitaj kaj inspiritaj de la menciita ismo.

6. Ni ne ĵetu perlojn antaŭ porkojn. La interideismo ne taŭgas por la popolamaso kaj mi ne volus eldiri miajn pensojn en **nacia lingvo**.

Sed ekzistas malgrandaj rondoj, kiuj povas facile akcepti la latentan enhavon de **sennacia lingvo**, tial ke ili havas similan idealon al tiu de nia Majstro, kaj kiuj bedaŭrinde ankoraŭ ne komprenis, ke por labori efike al la tutmonda interfratiĝo necesas **unue** fordetrui la lingvajn barojn.

7. Antaŭ konservativa publiko oni ne mensogas, dirante, ke esp-o estas absolute neŭtrala, ke ĝi povas esti utiligata por bonaj aŭ malbonaj celoj.

Tiu aserto tamen neniel signifas, ke la **praktikado** de sennacia lingvo inter **malsamnacianoj** ne difektos ĉe ili la naciecan senton.

8. Alkoholo estas senefika – neŭtrala – kiam ĝi restas en botelo kaj tamen konservas sian ebrigecon.

Kiu lernis esp-on kaj ne praktikas ĝin, tiu iel similas al persono, kiu posedas ebrigan likvoron kaj ne trinkas ĝin. Kaj neesp-isto, kiu celas interfratigi malsamlingvanojn, similas al homo, kiu tenas puran akvon en botelo sur kiun li gluis etiketon kun jena surskribo: **eliksiro**.

9. Celi la pliboniĝon de naciaj lingvoj estas same malsaĝe, kiel deziri la humaniĝon de l' milito. Ĉina pliboniĝinta lingvo restos tamen ĉina kaj uzebla nur de ĉinoj, dum simpla, racia, sennacia lingvo estas uzebla de ĉiuj homoj.

10. Esperantisto, kiu celas plibonigi naciajn lingvojn, similas al kuracisto, kiu konus nepre efikan medikamenton kaj tamen preferas preskribi paliativojn.

11. Celkonscia kaj sincera mondlingvano povas nur bedaŭri, ke naciaj lingvoj estas lerneblaj de diversaj nacioj kaj sekve deziri, ke tiaj lingvoj fariĝu pli kaj pli komplikaj kaj pli malfacile lerneblaj.



12. Ĉe multaj ne tre spertaj esp-istoj la nacieco sin venĝas per tio, ke ili senkonscie uzas en nia lingvo naciecajn esprimojn.

Cetere, por perfekte, senmanke scipovi esp-on, necesus esti forgesinta sian gepatran lingvon.

**E. Lanti.**

(Tiu artikolo aperis en "**Satana Bulteno**", n°6, novembro 1941)

# MONOLOGE

12-11-41

Kiom kruelaj, senkompataj, estas la germanaj militistoj! Se unu el ili estas mortigita en Francio, tiam ili pafmortigas 100 francojn...

Ho jes!... Sed ĉu **bona** soldato povas esti sentema, kompatema? Ĉu ne estas tute normala lia penso, ke la vivo de unu sola samlandano lia pli valoras ol tiu de ĉiuj fremduloj?...

Jes, certe! Tiel devas pensi lojala, **konsekvenca** patrioto...

Pli kruela kaj eĉ nedireble naŭza ŝajnas al mi la faro de kiu frapas sian malamikon en la dorson, sciante, ke tio kaŭzos la morton de 100 senkulpuloj...

Nur spionoj en la servo de Ĉeŭrĉil aŭ de Stalin kapablas tion fari...

Kaj la fakto, ke ekzistas tiaj "homoj", igas min honti pro mia aparteno al la homa gento...

**E.L.**

# MIELPIPRE

Novembro 1941

1. La distanco, kiu apartigas honestan revoluciulon de demagogo estas same granda kiel tiu ekzistanta inter sincera filozofa kaj lerta sofistoj.

Kaj tia distanco estas malfacile mezurebla.

2. Du specoj da motivoj ĝenerale instigos homon agadi: 1) persona ambicio aŭ famavido; 2) plena sinoferemo al iu nobla celo.

Iafoje okazas, ke persona ambicio koincidas kun la intereso mem de la afero kaj tiam ambiciulo tre efike agadas. Sed ne ĉiam tia koincido ekzistas kaj tial ulo instigata nur de ambicio estas latente malbonfarema.

3. "Ne juĝu, se vi ne volas esti juĝata". Bona konsilo, sed absolute neaplikebla: se mi vidas homon, kiu ne agas konforme al tio, kion ĝi opinias bona kaj alcelinda, mi ne povas ne pensi, ke ĝia konduto estas mallaŭdinda. Sekve, mi juĝas.

Sed mia juĝo ne signifas nepre kondamnon.

4. Neniu povas vekti ĉies simpatian. Nu, verdire, mi ne bedaŭras la mankon de tiu kapablo: estus al mi iel neagrabla sperti la simpatian de nesimpatia persono.

5. Kio estas meritinda en homaj interrilatoj, tio estas la glataj rilatoj inter homoj, kiuj ne sentas reciprokan simpatian. Sed neniel, nenial mi volus esti ŝulda al persono, kiu ne havas simpatian al mi.

6. Ili estas bonaj, afablaj homoj, okaze helpopretaj al vi kaj tamen vi ne emas rilati kun ili. Kial do?

– Tial ke ili kvazaŭ konsistigas la paston, kiun knedas registoj kaj regaspirantoj kaj tiel senkonscie helpas al tiuj lastaj por fari el la tero inferon; ili estas el la speco de tiuj, kiuj heroiĝas laŭkomande.

Patrioto povas esti bona homo kaj tamen mi vidas en li danĝeran ulon, kiu eble morgaŭ volonte mortigos homojn je la nomo de sia idolo patria.

7. La feliĉo estas iu subjektiva stato, kiu plej ofte **rezultas** de kaŭzoj neantaŭvideblaj, iafaje eĉ nekonscieblaj. Kaj tial ke ĝi estas **rezulto** de tiaj kaŭzoj, estas malsaĝe celi nur memfeliĉon.

8. Kiu deziras alies malfeliĉon, tiu tamen ne akiros mem feliĉon, se okazus laŭ ĝia deziro.

9. Kiel trompa estas la espero, ke per daŭra, profunda kaj sincera pripensado oni povas akiri komprenon pri la naturo, pri la universo! Laŭsperte mi scias, ke ju pli oni meditadas, des pli da neresponeblaj demandoj stariĝas.

Ĉe tia konstato ŝajnas al mi saĝe bildigi al si la vivon kiel nekompreneblan tragedi-farson. Kaj dependas de ni, ke la

farsa parto pliiĝu malprofite al la tragedia.

Tial mi emas kredi, ke la plejo de homa saĝo estas ridegi ĉe multaj okazoj kaj rideti eĉ ĉe plorindaj.

Kaj la pleja arto estas ridigi...

10. Se la plimulto de germanoj kapablas ridegi, kiam seriozmiene parolas Hitler kaj se la britoj farus same, kiam ili aŭdas la hipokritajn asertojn de Ĉeŭrĉil, tiam la nuntempa teatraĵo ne havus tragedian aspekton.

11. Eĉ la plej bonaj semoj ne povas doni abundan rikolton en malfekunda grundo; kaj la plej fekunda, ne produktos abunde, se mankas bonaj semoj.

Iam, ial verkis, **Iuelie**.

(Tiu artikolo aperis en "**Satana Bulteno**" n° 6, Novembro 1941)

# METAFIZIKE

## Respondoj

Al K-do Medamoto – Via kompreno pri la signifo de la titolo de nia anĝela gazeteto estas erara; ĝi tute ne signifas: "organo de satanoj", kiel vi supozas kaj plie la titola vorto "Bulteno" ankaŭ havas tute specialan sencon. Jen estas la ĝusta klarigo: **satano**, ano, kiu satas je ĉia mensogo kaj ĉia perforto kaj kiu malsatas veron kaj pacon; **bulteno**, teno de bulo. La satanoj ja tenas bulon el vero, espero, persisto kaj amo, kaj tia bulteno donas al ili forton, kuraĝon, bonhumoron kaj iel ŝirmas ilin kontraŭ la danĝeroj de la granda frenezulejo, en kiu ili estas devigataj vivi...

Tia estas la vera, saĝa, ĝusta, scienca, ktp., difino pri la titolo de nia organo. Almenaŭ tiel komprenas ĝin **Belinero**.

(Tiu ŝerca artikoleto de **Lanti** aperis en "Satana Bulteno", n°6, nov. 1941, eldonita en Los Angeles, Kalifornio).

# PRI JAPANIO

## Post okdek jaroj.

En letero, skribita en Japanio, la 29-an de julio 1937, mi diris, interalie, "...la sorto de l' homaro por 50-60 jaroj armile decidiĝos en Pacifiko dum pli malpli proksima estonto...". La 7-an de decembro 1941 komenciĝis la efektiviĝo de tiu antaŭdiro. Tamen la legantoj ne kredu, ke mi pretendas esti profeto. Tute ne! Ĉiu observkapabla homo, kiu konas iom la historion pri Japanio, povus diri la samon. Ni ekrigardetu al tiu ankoraŭ mistera lando, kiu mirigas nun la tutan mondon.

Laŭdire, en la fino de l' 13-a jarcento la italo Marko Polo vizitis Japanion. Li raportis, ke la lando estas tre malofte vizitata de negocistoj, ke la loĝantoj estas "paganoj kulturitaj kaj bonaspektaj", ke tie abundas oro, kies eksportado estas malpermesita, kaj ankaŭ perloj.

Tia aserto estis sufiĉa, por veki ĉe eŭropaj aventuristoj la emon "eltrovi" Japanion. En la 14-a kaj 15-a jarcentoj senĉese blankuloj venis al japanaj insuloj. Kaj inter 1549 kaj 1612 portugalaj kaj hispanaj misiistoj provis tie propagandi la katolikismon. Ili bone sukcesis, ĉefe en la sudaj insuloj Kjuŝu kaj Ĉugoku. En 1582 Itoo Joŝitaka estis sendita al Romo por tie viziti la papon. Li estis la unua japano, kiu venis en

Eŭropon. Sed poste okazis, ke fanatikaj katolikoj bruligis kelkajn budaistajn templojn, kaj estis eltrovite, ke inter la "misiistoj" estis spionoj aŭ agentoj de fremdaj landoj. Tiel, en 1587, la tiama ŝoguno Hidejoŝi malpermesis la propagandon de la kristanismo kaj forpelis la misiistojn. De tiam neniu japano rajtis forlasi la landon kaj estis malpermesite konstrui ŝipojn, kapablaj navigi tre malproksime for de l' marbordo. Nur la ĉinoj rajtis veni en la landon. Tamen estis permesite al nederlandanoj resti kiel negocistoj en iu sola insulo izolita apud Nagasaki. Ili devis plie kraĉi sur biblion kaj treti krucifikson, kiel pruvon, ke ili neniel celas propagandi la kristanismon. Tiel dum **du jarcentoj** Japanio estis "Ermita Nacio"...

Sed iun nebulan matenon de julio 1853, la usona admiralo M.C. Peri kun **kvar militŝipoj** proksimiĝis al la Jedogolfeto. Li portis proponon por komercaj rilatoj inter Usono kaj Japanio. La tiama ŝoguno Ijejoŝi ne malakceptis la proponon sed petis tempon por pripensi la aferon. La vido de la grandaj kanonoj surŝipaj tre forte impresis la japanojn kaj la postan jaron, kiam revenis Peri – tiun fojon kun **dek ŝipoj** – por havi al la peto farita, respondon, tiam ĝi estis jesa; la du havenoj Ŝimoda kaj Hakodate estis malfermitaj al la usonaj ŝipoj.

Intertempe la franca fregato **Konstantino** estis bombardinta kaj detruinta du japanajn fortikaĵojn. Nur mallongan tempon post Usono, Britio ankaŭ akiris similan kontrakton komercan; poste Rusio, Francio kaj Nederlando same. En julio 1858, la unua ĝenerala konsulo usona skribis en sia notlibro: "Hodiaŭ mi hisigis la unuan flagon konsulan,



kiu iam estis videbla en ĉi tiu lando. Grave pripensiga fakto. Aliĝo plena je konsekvencoj. Kredeble ĝi signas la finon de malnova periodo kaj la komencon de nova..." Kaj la unua vicambasadoro angla en Japanio skribis: "Japanio... ia polvo el insuloj, kiuj etendiĝas oriente ĝis la limoj de la horizonto kaj loĝataj, ŝajne, de groteska kaj sovaĝa raso". La opinio de rusaj kaj francaj konsuloj ne multe diferencis je tiu de la angla diplomato.

La usona konsulo pli saĝe intuciis la gravajn konsekvencojn de la malfermiĝo de lando, kiu dum du jarcentoj, **per la volo** de siaj regantoj, restis ferma al la okcidenta influo. Sed la reganta klaso japana estis ekkompreninta, ke por rezisti al la "barbaroj" el okcidento necesas kelkrilate ilin imiti. Tial, jam en 1855, fondiĝis lernejoj, en kiuj estis instruataj ne nur lingvoj el Eŭropo sed ankaŭ la tiea scienco kaj tekniko. Plie, multaj junuloj japanaj iris al Eŭropo kaj Usono, por tie studadi kaj observadi...

En la mezo de la antaŭa jarcento Japanio estis loĝata de 26 milionoj da homoj, kaj tiu nombro estis jam atingita ekde unu jarcento. Ĝi signis la maksimumon de loĝantoj, kiuj povis vivi en la lando. Tiam la infanmortigado estas "higaeri" kaj "mabiku", kies signifo estas **liberiĝi, maldikigi** rilate al la kolektivo. Sed kiam la reganta klaso estis decidinta industriigi la landon, tiam la infanmortigado estis malpermesita kaj la loĝantaro kreskis laŭ proporcio je 31% jare. Tial ke nun en Japanio mem estas proksimume 70 milionoj da loĝantoj kaj en la tuta imperio, t.e. kun Koreio kaj Formoso, ne enkalkulanta Manĉukuon, estas proksimume 100 milionoj...

La rakontoj de Marko Polo pri la riĉaĵoj de Japanio estis tute fantaziaj. Fakte ĝi estas malriĉa lando, kie estas nek oro, nek fero, nek aliaj gravaj mintavoloj. Preskaŭ ĉiuj mineraloj posedataj de Japanio troviĝas en Koreio, Manĉurio kaj Formoso. Importado kaj eksportado estas jam de multaj jaroj nepre necesa vivrimedo por tiu superloĝata lando. Tial la japanaj varoj jam delonge komencis invadi la tutan mondon, tial ke pro la malalta vivnivelo de l' japana popolo ili estas produktataj tre malkare. En la malmulte industriigita kaj multe loĝata Ĉinio troviĝas vasta merkato. Sed Britio kaj Usono jam de multaj jaroj klopodas por ĝin monopoligi. Kaj la marioneto Ĉang-Kaj-Ĉek helpas en tio. Jam de pli ol kvar jaroj ĉinoj oferas sian vivon ĉefe por la interesoj de l' britusona plutokratio. Sed nun britoj kaj usonanoj devas mem partopreni en tiu fia ludo sangoplena. Okdek ok jarojn post la vizito de Peri en la **Lando de l' Sunleviĝo** la tieuloj venis siavice kun militŝipo viziti usonanojn kaj postuli, ke la mondmerkato estu malfermata al ili. Mi diris "postuli", tial ke jam delonge ili petis tion...

La postulmaniero estis tiel elokventa, ke ĝi mirigis la tutan mondon. Blankhaŭtuloj apenaŭ povis kredi, ke flavhaŭtuloj kapablas tiel lerte argumentadi. Nu, ne necesas esti profeto por antaŭdiri, ke ni eniras periodon, dum kiu oni vidos la rolon de l' blanka raso, kristanisme saturita, pli kaj pli malgraviĝi. La ĉinoj kaj hindoj ne estas malpli inteligentaj ol la japanoj kaj same kiel ili kapablas asimili la teknikan civilizon (mi ne diras **kultur**on, tial ke popolo povas esti tre civilizita teknike kaj tamen nekulturita) per kiu ĝis nun superregadis okcidentanoj. Se la blankhaŭtuloj ne kapablas

kompreni, ke la tuta tero devas aparteni senescepte al ĉiuj teranoj, ili riskas esti finfine superregataj de l' flavhaŭtuloj, kiuj estas la pli multaj sur nia planedo.

Mi ne estas fakulo rilate al militaj aferoj kaj sekve ne havas opinion pri la venkoŝancoj de Japanio aŭ de la anglosaksa plutokratio. Sed, eĉ se la japanoj malvenkus, tio ne ŝanĝus la donitojn de l' problemo. Iel aŭ aliel Ĉinio imitos – jam komencis – Japanion, t.e. alprenos la okcidentan teknikon. Grandega revolucio, plena je tre gravaj konsekvencoj, okazis lastatempe en la menso de l' ĉina popolo: ĝi fariĝis patriota, militema. En la pasinta tempo la ĉinoj rilatis al militistoj kun malestimo. En la ĉina lingvo la ideografo por signi banditon, ekzekutiston kaj soldaton estas la sama. Sed jam de pli ol kvar jaroj multaj ĉinoj "heroiĝis" kaj nun la soldatoj estas glorataj. Jes ja, grava, gravega revolucio!... Venos tempo, kiam la ĉinoj ne plu estos obeemaj al Usono kaj Britio. Oni ne devas forgesi, ke la hodiaŭaj aliancanoj povas esti morgaŭaj malamikoj. Dum la antaŭa milito Japanio batalis kontraŭ Germanion aliance kun Britio, Francio, Italio kaj Usono. Kaj nun...

Ĉe la ekscio, ke iam la infanmortigado estis grandskale praktikata en Japanio, kredeble kelkaj legantoj pensos, ke tio signas barbarecon. Sed racie pensanta homo povus rebati ke pli barbare estus permesi, ke ĵusa naskito senkonscia vivu dum pli-malpli longa tempo kaj poste mortu pro malsato kaj mizero. Almenaŭ mi povas atesti, ke en Japanio la infanoj estas bone traktataj, eĉ dorlotataj, kaj ke la lernejoj estas bone prizorgataj.

Japanio estis jam kulturita, kiam eŭropanoj vivis en sovaĝa

stato. Ankoraŭ nun la japanoj havas la senton, ke ili estas pli kulturitaj ol blankuloj, kiuj eniras siajn domojn kaj ĉambrojn kun ŝuoj ĉe la piedoj. La planko de japanaj domoj estas kovrita per matoj, kiujn neniam premas la plando de ŝuoj.

Pri la grado de kulturo de blankuloj kaj flavuloj mi mencias du faktojn, kiujn proprokule mi povis observi. En 1914, kiam eksplodis la milito inter Francio kaj Germanio, mi vidis en Paris popolamasojn, kiuj sovaĝe disrompis la vitrojn de butikoj kaj magazenoj, kies montrofenestroj surhavis germanaspektan nomon. Mi estis en Japanio, kiam komenciĝis la milito inter Ĉinio kaj Japanio. Nenie mi vidis nek aŭdis pri scenoj similaj al tiuj viditaj en mia naskiĝlando. Tiam en Japanio estis almenaŭ 50 000 ĉinoj. En la kvartalo, kie mi loĝis en Osaka, estis relative multaj restoracioj ĉinaj. En ili ĉio funkciis kiel en normala tempo.

Verŝajne kelkaj legantoj miros, ke mi, sennaciisto, parolas simpatie al la japana popolo. Ili pensos, ke male, mi devus senti nur abomenon por lando, kie la amo al la patrio atingis la plej altan gradon. Tamen ne aliĝis mia opinio, ke la patriotismo estas ia mensa malsano, ke la ekzisto de nacioj estas plago por la homaro. Sed mi penas prijuĝi racie kaj ne pasie, sente. Kaj tion farante, mi pli facile komprenas la donitojn de l' problemo: malriĉa, inteligenta, laborema popolo sufokiĝas en siaj malgrandaj insuloj dum tuta kontinento kiel Aŭstralio, ekz-e, havas apenaŭ 8 milionojn da loĝantoj, dum en la tuta Ameriko la loĝateco ankaŭ estas tre maldensa. Sed la nepre necesa ekspansio japana kolizias kun la Brit-Usona imperialismo. Ĉu, por solvi tiun problemon, la

japanoj, anstataŭ militi, devus reapliki la devigan infanmortigadon?

La Versaja kontrakto generis la hitlerismon; la egoista konkeremo de l' blanka raso generis la nunan situacion en la Pacifiko. Kaj tiel simile okazos tiom longe, kiom la riĉaĵoj el la tuta mondo ne estos je la dispono de ĉiuj homoj senescepte. Tiun aserton oni povas konsideri aksiomo. Ĉu la homoj iam kapablos ĝin kompreni kaj ties konsekvencojn tiri? Mi ne scias, kaj nun ne emas profetumi. Prefere mi diru, ke per laŭcela praktikado de esp-o ni devas jam nun penadi por akiri menson de mondcivitano. En Esperantio regu ia patriotismo planeda...

Per tia penado ni povas almenaŭ ĝui la senton, ke ni mem ne havas respondecon en la naciecaj frenezaĵoj nunaj – kaj estontaj.

**E. Lanti**, 15-12-1941.  
("Satana Bulteno", januaro 1942)

## PAROLAS FAMA VIRINO ĈINA

Temas pri la edzino de la ĉefgeneralulo Ĉang-Kaj-Ŝek. Meze de aprilo (1942), ŝi verkis artikolon, kiu aperis en la suplemento de "Sunday Times" (Usono). La originalan tekston mi ne legis kaj raportas laŭ ties hispanlingva traduko, kiu aperis en "Novedades" (Meksikio). Ĉiuj blankhaŭtuloj devus koni kaj primediti la dirojn de tiu inteligenta kaj klera persono, kiu bone konas Orienton kaj Okcidenton.

Skizinte la historion pri la rilatoj inter Ĉinio kaj okcidentaj regnoj, S-ino Ĉang substrekas la fakton, ke la ĉinoj ĉiam havis la opinion, ke ili kulture tre superas la okcidentanojn, kaj konsideris ilian superan teknikon militan preskaŭ kiel signon de barbareco. Siaflanke la okcidentanoj rilatis al la ĉinoj, aparte, kaj al ĉiuj orientanoj ĝenerale, kiel al anoj de malsupera raso, kaj tre saĝe la aŭtorino konkludas, ke Okcidento kaj Oriento devas lerni unu de la alia, ke ambaŭ ne povas tute sufiĉi al si mem kaj, sekve, ke konvenas, ke ili interrilatu sur bazo el justo kaj egalrajteco.

Nun la ĉina popolo ne plu sentas malŝaton pro la okcidenta tekniko. Imite al la japanoj, la ĉinoj pli kaj pli tendencas industriigi sian landon. Kaj certe venos la tago, kiam eĉ la plej stulta el la blankhaŭtuloj ekkomprenos, ke la ĉinoj ne estas rase malsuperaj.

Sed eble tio ne estas la plej menciinda parto el la artikolo

de S-ino Ĉang. Vere citindaj ŝajnas al mi ŝiaj rimarkoj jenaj:

"Dum la lastaj monatoj, la ĉina popolo kun nekredemo kaj mirego eksciis kiel okcidentaj armeoj kapitulacas, laŭdire tial ke tre superas la japana potenco. Por ni tia klarigo estas nekomprenebla... jam de kvin jaroj ne okazis unu sola fojo, ke ĉinaj soldatoj kapitulacis antaŭ la malamiko. Male, en multaj okazoj la oficiroj kaj soldatoj batalis ĝis la lasta momento, kvankam ili sciis, ke helpo ne venos kaj ke ilin trafos la morto. Se iu proponus kapitulaci, tiu estus rigardata kun malestimego. Multaj militestroj sin mortigis, ĉe la konstato, ke malvenko estas neevitebla kaj ke, por konservi la vivon, ili devus kapitulaci. Ili preferis morton ol malhonoron...

...Por ĉina soldato, la rezisto ĝis la lasta kartoĉo kaj ĝis la lasta viro ne estas nur bela figuro retorika..."

Sufiĉe mi citis, por ke ĉiu leganto povu kompreni la gravegan signifon de la diroj de S-ino Ĉang. Almenaŭ por mi estas tute klare, ke ili signas malestimon por la okcidentanoj, kiuj ĝis nun povis sin trudi en Oriento, ne pro tio, ke ili estas pli bravaj ol la orientanoj, sed nur dank'al pli perfektaj kaj pli multnombraj armiloj.

Mi jam diris, ke la rolo de l' blanka raso pli kaj pli tendencos malgraviĝi. Kiam mi skribis tion, Hong-Kong, Singapuro, Birmanio, Filipino, Indonezio ktp. estis ankoraŭ regataj de blankuloj. Sed la japanoj mem sukcesis ilin forpeli. Venos certe la tago, kiam la ĉinoj ankaŭ kapablos, kiel la japanoj, produkti perfektajn armilojn. Kaj la estonta alianciĝo, en ia aŭ alia formo, de Ĉinio kaj Japanio ne estas ekster diplomatia eventualo. Por konvinkiĝi pri tio, sufiĉas

memori, ke en 1902 diplomatoj de lia Reĝa Moŝto de Grand-Britio, Imperiestro de Hindio, kune kun kolegoj de la Dia Moŝto Surtera, la laŭdira reganto super la Lando de l' Sunleviĝo, subskribis aliancan kontrakton.

Ĉu do neniam la proletoj povos kompreni, ke ili estas nur peonoj en la manoj de diplomatoj, kiuj kvazaŭ ŝakludas sur la internacia kampo? Ĉiu informita persono almenaŭ tre bone scias, ke la majstro de ĉiuj tiaj filudistoj estas Makiaveli.

La artikolo de S-ino Ĉang estas saturita per iu apenaŭ vualita malestimego por la blankhaŭtuloj, kiuj dum longa tempo malbontraktis ŝian landon. Certe ŝi ne forgesis, ke iam oni povis, ekzemple, legi ĉe la enirejo de parko en Ŝanghai jenan surskribon: **La enirejo estas malpermesata al hundoj kaj ĉinoj.**

Esperinde – ĉu espereble? – iam la blankuloj ekkomprenos, ke la moralinstruo de Konfucio kaj Budao neniel malsuperas tiun de Kristo. Persone mi pensas, ke ĝi male estas kelkrilate supera. Sed estus eraro konkludi, ke la edzo de S-ino Ĉang, la nuna reganto super la "libera Ĉinio", estas malpli lerta makiavelisto ol siaj okcidentaj kolegoj: li ja nun sukcesas kredigi, ke li batalas por la demokratio, kvankam en 1927 li murdigis amase komunistojn kaj revoluciulojn. Tiam la bolŝevista gazetaro nomis lin krimulo, turmentisto, fiulo ktp.

Feliĉaj estas la homoj, kiuj ne havas bonan memororganon!...

E. L. (14-5-1942)



(Ĉi tiu artikolo verkita por "Satana Bulteno" estis retenita de la usona cenzuro ĝis la militfino. Ĝi aperis en "La Kosmopolito" de aprilo 1946)

# LETERO DE F. AZORIN KAJ RESPONDO DE E. LANTI

Meksiko, 1-11-1942

Komentoj je [kvazaŭ aksiomoj de Lanty](#).  
de lia "Malsamidea Samcelano" F. Azorin.

Mi kunsentas kun la plimulto de viaj aksiomoj (?); sed vi petas rimarkojn kaj, por vin pruvi kiel atente mi legis ilin, jen iaĵ:

Al 3-a – Mi volus koni kia diferenco estas ĉe vi inter la vortoj Nacio kaj Ŝtato. Por mi la Nacioj = naciujoj aŭ naskiĝujoj estas tiel naturaj entoj kiel nigra raso, vegetala regno, kc. Neniu el ili havas limojn matematike, absolute difinitaj, sed ĉiu komprenas kio estas hispano, franco aŭ negro aŭ planto. Ŝtato, kontraŭe, estas artefarita, historia kreitaĵo. Kontraŭ la Nacioj mi ne estas, ĉar mi ne aspiras unuformigi la homaron; nur mi subtenus naciojn kaj nacianojn sub ĝenerala planeda ordo. Rilate al Ŝtato mi opinias, ke ĝi estis grava homara progresilo, hodiaŭ superota per Konfederacio.

Al 4-a – Vi defendas la "Teknokratio", ideo jam sufiĉe diskutita, eksperimentata kaj reĵetita diversloke. Teknikuloj estas kompetentaj en siaj teknikoj, sed la regokapableco estas alia tekniko speciala. La regantoj de grandaj entreprenoj

apartenas ordinare al neniuj el la fakoj organizitaj de ili; la usonaj "reĝoj" de la ŝtalo, de la fervojoj, Ford, k.c. ne estas fandistoj, nek konduktoj, nek ŝoforoj. Kial la regantoj de plej grandaj kaj delikataj entreprenoj kiel la urboadministrado, la ŝtata regado devus esti aliaj?

Al 8-a – Mi ne konsentas kun vi, ke la Arto estu konsiderata kiel bagatelo, kaprico aŭ distro por pasigi la tempon post la deviga, utila laboro. Arto estas laboro inspirita per la beleco, kaj idealo estas ke ĉia laboro atingus artan kvaliton. Laŭ vi murblankigisto estus utila laboristo, sed se li artisme freskopentras saman muron, jam ne; ĵurnalisto, redaktoro aŭ kronikisto – certe necesaj oficoj – estos deklarataj utilaj civitanoj, sed kiam ili literaturos iomete aŭ fantazios ĝis la verkado poezia, tiam senutilas; eble vi konsentus la rutinajn muzikistojn, kiuj edukos senton kaj animon de infanoj ĉe lernejoj, kiuj mildigos la vivon de plenaĝuloj, dum libertempaj horoj ĉe ĝardenoj aŭ parkoj, kiuj en radiaj sendstacioj ludos por distri familiajn enuojn, sed la komponistoj devus esti subestimataj; la Arkitekto devus esti anstataŭita de la Inĝeniero? Certe vi ne pensas tiel; vi ne volis diri tion.

Fine, ĉar miaj kritikoj longiĝas en tiu sama 8-a paragrafo, vi aldonas: Por mondmastrumado... "formiĝu iu malplimulto da homoj plejkonsciaj"... kaj tiuj "anticipuloj povos dinamike efiki sur la statikan plimulton kaj tio ebligos starigon de racia socisistemo". Tio estas, amiko Lanty, la malnova doktrino nomita despotismo ilustrita aŭ regado de la malplimulto selektaj, nedaŭra modo dum pasintaj jarcentoj!

Mi ne dubas, ke klarigaj interparoloj alproksimigos niajn

vidpunktojn, ĉar vi estas bonintenca, progresema, homareca  
persono... dume restas altekonsidere via **F. Azorin.**

\*

Meksiko, 5-11-1942

Al F. Azorin, Meksiko

Altestimata Samideano, kelkrilate malsamidea, sed certe  
samcela,

Bv. ne kredi, ke mi nun emas ŝerci per tiu komenco iom  
stranga. Mi tiele nur celas tuj altiri vian atenton al tio, ke por  
povi reale interkompreniĝi, necesas nepre havi saman  
komprenon pri la vortoj uzataj. Kaj tio estas malfacila, tial ke  
ne ĉiuj havas ĉiam la saman signifon. Iu aŭtoritata lingvisto  
eĉ diris: "... vorto neniam havas tute la saman signifon por  
du malsamaj personoj, nek por la sama persono en du  
malsamaj momentoj".

La fakto, ke mi aldonis la kvalifon "kvazaŭaj" al miaj  
**aksiomoj**, estas pruvo, ke mi bone konscias, ke ili ne povas  
esti tiaj por ĉiu ajn. Mi ja scias, ke aksiomo estas "vero  
evidenta per si mem", kaj miaj asertoj estas tiaj eble nur por  
mi sola. Sed kiu povus pruvi, ekzemple, ke la matematika  
aksiomo: "du kvantoj egalaj je tria kvanto egalas inter si",  
estas "evidenta vero" por ĉiu homo? Ekzistas ankoraŭ  
sovaĝuloj, kiuj apenaŭ povas kalkuli ĝis dek. Kaj inter  
kleruloj la abstraktokapablo tre varias: kio estas evidenta por  
Ejnstejn, tio estas tia nun por proksimume 50 homoj en la  
mondo.

Cetere, en "[La Laborista Esperantismo](#)", pĝ. 22, mi jam menciis la opinion de l' matematikisto Puenkare, kiu diris, ke la geometriaj aksiomoj estas nur oportunaj, t.e., ke oni ne devas ilin konsideri kiel absolutajn verojn...

Nu, sufiĉas, ke vi sciu, ke miaj asertoj pri konstruado de racia socio estas **por mi** aksiomecaj.

Kaj nun mi respondu vian demandon pri "Nacio kaj Ŝtato". Mi mem ne faras diferencon inter la du terminoj. Sed mi scias, ekzemple, ke Prudon vidis en Francio 12 naciecojn. Kaj en la serio da artikoletoj, kiuj aperis en **Renovigo**, mi menciis la opinion de profesoro Angel M. Korzo, kiu vidas en Meksikio 80 naciecojn. Se vi havas tempon kaj emon, vi bonvolu legi, aŭ relegi, tiun verkaĵeton kaj pli facile vi komprenos, kion mi konsideras aksioma.

Vere mirigas min via aserto, ke ĉiu ajn komprenas pri kio temas, kiam oni diras la vortojn "hispano, franco, negro aŭ planto". Ĉu, ekz-e, ĉiu vasko, ĉiu kataluno konsentas esti nomata "hispano"? Antaŭ ĉi tiu milito, ekzistis en Francio relative forta movado por la sendependiĝo de Bretonio. Aperis tiucele 7 gazetoj en bretona lingvo. Kaj certe tiuj bretonoj ne volas esti nomataj "francoj".

Etimologie, nacio ja rilatas al naskiĝejo, kiel patrio, al la loko, kie vivis kaj entombiĝis la gepatroj. Nu, ĉe mia klaso, en Paris, dufoje mi havis po unu negra lernanto. Ambaŭ **naskiĝis** en Paris kaj tamen ne estis "franco", tial ke liaj gepatroj ne klopodis por akiri la francan civitanecon. Sekve!...

Mi ne faras diferencon inter ŝtato kaj nacio, tial ke la Historio instruas, ke estas la ŝtatoj mem, kiuj, dum la daŭro

de jarcentoj, kreis la nunajn naciojn. Estus eĉ nemalfacile starigi tezon, laŭ kiu ne ekzistas **esenca** diferenco inter **patrio** kaj **partio**. Kaj en la okazoj, kiujn vi mem travivis en Hispanio, oni povus kolekti faktajn argumentojn apoge al tia tezo...

Mia opinie, la naciismo, same kiel la rasismo, estas nur demagogia agitrimedo lerte uzata de regaviduloj. Ĉiu tiaulo preferus esti prezidanto super unumiliona popolo mizera, ol duaranga civitano en centmilionhoma regno, kie ne estus mizeruloj. Kaj estus vera miraklo, se la ambasadoroj de, ekz-e, Hondura, Guatemala, Nikaragva, Salvador, Paragvaj k.s. nacioj konvertiĝus al la sennaciismo. Pravas la popoldiro, ke **ĉiu ajn preferus esti kapo de muso ol vosto de leono**. Ĉiu ajn naciista agitado fakte ne havas alian celon ol doni regpostenon al iuj politikuloj. Kaj la naiva popolo facile lasas sin trompi de laŭtvoĉaj demagogoj. La registroj de la ĉifonulriĉa Ĉilio eĉ sukcesis atingi, ke iliaj regatoj fieras pri sia mizero. Ĉiujare ja okazas tie "Fiesta del Roto Chileno" (Festo de la Ĉifonulo Ĉila). Tiam oni kanonpafas, kisas la nacian standardon, bruigas la sonorilegojn, ktp. En Meksikio oni povas fari similajn konstatojn.

Mi opinias, ke la marksismo eraras en tio, ke ĝi pretendas klarigi ĉion per la ekonomio. Laŭ tio, kion mi povis observi kaj noti, mi emas konkludi, ke la ekonomio ne estas faktoro en la socia vivo sed nur **kondiĉo**, kiun utiligas regaviduloj. La reg-, potencavido ĉiam estis ĝis nun la decidiga **faktoro** en la historiaj cirkonstancoj. Nu, ni konsideru, ke dum la lastaj 150 jaroj proksimume la vivkondiĉoj pli aliĝis ol dum la tri aŭ kvar mil jaroj antaŭaj. Kaj tia procezo ne haltos; male, ĝi tre

verŝajne pli akceliĝos. Krome, ni ne malatentu la fakton, ke ĝenerale la scienculoj, la inventemuloj ne estas reg- sed **sciavidaj**. Serĉi, observi, eksperimenti estas ĉe ili pasio. Tiajn homojn mi nomas teknikuloj, kontraste al la regaviduloj aŭ politikistoj.

Tamen, inter ĉi tiuj lastaj ekzistas kelkaj pri kiuj oni povus iel diri, ke ili estas teknikuloj en la ...agita fako (la vorton **agiti** mi uzas laŭ la 3-a difino en P.V.). Certe Musolini kaj Hitler estas majstroj en tiu demagogia arto. Cetere, ili povis lerni de la bolŝevistoj. Kaj Lenin mem ŝajne lernis de la jezuitoj, ĉar li rekomendis la ĉiarimedecon. La rezultojn de tia "tekniko" ni nun vidas...

Tion mi diris, por emfazi la neceson havi tute saman komprenon pri la uzataj vortoj. Se mi sukcesis komprenigi al vi la sencon, laŭ kiu mi uzis la vorton "teknikuloj" en miaj "aksiomoj", eble vi konsentos, ke ne estas tute malsaĝe deziri, ke tiaj homoj anstataŭu la politikistojn en la tasko organizi kaj gvidi la ekonomian vivon. Kaj ĉu ne konvenas esperi, ke venos tago, kiam la popolo mem komprenos, ke ĝia bonstato dependas ĉefe de **racia, bonorda mastrumado super naturaj riĉaĵoj de nia planedo**? Se tiu tago alvenus, tiam la ĝisnuna rolo de la politikistoj estus finludita. Anticipe mi vidas ilin, kiel nun oni ĝenerale prezentas al si la sorĉistojn kaj antaŭdiristojn de l' faraona epoko.

Se jam mi ne estus konvinkita pri la rolo, kiun devus ludi teknikuloj, min certe impresus la fakto, kiun, antaŭ tri tagoj, menciis G.A. Palma en "El Universal Grafico". Liadire, en Germanio, Britio, Francio kaj Usono estis antaŭ ĉi tiu milito po 8 aŭ 10 teknikuloj por 100 loĝantoj, dum en Meksikio

estas nur 1. Sed ĉi tie pli ol ie ajn alie, mi kredas, svarmas politikistoj; kaj pri la vivnivelo de l' popolo mi ne bezonas raporti al vi...

Tamen vi ne kredu, ke mi apologias la teknokration. Teknikulo ja povas ankaŭ politikumaĉi, simile, kiel ekzistis – kaj verŝajne ankoraŭ ekzistas – liberpensaj pastroj, kiuj tamen predikis elokvente religiajn dogmojn al la popolo. Mi celas regadon de la **...racikratio**. Supozeble vi komprenas la signifon, kiun mi donas al tiu termino, netrovebla en P.V.

En la antikva Egiptio, teknikistoj konstruis piramidojn kaj mumiiĝis kadavrojn. Kaj nun en Meksikio, ekz-e, la "panteones" estas teknike bone prizorgataj, dum miloj kaj miloj da homoj estas senhejmaj. Kaj post ĉi tiu milito, kiu certe ne estos la lasta, la teknikistoj pri konstruado de maŭzoleoj por la "herooj" falintaj sur batalkampoj havos multe da laboro.

Lastatempe, mi vidis bildon pri marmora konstruo, kiu superstaras kaj protektas la dometaĉon, kie, en Gori, naskiĝis Stalin. Tio ankaŭ estas verko de teknikistoj, sed havas **nenion komunan kun racia mastrumado socia**. Miakomprene, ĝi esprimiĝas per miaj "aksiomoj"; kaj ŝajnas al mi facile pruveble, ke per ilia aplikado la mondo ne havus la funebran, dolorigan aspekton, kiun ĝi havas nun.

Tial ke mi parolis pri "universala aparato ordiga kaj kontrola, kiun volonte mi nomus Polico..." vi povis facile dedukti, ke mia tezo ne estas anarkisma. Tamen, ĝis 1914, mi estis anarkista kredulo. Sed la sinteno de Kropotkin, Grav kaj aliaj aŭtoritataj teoriuloj anarkistaj, rilate al la tiama milito (kiu jam devis esti la lasta) instigis min pensi per mia



propra cerbo. Kaj tiam mi komprenis, ke se fakte la Ŝtato estus la kaŭzo de ĉio malbona en la socio, tiam ne eblas klarigi, kial ĝi estiĝis, ĉar la homo ja ekzistis antaŭ la Ŝtato. Sed senŝtata socio restas por mi sopirinda, alcelenda... idealo. Vi do eraras, supozante, ke mi celas despotisman regadon de ia malplimulto da teknikuloj. Kaj se vi memoras la Statuton de SAT, kiun mi mem redaktis, certe ne venus tia penso pri mi. Por ke nia Asocio estu "demokrate" (mi metas la vorton inter citilojn, tial ke necesas, ke mi klarigu mian komprenon pri ĝi. Nur mi diru nun, ke la demokratio, kiel ĝi ekzistas en Meksikio, ekz-e, ŝajnas al mi malsprita ŝerco, groteska farso, ĉar pli ol duono de l' popolo estas analfabeta); por ke SAT estu "demokrate" gvidata, mi rediras, la kongresoj estis nur propon- kaj ne decidrajtaj. Okazis poste referendumo, kiun povis partopreni la tuta anaro. Samideano! favoru min, pensante, ke ni ne diskutas antaŭ publiko, kiu voĉdone povas decidi pri mia aŭ via vidpunkto. La teknikulo, t.e. la arkitekto, superregu la politikiston dum nia diskutado.

Vi certe eraras, dirante, ke la registemo, kiun mi rekomendas, estis "nedaŭra modo dum pasintaj jarcentoj". Cetere, neniam ekzistis mondregado **unueca**, kaj, miaopinie, ĝi estas nepre necesa, por certigi mondpacon. Plie, mi konfesas, ke eĉ nun la malvolviĝo de la tekniko ne ankoraŭ atingis la gradon necesan de aplikado, por ke povu funkcii mondregno. Lastatempe oni inaŭguris la "internacian" ponton de Suŝiate, sed malgraŭ tio ne ankoraŭ ekzistas fervojo, kiu kontaktigus Njujorkon kaj Buenosaireson aŭ Riodeĵaneiron. Sed oni ne povas dubi, ke ne forpasos multaj jardekoj ĝis

estos finkonstruitaj tiuj fervoj. Antaŭ kelkaj tagoj mi legis, ke la japanoj komencis konstrui kanalon sub la maro inter sia lando kaj Koreio... Kaj estus superflue emfazi la rolon, kiun, post ĉi tiu milito, ludos la aviado...

Mi do anticipas la tagon, kiam mondregno estos **objektive** ebla; sed tiam malebligos ĝin la fakto, ke la menso de la homoj estas naciece saturita. Tiam la mondo estos en simila – mi ne diras: sama – stato kaosa, kiel Hindio, kiam vivis Budao, kaj Ĉinio en la tempo de Konfucio. Sed nunepoke mistikecaj rimedoj ne taŭgas, por eliri el la kaoso. Mi opinias, ke nur la Racio povas doni la solvon de l' problemo. La teknikon, la sciencon generis la racio. Kaj tial la raciuloj devas anstataŭi la mistikulojn kaj politikistojn en la ordigo de la socia vivo.

Ju pli mi observas la agadon de la Meksikiaj politikistoj kaj laboristaj gvidistoj, des pli mi konvinkiĝas, ke tiaj faras absolute nenion efektive utilan. Kaj ĉiam viva restas en mia memoro la naiva entuziasmo de francaj laboristoj, kiuj kredis, ke en Francio oni baldaŭ ekkonstruos socialismon, tial ke Blum fariĝis ĉefministro. Eĉ en "Sennaciulo" esprimiĝis tiu kredo per la plumo de K-do Kaŝon (Cachon, bona homo, tipografisto). Kaj mi mem forkuris el Paris kun la tre forta antaŭsento, ke tia revo dronos en sango, post ne tre longa tempo. Sed mia skeptiko igis min nesimpatia al Kaŝon kaj liaj samkreduloj.

Se mi sukcesis iomete komprenigi min, eble vi konsentos, ke ne ĝustas via opinio, ke la de mi rekomendita malplimulto da "dinamikuloj" povus regi nur despote. Mi male hipotezas, ke, en la kriza, kaosa tempo antaŭvidebla, la granda plimulto

da homoj akceptus volonte la raciajn proponojn, kiujn farus teknikuloj, por eliri el la kaoso. Kaj se tiam ekzistus relative forta organizo **sennacieca** el simpluloj, kia mi, kiuj estus jam akirintaj **senton de mondcivitaneco** aŭ **planeda patriotismo**, tio tre helpus la efektivigon de racia plano...

Mi diris sufiĉe por ke vi povu kompreni, ke esp-o ne estas por mi bagatela, flanka afero, sed nepre necesa ilo, kiun devas **uzadi** la homoj, kiuj sincere deziras iri laŭcelan vojon al mondpaco. Kaj krome, vi ankaŭ komprenos, kiom pezas sur mian animon mia ekziliteco el... Esperantio. Mi ja tute ne sopiras al Francio.

Rilate vian diron, por pravigi la ekziston de nacioj, nome ke vi ne "aspiras uniformigi la homaron", mi povas sincere konfesi mian propran ŝaton por varieco. Tial mi diris, ke la universalisma edukado ne celus unutipigecon... Tamen mi ne ŝanceliĝos, por deklari, ke mi preferus unutipan mondon pacan ol la nunan, kies varieco estas vere tro makulita per sango. Sed mi opinias, ke la malapero de nacioj, kiel suverenaj entoj, ne samaspektigus la mondon. Montoj, ebenaĵoj, maroj, klimatoj ktp daŭre ekzistos kaj rezultigos variecon en la vivmaniero. Pruve, mi nur menciu la kontroleblan fakton, ke la ekzisto de nacioj ne formalaperigis la provincecojn. Kaj mi antaŭvidas grandan variecon individuan, tial ke ĉiuj homoj havus la eblon malvolvi ĉiujn siajn latentajn kapablojn.

Dume oni povas nun observi ĉie en la mondo usonecan uniformiĝemon, kiu vere naŭzas min. Eĉ en Japanio mi ĉagrene povis konstati la ekziston de kelkaj "coffee-bar"-oj. Kaj preskaŭ ĉiujn filmojn el Holivud mi trovas vulgaraj; ili

signas al mi civilizitan sed ne kulturitan popolon. Kaj tio pensigas min pri viaj rimarkigoj rilate Arton.

Mi konsentas al via difino pri tiu homa kreado kaj tute ne konsideras ĝin "bagatelo", "kaprico". En la socio, kiun mi revas, ĝi kredeble malvolviĝus ĝis atingi, ke homoj volus eĉ arte morti. Tiucele konstruiĝus eŭtanaziaj palacoj, kiuj, esperinde, malaperigus la funebrajn tombejojn, kie nun oni prizorgas, dorlotas putrantan karnon. La vorto **arto** ankaŭ ne havas tute precizan sencon. Ĝin eble mi uzis netrafe. Nun mi emas anstataŭi ĝin per **lukso**, aŭ serĉi alian formon, por esprimi mian penson.

Klarigcele, mi do diru, ke ŝajnas al mi krime elspezi energion kaj materialon por luksaĵoj, kiam necesajoj mankas al grandega nombro da homoj. Ekz-e, kiam ĉi tie mi promenas ĉirkaŭ la **Palaco de Belartoj**, ĉiam venas al mi la amara penso pri manko de lernejoj por preskaŭ 4 milionoj da meksikiaj infanoj, kaj pri la mizera stato de multaj el la ekzistantaj; mi pensas pri la ŝupurigistoj, ŝarĝportistoj, ĵurnalvendistoj kaj aliaj ĉifonuloj, kiujn oni renkontas preskaŭ ĉiupaŝe. Kaj memorante pri la diro de mi ne plu scias kiu verkisto, ke la gotikaj katedraloj akiris animon laŭ pasado de jarcentoj, tiam mi emas kredi, ke la marmora konstruo, kiu staras apud "Alameda", ne bezonis tiom longan tempon, por ankaŭ akiri animon: ĝi ja hontas stari en la ĉifonulriĉa Meksikio, kaj tial emas pli kaj pli profundiĝi en la teron, por sin kaŝi<sup>[1]</sup>. Sed la meksikiaj politikistoj havas almenaŭ motivon por fieri pri la lando, kiu konstruigis tiun artaĵon, laŭ planoj de ...italo, se mi ne eraras.

Altestimata Samideano! espereble mi diris sufiĉe, por ke nun ne plu estu miskompreno inter ni. Kaj vi ne forgesu noti, ke mi ne havas la kredon, ke miaj asertoj povas efiki aksiome sur iu ajn. Vi nur komprenu, ke ili estas por mi kvazaŭ aksiomoj, sekve de longa cerbumado pri la demando. Kaj la fakto, ke mi respondas tiom longe al via letero, estu pruvo, ke mi dankas vin sincere pro viaj kritikoj. Supozeble, vi divenis, ke instigis min verki miajn "aksiomojn" la konatiĝo kun via propra plano pri la temo, aperinta en **Renovigo**. Verkema mi ja ne estas kaj ĉiam necesas instigo, por ke mi surpaperigu pensojn, kiuj tamen ofte kvazaŭ sieĝas mian cerbon...

Eble utilas aldiri, ke mi tute ne scias, ĉu la Homaro nepre evoluas al stato de daŭra paco. Oni eĉ povus facile argumenti, ke la homa gento malaperos pro nekapablo sin adapti al kondiĉoj, kiujn ĝi mem kreis. Temperamente mi estas pesimisto kaj nemalofte miras, kiam io bonsukcesas. Se mi penadas agadi laŭ racia maniero, estas ĉefe por akiri la agrablan senton intiman, ke almenaŭ mi persone ne havas respondecon en la frenezajoj de nia multnacia mondo...

Vi bonvolu indulgi min, se tede efikis sur vin la legado de ĉi tiu sendube tro longa skribo. Dume mi restas homece t.e. sennaciece, kaj servoprete via **E. Lanti**.

## Piednotoj

1. ↑ La arkitekto ne sufiĉe atentis la fakton, ke en Meksiko la subgrundo estas mola: La Palaco jam

enprofundiĝis je pli ol 1 metro kaj estas preskaŭ  
miraklo, ke ĝi ne forfalis.

## ĈU LINGVUMI?...

Eble jes... En nia gloriĉa epoko ja ne eblas senĝene priparoli socipolitikajn demandojn. Tial iu el miaj korespondantoj konsilis, ke mi lingvumu.

Sed lingvisto ne estas mi, kaj eĉ havas nekonfesindan nekapablon pri lingvolernado. Ĉu sekve konvenas, ke mi sekvu la konsilon? Post ioma ŝanceliĝo, mi tute liberigis je tiu skrupuleto, pensante, ke aŭtoritataj lingvistoj plej ridinde argumentadis pri esp-o. Ili ja demonstris, ke artefarita lingvo ne estas vivkapabla kaj iel similas al retorte farita estulo. Tamen ĉiuj Samideanoj scias laŭsperte, ke esp-o fariĝis viva lingvo. Eĉ kelkaj lingvistoj hereze konfesis tion.

Ne celante teorumi pedante, mi do anekdotos kelkajn el miaj prilingvaj spertoj.

Ĉu esp-o estas belsona? iafoje oni demandas nin. Antaŭ multaj jaroj, mi mem estus tre embarasata, por respondi sincere tiun demandon. En la komenco de mia esp-ista vivo ja sieĝis min naŭza sento, kiam mi aŭdis la sonon **ĉu**. Klarigcele mi diru, ke en la regiono, kie mi naskiĝis kaj vivis ĝis mia dek oka jaro, la kamparanoj diras: **ĉu!... ĉu!...** kiam ili forpelas porkojn. Tial, komence, esp-o ŝajnis al mi nelerninda lingvaĉo porkpensiga. Kaj tiam, por daŭrigi la lernadon, necesis, ke mia racio forte bremsu mian malsimpation al la **ĉu**-a Zamenhofaĵo.

Kelkaj jaroj forpasis, dum kiuj mi ne tute sukcesis liberiĝi je mia malesperantemo. Nu, en 1921, mi havis la okazon, en Dresden (Germanio), konatigi kun juna fraŭlino, kiu preskaŭ manie uzadis la konjunkcion **ĉu**. Kiam, ekz-e, mi diris: "Estas al mi tre agrable promeni kun vi...", tiam ŝi respondis: "Ĉu...?" Kaj tiel same ĉe la fino de multaj el miaj paroloj.

Unuafoje mi ricevis la impreson, ke ŝi volas forpeli min, kiel porkon. Sed, rigardante en ŝiajn okulojn, mi tuj konvinkiĝis pri mia eraro. Baldaŭ mi ne plu pensis pri porkoj, kiam mi aŭdis: **ĉu?** el la buŝo de la aminda Dresdenanino bluokula. Kaj dank'al ŝi esp-o ĉesis esti por mi porkpensiga...

Dek naŭ jaroj forpasis kaj mi fariĝis ĝismedola esp-isto, kiu kvazaŭ **sentas** la signifon de **aĉ**. Nu, mia migremo puŝis min en hispanlingvajn landojn, kaj mi do havis la okazon aŭdi la vortojn "muchacho" (muĉaĉo, knabo) kaj "muchacha" (muĉaĉa, knabino). Tial, komence, mi pensis, ke la lingvo de Cervantes estas malbelsona, vere aĉa kaj nelerninda. Sed forpasis preskaŭ kvin jaroj, de tiam mi ĉiutage aŭdas la vortojn "muchacho" kaj "muchacha" kaj mi devas konfesi, ke ili ne plu tiklas malagrabla mian aŭdorganon.

El tiuj kaj similaj konstatoj mi alvenis al la konkludo, ke bel- aŭ malbelsoneco de lingvo estas afero pure subjektiva, kiu, por la plimulto, varias laŭ latitudoj.

Por miaj oreloj, la plej malbelsona lingvo, el ĉiuj, kiujn mi aŭdis ĝis nun, estas la angla. Kiam mi aŭdas paroli angle, tiam mi ricevas la impreson de siblado kaj kraĉado. Sed mi neniel dubas, ke se mi naskiĝus kaj edukiĝus en London, la



lingvo, kiun parolas lia reĝa moŝto de Britio, imperiestro de Hindio ktp., estus por miaj oreloj la plej melodia el ĉiuj kaj nepre indas esti trudata al la tuta mondo...

Nacisente estas saturita nia menso. Kaj por pravigi mian aserton, mi ankoraŭ anekdotos, kion foje mi spertis inter anglolingvaj samideanoj el la suda hemisfero. Neniam ili diris: "Kiel vi fartas?" sed ĉiam: "Kiel vi sanas?". Kaj la kaŭzon de tio mi komprenis, kiam mi eksciis, ke en la angla lingvo **to fart** signifas **furzi**. Sed tiuj samaj malfartemuloj ne hontis diri al mi, ekz-e: "Ĉu mi povas **peti...**?" tial ke ili ne sciis, ke por franclingvano tiu vorto samimpresas, kiel farti ĉe anglo. En la franca lingvo "péter = to fart".

Simile, la japanaj samideanoj ne emas diri: **dankon!** tial ke japane **dan** = viro kaj **kon** = radiko, kio signifas: **peniso**. Ili do preferas diri: "Vi estu dankata" aŭ "Mi dankas vin".

Pri ĉiuj aliaj lingvoj oni povas fari similajn rimarkojn. Tial, konklude, mi diros: ni ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel penadu, por liberigi nin je nacia influo kaj atingi, ke en nia cerbo superregu la sennacieca racio. Tiam la demando pri bel- aŭ malbelsoneco de lingvo fariĝos ekstertema.

**E. Lanti** (24-2-1944)

# LA SINSUGESTO FARAS "MIRAKLOJN"

## Konsciulo kaj senkonsciulo

En ĉiu homo ekzistas **du individuoj**, absolute diferencaj unu de la alia. Ambaŭ estas inteligentaj; sed dum unu estas konscia, la alia estas senkonscia. Pro tio la ekzisto de ĉi tiu lasta estas ĝenerale neperceptata.

Kaj tamen tiu ekzisto estas facile konstatebla, se oni nur penas ekzameni iujn fenomenojn kaj pri ili pripensi dum kelkaj momentoj.

Ekzemple, ĉiu aŭdis pri somnambulismo, ĉiu scias, ke somnambulo ellitiĝas dum la nokto, **ne estante veka**, ke li eliras sian ĉambron vestita aŭ nuda, ke li malsupreniras ŝtuparojn, laŭiras koridorojn kaj ke, farinte iujn agojn aŭ plenuminte iun laboron, li revenas en sian ĉambron, reenlitiĝas, kaj la postan tagon miregas ĉe la konstato, ke finita estas la laboro, kiun la antaŭan tagon li lasis nefinita.

Tamen la somnambulo mem finis la laboron, kvankam li scias nenion pri tio. Kiu estas la forto, kiu impulsis lin? Nur la senkonscia, nur lia senkonscia individuo.

Se ni komparas la konscian estulon kun la senkonscia, ni konstatas, ke la konsciulo havas ne tute bonan memoron,

dum la senkonsciulo, male, estas dotita je mirinda, senmanka memoro, kiu sen nia scio enregistras la plej malgravajn faktojn el nia ekzisto. Plie, ĝi estas kredema kaj akceptas, nerezonante, kion oni diras al ĝi. Kaj tial ke ĝi prizorgas la funkciadon de ĉiuj niaj organoj pere de la cerbo, okazas tio, kio povas ŝajni paradoksa, ke se ĝi kredas, ke tiu aŭ aliu organo bone aŭ malbone funkcias, ke ni spertas tian aŭ alian impreson, la koncerna organo, efektive, bone aŭ malbone funkcias, kaj ni spertas tian aŭ alian impreson.

Ne nur la senkonsciulo direktas la funkciojn de nia organismo, sed ĝi direktas ankaŭ la plenumadon de **ĉiuj niaj agoj, kiaj ajn ili estas.**

Estas ĝi, kiun ni nomas imago, kaj kiu, male je tio, kion oni ĝenerale kredas, **ĉiam** agigas, eĉ kaj **precipe** kontraŭ **nia volo**, kiam estas antagonismo inter la du fortoj.

## Volo kaj Imago

Se ni serĉas en vortaro la signifon de l' vorto volo, ni trovas jenan difinon: "Kapablo uzi la spiritajn fortojn, per kiuj efektiviĝas la agoj." Nu, nenio estas pli erara, kaj tiu volo, pri kiu ni fieras, ĉiam cedas antaŭ la imago. Ĝi estas **absoluta** regulo sen iu **escepto.**

Klarigcele mi mencias ekz-on. Jen kuŝas sur la tero dekmetre longa tabulo larĝa je dudek kvin centimetroj; evidente ĉiu ajn povas laŭlonge paŝi sur ĝi, ne metante piedon ekster unu flanko. Nu, ni aliigu la kondiĉojn de la eksperimento, supozante, ke la ekstremaĵoj de tiu sama tabulo kuŝas sur muroj altaj kiel la turoj de katedralo.

Tiakondiĉe, kiu kapablos antaŭeniri eĉ unu metron sur tiu mallarĝa vojo? Preskaŭ neniu, **malgraŭ ĉiuj volpenadoj** la provantoj baldaŭ ekstremus kaj falus teren. Kial do la tabulo estas sekura, kiam ĝi kuŝas sur la tero kaj faliga, kiam ĝi estas alta? Tute simple, tial ke en la unua kazo oni **imagas**, ke estas facile paŝi sur la tabulo kaj en la dua kazo oni imagas, ke oni **ne povas**.

Rimarkinde estas, ke malgraŭ la volo antaŭeniri, se oni **imagas**, ke oni **ne povas**, tiam absoluta estas la senpoveco. Tamen ekzistas tegmentistoj, ĉarpentistoj, kiuj povas plenumi tian agon, tial ke ili akiris la kapablon imagi, ke ili povas.

La kapturniĝo ne havas alian kaŭzon ol la bildon pri nia falo, kiu aperas antaŭ niaj okuloj; tiu bildo aliĝas en agon, **malgraŭ ĉiuj niaj volpenoj**.

Ĉiam la **imago** venkas la **volon**.

### **Sugesto kaj sinsugesto**

Laŭ la jama dirito, ni povas similigi la imagon al torento, kiu fatale kuntrenas la kompatindulon, kiu falis en ĝin, malgraŭ lia volo atingi la bordon. Tiu torento ŝajnas neregebla; tamen, se oni lerte agas, oni povas deturni ĝian fluon kaj konduki ĝin al fabriko, kie ĝia forto estos aliigata en movadon, en varmon, en elektron.

Kiam oni estas konstatinta la grandegan forton de la senkonscia aŭ imaghava ulo, konsiderata kiel neobeigebla, temas kompreni, ke fakte oni tamen povas regi ĝin laŭ simila maniero, kiel rilate al torento.

Unue necesas zorge difini la signifon de l' vortoj **sugesto**

kaj **sinsugesto**. La agon trudi ideon al la cerbo de alia persono oni povas nomi sugesto. Ĉu tia ago reale ekzistas? Ne, ĝi ne ekzistas per si mem, sed nur en la **nepra** kondiĉo ĉe la submetito aliĝi en sinsugeston. Kaj tiun vorton ni difinos jene: "la akceptigo de ideo en si mem per si mem". Oni povas sugesti ion al iu, sed tio ne efikos, se lia senkonsciulo ne akceptas kaj asimilas la ideon kun la celo aliĝi ĝin en **sinsugeston**.

### Uzo de la sinsugesto

Ni memoru, ke eblas obeigi la imagon, same kiel oni regas torenton aŭ dresas sovaĝan ĉevalon. Sufiĉas tiucele scii unue, ke tio eblas (preskaŭ neniu scias tion), kaj poste koni la rimedon. Nu! tiu rimedo estas tre simpla; ĝi estas tiu, kiun, senvole, sence, laŭ maniero absolute senkonscia koncerne nin, ni utiligas ĉiun tagon, de kiam ni naskiĝis, sed kiun, bedaŭrinde por ni, ofte ni malbone utiligas kaj por nia plej granda malprofito. Tiu rimedo estas la **sinsugesto**.

Dum, kutime, oni sin sugestas senkonscie, sufiĉas sin sugesti konscie, kaj la procedo konsistas el ĉi tio: unue, bone pripensi per sia racio la aferojn, kiuj estos la objekto de la sinsugesto kaj, laŭ tio, ĉu ĝi (la racio) jesas aŭ neas, plurfoje ripeti pensante pri nenio alia: "Ĉi tio okazas aŭ ĉi tio forpasas; ĉi tio okazas aŭ ne okazos, ktp., ktp.", kaj se la senkonsciulo akceptas tiun sugeston, se ĝi sin sugestas, la aferoj senmanke realiĝas.

La **sinsugesto** fakte ne estas alio ol hipnotismo, kiun oni povas difini jene: **Influo de la imaga sur la moralan**

**estulon (aŭ mi-on) kaj la fizikan estulon de l' homo.**

Multaj personoj estas malsanaj, nur pro tio, ke ili **imagas** esti tiaj. Se iuj personoj estas feliĉaj aŭ malfeliĉaj, estas pro tio, ke ili **imagas** esti tiaj: du personoj troviĝantaj tute en samaj kondiĉoj povas esti unu **tute feliĉa** kaj la alia **tute malfeliĉa**.

Sed, se nia **senkonsciulo** estas la fonto de multaj el niaj malsanoj, ĝi ankaŭ povas kuraci niajn moralajn kaj fizikajn malsanojn. Tiucele necesas izoliĝi, sidiĝi, fermi la okulojn, por eviti ĉiun distrecon, kaj dum kelkaj momentoj nur pensi: "tio estas malaperanta", "tio estas okazanta". Tamen nepre necesas atenti, ke la volo ne partoprenu en la praktikado de la sinsugesto; ĉar, se ĝi ne akordiĝas kun la imago, se oni pensas: "mi volas, ke tiu aŭ aliu afero okazu", kaj ke la imago diras: "ci volas, sed tiel ne okazos", ne nur oni ne akiras, kion oni volas, sed eĉ la malon. Temas eduki ne la volon sed la imagon. Kiam la volo kaj la imago konfliktas, ĉiam, **sen iu escepto**, la imago venkas. Sed kiam la volo kaj la imago akordas, tiam unu ne nur aldoniĝas al la alia sed multobliĝas.

Laŭ la dirito, ŝajnus, ke neniu devus iam ajn esti malsana. Tio estas vera. Ĉiu malsano, preskaŭ sen escepto, **povas cedi al la sinsugesto**; ni ne diras **ĉiam cedas**, sed **povas cedi**, kio diferencas. Sed necesas lerni la praktikadon de la **sinsugesto konscia**, samkiel oni lernas legi aŭ skribi.

La sinsugesto estas ilo, kiun ni posedas ekde la naskiĝo kaj per kiu senkonscie ni ludas dum nia tuta vivo, samkiel suĉinfano kun amuzilo. Sed ĝi estas pli danĝera, kaj povas vundi, eĉ mortigi, kiam oni malprudente kaj senkonscie manipulas ĝin. Male, ĝi savas, per **konscia** uzado.

## Kiel oni devas praktikadi la konscian sinsugeston

Ĉiun tagon ĉe la vekiĝo kaj ĉiun vesperon post la enlitiĝo, oni fermu la okulojn kaj, **ne provante fiksi sian atenton** je tio, kion oni diras, oni eldiru, sufiĉe laŭte por **aŭdi** siajn proprajn vortojn, jenan frazon: "**Tagon post tago, kaj ĉiurilate, mi fartas pli kaj pli bone**". Ĉar la vorto **ĉiurilate** ampleksas ĉion, estas senutile fari al si **apartajn** sugestojn. Tiun frazon oni ripetu dudek fojojn, helpante sin per ŝnureto garnita je dudek nodoj.

Tiu sinsugesto devas esti farata, kiel eble plej **simple, infanece, maŝine, sen la plej eta peno**. Unuvorte, la formulo devas esti ripetata litanimaniere. Oni tiele sukcesas **mekanike** penetrigi ĝin per la aŭdsento en la senkonsciulon, kaj, kiam ĝi estas penetrinta, tiam ĝi agas. **Dum sia tuta vivo oni apliku tiun metodon, kiu estas same malsanevitiga kiel kuraca.**

Plie, ĉiufoje, kiam, dum la tago aŭ dum la nokto, oni spertas fizikan aŭ moralan suferon, tuj **aserti** al si, ke oni forigos ĝin; poste oni izoliĝu, fermu la okulojn, kaj, ŝovadante la manon sur la frunto, se temas pri io morala, aŭ sur la dolora parto, se temas pri io fizika, oni ripetu tre rapide la vortojn: "**Ĝi forpasas, forpasas, ktp., ktp.**", tiom longe, kiom necesas. Per iom da kutimiĝo oni sukcesas forigi la moralan aŭ fizikan suferon post 20 ĝis 25 sekundoj. Oni rekomencu ĉiufoje, kiam necesas.

(La praktikado de la sinsugesto ne povas en ĉiuj kazoj anstataŭi medicinan kuracadon, sed ĉiam ĝi estas valorega

helpo).

## **Kiel agas la sinsugesto**

Por bone kompreni la rolon de la sinsugesto, sufiĉas scii, ke la **senkonsciulo** estas la **granda direktoro de ĉiuj niaj funkcioj organaj**. Ni kredigu al ĝi, kiel jam dirite, ke tiu organo, kiu ne bone funkcias, devas bone funkcii, tuj ĝi transdonas la ordonon, kaj la koncerna organo, eme obeante, ĝia funkcio refariĝas normala, ĉu tuj, ĉu iom post iom.

Per ĉi tio oni povas klarigi laŭ tiel simpla kiel klara maniero, kiel per sugesto oni haltigas sangelfluojn, venkas mallakson, forigas fibromojn, kuracas paralizojn, tuberkulozajn vundojn, vejnoŝvelajn difektojn, ktp.

El **La Maîtrise de Soi-Même par l'autosuggestion consciente**" de Emile Coué (La Sinregado per konscia sinsugesto, de Emilo Kue), kompiltradukis

**E. Ŝoz-Maŝen**

Ĉi tiu verko havis eksterordinaran sukceson. La lasta eldono el 1938 pliigis la nombron de ekz-roj ĝis 213 000. La plej granda parto el la 128-paĝa teksto konsistas el atestoj pri kuraciĝoj, kiuj pensigas pri mirakloj. Tamen estas notinde, ke la aŭtoro avertas, ke la sugesto kaj sinsugesto efikas nur rilate al aferoj raciaj. Sed ankaŭ neniam okazis, ke homo de kies kruron aŭ brakon oni fortranĉis reakiris tiun organon per



"miraklo", kvankam, laŭdire, Dio estas ĉiopova kaj sekve povus plenumi tian taskon.

En la metodo rekomendita de profesoro Kue forestas ĉia signo je mistikeco; ne intervenas Dio aŭ ia "Universala Mi" diigita de novspecaj kreduloj. Laŭ tute simpla maniero li instruas kiel utiligi forton, kiu estas en ni mem.

"Lernu kuraci vin, tion vi povas; iun mi mem neniam kuracis. La kuraca rimedo estas en vi; utiligu ĝin por via fizika kaj morala bono, voku ĝin kaj ĝi venos kaj kuracos vin, vi estos forta kaj feliĉa." Tion, ekz-e, diris Kue al iu paralizulino, kiu tuj ekstaris kaj poste marŝis. Plenumiĝis "miraklo".

En nia frenezaĵ- kaj krimriĉa epoko, estas utile memori, ke la sinsugesto povas kuraci, sed ankaŭ malsanigi. Oni do okaze povas utiligi ĝin por senigi sin je soldatkapablo.

Bedaŭrinde la instruoj de profesoro Kue estas senefikaj rilate al la bomboj, kiujn heroaj aviadistoj faligas sendistinge sur iun ajn. Tial ni ne konsideru la sinsugeston kiel universalan kuracilon.

**E. Ŝ. M.**

(pseŭdonimo de E. Lanti)

## LETERO AL E., Sydney

11-5-1944

Amiko!

Hieraŭ mi ricevis vian letereton de la 20-a de Marto kaj ekz-on de "H-o". Mirigite mi konstatis, ke miaj ironiaĵoj ŝajnis al vi publikigindaj, kaj eĉ instigis vin plenumi la paĝojn de via revueto per pri- kaj Lantiaĵoj. Sed mi ne dubas, ke vi mem ironias, kiam vi kvalifas min "genia", kaj seriozas per la kvalifo "simplanima". Mi ja kredas, ke kelkrilate mi estas tia. Kaj estas ankaŭ fakto, ke mi estas "eksplodema", sed ne ĉiam eksplodas, se antaŭe mi preparas min por fronti al eksplodinstigaj aferoj.

Nu, ĉu vi kredos, ke mi tute ne eksplodis, sed nur ridetis, ĉe la konstato, ke vi persistas rifuzi al mi la kvalifon **sennaciulo**, tial ke mi estas **devigata** havi nacian pasporton, **por povi transiri la limojn de nia**, ho ve! **multnacia mondo?**

Kvankam mi ne esperas konvinki vin pri la realo de mia sennaciuleco, tamen mi nun ne povas deteni min demandi: ĉu la etiketo gluita sur botelo nepre pruvos, ke ĝia enhavo respondas la aĵon menciitan? Botelo plena je akvo aŭ urino povus surhavi etiketon kun la vorto **ĉampano**. Mia franca pasporto simile mensogas pri mia franceco.

Mi ankaŭ menciis fakton, miaopinie tre signifan, kiu okazis, kiam mi estis en Ĉilio. Iun tagon, en Santiago, la

katolika S-ano R. Garcia venis al mi tenante en mano ekz-on de ĵurnalo, en kiu troviĝis la informo, ke germanaj trupoj eniris Paris-on kaj defilis laŭ la avenuo de la Elizeaj Kampoj, por fine transsubiri la faman Triumfarkon. Nu, ĉe tiu ekscio mi sentis neniun indignon kaj nur ridetis. Ega estis la miro de la ĉila patrioto Garcia, "amanto de Francio", kiu havis funebran mienon. Kaj tiam li demandis min:

– Kial vi povas rideti ĉe la ekscio de tia novaĵo?

– Tial ke eble tio signifas, ke la militfino proksimiĝas, mi respondis. Kaj mi provis klarigi al li mian spiritostaton sennaciecan. Sed apenaŭ li aŭskultis kaj baldaŭ ekparolis pri alia afero...

Nu, forpasis kvar jaroj, dum kiuj, de tempo al tempo, mi korespondis kun tiu S-ano, kaj jen, antaŭ kelkaj tagoj, mi ricevis de li leteron, en kiu li diras, ke kvankam li restas konvinkita katoliko, li tamen nun simpatias al la sennaciismo, tial ke fine li komprenis, ke la Homaro suferas kaj sangas pro la ekzisto de nacioj.

Mi ne rakontis tion al vi, por instigi vin imiti S-anon Garcia. Tute ne gravas, ĉu plaĉas aŭ ne al vi trinki puran akvon, gustumante ĝin kiel ĉampanon, tial ke la botelo el kiu vi plenigis vian glason, surhavas etiketon kun tiu vorto diklitere presita...

Sed eble vi pravas, dirante, ke mi povas esti nur sennaciemulo. Mi ne pretendas esti sanktulo. Kaj, kiel vi sendube scias, eĉ sanktuloj pekis. Mi konfesas al vi, ke jam de kelkaj monatoj mi spertas ian patriotismon eŭropan. Kaj se mi ne timus kunŝovigi la brovojn de lia cenzura moŝto, mi volonte priparolus longe tiun aferon. Almenaŭ mi diru, ke

iafoje mi sentas ian francecon ĉe la penso, ke en Francio la negroj estas traktataj tute same kiel aliaj homoj...

Mi ja nun spertas eŭropan patriotismon, sed mi forte emas kredi, ke se mi legus, ke Kioto, Nara k.a. japanaj urboj, kiuj entenas artajn trezorojn, kaj kie mi havas geamikojn, estas bombe detruitaj, kiel jam okazis en Eŭropo, tiam mi tre verŝajne spertus la saman ĉagrenon kaj indignon. Tial eble ne estas tute senbaza mia pretendo esti planeda patrioto...

**Ino** kaj **ulo** havas komunan sencon; ambaŭ ja signifas: **vivaj estaĵoj**. Sekve, ilia kunesto ĉe sama radiko estas balasta. Via ekz-o "lavido" havas neniun rilaton dum la demando. **Lavido** analiziĝas **ido lava** kaj sekve havas neniun sencon. Se oni nepre volas pravigi la kuneston de **ulin**, nu, konvenus diri: fratulino, amatulino ktp. **Ulin** pensigas min pri ambaŭseksa (hermafrodita) estaĵo.

Sed longe, tre longe oni povus skribi pri tio. Kaj ne malofte venis al mi la penso, ke estas domaĝe, ke Zamenhof ne praktikadis dek jarojn pli sian lingvon antaŭ ol publikigi ĝin.

Rilate esp-on jam delonge mi alprenis kiel regulon iun diron de la tre konservativa akademiano Teofilo Kar (Cart) nome: "En esp-o ĉio, kio estas klara, tio estas bona, eĉ se ĝi ne estas tute gramatike korekta; kaj ĉio, kio estas gramatike korekta kaj ne klara, tio estas malbona". Mi citas parkere kaj eble mia cito ne estas tute laŭlitera; sed mi ne perfidas la sencon. Nu, la vortoj **Sanktino** (ino sankta), **Virgino** (ino virga) ks. estas same klaraj kiel **Sanktulo** (ulo sankta), **Virgulo** (ulo virga) ks.

La uzo de **ulin** estas same balasta, kiel la uzo de **ec** ĉe

adjektivaj (do ecaj) radikoj. Kaj se vi havas tempon kaj emon, vi povos konstati per la legado de la Biblio, ke Zamenhof jen almetis, jen forlasis la sufikson **ec** ĉe adjektivaj radikoj laŭ tute kaprica maniero.

Jam mi diris antaŭe, ke mi ne esperas vian konsenton al mia tezo pri sennaciismo; sed eble vi tamen povos konfesi al vi mem, ne publike, ke vi malĝuste kvalifas ĝin "anarkia". Se vi bv. legi aŭ relegi, miajn **Postulatojn Sociologiajn**, en kiuj mi kondensis (tro, sed mi pensis pri la formato de **Reno**) mian koncepton pri racia organizado de la homaro, vi nepre komprenos, ke ĝi ne akordas kun la teorio de Eliseo Reclu (Reclus), Kropotkin k.a. eminentaj kleruloj, kiuj argumentis, ke ĉio malbona en la socio kuŝas en la aŭtoritato, en la ŝtato. Celi mondregnon ne signifas malakcepti aŭtoritaton, regadon.

Ĉar mi tenas kopion de letero, en kiu mi traktas iomete la demandon, mi sendas ĝin al vi, petante, ke vi ne ĵetu ĝin en rubujon, sed gardu por eventuala transdono al alia persono. Klarigcele, mi diru, ke antaŭ ol liveri mian manuskripton al Amaja, mi estis sendinta ĝin al F. Azorin, kiu publikigis en **Reno**, n-o 48, sian propran planon pri organizado de l' mondo. Tiu mia manuskripto tiam havis kiel titolon **Aksiomoj Sociologiaj** kaj mi anstataŭigis la vorton "Aksiomoj" per **Postulatoj** sekve de mia korespondo kun Azorin. Samcele mi ankaŭ diru, ke, post la ricevo de mia letero, Azorin vizitis min kaj ni longe interdiskutis. Kaj poste ni ne plu havis la okazon tion fari. Menciinde estas plie, ke la arkitekto Azorin estis hispana konsulo en Francio, kiam okazis la civila milito en Hispanio. Kaj ĉi tie li havas bonan pozicion...

Eble ankaŭ utilas, ke vi sciu, ke pri la nacioj Azorin kelkrilate rezonis kiel vi. Kaj la **Cerbaj Sekrecioj** en la n-ro 52 de **Reno** estas kvazaŭ la sekvo de nia interdiskutado. Mi ŝatus, ke vi legu, aŭ relegu, tiun artikoleon, en kiu S-ro Amaja faris iun ŝanĝeton en la 11-a sekrecio; li anstataŭigis "sovaĝa besto" per io. Okaze, ke vi ne havus tiun n-on de **Reno**, mi volas almenaŭ citi la duan sekrecion:

"Esperi daŭran pacon inter nacioj estas same malsaĝe, kiel esperi bonfarton per englutado de veneno: la nacieco ja venenas la homaron".

Vi opiniis utile citi el miaj diroj pri Aŭstralio kaj eble vi pravis. Sed mi scias, ke tiam ili vekis malsimpation al mi ĉe kelkaj Samideanoj. Kredeble ili ne sciis, ke mi povas ankaŭ mallaŭdi Francion, kiel estas konstateble en mia artikolo kun titolo **Post Okdek Ok Jaroj**<sup>[1]</sup> kaj aperinta en la n-o 7-a de "S.B". Kaj mi notis, ke la materia vivnivelo de la aŭstrala popolo estas alta. Nun mi povas sincere konfesi al vi, ke la artemo de l' meksikoj neniel en mia juĝo povas kompensi la malaltan, la mizeran vivnivelon de l' meksika popolo ĝenerale. La diferenco de klasoj ĉi tie estas multe pli okulfrapa ol en Aŭstralio. Kaj nun, malgraŭ mia pli kaj pli malaltiĝanta pensio, mi vivas ankoraŭ etburĝe, kompare al la plimulto de l' meksika popolo. En Aŭstralio mi absolute ne povus nun vivi per mia nuna enspezo.

Almenaŭ vi bonvolu neniam forgesi, ke en Sidnej kaj Melburn mi povis akiri vere bonajn geamikojn, inter kiuj mi kalkulas vin, malgraŭ kelkaj miskomprenetoj okazintaj inter ni...

Eble mi jam tro longe babilis, tamen mi ankoraŭ volas konfirmi mian antaŭan diron pri mia sano. Mi ne scias tute ĝuste la kaŭzon de mia nuna bonfarto, sed estas fakto, ke mi sentas min vigla, kiel en mia dudekjaruleco. Kaj kiam mi promenadas, tiam okazas iafoje, ke mi kantetas laŭ diversaj arioj, kiujn mi mem elpensas, jenajn frazojn:

"Mi junas kaj sanas, kiel dudekjarulo" – aŭ

"Kiel dudekjarulo mi junas kaj sanas".

Sed preferinde mi diru, ke ĉiumatene mi gimnastikas dum 10 minutoj, 5 antaŭ duŝo kaj 5 poste. Krome, dum la tago mi kelkfoje spiras profunde laŭ la metodo rekomendita de la "yogis" el Hindio, kaj penas meti mian menson en harmonio kun la kosmaj leĝoj, kiujn nia racio ne povas detale kaj precize koni, sed kiujn eble nia intuicio povas senti.

Bedaŭrinde mi ne kapablas forgesi la kruelajn frenezaĵojn, kiujn plenumas "homoj", kiuj ekstere similas nin, sed interne tre malsimilas. Fakte, ili ne estas homoj sed naciuloj... Sekve mia spiritostato kaj humoro ne estas kontentigaj. Kaj tial ke mi estas devigata resti ĉi tie, mi sentas min kiel en malliberejo. Krome, mia pensio pli kaj pli reduktiĝas dum la prezo de vivnecesajoj daŭre pligrandiĝas. Eble baldaŭ alvenos tempo, kiam mi ne plu povos elspezi por poŝtmarkoj...

Por ke vi povu ĝuste kompreni mian koncepton pri seksrilatoj mi devus skribi tre longe. Nur mi diru, ke la monogamio ŝajnas al mi neracia sistemo. Mi kredas, ke viro povas ami samtempe du, tri, eble kvar virinojn, kies ecoj estas reciproke kompletigaj. Eble virino ankaŭ povas ami samtempe kelkajn virojn; sed tion ĉi lastan kompreneble mi ne povas scii laŭsperte... Bondezire kaj sincere via.

# Piednotoj

1. [↑](#) En tiu artikolo mi komparas la sintenon de la Paris-anoj, en 1914, rilate al la germanoj, kun tiu de la Tokio-anoj, en 1937, rilate al la ĉinoj.



# EL LETERO AL K-DO D.

Meksiko, 23-7-1944

Kara Amiko,

... Tre interesis min viaj diroj pri britusona influo en Argentino. Pri Meksikio mi povas diri la samon. Cetere mi ne scias precize kial, sed ĉi tie pli kaj pli svarmas la usonanoj. Kaj preskaŭ ĉiutage mi havas la okazon aŭdi almenaŭ unu meksikon, kiu diras al mi: "Thank you, sir", tial ke li kredas, ke mi mem estas usonano. Kaj en grandaj magazenoj kaj luksaj restoracioj oni preskaŭ ĉiam estas alparolata anglalingve.

Tiu konstato kelkrilate apogas la marksan teorion: kiu ĉi tie posedas dolarojn, povas fari ŝatindan mondonacon al servistoj kaj similuloj...

Oni ne povas nei la fakton, ke la anglosaksaj popoloj estas pli organizkapablaj ol la latinaj. Tial mi volonte konsentus, ke ili organizu la ekonomian vivon en la tuta mondo. Sed rilate arton mi abomenus ilian hegemonion. Kaj la Historio instruas, ke Arto povas venki per tute pacaj rimedoj. Ekz-e, la Romanoj konkeris Grekion milite; sed poste Grekio konkeris Romanion arte...

Eĉ pli interesis min viaj sciigoj pri d-ro J.A.Q.G. Se fakte li konsentis rilati tute neŭtrale kun la aliaj membroj nekatolikaj de la Ligo, kaj se ĉi tiuj lastaj riproĉis lian katolikecon, tio signifas, ke li estas pli larĝmensa kaj pli

tolerema ol ili. Kaj tio pensigas min pri Mikaelo Serve (Servet), kiu estis vive brulmortigita laŭ la instigoj de Kalvin; kio pruvas, ke la protestantoj ne estis malpli fanatikaj ol la katolikoj. Kaj mi ne dubas, ke se mi mem ĉeestus en Stalino, jam de longe mi ne plu vivus – kio, cetere, ne tre gravus. Ĝenerale la homoj bezonas **kredon** kaj ĉiu **firma** kredulo nepre estas fanatika. Tian konstaton jam delonge mi faris kaj ĝi inspiris mian paroladon en Antverpeno dum la jaro 1934, kaj kiu estas eldonita kun la titolo [Absolutismo](#).

Mi respektas ĉiun **sincerulon**; ne gravas al mi, ĉu li estas katoliko, budaisto, islamano aŭ bolŝevisto. Sed, kompreneble, kondiĉe, ke tiuj sinceruloj ne celu trudi al mi **perforte** sian kredon...

Kiam mi estis en Santiago, mi povis sperti, ke la katoliko Renato Garcia estas malpli fanatika ol la Stalinano Kastijo. Kaj antaŭnelonge mi ricevis de tiu ĉilia katoliko leteron, en kiu li konfesas sian nunan simpation al la sennaciismo. Oni neniam povos unuigi la mondon **per unu sola kredo**, religio aŭ filozofia sistemo; tion oni povas fari nur per toleremo al ĉiaj kredoj.

Sed mi emas... kredi! (pensi), ke la toleremaj eklezianoj ne havas absolutan kredon; dubo iafoje atakas ilin; sed tial ke ili sentas la neceson de kredo, ili kvazaŭ alkroĉiĝas al sia propra. Kredeble s-ro J.A.Q.G. apartenas al tiu kategorio de homoj.

Mi mem estis kredulo ĝis 1914-15. Antaŭe mi estis katolika kredulo ĝis mia 17-18-a jaro; kaj mi poste forlasis la katolikan kredon por alpreni la anarkian. Kaj de kiam mi fariĝis skeptika pri anarkismo, de tiam mi ofte povis sperti,

ke la skeptiko ne estas agrabla animstato. Sed mi ĉiam restis saturita je idealismo. Kaj mi pensas: se ne eblas atingi absolutan belon, absolutan bonon, absolutan juston, estas tamen dezirinde, ke oni celadu per ĉiuj fortoj al tiuj ecoj. Ne eblas konstrui, ekz-e, radon absolute rondan; sed ĉiu radfaristo devas penadi al tiu absoluta rondeco.

Ĝis nun tia idealismo estis por mi sufiĉa viv-, laborinstigo. Celi al universala paco, al starigo de justa sociordo en la mondo ŝajnas al mi idealo nepre inda je ĉiuj, ĉiaj penadoj. Kaj ŝajnas al mi klare, ke la homoj devas esti kapablaj interkompreniĝi por povi efektive interfratiĝi. Tial mi sincere ĝojas, kiam esp-o progresas; eĉ se tio okazas en reakciaj medioj...

# LETERO AL J.A., Buenos-Aires

Meksiko, 25-12-1944

Estimata Idealistino,

Hieraŭ mi ricevis kun surprizego vian leteron de la 5-5-44. Mi estis tute forgesinta, ke iam mi skribis al iu spiritualistino el Buenos-Aires. Kaj tiam mi ne supozis, ke ŝia respondo bezonos 7 monatojn por atingi min. Sed iom indignite mi konstatis, ke via letero estas nacilingve skribita. Mi ne estas meksiko kaj la hispana lingvo ne estas mia gepatra. Mi naskiĝis en Normandio kaj vivis en Paris dum 40 jaroj. Sed, se via letero estus en franca lingvo mi sentus la saman indigneton. Vi metis vian anoncon en esp-ista gazeto kaj sekve mi rajtis esperi ricevi de vi leteron en esperanto..

Sed, leginte, ke vi vizitis Azion, Afrikon kaj Eŭropon, mi ne povis deteni min pensi, ke korespondadi kun vi povas esti tre interesa, tial ke mi mem vizitis, krom ĉiuj landoj el Eŭropo, Japanion, Aŭstralion, Nov-Zelandon, Urugvajon, Argentinio, Ĉilion; kaj mi estas en Meksikio jam de 4 jaroj, tial ke la milito malebligas, ke mi povu daŭrigi mian migradon. Sekve, mi tre volonte akceptos de vi alian leteron nacilingve skribitan; sed nur unu. La tempo, kiu pasos inter la sendo de tiu via letero kaj mia respondo al ĝi pli ol sufiĉos, por ke vi povu ellerni esp-on, la sennaciecan lingvon.

Nu, en tiu espero mi tuj diru, ke mi ne estas spiritualisto, sed tre interesiĝas pri tiu filozofia doktrino, kiel pri ĉiuj aliaj,

cetere. Mi ne kredas je la ekzisto de Dio, almenaŭ je tiu, kiu estas prezentita en **La Sanktaj Skriboj** judaj kaj kristanaj. Sed mi **ne neas** la ekziston de dio, tial ke nei kaj **aserti** ĝian ekziston estas **esence** la sama afero. Mi do ne estas deisto nek ateisto. Kaj mi respektas ĉiujn sincerajn kredulojn. Se Dio fakte ekzistas, Ĝi do povas senpere paroli al mi, evidentigi sian ekziston. Mi ĉiam penadis esti en spiritostato taŭga por akcepti la veron.

Sed, se Dio volas utiligi perantinon, por konduki min al la Vojo ĝusta, kaj se vin Ĝi elektis, nature mi estas preta aŭskulti ĝiajn instrukciojn el via buŝo.

Por ke vi povu iomete kompreni mian nunan staton de kleriĝo, mi diru, ke nun kuŝas sur mia skribotablo: 1) **La Sankta Biblio** en la traduko de Zamenhof; 2) **La Korano** en franca lingvo; 3) **Budaista Biblio** en angla lingvo; 4) **Dekkvar lecionoj pri la joga filozofio** en hispana lingvo...; 5) **Budao** en esperanto, 50-paĝa broŝuro de japano, en kies hejmo mi vivis dum kvar monatoj en la jaro 1937. En Japanio mi restis dum 13 monatoj. Se mi aldonas, ke mi legis relative multan literaturon pri spiritismo, pri la Tutmonda Institucio de la **Nepersona Vivo** ktp, ks, vi certe konvinkiĝos, ke mi estas ia Verserĉanto, kiu ĝis nun ne sukcesis trovi kontentigajn respondojn al la demandoj, kiuj naskiĝis en mia cerbo...

Por ke vi ekkonu mian fizikan eksteriĝon, mi aldonas etan foton.

Bondezire kaj homece<sup>[1]</sup> mi salutas vin

**E.A. Lanieps**

# Piednotoj

1. [↑](#) Vi komprenu, ke per tiu esprimo mi volas diri, ke ĝenerale la dupieduloj, kiuj interbuĉiĝas sur batalejoj estas **unue** kaj ĉefe angloj, francoj, germanoj, rusoj, ktp., kaj nur **due** homoj.

## NACIA HONORO

Iam mi difinis la terminon **nacio** jene: "Aparato farita el reg- kaj potencavido, ĵaluzo, malamo kaj stulto, kiun uzas suvereno, diktatoro, partio aŭ klaso, por akiri famon, honorojn, bonstaton ktp. je la malprofito de l' granda plimulto de ties aparateroj, t.e, la simplaj nacioj.

"Memkompreneble, aparato utilas nur al ties uzantoj, t.e. la registoj".

Nun tiu difino ŝajnas al mi ankoraŭ ĝusta, sed iom mankohava: necesas aldoni, ke tia "aparato" estas parte transportebla. Dum la lastaj jaroj oni ja povis konstati, ke pluraj nacioj alilokiĝis, aŭ, pli precize, duopiĝis. Ĉe la antaŭeniĝo de Hitleraj armeoj, regantoj de la invaditaj nacioj forkuris, kunportante trezorojn, per kiuj ili povas ĝuadi komforton aliloke. Kaj tiuj forkurintoj ne hontas bombaste proklami, ke ili konsistigas la veran, la "liberan" nacion. Kaj same senhonte tiaj nacioprofituloj sin turnas per la radio aŭ alirime al la forlasitaj nacioparateroj por ilin instigi al batalado kontraŭ la invadintojn. Ĉe legado de tiuj proklamoj mi ĉiam sentis naŭzan indignon...

Sed aparte naŭzis min la sinteno de la "liberaj" poloj, tial ke ĝi rememorigis min pri tre tipa ekzemplo de **nacia honoro** ĉe iliaj antaŭuloj el la 18-a jarcento. Temas pri Maria Valevska kaj Napoleon.

Pro obeemo al siaj gepatroj, tiu polino edziniĝis, en sia 16-a jaraĝo, kun maljuna magnato el sia lando, A.C. Valevski, al kiu ŝi naskis filon. Nu, kelkajn jarojn poste, en 1807, Napoleon trapasis la vilaĝon, kie ŝi loĝis, kaj vidante ŝin li forte enamiĝis. Tiam li tuj komencis klopodojn por atingi sian celon. Ekz-e, li skribis al ŝi:

"Nur vin mi vidis, nur vin mi admiris, nur vin mi deziras. Senprokraste vi respondu, por kvietigi la senpaciencon ardon de N."

Sed la edzino de Valevski indigniĝis ĉe la ricevo de tia letereto kaj ne respondis. Ŝi ja sentis sin ofendita kaj volis resti fidela al sia edzo. Nu, la princo Jozefo Poniatoŭski, estro de la provizora registaro pola, kiu mem portis la letereton de Napoleon, insistis, por ke ŝi cedu al lia deziro. Vane! Tiam, la postan tagon, de la mateno ĝis la vespero, la plej famaj magnatoj polaj sinsekve vizitis la edzinon de Valevski, kun la celo atingi, ke ŝi kokru sian edzon. Sed tiuj klopodoj ne sukcesis, kaj tiam la anoj de la provizora registaro skribis al ŝi jenon:

"Sinjorino, etaj kaŭzoj ofte okazigas egajn efikojn. En ĉiuj epokoj, virinoj havis grandan influon en la mondpolitiko. Se vi estus viro, vi oferus vian vivon sur la altaroj de la patrio. Estante virino, estas aliaj aferoj, kiujn vi povas kaj sekve devas fari, eĉ se ili estas al vi penigaj.

"Ĉu vi kredas, ke Ester liveris sin pro amo al la reĝo Aĥaŝveroŝ? Ĉu la teruro, kiun li sentigis al ŝi, finfine tiagrade, ke ŝi svenis antaŭ lia rigardado, ne pravas, ke neniel efikis la korinklino en tiu kuniĝo. Ŝi oferis sin por savi sian nacion kaj havis la gloron ĝin savi.



"Dio volu, ke ni mem povos diri la samon pro via gloro kaj nia feliĉo".

Maria Valevska, kies menso estis saturita per nacipatriota edukado, finfine konsentis prostitue liveri sin al Napoleon. (Mi ja diras "prostitue", tial ke seksrilatoj sen reciproka amo aŭ amoro de la paro estas fakte prostituigo). Tiele, antaŭ 138 jaroj Polio liberiĝis kaj restis dum kelka tempo, suverena, sendependa, libera ktp. nacio. Poste, Germanio kaj Rusio denove "subpremis" ĝin kaj dividis inter si. Kaj, en 1918, la "subpremata", "martira", nacio refariĝis "libera"...

Nu, kion tio signifas? Faktoj respondu mem tiun demandon. En 1922 okazis ĝenerala balotado kaj elektiĝis parlamento, kies ekzisto estis kvarjara. En 1926 la marŝalo Pilsudski eniris Varsovion kun siaj trupoj, renversis la registaron kaj fariĝis diktatoro, imite al Musolini kaj Hitler. La konstitucio el 1921 estis nuligita kaj stariĝis nova, kiu deklaris nelaŭleĝaj ĉiujn partiojn, krom unu, nomita **Kampado de Nacia Unuiĝo**.

Tia estis la stato en Polio, kiam eksplodis la nuna milito. Regis tie la plej aĉa feŭdismo de bienposedantoj kun mizera stato de la grandega plimulto de l' popolo. La vivnivelo de l' germana popolo, sub la diktatoreco Hitlera, estis konsiderinde pli alta ol tiu de l' pola popolo, sub la Pilsudskia diktatoreco. Sekve, la polaj kamparanoj kaj laboristoj havis absolute neniun intereson defendi la **suverenecon** de Polio, de ento profitdona nur al tre malgranda malplimulto da naciprofituloj. Sed tiauloj, kies menso iel similas tiun de prostituistoj, sukcesas trompi la naivan popolon per belsonaj vortoj kiel "libero", "demokratio", "nacia honoro" ks. kaj tiel

la trompitoj konsentas morti aŭ mortigi por defendi alies interesojn. Por la naciprofituloj la simpla popolo ludas similan rolon, kiel tiu de prostituino rilate al sia prostituisto. Kaj estas fakto, ke virino povas eĉ amegi sian ekspluatiston.

La ekzisto de nacioj estas plago por la homaro. Ni devas celi al sennacieca stato kaj tiucele saturi nian menson per planeda patriotismo...

**E. Lanti**  
(Majo 1945)

Meksiko, Julio 1945

## PRAVIS HITLER...!?

En la januara n-o (1945) de **SAT-Amikaro**, aperanta en Paris, troviĝas raporteto, kiu, miaopinie, indas esti komentata. Temas pri renkontiĝo, kiu okazis en la ĉefurbo de Francio, dum la jaro 1942-a, inter germana soldato kaj du Paris-anoj. Iun tagon, ĉi tiuj lastaj promenis enurbe kaj havis verdan stelon ĉe butontruo de sia vesto. Tial la germano alparolis ilin dirante: "Saluton, s-anoj! Ĉu vi estas burĝaj aŭ laboristaj esp-istoj?" Surprizite sed senhezite la du k-doj respondis: "Ni estas SAT-anoj!..." (Anoj de **Sennacieca Asocio Tutmonda**). Tiam la okuloj de la germano ekbrilis pro ĝojo kaj li tuj aldiris: "Mi ankaŭ estis SAT-ano ĝis la ekregado de Hitler..." Li parolis flue esp-on kaj klarigis, ke en la urbo, kie li vivis, neniam la tieaj k-doj ĉesis kaŝe kunveni, por buŝe praktiki la lingvon. Sed mi citu laŭvorte la raporton:

"Kiom ĝojiga estis la konatiĝo! La tutan tagon ni promenis tra la urbo kaj vespere tre malagrabla estis la disiĝo. Sed li promesis viziti nin hejme iun vesperon, kaj fakte li venis. Denove ni babilis vere intime, kamaradece, fratece. Poste li sendube foriris el Paris, ĉar ni ne plu vidis lin... Kie ci estas nun, frato?..."

"... Fakto estas, ke post dek jaroj da blanka teruro, iu SAT-ano el S... apud la Rejno, parolas pli flue la lingvon ol

multaj el ni kaj pensas pli **sennaciece** ol iuj "esp-istoj". Tial mi volas tuj saluti kaj gratuli la SAT-anojn el Germanio kaj aliaj landoj blankaj, kiuj konservis malgraŭ ĉio nian idealon en la profundo de sia koro. – Andreo."

Kredeble legantoj pensos, ke tia fakto ne kongruas kun la titolo de ĉi tiu artikolo. Klarigcele mi do konigu, kiel Hitler pravigis la malpermeson je propagando kaj instruado de esp-o en Germanio. Tiam estis publikigita interalie jeno:

**"La praktikado de sennacieca lingvo kun eksterlandanoj povas nur difekti la naciecan senton ĉe ties praktikantoj".**

Jes ja, tiel estas, kiel pruvas la ĉi supre raportita fakto. Cetere, mi povas menciigi aliajn el mia propra sperto. Sed eble sufiĉos, ke mi senhonte konfesu, ke lastatempe, kiam mi legis, ke Kioto, Nara kaj aliaj urboj japanaj, kiuj entenas artajn trezorojn kaj kie mi havas geamikojn, estis bombardataj, tiam mi spertis la saman ĉagrenon, kiel antaŭe ĉe la ekscio, ke francaj urboj estis bombe detruitaj. Per mia longdaŭra **praktikado** de esp-o kun homoj el plej diversaj mondpartoj mi sekve perdis ĉian naciecan senton kaj akiris ian patriotismon planedan.

Ĉie en la mondo estas bonaj kaj malbonaj homoj. Kaj la nacieca patriotismo povas fari sovaĝan beston eĉ el plej bona homo. Pri tio tre tipa estas la angla moto: "Right or wrong, my country"; kio por angla patrioto signifas, ke li defendas sian landon, ĉu ĝi pravas aŭ malpravas.

Nu, se fakte Hitler pravis en sia opinio pri **praktikado** de sennacieca lingvo, tio signifas, ke ĉiuj liaj kontraŭuloj malpravas, malatentante la esp-an aferon. Kaj mi firme

konvinkiĝis, ke ĉiuj homoj, kiuj ne **praktikadas** esp-on, tiuj havas sian parteton da respondeco en la milito. Ili kvazaŭ konsistigas naciecan paston, kiun knedas regavidaj politikuloj, kaj tiel ebligas, ke diverslandaj patriotoj interbuĉiĝu.

Necesas ja penadi por senigi sin je nacieco kaj tiel atingi nuran sentkapablon homecan, se oni sincere volas agadi efike por starigo de daŭra paco en la mondo.

Kiu ne lasas sin trompi per bombastaj frazoj de regnestroj kaj diplomatoj, tiu povas klare konstati, ke la nunaj rilatoj inter la "unuiĝantaj nacioj" jam entenas multajn ĝermojn de malpaco, kiuj kreskos ĝis okazigo de tria mondmilito. Tial por mi fariĝis kvazaŭa aksiomo tio, kion mi jam diris en **Reno** antaŭ tri jaroj, kaj ne laciĝos ripeti:

"Esperi daŭran pacon **inter nacioj**, estas same malsaĝe, kiel celi bonfarcon per englutado de veneno: la nacieco ja venenas la homaron."

**E. Lanti**

(Tiu artikolo aperis en "Renovigo", n-ro 71, aŭgusto 1945)

## K-DO LANTI RAKONTAS PRI MEKSIKIO

Ĉe la unua promenado, kiun mi faris tra la antaŭurba kvartalo de Meksiko, tuj altiris mian atenton aplaŭdsimila bruo, kiun mi aŭdis preskaŭ ĉiupaŝe. Maldiskrete mi proksimiĝis al iu pordo, kie aŭdiĝis tiu bruo, kaj tie ekvidis ses virinojn, kiuj staris ĉirkaŭ granda forno, kaj platis bulojn el farunpastro, frapante ilin aplaŭdmaniere. Aro da rondaj, plataj kaj maldikaj tortetoj bakiĝis sur la forno.

Tiaj tortetoj el maizfaruno konsistigas la ĉefan nutraĵon de l' Meksikia popolo. Tritika pano estas ĉi tie preskaŭ lukso.

Biero, vino, brando estas ankaŭ ia lukso. La ordinara trinkaĵo de l' popolo estas la **pulkeo**, alkoholaĵo, suĉita el agavo, sufiĉe ebriiga kaj tre malkara. La pulketrinkejoj donas vere originalan aspekton al la laboristaj kvartaloj en Meksiko.

Estas malpermesite al neplenaĝuloj kaj virinoj eniri tiujn drinkejojn. Sed tial ke mi estas eĉ pli ol sufiĉe plenaĝa, foje mi eniris iun el tiuj ejoj. Nenie kaj neniam antaŭe mi vidis pli naŭzan spektaklon. Estis tie aro da ebriuloj, kiuj krie parolaĉis antaŭ vendotablo, dum aliaj urinis aŭ vomis kontraŭ muro paralela kaj ne malproksima de l' tablo. Ĉio aspektis malspure kaj haladzis. Parenteze mi diru, ke pli poste mi rimarkis, ke eĉ en bier- kaj vintrinkejoj, kiuj estas pli

decaspektaj ol la pulkejoj, tie ankaŭ urinejo troviĝas en la trinkĉambro.

Virinoj kaj infanoj ne rajtas eniri en la pulketrinkejojn, sed ili povas ricevi la ebriigaĵon el speciala aperturo, antaŭ kiu preskaŭ ĉiam staras klientinoj. Ricevinte la malkaran trinkaĵon ĉu en poto, kruĉo, botelo aŭ sitelo, ili ĝenerale portas ĝin hejmen, sed ne ĉiuj: oni nemalofte povas vidi kelkajn, kiuj trinkas en la strato mem. Apud la pulkejoj ĉiam staras aŭ kaŭras aro da gedrinkuloj, kiuj trinkadas laŭvice el sama ujo. Ordinare tiuj pulketrinkuloj estas ĉifone vestitaj, malpuraj, naŭzaj, kompatindaj...

Kio donas ankaŭ specialan fizionomion al la ĉi tieaj stratoj, tio estas la multnombraj ŝarĝportistoj. Jen unu kun ŝranko surdorse, jen alia kun lito, jen alia kun skribtablo, jen kelkaj kun sakoj plenaj de mi ne scias kion; jen alia kun kestego, en kiu premiĝas meleagroj...

Evidente, azenoj, ĉevaloj kaj aŭtoj ne povas konkuri kun tiuj dupieduloj, kiuj aspektas pli bestece ol homece. Ili ĉiuj estas klientoj de pulkejoj, marŝas nudpiede aŭ kun sandalaĉoj, kiuj kovras nur parte la piedojn kaj ebligas, ke oni vidu la amasiĝintan malpuraĵon, kiu, kun la tempo, akiris aspekton de io normala, natura.

Tiuj portistoj estas ĉiuj indoj aŭ mestizoj. En iu historio pri la konkero super la lando fare de hispanoj, mi legis, ke ĝis tiam ĉevaloj, azenoj, muloj k.a. ŝarĝbestoj estis nekonataj en la Azteka Imperio. Homoj portis ĉion surdorse aŭ surŝultre. Jarcentoj forpasis; ĉevaloj, azenoj, muloj, bovoj ekzistas grandnombre en Meksikio; la kristanismo anstataŭis la idolanan religion, sed malgraŭ tio homoj estas ankoraŭ

utiligataj kiel ŝarĝbestoj...

Hominoj ĝenerale ne surmetas ĉapelon, kio ŝajnas al mi tre laŭdinda, ili portas ŝalon sur la ŝultroj kaj dorso kaj iafoje, en preĝejo ekz-e, ili kovras per ĝi sian kapon. Tiu ŝalo servas ankaŭ por porti surdorse aŭ ĉeflanke infaneton. Granda nombro da virinoj ne nur iras sen kapvesto, sed marŝas ankaŭ nudpiede.

Ĉe la kamparo tiaj nudpiedinoj estas la plimultnombraj. Granda parto el la loĝantoj ne havas litojn hejme t.e. en siaj kabanaĉoj; ili dormas sur mato kaj sin kovras per ĉifonoj.

La spektaklo videbla surstrate en kelkaj kvartaloj estas io nepriskribebla. Ĉiupaŝe oni tie kolizias kun vendisto, kies varoj (nemalofte nur kelkaj fruktoj) sterniĝas sur la trotuaro. La preterpasantoj senĉese devas atenti, por ne meti la piedojn sur vendotaĵojn. En la centro de la urbo oni estas senĉese tedata de loteribiletvendistoj aŭ de ŝupurigistoj; ili ja svarmas en kelkaj lokoj kiel kuloj en marĉo.

Sed tiu drinkema kaj ĉifonvestita popolo estas la plej pia, kiun mi iam vidis. Multnombraj estas la preĝejoj kaj kiam homulo preterpasas iun el li, la kapveston li demetas. Eĉ ebruloj tion faras. En la didomoj (katolikaj) oni povas vidi gepiulojn, kiuj kisas la nepuran plankon kaj trenas sin surgenue de la ĉefpordo ĝis la ĉefaltaro kun brulanta kandelego ĉemane. La vendo de kandelegoj estas tiel same prospera negoco ĉi tie, kiel tiu de pulkeo. Estas evidente, ke tiuj piuloj estas sinceraj.

Notinda ŝajnas al mi la fakto, ke ĉefe la Sankta Virgino estas ĉi tie kultobjekto. Preskaŭ en ĉiuj preĝejoj Ŝi venke konkuras kun sia filo, rilate la nombron de altaroj, statuoj kaj



pentraĵoj...

Kontraste al la bone prizorgataj preĝejoj, la stato de la ŝtataj lernejoj estas vere mizera kaj apenaŭ kredebla: pordoj kaj fenestroj difektitaj, vitraĵoj rompitaĵoj, ĉio kaduka, malpura kaj senorda. Eĉ en Ĉilio, kie la vivnivelo de l' popolo estas proksimume la sama kiel ĉi tie, mi ne vidis tiel mizerajn lernejojn. Kaj nunjare ĵurnaloj raportis, ke en la **Federa Distrikto**, t.e. unu el la 28 "ŝtatoj" aŭ distriktoj de Meksikio, mankis loko en lernejoj por 50 000 lernantoj! Kioma estas la nombro por la tuta lando? mi nun ne scias.

\*

Oni bonvolu ne kredi, ke la tuta ĉefurbo de Meksikio havas la aspekton, kiun mi skizis. Estas agrablaj kvartaloj, kie la stratoj estas pavimitaj kaj pulketrinkejoj nevideblaj. Tamen, eĉ en tiuj burĝaj restadejoj oni povas vidi rubon en la stratoj dum la tuta tago.

En burĝaj kvartaloj troviĝas privataj lernejoj mastrumataj de fremduloj: angloj, francoj, germanoj, usonanoj k.a. Tiuj fremduloj eĉ havas sian tombejon apartan, kiun ĉi tie oni nomas "panteon". La termino "cementerio" (tombejo) estas kredeble tro vulgara por paradema popolo, kiu tro ofte estas kontentigata per belsonaj paroloj trompaj. Eble la ĉi tieuloj kredas, ke ili diiĝos postmorte kaj pro tio bezonas diejon.

Bedaŭrinde ne ankoraŭ ekzistas en Meksikio esperantista "panteon" kaj tial mi ne deziras resti en tiu lando ĝis mia morto...

Ĉinoj konsentas esti entombigitaj nur en sia lando, kaj

sekve la kadavro de tiuj, kiuj mortis eksterlande, estas transportata al Ĉinio. Pro tio ne ekzistas ĉi tie "panteon" por ĉinoj. Ili tamen estas multnombraj kaj eĉ monopoligis la mastrumadon super la mezklasaj restoracioj.

Kio ankaŭ altiris mian atenton en la komenca tempo de mia ĉeesto en Meksikio, tio estas la senĉesa maĉado de multaj personoj.

Mi eĉ emis kredi, ke ili apartenas al iu raso el remaĉuloj. Oni ja povas ĉi tie vidi virojn kaj inojn, kiuj senĉese movas la suban makzelon kaj maĉas, maĉadas, mi ne scias kion, kaj ŝajne nenion englutas. Eble estas pro tio, ke la ĉi tieuloj havas sanajn dentojn.

Sed tiu ŝatinda dentostato havas bedaŭrindan konsekvencon ĉe policistoj kaj ŝtatoficistoj: ili ĉiuj mordas. La "mordida" (mordo) estas iu tre karakteriza moro en Meksikio. Klarigo necesas: la **mordo** de policisto, ekz-e, signifas, ke donacante al li monon, oni povas tute malatenti la leĝon. La mordado estas tiel bona negoco, ke lastatempe ĵurnaloj raportis pri falsaj policistoj, kiuj mordis. Tiu nelojala konkurenco kompreneble ne povis daŭri longe.

\*

Ofte mi legas en gazetoj, ke en 1910 la meksikia popolo faris revolucion kaj konkeris liberon. Mi ne scias kian; eble temas pri la libero ĵeti ĉian rubon surstraten, fumadi en tramoj kaj busoj kaj bruadi tage kaj nokte. Aŭ ĉu temas pri la libero por laboristoj manifestacii surstrate, organizi festotagojn honore al la armeo kaj ĉiaokaze kriadi: Vivu

Meksikio!?

La Unuan de majo, la sindikatanoj havas la liberon manifestacii, sed ne por foresti la manifestacion. Kiu forestas, tiu ricevas monpunon je tritaga salajro. La laboristaj gvidistoj formas la embrion de nova klaso; ili enspezas duoble pli ol metiisto, kvaroble pli ol simpla laboristo kaj certe dekoble pli ol la bestsimilaj portistoj pri kiuj mi parolis. Tiuj gvidistoj ne ebrigas sin per pulkeo, sed per biero, vino kaj brando.

(...) Antaŭ unu jarcento Usono konkeris grandegan parton de Meksikio, kaj tie la vivnivelo de l' popolo estas konsiderinde pli alta ol en la nekonkerita, sendependa, suverena, libera ktp. parto. Tial, se mi estus Meksikia laboristo, mi dezirus, ke Usono denove invadu la landon kaj tute konkeru ĝin. Sed certe mi ne havus la liberon diri tion publike al miaj samsortanoj...

Ĝis nun mi ne havis la oportunun vivi surkampare en Meksikio, sed dum vojaĝoj tra la lando mi povis ekvidi la loĝejojn de kamparanoj; ili ĝenerale estas kabanaĉoj ne eĉ komparindaj al staloj el multaj landoj.

\*

Turisto, kiun interesas nur pitoreskaĵoj, pentrus tute alian bildon. Veturante en la ĉefurbo aŭtomobile, li eĉ ne vidus la spektaklojn, kiuj ĉiutage naŭzas min. Li sendube rakontus pri la kolosaj piramidoj el Teotihuakan kaj el Ĉolula, kiujn mi ankaŭ vizitis, kaj kiuj atestas pri la grado de kulturo de la Aztekoj, antaŭ la hispana konkerero; li dirus sian emocion

antaŭ la belaj pejzaĝoj, antaŭ la mirindaj sunmalleviĝoj tropikaj ktp. Sed mi ne povas deteni min esti ĉefe interesata pri la vivo de miaj samgentanoj.

Antaŭ ol meti la finan punkton al ĉi tiu skribo, konvenas diri, ke la meksikia popolo estas artema. Bonstataj viroj, kiuj ankoraŭ vestas sin per nacia kostumo, aspektas tre pitoreskaj kun sia diversforme kaj plurkolore dekorita ĉapelo, kies ĉirkaŭrandoj larĝe elstaras, kun sia ĵaketo ankaŭ brile dekorita, kun siaj pantalonoj, alĝustigitaj al la formo de l' gamboj, kaj kiuj ankaŭ havas dekorojn. Sed tiuj bildoj nur de tempo al tempo prezentiĝas al mi, dum ĉiutage miaj okuloj vidas ĉifonulojn, mia nazo flaras malbonodorojn kaj miaj oreloj aŭdas kriaĉojn el la drinkejoj.

("Sennaciulo", septembro 1946)

# KIEL NASKIĜIS KAJ DISVOLVIĜIS LA FAŜISMO?

El diversaj fontoj mi eksciis, ke eĉ inter esp-istoj troviĝas uloj, kiuj malamegas senescepte **ĉiujn** germanojn; sekve, eĉ siajn "samideanojn" el Germanio. Evidente tiaj malamantoj ne kapablas kompreni, kial la demagogaj naci-socialistoj sukcesis influi la menson de la plimulto el la germanoj.

Unue, konvenas ne malatenti la fakton, ke la iniciatinto de l' faŝismo ne estis la aŭstro Hitler, sed la italo Musolini. Kaj kial li sukcesis akiri la regadon en Italio?

Por ĝuste respondi tiun demandon, necesas memori, ke en la unua mondmilito Italio – kaj Japanio – estis alianciĝinta kun Britio, Francio ktp. Sed en la packontraktoj ĝiaj petoj estis grandparte malatentataj, kaj pro tio okazis granda elreviĝo ĉe la itala popolo.

Ne eblas en ĉi tiu artikoleto mencii la petojn de la itala registaro tiama. Sed sufiĉas scii, kaj ne forgesi, ke Italio estas **superloĝata** lando, malriĉa je naturaj krudaĵoj. Oni prezentu al si, ke 45 milionoj da italoj devas vivi sur areo je 312 000 kvadrataj kilometroj. Aliflanke, nemalotentenda estas la fakto, ke en multaj ne dense loĝataj landoj estas starigitaj limigoj al la enmigrado. Tial Musolini havis tre bonan grundon por sia agitado.

Nu, Germanio same estas **superloĝata**: tie 70 milionoj da homoj disponas malpli grandan teritorion ol la 42 milionoj da francoj.

Similan konstaton oni povas fari pri Japanio kaj el tio nepre deduktiĝas, ke tiuj 3 **superloĝataj** landoj pli bezonas koloniojn ol Britio, Francio kaj Usono. Kiam senantaŭjuĝe oni frontas al tiuj faktoj, tiam klare aperas unu el la ĉefaj kaŭzoj de la naskiĝo kaj elvolviĝo de la nigra, bruna kaj flava faŝismoj. Kaj mi estas firme konvinkita, ke se ekzistus en la t.n. landoj demokrataj similaj kondiĉoj, tie ankaŭ aperus demagogoj el la speco de Musolini kaj Hitler, kiuj sukcesus akiri la regadon.

Estas mensoge aserti, ke la germana, itala kaj japana popoloj pli militemas ol aliaj. La Historio male pruvas, ke dum la lastaj jarcentoj la nacioj, kiuj plej ofte militis estis Britio kaj Francio.

– Sed Belgio kaj Nederlando estas ankaŭ superloĝataj landoj kaj tamen tie ne ekregis faŝistoj...

– Jes, sed la unua landeto posedas en Afriko kolonion je 2 385 120 kv. kilometroj, kaj la dua, koloniojn je 1 900 000 kv. km en Oriento...

Kaj kiam oni prezentas al si, ekz-e, ke tuta kontinento, kiel Aŭstralio, havas nur 8 milionojn da loĝantoj, tiam oni povas facile kompreni, ke tia nenormala stato, kompare al Eŭropo, Ĉinio kaj Japanio, entenas militĝermojn.

Neniam regos daŭra paco sur nia planedo ĝis ties naturaj riĉaĵoj estos dispone al ĉiuj teranoj senescepte; alivorte, ĝis ekzistos mondmastrumado, t.e. sennacieca mondo.

Povas esti, ke eĉ inter la SAT-anoj estas kelkaj, kiuj

malamas la germanojn. Se ili troviĝas en Holando, ekzemple al tiuj mi diras: "ĉu do vi ne scias, ke same indonezoj malamas la holandanojn?"

Almenaŭ, koncerne min, se iam mi havos denove la okazon kontakti kun malnovaj SAT-anoj el Germanio, estas tute certe, ke tiam kun granda ĝojo kaj forta emocio mi premegos al ili la manojn...

**E. LANTI**

("Sennaciulo", septembro 1946)

# LETERO DE K-DO LANTI

Meksiko, la 13-10-1945

Karaj Gek-doj (Banje kaj Ge-Glodo)

Kiel vi povis sperti plurfoje, mi estas pli grumblema ol gratulema. Tamen, leginte viajn informojn pri SAT, nun mi vere sentas la deziron gratuli vin pro via fervoro kaj persisto, – kaj grumblas al mi mem, tial ke mi estis malpli fervorema kaj laborema ol vi. Sed eble vi min indulgos, eksciante, ke jam de preskaŭ kvin jaroj mi estas ekzilita el... **Esperantio**. Ĉi tie **ja** ne ekzistas esp-a vivo, malgraŭ tio, ke en Meksiko estas proksimume 20 esp-istoj. Sed neniam ili kunvenas. Kaj mi menciuj al vi fakton apenaŭ kredeblan: jam de kelkaj monatoj mi loĝas en la domo de S-ano Amaja, la eldonanto de **Renovigo**, kaj tamen mi tre malofte vidas lin kaj plejofte niaj interrilatoj estas skribaj. Nur kun K-do Jozefo Serano mi regule rilatas unufojon ĉiusemajne. De tempo al tempo mi ankaŭ renkontas S-anojn Azorin kaj Mangada, kiujn vi certe konas, almenaŭ nome. Sed tiaj renkontiĝoj neniel povas forigi ĉe mi la penson pri viaj kunvenoj kun multaj ĉeestantoj en la Laborborso Parisa. Kaj se mi aldiras, ke jam delonge mi ne plu havas sciigojn pri miaj korespondantoj el Germanio, Japanio, Sovetio kaj kelkaj aliaj landoj, vi certe komprenos,



kial mi havas fortan senton de ekziliteco kaj nepriskribeblan malamon al ĉio nacieca, tial ke la ekzisto de nacioj estas io nenormala en epoko, kiam oni povas ĉirkaŭveturi nian planedon en unu semajno...

Sed eble preferindas, ke mi konigu al vi mian nunan opinion pri la esp-a afero. Tuj mi konfesas al vi, ke kelkfoje okazis, ke mi demandis min: "Ĉu vere ci pravis, kiam, post la unua mondmilito, kiu jam devis esti la lasta per starigo de iu **Ligo de Nacioj**, ci kriis: "For la Neŭtralismon"?". Tiam mi naive pensis, ke la internaciistaj medioj konsistigas la plej fekundan grundon, kie povos abunde kreski la semoj de "internacia" lingvo. Logike ja tiel devus esti. Sed pli poste, sekve de miaj observoj kaj konstatoj, mi komprenis, ke, ĝenerale, la politikuloj kaj la sindikataj gvidistoj, konscie ĉe kelkaj el la plej lertaj kaj ruzaj, nekonscie ĉe la plimulto ne deziras, ke la simplaj anoj de iliaj organizoj havu rektan, senperan kontakton kun siaj samsortanoj eksterlandaj. La **internaciaj** kongresoj de la laboristaj organizoj iel similas la konferencojn de diversnaciaj registoj kaj diplomatoj. Kaj en la buĝeto de la laboristaj organizoj estas facile disponi monon por salajri tradukistojn.

Same naive la neŭtraluloj sin turnis al la **Ligo de Nacioj**, por sukcesigi la esp-an aferon. Ni ĉiuj devas konvinkiĝi, ke esp-o venkos nur per la esp-istoj mem aŭ neniam venkos...

Kaj nun ni supozu, ke nia lingvo jam venkis, t.e. ke ĝin uzas la ambasadoroj, konsuloj kaj similaj parazitoj tra la tuta mondo. Ĉu tio signifus la emancipiĝon de l' proletaro? Faktoj respondu mem tiun demandon. En ĉi tiu kontinento estas 19 nacioj "suverenaj", "sendependaj", "liberaj" kaj ĉefe

ĉifonulriĉaj – kun **komuna lingvo**, la hispana. Samlingveco sekve tute ne sufiĉas, por ke la popoloj unuiĝu, kunfandiĝu kaj starigu **justan** sociordon per forigo de ĉia paraziteco. El tio sekvas, ke la propagando por esp-o je neŭtrala, pure lingva vidpunkto estas ĉe proletoj misuzo de tempo kaj energio. Tial hodiaŭ, kiel antaŭ 25 jaroj, mi povus rekrii: "For la Neŭtralismon!".

Kaj nun mi starigas jenajn demandojn: 1) kial esp-o ne ankoraŭ venkis post 58 jaroj de propagando? – 2) kial ĝi ne mortis, kiel volapuk? Post longa cerbumado plurfoja mi respondas ilin jene: a) artefarita lingvo konsistigas ian revolucion en la lingvistiko; ĝia propagando kolizias kun la rutino, tradicio kaj eĉ kun la intereso de relative multaj personoj; b) esp-o ne mortis, tial ke ĝia aŭtoro ligis al ĝi specialan ideologion. Nu, malgraŭ la admiro, kiun mi havas por Zamenhof, tamen mi devas konfesi, ke la laborista klaso ne povas trovi en lia **homaranismo** solvon al la sociaj problemoj. Sekve, la esp-istoj laboristaj devas trovi alian ligilon idean.

Nu, ju pli mi cerbumas pri la demando, des pli mi konvinkiĝas, ke la internaciismo estas konservativa ideologio; mi eĉ emas diri **reakcia**, tial ke fakte ĝi estas tia, kiam la internaciistoj partoprenas kun la naciistoj batalojn kontraŭ la imperialismon. Necesas je ne malatenti la fakton, ke multaj el la nun ekzistantaj nacioj rezultas de imperialisma politiko. Prudon ja demonstris, ke Francio, ekz-e, konsistas el 12 naciecoj. Aliparte, estus facile pruvi per diplomataj dokumentoj, ke nacioj, kiel Belgio, Luksemburgo, Nederlando, Danio, Litovio, Latvio, Estonio k.a. ekzistas aŭ

ekzistis nur tial ke ili ludas rolon de ia bufro protekta al Britio.

Tiaokaze mi ne povas preterlasi la oportunun diri, ke ne mankas bonaj argumentoj, por pruvi, ke tiu lando portas la plej grandan respondecon en la okazigo de la lastdata militego. La britaj registoj timis, ke Francio fariĝu tro potenca sur la kontinento kaj tial permesis, ke, malgraŭ la Versaja kontrakto, Germanio rearmiĝu. Kaj por tiu celo Britio, kaj eĉ Usono, pruntedonis monon al Hitler...

La internaciismo, kiel ĝi nun estas praktikata de politikuloj, nur signifas iun artifikon por kontentigi kaj ekvilibrigi ilian regavidon reciproke. Klarigcele mi citu hispanan popoldiron: "**Preferindas esti kapo de muso ol vosto de leono**". Kaj mi menciuj konkretan ekz-on. Lastatempe la nova ambasadoro de Nikaragvio en Meksikio prezentis sian oficialigan leteron al la prezidanto de ĉi tiu lando. Okaze de tiu ceremonio ĵurnaloj publikigis la portreton de la du politikuloj kun flataj paroloj. Nu, kvankam mi ne vizitis Nikaragvion, tamen mi havis plurfoje la okazon ĉi tie legi pri la vivkondiĉoj de l' popolo en kiu 700 000-homa nacioto "suverena", "libera", "glora" ktp.: ili estas treege mizeraj. Kaj tamen antaŭ 14 jaroj, ĉiuj laŭdegis la batalon de generalo Sandino, por atingi, ke Nikaragvio estu plene suverena lando.

Hodiaŭ mi estas pli firme konvinkita ol kiam mi verkis la [Manifeston de la Sennaciistoj](#), ke la agitado por la suvereneco nacia estas trompo al la popolo, estas artifiko de regaviduloj. Nia maksimumo estu **KLAS- kaj ne nacibatalo!** Kaj paca povas esti klasbatalo. Se la laboristoj de iu industrio

strikus en la tuta mondo, ties mastroj devus cedi. Ni batalu por starigo de justa sociordo, kaj tiel estos nur kiam simpla kamparano povos ĝui la saman vivnivelon, kiel metiisto en urbo; kaj kiam enurba metiisto simpla ricevos la saman salajron, kiel inĝeniero. Tiam la diferenco de vivmaniero inter la homoj ne plu rezultos de iliaj enspezoj, sed de iliaj gustoj, emoj. Komprenoble neniam artisto organizos sian vivon, kiel faras, ekz-e, boksisto...

Ŝajne mi forgesis, ke mi skribas leteron kaj ne ĉapitron de tezo. Vi min indulgu, karaj Gek-doj! Sed vi certe komprenos, ke mia disertemo nuna ĉefe pruvas, ke mi konscias pri la respondeco, kiun vi elportas pro via SAT-gvidado. Mi deziras, ke vi komprenu, ke esp-o per si mem ne estas grava afero. Kio vere gravas, tio estas ĝia uzado. Se la sennacieca lingvo estus uzata nur por naciecaj, negocistaj kaj turistaj celoj, mi tiam certe dizertus el Esperantio.

En la vivo praktika pli utilas la scio de kelkaj frazoj ordinaraj el la lingvo parolata en la lando, kie oni troviĝas, ol funda scio de esp-o. Kaj la lernado de tiaj frazoj ne postulas tre longan tempon. Eĉ en Japanio mi fine povis iomete komprenigi min ĉe poŝtejo, restoracio kaj hotelo.

Kvankam tiu ĉi letero estas eble jam tro longa, mi tamen ne volas meti la finan punkton antaŭ ol diri, ke en Esperantio jam delonge troviĝas iaj politikuloj. Per tiu mia diro mi nun ĉefe aludas al la stariĝo de I.E.L. Konvinkita mi estas, ke la ekzisto de **internacieca** organizo signas etan simptomon de la malsano, kiu periode sangigas kaj suferigas la homaron. Tro longe mi devus skribi, por ke vi povu tute ĝuste kompreni mian penson. Nur mi diru, ke dum iuj el miaj

ekskursoj al Citero, antaŭ 26-27 jaroj, mi havis la okazon halti en la strato Kliŝi, kie sidis la **Esp-a Centra Oficejo** kaj tiam povis observi, ke la sennacieca organizo fondita de la memorinda kaj honorinda H. Hodler (mi aludas al U.E.A.) estis tie rigardata envie. Por iuj politikulecaj esp-istoj tute ne gravas ĉu la anoj de la asocio, kiun ili prezidas aŭ avidas prezidi, estas efektivaj espistoj. Por tiauloj ilia ĉefa celo estas havi kion eble plej da kotizpagantoj...

Tion mi diris, por ke vi neniam, nenial cedu, rilate al la nepra neceso konservi la **sennaciecan strukturon** de la Asocio, kiun vi nun gvidas. Kaj vi bonvolu ne konkludi el tiu mia diro, ke nia sennacieca organizo devas fariĝi sennaciista. Tute ne! Miaopinie, la sennaciisteco povas kaj devas rezulti nur de daŭra **praktikado** de esp-o en **sennacieca** kadro. Aliel la akcepto de la sennaciismo estus ĉe multaj SAT-anoj nur iu nova kredo. Kaj la Statuto de nia Asocio krias: **For la dogmoj!**

Vi scias, ke temperamente mi estas pesimista kaj ĉiam iom miras, kiam io bona sukcesas. Nu, en la epoko atombomba, kiun ni eniras, pesimisto povus starigi bone argumentitan tezon laŭ kiu la homaro pereos pro nekapablo adaptiĝi al kondiĉoj, kiujn ĝi mem kreis. La ekzisto de nacioj en nia epoko estas io absurda, arkaika. La racio postulas mondmastrumadon, malaperon de landlimoj. Aliel la tria mondmilito povus signifi la malaperon de nia planedo. Tio cetere ne gravus... al mi!

Sed optimisto ankaŭ povus argumenti, ke nova mondmilito ne okazos, tial ke la regnestroj, ministroj, ambasadoroj ks. ne plu havos la ŝancon, kiel ĝis nun, eviti la morton...

**E. LANTI**  
("La Kosmopolito", marto 1946)

# LETERO DE HEREZULO

Meksiko, 5-5-1946

Estimataj Gek-doj!

En la letero mia, kiun vi publikigis, mi rakontis, ke ĉi tie neniam la esp-istoj kunvenas. Nu, mi devas nun raporti, ke lastatempe ili kunvenis kaj mi mem **intence** forestis. Tiu kunveno okazis en tombejo, ĉe la enterigo de S-ano Julio Mangada. Jam delonge mi konigis mian opinion pri la malracieca kulto al kadavroj kaj sekve ne bezonas klarigi al vi la tialon de mia foresto. Sed konvenas, ke vi sciu, ke mi vizitis la hejmon de la mortinto la du lastajn tagojn de lia vivo. Tiam li estis jam senkonscia kaj mi do ne povis esprimi al li mian estimon kaj mian deziron, ke li resaniĝu.

Mi scias, ke kelkaj k-doj iom miris ĉe la ekscio, ke mi amikiĝis kun "generalo". Nu, ili pli bone komprenus la aferon, se ili scius, ke tiu amikiĝo estiĝis ĉe renkontiĝo en kunveno de kvakeroj. Kiel vi scias, mi estas scivolema pri ĉiuj ideologioj kaj sekve interesis min kontakti kiun homoj, kiuj rifuzas uzi armilojn kaj konsideras ĉian ajn militon fratmortiga.

Ĉe kvakeraj kunsidoj oni silentas, enpensiĝas, ĝis iu el la ĉeestantoj spertas dian inspiron, kaj tiam ekparolas.

Bedaŭrinde – aŭ feliĉe – neniam Dio – supozante, ke Ĝi ekzistas – favoris min per inspiro; kaj per la aŭdado kaj observado de "Die inspiritaj" parolantoj, mi akiris la konvinkon, ke tiam temas pri sugestiĝo. Tial mi ne povis konvertiĝi al la kvakerismo kaj jam de longe ne plu rilatas kun la ĉi tieaj kvakeroj, ĉefe pro tio, ke ili ne interesiĝas pri esp-o; sekve ilia menso restas saturita je nacieco, kiun mi abomenas...

Sed pli notinda estas la fakto, ke longdaŭra partopreno al la esp-a movado kaŭzis, ke maljuna militisto konvertiĝis al la kvakerismo, aŭ almenaŭ simpatiis al ĝi. Estas plia pruvo, ke... Hitler pravis!

Kredeble mi diris sufiĉe, por ke la "mirigitaj" K-doj povu ĝuste kompreni tiun strangan amikiĝon inter ĝismedola sennaciulo kaj generalo. Kaj ili krome devas scii, ke ĉiam mi sentis la saman malsimpation por marŝalo Peten, kiu lakeis al Hitler kiel por generalo Degool, kiu lakeis al Ĉerĉil kaj al Rusvelt.

Tamen mi havus motivon, por senti malpli da simpatio por la unua militisto ol por la dua. Kiam Peten regis en Francio, tiam mi povis per mia emerita salajro vivi etburĝe en Ĉilio kaj Meksikio, kie la vivnivelo de l' popolo estas tre malalta. Sed kiam lin anstataŭis Degool, tiam mi fariĝis proleto ĉi tie. Kaj, parenteze, kiel klarigi la fakton, ke de kiam en Francio regas komunistoj kaj socialistoj, de tiam mi estas mizerulo, kiu ne ankoraŭ malsatis ĝis nun, nur dank'al la monhelpo de S-anoj el Usono kaj Brazilio?...

Sed, kredeble, preferindas, ke vi sciu, ke sincere mi kondolencas al la familianoj de "generalo" Mangada, kaj ke



nun mi devas klopodi por varbi ties anstataŭanton por kunlaborado al nia **Plena Vortaro Ilustrita**. Al S-ano Mangada mi ja estis komisiinta la trakton pri vortoj, kiuj rilatas al ĉi tiu kontinento kaj kiuj mankas en la elĉerpita eldono de P.V. Nia verko ja devas havi tutmondecan karakteron kaj ne ĉefe eŭropecan.

Antaŭ ol meti la finan punkton al ĉi tiu letero, mi ne povas deteni min diri, ke la K-doj, kiujn mirigis mia amikeco por kvakerismema generalo, verŝajne ne malpli miros, kiam ili ekscios, ke jam de kelka tempo mi simpatias al la strategio de marŝalo Stalin. Sovetio ja povas esti kvazaŭ ponto inter Oriento kaj Okcidento. Kaj se la t.n. ruĝa armeo sukcesus unuigi Eŭropon, tiam mi vere ĝojus. Kompreneble, mi preferus, ke tiu unuiĝo okazu laŭ sennaciisma metodo paca; sed se ĝi povas okazi nur imperialisme, tiam neniel mi volus kontraŭi al tiu procedo. Kaj mi aplaŭdus la likvidiĝon de ĉiuj tronoj. Al mi estas io nekomprenebla, ke en Britio, ekz-e, daŭre estas tolerata la gereĝa paraziteco, kiam regas tie la laborpartio...

("Sennaciulo", novembro 1946)

**E. LANTI**

# LETERO AL K-DO G. VARINGJEN

Meksiko, 14-5-1946

Kara Amiko,

Jam de unu semajno mi ricevis vian leteron de la 28-4 kaj nur nun mi havas sufiĉe da tempo kaj energio, por ĝin mallonge respondi. Mi ja volus fari longan, detalan pledon pri la afero propranoma. Sed nun mi ne povas, kaj eble ne utilis. Nur mi starigu jenan demandon: ĉu decas, ke en verko enhavonta parton pri esperantigitaj nomoj propraj, ties kovrilo estu makulita per naciaĵo? Kaj vere stranga, miriga, al mi estas via diro ke "neniu franca leganto... retrovos mian nomon sub Varingjen". Ĉu do la P.V.I estos libro por francoj? Ne! milfoje ne, ĝi ne devas esti tia; ĝi devas taŭgi por ĉiuj esperantianoj. Kaj ne ĉiuj sciis, kiel elparoli la nomon "Waringhien". Kompreneble, se vi preferas, ke en Esperantio via nomo estu GWARDIHEJMO, nu, neniel mi kontraŭdirus al tio. En Francio, inter francoj, mia nomo estas ADAM, sed en Esperantio ĝi estas LANTI.

Via vidpunkto pri propraj nomoj signas al mi klare, ke vi estas ankoraŭ saturita je nacieco. Sed mi ne rajtas tro forte indigni, tial ke mi mem, dum kelkaj jaroj, subskribis "Lanty".

En 1937 (S-ulo dec. n<sup>o</sup>) mi jam skribis: "Respekto al la

nacia formo de sia propra nomo, tio estas signo pri konscia aŭ nekonscia naciismo. Propra nomo ja pensigas pri familio, kio estis la unua formo de patrio, pri regiono, lando, tradicio kaj ĉio cetera, kio premŝvebas super la popoloj kaj konsistigas la spiritan atmosferon, kiu ebligas militojn...". La artikolo, en kiu troviĝas tiu cito, estas subskribita NARAZU MONO (japane: **vagulo, sentaŭgulo**) kaj havas kiel titolon: "**Ne ankoraŭ ekzistas mondlingvo.**"

Jes ja, bedaŭrinde tiel estas kaj la L.K. kaj Akademio baraktas en kontraŭdiroj kaj sofismaj argumentoj koncerne la demandon pri propraj nomoj, tial ke ties anoj estas, konscie aŭ ne, ĉiuj naciistoj. En via letero al mi, aperinta en S.R. (junio 1939) vi ĝentile rimarkigis, ke mi estas senkompetenta en lingvaj aferoj kaj devus silenti tiurilate. Eble vi pravas en tiu opinio pri mi. Sed restas la fakto, ke mi estas ĝismedola esp-isto, kiu ne povas toleri, ekz-e, spertojn, kiel jenajn. Foje oni demandis min pri K-do "Boubou", elparolante bo-u-bo-u kaj mi respondis, ke lin mi ne konas. Tial en Esperantio la franco "Boubou" devas fariĝi BUBU, por ebligi interkompreniĝon. Alifoje mi estis prezentata al iu anglalingvano sub la nomo de la franco Adam, kaj tiam tiu angla s-ano demandis min: "Kiel sanas s-ano "Lente"?" . Lin mi ne konas, mi respondis, ne pensante, ke temas pri mi mem t.e. LANTI. El tiuj spertoj kaj multaj aliaj similaj mi akiris la firman konvinkon, ke la propraj nomoj devas esti esperantigataj, simile, kiel ili estas naciigataj. Ekz-e, franco scias, kiu urbo estas "Aix-la-Chapelle", hispano, kiu estas "Aquisgran", germano, kiu estas "Aachen", kaj same la esp-istoj havu nomon por tiu urbo: ĝi estu "Aĥen". Tiom longe,

kiom ne tiel estos, tiom longe ni blufe parolos pri ekzisto de mondlingvo; kaj tiom longe okazos similaj neinterkompreniĝoj, kiel tiuj, kiujn mi menciis. En Esperantio, la esp-istoj ĉiam parolu esp-e, t.e. prononcu la nomojn, kiel ili estas skribitaj. **La grafismo kaj la fonetismo plene harmoniu en nia lingvo.**

Per spertado mi akiris tiun konvinkon, same kiel antaŭe mi konvinkiĝis, ke perfekta interkompreniĝo per esp-o povas okazi nur se ties uzantoj lernas la signifon de la vortoj en la sama libro. Tial mi iniciatis la eldonon de P.V. kaj tiucele devis, dum almenaŭ ses monatoj, plede argumentadi kun Groĵan-Mopen, kiu komence opiniis la aferon utopieca, almenaŭ antaŭtempa kaj fiaskonta... Tamen la sperto pruvis, ke la senkompetenta, analfabeta, sendiploma ktp. Lanti tiurilate pravis en sia argumentado kontraŭ la Profesoro, Akademiano ktp. G.M. kun kiu, hontinde! mi devis paroli franclingve...

Viaj citoj el la verkaro de Devjatnin ne kontraŭdiras mian vidpunkton. Mi ne vivas en nuboj. Kvankam mi estas pli ol iam ajn antaŭe sennaciisto, tamen mi, ho ve! bone scias pri la ekzisto de nacioj, sekve, pri la neceso de pasporto, se mi volas migri ĉirkaŭ nia planedo. Mi scias, ke ne ekzistas multaj poŝtistoj esp-istaj kaj pro tio, bedaŭrinde, necesas uzi naciajn nomojn sur leterkovertoj ktp. Tial mi projektas, ke apud la esperantigotaj nomoj troviĝu per tute etaj literoj la nacia ortografio de tiuj nomoj. Kaj mi neniel intencas rezigni mian procedon uzi ludkubeton por decidi pri dubaj kazoj. Kaj mi ne havas la iluzion, ke nia Vortaro povos esti 2 000-paĝa, kiel la "Petit Larousse", kaj enhavi mapojn ktp. **Sed mi**

**celas montri la vojon, kiun devus laŭiri la esp-lstoj; mi volas liveri regulojn kiuj ĉesigos la kaoson nun reganta rilate la proprajn nomojn.**

En iu letero Banje raportis al mi, ke vi kaj li estas embarasataj pri la demando, kiun kvalifon aldoni al mia nomo. Sed neniam mi petis, ke mia nomo aperu, kiel kunaŭtoro de nia Vortaro. Nur mi diris al li, ke, konsidere mian mizeran situacion nunan, estus racie, ke mi ricevu honorarion. Se G.M. ankoraŭ vivus, li povus atesti, ke en la unua eldono de P.V. mia kunlaborado eble pli valoris ol tiu de Grenkamp. Tamen li enspezis honorarion kaj ne mi. Kaj tio pensigas min nun, ke la difinoj pri BOLŜEVISMO kaj FAŜISMO estas miaj. Multaj aliaj ankaŭ estas miaj. Nu, sufiĉe pri tio. Prefere mi diru, ke senhezite mi konsentas, ke la parto 3-a de la difino pri bolŝevismo estu forstrekata. Pri faŝismo mi opinias, ke la tuta difino devas esti aliigata. Ne urĝas nun kaj mi do proponos al vi pli poste novan tekston. Tre trafa ekz-o, kiu pruvas, ke ne ĉiuj vortoj konservas ĉiam la originan signifon...

Verdire, nun mi ne scias, kion respondi al via demando pri la radikoj Zamenhofaj. Almenaŭ mi tuj povas diri, ke ĉiuj vortoj troviĝantaj, ekz-e, en **La Biblio** devas ankaŭ esti en P.V.I. Sur mia ekz-o de P.V. mi notis plurajn el la mankantaj. Mi povos sendi al vi ties liston, se vi jam ne ricevis de alia s-ano.

Ĉio, kio simpligas, raciigas, havas mian aprobon. Tion mi jam diris al Azorin. Sed lin mi ankaŭ atentigis pri obstakloj kontraŭ kiuj la racia simpligo povas kolizii. Ekzemple, ĉu vi proponos, ke la oficiala vorto MATEMATIKO kun la nuna

signifo je scienco... aliĝu en MATEMATIKIO? Kaj ĉi-okaze mi rimarkas, ke en P.V. mankas la vorto MATEMATIKISTO, kiu fariĝus MATEMATIKO, analoge al BIOLOGO-BIOLOGIO, FIZIOLOGO-FIZIOLOGIO ktp... Ĉu tia aliigo ne vokus la indignon de la rabenecaj esp-istoj? Mi kredas, ke jes. Kaj tio starigas alian demandon: ĉu nia verko, en la nuna stato de la esp-a movado, havas ŝancon renversi la obstaklojn, kiujn mi aludis? Eble vi mem povus pli bone ol mi respondi tiun demandon. Almenaŭ, mi konsilas, ke antaŭ ol findecidi, ni akiru la konsenton de kiom eble plej da aŭtoritataj fakuloj.

Jam delonge mi mem uzas la formon ANARKISTO kaj ne "anarkiisto", tial ke la iumado tiklas malagrable mian aŭdorganon. Pro la sama motivo mi diras ALIEL kaj ne "aliiel", kiel kelkaj s-anoj nederlandaj. Kaj nun mi demandas: se oni decidas alpreni la sencon, kiun vi proponas, tiam oni devas logike diri: ANARKIO-ANARKO. Kun K-do Azorin, kiun mi renkontas ĉiudusemajne, mi jam havis la okazon iomete pridiskuti similajn demandojn kaj ĉiam konklude mi diris: **Ni faru ĉion eblan, por ke nia verko estu, kiom eble plej racieca. Sed ni ankaŭ ne malatentu la obstaklojn de la tradicio, aŭtoritato de Zamenhof ktp...**

Antaŭ kelka tempo mi ricevis leteron de NEERGAAR; nun li estas survoje al Usono, kie li restos dum 8 monatoj. Mi ĝojas, ke li fariĝis kunlaboranto.

Mi havas ankoraŭ multon por diri, sed ĉi tiu letero fariĝis jam pli longa ol mi projektis. Kaj nun mi rimarkas, ke mi ne rebatis unu el viaj diroj pri neceso de nacieca ortografio de propraj nomoj. Laŭ via argumentado, la nomo ADAM ekz-e

ne ebligas, ke oni distingu en la franca lingvo la unuan viron, de Dio – aŭ de Diablo – kreita, je Adam, franca skulptisto, je Adam, angla arkitekto, je Adam muzika komponisto, je Adam verkisto, je Adam verkistino ktp...

Kara amiko Gvardiĥejo, mi konsilas, ke vi ne malatentu vian subkonscian naciecon...

**E. Lanti**

# BUDAISMO

## Nuraj Ideoj

1. Ĉio originas en la menso. Same kiel magiisto lerte aperigas ion ajn, tiel same ĉi tiu mondo el iluzio originas en nia menso. Homoj rigardas super ĝi kaj rimarkas ĝiajn aperkaj malaperojn, kaj ili kredas tion reala kaj nomas ĝin vivo kaj morto. Tio estas, ke ĉio estas mensfarita kaj ne havas signifon ekster la menso.

Oni povas prezenti al si la homan menson funkcianta sur tri malsamaj niveloj de kono. Sur la plej malalta nivelo ĝi estas distinga menso; sur tiu nivelo ĝi havas la kapablon vidi, aŭdi, gusti, flari, tusi, kombini siajn sentumajn konceptojn, ilin distingi, kaj iliajn rilatojn pripensi. Sur pli alta nivelo ĝi estas intelekto; tie ĝi havas la kapablon fari enajn alĝustigojn, necesaj por harmoniigi la reagojn de la distinga menso kaj rilatigi ilin inter si kaj al iu tuta mi-koncepto. Sur la plej alta nivelo ĝi estas la Universala Menso. Kiel tia, ĝi estas pura, trankvila, senkondiĉa, en sia vera esenca naturo, sed pro ĝia rilato kun la pli malaltaj mensoj ĝi fariĝas la enmagazenigo de iliaj reagoj kaj estas per ili malpurigata.

\*



2. La homa menso distingas sin mem de la aĵoj, kiuj ŝajnas esti ekster ĝi mem, ne komprenante, ke ĝi unue kreis ilin. Tiel ĉiam okazis kaj la iluzio firme fiksiĝis en la menso kaj eĉ aliĝis al la aĵoj mem. Pro tiu distingo inter la memo kaj la nemo la menso ekkonsideris sin kiel mi-personecon kaj ligiĝis al ĝi, kiel estulo iom malsama kaj pli daŭra ol la aĵoj de l' mondo. Tiele, la homoj maturiĝas en la nescio pri la fakto, ke distingo kaj pendo de mempersoneco estas nur aktivoj de la universala menso.

La Universala Menso, dum ĝi restas pura kaj trankvila kaj senkondiĉa en sia mem-naturo, estas la fonto de ĉia mensa procezo kaj estas, tiel, la fundamento por la aliaj du mensoj kaj retenas en si mem ĉiujn iliajn spertojn. La Menso, tial, simile al akvofalo, neniam estas malaktiva. Ĝuste kiel kvietaj oceano subite fariĝas ia tumulto el ondoj pro la okaziĝo de ia ventego, simile la oceano de la Menso fariĝas ekscitata per la ŝtormoj el iluzio kaj la ventoj de la karmo<sup>[1]</sup>. Kaj ĝuste kiel la oceano denove kvietiĝas, kiam forpasis la ŝtormo, simile la Oceano de la Menso retrovas sian naturan trankvilon, kiam la ventoj el karmo kaj iluzio kvietiĝis.

\*

3. La korpo kaj ĝia medio estas samaj produktoj de iu menso, sed observitaj per homaj okuloj ili ŝajnas esti malsamaj kaj ili estas klasigitaj kiel "observanto" kaj "observataĵo".

Sed, ĉar nenio en la mondo ekzistas ekster la menso, tie ne povas esti esenca diferenco inter subjekto kaj objekto. La mi-

memo kaj la ideo pri posedo ne havas veran ekziston. Temas nur pri tre malnova kutimo el erara pensado, kiu kaŭzis, ke la homoj perceptas kaj distingas diversajn aspektojn de l' mondo, dum reale ekzistas nur unu. Ĉiuj objektoj, ĉiuj vortoj, ĉiuj faktoj en la mondo, ĉi tiu korpo, ĉi tiu trezoro, ĉi tiu loĝejo, estas ĉiuj ŝajnoj, kiuj ekaperis pro la iluziigoj, kiuj estas esencaj en iliaj propraj procedoj mensaj.

Se la homoj povus aliigi siajn vidpunktojn, povus detrui tiujn ĝisnunajn penskutimojn, povus liberigi sian menson el la deziroj kaj malsaĝigoj de la egoismo, tiam la saĝo de la vera elkleriĝo estus ebla. Se ili povus mem ekkompreni, ke ĉio estas nur aperigoj de ilia propra menso, se ili povus malebligi, ke ilia menso estu konfuzata per ŝajnoj kaj trompata per bildoj, tiam estus eble, ke ili akiru veran elkleriĝon. La elkleriĝo predikita de Budao estas la vera elkleriĝo. Ĝi okazas kaj povas nur okazi, kiam la menso estas senigita je ĉia malpuro kaj liberigita el ĉiuj malvirtaj ideoj rilatantaj la memon kaj ĝian medion.

\*

4. Tial la iluzia mondo kaj la mondo de elkleriĝo estas el la sama menso. La penado teni la menson senigita je distingaj ideoj, tiel ke ĝi povu ĝuste kompreni la veran naturon de elkleriĝo, por tiuj ĉiuj okazoj estas ĝustaj kaj ĉiuj lokoj estas en la Pura Lando de Budao.

Reale ĉiuj Buda-landoj estas destinitaj por esti feliĉigaj al la homoj, ĉar la homaj mensoj kaj la Buda-landoj estas ĉiuj el la sama naturo. Ĝi estas kiel domo konstruita sur bona

fundamento. Kie ajn vivas homoj, tie estas la Pura Lando de Budao. Sed la Lando de Budao devas esti elkonstruita per puraj mensoj. Ĝi devas esti la animo el kompatato kaj amo, ĝi devas observi la regulojn, ĝi devas esti pacienca kaj humila, ĝi devas esti fervora kaj persista, ĝi devas esti trankvila kaj serena, ĝi devas esti la animo el saĝo, same kiel la animo el kompatato, la animo, kiu fervore uzas saĝajn kaj bonfarajn rimedojn kaj metodojn por konduki ĉiujn homojn al elkleriĝo.

\*

5. Se la homoj volas fari ian Buda-landon el ĉi tiu mondo ili devas unue purigi sian propran menson. Se la mensoj estas puraj, la medioj estos puraj. Se la medioj estas senmakulaj kaj la mensoj puraj, ĉi tiu mondo estos domo por Budao. Tiam iu volos demandi, kial ĉi tiu mondo estas tiel plenigita per malpuraĵoj?

Blindulo ne povas vidi la sunon nek la lunon, sed tio ne estas motivo, por ke li ne la ekziston de la suno kaj de la luno. Kiam homoj havas malpuran menson, tiam ili estas blindaj rilate la veran naturon de la aferoj; ili ne povas vidi la puron, kiu ĉirkaŭas ilin ĉie en ĉi tiu mondo. Kiuj havas puran kaj diafanan menson, en tiuj estas okulo el saĝo, per kiu ili kapablas koni, eĉ en ĉi tiu mondo, la Puran Landon de Budao.

El "The Teaching of Buddha" (The Buddhist Bible) tradukis

**E. Ŭatisnem**

kiu tiras la atenton de la legontoj al la de li substrekita frazo en la parto 3-a. Se ili konsentos kun tiu aserto, ties logika konkludo estas, ke ĉi tiu traduko estas nur ŝajno kaj sekve nekritikebla.

## Piednotoj

1. [↑](#) Ago kaj ties laŭa rezulto.

## MI FARIĜAS IMPERIALISMEMA...

Ĉiu pripensema homo observkapabla ne povas malkonsenti jenon: ni eniras novan epokon, la atombomban, kaj nun la homaro staras ĉe ia vojkruciĝo, nome, rapida atingo de komforta vivo por ĉiuj homoj per tiucela uzado de maŝinoj, ĉiam pli kaj pli perfektaj, aŭ refalo en primitivan staton, pro nekapablo de la plimulto da homoj adaptiĝi al novaj vivkondiĉoj, kreaĵoj de la scienco kaj tekniko.

Sur nia planedo la distancoj **tempe** ne plu ekzistas, ĉar du homoj, loĝantaj antipode unu de la alia, povas tuj voĉe interrilatiĝi. Kaj por ke ili povu premi al si reciproke la manojn, sufiĉus nur duonsemajna flugado direkte unu al la alia.

Sed, malgraŭ tio, la homaro restas nacie dividita. Neniam antaŭe la landlimoj estis tiel malfacile transireblaj kiel nuntempe, tial ke multe pligrandiĝis la nombro da doganistoj kaj diversspecaj kontrolistoj pri en- kaj elmigrado.

Kaj estas plorinda fakto, ke, malgraŭ la promilita turmentado, la popoloj nun estas eĉ pli naciulecaj ol antaŭmilite. Oni eĉ povas konstati nemalofte, ke granda nombro da nacioj ne ankoraŭ akiris naciulecon, tial ke ili restas ĉefe saturitaj je provinceco aŭ regioneco. Tia estas la realaĵo...

Kioma ironio amara! antaŭ unu jarcento, Karlo Marks

vokis: "Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!". Kaj Zamenhof metis iliadisdone unuigan lingvon, duonjarcenton pli poste... Ĉe tiaj konstatoj, estus do trompi sin mem, se oni volus nepre kredi, ke la popolamasoj tendencas al starigo de socistato kongrua kun la teknika stato nuna. Precipe la esp-istoj povas facile kompreni la signifon de tiaj faktoj, ĉar ili ĉiutage spertas, ke ilia lingvo ne vekas intereson ĉe la grandega plimulto el la dupieduloj, kiuj konsistigas la paston, kiun knedas siaprofite diverspartiaj regaviduloj.

Sekve, sin trudas nepre la penso, ke nur la imperialismo povas unuige efiki. Tial mi ne ŝanceliĝas por diri, ekzemple, ke estus bone, se Usono unuigus ĉi tiun kontinenton per malaperigo de la entoj, kiujn oni nomas nacioj "liberaj", "sendependaj", "suverenaj", "gloraj", ktp. De tio malprofitus nur tre malmultnombraj politikuloj kaj profitus la tuta popolo trompita kaj ekspluatata.

Pri tio atestas historia fakto. Antaŭ unu jarcento, konkeris Usono preskaŭ la duonon de Meksikio tiama kaj en tiu konkerita parta la vivnivelo de l' popolo estas pli alta ol en la nekonkerita. Kaj mi povis ĉi tie, dum la lastaj jaroj, vidi proprokule milojn kaj milojn da meksikiaj braklaboristoj, kiuj vice atendadis dum semajnoj kaj eĉ dum tuta monato antaŭ ŝtatoficejoj, por tie ricevi la permeson forlasi "sian" patrion, dum limigata tempo, kaj iri en la apudan, t.e. en Usonon, kie ili enspezos por unu taglaboro pli grandan sumon ol por tuta semajno en "sia" lando...

Kaj nun ni ekrigardetu al Hindio, kie okazas vasta agitado por ties "liberigo". Necesas koni kaj ne malatenti la **fakton**, ke ne la tuta landego estas regata de britoj. Naŭdek tri

milionoj da hindoj estas "liberaj", ĉar ilin ekspluatas sampatriaĵaj princoj, kiuj vivas eĉ pli lukse ol la britaj gereĝoj. En tiuj princlandoj la mizero de l' popolo estas nepriskribebla. Nur mi diru, ke preskaŭ ĉiujare mortas tie pro malsato kelkcentmiloj da homoj.

Sed ni revenu al Meksikio, kie antaŭnelonge oni celebris la "patriaĵajn festojn", t.e. la datrevenon de la "nacia liberiĝo". Laŭ raportoj de ĉi tieaj gazetoj, neniam antaŭe regis tiom granda entuziasmo ĉe la popolamaso. Mi ja povis fari mem la malagrablan sperton, ke la nombro da raketoj eksplodigitaj, tage kaj nokte, estis nekalkulebla. Ŝajnas, ke la ĉifonvestitaj infanoj senhejmaj, kiuj vagas en la ĉefurbo, forgesis per tiu bruado sian malsaton kaj pro tio dume spertis ĝojon.

Almenaŭ tre notindaj estas pri tio la diroj de S-ino R.S. MALEN, kiun oni povas legi en la grava ĵurnalo "Excelsior", № de la 17-9-1946. Mi citu parteton:

"Ĉu la meksikia popolo havas nuntempe pli da motivoj, ol antaŭe por ĝojegi? Tute ne. Neniam en nia lando, kiel nun, vidiĝis tiom da riĉegaĵo luksa unuflanke kaj tiom da mizero aliflanke. La riĉaĵo nacia estas tiele disdonita, ke nur malmultaj ĝuas ĝin, dum la granda plimulto el la popolo spertas affliktiĝon kaj mizeron. Tiu kontrasto estas ĉiutage pli rimarkebla. Ĉiutage la malriĉo de la malriĉuloj kaj la riĉo de la riĉuloj estas pli grandaj..."

Ja tiel estas. Kaj tamen la popolo daŭre lasas sin trompi per bombastaj paroloj kaj ĉiam estas preta oferi sian vivon, por defendi alies interesojn.

Neniam mia situacio estis pli proleteca ol nun. Tial mi riskas diri, ke la proletaro, kiel tuto, ne konsistigas

progresigan faktoron en la procezo historia. Kiam, ekz-e, doganistoj aŭ arsenallaboristoj strikas por ricevi pli altan salajron tio neniel signifas tendencon al starigo de justa kaj paca sociordo en la mondo.

Pro tiaj konsideroj mi amare alvenas al la konkludo, ke la nura faktoro efike unuiga sur la socia kampo estas la imperialismo. Kaj tial mi nun emas krei "heil" Stalin! ĉe la penso, ke la ruĝa armeo eble unuigos Eŭropon, tie forbalaos la tronojn kaj tiam Sovetio fariĝos la ponto inter Okcidento kaj Oriento...

Oni ne rebatu, ke la malapero de nacioj, kie la arto kaj kulturo atingis altan gradon, estus bedaŭrinda. Al tio respondas tre signifa fakto historia: En la antikva epoko la Imperio Romana armile konkeris Grekion kaj poste estis arte kaj kulture konkerita de la grekoj. Kaj mi estas konvinkita, ke oni povas starigi bone dokumentitan tezon, laŭ kiu la disfalo de la Imperio Romana signis historie grandan malprogreson, kiun karakterizis la Mezepoko.

Kompreneble, mi mem ne volus aktive partopreni en la imperialisma procedo unuiga, tial ke mi kredas esti akirinta menson de mondcivitano per **praktikado** de esp-o kun homoj el ĉiuj mondpartoj. Kaj, kiel ano de **Sennacieca Asocio Tutmonda**, mi ĉiam celis ke tiu organizo estu la **embrio** de mondmastrumado.

Sed, malgraŭ la fakto, ke S.A.T. vivas jam de 25 jaroj kaj okazigos sian 20-an kongreson en Danio, proksiman jaron, estus iluzie kredi, ke ĝi jam provas efiki en la historia procezo. La malrapida disvastiĝo de esp-o pruvas, ke la proletaro restas inerta elemento netaŭga por starigo de



mondpaco laŭ SAT-anea metodo; tial mi nun emas al la sendube dieca imperialismo...

**E. LANTI**

Meksiko, 26-9-1946

("Sennaciuo", februaro 1947)

**Komento de K-do VALO:** Koncerne imperialismon, inteligentaj legantoj scios interpreti la Lantian "heil Stalin!", kaj komprenos, ke tio estas manifestaĵo de la Lantia inklino al paradokso, kaj maniero vipi la inertecon de la proletaj amasoj: "se vi ne estas kapablaj memstare unuiĝi, nu do, venu imperialista despoto, kiu perforte unuigos vin". Simile oni dirus: "vi molaj dormemuloj, vi estas maturaj, por ke diktatoro veku vin per batoj". Eble, se tiu letero aperus izolite, iuj povus erari pri ĝia vera signifo, sed en la kunteksto de aliaj, neniu kredus, ke Lanti sincere deziris la regadon de Stalin aŭ de iu alia tirano sur tuta Eŭropo. Cetere oni scias, kion li opiniis pri la "patro de l' popoloj" kaj lia kremla kliko.

# About this digital edition

This e-book comes from the online library [Wikisource](#)<sup>[1]</sup>. This multilingual digital library, built by volunteers, is committed to developing a free accessible collection of publications of every kind: novels, poems, magazines, letters...

We distribute our books for free, starting from works not copyrighted or published under a free license. You are free to use our e-books for any purpose (including commercial exploitation), under the terms of the [Creative Commons Attribution-ShareAlike 3.0 Unported](#)<sup>[2]</sup> license or, at your choice, those of the [GNU FDL](#)<sup>[3]</sup>.

Wikisource is constantly looking for new members. During the realization of this book, it's possible that we made some errors. You can report them at [this page](#)<sup>[4]</sup>.

The following users contributed to this book:

- Wierzbowski
- Pauchjo
- Frglz

1. [↑ http://wikisource.org](http://wikisource.org)
2. [↑ http://www.creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0](http://www.creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0)
3. [↑ http://www.gnu.org/copyleft/fdl.html](http://www.gnu.org/copyleft/fdl.html)
4. [↑ http://wikisource.org/wiki/Wikisource:Scriptorium](http://wikisource.org/wiki/Wikisource:Scriptorium)